# BAZOJ

# DE LA BIBLIO

LERNA HELPLIBRO

## MALKOVRANTA LA ĜOJON KAJ MONDON DE VERA KRISTANISMO

**DANKAN HISTER**

Christadelphian Advancement Trust
49 The Woodfields, South Croydon
Surrey CR2 0HJ ENGLAND
Registered Charity No: 1014615

La unua eldono de *Bazoj de la Biblio* aperis anglalingve en la 1992

Esperantigis Nina Zueva en la 2003

Kontrolita de Ernesto Batey kaj David Budden

***ISBN 81-87409-19-3***

*Bazoj de la Biblio* ankaŭ estas en la lingvoj: Albana, Araba, Armena, Kartvela, Hebrea, Hinda, Japana, Kazaĥa, Korea, Litova, Makedona, Pola, Portugala, Rusa, Serba-Kroata, Hispana, Tagaloga

La tekston en la angla kaj en multaj aliaj menciitaj lingvoj vi povas trovi en

www.carelinks.net

Tiujn ĉi publikigitajn projektojn eblas akiri ĉe :

The Christadelphian Advancement Trust
49 The Woodfields
South Croydon
Surrey CR2 0HJ
England
Registered Charity No. 1014615

Ĉe la sama adreso vi povas ricevi pli detalan informon pri supremenciitaj eldonaĵoj kaj senpagan ekzempleron. Specialajn demandojn sendu al la eldonanto aŭ:

**info@carelinks.net**

# ENKONDUKO

Ĉiu homo, jam komencante kredi je la ekzisto de Dio, kaj agnoskante, ke la Biblio estas Lia revelacio al homoj, bezonas seriozan studon de ĝia baza mesaĝo. Tamen multaj homoj, nomantaj sin "kristanoj", malatentas tion kaj limigas sin je dimanĉa tralego de kelkaj versoj el la Nova Testamento. La Biblio ĉe ili troviĝas ie en la hejmo, malofte malkovrata; eble ili malklare memoras el ĝi kelkajn rakontojn. Ne estas mirinde, ke en la vivo kaj la konscio de la homoj kun tia rilato al la Vorto de Dio, estas granda konfuzo kaj malcerteco.

Aliflanke, estas tiuj, kiuj, havante nur malgrandan scion pri la kristanismo, decidis ekkompreni la mesaĝon de la Biblio. Bedaŭrinde, ili ofte renkontas sur sia vojo tiajn interpretistojn de ĝi, kiuj esprimas siajn proprajn doktrinojn kaj filozofiajn konceptojn, ne respegulantan la veran esencon de la Sankta Skribo.

La celo de tiu ĉi libro estas praktika analizo de la Sankta Skribo en difinita sinsekvo. Tiu ĉi libro estas rekomendita por legado, kiel ordinara libro por plivastigi sian scion pri la Biblio. Ĝi ankaŭ povas esti uzata kiel helplibro por korespondaj kursoj. Respondoj al la demandoj, donitaj ĉe la fino de ĉiu ĉapitro, estas sendeblaj al la adreso indikita pli malsupre. Viaj respondoj estos transdonitaj al persona instruisto, kiu poste korespondos kun vi dum vi progresos tra la kurso. Povas esti, ke iuj legantoj ne volos respondi al la demandoj, preferante fari mem demandojn pri malklaraĵoj, aŭ pri aferoj, pri kiuj ili malkonsentas. Ankaŭ ĉi-okaze sendu viajn leterojn al la adreso, indikita pli malsupre – al ili estos donitaj personaj respondoj. La korespondado povas esti en esperanto, en la angla aŭ en la rusa lingvo.

La aŭtoro estas konvinkita, ke la mesaĝo de la Biblio estas tute komprenebla por ĉiu homo. Tamen en tiu ĉi libro povas esti iuj lokoj kaj temoj, kiuj ekstere povas diferenci de la ĝenerale akceptita interpreto de la Sankta Skribo. Kelkaj el ili, kune kun aliaj temoj de la Evangelio, kiuj eble interesos nur kelkajn legantojn, estas diskutataj en la "Komentoj", lokitaj ĉe la fino de ĉiu ĉapitro. Ni opinias, ke la baza mesaĝo de la Biblio estos komprenebla sen tralego de la "Komentoj", sed povas esti, ke iuj studantoj tralegos pli grandan parton da ili. La citaĵoj en tiu ĉi libro estas prenitaj el la Sankta Biblio, eldonita esperantlingve fare de Brita Biblia Societo kaj Nacia Biblia Societo de Skotlando (1984).

Mi esprimas sinceran dankon al multaj homoj, kiuj kunhelpis min prepari tiun ĉi libron. Precipe mi estas danka al Klajv Rivers pro lia bonega serio da disponigitaj fotoj, kaj ankaŭ al ĉiuj tiuj, kiuj esprimis siajn komentojn pri malnetaj materialoj de la libro. Mi ankaŭ esprimas mian apartan dankon al tiuj centoj da homoj, loĝantoj en Afriko, Vest-Hindio, Filipinoj kaj Orienta Eŭropo, kiuj per siaj demandoj kaj dezirego scii la veron, konstante helpis al mi pense koncentriĝi por skribi la "Bazoj de la Biblio"-n. Demandoj pridiskutitaj de diversaj vidpunktoj donis al respondoj belecon kaj klarecon. En superplenaj takseoj, sur malkovritaj platformoj kaj en kameonoj, en konferenc-salonoj, sur balkonoj de sufokaj hoteloj kaj en arbaraj loĝlokoj, sub la lumo de steloj estis diskutataj kaj disputataj tiuj ĉi temoj kaj ili elvokadis entuziasmon ĉe studantoj de la Biblio, de ĉiaj vivniveloj. Miaj kristadelfianaj fratoj, kun kiuj mi havis plezuron labori pri la libro, estis por mi ĉiama fonto de fortoj kaj inspiro. La enhavo de multaj el la "Komentoj" estis detale pridiskutata inter ni en hotelĉambroj post longaj kunsidoj kun studantoj de la Biblia korespondkurso. La kunuleco kaj amikeco, kiuj devenas de ĉi tiuj doktrinoj de Biblia vereco, estas vere nesuperigitaj en la homa travivo. Do, al ĉiuj tiuj "miaj kunlaborantoj por la regno de Dio"

mi pagas mian tributon, esperante, ke tiu ĉi libro helpos al ili eldoni la veran Evangelion "por ĉiuj popoloj". Ekkono de la fakta vero de la Evangelio, formulita sur la paĝoj de la Biblio, bonefike influas al ĉiuj flankoj de nia vivo. Aliĝo al la Vorto de Dio kondukas al tio, ke viroj kaj virinoj en la tuta mondo gloras Dion nun kaj gloros Lin en ĉiuj tempoj, kiel Li kaj volis tion. Ĉiu, kiu trovos la veron, trovos por si "perlaĵon de granda valoro" kaj ekscios por si la senton de Jeremia: "Kiam mi trovis Viajn vortojn, mi ilin englutis; kaj Via vorto fariĝis mia ĝojo kaj gajeco de mia koro" (Jer 15:16). Por atingi tion, nepre ne neglektu preĝi al Dio pri helpo por kompreni la Vorton antaŭ ol vi komencos studi la skribitajn pli malsupre ĉapitrojn. "Kaj nun mi vin rekomendas al Dio kaj al la vorto de Lia graco, kiu povas edifi kaj doni al vi la heredon inter ĉiuj sanktigitoj" (Agoj 20:32).

D. H.

## Mallongigoj

### Libroj de la Malnova Testamento :

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Gen | - | Genezo | Sent | - | Sentencoj |
| El | - | Eliro | Pred | - | Predikanto |
| Lev | - | Levidoj | Jes | - | Jesaja |
| Nom | - | Nombroj | Jer | - | Jeremia |
| Read | - | Readmono | Jeĥ | - | Jeĥezkel |
| Jos | - | Josuo | Dan | - | Daniel |
| Juĝ | - | Juĝistoj | Hoŝ | - | Hoŝea |
| 1 Sam | - | 1 Samuel | Am | - | Amos |
| 2 Sam | - | 2 Samuel | Miĥ | - | Miĥa |
| 1 Reĝ | - | 1 Reĝoj | Naĥ | - | Naĥum |
| 2 Reĝ | - | 2 Reĝoj | Ĥab | - | Ĥabakuk |
| 1 Kron | - | 1 Kroniko | Cef | - | Cefanja |
| 2 Kron | - | 2 Kroniko | Ĥag | - | Ĥagaj |
| Neĥ | - | Neĥemja | Zeĥ | - | Zeĥarja |
| Ps | - | Psalmaro | Mal | - | Malaĥi |

### Libroj de la Nova Testamento :

| | | | | | |
|---|---|---|---|---|---|
| Mt | - | S. Mateo | 1 Tes | - | 1 Tesalonikanoj |
| Mk | - | S. Marko | 2 Tes | - | 2 Tesalonikanoj |
| Lk | - | S. Luko | 1 Tim | - | 1 Timoteo |
| Joh | - | S. Johano | 2 Tim | - | 2 Timoteo |
| Ag | - | La Agoj | Tit | - | Al Tito |
| Rom | - | Al la Romanoj | Jak | - | De Jakobo |
| 1 Kor | - | 1 Korintanoj | Heb | - | Al la Hebreoj |
| 2 Kor | - | 2 Korintanoj | 1 Pet | - | 1 Petro |
| Gal | - | Al la Galatoj | 2 Pet | - | 2 Petro |
| Ef | - | Al la Efesanoj | 1 Joh | - | 1 Johano |
| Fil | - | Al la Filipianoj | 2 Joh | - | 2 Johano |
| Kol | - | Al la Koloseanoj | Ap | - | Apokalipso |

La demandoj, donitaj ĉe la fino de ĉiu ĉapitro, estas duspecaj:

Elekto el grupo da respondoj (vi devas elekti unu el nomitaj respondoj kiel ĝusta respondo al demando)
Kaj ordinaraj demandoj, kiuj bezonas kelkajn propoziciojn por respondo.

Viajn respondojn skribu sur aparta paperfolio, ne forgesante dum tio klare indiki Vian familian nomon, nomon, kaj adreson.

Viajn respondojn Vi povas sendi al la adreso:

**49 The Woodfields, South Croydon**
**Surrey CR2 0HJ ENGLAND**

# BAZOJ DE LA BIBLIO

## ENHAVO

### *PARTO 1*

### Bonanoncanta pri la Regno de Dio


Paĝo

**Enkonduko** ---------------------------------------------------------

**Ĉapitro 1: Dio** --------------------------------------------------

1.1 La ekzisto de Dio
1.2 La personeco de Dio
1.3 La nomo kaj karaktero de Dio
1.4 La anĝeloj
Komento 1: "Dio estas Spirito"
Komento 2: La uzado de la Dia nomo
Komento 3: Elmontro de Dio

**Ĉapitro 2**: La Spirito de Dio -------------------------------------

2.1 Difino
2.2 Inspiriteco
2.3 Donacoj de la Sankta Spirito
2.4 La elpreno de la donacoj
2.5 La Biblio - la ununura aŭtoritato
Komento 4: Ĉu la Sankta Spirito estas persono?
Komento 5: La principo de personigo
Komento 6: Kalvinismo
Komento 7: "Kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito"
Komento 8: "Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn"

**Ĉapitro 3:** La promesoj de Dio ------------------------------------

3.1 Enkonduko
3.2 La promeso en Edeno
3.3 La promeso al Noa
3.4 La promeso al Abraham
3.5 La promeso al David

Komento 9: Nova tero kaj nova ĉielo
Komento 10: La pretendoj de "Brita Izraelismo"

**Ĉapitro 4:** Dio kaj morto ------------------------------------------
4.1 La naturo de homo
4.2 La animo
4.3 La Spirito de homo
4.4 Morto estas senkonscia stato
4.5 La releviĝo
4.6 La juĝo
4.7 La loko de rekompenco: ĉielo aŭ tero?
4.8 Respondeco antaŭ Dio
4.9 Infero
Komento 11: Purigejo
Komento 12: Fantomoj kaj metempsikozo
Komento 13: Naturo de nia resurekto
Komento 14: La suprenkapto

**Ĉapitro 5:** La Regno de Dio ----------------------------------------
5.1 Difino de la Regno
5.2 La Regno nun ne estas establita
5.3 La Regno de Dio en la pasinteco
5.4 La Regno de Dio en la estonteco
5.5 La Jarmilo
Komento 15: La laŭlitereco de la Regno
Komento 16: Ĝeneraligo de la historio de Izrael

**Ĉapitro 6:** Dio kaj malbono ---------------------------------------------
6.1 Dio kaj malbono
6.2 La diablo kaj satano
6.3 Demonoj
Komento 17: Sorĉo
Komento 18: Kio okazis en Edeno?
Komento 19: Lucifer
Komento 20: Tentoj de Jesuo
Komento 21: "Milito en la ĉielo"

## *PARTO 2*

### "Predikanta ... pri la nomo de Jesuo Kristo"
### (Agoj 8:12)


**Ĉapitro 7:** La origino de Jesuo ------------------------------------
7.1 Profetaĵoj de la Malnova Testamento pri Jesuo
7.2 Naskita de la virgulino
7.3 La loko de Kristo en la plano de Dio
7.4 "En la komenco estis la vorto"
Komento 22: Jesuo en la historio
Komento 23: "Mi malsupreniris de la ĉielo"
Komento 24: Ĉu kreis Jesuo la teron?
Komento 25: "Antaŭ ol naskiĝis Abraham, mi ekzistas"
Komento 26: Melkicedek

**Ĉapitro 8**: La naturo de Jesuo --------------------------------------
8.1 Enkonduko
8.2 Diferencoj inter Dio kaj Jesuo
8.3 La naturo de Jesuo
8.4 La homeco de Jesuo
*8.5* La interrilatoj de Dio kun Jesuo
Komento 27: "Estante en la formo de Dio"

**Ĉapitro 9**: La misio de Jesuo ----------------------------------------
9.1 La venko de Jesuo
9.2 La sango de Jesuo
9.3 Oferdono pro ni kaj si mem
9.4 Jesuo kiel nia reprezentanto
9.5 Jesuo kaj la leĝo de Moseo
9.6 Sabato
Komento 28: La krucifikso
Komento 29: Ĉu Jesuo naskiĝis la 25-an de decembro?

**Ĉapitro 10:** Bapto je Jesuo ------------------------------------------
10.1 La vivgrava bezono de baptiĝo
10.2 Rito de bapto
10.3 La signifo de baptiĝo
10.4 Baptiĝo kaj savo
Komento 30: Rebaptiĝo
Komento 31: Kion necesas scii antaŭ baptiĝo?

Komento 32: La krimulo sur la kruco
Komento 33: Kiel okazigi bapton?

**Ĉapitro 11:** Vivo en Kristo --------------------------------------------
11.1 Enkonduko
11.2 Sankteco
11.2.1 Perforto
11.2.2 Politiko
11.2.3 Mondaj plezuroj
11.3 Ĉiutaga kristana vivo
11.3.1 Studado de la Biblio
11.3.2 Preĝo
11.3.3 Predikado
11.3.4 Eklezia vivo
11.3.5 Dispecigo de pano
11.4 Geedzeco
11.5 Interkomunikado
Suplemento 1: Resumo de bazaj bibliaj doktrinoj ------------------
Suplemento 2: Nia rilato al studo de biblia vero -------------------
Suplemento 3: La baldaûa reveno de Kristo ------------------------
Suplemento 4: La justeco de Dio ------------------------------------

--------------------------------------------------------------------------------

# PARTO 1

# DIO

## 1.1 LA EKZISTO DE DIO

“Necese estas, ke tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke Li ekzistas, kaj ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas” (Heb 11:6).

La celo de tiu ĉi helplibro estas helpi al tiuj homoj, kiuj volas alveni al Dio kaj jam kredas “ke Li ekzistas”. Tial, ni ne haltos tie ĉi por konsideri demandojn, kiuj plifortigas la veron je Lia ekzisto. Studante la malsimplan strukturon de niaj korpoj (vidu Ps 139:14), admirante pri mirinda koloro de floreto, rigardante en la senliman foron de la ĉielo dum klara nokto, pensante pri tio kaj ankaŭ pri la sennombra abundeco de aliaj elaperigoj de la vivo, oni nevole ignoras ĉiun penson pri ateismo. Pli malfacile estas ekkredi je malesto de Dio, ol pleniĝi de profunda kredo je Lia ekzisto, ĉar sen Dio ne estus ordo, celo, senco kaj plena eksplikо de ĉio, kio okazas en la universo. Ĉio tio, sendube, trovas respegulon en la vivo de homo, kiu nomas sin ateisto. Lige kun tio iĝas kompreneble, kial la plimulto da homoj allasas eblecon de la ekzisto de Dio, kvankam vivas en socio, kie dominas materialismo.

Tamen, estas grava diferenco inter malklara imago pri la ekzisto de iu supera forto kaj firma konvinko pri tio, ke Li rekompencas homojn pro ilia fidela servo al Li. La verso Heb 11:6 tiel diras pri tio:

> “Sen fido, neeble estas plaĉi al Li; ĉar necese estas, ke tiu, kiu alvenas al Dio, kredu, ke Li ekzistas
>
> **KAJ**
>
> ke Li fariĝas rekompencanto al tiuj, kiuj Lin diligente serĉas”.

En la Biblio estas multe da lokoj pri la historio de la Dia popolo, Izraelo. Plurfoje estas substrekite, ke ĝi agnoskis la ekziston de Dio, sed ne kredis je la promesoj de Dio. Granda gvidanto de la Izraela popolo, Moseo, diradis al ĝi: “Sciu do nun kaj enmetu en vian koron, ke la Eternulo estas Dio en la ĉielo supre kaj sur la tero malsupre; ne ekzistas alia. Kaj observu Liajn leĝojn kaj Liajn ordonojn” (Read 4: 39-40).

La sama averto rilatas al ni: agnoski la ekziston de Dio ne signifas, ke Dio aŭtomate akceptas nin. Se ni sincere kredas ja la ekzisto de nia Kreinto, ni devas “observi Liajn leĝojn kaj Liajn ordonojn”. Tial en pli malsupre donitaj ĉapitroj estas klarigo, kion signifas tiuj ĉi leĝoj kaj ordonoj kaj kiel observi ilin.

Laû nia ellerno de la Sankta Skribo, por trovi necesajn respondojn, kreskas nia kredo je la ekzisto de Dio: "La fido venas do per aûdado, kaj aûdado per la Vorto de Kristo" (Rom 10:17). Same Jes 43:9-13 montras, kiel komprenado de la Diaj antaûdiraĵoj pri estontaj aferoj sciigas nin, ke "Mi estas Dio. De la komenco de la tempo Mi estas la sama" (Jes 43:12-13) - t. e. la vera Lia nomo estas "Mi estas, kiu estas", la Eternulo (El 3:14).

La apostolo Paûlo venis en la urbon Berea, kiu situas nune en Norda Grekio. Kiel ĉiam li predikis la Evangelion ("bonajn novaĵojn") de Dio, tamen homoj ne nur akceptis la vorton de Paûlo, sed "ili akceptis la vorton (de Dio, ne de Paûlo) kun plena fervoro, kaj ĉiutage esploris la Skribojn por konstati, ĉu tiuj aferoj estas veraj kaj tial multaj el ili kredis" (Agoj 17:11-12). Ilia vera kredo venis al ili, ne kiel subita Dia influo, simila al spirita operacio pri la koro, senrespektive al la Vorto de Dio. Ilia kredo estis la rezulto de senantaûjuĝa, regula ("ĉiutage") kaj laûsistema ("ĉu tiuj aferoj estas veraj?") analizo de la Biblio. Kiel, do, povas homoj, ĉeestinte unu kunvenon emocian, reveni reen kiel "kredantoj"? Kiel multe da ĉiutagaj studoj de la Sankta Skribo havis ili ĉi-okaze? Tia kredo, ne bazita sur la Biblio, sendube elvokas senrevon, kiun trovas en si multaj novkredantoj dum la posta vivo, kaj pro tio multe da homoj forlasas la evangelian movadon.

La celo de tiu ĉi studkurso estas doni gvidlibron por via memstara sistemeca studado de la Sankta Skribo, kiu helpos al vi atingi la veran kredon.

La ligo inter la vera Evangelio kaj vera kredo estas ofte substrekita en la Evangeliaj predikoj:

> "Kaj multaj korintanoj, aûdinte, kredis kaj baptiĝis" (Ag 18:8).
>
> "La nacianoj aûdu la vorton de la evangelio kaj kredu" (Ag 15:7).
>
> "Ĉu do mi, ĉu ili, tiel ni predikas, kaj tiel vi kredis" (1 Kor 15:11).
> En la parabolo pri la semisto, la "semo" prezentas la vorton de Dio, kaj aliloke Jesuo instruas: "Se vi havus fidon kiel semeron de sinapo, vi dirus al ĉi tiu morusarbo: Estu elradikigita kaj estu plantita en la maron; kaj ĝi obeus al vi" (Lk 8:11; 17:6).
>
> "La afero estas proksime de vi, en via buŝo kaj en via koro; tio estas, la vorto de fido, kiun ni predikas" (Rom 10:8).
>
> "Bona servanto de Kristo Jesuo, nutrita per la vortoj de la fido kaj de la bona doktrino, kiun vi jam sekvis" (1Tim 4:6).

"Ĉar al ni ankaŭ estas evangelio anoncita tiel same, kiel al ili; sed al ili la aŭdita parolo ne utilis, ne miksite kun fido ĉe la aŭdantoj" (Heb 4:2).
La apostolo Johano en la priskribo de la vivo de nia Sinjoro diris: "... kaj li scias, ke li diras la veron, ke vi ankaŭ kredu" (Joh 19:35). Kaj ankaŭ "Via vorto estas vero" (Joh 17:17). Do, la vorto de Dio estas vero, kiun ni devas kredi.

## 1.2 LA PERSONECO DE DIO

Estas mirinde, ke Dio montras al ni Sian ekziston, kiel realan estaĵon. Kaj fundamenta dogmo de kristanismo estas tio, ke Jesuo estas la filo de Dio. Se Dio ne estas reala estaĵo, ne eblas al Li havi filon, kiu estus "plena bildo de Lia substanco" (Heb 1:3). Krome, estas malfacile havi personan, vivantan interrilaton kun "Dio", se "Dio" estas nur mensa koncepto, ia maldensaĵo ie en la kosmo. Estas tragedie, ke la plimulto da religioj havas tiun koncepton pri nereala, nepersona Dio.

Dio estas tiom senlime granda kompare kun ni, ke estas malfacile por homoj havi kredon je plenumiĝo de klaraj promesoj pri tio, ke ni ekvidos Dion. Tia kredo venas dank` al konado de Dio, al kredo je Lia vorto:

"Feliĉaj estas la kore puraj, ĉar ili vidos Dion" (Mat 5:8).

"Rigardu, kian amon la Patro donis al ni, ke ni estas nomataj infanoj de Dio; kaj tiaj ni estas (eĉ nun). ... Amataj, nun ni estas infanoj de Dio, kaj ankoraŭ ne elmontriĝis, kio ni estos. Ni scias, ke se li elmontriĝos, ni estos similaj al li; ĉar ni vidos lin, kiel li estas" (1 Joh 3:1,2).

"Kaj Liaj servistoj Lin adoros, kaj ili vidos Lian vizaĝon; kaj Lia nomo estos sur ilia frunto" (Ap 22:3,4).

Tia mirinda espero, se nur ni sincere kredos je ĝi, grave influos al nia vivo:
"Serĉu pacon kun ĉiuj, kaj la sanktigon, sen kiu neniu vidos la Sinjoron" (Heb 12:14).

"Ni vidos lin, kiel li estas. Kaj ĉiu, kiu havas ĉi tiun esperon rilate lin, sin sanktigas tiel same, kiel li estas sankta" (1 Joh 3:2,3).

En tiu ĉi vivo nia kompreno pri la Ĉiela Patro estas tre nekompleta, sed en la profunda mallumo de nia vivo ni havas esperon, ke finfine ni renkontos Lin.

El la senlima profundo de homa suferado Ijob povis ekĝoji pri la plene persona interrilato kun Dio, kiun li plene konos en la lasta tago:

> "Kaj post kiam mia haûto estos tiel detruita kaj mi estos senkorpa, mi vidos Dion; Lin vidos mi, kaj miaj okuloj vidos, ne fremdaj" (Ijob 19:26,27).

Kaj la apostolo Paûlo ekkriis el alia vivo de doloro kaj tumulto: "Nun ni vidas per spegulo, malhele; sed tiam okulon ĉe okulo" (1 Kor 13:12).

**Atesto De La Malnova Testamento**

Ĉi tiuj promesoj de la Nova Testamento estas bazitaj sur multaj atestoj de la Malnova Testamento pri persona Dio. Sen trograndigo oni povas diri, ke tre gravas scii la naturon de Dio por havi veran komprenon de la religio, bazita sur Biblia doktrino. La Malnova Testamento diras pri Dio, kiel pri reala persono. La persona interrilato kun Dio, pri kiu diras kaj la Malnova kaj la Nova Testamentoj, estas unika al la vera kristana espero. La donitaj pli malsupre ekzemploj konfirmas la ekziston de persona Dio.

> "Kaj Dio diris: Ni kreu homon laû Nia bildo, similan al Ni" (Gen 1:26).

Do, la homo estas kreita laû la bildo kaj simileco de Dio, kiel tio estas evidentigite per la anĝeloj. Jak 3:9 diras pri homoj, faritaj "laû la bildo de Dio". Tiu fakto, ke ni estas kreitaj laû la bildo de Dio, nedusence signifas, ke ni povas havi konkludon pri tiu reala objekto, al kiu ni mem similas. Kaj Dio, kiun ni respegulas, ne estas iu malklara estaĵo, kiun ni ne povas imagi al si.

"Li scias nian esencon" (Ps 103:14). Li volas, ke ni sciu pri Li, kiel pri reala persono, kiel pri Patro, kun kiu ni povas interrilati.

Priskribo de loko, kie Dio estadas, montras, ke Dio havas Sian personan loĝlokon: "Dio estas en la ĉielo" (Pred 5:2). "Li rigardis malsupren el Sia sankta altaĵo, el la ĉielo la Eternulo direktis rigardon al la tero" (Ps 102:19). "Vi aûskultu en la ĉielo, en la loko de Via loĝado" (1 Reĝ 8:39). Kaj ankoraû pli karaktere estas, ke Dio havas "tronon" (Ps 11:4; Jes 6:1; 66:1). Malfacile estas apliki tiujn ĉi eldiraĵojn al io nedifinita, estanta ie en la ĉiela vasteco.

Jes 45 estas plenigita per revelacioj de Dio pri Sia partopreno en la aferoj de homoj:

> "Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas alia"
> "Mi, la Eternulo, faris ĉion ĉi tion"
> "Mi, la Eternulo, tion kreis"

“Ve al tiu, kiu malpacas kun sia Kreinto!”
“Mi per Miaj manoj etendis la ĉielon”
“Turnu vin al Mi, ĉiuj finoj de tero, kaj estu savitaj”

Tiu ĉi lasta frazo precipe emfazas la personan estadon de Dio – Li volas, ke homoj turnu sin al Li por kompreni Lian ekzistadon per la okuloj de fido.

Dio elmontriĝas al ni kiel ĉionpardonanta Dio. Sed pardono povas deveni nur de persono: tio estas mensa ago. Tiel, David estis homo laû la koro de Dio (1 Sam 13:14); tio montras, ke Dio estas sentanta, konscia estaĵo. Ĉi tio helpas al ni kompreni, kiel ni povas komplezi aû ne komplezi al Li per niaj faroj, same kiel komprenas tion infano rilate al sia patro.

**Se Dio Ne Estas Persono**

Se Dio ne estus reala persono, tiam estus malfacile kompreni la koncepton de spiriteco. Se Dio estas tute justa, sed ne estus materia substanco, ni ne povus reale percepti Lian justecon, rivelitan al homoj. Eksadeptoj de kristanismo kaj ankaû judaismo asertas, ke la justeco de Dio eniras nian vivon per malklara “sankta Spirito”, kiu iamaniere kreas en ni Dian mensan formon, akcepteblan por Li. Aliflanke, se ni agnoskas ekziston de persono, nomita Dio, ni povas kun Lia helpo kaj sub la influo de Lia vorto plibonigi nian karakteron kaj ankaû evoluigi en ni la Diajn karakterizojn.

La celo de Dio estas en tio, ke riveli Sin je multaj gloraj estuloj. Lia memoriga nomo, Yahveh Elohim, sugestas tion (“Tiu, Kiu estos potenculoj” - jen proksimuma traduko). Sed priskriboj de rekompencoj pro sincera fido en estonta Regno de Dio sur la tero montras, ke tiaj kredantoj havos palpeblan, korpan ekziston, kvankam ili ne sentos malfortecon de homa naturo. Ijob sopiris al “la lasta tago”, kiam lia korpo releviĝos (Ijob 19:25-27); Abraham devas esti unu el tiuj, pri kiuj temas en tia verso: “Kaj multaj el tiuj, kiuj dormas en la tero, vekiĝos.. por vivo eterna” (Dan 12:2), por ke li povu ricevi promesitan por eterna posedo la teron Kanaan, la realan lokon sur la tero (Gen 17:8). “Kaj ĝiaj fideluloj ĝojos kaj triumfos... La fideluloj ĝoju en honoro, kantu ĝoje sur siaj kuŝejoj... fari venĝon super la popoloj” (Ps 132:16, 149:5,7). La malsukceso de judoj kaj ankaû ne judoj kompreni similajn citaĵojn, kaj ankaû laûliteran signifon de la promesoj, donitaj al Abraham, kondukis al erara kompreno de “senmorta animo” kiel reala formo de homa ekzistado. Tiu ĉi ideo ne havas subtenon en la Biblio. Dio estas senmorta. Li estas glora estaĵo, kaj Li montras Sian celon por ke viroj kaj virinoj povu esti alvokitaj por la vivo en Lia Regno sur ĉi tiu tero kaj por partopreni Liajn atributojn, elmontritajn en korpa formo.

Al la fideluloj Dio promesis, ke ili fariĝos partoprenantoj en Lia naturo (Pet 1:4). Ili havos korpon kiel tiun de Jesuo (Fil 3:21). La doktrino pri la personeco de Dio, tial, rilatas al la doktrino pri la Regno.

El tio sekvas, ke ne estas racia koncepto de adoro al Dio, al religio aŭ kompreno de persona parenceco kun Dio, se ne estos agnoskite, ke Dio estas persono, kaj ke Li kreis nin laŭ Sia bildo. Do, multe da senco kaj konsolo oni povas eligi el citaĵoj, dirantaj pri Dio kiel pri amanta Patro, kiu instruas nin same kiel instruas patro sian filon (ekzemple Read 8:5). Kun kuntekstoj pri la suferado de Jesuo oni legas, ke "la Eternulo volis tiel lin turmenti" (Jes 53:10), kvankam li "al mia Dio mi kriis; El Sia templo Li aŭdis mian voĉon, kaj mia krio al Li atingis Liajn orelojn" (Ps 18:6). La promeso de Dio, donita al David pri la semo, kiu estos filo de Dio, postulis la mirindan naskiĝon de la homo. Se Dio ne estus persono, Li ne povus havi filon.

La vera kompreno de Dio estas ŝlosilo, kiu malfermas multajn aliajn vivogravajn sferojn de la Biblia doktrino. Sed kiel unu mensogo kondukas al alia, tiel same nevera koncepto pri Dio malklarigas la sistemon de la Vero, kiun enhavas la Sankta Skribo.

## 1.3 LA NOMO KAJ KARAKTERO DE DIO

Se ekzistas Dio, sekve necesas opinii, ke Li inventis iujn rimedojn por sciigi nin pri Si. Ni kredas, ke la Biblio estas la revelacio de Dio por homoj, kaj ke en ĝi ni vidas la malkaŝitan karakteron de Dio. Nome pro tio, ke la vorto de Dio efikas al nia menso, kaj ni iĝas nova kreitaĵo kun trajtoj de Dio (Jak 1:18; 2 Kor 5:17), ĝi estas nomita "semo" (1 Pet 1:23). Tial, ju pli ni ensorbas la vorton de Dio kaj komprenas Liajn instruojn, des pli ni iĝas "konformaj al la bildo de Lia Filo" (Rom 8:29), kiu laŭ sia spirita ecaro estis senriproĉa bildo de Dio ( Kol 1:15). De tiu ĉi vidpunkto estas tre utile konatiĝi kun historiaj partoj de la Biblio, kie estas dirite pri tio, kiel Dio traktis homojn kaj popolojn, elmontrante dum tio ĉiam la samajn Siajn ĉefajn trajtojn.

En la hebrea lingvo ofte nomo de homo respegulis lian karakteron kaj / aŭ informon pri li. Jen estas kelkaj klaraj ekzemploj:

- "Jesuo" – "Savanto", ĉar " li savos sian popolon de ĝiaj pekoj" (Mt 1:21).
- "Abraham" – "Patro de multe da popoloj" – " ĉar Mi faris vin patro de multe da popoloj" (Gen 17:5).
- "Eva" – "Vivo", "Vivanta", ĉar ŝi estis patrino de ĉiuj vivantoj" (Gen3:20).

- “Simeon” - “Aŭdado” – “ la Eternulo aŭdis, ke mi estas malamata, tial Li donis al mi ankaŭ ĉi tiun” ( Gen 29:33).

En psalmoj ofte estas egaligite la nomo kaj agoj de Dio kun Li Mem. ( Ps 103:1; 105:1; 106:1,2,12,13).

Sekve oni povas atendi, ke la nomoj kaj titoloj de Dio, donos al ni multe da informoj pri Li, kaj pro tio, ke Dio havas multe da aspektoj de la karaktero kaj multe da intencoj, Li havas multe da nomoj. Estas dezirinde, ke pli detale oni studadu la nomon de Dio post baptiĝo, ĉar ni devas daŭrigi tian studadon dum la tuta nia vivo en la Sinjoro. Aldonitaj pli sube informoj estas nur antaŭparolo al tiu ĉi temo.

Kiam Moseo dum tre drama momento de sia vivo ekvolis fortikiĝi en la fido kaj pli detale informiĝi pri Dio, li “alvokis la nomon de la Eternulo. Kaj la Eternulo preteriris antaŭ li, kaj li ekkriis: Eternulo, Eternulo, Dio indulgema kaj kompatema, multpacienca, favorkora, kaj verema, kiu konservas favorkorecon por miloj, pardonas kulpon kaj krimon kaj pekon, sed antaŭ Kiu neniu estas senkulpa” (El 34:5-7).

Tio estas klara pruvo, ke la nomoj de Dio montras Lian karakteron kaj konfirmas, ke Dio estas persono. Dio volas, ke tiaj trajtoj evoluu en niaj karakteroj. Dio elektis unu apartan nomon, pere de kiu Li volus esti konata, kaj kiu memorigus al homoj pri Li; tio estas resumo, entuto de Liaj intencoj rilate al homoj.

En tiu tempo la Izraelidoj estis sklavoj en Egiptujo kaj bezonis, ke Dio rememorigu al ili pri Siaj intencoj rilate al ili. Dio ordonis al Moseo sciigi al ili la nomon de Dio, por helpi al la Izraelidoj eliri el Egiptujo kaj iri al la promesita lando (kmp. 1 Kor 10:1). Kaj ankaŭ ni, se ni komprenas la ĉefajn principojn, kaŝitaj en Liaj nomoj, trovos helpon sekvi la vojon al Lia Regno.

Dio diris al la Izraelidoj, ke Lia nomo estas Jahve, kio signifas “La Estanto”, aŭ en pli ĝusta traduko – “Mi estas, Kiu estas” (El 3:13-15). Iom pli poste tiu ĉi nomo estis plivastigita: “Kaj plue Dio diris al Moseo: Tiel diru al la Izraelidoj: la Eternulo, la Dio de viaj patroj, la Dio de Abraham, la Dio de Isaak, kaj la Dio de Jakob, sendis min al vi…Tia estas Mia nomo por eterne, kaj tia estas memoraĵo pri Mi por ĉiuj generacioj” (El 3:15). Sekve, la plena nomo de Dio estas “la Eternulo Dio”.

La Malnova Testamento estis skribita plejparte en la hebrea lingvo kaj ĉiu traduko neeviteble preterlasas multe da detaloj, tradukante la hebreajn vortojn, signifantajn "Dio".

Unu el la disvastigitaj hebreaj vortoj, tradukitaj kiel "Dio" estas "Elohim", tio estas "Potenculoj". Sekve, Dio volas, ke ni rememoru Lin laû la nomo

**J A H V E   E L O H I M**

tio signifas

**TIU, KIU RIVELOS SIN EN GRUPO DE POTENCULOJ**

El tio sekvas, ke la intenco de Dio estas riveli Sian karakteron kaj Sian personecon en granda grupo da homoj. Se ni obeos al Lia vorto, ni povos disvolvigi en ni iujn el la Diaj trajtoj jam nun, do iusence Dio rivelos Sin al la mondo en veraj fidantoj dum tiu ĉi vivo.

Sed la nomo de Dio ankaû estas profetaĵo pri tempo, kiu venos, post kiam la tero estos plenigita de homoj, similaj al Li laû karaktero kaj ankaû laû naturo (kmp. 2 Pet 1:4).

Se ni volas asociiĝi kun la intenco de Dio kaj iĝi, kiel Li, senmortaj, havante eternan vivon kaj vivi en plena morala perfekteco, do ni devas asociiĝi ankaû kun Lia nomo. La vojo al tio kondukas tra baptiĝo je Lia Nomo ( Mt 28:19). Tio ankaû faras nin la idaro ("semo") de Abraham (Gal 3:27-29), al kiu estis promesite esti heredantoj de la mondo ( Gen 17:8; Rom 4:13 ), t. e. al tiu grupo da "potenculoj" ("Elohim"), en kiu estos realigite la profetaĵo, entenanta en la Nomo de Dio.

Pli detale pri tio estos dirite en Ĉapitro 3.4

## 1.4 LA ANĜELOJ

Konsiderante ĉion pli supre diritan pri la anĝeloj, oni povas konkludi, ke la anĝeloj estas:

realaj personaj estaĵoj,

havantaj la Dian nomon;

estaĵoj, en kiuj la Spirito de Dio efektivigas Lian volon

laû Lia karaktero kaj intencoj,

kaj pro tio evidentigante Lin.

Kiel ni jam diris en la parto 1.3, unu el la plej disvastigitaj tradukoj de la vorto “Dio”, estas “Elohim”, “Potenculoj”. La Biblio diras, ke estas nur unu Dio (Read 6:4; Jes 45:5; 1 Kor 8:4; Ef 4:6), kaj tiu ĉi vorto ofte aludas al la estaĵoj, kiuj kiel “potenculoj” de Dio, portas Lian nomon, kaj povas nomiĝi “Dio” pro tio, ke ili reprezentas Dion. Tiuj ĉi estaĵoj estas la anĝeloj.

En la priskribo de la kreado de la mondo estas dirite, ke Dio donis certajn indikojn rilate al la kreado kaj “iĝis tiel”. Li diris tion al la anĝeloj. Kaj la anĝeloj estis tiuj, kiuj plenumis la ordonojn de Dio.

“Benu la Eternulon Liaj anĝeloj, potencaj per sia forto, kiuj plenumas Lian vorton, por ke oni obeu la voĉon de Lia vorto” (Ps 103:20).

Pro tio, kiam ni legas “Dio kreis la mondon”, estas logike supozi, ke fakte tiun laboron plenumis la anĝeloj. La versoj Ijob 38:4-7 aludas ankaû pri tio. Nun estas ĝusta momento por resumi la eventojn dum la kreado de la mondo, priskribitajn en Genezo 1:

**Tago 1:** “Kaj Dio diris: Estu lumo; kaj fariĝis lumo” (v. 3).

**Tago 2:** “Kaj Dio diris: Estu firmaĵo inter la akvo, kaj ĝi apartigu akvon de akvo. (Kaj fariĝis tiel). Kaj Dio kreis la firmaĵon, kaj apartigis la akvon, kiu estis sub la firmaĵo, de la akvo, kiu estas super la firmaĵo; kaj fariĝis tiel. (v. 6,7).

**Tago 3:** “Kaj Dio diris: Kolektiĝu la akvo de sub la ĉielo en unu lokon, kaj aperu la sekaĵo; kaj fariĝis tiel” (v. 9).

**Tago 4:** ”Kaj Dio diris: Estu lumaĵoj en la ĉiela firmaĵo, por apartigi la tagon de la nokto…” Kaj fariĝis tiel” (v. 14,15).

**Tago 5**: “Kaj Dio diris: La akvo aperigu moviĝantojn, vivajn estaĵojn, kaj birdoj flugu super la tero, sub la ĉiela firmaĵo. Kaj fariĝis tiel. Kaj Dio kreis la grandajn balenojn, kaj ĉiujn vivajn estaĵojn moviĝantajn, kiujn aperigis la akvo, laû ilia speco, kaj ĉiujn flugilhavajn birdojn laû ilia speco” (v. 10, 21).

**Tago 6:** “Kaj Dio diris: La tero aperigu vivajn estaĵojn, laû ilia speco, brutojn kaj rampaĵojn kaj surterajn bestojn, laû ilia speco; kaj fariĝis tiel” (v. 24).

Homo estis kreita en tiu sama sesa tago. “Kaj Dio diris: Ni kreu homon laû Nia bildo, similan al Ni” (Gen 1:26). Ni jam diris pri tiu verso en la parto 1.2. Nun ni volas rimarkigi, ke la vorto “Dio” ĉiloke ne rilatas senpere al la persono de Dio Mem - la vortoj “Ni kreu homon” indikas, ke la vorto “Dio” rilatas al pli ol unu persono. En la hebrea originalo ĉi-loke estas uzite la vorto “elohim” - “potenculoj” respektive al la anĝeloj. Tiu fakto, ke la anĝeloj kreis nin laû sia bildo, signifas, ke ili havas la saman korpan aspekton, kiun havas ankaû ni. Tial ili estas tute realaj, palpeblaj korpaj estaĵoj, havantaj la saman naturon, kiun havas Dio.

La vorto “naturo”, uzita tie ĉi, rilatas al ilia fizika strukturo, ilia karaktero. La Biblio mencias pri du “naturoj”. Laû propra signifo de la vorto ne eblas havi du naturojn samtempe.

**La naturo de Dio**

Tute ne povas peki (estas perfekta) (Rom 9:14; 6:23; Ps 90:2; Mt 5:48; Jak 1:13);

Ne povas morti (1Tim 6:16);

Estas plena da forto kaj energio

Tia estas la naturo de Dio kaj la anĝeloj. Tian naturon ricevis Jesuo post Sia reviviĝo (Agoj 13:34; Ap 1:18; Heb 1:3). Tia naturo estas promesita ankaû al ni  (Lk 20:35,36; 2 Pet 1:4; Jes 40:28, kmp. 31).

**Homa naturo**

Estas tentebla de malbono (Jak 1:13,15) pro malvirta natura menso (Jer 17:9;  Mk 7:21-23; Jak 1:13-15);

Estas mortema (Rom 5:12,17; 1 Kor 15:22);

Havas tre limigitan forton, kaj fizike (Is 40:30), kaj mense (Jer 10:23).

Tiun ĉi naturon havas nun ĉiuj homoj – bonaj kaj malbonaj. La fino de tiu ĉi naturo estas morto (Rom 6:23). Tiun ĉi naturon havis Jesuo dum sia homa vivo (Heb 2:14-18; Rom 8:3; Joh 2:35; Mk 10:18).

**Aperoj De Anĝeloj**

La anĝeloj, havante la naturon de Dio, devas esti senpekaj, kaj pro tio ili ne povas morti, ĉar la morton alportas peko (Rom 6:23). Ili devas havi, laŭlitere, fizikan formon de ekzistado. Nome pro tio la anĝeloj ofte aspektis kiel ordinaraj homoj, kiam ili aperadis sur la tero:

- Anĝeloj venis al Abraham, por transdoni al li Diajn vortojn. Ili estas priskribitaj kiel “tri viroj”, al kiuj Abraham rilatis dekomence kiel al homoj, ĉar tia estis ilia aspekto: “Oni alportos iom da akvo, kaj vi lavu viajn piedojn kaj ripozu sub la arbo” (Gen 18:4).
- Du el tiuj anĝeloj venis poste al Lot en la urbon Sodom. Kaj denove ĉiuj opiniis ilin kiel homojn, kaj Lot, kaj ankaŭ la loĝantoj de Sodom. “Kaj la du anĝeloj venis Sodomon vespere… Kiam Lot ilin ekvidis, li leviĝis renkonte al ili kaj kliniĝis vizaĝaltere”. Kaj Lot invitis ilin en sian domon por noktumi. Sed la homoj de Sodom ĉirkauis la domon de Lot kaj insiste postulis: “Kie estas la viroj, kiuj venis al vi dum la nokto? elirigu ilin al ni”. Lot petegis ilin “al tiuj viroj nenion faru”. En ĉi tiu priskribo la anĝeloj estas nomitaj “viroj”: “Tiam tiuj viroj etendis siajn manojn” kaj savis Loton; “Kaj la viroj diris al Lot… La Eternulo sendis nin, por pereigi” Sodomon (Gen 19:1,5,8,10,12,13).
- La komento de la Nova Testsmento konfirmas, ke la anĝeloj havas aspekton de homoj: “Ne forgesu gastamon al nekonatoj; ĉar per tio iuj gastigis anĝelojn ne sciante” (Heb 13:2).
- Jakobo luktis dum la tuta nokto kun iu homo (Gen 32:24), kiu, kiel estas dirite pli poste, estis anĝelo (Hoŝ 12:4).
- Du homoj en blankaj brilaj vestaĵoj ĉeestis dum la reviviĝo kaj suprenleviĝo de Jesuo. Ili, sendube, estis anĝeloj.
- Atentu pri la kaŝita signifo de la vortoj; “laŭ mezuro de homo, tio estas, de anĝelo” (Ap 21:17).

## Anĝeloj Ne Pekas

Pro tio, ke la anĝeloj havas la naturon de Dio, ili ne povas morti. Sed ĉar morton alportas peko, sekvas, ke anĝeloj ne povas peki. La originalaj grekaj kaj hebreaj vortoj, tradukitaj per la vorto “anĝelo”, signifas senditon, interliganton. La anĝeloj estas senditoj aŭ servantoj de Dio, obeemaj al Li, kaj pro tio oni ne povas opinii ilin pekulojn. La grekan vorton “aggelos”, tradukatan kiel “anĝeloj”, oni ankaŭ povas traduki “senditoj, interligantoj”, kiam temas pri homoj, ekzemple Johano

la Baptisto (Mt 11:10) kaj liaj senditoj (Lk 7:24); la senditoj de Jesuo (Lk 9:52), kaj la homoj, kiujn akceptis Raĥab (Jak 2:25). Povas esti, certe, ke “anĝeloj” en la senco “homaj senditoj” povas peki.

La sekvantaj eltiraĵoj klare montras, ke ĉiuj anĝeloj (ne nur kelkaj el ili) laŭnature obeas al Dio kaj pro tio ili ne povas peki:

> “La Eternulo starigis en la ĉielo Sian tronon; kaj Lia reĝeco regas ĉion (t. e. en la ĉielo ne povas esti ribelo kontraŭ Dio). Benu la Eternulon Liaj anĝeloj, potencaj per sia forto, kiuj plenumis Lian vorton, por ke oni obeu la voĉon de Lia vorto. Benu la Eternulon *ĉiuj* Liaj ĉirkaŭantoj, Liaj servantoj, kiuj plenumis Lian volon” (Ps 103:19-21).

> “Gloru Lin, *ĉiuj* Liaj anĝeloj, Gloru Lin, ĉiuj Liaj militistaroj” (Ps 148:2).

> “ Ĉu ne estas ili *ĉiuj* spiritoj servantaj, elsendataj, por servi al tiuj (kredantoj), kiuj estas heredontoj de la savo?” (Heb 1:14).

La ripeto de la vorto “ĉiuj” montras, ke la anĝeloj ne estas dividitaj en du grupoj – bona kaj malbona. La naturo de la anĝeloj klare videblas el tio, ke la rekompenco por fidantoj estos aliĝo al la naturo de la anĝeloj;

“Sed kiuj estas juĝitaj indaj tiun mondon kaj releviĝon el la mortintoj, tiuj nek edziĝas nek edziniĝas; ĉar ili ne plu povas morti; ĉar ili estas egalaj kun anĝeloj” (Lk 20:35,36). Tio gravas por kompreno. Se la anĝeloj povus peki, tiam tiuj, kiuj indos rekompencon dum la alveno de Kristo, ankaŭ povos ankoraŭ peki, kaj pro tio, ke peko alportas morton (Rom 6:23), ili ne havus eternan vivon. Se ni havos eblecon peki, ni ankaŭ kapablos morti. Se ni diru, ke la anĝeloj povas peki, do, perdas ĉiun sencon la promeso de Dio pri eterna vivo. Tamen ni scias, ke nia rekompenco estas dividi la naturon de la anĝeloj.

### Anĝeloj Kaj Kredantoj

Ekzistas sufiĉe konvinka kialo, ke ĉiu vera kredanto havas anĝelojn, - povas esti, unu el ili estas aparta - helpanta al li en lia vivo:

- “Anĝelo de la Eternulo postenas ĉirkaû tiuj, kiuj Lin timas, kaj Li ilin savas” (Ps 34:7).``

- “Ĉi tiuj malgranduloj, kiuj kredas al mi” (t.e. malfortaj apostoloj)… iliaj anĝeloj en la ĉielo ĉiam rigardas la vizaĝon de mia Patro (Mt 18:6,10).

- Fruaj kristanoj firme kredis, ke Petro havis anĝelon-gardanton (Ag 12:14,15).

- La Izraelidoj trairis la Ruĝan maron, kaj anĝelo kondukis ilin tra la dezerto al la promesita lando. La trairo la Ruĝan maron simbolas nian baptiĝon en akvo (1 Kor 10:1), tial estos racie supozi, ke post nia baptiĝo ankaû nin kondukas kaj helpas al ni anĝelo en nia iro tra dezerto de la vivo al la lando de la Regno de Dio.

Se anĝeloj povus esti malbonaj pro pekemeco, tiuj promesoj pri la kontrolo kaj influo en niaj vivoj, fare de anĝeloj, povus fariĝi malbeno anstataû beno.

Sekve, ni vidas, ke la anĝeloj estas estaĵoj…

- kun la Dia naturo kaj korpa aspekto,
- kiuj ne povas peki,
- kiuj ĉiam plenumas la ordonojn de Dio,
- estas kanaloj, per kiuj diras kaj agas Dia spirito-forto (Ps 104:4).

**SED...?**

Multaj “kristanaj” eklezioj opinias, ke anĝeloj povas peki kaj ke pekemaj anĝeloj ekzistas nun, kaj kaûzas pekon kaj mondajn problemoj sur la tero. Pli detale ni diskutos tiun ĉi malveran koncepton pli poste. Nun ni rimarkos:

- Estas eble, ke nian universon antaûestis alia, t. e. tiu, pri kiu estas dirite en Gen 1. Ankaû eblas, ke la nunaj anĝeloj estas sciantaj pri bono kaj malbono (Gen 3:5), ĉar ili estis en tiu stato, kiun ni havas

nun en nia vivo. Oni ne povas escepti eblecon, ke iuj estaĵoj, vivintaj en tiu tempo, pekis; tamen tio estas nur tia supozado, kian la homoj emas ami. La Biblio diras nenion pri tiaj aferoj, sed klare indikas tion, kio estas necese al ni scii pri nia nuna stato, nome, ke ne ekzistas pekemaj anĝeloj; ĉiuj anĝeloj estas plene obeemaj al Dio.

- En la ĉielo ne povas esti pekemaj estaĵoj, ĉar la Diaj okuloj estas tro puraj, por vidi malbonon, kaj rigardi malhonestulojn (Ĥab 1:13). Ankaŭ Ps 5:5,6 klarigas: "Fanfaronuloj ne staros antaŭ Vi; Vi malamas ĉiujn, kiuj faras malbonon. Vi pereigas tiujn, kiuj parolas malveron; Sangavidan kaj malican la Eternulo abomenas". Sekve, eĉ la penso mem pri malobeo al Dio en la ĉielo de pekemaj anĝeloj plene kontraŭas al tio, pri kio diras tiuj ĉi citaĵoj.

- La greka vorto "anĝelo" signifas senditon kaj povas, kiel ni jam diris pri tio, rilati al homoj. Tiuj homaj "senditoj", kompreneble, povas peki.

- Unu el la plej disvastigitaj opinioj en paganismo estas tio, ke ekzistas malbonaj, pekemaj estaĵoj, al kiuj falas akuzoj pri ĉiuj negativaj fenomenoj de la vivo.

- En la Biblio estas nur kelkaj fragmentoj, kiujn oni povas misinterpreti por konfirmi la ideon pri ekzisto nun de pekemaj anĝeloj. Sed tiuj fragmentoj ne povas rifuti tiujn multnombrajn argumentojn, kiuj estas en la Biblio konekse al la anĝeloj kaj kiuj estas donitaj pli supre. Pli detale pri tio oni povas legi en la eldonaĵo "Serĉante Satanon", senpage havebla ĉe la eldonistoj.

**KOMENTO 1 "Dio estas Spirito" (Joh 4:14)**

En la ĉapitro 2 ni diros pri tio, kio estas Spirito de Dio. Nun ni resumos la rezonojn, tie farotajn, ke la Dia Spirito estas Lia potenco, Lia spiro, pere de kiu Lia esenco kaj karaktero estas elmontritaj al homoj. Sekve, la frazo "Dio estas Spirito" (Joh 4:24) esprimas, ke Lia Spirito estas Lia personeco.

Oni priskribas Dion multmaniere, ekzemple:

"Dio estas fajro konsumanta" (Heb 12:29);

"Dio estas lumo" (1 Joh 1:5);

"Dio estas amo" (1 Joh 4:8);

"La Vorto (la greka "logos" – plano, intenco, ideo) estas Dio" (Joh 1;1).

El tio sekvas, ke "Dio estas" – Lia karakterizo. Tute erare aserti, ke abstrakta nocio pri amo estas "Dio" nur pro tio, ke ni legas: "Dio estas amo".

Ni povas nomi iun "la boneco mem", sed tio ne signifas, ke tiu iu ne estas fizika estaĵo – tio estas nur maniero de laŭlitera esprimo de karakteraj trajtoj de tiu persono.

La Spirito estas la povo de Dio. Ni ofte legas, ke Dio sendas aŭ direktas Sian Spiriton por atingi celojn konforme kun Sia volo kaj karaktero. Pri Li estas dirite, ke Li estas kreanto de la vento (Am 4:13). Diri, ke Dio estas Spirito, en la pura laŭlitera senco, estas taŭtalogio, tio fakte neas la ekziston de Dio.

Estas multe da ekzemploj, kiuj atestas, ke Dio sendas Sian Spiriton, kaj apartigas de Si Sian Spiriton:

" Tiu, kiu metis internen de ili Sian Sanktan Spiriton (Jes 63:11);

" Mi metos Mian Spiriton sur lin (Jesuo)" (Mt 12:18);

" Via Patro ĉiela donos la Sanktan Spiriton al tiuj, kiuj petos al Li" (Lk 11:13);

" Mi vidis la Spiriton malsupreniranta de la ĉielo" (Joh 1:32);

"Mi elverŝos Mian spiriton sur ĉiun karnon" (Agoj 2:17).

Fakte, oftaj citaĵoj pri “la Spirito de Dio” jam atestas, ke la Spirito ne estas Dio Mem persone. Tiu ĉi diferenco inter Dio kaj Lia Spirito estas ankoraŭ unu malfacilaĵo por tiuj, kiuj kredas, ke Dio estas “Triunuo”, en kiu Dio Patro estas identigita kun Jesuo kaj la Sankta Spirito. Se tio estus tiel, kaj Dio ne estus persono, el tio sekvus, ke Jesuo ne estis kaj ne estas laŭlitera estaĵo.

Necesas ankaŭ rimarki, ke senpersona Dio faras preĝon malsaĝaĵo, ĉar preĝo estas dialogo inter nia menso kaj Dio, kiu ekzistas en nia konscio. Ĉiam oni rememorigas al ni, ke ni preĝas al Dio, kiu havas fizikan lokon en la ĉielo (Pred 5:2; Mt 6:9; 5:16; 1 Reĝ 8:30), kaj ke Jesuo troviĝas nun ĉe la dekstra mano de Dio, transdonante al Li niajn preĝojn (1 Pet 3:22; Heb 9:24). Se Dio ne estas reala persono, tiuj versoj ne havas sencon. Sed kiam oni komprenas, ke Dio estas reala, amanta Patro, nia preĝo al Li iĝas realaĵo – fakte parolo kun estulo, kiu, kiel ni kredas, volas kaj povas respondi al ni.

**KOMENTO 2: La uzado de Dia nomo**

Ni vidas, ke la nomo de Dio Mem kaj la nomo de Lia Filo Jesuo havas tre profundan signifon. Kiam ni diras pri Dio, ni tuŝas ĉiun flankon de Lia mirinda elmontro de amo kaj vero. Oni devas ne uzi la nomon de Dio kiel simplan enkondukitan vorton aŭ uzi ĝin por esprimi inciton, tia uzo estas ofendaĵo al nia Kreinto. Pro tio, ĉiu, kiu volas fari agrablon al Dio kaj fari honoron al Li, devas uzi ĉiujn rimedojn por ke ne elparolu Lian nomon kun senpripensa facileco. En multaj landoj de la mondo tiu sakrilegio iĝis ordinara fenomeno de nuntempa parollingvo kaj estas malfacile liberiĝi de tiuj kutimoj de ĉiutaga vivo. Sendube, sincera preĝo por Dia helpo ĉi okaze ne estos nerimarkebla por Li. Al tiuj do, kiuj troviĝas sub nia kontrolo kaj influo, ekzemple – al infanoj, necesas rimarkigi, ke similaj sakrilegioj ne restos senpunaj, “ĉar la Eternulo ne lasos senpuna tiun, kiu malbonuzas Lian nomon” (Read 5:11).

Aliflanke, estas homoj, kiuj persistas je ĉiama uzado de hebreaj vortoj Jahveh aŭ Jegovah (diversaj manieroj de la prononco de la sama vorto), kiam ni parolas pri Dio. Ili asertas, ke aliokaze ni faras gravan eraron. Al adeptoj de tiu ĉi nomo de Dio apartenas la Societo de Garda Turo, anoj de kiu opinias, ke se kristano ne nomas sin “atestanto de Jegovah”, li ne havos interrilatojn kun Dio. Kondutante tiele, tiuj homoj uzas Dian sanktan kaj mirindan nomon por stimuli siaspecan spiritan superecon, kiam unu malestimas alian homon simple pro prononco aŭ

uzo de iu vorto. Ni ne volas diri, ke uzado de la nomo de Dio estas malbona afero, ĝi precipe konvenas por niaj personaj preĝoj, se ni estas baptitaj je Lia Nomo. Tamen en la Nova Testamento forestas iu ajn mencio, ke uzo de nomo de Dio estas deviga por ni aŭ dezirata de Dio. Dio inspiris skribi la Novan Testamenton en la greka lingvo, en kiu por la vorto “Dio” estas uzate nur unu vorto – “theos”, kio signifas “Potenculo” (“Plejaltulo”). En la Nova Testamento forestas diferenco inter “Dio” kaj “Jahve” kaj ankaŭ forestas iu speciala indiko rilate al tio, ke kredantoj, kiel komunumo, devas nomi sin. Petro nomas kredantan homon “kristano”, sed ne “homo de Jegove” aŭ per iu simila al tio vorto (1 Pet 4:16). Troa emfazo de uzo de la nomo “Jegove” senvalorigas la agojn kaj signifon de Jesuo Kristo. Kaj kontraŭe, multaj “evangeliaj kristanoj” donas tro gravan signifon al la nomo kaj rolo de Jesuo Kristo, ne donante necesan atenton al la potenco de Dio. La komunumoj de fruaj kristanoj ankaŭ ne nomis sin per la nomo de Jegovah:

- “La Komunumo de Izrael” (Ef 2:12);
- “La ĝenerala kunveno kaj eklezio de la unuenaskitaj” (Heb 12:23);
- “La Eklezio de Dio” (Ag 20:28);
- “La Eklezio de la vivanta Dio, la kolono kaj bazo de la vero” (1Tim 3:15).

Interalie, rimarku, ke fruaj kredantoj ne nomis sin “kristanoj”. Tio estis humiliga moknomo, donita al ili de iliaj kontraŭuloj.

**KOMENTO 3**: **Elmontro de Dio**

Tion, kio sekvos pli sube, estos malfacile kompreni de unua tralego, sed de leciono al leciono vi pli kaj pli komprenos la pridiskutatan demandon. Nun ni enmetis tiun ĉi parton por via studo, ke vi havu nocion pri la ĉefa revelacio de la Biblio rilate al Dio Mem.

La nomon de Dio povas havi ĉiu homo, pere de kiu Li volas “elmontri” aŭ riveli Sin. Pro tio nomon de Dio povas havi kaj homoj, kaj anĝeloj, kaj Jesuo Kristo. Tiu ĉi grava principo donas al ni komprenon de la Biblio. Ekzemple, filo povas havi nomon de sia patro; li havas certan similecon kun sia patro. Sekve, reprezentanto de kompanio povas paroli de la nomo de sia kompanio, li povas telefoni al iu kaj diri: “Hola! Vin trankviligas “Unilever”, se li laboras en la kompanio, kiu havas tiun nomon, kvankam li mem ne estas sinjoro Unilever.

Tion saman oni povas diri pri Jesuo.

### Anĝeloj, Portantaj La Nomon De Dio

El Eliro 23:20,21 ni scias, ke Dio diris al la popolo de Izraelo, ke anĝelo iros antaŭ ili. "Mia nomo estas en li" diris Li. La persona nomo de Dio estas "Jahve". Tial la nomo de la anĝelo estis "Jahve" aŭ " Jegovah". Eliro 33:20 diras, ke neniu el homoj povas vidi la vizaĝon de Dio kaj resti viva, sed en Eliro 33:11 ni legas: "Kaj la Eternulo paroladis kun Moseo vizaĝon kontraŭ vizaĝo, kiel parolas homo kun sia amiko", t. e. senĝene kaj amike. Tio ne estis Dio, la Eternulo Mem persone, ĉar neniu el homoj povas vidi la vizaĝon de Dio. Tio estis la anĝelo, portanta la nomon de Dio. Tial, kiam ni legas pri Dio, kiu paroladis kun Moseo vizaĝon kontraŭ vizaĝo, ni devas kompreni, ke fakte tio estis la anĝelo (Ag 7:30-33).

Estas multe da aliaj ekzemploj, kiam la vorto "Dio" aŭ "Sinjoro" rilatas al anĝeloj, sed ne al Dio Mem. Jen estas unu ekzemplo el Gen 1:26: "Kaj Dio (anĝeloj) diris: "Ni kreu homon laŭ nia bildo".

### Homoj Kun La Nomo De Dio

Unu el citaĵoj, kiuj estas tre utilaj por klarigi ĉion suprediritan, estas Joh 10:34-36. Tie ĉi hebreoj faris eraron, kiun faras nun multaj tiel nomataj "kristanoj". Ili opiniis, ke Jesuo diris, ke li mem estas Dio, Jesuo korektis ilin, dirante: "Ĉu ne estas skribite en via leĝo: Mi diris: Vi estas dioj? Se li nomis dioj tiujn, al kiuj venis la vorto de Dio (kaj la Skribo ne povas esti nuligita), ĉu vi diras pri tiu, kiun la Patro konsekris kaj sendis en la mondon: Vi blasfemas; ĉar mi diris: Mi estas Filo de Dio?". Jesuo fakte citas la versojn el psalmo 82, kie la juĝistoj de Izrael estas nomitaj "dioj".

Kiel estis dirite, la plena nomo de Dio en la hebrea lingvo estas "Jhvh Elohim", tio signifas "Mi riveliĝos en multaj potenculoj". Tiuj "potenculoj" estas la veraj kredantoj, en kiuj Dio riveliĝas en limigita senco en tiu ĉi vivo. Tamen en la Regno de Dio, ili estos "potenculoj", en kiuj la Eternulo estos rivelita plene. Tion klare montras komparo de la versoj Jes 64:4 kaj 1 Kor 2:9. "Neniam oni tion aŭdis, ne eksciis per la orelo, nek okulo tion vidis, ke iu dio krom Vi tion faras por tiuj, kiuj esperas je li". Paŭlo citas tion en 1 Kor 2:9,10: "Sed kiel estas skribite: "Tion, kion okulo ne vidis kaj orelo ne aŭdis, kaj kio en la koron de homo ne eniris, Dio preparis por tiuj, kiuj Lin amas. Sed al ni Dio malkaŝis ilin per la Spirito". La citaĵo en Jes 64 diras, ke neniu krom Dio povas kompreni tion, kion Li preparis por kredantoj; sed 1 Kor 2:10 indikas, ke

ĉio tio ĉi estis malkaŝite al ni, sekve, ni en tiu ĉi senco povas esti dio, ne Dio Mem persone, sed elmontriĝo de Dio rezulte de nia baptiĝo kaj ekkono de la Vero.

### Jesuo Kaj La Nomo De Dio

Ne estas mirinde, ke Jesuo, kiel la Filo de Dio kaj Lia elmontro al homoj, ankaŭ devas porti la nomon de Dio. Li povis diri: "Mi venis en la nomo de mia Patro" (Joh 5:43). Laŭ sia obeemo, Jesuo estis prenita supren en la ĉielon kaj Dio "donis al li nomon, kiu estas super ĉia nomo" – la nomo de Jahve, la nomo de Dio Mem (Fil 2:9). Jen tial ni legas en Ap 3:12: "Mi skribis sur li (sur kredanto) la nomon de mia Dio... kaj mian novan nomon". Nun ni povas klare kompreni ankaŭ Jes 9:6, kie estas dirite "...kaj lia nomo estos: Mirinda, Konsilisto, Potenculo, Patro de Eterneco ...". tio estas profetaĵo, ke Jesuo portos ĉiujn nomojn de Dio, li estos plena kaj perfekta elmontro de Dio al ni. Nome pro tio li estis nomita "Emanuel"; tio estas, "Dio kun ni", kvankam persone li ne estis Dio Mem.

## ĈAPITRO 1: Demandoj

1. Kio plejparte helpos al ni kredi je Dio?
a) Vizitado de preĝejoj
b) Studado de la Biblio kun preĝoj
c) Konversacioj kun kristanoj
d) Observo de la naturo

2. Kiu el la subediritaj determinoj de Dio estas la plej vera?
a) Nia imago
b) Impeto de spirito en la atmosfero
c) Dio ne ekzistas
d) Reala materia persono

3. Dio estas:
a) Unueco
b) Triunuo

c) Multe da dioj en unu
d) Ne eble estas iel difini Dion

4. Kion signifas la nomo de Dio “Jhvh Elohim”?
a) Tiu, kiu estos
b) Tiu, kiu riveliĝos en multaj potenculoj
c) Plejaltulo;
d) Potenculo

5. Kion signifas la vorto “anĝelo”?
a) Homsimila
b) Havanta flugilojn
c) Sendito;
d) helpanto

6. Ĉu anĝeloj povas peki?
7. Kio plejparte konvinkas vin, ke Dio ekzistas?
.

# ĈAPITRO 2

# LA SPIRITO DE DIO

## 2.1 LA SPIRITO DE DIO

Pro tio, ke Dio estas reala persono, havanta sentojn kaj emociojn, Li havas iujn rimedojn dividi Siajn dezirojn kaj sentojn kun ni, Liaj infanoj, kaj efiki nian vivon per tiuj rimedoj, kiuj konvenas al Lia karaktero. Dio plenumas ĉion tion per Sia Spirito. Se ni volas koni Dion kaj havi aktivan intiman interrilaton kun Li, ni devas scii, kio estas la Spirito de Dio kaj kiel ĝi efikas.

Ne estas facile difini la vorton "spirito". Se vi revenante, ekzemple, de nuptofesto, diras: "Tie estis efektive bona etoso!", per tiuj vortoj vi esprimas, ke dum la nuptofesto estis bona atmosfero, ĉio estis bone aranĝite, homoj estis bele vestitaj kaj belaspektis, manĝaĵo estis bongusta, paroloj estis agrablaj kaj tiel plu. Ĉiuj tiuj ĉi diversaĵoj faris "spiriton" de la nuptofesto. Simile al tio, la Spirirto de Dio resumas ĉion pri Li. La hebrea vorto, tradukata kiel "spirito" en la Malnova Testamento, strikte dirante, signifas "spiro" aŭ "potenco". Sekve, la Spirito de Dio estas Lia spiro, la esenco mem de Dio, kiu respegulas Lian menson. Ni donos ekzemplojn, uzante la vorton "spirito" rilate al kies ajn menso aŭ karaktero en Parto 4.3.

En la Biblio estas dirite, ke pensojn de homo elmontrigas liaj aferoj (Sent 23:7; Mt 12:34). Mallongaj pensoj pri niaj agoj konfirmas tion. Ni pensas pri io, poste ni agas konvene al tio. Nia spirito aŭ racio povas trovi sian respegulon en agoj, montrantaj, ekzemple, ke ni estas malsataj. Ni vidas en kuirejo bananon, kaj tiam deziro de spirito efektiviĝas en ago – ni etendas la manon, prenas la bananon, senŝeligas ĝin kaj manĝas ĝin. Tiu ĉi simpla ekzemplo montras, ke la hebrea vorto "spirito" signifas "spiro" aŭ "menso" kaj ankaŭ "potenco". Nia spirito, nia esenco rilatas al niaj pensoj kaj sekve, al agoj, kiujn ni faras por esprimi niajn pensojn aŭ humoron. La Dia spirito estas la sama, sed en senmezure pli granda skalo. Ĝi estas povo, per kiu Li esprimas Sian esencon, Sian karakteron kaj intencon.

### La Potenco De Dio

Multaj citaĵoj klare identigas la spiriton de Dio kun Lia potenco. Por krei la universon "…la spirito de Dio ŝvebis super la akvo; kaj Dio diris: "Estu lumo. Kaj fariĝis lumo" (Gen 1:2,3). La spirito de Dio estas kapablo, povo, per kiu ĉion (ekzemple, la lumon) Li kreis. "Per Lia Spirito belegiĝis la ĉielo; Lia mano trapikis la tordiĝantan serpenton" (Ijob 26:13). "Per la vorto de la

Eternulo estiĝis la ĉielo; kaj per la spiro de Lia buŝo estiĝis ĝia tuta ekzistantaro" (Ps 33:6). Pro tio, la spiriton de Dio oni priskribas kiel:

Lia Spirito,
Lia Vorto;
Lia mano

Sekve, ĝi estas Lia potenco, per kiu Li efektivigas ĉion. Tiel, la fiduloj naskiĝas denove laŭ la volo de Dio (Joh 3:3-5). Lia volo efektiviĝas per la spirito. Rilate al la kreado de la mondo ni legas: "Vi sendas Vian spiriton, tiam ili kreiĝas; kaj Vi renovigas la vizaĝon de la tero" (Ps 104:30). Tiu ĉi spirito/povo estas apogilo por ĉio. Kompreneble, sen aktivaj agoj de la spirito de Dio la vivo en tiu ĉi mondo donos multe da problemoj. Al Ijob, kiu laciĝis de tiu ĉi vivo, la alia profeto rememorigas: "Se Li pensus nur pri Si, se Li prenus al Si Sian spiriton kaj spiron, tiam pereus absolute ĉiu karno, kaj homo refariĝus polvo" (Ijob 34:14,15). Estante en deprimo, David petis Dion subteni lin per Sia spirito (Ps 51:12).

En Parto 4.3 ni vidos, ke la spirito, donita al ni kaj al ĉiu kreita, estas tio, kio subtenas nian vivon. Ni havas en ni 'spiriton de vivo" (Gen 7:22), donitan al ni de Dio dum nia naskiĝo. (Ps 104:30, kmp. Heb 12:9). Pro tio Li estas la Eternulo, Dio de la spiritoj de ĉiu karno" (Nom 27:16, kmp. Heb 12:9). Se Dio estas la viva forto, kiu subtenas la tutan mondon, tio signifas, ke Lia spirito ĉeestas ĉie. David agnoskis, ke per Sia spirito Dio ĉiam estas kun li, kaj dank` al tiu spirito/povo, Li scias ĉiun anguleton de lia racio kaj penso. Tiele, la Dia spirito estas rimedo, per kiu Li ĉeestas ĉie, kvankam persone Li estas en la ĉielo.

> "Vi scias, kiam mi sidas kaj kiam mi leviĝas; Vi komprenas mian penson de malproksime…"
>
> "Kien mi iros for de Via spirito? Kaj kien mi kuros for de Via vizaĝo?"
>
> "Ĉu mi okupos la flugilojn de la matenruĝo, ĉu mi loĝiĝos sur la rando de la maro: ankaŭ tie Via mano (t. e. per la spirito) min kondukos kaj Via dekstra mano min tenos" (Ps 139:2,7,9,10).

Ĝusta kompreno de tiu ĉi demando montras al ni Dion, kiel potenca aktiva estulo. Multaj homoj plenkreskiĝas, havante malklaran kredon je Dio, sed fakte "Dio" estas nur ideo en iliaj kapoj, nigra kesto ie en la cerbo. Kompreno de la vera Dio kaj Lia reala ĉeesto ĉirkaŭ ni pere de Lia spirito povas plene ŝanĝi nian nocion pri vivo. Ni estas ĉirkaŭataj de la spirito kaj ĉiame ni atestas pri

Liaj agoj, kiuj malkovras al ni Dion. David tiel ekkriis konekse al tio: “Mirinda estas por mi tia sciado, tro alta; mi ĝin ne povas kompreni” (Ps 139:6). Samtempe, kun scio de tio alvenas ankaŭ respondeco; ni devas agnoski, ke niaj pensoj kaj agoj estas plene malkovritaj por Dio. Precipe tion ni devas konsideri antaŭ nia baptiĝo. La vortoj de Dio, diritaj al la profeto Jeremia rilatas ankaŭ al ni: “Ĉu homo povas kaŝi sin en tia sekreta loko, kie Mi lin ne vidus? Diras la Eternulo; ĉu ne Mi plenigas la ĉielon kaj teron?” (Jer 23:24).

### La Sankta Spirito

Ni vidas, ke la Sankta Spirito estas ampleksa nocio; tio estas la racio kaj karaktero kaj ankaŭ povo, pere de kiu Li efektivigas Sian volon. “Kiaj estas la pensoj en lia (de homo) animo, tia li ankaŭ estas” (Sent 23:7); tio rilatas ankaŭ al Dio. Li estas tia, kiaj estas Liaj pensoj, Lia Spirito (Joh 4:24; vd. Komento 1).

La Biblio ofte diras pri “Sankta Spirito”, precipe la Nova Testamento. En Ag 2 ni legas pri la elverŝo de la Sankta Spirito al la disĉiploj dum la tago de Pentekosto. Petro klarigas, ke tio estas la efektiviĝo de la profetaĵo de Joel: “Mi elverŝos Mian (Dian) spiriton sur ĉiun karnon” (Ag 2:17). En la Malnova Testamento paralele kun la termino “Sankta Spirito” estas uzataj ekvivalentaj frazoj “Dia spirito” aŭ “Spirito de la Sinjoro”. La verso Lk 4:1 diras: “Kaj Jesuo, plena de la Sankta Spirito revenis de Jordan”. Pli sube en la sama ĉapitro Jesuo diras pri tio, kiel pri la plenumiĝo de la profetaĵo de Jes 61: “La spirito de la Eternulo estas sur mi”. Atentu, kiel en la sekvaj citaĵoj la Sankta Spirito identiĝas kun Dia potenco:

> “La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin” (Lk 1:35).
> “Laŭ la potenco de la Sankta Spirito… en la potenco de signoj kaj mirindaĵoj, en la potenco de la Sankta Spirito” (Rom 15:13,19).
>
> “Nia evangelio venis al vi ne nur parole, sed ankaŭ kun potenco kaj kun la Sankta Spirito kaj plena certigo” (1 Tes 1:5).
>
> “Kaj jen mi elsendos sur vin la promeson de mia Patro…ĝis vi vestiĝos per potenco de supre” (Lk 24:49).
>
> “Jesuon, la Nazaretanon, kiun Dio sanktoleis per la Sankta Spirito kaj potenco de supre” (Ag 10:38).
> “Kaj mia parolo kaj mia prediko estis ne en allogaj paroloj de saĝeco, sed en elmontro de la Spirito kaj potenco” (1 Kor 2:4).

## 2.2 INSPIRITECO

Ni jam konsideris la Spiriton kiel Lia potenco, penso kaj karaktero, kiujn Li elmontrigas en agoj per Sia spirito. En antaûa parto ni notis, ke per la Spirito de Dio kreiĝis la mondo: “Per Lia spirito belegiĝis la ĉielo” (Ijob 26:13); “Kaj la spirito de Dio ŝvebis super la akvo” (Gen 1:2). Samtempe ni legas: “Per la vorto de la Eternulo estiĝis la ĉielo (Ps 33:6). Ankaû en la libro “Genezo” estas dirite, ke laû la vorto de Dio estis kreita la mondo. Pro tio la spirito de Dio tre klare speguliĝas en Lia vorto, same kiel niaj vortoj, esprimantaj niajn pensojn kaj dezirojn, spegulas “nin”, nian esencon. Jesuo saĝe diris: “El la abundo de la koro (menso) la buŝo parolas” (Mt 12:34). Do, se ni volas kontroli niajn vortojn, ni devas antaû ĉio komenci ekde niaj pensoj. La vorto de Dio spegulas Lian spiriton, Liajn pensojn. Tio estas beno, ke ni havas en la Biblio skribitajn vortojn de Dio kaj povas kompreni Lian spiriton aû Lian menson. Dio atingis tiun miraklan esprimon de Sia spirito en skribitaj vortoj pere de inspiriteco. Tio signifas, ke ĉiuj skribintoj de la Biblio skribis ĝin laû la inspiro de Dio. Kaj la apostolo Paûlo admonis Timoteon ne forgesi, ke miraklo de la Biblio estas tio, ke ĝi estas la vortoj de la Dia spirito kaj donas al ni ĉion, kion ni devas scii pri Dio:

> “Kaj ke jam de frua infaneco vi konas la sanktajn skribojn, kiuj povas fari vin saĝa por savo per la fido, kiu estas en Jesuo Kristo. Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaû utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona laboro” (2 Tim 3:15-17).

Se la inspiritaj de Dio Skriboj povas doni tiun plenecon da scioj pri Dio, do ne estas bezonata iu ajn “interna lumigo” por doni al ni veron pri Dio. Tamen ofte homoj diras pri siaj sentoj kaj persona sperto, kiel pri fonto de sia scio de Dio! Se akcepto, en fido, de la inspirita de Dio Vorto sufiĉas por plena pliriĉiĝo de homo en lia kristana vivo, ne necesas iu alia potenco en niaj vivoj. Se ekzistas tia bezono, tio signifas, ke la Vorto de Dio ne plene ekipis nin, kiel promesis Paûlo. Tenante enmane la Biblion, necesas havi fortan fidon kredi, ke ĝi efektive estas la vorto de la Dia Spirito. La Izraelidoj, kiel multaj kristanoj nun, racie interesiĝis, kion diras la Dia Vorto. Tamen ni ĉiuj devas esti atentaj pri la vortoj de Paûlo:

> “Ĉar al ni ankaŭ estas evangelio anoncita tiel same, kiel al ili (Izraelidoj), sed al ili la aŭdita parolo ne utilis, ne miksite kun fido ĉe la aŭdantoj” (Heb 4:2).

Anstataŭ kreski ĝis plena fido je la potenco de la Dia spirito-vorto, donita al ni, kaj konscie subigi nian vivon al la Dia vorto, kaj per tio mem permesi al la Dia spirito efektive influi niajn korojn, pli alloga ŝajnas al ni la ideo pri ia subita “interna lumigo”, aŭ pri ia potenco de justeco, kiu subite malsupreniĝas al ni, farante nin akcepteblaj al Dio.

Tiu ĉi nedeziro akcepti la grandegan forton, kiu kuŝas en la Vorto de Dio, naskis dubojn ĉe multaj “kristanoj”, kiuj demandas sin, ĉu vere, ke ĉiuj Skriboj estas inspiritaj de Dio kaj ne estas esprimoj de personaj opinioj de maljunaj saĝuloj? Sed Petro firme malakceptis tian supozadon:

> “Kaj ni havas la profetan vorton konfirmitan; kiun atentante, vi bone faras… antaŭ ĉio sciante, ke neniu profetaĵo de la Skribo enhavas en si sian propran klarigon. Ĉar neniam profetaĵo estas alportita per homa volo; sed homoj, movataj de la Sankta Spirito, parolis laŭ Dio” (2 Pet 1:19-21).

## La Skribintoj De La Biblio

Evidentiĝas do, ke firma kredo je la plena inspiriteco de la Skriboj estas necesa. La homoj, kiuj skribis la Biblion, estis sub la influo de la Spirito, kiu inspiradis kaj kondukis ilin, kaj pro tio iliaj vortoj ne estas iliaj propraj. Pro tio, ke la Vorto de Dio estas vero (Joh 17:17) kaj utila por instruo, por admono, por korekto (2 Tim 3:16), ne estas mirinde, ke multaj homoj deflankiĝas de ĝi, ĉar sekvi veron ĉiam estas malfacile. La profeto Jeremia renkontadis grandan kontraŭstaron parolante la vortojn, inspiritajn al li de Dio; kaj li decidis ne skribnoti kaj ne publikigi la vortojn, kiujn li ricevis de Li. Tamen pro tio, ke la skribado de la Vorto de Dio estas rezulto de la volo de Dio, ne de la deziro de homo, li estis “movita de la Sankta Spirito” kaj havis nenion alian elekton. “Mi fariĝis objekto de ĉiutaga mokado, ĉiu mokas min… Mi diris al mi: Mi ne rememorigos pri Li, mi ne plu parolos en Lia nomo; sed tio fariĝis en mia koro kiel flamanta fajro, penetrinta en miajn ostojn, kaj mi laciĝis de retenado kaj ne plu povis elteni” (Jer 20:7-9).

Simile al tio, kiam Bileam firme intencis malbeni Izraelon, anstataŭ tio la spirito de Dio devigis lin beni Izraelon. (Nom 14:1-13, kmp. Read 13:5).

Estas mirinde, kiom da homoj, kiujn Dio inspiris profeti la vorton Lian, de tempo al tempo ne volis fari tion. Jen estas la listo da ili:

Moseo (El 4:10)

Jehezkel (Jeh 3:14)
Jona (Jona 1:2,3)
Paûlo (Ag 18:9)
Timoteo (1 Tim 4:6-14)
Bileam (Nom 22:24)

Ĉio tio konfirmas la vortojn, diritajn en la versoj 2 Pet 1:19-21, ke la Vorto de Dio ne estas esprimo de persona opinio de homoj, sed estas la rezulto de Dia inspiro – skribi pri tio, kio estis malkaŝita al ili.

Alia pruvo pri tio estas tio, ke la skribintoj de la Biblio konsciis, ke ili ne havas komprenon pri tio, kion ili skribis. Ili "serĉis" veran klarigon, ĉar "al ili malkaŝiĝis, ke ne al si mem, sed al vi, ili liveris tion, kio nun estas proklamita al vi" kaj pri kio ili skribis (1 Pet 1:9-12). La profeto Amos diris: "Kiam la Sinjoro, la Eternulo, parolis, kiu tiam ne profetos?" (Amos 3:8). Tiuj vortoj, kiujn ili skribis, fakte ne estis iliaj propraj. Ili venis de Dio, kaj la skribintoj mem penis kompreni ilian signifon. Jenaj versoj provizas senduban pruvon pri tio: Daniel (Dan 12:8-10); Zeĥarja (Zeĥ 4:4-13); Petro (Ag 10:17).

Se tiuj homoj estis nur parte inspiritaj, ni ne havas aliron al la vera Vorto, aû spirito de Dio. Se tio, pri kio ili skribis, estis la Vorto de Dio, el tio sekvas, ke la skribintoj de la Biblio estis plene gvidataj per la Dia spirito dum ili skribis la Biblion. La kompreno de tio, ke ĉiuj vortoj de la Skribo devenas de Dio, instigas nin legi la Skribon kaj obei al ĝi. "Tre pura estas Via vorto, kaj Via sklavo ĝin amas" (Ps 119:140).

Sekve, la libroj de la Biblio estas la faro de Dio, ne nura homa literaturo. Tion ankaû konfirmas interrilato de la Nova Testamento kun la Malnova Testamento:

> "… ke plenumiĝu tiu Skribo, kiun la Sankta Spirito antaûparolis per la buŝo de David" (Ag 1:16). Tiel Petro citis verson el la Psalmaro. Kmp. Heb 3:7.
>
> "Bone parolis la Sankta Spirito per la profeto Jesaja al viaj patroj" (Ag 28:25). Lk 3:4 diras pri "la libro de la <u>*vortoj*</u> de la profeto Jesaja", ne pri "la libro de Jesaja".

El tio ni vidas, ke por la fruaj kristanoj estis iom negrave, kiu homo skribis la Biblion. Grave estis nur tio, ke homo skribis tiujn vortojn sub la influo de la spirito de Dio.

Ni finos tiun ĉi parton per versoj, kiuj montras, ke la spirito de Dio elmontriĝas al ni per Lia skribita vorto:

- Jesuo klare deklaris: “La vortoj, kiujn mi diras al vi, estas spirito” (Joh 6:63); li parolis sub la influo de la spirito de Dio (Joh 17:8; 14:10).

- Nin oni priskribas kiel renaskitajn kaj el la Spirito (Joh 3:3-5) kaj per la vorto de Dio (1 Pet 1:23).

- “… por ne obei la instruon, kaj la vortojn, kiujn la Eternulo Cebaot sendis en Sia Spirito per la antaŭaj profetoj” (Zeĥ 7:12).

- “Mi eligos al vi mian spiriton, Mi sciigos al vi miajn vortojn” (Sent 1:23). Tiuj ĉi vortoj identigas veran komprenon de la Dia vorto kun efiko de Lia spirito al ni – legado do de la Libro sen kompreno ne donas ian ajn utilon, ĉar la Dia spirito/menso ne elmontriĝas al ni.

- Estas ankaŭ aliaj lokoj en la Biblio, kiuj diras pri identeco de Lia vorto kaj Lia Spirito: “Mia spirito, kiu estas sur vi, kaj Miaj vortoj, kiujn Mi metis en vian buŝon” (Jes 59:21); “Pro Via vorto kaj laŭ Via koro (spirito)” (2 Sam 7:21); “Kaj Mian spiriton Mi metos en vin” (Jeĥ 36:27); “Mi metos mian leĝon en ilian internon” (Jer 31:33).

**La Povo De La Vorto De Dio**

La spirito de Dio estas ne nur Lia menso/karaktero, sed ankaŭ Lia povo, per kiu Li esprimas Siajn pensojn. Sekvas, ke Lia spirito-vorto elmontrigas al ni ne nur Lian menson, sed ankaŭ tion, ke Lia vorto estas dinamika forto. Ĝusta kompreno de la signifo de tiu ĉi povo devas stimuli nin por uzi ĝin. Ĉiuj niaj embarasoj, ĉiuj baroj povas esti forigitaj per nia prikonscio, ke obeo al la vorto de Dio donos al ni forton, kiun ni bezonas por deflankiĝi de la vanteco de tiu ĉi vivo kaj savi nin. Bazinte sin je sia granda viva sperto, Paŭlo skribis:

> “Mi ne hontas pri la evangelio; ĉar ĝi estas la potenco de Dio al savo por ĉiu” (Rom 1:16).

Studado de la Biblio kaj aplikado ĝin en nia vivo estas do dinamika proceso, kiu kontraŭas al la senemocia vidpunkto de teologoj kaj ankaŭ al “oportuna” kristanismo, kiam oni mallonge citas nemultajn partojn de la Biblio sen iuj ajn provoj kompreni ilin aŭ uzi ilin en sia vivo. “La vorto de Dio estas viva kaj energia”, “Per la vorto de Sia (Dia) potenco” (Heb 4:12; 1:3), “La Dian vorton, kiu ankaŭ energias en vi, kiuj kredas” (1 Tes 2:13). Per Sia vorto Dio efikas al la menso de veraj kredantoj ĉiutage, ĉiuhore.

La Evangelio, pri kiu vi lernas, estas do la vera potenco de Dio, kaj se vi permesas al ĝi tiel fari, ĝi povas efiki vian vivon kaj igi vin infano de Dio, elmontrante ĝis iu grado Dian Spiriton/menson dum tiu ĉi vivo kaj preparante vin por la alveno de Kristo (2 Pet 1:4). La predikado de Paûlo estis "en elmontro de la Spirito kaj potenco" (1 Kor 1:4).

Multaj homoj nomas sin kristanoj, sed ne plene kredas, ke la Biblio estas la vorto de Dio. Ili diras pri sia kredo je Dio, sed samtempe ili ne rekonas, ke Li estas reala persono. Neante plenan inspiritecon de la Skribo kaj ankaû ĝian efikon al niaj personaj sentoj kaj konvinkoj, ili ankaû neas la potencon de Dio. En 2 Tim 3:5: "Havante ŝajnon de pieco, sed neinte ĝian potencon", t. e. la potencon de la vorto de la Evangelio.

Nia fundamentalismo estas mokata en la mondo. Same estis primokataj Paûlo kaj lia grupo da predikantoj: "ĉar la priparolo de la kruco estas por la pereantoj malsaĝeco; sed por ni, la savatoj, ĝi estas la potenco de Dio (1 Kor 1:18).

Konsciinte tion, ĉu ni ne tenos en niaj manoj la Biblion kun ankoraû pli granda respekto, ĉu ni ne legos ĝin kun ankoraû pli granda deziro por kompreni ĝin kaj obei al ĝi?

**Rilato De La Popolo De Dio Al La Dia Vorto**

Atenta legado de la Skriboj malkaŝas al ni, ke homoj, skribintaj la vortojn de la Biblio, bone konsciis, ke ne nur ili, sed ankaû ĉiuj aliaj skribintaj la Biblion, estis inspiritaj de Dio. La saman opinion havis la Sinjoro Jesuo Kristo. Antaû ol citi la Psalmaron de David, li diris la vortojn: "... David en la Spirito..." (Mt 22:43), montrantajn sian agnoskon de la fakto, ke la vortoj de David estis inspiritaj. Same Jesuo diris pri la skriboj de Moseo (Mk 7:8,9), nomante ilin "la ordono de Dio". Multaj "kristanoj" asertas, ke la pli granda parto de la Malnova Testamento estas mito, elpensaĵo. Tamen Jesuo kaj ankaû Paûlo neniam opiniis la Skribojn simile al tio.

Ekzemple, Jesuo agnoskis la reĝinon Ŝeba kiel nekontesteblan historian fakton (Mt 12:42). La saman rilaton al la Malnova Testamento havis ankaû la apostoloj. La apostolo Petro diris, ke krom tio, kion li persone aûdis de Jesuo, "ni havas la profetan vorton" (2 Pet 1:19-21). Petro ankaû egaligis la epistolojn de Paûlo al "la ceteraj skribaĵoj" (2 Pet 3:16).

En Agoj, la Epistoloj kaj Apokalipso estas multe da citaĵoj el la Evangelioj (ekzemple, Ag 13:51; Mt 10:14), kio konfirmas ne nur tion, ke ili ĉiuj estis inspiritaj de la Spirito, sed ankaû tion, ke la Evangelioj estis opiniataj de la fruaj kristanoj, kiel inspiritaj de Dio. Paûlo en 1Tim 5:18 citas kaj la Malnovan Testamenton (Read 15:4) kaj la Novan (Lk10:7), kaj nomas ilin ambaû "la Skribo". Li emfazas, ke lia mesaĝo ne estis lia, sed de Jesuo Kristo

(Gal 1:11,12; 1 Kor 2:13; 11:23; 15:3). Kaj tion ankaŭ agnoskas aliaj apostoloj. Tiel Jakobo 4:5 citas "la Skribon", kio laŭesence estas la vortoj de Paŭlo el Gal 5:17.

Dio "parolis al ni" en Jesuo Kristo kaj pro tio ni ne bezonas aliajn revelaciojn (Heb 1:2). La Biblio iufoje mencias aliajn skribojn, kiuj nun estas neatingeblaj por ni (ekzemple, la libro de Jaŝer, la skriboj de Nafan, Elijah, la Epistolo de Paŭlo al Korintanoj, kaj en la Tria Epistolo de Johano, v. 9, estas sugesto, ke Johano skribis leteron, nekonservitan, kiun Diotrefes rifuzis obei). Kial tiuj skriboj ne estis konservitaj por ni? Verŝajne pro tio, ke ili ne koncernas nin. Ni povas esti certaj, ke Dio konservis por ni ĉion, kio koncernas nin.

Iufoje oni povas aŭdi, ke la libroj de la Nova Testamento estis agnoskitaj kiel inspiritaj, ne tuj, sed iompostiome. Tamen tiu fakto, ke la apostoloj opiniis la Skribojn kiel inspiritaj, refutas tiun aserton. En tiu tempo ekzistis la donaco de la Sankta Spirito, pere de kiu oni povis kontroli, ĉu leteroj aŭ vortoj, kiuj pretendis esti inspiritaj, fakte estis tiaj (1 Kor 14:37; 1 Joh 4:1; Ap 2:2). Tio signifas, ke la inspiritaj leteroj senprokraste estis agnoskitaj kiel inspiritaj. Se elekto de libroj por la Biblio ne estus kontrolita de Dio, tiam la Biblio ne havus aŭtoritaton.

## 2.3 DONACOJ DE LA SANKTA SPIRITO

En Siaj rilatoj kun homoj Dio donis al ili de tempo al tempo por uzado Sian povon (la Sanktan Spiriton). Tamen tio neniam estis donite kiel "malplenigita ĉeko", permesante al homoj fari ĉion, kion ili volas. Ĉiam la Sankta Spirito estis sendita por servi al difinita celo. Post efektivigo de tiu celo la Sankta Spirito estis reprenita. Ni ĉiam devas memori, ke la spirito de Dio servas por efektivigi intencojn de Dio. Kaj Lia intenco ofte donas mallongdaŭran suferon en la vivo de homoj por ke efektiviĝu Lia longdaŭra celo (vidu Parton 6.1). Sekve, la Sankta Spirito ne ĉiam estis sendata por faciligi suferojn de homoj en tiu ĉi vivo. Ĉiu efektivigita pere de ĝi faciligo celas atingi pli altan celon - esprimi al ni intencojn de Dio.

Donitaj pli supre vortoj kontrastas al disvastigita nune rilato al la Sankta Spirito; oni opinias, ke fido al Kristo valoras tial, ke ĝi donos plibonigon de la sanstato, kiu devas efektiviĝi pere de Sankta Spirito.

Multaj nuntempaj kristanoj asertas, ke ili posedas miraklajn donacojn de la Sankta Spirito, tamen ili ne povas doni iun ajn certan respondon al la demando, por kiu celo tiuj donacoj estas donitaj al ili. Dio ĉiam donis Sian Spiriton al la homoj por iu ajn certa, konkreta celo. Kaj homoj, kiuj efektive posedis la Sanktajn donacojn, ĝuste sciis, por kiu celo ili devas uzi ilin. Pro tio ili atingadis plenajn sukcesojn. Kontraste al ili, nuntempaj homoj, asertantaj, ke

ili posedas la Sanktajn donacojn, ofte malsukcesas aû havas nur partan sukceson pri resanigo de homoj.

Ĉiuj donitaj pli sube ekzemploj montras, ke la donacoj de la Sankta Spirito estis donataj nur por certaj celoj. Neniu el ili montras, ke la donacoj de la Sankta Spirito estis donataj laû la volo de homo aû povis esti uzataj laû la deziro de homo.

- En la komenco de sia historio la Izraelidoj ricevis ordonon de Dio fari tendon (tabernaklon), en kiu povus esti gardata la altaro kaj aliaj sanktaĵoj. Dio donis detalajn indikojn kiel fari ĝin. Por plenumi tiun taskon Dio donis al difinitaj homoj Sian Spiriton, t. e. Li ilin "plenigis per spirito de saĝo" (El 28:3).

- Unu el tiuj homoj, Becalelo, estis plenigita "per Dia spirito, per saĝo kaj prudento kaj scio kaj ĉia arto por pripensi ideojn, por labori el oro kaj el arĝento... kaj por ĉizi ŝtonojn... por fari ĉian laboron" (El 31: 3-5).

- En la versoj Nom 11:14-17 estas dirite, ke la Spirito, donita al Moseo, estis prenita de li kaj transdonita al la plejaĝuloj de la Izraelidoj por ke ili havu eblecon ĝuste juĝi homojn kaj per tio mem depreni de Moseo parton da liaj zorgoj. Kaj antaû la morto de Moseo la spirita donaco estis transdonita al Josuo, filo de Nun, por ke li povu en la deca maniero gvidi la popolon de Dio (Read 34:9).

- Ekde tiu momento, kiam la Izraelidoj eniris sian landon kaj ĝis la surtroniĝo de ilia unua reĝo (Saûl), ilin gvidis homoj, kiuj nomiĝis juĝistoj. Dum tiu tempoperiodo ili ofte estis subpremitaj de malamikoj. En la Libro de Juĝistoj estas dirite, ke la spirito de Dio estis donita al kelkaj juĝistoj por savi la Izraelidojn de iliaj invadantoj. Al tiuj juĝistoj apartenas Otniel (Juĝ 3:10), Gideon (Juĝ 6:34) kaj Jiftaĥ (Juĝ 11:29).

- Al alia juĝisto Ŝimŝon la spirito de Dio estis donita por ke li mortigu leonon (Juĝ 14:5,6), mortigu tridek homojn (Juĝ 14:19) kaj disŝiru ŝnurojn, per kiuj li estis ŝnurita (Juĝ 15:14). Tiu "sankta spirito" ne estis donita al Ŝimŝon porĉiame - ĝi venis sur li por efektivigi certan celon kaj post plenumo de kiu ĝi estis deprenita de li.

- Kiam Dio volis transdoni specialan sciigon por Sia popolo, Li sendis Sian spiriton al iu homo, kaj tiu homo anoncis la vorton de Dio. Post

kiam la sciigo estis jam efektivigita, la donaco de la Spirito lasis tiun homon kaj tiu ĉi homo diradis denove siajn proprajn vortojn, ne la vortojn de Dio. Jen estas unu el multaj ekzemploj: "La spirito de Dio venis sur Zeĥarjan ... kaj diris al ili: Tiele diras Dio: Kial vi malobeas la ordonojn de la Eternulo?" (2 Kron 24:20).

Aliaj ekzemploj estas donitaj en la versoj 1 Kron 15:1 kaj Lk 4:18, 19.

El tio sekvas, ke la spirito de Dio estis donita por certa, konkreta celo kaj ne estis:

- garantio de savo;
- io, kio daŭras dum la tuta vivo;
- mita povo interne de ĝia posedanto;
- io gajnita de iu "persona travivaĵo".

Necesas rimarki, ke estas multe da dubindaj kaj malprecizaj rezonadoj pri donacoj de la Sankta Spirito. Tiel iuj homoj anoncas, ke ili ricevis la donacon de la Sankta Spirito, kaj allogas al si homojn asertante, ke ankaŭ ili ricevos la Sanktan Spiriton, se ili "akceptos Jesuon". Tamen necesas demandi sin: "Kio estas tiuj donacoj?". Estas malfacile kredi, ke homoj ne scias, kiujn donacojn ili havas. Al Ŝimŝon estis donita spirita donaco por mortigi leonon (Juĝ 14:5,6) ĝuste tiam, kiam li staris antaŭ blekeganta besto. Kaj li ĝuste sciis por kiu celo estis sendita al li la sankta donaco. Li ne dubis pri tio. La epizodo pri Ŝimŝon kontrastas al asertoj de tiuj homoj, kiuj nun anoncas, ke ili havas la Sanktan Spiriton, tamen ne povas okazigi iun ajn eksterordinaran agon; aldone al tio ili eĉ ne scias, kiujn donacojn ili posedas.

Tutcerte oni povas diri, ke tiuj homoj havis en sia vivo iujn dramajn emociajn konsternojn kunligitajn kun kristanismo, kiuj ŝanĝis ilian vivon kaj lasis en ili la senton de renaskiĝo. Sentante tion, ili prenas la Biblion, trovas en ĝi iun citon rilate al la Sankta Spirito kaj konkludas, ke tio estas skribite pri ili. Kaj ilia pastro kontente diras: "Ĝuste tiel. Gloro al Dio!" kaj demonstras ilin antaŭ aliaj parohanoj, kiel posedantojn de la Sankta Spirito. La ĉefa kialo de tiu travestio kuŝas en la manko de biblia kompreno en tiuj homoj antaŭ sia "konvertiĝo".

Dum nia batalo kontraŭ sintrompo de niaj propraj sentoj (Jer 17:9) ni devas firme stari sur la bazo de bibliaj principoj. Tio aparte necesas en studado pri la maniero, laŭ kiu la spirito de Dio funkcias. Al ĉiuj ni plaĉas pensi, ke la povo de Dio agas kun ni en niaj vivoj. Sed kiel kaj kial Li faras tion? Ĉu posedas ni fakte donacojn de la Spirito, kiel posedis ilin la homoj de la Biblio? Se ni efektive volas kompreni Dion kaj havi vivan rilatecon kun Li, ni devas agnoski bezonon de ĝusta kompreno de tiu fenomeno.

**Kialoj Por Posedi La Sanktajn Donacojn En La Unua Jarcento**

Memorante la bazajn principojn, kiujn ni jam lernis pri la donacoj de Dia Spirito, ni transiras nun al la skriboj de la Nova Testamento pri la spiritaj donacoj, kiujn havis la frua eklezio (t. e. la grupo da kredantoj, vivintaj en la unua jarcento post Kristo).

La lasta instrukcio de Kristo al la apostoloj estis iri tra la tuta mondo, predikante la Evangelion (Mk 16:15,16). Kaj ili sekvis la instrukcion, predikante ĉefe pri la morto de Kristo kaj pri lia releviĝo. Tamen necesas atenti, ke en tiu tempo dume ne ekzistis tiu Nova Testamento, kiun ni scias nune. En tiu tempo, kiam ili staris en bazaroj aŭ sinagogoj kaj parolis pri Jesuo, la ĉarpentisto el Nazaret, kiu estis senriproĉa, kiu mortis kaj poste reviviĝis ĝustkonforme al la profetaĵo de la Malnova Testamento, kaj kiu nun petas ilin baptiĝi kaj sekvi Lian ekzemplon, tiam ilia parolado povis ŝajni stranga.

En tiuj tagoj estis ankaŭ aliaj predikantoj, kiuj penis allogi homojn al si kaj krei kultajn sekvantarojn. Necesis do, ke estiĝu rimedo por pruvi al la mondo, ke la mesaĝo, predikata de la kristanoj, estis de Dio mem, kaj ne estis la filozofio de iu grupo da fiŝistoj el norda Izraelo.

En nia tempo ni turnas nin al la Skriboj de la Nova Testamento, kiuj diras pri la agoj kaj doktrino de Jesuo Kristo. Ni estas konvinkitaj, ke tiuj ĉi Skriboj estas mesaĝo de Dio. Sed en tiuj tagoj, kiam la Nova Testamento dume ne estis skribita, Dio donis al predikantoj la eblecon uzi Lian Sanktan Spiriton por konfirmi tion, pri kio ili parolis. Tio estis la preciza kialo por la uzado de la donacoj antaŭ la mondo. La donacoj de la Sankta Spirito ankaŭ estis bezonataj por fortikigi la fidon ĉe fidantoj mem, plenumante la nuntempan rolon de la Nova Testamento. Por gvidi la fruajn fidantojn, por fortikigi ilian fidon je Kristo, ĝis tiu tempo, kiam estos skribita kaj publikita la Nova Testamento, estis donitaj al ili la donacoj de la Sankta Spirito.

Kiel kutime, la kialoj por sendi la Sanktan Spiriton estis plene klarigitaj:

- "Tial li diras: Kiam li (Jesuo) supreniris alten, li... donis donacojn al homoj... por perfektigo de la sanktuloj, por la laboro de pastrado, por la konstruo de la korpo de Kristo", t. e. la kredantoj (Ef 4:8,12).

- Paŭlo tiel skribis al la kredantoj en Romo: "Mi sopiras vin vidi, por ke mi transdonu al vi ian spiritan donacon, por ke vi estu firmigitaj" (Rom 1:11).

Rilate al la uzo de la donacoj por konfirmi la predikadon de la Evangelio ni legas:

- "Nia evangelio venis al vi ne nur parole, sed ankaŭ kun potenco kaj kun la Sankta Spirito kaj plena certigo" per la mirakloj faritaj (1 Tes 1:5; kmp. 1 Kor 1:5,6).

- En Rom 15:18,19 Paŭlo povis diri pri "tio, kion Kristo faris per mi por obeigi la nacianojn, vorte kaj fare en la potenco de signoj kaj mirindaĵoj, en la potenco de la Sankta Spirito".

- Rilate al la predikantoj de la Evangelio ni legas, ke ili agis "dum Dio ankaŭ kunatestis per signoj kaj mirindaĵoj kaj diversaj potencaĵoj kaj disdonoj de la Sankta Spirito laŭ Sia volo" (Heb 2:4).

- Predikado pri la Evangelio sur Cipro estis akompanata per mirindaĵoj tiel, ke "la prokonsulo, vidinte la okazintaĵon, kredis, mirigite de la instruado de la Sinjoro" (Ag 13:12). Tiuj mirindaĵoj fakte fortikigis lian kredon je Kristo. Ankaŭ en Ikonio ili parolis "en la Sinjoro, kiu atestis pri la vorto de Sia graco, lasante, ke signoj kaj mirakloj fariĝu per iliaj manoj" (Ag 14:3).

Ĉion tion resumas la vortoj pri la obeemo de la apostoloj al la ordono prediki: "Kaj elirinte, ili predikis ĉie, kaj la Sinjoro laboris kun ili kaj fortikigis la vorton per la signoj, kiuj sekvis" (Mk 16:20).

### Por Ĉiu Afero Estas Sia Tempo

La donacoj de la Sankta Spirito estis donataj por iuj certaj celoj kaj en certaj tempoj. Tio pruvas la eraron de tiuj homoj, kiuj asertas, ke ili posedas la miraklan donacon dum la tuta vivo. La apostoloj, inkluzive Petron, "ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito" en la tago de Pentekosto, baldaŭ post kiam Jesuo estis akceptita supren (Ag 2:4). Tial ili povis paroli en aliaj lingvoj por verve prediki la kristanan Evangelion. Kiam la aŭtoritatuloj provis haltigi ilian predikadon, "Petro, plenigite de la Sankta Spirito" povis do konvinke respondi al ili (Ag 4:8). Post sia liberigo el la karcero ili daŭrigis prediki sub la influo de la Sankta Spirito "kaj ili ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj parolis kuraĝe la vorton de Dio" (Ag 4:31).

Dirante pri la miraklaj donacoj, Paŭlo skribis, ke la fruaj kredantoj posedis ilin "laŭ la mezuro de la dono de Kristo" (Ef 4:7). La greka vorto

“mezuro” signifas iun limigitan parton aû gradon. Nur Jesuo posedis la Sanktan Spiriton senlimigite, t. e. uzis ĝin tutlibere laû sia bontrovo (Joh 3:34).

Nun ni konsideros tiujn spiritaj donacojn, kiuj estis pli ofte uzataj en la unua jarcento.

**LA SPIRITAJ DONACOJ EN LA UNUA JARCENTO**

## Profeteco

La greka vorto “profeto” signifas iun, inspiritan por diri la vortojn de Dio, kio foje inkluzivis antaûdiradon de estontajn eventojn (2 Pet 1:19-21). Ekzemple, “Kaj en tiuj tagoj profetoj el Ierusalemo vojaĝis al Antioĥio. Kaj stariĝis unu el ili, nomata Agabo, kaj deklaris per la Spirito, ke estos granda malsato tra la tuta mondo: kaj tio okazis en la tagoj de Klaûdio. Kaj la disĉiploj decidis, ke ĉiu laû sia bonstato sendu helpon al la fratoj, kiuj loĝis en Judujo” (Ag 11:27-29). Similaj specifaj profetaĵoj, kiuj tute efektiviĝos post malmultaj jaroj, tute mankas ĉe tiuj, kiuj pretendas posedi la donacon profeti. Sed en tiu tempo la fruaj kredantoj tiel firme kredis, ke ili efektive posedas la donacon por profeti, ke ili oferadis sian liberan tempon kaj monon por helpi al homoj, kiujn trafos la antaûdirita malsato. Ĉu multe da similaj ekzemploj oni povas renkonti en nunaj, tiel nomataj, “spiritaj” eklezioj?

## Resanigo

Estis taûge, ke la apostoloj predikintaj bonajn novaĵojn (Evangelion) pri la alveno de Dia Regno surteron, devis konfirmi siajn vortojn per mirindaĵoj, kiuj donus eblecon imagi tiun tempon, kiam “malkovriĝos la okuloj de la blinduloj, kaj la oreloj de la surduloj malfermiĝos... la lamulo eksaltos kiel cervo, kaj la lango de la mutulo ekkantos” (Jes 35:5,6). Post kiam la Regno de Dio stariĝos surtere, tiaj promesoj estos okazigataj ĉie kaj plenmezure. Kaj neniu dubos, ĉu venis jam la Regno de Dio aû ne. Nome pro tio la profetaĵon pri la Regno akompanadis mirindaj agoj, pro kiuj neniu povis dubi, ĉar ilin la fruaj kredantoj okazigis publike.

La klasika ekzemplo estas la resanigo pere de Petro de la lama almozulo. Pro tio, ke tiu almozulo estis ĉiumatene portita kaj sidigita apud la pordego de la templo (Ag 3:2), li estis konata persono en la urbo. Resanigita per la Sankta Spirito pere de Petro, “li suprensalte stariĝis, kaj piediris; kaj li eniris kun ili en la templon, piedirante kaj saltante, kaj laûdante Dion. Kaj la tuta popolo vidis lin piedirantan kaj laûdantan Dion; kaj ili rekonis lin, ke li estas tiu, kiu sidis por almozo apud la Bela Pordego de la templo, kaj ili pleniĝis de mirego kaj konfuziĝo pri tio, kio okazis al li. Kaj dum li tenis Petron kaj Johanon, la tuta

popolo kunkuris al ili en la portikon nomata Salomona, miregante” (Ag 3:7-11). Tiam Petro senprokraste komencis paroli al la popolo pri la reviviĝo de Kristo. Ni povas esti certaj, ke la aŭskultantoj, vidante tiun konvinkan kaj nerifuteblan pruvon, akceptis la vortojn de Petro kiel de Dio Mem. La templo “en la horo de la preĝado” (Ag 3:1) estis plenigita de homoj, same kiel salono de vendejo dum sabata mateno. Kaj tiu ĉi loko estis elektita de Dio por konfirmi la predikadon de Lia Vorto per tiu efekta kaj mirakla rimedo.

Ankaŭ en Ag 5:12 ni legas, ke per la manoj de la apostoloj estis faritaj multaj signoj kaj mirindaĵoj meze de la popolamaso. Necesas rimarki, ke tiuj popolamasoj estis plenigitaj de skeptikeco kaj malamikeco, kontraste al tiuj de la nuntempaj “pentekostanoj”, kiuj ie en malgrandaj eklezioj atendas miraklon.

La aŭtoro de tiuj ĉi linioj ofte diskutadis pri tiu ĉi temo kun homoj, kiuj asertas, ke ili posedas la Spiriton, kaj ankaŭ ĉeestis dum, tiel nomataj, seansoj de resanigoj, kiuj estis nekonvinkaj kaj en la plej bona okazo resanigis nur parte kaj ne por ĉiam. Ĉiu honesta ano de tiuj eklezioj agnoskos, ke rezultoj de tiuj resanigoj rapide ĉesas. Multfoje mi diris al miaj amikoj pentekostanoj: “Mi ne volas nei, ke vi posedas tiun fortan povon. Sed Dio ĉiam klare montras, kiu posedas Lian povon kaj kiu ne posedas. Kaj tial, ĉu ne estas logike peti vin, ke vi demonstru vian kapablecon je mi, tiam, povas esti, mi estos pli ema agnoski vian doktrinon, kiun nuntempe mi ne povas kunigi kun la Skribo. Tamen neniam oni povis demonstri al mi elmontron de la spirito kaj povo.

Kontraste al tiu mia vidpunkto, la ortodoksaj judoj de la unua jarcento tute neis la eblecon, ke la kristanoj posedas miraklajn spiritajn donacojn de Dio. Tamen eĉ ili mem devis konfesi, “estas videble por ĉiuj loĝantoj en Jerusalem, ke rimarkinda signo fariĝis per ili, kaj nei ĝin ni ne povas” (Ag 4:16). Jen aŭtentika miraklo, kiu fariĝis bone sciata kaj agnoskita tra la tuta Jerusalemo. Se io simila okazus en la centro de Londono, ekzemple, estus tutmonda agnosko, ke la miraklajn donacojn de Dio oni posedas hodiaŭ. Sed anstataŭ tio pentekostanoj atendas, ke la mondo akceptos la sekvajn specojn da “atesto” kiel pruvon, ke ili mem posedas tiujn donacojn:

- Resanigo (eventuale) de stomakulcero. Ili opinias, ke la proceso de resaniĝo komenciĝas tuj post preĝkunveno;
- rektigo de difektitaj membroj;
- plibonigo de vidpovo aŭ aŭdpovo (kvankam ofte kun reveno al la antaŭa stato);
- forigo de deprimo.

Al tio necesas aldoni tiun fakton, ke kiam ambulancoj alveturigis pacientojn en la religian resanigan centron de pentekostanoj en Najrobi

(Kenjo), la kondukistojn alfrontis etika dilemo: ĉu resti tie, aŭ iri returne al la hospitalo. Ili restis, kaj tio estis ja bone, ĉar la suferantoj ne estis resanigitaj.

Malgraŭ tio multnombraj afiŝoj alvokas viziti iliajn kunvenojn: "Alvenu, atendante miraklon!". Tiu farita de ili scenejo, vidpunkte de psikologio, servas kiel preparo por ĉiuspeca memsugesto kaj al ĝi simila. Tamen nenie en la Nova Testamento vi povas trovi kvankam iu ajn aludon pri neceso de tiu forta psika influo antaŭ okazigo de miraklo. Estas evidente, ke en la unua jarcento multaj resanigitaj homoj tute ne havis iun ajn religian kredon, kaj estis unu, kiu eĉ ne sciis, ke lin resanigis Jesuo. Nune do necesan psikan staton oni atingas per sensenca ripetado de preĝoj, tamburaj ritmoj kaj ekscita muziko. Sendube, dum tio forestiĝas ĉia racia konscio pri Dio kaj pri io ajn alia. La muziko sufokas ĉion. La aŭtoro de tiu ĉi libro vizitis kelkajn similajn kunvenojn en diversaj lokoj, kaj ĉiufoje li sentis akran kapdoloron pro la penado konservi racian, klaran biblian konscion kaj ne cedi al la tento droniĝi en la ritmoj de tamburoj kaj aplaŭdoj. Ĉio tio estas necesa preludo por pentekostana "miraklo" kaj konfirmas, ke tiaj "resanigoj" pli estas rezulto de emocia kaj psika stato, ol senpera elmontrigo de la Dia Spirito.

Kontraste al tio, Petro povis uzi la veran donacon de Dio por resanigi malsanulojn, dum ili kuŝis sur la stratoj: "oni elportis la malsanulojn sur la stratojn kaj kuŝigis ilin sur litoj kaj kanapoj, por ke ĉe preterpaso de Petro, almenaŭ lia ombro ombru iun el ili" (Ag 5:15). Paŭlo uzis la miraklan donacon dum ĉeesto de la nekredanta prokonsulo (Ag 13:8-13), kaj de multaj el la paganoj, loĝantaj en la urbo Listra (Ag 14: 8-13). Kiel postulis la celo mem kaj la karaktero de la spiritaj donacoj, ĉiujn tiujn miraklojn oni okazigis publike, tiel ke ĉiuj devis konfesi, ke la povo de Dio estis malkaŝe efektivigita pere de Liaj servantoj. Tio similas al la mirakla resanigo, kiun okazigis Jesuo Kristo en Mk 2:12: "...kaj li leviĝis, kaj tuj prenis la liton, kaj eliris antaŭ ĉiuj, tiel ke ĉiuj miregis, kaj gloris Dion, dirante: neniam ni vidis ion tian".

### Lingvoj

La apostoloj, el kiuj kelkaj estis simplaj fiŝistoj, ricevis grandan komision iri en la tutan mondon, predikante la Evangelion (Mk 16:15,16). Estas eble, ke ilia unua reago estis jena: "Sed mi ne scias (aliajn) lingvojn!". Ili eĉ ne povis diri: "Mi ne sukcesis pri lingvoj en lernejo", ĉar ili neniam lernis en lernejo. Laŭ iliaj aspektoj oni povis kompreni, "ke ili estas malkleruloj kaj nesciuloj" (Ag 4:13). Kaj eĉ por pli kleraj predikantoj (ekzemple, por Paŭlo) la lingva problemo estis tre grava. Novaj kredantoj bezonis predikojn kaj edifan helpon unu de la alia, kaj (dum forestis la Nova Testamento) nescipovo de lingvoj estis ne malgranda problemo.

Por venki tiujn malfacilaĵojn en interrilatoj, al ili estis donita la sankta donaco de parolpovo en, kaj kompreno de fremdaj lingvoj. En la originala greka teksto oni uzas la vorton “glossa” por “lingvo”. “Glossa” fakte signifas baze “langon”, kaj la pentekostanoj mem uzas la vorton “langoj” por sia tiel nomata “donaco”, kiu konsistas el nekompreneblaj sonoj. Tamen en la Nova Testamento la vorto “glossa” estas tradukita kiel “fremda lingvo”, kaj la Esperanto Biblio tute ĝuste preskaŭ ĉiam uzas la vorton “lingvo” por traduki “glossa”.

Dum la juda festo de Pentekosto, baldaŭ post la suprenleviĝo de Kristo al la ĉielo, la apostoloj “pleniĝis de la Sankta Spirito, kaj komencis paroli aliajn lingvojn... la homamaso kunvenis (ree publika elmontriĝo de la sanktaj donacoj!) kaj miregis, ĉar ĉiu aparte aŭdis ilin paroli per lia propra dialekto. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj miris, dirante unu al la alia: Rigardu! Ĉu ne estas Galileanoj ĉiuj tiuj parolantoj? Kiel do ni aŭdas ĉiu en sia dialekto, en kiu ni naskiĝis? Partoj kaj Medoj... Judoj kaj prozelitoj, Kretanoj kaj Araboj – ni aŭdas ilin paroli en niaj lingvoj la mirindaĵojn de Dio. Kaj ĉiuj konfuziĝis kaj embarasiĝis...” (Ag 2:4-12). Estas malverŝajne, ke necesus la duobla emfazo (“konfuziĝo”, “miro”), se la homamaso aŭdis nur tian nekompreneblan sonkonfuzaĵon, kian parolas tiuj, kiuj nuntempe pretendas posedi la donacon.

En 1 Kor 14 estas listo da ordonoj rilate al uzado de la sankta donaco pri lingvoj. Tiu ĉi ĉapitro estas la inspirplena kritiko de Paŭlo rilate al malbonuzo de la donacoj en la frua eklezio kaj tiamaniere ĝi donas la eblecon kompreni la esencon de la donacoj de lingvoj kaj profetaĵoj. Pli sube ni donos kurtan komenton rilate al tio:

La verso 37 estas ŝlosila:
“Se iu ŝajnas al si esti profeto aŭ laŭspirita, li sciiĝu pri tio, kion mi skribas al vi, ke ĝi estas la ordono de la Sinjoro”.

Kaj pro tio, se iu ajn pretendas, ke li posedas la spiritajn donacojn, li devas akcepti, ke la antaŭaj ordonoj pri la uzado de donacoj estas inspiritaj de Dio. Pro tio, iu ajn, kiu hodiaŭ malobeas al tiuj ordonoj, malkaŝe konfesas, ke li intence malatentas la inspiritajn vortojn de Dio.

Versoj 11-17:
“Se do mi ne scios la signifon de la voĉo, mi estos, rilate la parolanton, barbaro, kaj la parolanto estos por mi barbaro”.

“Tiel same ankaŭ vi, dum vi fervore deziras spiritajn donacojn, klopodu, ke vi havu abunde por la edifo de la eklezio”.
“Tial kiu parolas per lingvo, tiu preĝu, ke li interpretu.”

"Ĉar se mi preĝas per lingvo, mia spirito preĝas, sed mia intelekto estas senfrukta."

"Kio do estas? Mi preĝos spirite, kaj mi preĝos ankaŭ intelekte; mi kantos spirite, kaj mi kantos ankaŭ intelekte."

"Alie, se vi benas spirite, kiamaniere tiu, kiu okupas la lokon de la malklerulo, diros Amen ĉe via dankesprimo? Ĉar li ne scias, kion vi diras".

"Ĉar vi ja bone dankesprimas, sed la alia ne estas edifata."

Pro tio estas sensence paroli en lingvo, kiun la ĉeestantoj ne komprenas. Ĉar kiel oni povas diri "Amen" en la fino de "preĝo", se ĝi estis por ili nekomprenebla murmurado. Ja la vorto "Amen" signifas "Estu tiel", t. e. "Mi plene konsentas pri tio, kio estis dirite en tiu ĉi preĝo". Kaj paroli en lingvo, kiun ne komprenas viaj fratoj, ne edifas ilin, diras Paŭlo.

Mi memoras la okazon, kiam apud la citadelo de Billi Greham mi disdonadis broŝurojn, kiuj enhavis alvokojn al homoj reveni al la Bibliaj bazoj de kristanismo. Unu ekscitita virino penis konvinki min, ke mia kristadelfiana doktrino estas la doktrino gvidata de diablo. Ĉirkaŭ dum 10 minutoj ŝi parolis sensencaĵojn "per lingvoj". Memkompreneble mi ne povis esti "edifita" per tio. Paŭlo ordonis, ke tion ni ne faru.

Verso 18:
"Mi dankas Dion, mi parolas per lingvoj pli ol vi ĉiuj".

Pro tio, ke Paŭlo predikante la doktrinon de Kristo, vojaĝis pli multe, ol aliaj, li pli ol ĉiuj bezonis la donacon paroli en fremdaj lingvoj.

Verso 19:
"Tamen en la eklezio mi preferus paroli kvin vortojn per mia intelekto, por ke mi instruu ankaŭ aliajn, ol dek mil vortojn per lingvo."

Tio estas klara. Mallonga frazo en mia patrina lingvo estos por mi pli utila, ol multhora predikado al mi en fremda lingvo, tute ne komprenebla por mi.

Verso 22:

> “Tial la lingvoj estas kiel signo, ne al la kredantoj, sed al la nekredantoj; sed la profetpovo estas kiel signo, ne al la nekredantoj, sed al la kredantoj.”

Tial la donaco de lingvoj necesis ĉefe por prediki la Evangelion al nekredantoj. Tamen hodiaŭ la pli granda parto da pretendoj pri “lingvoj” okazas inter grupoj da “kredantoj”, aŭ kiam ili estas solaj.

Rimarkeble estas kronika manko da homoj, kiuj povus mirakle paroli en fremdaj lingvoj por prediki la Evangelion. En la komenco de 1990-aj jaroj aperis ebleco prediki la doktrinon de Kristo en Orienta Eŭropo, tamen la (tiel nomataj) evangeliaj eklezioj pro lingvaj baroj estis devigitaj disvastigi siajn literaturon, skribitan en la angla lingvo! Sendube la donaco de lingvoj estus tre utila por ili, se ili posedus ĝin. Kaj eĉ la fama predikanto Rejnard Sejber, predikanta al multnombraj homamasoj, dum kunvenoj en la urbo Kampala (Ugando) estis devigita paroli, uzante tradukiston.

Verso 23:

> “Se do la tuta eklezio kunvenos, kaj ĉiuj parolos per lingvoj, kaj tien envenos nekleruloj aŭ nekredantoj, ĉu ili ne diros, ke vi frenezas?”

Kaj ĝuste tiu fakte okazis. En Okcidenta Afriko mahometanoj kaj paganoj egale priridadis la strangan konduton de tiuj, kiuj asertis, ke ili posedas la donacon de lingvoj. Kaj eĉ trankvilkaraktera kristano, observante el post la angulo kunvenon de pentekostanoj, sentus tenton opinii, ke antaŭ li estas frenezuloj.

La verso 27:

> “Se oni parolas per lingvoj, tio estu duope, aŭ triope je plejmulto, kaj laŭvice; kaj unu interpretu”.

Nur du aŭ tri personoj povus paroli en diversaj lingvoj dum ĉiu Diservo. Estas neverŝajne, ke en iu kunveno estus parolitaj pli ol tri diversaj lingvoj. La Diservo baldaŭ perdus sian bonordecon, se necesus traduki ĉiun frazon pli ol dufoje. Se la donaco de lingvoj elmontriĝus dum kunveno en la centra parto de Londono, kiun partoprenus kelkaj francaj kaj germanaj turistoj, la oratoroj eble komencus siajn elpaŝojn tiele:

Pastro (angle): Good evening.
Franca oratoro: Bon soir.
Germana oratoro: Guten abend.

Sed certe, ili devus paroli laŭvice, unu post la alia. Estus ja parolhaoso, se ili ĉiuj estus parolantaj samtempe. Tamen, pro la baze emocia karaktero de

nuntempa parolado en "langoj", tio fakte okazas, kaj multaj parolas "lange" samtempe. Mi mem havis okazon vidi ion similan, kiam nur unu homo komencas paroli, kaj ankaû aliaj tuj komencas paroli.

La donaco de lingvoj ofte estis kunigita kun la donaco profeti, por ke inspirita de Dio mesaĝo, estu eldirita (pere de la donaco de lingvoj) en alia, fremda lingvo (pere de la donaco profeti). Ekzemplon de tiu uzo de la donacoj oni povas trovi en la verso Ag 19:6. "Kaj unu interpretu; sed se ne ĉeestas interpretanto, oni silentu en la eklezio" (1 Kor 14:17,28). Kiam nuntempaj pretendantoj je scio pri lingvoj parolas tiel, ke ilin neniu komprenas kaj parolas ili sen tradukisto, tio estas evidenta demonstro de malobeo al la indiko de Paûlo.

La versoj 32, 33:

"Kaj la spiritoj de la profetoj estas submetataj al la profetoj; ĉar Dio estas Dio ne de konfuzo, sed de paco; kiel en ĉiuj eklezioj de la sanktuloj".

El tio sekvas, ke posedo de la sanktaj donacoj ne devas esti komprenata tiel, ke tiuj ĉi donacoj eligas homon el reala, normala konscio: la donita spirito ĉiam estas sub la kontrolo de posedanto kaj ne devigas lin agi kontraû sia propra volo. Ofte oni erare opinias, ke demonoj aû "malbonaj spiritoj" enloĝiĝas en nekredantoj, sed kredantoj pleniĝas de la Sankta Spirito (vidu Parto 6:3). Sed la forto de la Spirito, pri kiu temas en la verso 1 Kor 14:32, estis kontrolata de sia posedanto. Kaj krom tio, kiel ni jam diris pli supre, fortoj de la Sankta Spirito descendis al la apostoloj en certaj tempoj por certaj celoj, sed ne estis en ili ĉiame. La alvoko al nuntempaj "posedantoj" de la donacoj uzi ilin konforme al la Dia amo de paco kaj malamo de konfuzo (v. 33), verŝajne, falas nun al surdaj oreloj en pentekostaj eklezioj.

La verso 34:

"La virinoj silentadu en la eklezioj; ĉar ne estas permesite al ili paroli, sed ili submetiĝu, kiel ankaû diras la leĝo".

Kontekste al uzo de la Sanktaj donacoj, estas nekontesteble substrekite, ke virinoj ne devas uzi ilin dum eklezia servo. Tamen nune tiu ĉi rekomendo renkontas nekonsenton de ĉiuj, ĉar la fenomeno paroli en sensenca lingvo klariĝas per emocia ekscitiĝo, transdonata de unu homo al la alia inter la ĉeestantoj. Virinoj, infanoj kaj ankaû ĉiu homo, emaj al tio, povas esti kaptitaj per senbrida impeto, kaj pro tio, fari la furiozajn elkriojn, kiuj estas trompe prezentitaj kiel "fremdaj lingvoj". En nuntempaj eklezioj la elstareco de virinoj en tiel nomata parolado "en lingvoj" kaj en "profetado" ne povas akordiĝi kun la ordono en verso 34. Estas ridinda kaj senrespondenca la aserto, ke Paûlo estis

kvazaŭ malamanto de virinoj. La sekva verso konvinke rifutas tion: "Se iu ŝajnas al si esti profeto aŭ laŭspirita, li sciiĝu pri tio, kion mi skribas al vi, ke ĝi estas la ordono de la Sinjoro" (1 Kor 14:37), sed ne de Paŭlo persone.

Pro tio, iu ajn, kiu kredas, ke la Biblio estas inspirita de Dio, devas akcepti la ordonojn, donitaj en la ĉapitro 1 Kor 14, kaj observi ilin. Malkaŝe malatenti ilin povas signifi nur foreston de la kredo, ke la Evangelio estas inspirita de Dio, aŭ memagnoskon, ke ĉe li forestas spirita talento. Homo kun tiuj ĉi opinioj neos, ke la edifoj en 1 Kor 14 estas la edifoj de Dio por ni. Konsiderante ĉion pli supre diritan, kiel oni povas esti anoj de similaj eklezioj aŭ havi bonajn rilatojn kun iliaj adeptoj?

### 2.4 LA ELPRENO DE LA DONACOJ

La miraklaj donacoj de la Dia Spirito ree estos uzataj de la kredantoj post la reveno de Kristo, por ŝanĝi la ekzistan mondon je la Regno de Dio. Pro tio do la donacoj nomiĝas "la potencoj de la estonta mondo" (Heb 6:4,5); kaj Joel 2:26-29 priskribas grandan elverŝon de la spiritaj donacoj post la pento de Izraelidoj. La fakto mem, ke tiuj ĉi donacoj estos donitaj al la kredantoj post la reveno de Kristo, klare pruvas, ke nun oni ne posedas ilin, kaj ĉiu kristano, havanta malfermitajn okulojn al la Evangelio kaj al eventoj en la mondo, vidas, ke la reveno de Kristo devas okazi en la proksima estonteco (vidu Komenton 3).

Estas klaraj bibliaj antaŭdiroj, ke je iu tempopunkto inter la unua jarcento, kiam homoj posedis la donacojn, kaj la dua alveno de Kristo, la donacoj estos reprenitaj:

> "Cu estas profetadoj, ili neniiĝos; ĉu lingvoj, ili ĉesiĝos; ĉu estas scio, ĝi neniiĝos. Ĉar ni scias laŭparte, kaj ni profetadas laŭ parte; sed kiam venos perfektaĵo, tiam neniiĝos tio, kio esta laŭparta" (1 Kor 13:8-10).

La donacoj de la unua jarcento devis esti reprenitaj, ĝis " kiam venos perfektaĵo". La greka vorto, tradukita "perfektaĵo", ĉi tie ne rilatas al senpekeco, sed signifas ion kompletan, havantan neniun mankon. Ĉi tiu perfektaĵo devis anstataŭigi la laŭpartan scion, kiun posedis la fruaj kristanoj konsekvence al la donaco de profetado. Profetado estis la donaco elparoli la inspiritajn vortojn de Dio; la Biblio konsistas el tiuj vortoj.

En la unua jarcento ordinara kredanto sciis nur parton da tiu Nova Testamento, kiun ni scias nune. Li povis aŭdi de la presbiteroj de sia eklezio kelkajn profetaĵojn rilate al la praktika vivo. Li sciis iom de la vivo de Jesuo kaj povis esti, ke li jam aŭskultis, kiam iu laŭte legis unu-du el la epistoloj de

Paûlo. Sed post kiam la vortoj de profetaĵoj estis finskribitaj kaj disvastigitaj, la donaco de profetado iĝis jam nenecesa. Kio kompletiĝis, tio iĝis la Nova Testamento, kiu anstataûgis la spiritajn donacojn.

> "Ĉiu skribaĵo inspirita de Dio estas ankaû utila por instruo, por admono, por korekto, por disciplino en justeco; por ke la homo de Dio estu perfekta, plene provizita por ĉiu bona laboro" (2 Tim 3:16,17).

Tio, kio perfektigas, estas "ĉiu skribaĵo inspirita de Dio". Post kiam "ĉiu skribaĵo" estis finskribita, do jam venis tio, kio estas "perfekta", kaj la miraklaj donacoj estis elprenitaj.

La versoj el la epistolo al la Efesanoj 4:8-14 helpas nin pli bone kompreni tion.

> "Tiel li diris: Kiam li (Jesuo) supreniris alten (al la ĉielo)... Kaj donis donacojn al homoj... por la konstruo de la korpo de Kristo, ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido kaj la scio de la Filo de Dio, ĝis la nomo perfekta... por ke ni jam ne estu infanoj, onde ĵetataj kaj ĉirkaûpelataj de ĉiu vento de doktrino...".

La donacoj de la unua jarcento devis esti sendataj ĝis la homo de Dio fariĝos perfekta aû spirite matura: kaj la versoj 2 Tim 3:16,17 diras, ke "la homo de Dio" fariĝas "perfekta" per la gvidado de "ĉiu skribaĵo". Ĉar "ĉiu skribaĵo" estis inspirita de Dio kaj estas jam finskribita kaj havebla, do mankas kialo por konfuzo pro la diverseco de la doktrinoj, proponitaj de diversaj eklezioj. Estas nur unu Biblio, kaj ĉar "Via Vorto estas vero" (Joh 17:17), per studado de ĝiaj paĝoj, ni povas trovi "unuecon de la fido" (t. e. unu fidon, kiel estas dirite en Ef 4:13). Tial veraj kristanoj havis tiun unuecon de la fido. Ĉi-sence ili estas plene "perfektaj" rezulte de ilia perfektiĝo per la perfekta vorto de Dio.

Interalie, atentu, kiel en la verso Ef 4:14 la tempo de la posedo de miraklaj donacoj estas komparata kun spirita infaneco; sekvas, ke fiero pri posedo de spiritaj donacoj ne estas indiko de spirita matureco. Ankaû la saman diras 1 Kor 13:11. Do ĉiu leganto de tiuj ĉi vortoj devas pli aspiri al scio de la skribita Vorto de Dio, ĝoji pri la kompleteco de la Dia revelacio al ni pri Si Mem kaj respondi al tio per humila obeemo.

**Nuntempaj Pretendoj Je Posedo De La Spirito**

Kaj por la fino de tiu ĉi temo necesas fari kelkajn rimarkojn konekse al plurfojaj asertoj de tiuj homoj, kiuj opinias, ke ili posedas la donacojn de la Spirito:

- Nuntempa "parolado per lingvoj" havas tendencon al la multfoja repetado de kurtaj silaboj, ekzemple, "lala, lala, lala; ŝama, ŝama; Jesuo, Jesuo", kiuj ne rilatas sintakse al iu ajn lingvo. Ĉiu homo, aŭdante fremdan parolon, kvankam ne komprenante la fremdlingvajn vortojn, tamen laŭ specifikaj sonsonoj, laŭ vortordoj kaj prononcoj, li povas kompreni, ke homoj ion komunikas. Sed nuntempa lingvoparolado ne havas tiun karakteron. Tio substrekas la fakton, ke ĝi ne provizas edifon, kiu estis la celo de la spiritaj donacoj en la unua jarcento.

- Iuj pentekostanoj asertas, ke parolado per lingvoj estas signo, ke oni estas "savita" kaj ĝi akompanas ĉiun veran konverton.
Tio kontraŭas al la priskriboj de la fruaj eklezioj, en kiuj posedantoj de la donacoj similis al diversaj korpopartoj. Ne ĉiu estis mano aŭ piedo, kaj simile, iu ajn specifa donaco, ekzemple lingvoparolado, ne estis posedita de ĉiuj. 1 Kor 12:17, 27-30 klarigas tion:

> "Se la tuta korpo estus okulo, kie estus la aŭdado? Se la tuta estus aŭdado, kie estus la florado?" "Vi do estas la korpo de Kristo, kaj membroj en ĝi, ĉiu laŭ sia parto. Kaj Dio metis iujn en la eklezio, unue apostolojn, due profetojn, trie instruantojn, poste miraklojn, poste donacojn de kuracado, helpojn, direktojn, diversajn lingvojn. Ĉu ĉiuj estas apostoloj? Ĉu ĉiuj profetoj? Ĉu ĉiuj instruantoj? Ĉu ĉiuj mirakluloj? Ĉu ĉiuj havas kuracan povon? Ĉu ĉiuj parolas per lingvoj? Ĉu ĉiuj interpretas?"

Same, pli frue en la sama ĉapitro:

"Ĉar al unu estas donite per la Spirito la vorto de saĝeco; kaj al alia, la vorto de scio, laŭ la sama Spirito; al alia, fido, en la sama Spirito; al alia, donacoj de resanigoj, en la unu Spirito; kaj al alia, energioj por mirakloj; kaj al alia, profetpovo; kaj al alia, distingoj de spiritoj; al alia, diversaj lingvoj; kaj al alia, interpreto de lingvoj; sed cion tion energias la unu sama Spirito, dividante al ĉiu aparte, kiel al Li plaĉas. Ĉar kiel la korpo estas unu, kaj havas multajn membrojn, kaj ĉiuj membroj de la korpo, estante multaj, estas unu korpo; tiel same ankaŭ estas Kristo" (1 Kor 12:8-12).

Tiun esprimplenan klarigon neeblas ignori.

Alia problemo rilate al pentekostanaj argumentoj estas la ekzemplo, kiel Filipo en Samaria konvertis multe da popolo al la nova fido, t. e. post kompreno pri la evangelio ili estis baptitaj en la akvo, sed ili ne ricevis la donacojn de la Spirito, ĉar poste, Petro kaj Johano aliris al ili kaj "alveninte, preĝis por ili, ke ili ricevu la Sanktan Spiriton... Tiam ili metis la manojn sur ilin, kaj ili ricevis la Sanktan Spiriton. Kaj kiam Simon vidis, ke la Sankta Spirito estis donata per surmetado de la manoj de la apostoloj..." (Agoj 8:4-18). Povas esti, ke la transdono de la spiritaj donacoj estis farata nur per surmetado de manoj, kion ne ofte praktikas nuntempaj pretendantoj je spiritaj donacoj.

Aliaj pentekostanoj opinias, ke parolado en diversaj lingvoj ne estas pruvo pri savo. Tio substrekas la fakton, ke estas seriozaj doktrinaj diferencoj inter tiuj, kiuj asertas, ke ili posedas la donacojn. Ekzemple, kelkaj kredas, ke la Regno de Dio estos sur la tero, dum aliaj opinias, ke ĝi estos sur la ĉielo. Katolikaj "inspirituloj" pretendas, ke la Sankta Spirito ordonas al ili adori Maria-n kiel Diinon kaj respekti la Papon, samtempe iuj pentekostanoj asertas, ke posedata de ili la Sankta Spirito ordonas al ili rigardi la Papon kiel Antikriston kaj kondamni katolikan doktrinon. Tamen Jesuo diris, ke kiam venos la Parakleto, t. e. la Spirito de la vero, "li gvidos vin en ĉian veron... Kaj en tiu tago vi demandos min pri nenio... Sed la Parakleto, la Sankta Spirito, kiun la Patro sendos en mia nomo, instruos vin pri ĉio, kion mi diris al vi (Joh 16:13,23; 14:26).

Inter tiuj, kiuj posedas la Parakleton, ne devas esti gravaj diferencoj pri doktrino. Pro tio, ke troviĝas tiaj diferencoj, iliaj pretendoj ne estas kredeblaj. Videbla nekapableco de kelkaj pretendantoj laûbiblie klarigi sian kredon, montras, ke ili ne estas edifataj de la Parakleto en ĉian veron kaj plenan scion.

La granda atento, kiun iuj homoj donas al la parolado en lingvoj ne reflektiĝas en la Biblio. En la listo da donacoj de la Spirito, donita en la ĉapitro Ef 4:11, ĝi ne troviĝas. En la simila listo en 1 Kor 12:28-30 ĝi troviĝas nur ĉe la fino. Fakte en la Nova Testamento nur en tri lokoj estas mencioj pri uzo de tiu donaco (Agoj 2:4; 10:46; 19:6).

La pretendoj de nuntempaj "inspiritaj" kristanoj je posedo de parolado en diversaj lingvoj kaj scipovoj fari miraklojn, oni devas konsideri konekse al tio, kion ni diras en tiu ĉi ĉapitro rilate al la maniero, laû kiu la Spirito de Dio agas. La baza punkto estas tio, ke ĉiuj pretendoj, kiujn tiaj homoj faras, ne estas rezulto de posedo de la Sankta Spirito. Tiuj, kiuj asertas, ke ili ja posedas la donacojn, trovos malfacilon respondi al tiuj Bibliaj argumentoj, kiujn ni donis ĉi tie.

Tamen, estas racie atendi ian klarigon pri la demando, kial iam okazas partaj resanigoj kaj "paraladoj en lingvoj".

Estas konate, ke homoj uzas nur negrandan parton de sia cerbopovo, laû kelkaj taksoj – nur je 1%. Estas ankaû akceptite, ke la menso povas havi preskaû "fizikan" efikon al la korpo. Per tia memsugesto, ke fajro ne povas brulvundi, hindoj atingas povon iri sur fajro nudpiede, ne brulvundante piedojn. En momentoj de eksterordinara inspiro ni povas uzi multe pli da procentoj de eblecoj de nia cerbo, ol kutime, kaj atingi tiun fizikan staton de nia korpo, kiu multe pli superos ĝenerale konatajn korpeblecojn. Tiel, en stato de forta ekscito dum batalo, soldato povas tute ne rimarki dum kelkaj horoj, ke ĉe li estas deŝirita mano.

Kun forta religia fido, dum kiam sonas konvena stimula muziko, sub influo de inspira gvidanto povas okazi fenomenoj, kiuj estas ekster normala homa kompreno.

La mirakloj, pri kiuj parolas nuntempaj "kristanoj", kaj ankaû similaj eksternormaj spertoj de aliaj religioj, estas el la sama eksterordinara kategorio. Ŝamanoj same praktikas sensencan paroladon en lingvoj. Kaj islamanoj povas atesti al "mirakloj" similaj al tiuj, kiuj estas pretenditaj de nuntempa kristanismo. Tamen la posedo de spiritaj donacoj en la unua jarcento celis ĉefe pruvi la superecon de vera kristanismo rilate al aliaj religioj. Tiu fakto, ke nuntempaj "mirakloj" de nuna kristanismo similas al la samaj "mirakloj" de aliaj religioj, atestas pri foresto nune de tiaj donacoj de la Sankta Spirito, kiuj estis en la unua jarcento.

## 2.5 LA BIBLIO - LA UNUNURA AÛTORITATO

El ĉio dirita en tiu ĉi ĉapitro sekvas, ke la Sankta Spirito rilatas al Lia racio, intenco kaj potenco, pere de kiu Li efektivigas Siajn kreaĵojn. Ni substrekas, ke la Spirito klare malkaŝiĝas al ni sur la paĝoj de la Dia Vorto. Multaj problemoj de nuntempa kristanismo leviĝas pro la tuta manko de kompreno de tio ĉi. Pro tio, ke ne estas facile kompreni, ke tiom granda povo estas enmetita en unu libron, aperas deziro opinii, ke krom la Biblio ekzistas ia alia formo de Dia revelacio al la homo. Nia ege malvirta homa naturo (Jer 17:9) trovas la puran veron de Dia Vorto malfacila por kompreni (Joh 17:17), kaj multaj homoj fordonas sin al la tento havi aliajn formojn de revelacio, pli allogajn por homa menso. Pli sube vi trovos kelkajn ekzemplojn de ili:

-----------------------------------------------------------------------------------

| Konfesio | Aliaj formoj de revelacio | Avantaĝo de tiu ĉi formo por homo |
|---|---|---|
| Atestantoj de Jehovah | Eldonaĵoj de la societo "Garda Turo", | Ne necesas iun personan penon por pripensi la ĝustan |

| | | |
|---|---|---|
| . | kiuj estas opiniataj kiel inspiritaj. | interpreton de la Biblio. Ĉiuj respondoj jam estas aperigitaj. |
| Roma Katolikismo | Eldiroj de la Papo kaj opinioj de pastroj, kiuj (laû iliaj vortoj) estas la respegulo de Dia Racio | Persono mem ne bezonas legi la Biblion. En la pasinteco katolikismo ne aprobis, eĉ malpermesis legi la Biblion. Oni fidu al pastroj prefere ol persona peno kompreni la Dian Vorton. |
| Mormonoj | La libro de Mormono | Ne necesas kredi al la Bibliaj doktrinoj, kiuj iufoje estas malfacile akceptataj - la libro de Mormono proponas ŝancon de universala savo. Tamen, la Biblio diras, ke multaj homoj vivas kaj mortas sen espero pro tio, ke ili ne estas alvokitaj al konado de la Evangelio. |
| Inspirita Kristanismo | "Interna Lumo", kiu laû ili estas la Sankta Spirito | Ili kredas, ke iliaj sentoj kaj agoj estas korektaj, ĉar ilin gvidas kaj inspiras la Dia Spirito diversmaniere, sen la Biblio. |

Ĉio tio substrekas, ke necesas akcepti la Biblion, kiel Dian Vorton kaj memstare sur ĝiaj paĝoj trovi la veran revelacion. Al la demando: "Unu Biblio, multe da konfesioj – Kial?" oni povas respondi, ke krom la Biblio tiuj homoj akceptas ankaû aliajn formojn de la revelacio de Dia Spirito.

Se vi volas trovi unu veran konfesion, unu veran fidon kaj unu veran bapton (Ef 4:4-6), vi devas sekvi la laûta kaj klara alvoko: "Reen al la Biblio!"

**KOMENTO 4 : Ĉu La Sankta Spirito Estas Persono?**

En la partoj 2.1 kaj 2.2 estas donite sufiĉa pruvo, ke la Dia Spirito rilatas al Lia potenco, kiu larĝmaniere respegulas Lian "menson". Pro tio, ke la Dia Spirito efikas kiel respegulo de la personeco de Dio, kelkaj opinias, ke la Dia Spirito estas persono, kiu estas ankaŭ Dio.

Atenta refoja tralego de la antaŭaj partoj montras, ke la Dia Spirito estas Lia menso kaj potenco, kaj se tio estas tiel, do menso kaj potenco neniel povas esti persono. La elektro estas nevidebla forto, donanta rezultojn por homo, kiu manipulias tiun forton; sed ja ĝi ne povas esti persono. Amo estas elaperigo de homa karaktero, sed ĝi ne povas esti persono. La Spirito Dia enhavas Lian amon, kiel parton de Lia karaktero, kaj povas rilati al Lia potenco, sed ĝi neniamaniere povas rilati al persono aparta de Li.

Evidenta kaj grava eraro de multaj "kristanoj" (ke la Spirito estas persono) estas en tio, ke ili kredas je la doktrino pri la "Triunuo". Laŭ tiu ĉi doktrino estas tri dioj, kiuj iamaniere estas samtempe unu la sama – Dio Patro, Dio Sankta Spirito kaj Dio Filo (Jesuo). Tiuj samaj homoj asertas, ke Dio ne estas persono kaj samtempe diras, ke Dia Spirito estas persono, montrante per tio evidentan kontraŭdiron, ke la Sankta Spirito estas la patro de Jesuo.

Pro tio, ke la vorto "triunuo" forestas en la Biblio, tio pruvas, ke la ideo pri "triunueco" estis pagana ideo, enportita en kristanismon. Akceptante la ideon, ke Dio estas triunuo, kristanoj estis devigitaj fari strangan konkludon, ke la Dia spirito/povo estas persono, kiu ankaŭ estas Dio, kvankam ne estas Dio la Patro. Kiam do al ili oni evidentigas tiujn kontraŭdirojn, ili trovas la plej facilan por si konkludon, dirante, ke Dio estas granda mistero, kaj ni devas fidi, sen provoj por trovi logikan klarigon. Tamen samtempe ili ignoras citaĵojn el la Nova Testamento konekse al la misteroj de Dio, malkaŝitaj en la vortoj kaj agoj de Kristo:

"Ĉar mi ne volas, fratoj, ke vi ne sciu ĉi tiun misteron" (Rom 11:25).

"la predikado de Jesuo Kristo, laŭ la malkaŝo de la mistero" (Rom 16:25).

"Jen mi sciigas al vi misteron..." (1Kor 15:51).

" Sciiginte al ni la misteron de Lia volo" (Ef 1:9; 3:3).

La predikado de Paŭlo estis "sciigi kuraĝe la misteron de la Evangelio" (Ef 6:19; Kol 4:3).

"La misteron... nun klarigita al liaj sanktuloj" (Kol 1:26).

Tio montras, ke nune ne estas misteroj rilate al ĉefaj doktrinoj, kaj nur homo, estante ankoraŭ en mallumo, dirus pri tiuj misteroj. Kaj ĉu ne konfuzas tiun homon tiu fakto, ke la Biblia nomo "Babelo", la sistemo de falsaj doktrinoj, priskribitaj en Apokalipso, estas "Mistero" (Ap 17:5)? La ĉefa senco estas en tio, ke tiu ĉi sistemo anoncas siajn kredojn "mistero", sed veraj kredantoj komprenas la misteron de tiu virino (Ap 17:7).

Tiujn nebulajn klarigojn oni povas aŭdi de homoj, kiuj bazas sian komprenon de Dio sur subjektivaj impresoj aŭ sur malklara, necerta influo de ia ekstera inspira povo al ilia menso. Se ni efektive volas kompreni la veran doktrinon de la Dia Vorto, ni devas uzi ĉiujn niajn kapablojn por kompreni la mesaĝon de la Biblio.

Neniu el predikantoj de la Evangelio, menciitaj en la Biblio, diris similan frazon: "Tio estas absoluta mistero kaj vi ne povas kompreni ĝin". Anstataŭ tio ni legas alvokojn al ni uzi nian intelekton por fari logikajn konkludojn pri la Sankta Skribo.

En sia prediko pri ĉefaj tezoj de la Biblio (kiujn ni ankaŭ konsideras en tiu ĉi libro) Paŭlo "rezonadis kun ili el la Skriboj, klarigante kaj montrante, ke la Kristo devis suferi kaj releviĝi el la mortintoj" (Agoj 17:2,3). Tio estis logika Biblia pruvo; kaj la propozicio mem komemciĝas per la vortoj: "Kaj laŭ sia kutimo... rezonadis...". Tiu stilo estis kutima por Paŭlo (vidu ankaŭ Agoj 18:19). Konforme al tio, dum la granda kompanjo en Korinfo, Paŭlo "diskutadis en la sinagogo ĉiusabate, kaj penis konvinki Judojn kaj Grekojn..." (Agoj 18:4-6). Homoj, kiuj akceptis la fidon, aŭskultis pruvojn de Paŭlo, kiujn li citis el la Biblio; tie ne estis frazoj, similaj al: "vizio de Jesuo en mia dormaĉambro", "nepriskribebla sento kaptis min", "iuvespere mi renkontis la Sinjoron".

Rimarku ankaŭ, ke la inspirita de Dio Skribo alvokas al logiko kaj racieco, indikante dum tio, ke "ili kontraŭstaris". Simile al tio, en Antioĥio Paŭlo kaj Barnabaso "alparolante ilin, urĝe admonis ilin" (Agoj 13:43). Ilia sekva halto estis en Ikonio, kie ili "tiel parolis, ke granda amaso da Judoj kaj Grekoj kredis" (Agoj 14:1).

Dum kiam do iom pli poste oni juĝis Paŭlon, la sama logiko inspiris lian certan esperon al la estonteco: "Paŭlo rezonis pri justeco, sinregado, kaj juĝo estonta" kun tiu plena da sentoj klareco, ke eĉ cinika juĝisto "Felikso timiĝis" (Agoj 24:25).

Pro tio, ke temas pri pruvoj, ni devas doni Bibliajn citaĵojn pri nia espero kaj doktrino: "Estu ĉiam pretaj doni defendan respondon al ĉiu, kiu vin demandas pri la motivo de la espero en vi, sed kun humileco kaj timo" (1 Pet 3:15).

Paroli per trankvila voĉo pri iu ajn persona sperto – tio ne signifas doni pruvon je la Evangelia espero. Oftaj mencioj pri personaj atestoj kiel rimedo de

predikado de multaj "evangeliaj" kristanoj, substrekas foreston argumentitan "respondon" al ilia "espero". Aperis eĉ leksikono ĉe ili, por doni eblecon al ili uzi "kion la Sinjoro faris en mia vivo" kaj tiel plu. Tiaj personaj anekdotoj akre kontraŭas al la vortoj de Paŭlo: "Ni predikas ne nin mem, sed Kriston Jesuon" (2 Kor 4:5), kaj tion diris homo, kiu pli multe ol iu alia interrilatis kun Jesuo.

La logika kaj laŭ la Biblio argumentita metodo de nia konvertiĝo devas krei modelon por niaj pli intimaj rilatoj kun Dio ĝis la fino de niaj tagoj. La ekzemploj por ni, kiel ĉiam, estas la unuaj kristanoj, kiuj uzis racion por decidi problemojn de sia servado (Agoj 6:2).

En la epistoloj de la Nova Testamento ankaŭ estas esprimita certeco, ke iliaj legantoj akceptos Biblian logikon kiel gvidilon. Sekve, sciante, kiaj estis ĉefpastroj, vivintaj laŭ la leĝo de Moseo, ni povas scii detalojn pri agoj de Kristo (Heb 5:3). Parolante pri la amo de Dio en Jesuo, Paŭlo emfazas, ke estas nia "racia (greke "logikos" t. e. "logiko") servo" plene dediĉi nin al Li (Rom 12:1). La vorto "logikos" devenas de la greka vorto "logos", kiu signifas "vorto", en la senco de Dia Vorto. Sekve, nia logika respondo per Bibliaj terminoj ankaŭ devas esti bazita sur la Vorto de Dio.

Do, nelogike estas aserti, ke la Dia Spirito estas persono, kiu ne estas Dio kaj samtempe estas Li. Kaj ankaŭ la respondon, ke ĉio tio estas mistero kaj ne subiĝas al la logiko, refutas Bibliaj tekstoj. Se ni ne povas fari logikajn konkludojn el la Sankta Skribo, do la tuta studo de la Biblio iĝas vana; kaj foriĝas bezono de la Biblio, se ĝi povas esti konsiderita kiel nur interesa banalaĵo aŭ kiel amuza beletra verko. Ŝajnas, ke ĉio tio estas sur librabretoj de multaj kristanoj.

Tamen pro la justeco necesas rimarki, ke kelkaj el tiuj, kiuj kredas, ke la Spirito de Dio estas persono, provas doni Biblian klarigon al tio. Ili citas versojn, en kiuj pri la Dia spirito estas dirite, kiel pri persono aŭ persona kvalito, ekzemple pri "Parakleto" (Jh 14:16), aŭ ke la spirito estis "malĝoigita".

En la parto 4.3 ni montras, ke homa "spirito" povas esti ĉagrenita (Agoj 17:16), afliktigita aŭ ĝoja (Lk 10:21). Pri la "spirito" de homo, t. e. pri la senco mem de la homo, pri lia racio estas dirite kiel pri aparta persono. Sed, certe do, oni ne devas akcepti tion laŭlitere. Ankaŭ pri la spirito de Dio oni povas paroli sammaniere.

Necesas atenti, ke en la Biblio ofte estas uzata la lingvo de personigo, kiam oni diras pri abstraktaj nocioj. Ekzemple, en Sentenco 7:4 pri la saĝo estas dirite kiel pri virino. Tio montras al ni, kia estus homo, se li posedus saĝon pri agoj. La saĝo ne povas ekzisti aparte de la menso de homo kaj pro tio estas uzita tiu personigo. Pli detale pri tio estas dirite en Komento 5: "La principo de personigo".

**KOMENTO 5: La Principo De Personigo**

Povas esti por kelkaj homoj estos malfacile akcepti la klarigon pri personigo de la satano, ĉar en la Biblio li estas ofte menciita kiel persono, kaj tio, verŝajne konfuzas homojn. Tamen en la Biblio ofte estas uzata la metodo de personigo de tiuj nocioj, kiel saĝo, riĉeco, peko, eklezio, sed nur rilate al la satano aperas iuj abstraktaj teorioj. Sekvantaj ekzemploj ilustros la punkton.

**Personigo de riĉeco**

"Neniu povas esti sklavo por du sinjoroj; ĉar aŭ li malamas unu kaj amas la alian; aŭ li aliĝos al unu kaj malestimos la alian. Vi ne povas servi al Dio kaj al Mamono!" (Mt 6:24). Tie ĉi riĉeco estas komparata kun sinjoro. Multaj homoj tre forte aspiras ricevi riĉecon kaj ĝi iĝas ilia sinjoro. Jesuo diras al ni tie ĉi, ke ni ne povas fari tion kaj samtempe bone servi al Dio. La instruo estas simpla kaj efika, sed neniu opinias, ke riĉeco estas homo laŭ nomo Mamono.

**Personigo de peko**

"... Ĉiu, kiu faras pekon, estas sklavo de peko" (Joh 8:34). "Kiel la peko *reĝis* en morto" (Rom 5:21). "Ĉu vi ne scias, ke kiam vi vin prezentas, kiel sklavoj al iu por obeado, vi estas sklavoj de tiu, al kiu vi obeas, ĉu de peko por morto, aŭ de obeemeco por justeco? (Rom 6:16).

La same kiel en la okazo pri riĉeco, peko tie ĉi estas komparata kun sinjoro, kaj tiuj, kiuj pekas estas liaj sklavoj. Tamen neniu racia leganto de tiuj linioj akceptos la vortojn de Paŭlo, ke peko estas persono.

**Personigo de spirito**

"Tamen kiam venos *li*, la Spirito de la vero, *li* gvidos vin en ĉian veron; ĉar *li* parolos ne de si mem" (Joh 16:13).

Ĉi tie Jesuo diras al siaj apostoloj, ke ili ricevos la povon de la Sankta Spirito kaj tio fakte okazis en la tago de Pentekosto, kiel estas dirite en Agoj 2:3,4: "Kaj al ili aperis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito", kiu donis al ili mirindan povon fari mirindaĵojn, konfirmantajn, ke ilia povo devenas de Dio. La Sankta Spirito ne estis persono; tio estis povo, sed dirante pri tio, Jesuo uzis la personan pronomon "li".

**Personigo de morto**

“Kaj mi rigardis, kaj jen pala ĉevalo; kaj la nomo *de la sidanta* sur ĝi estis Morto” (Ap 6:8).

**Personigo de la popolo de Izraelo**

“Denove Mi aranĝos vin, kaj vi estos aranĝita, *ho virgulino de Izrael*; denove vi ornamos vin per viaj tamburinoj... (Jer 31:4). “Mi aŭdis, kiel Efraim diras pentante: Vi punis min, kaj mi estas punita, kiel bovido ne dresita; konvertu min, kaj mi konvertiĝos; ĉar Vi, ho Eternulo, estas mia Dio (Jer 31: 18).

La enhavo de tiuj ĉi versoj montras, ke la profeto turnas sin ne al laŭlitera senpeka homo Efraim, sed al la popolo de Izraelo, kiu ĉi okaze personiĝas la same, kiel Brition iufoje oni nomas “John Bull” aŭ “Britannia”. Ne ekzistas tiuj personoj, sed kiam oni renkontas en libroj aŭ sur pentraĵoj iliajn nomojn, ĉiu scias, ke tiuj ĉi nomoj signifas Brition.

**Personigo de kredantoj je Kristo**

“Ĝis ni ĉiuj atingos la unuecon de la fido kaj de la scio de la Filo de Dio, ĝis *la homo perfekta*, ĝis la mezuro de la matureco de la pleneco de Kristo” (Ef 4:13). “Estas unu *korpo*” (Ef 4:4). “Vi do estas *la korpo de Kristo*, kaj membroj en ĝi, ĉiu laŭ sia parto” (1 Kor 12:27). “Kristo estas kapo de la eklezio; kaj li estas la savanto de *la korpo*” (Ef 5:23). “Kaj li estas la kapo de la *korpo*, la eklezio... Nun mi ĝojas pri miaj suferoj pro vi, kaj plenigas la mankon de la afliktoj de Kristo en mia karno pro lia *korpo*, kiu estas la eklezio” (Kol 1:18,24). “Ĉar mi ĵaluzas pri vi per Dia ĵaluzo, ĉar mi fianĉigis vin al unu edzo, por ke mi prezentu vin kiel ĉastan virgulinon al Kristo (2 Kor 11:2). “... venis la edziĝo de la Ŝafido, kaj *lia edzino* sin pretigis” (Ap 19:7).

Ĉiuj tiuj versoj tute klare rilatas al la komuneco de homoj, kiuj estis veraj fidantoj je Kristo kaj kiuj iufoje nomiĝis kiel “eklezio”, tamen tio ne rilatas al nuntempaj eklezioj, kiuj jam delonge ĉesis esti veraj kredantoj je Kristo. La veraj kredantoj, t. e. tiuj, kiuj kredas al la veraj doktrinoj de la Biblio, nomiĝas “ĉasta virgulino”, indikante per tio, kiun vivmanieron ili devas havi; ili estas “eklezio”, “korpo” kaj tio estas konvinka figura esprimo, ĉar kiel natura korpo havas multe da funkcioj, same ankaŭ la vera eklezio havas grandan recpondecon kaj efektivigas diversajn funkciojn. Kiam oni nomas la eklezion kiel “korpon”, neniu opinias ĝin iu persono; neniu opnius la diablon aŭ satanon kiel iu ĉiela monstro aŭ falinta anĝelo, se tiuj vortoj estus tradukitaj ĝuste kaj se viroj kaj virinoj ne akceptus falsajn ideojn, devenintaj de la malveraj eklezioj de pasintaj tagoj.

El la libro de Robert Roberts “Christendom Astray”.

**KOMENTO 6: Kalvinismo**

Antaû kelkaj jarcentoj Kalvin eldiris la koncepton pri antaûdifino de nia vivo, ke ĉiuj niaj bonaj decidoj havas neniun signifon por nia savo – ni estas aû destinitaj al la savo antaûe, aû repuŝitaj de ĝi. Tiun koncepton respegulas ankaû kelkaj nuntempaj ideoj:

- Sensence estas doni niajn fortojn por studi la Biblion aû religion, ĉar se ni devas esti savitaj, ni estos savitaj ĉiuokaze.

- Ekzistas estaĵo, nomita diablo, kiu devigas nin peki kaj enigas en niajn vivojn problemojn sendepende de nia volo. Tiu ĉi malvera ideo estas pridiskutata en Ĉapitro 6.

- Ne necesas peti Dian helpon en diversaj okazoj de la vivo, ekzemple, pri sekureco dum vojaĝado, ĉar ĉio havas sian destinon. Ekzistas la proverbo, kiun oni povas ofte aûdi en flughavenoj antaû forflugo: "Kio devas okazi, tio okazos".

- Evangeliaj eklezioj instruas, ke ne eblas fidi al la Biblio aû kompreni ĝin, se la Sankta Spirito ne devigas nin fari tion.

Tamen estas multe da raciaj Bibliaj kialoj, ke oni rifizu tian filozofion:

- Similaj eldiraĵoj sensencigas la tutan koncepton pri obeemo al Dio. En la Biblio estas dirite al ni, ke ni devas observi ordonojn de Dio, kaj niaj agoj povas doni al Li ĝojon aû ĉagrenon. Tiu ĉi koncepto perdas sian sencon, se Dio devigas nin esti obeemaj. Kristo proponas savon "al ĉiuj al li obeantaj" (Heb 5:9).

- Heb 11 diras, ke Dia influo al nia vivo kaj sekvonta havigo al ni savon rilatas al nia fido. Multaj Bibliaj ekzemploj pri alvokoj al Dio kun preĝoj pri helpo dum malfacilaj momentoj de nia vivo perdas sencon, se ĉio estas tute antaûdifinita. Simile al tio, iĝas sensenca la ideo pri savo kiel la rezulto de nia fido je Kristo.

- Baptiĝo estas premiso por la savo (Mk 16:16: Joh 3:3-5). Tion neas kalvinistoj. Tamen savo iĝis ebla dank` al la ofero de Kristo (2 Tim 1:10), sed ne estas rezulto de la abstrakta koncepto de antaûdifino. Ni devas konscie alveni al li per baptiĝo. La versoj

Rom 6:15-17 diras, ke per baptiĝo ni ŝanĝas nian vivon de peko al vivo de obeemo "Vi estis la sklavoj de peko, vi tamen fariĝis kore obeemaj". Tiuj versoj pri prezentado de ni al obeemeco klare diras pri nia propra volo, kontraŭe al senkondiĉa antaŭdifino. La prezentado efektiviĝas per obeado de la koro al la instruado de la Evangelio (Rom 6:17).

- Se niaj vivoj estas jam antaŭdifinitaj, la Diaj vortoj al ni perdas sian sencon. Ankaŭ ne necesus prediki; tamen la Biblio per edifoj kaj per klaraj ekzemploj pri ili montras, ke pere de predikado de la Vorto viroj kaj virinoj venas al la savo. "La vorto de tiu ĉi savo" (Agoj 13:26) devas atingadi homojn.

- Nin oni juĝos konforme al niaj agoj (Ap 22:12). Kial, se niaj propravolaj agoj ne gravas por la savo? Paŭlo diris, ke la hebreoj mem juĝis sin esti ne indaj de la eterna vivo pro ilia malakcepto de la vorto de Dio (Agoj 13:46). Ili mem kondamnis sin – Dio ne preventis ilin. Se ni diras, ke Dio destinas kelkajn homojn al la savo, kaj la aliajn al la kondamno, do el tio sekvas, ke Li devigas unujn homojn esti pekuloj, kaj la aliajn esti justuloj. Pro la peko de Adamo "morto atingis ĉiujn homojn pro tio, ke ĉiuj pekis" (Rom 5:12). Homoj mortas, "Ĉar la salajro de peko estas morto" (Rom 6:23), sed ne pro tio, ke Dio devigis ilin, iam antaŭ la peko de Adamo, esti pekuloj.

- En la ĉapitro 1 Kor 10 kaj ankaŭ en multaj aliaj lokoj de la Biblio, kiel averto por kredantoj, estas dirite pri homoj de la pasinteco, kiuj iam havis rilatojn kun Dio, sed poste ili flankeniris de Li. Tiu fakto, ke ili "forfalis de graco" (Gal 5:4), montras, ke forestas sistemo de savo, laŭ kiu kalvinistoj asertas, ke "savita unufoje estas savita por ĉiam". Ni povas esti savitaj nur en tiu okazo, se ĉiam sekvos la veran instruon (1Tim 4:16).

- Jesuo klare diris, ke kompreno de la Vorto Dia dependas de niaj propravolaj penoj. "La leganto komprenu" (Mt 24:15). Ni mem devas peni kompreni la Vorton, neniu devigas nin fari tion. Ankaŭ Jesuo ofte ripetis similajn vortojn: "Kiu havas orelojn, tiu aŭskultu" aŭ komprenu. La vortoj "Kiu havas orelojn, tiu auskultu" estas komparataj kun legado de la Dia vorto, ĉar la Dia Spirito estas tre klare montrata per Lia Vorto. Pro tio Jesuo povis diri, ke Liaj inspiritaj vortoj "estas Spirito" (Joh 6:63). Ne povas

Dia Spirito aparte de Lia vorto devigi homojn esti obeemaj al la vorto.

- "Kaj la soifanto venu; kiu volas, tiu prenu donace la akvon de vivo" (Ap 22:17) – tiel diras la Evangelio al ĉiuj, kiuj akceptas lian vorton de vivo.

**KOMENTO 7: "Kaj vi ricevos la donacon de la Sankta Spirito" (Agoj 2:38).**

Per tiuj vortoj Petro finis sian parolon antaŭ la granda homamaso en la tago de Pentekosto, alvokante baptiĝi kaj ricevi la donacojn de la Sankta Spirito. La indiko ĉi tie al la donaco de la Sankta Spirito estis farita lige al tio, ke la apostoloj mem posedis la donacon paroli al homamasoj per diversaj lingvoj, klarigante al homoj, ke agante tiel, ili plenumas la profetaĵon de Joel pri la donaco de miraklaj povoj (Agoj 2:16-20). Oni povas supozi, ke Petro promesis la miraklajn donacojn de la Spirito nur al la hebreoj, kiuj aŭskultis lin. La homamaso konsistis el hebreoj, sed ne el nacianoj (Agoj 2:5). La profetaĵo de Joel pri dispono de la donacoj rilatis, antaŭ ĉio, al hebreoj. Tial Petro diris al ili: "La promeso estas por vi kaj *por viaj infanoj"* (Agoj 2:39), konsiderante, verŝajne, ke la profetaĵo de Joel pri la donaco de la Spirito estis donite al *la hebreoj kaj al iliaj infanoj* (Agoj 2:17; kmp. Joel 2:28-32). En tiuj versoj povas esti aludo, ke la promeso pri tiuj ĉi miraklaj donacoj estis adresitaj nur al du generacioj – al tiuj, kiuj aŭskultis Petron kaj al iliaj infanoj.

Ni jam montris, ke en la fino de la unua jarcento (t. e. ĉirkaŭ 70 jaroj post la parolo de Petro) la donacoj ĉesis ekzisti. Tion konfirmas ankaŭ la historiaj skriboj. Dum tiuj du generacioj la donacoj estis ankaŭ ĉe nacianoj: "kaj por ĉiuj ĝis malproksime, kiujn alvokos la Eternulo, nia Dio" (Agoj 2:39). Atentu, ke la nacianoj estas nomitaj en Ef 2:14-17 "malproksimaj".

Tamen estas kaŭzo opinii, ke ĉio skribita en Agoj 2, estas nur malgranda parto da la promesoj, pri kiuj diras Joel 2. La ĉefa efektiviĝo de la profetaĵo okazos post kiam Izraelon invados malamikaj armeoj, kiam ili estos frakasitaj (Joel 2:20), kaj post tio izraelidoj pentos kaj vivos en la feliĉa interrilato kun Dio (Joel 2:27). "Post tio Mi elverŝos Mian spiriton..." (Joel 2:28). Dume ne estos plenumitaj ĉiuj antaŭdiritaj kondiĉoj, ni ne povas atendi la plenumon de aliaj vortoj de Joel, krom tiuj ne grandaj eventoj, kiuj okazis en la tago de Pentekosto, kiel tion priskribas Agoj 2.

La promeso pri ricevo de la donaco de la Spirito post baptiĝo povas rilati ankaŭ al ni nun. Estas unu Spirito, sed ĝi povas elmontriĝi diversmaniere (1Kor 12:4-7; Ef 4:4). En la unua jarcento tio okazis pere de miraklaj donacoj. Nun la miraklaj donacoj estas forprenitaj, kaj oni povas logike konkludi, ke la promeso

pri “la donaco de la Spirito”efektiviĝas alivoje. “La donaco de la Sankta Spirito povas rilati al “la donaco, kiu *estas* la Sankta Spirito” mem, aû al “la donaco, pri kiu diras la Sankta Spirito” t. e. al la donaco de pardono kaj savo, kiujn promesis inspirita de la Spirito la Vorto de Dio. Estas multe da aliaj similaj vortkombinoj, kiujn oni povas kompreni diverse. Ekzemple, “kreskantaj en la scio de Dio” (Kol 1:10) povas signifi “kreskantaj en la scio, kiun havas Dio”, aû “kreskantaj en la konado pri Dio”. “La amo de Dio” kaj “La amo de Kristo” (Joh 4:9; 3:17; Kor 5:14) oni povas kompreni kiel la amo, kiun Dio kaj Kristo havas al ni kaj ankaû kiel la amo, kiun ni havas al ili. “La Vorto Dia” povas signifi la vorton pri Dio aû la vorton, kiu venis de Dio. La saman oni povas diri pri la donaco de la Sankta Spirito – ĝi povas esti la donaco, donita de la Sankta Spirito aû la Sankta Spirito mem.

### La Donaco De La Sankta Spirito - Ĉu Ĝi Estas Pardono?

La versoj Rom 5:16 kaj 6:23 priskribas savon, kiel “la donaco” kaj elvokas komparon kun “donaco de la Spirito” en la verso Agoj 2:38. Sed verŝajne, Agoj 2:39 citas el Joel 2:32 rilate al savo, kvazaû tio estas la donaco de la Spirito. La mencio de Petro rilate al la promesita donaco al tiuj “malproksimaj” konformas al la vortoj de Jesaja 57:19: “Paco, paco (kun Dio pere de pardono) al malproksimaj”. Ef 2:8 ankaû priskribas la donacon kiel savo, kaj kelkaj linioj pli sube estas dirite: “per li ni ambaû havas en unu Spirito (la donaco) alkondukon al la Patro” (2:18). Tion ankaû konfirmas tiu fakto, ke Ef 2:13-17 konformas al la verso Jes 57:19: “Vi, iam malproksimaj, proksimiĝis en la sango de Kristo... ĉar nia paco estas li... kaj li venis kaj predikis pacon al vi malproksimaj kaj al la proksimaj”. Jesaja 30:1 malaprobas provon de la Izraelidoj trovi sian propran vojon al la pardono, sed ne akiri ĝin per la donaco de Dia Spirito: “kiuj faras interkonsilojn, sed sen Mi, kaj aranĝas interkonsentojn, sed sen Mia spirito, por aligi pekon al peko”. Verso Jes 44:3 priskribas la lastan tagon de la pardono per tiuj vortoj: “Mi verŝos akvon sur la soifantaĵon kaj torentojn sur la sekan teron (spirite malplenigita – Jes 53:2); Mi verŝos Mian spiriton sur vian idaron kaj Mian benon sur viajn devenontojn”. La beno de la idaro de Abraham okazas pere de Kristo (Ag 3:25,26), kiu estas komparata kun elverŝo de la Spirito sur la Izraelidoj. Ĉi tie klare videblas konformo al Joel 2 kaj Ag 2. En Gal 3:14 Ĉio tio estas ĝeneraligite per tiuj vortoj: “Por ke venu sur la nacianojn la beno de Abraham en Kristo Jesuo, por ke per fido ni ricevu la promeson de la Spirito”. La verso 1 Kor 6:11diras pri forlavo de niaj pekoj “en la Spirito de nia Dio”. En la epistolo al Romanoj estas indikite al egaleco inter ni, kiuj ricevas “gracon... repacigon... la Spiriton” (1:5; 5:11; 8:15), ankaû montrante per tio interligon kun la donaco (“graco”) de la Spirito kaj pardoneco, kiu kondukas al la repacigo. Malfacile estas supertaksi la

signifon de la lingvostilo kaj konceptoj de la Malnova Testamento, sur kiuj bazas sin la Nova Testamento, konsiderante, ke la unuaj legantoj de ili estis Izraelidoj, al kiuj gravan influon, okazigis la apostolaj epistoloj. La libroj de Moseo kaj de Josuo multfoje mencias la promeson de Dio doni al Sia popolo la teron – "la teron, kiun Dio donos al vi kiel posedaĵo". Tiun frazon sufiĉe ofte oni povas renkonti ankaŭ en la Nova Testamento, en kiu la vorton "tero" aŭ "lando" anstataŭas la vorto "savo". Sekve, la donaco de Dio nune estas en estonteco, memkompreneble, kune kun la pardono de pekoj.

Gal 3:2,5,8-11 komparas la benojn, pardonon kaj savon de Abraham kun ricevo de la Sankta Spirito. "La promeson de la Spirito" (Gal 3:14) estas dirite kuntekste al la promesoj al Abraham.

Petro petis hebreojn penti, antaŭ ol ili ricevos la donacon. Sed pento kondukas al persona preĝo. Sekve estas kaŭzo por kredi, ke la donaco de la Sankta Spirito estas respondo al persona preĝo. Doni "bonajn donacojn" al tiuj, kiuj petas de Li en preĝoj, tio signifas la saman, ke doni (la donacon) la Sanktan Spiriton (Mt 7:11; kmp. Lk 11:13). Tion saman diras Fil 1:19 "...al mia savo, per viaj preĝoj kaj la provizado de la Spirito de Jesuo Kristo". Ankaŭ 1 Joh 3:24 diras, ke la Spirito estas donata al tiuj, kiuj observas Liajn ordonojn; kaj la verso 22 diras, ke ĉion ajn, kion ni petas, ni ricevas de Li, se ni observas Liajn ordonojn. Do, nia fido premisas, ke Dio aŭdas niajn preĝojn (1 Joh 5:14) kaj ni havas la Spiriton (1 Joh 3:21, 24; 4:13). Kiel ni vidas, tiuj ĉi eldiroj konformas unu al la alia.

Ofte oni tradukas la grekan vorton "karismo" per la vorto "graco" kaj ofte uzas ĝin konekse al la donaco de Dio. "Sed ni kredas pri nia savo per la graco (la donaco) de la Sinjoro Jesuo"(Ag 15:11). Samtempe, la vorto "graco" ofte estas ligita kun respondo al preĝo (ekzemple, Eliro 33:12; 34:9; Nom 32:5; Ps 84:11; 2 Kor 12:9; Heb 4:16; Jak 4:6 kmp. v.3). Zeĥ 12:10 diras pri la lasta tago, en kiu Dio verŝos "spiriton de amo kaj de preĝoj" al la Izraelidoj. Tio konfirmas, ke la donaco de la Spirito, en la senco de pardono kaj savo, estas respondo al preĝo kaj por la hebreoj, kiuj vivis en la unua jarcento, kaj ankaŭ por tiuj, kiuj vivas en la lastaj tagoj. En la sama senco Paŭlo diras pri "la donacoj kaj la vokado de Dio" al pento kaj savo (Rom 11:29).

**La Parakleto**

La sama klarigo povas rilati al la promesoj de la Parakleto en ĉapitroj Joh 14 kaj 16. Dekomence tio rilatis al la miraklaj povoj, donitaj al la apostoloj, ĉar ili ricevis la promeson unuavice. Ĝi ankaŭ povas rilati al ni en la kutima, ne mirakla senco. La miraklaj povoj, donitaj al la apostoloj, verŝajne, devis helpi al ili por skribi la Evangeliojn. La donacoj "instruos vin pri ĉio, kaj vin rememorigos pri ĉio, kion mi diris al vi" (Joh 14:26). La vorto "rememorigos"

limigas la miraklan povon de la promeso de la Parakleto, donita al la apostoloj, kiuj estis kune kun Jesuo dum lia surtera vivo. Nur al ili la Parakleto povis *rememorigi* ion el vortoj de Jesuo. Ĉio, kio estas dirite pri la Parakleto, konvenas al povo de plene skribita Biblio. Pro tio ni povas konkludi, ke tiu kaj ankaŭ aliaj promesoj de la spirito en mirakla formo estis plenumitaj dum la unua jarcento, sed nun ili estas elmontritaj al ni pere de la skribita Vorto de Dio en la Biblio. Certe, pasintatempe La Dia Spirito ankaŭ revelaciis per skribita vorto, sed tio estis nur *laŭparta* revelacio kompare kun tiu "perfekta" revelacio, kiun ni havas nun en la plena Vorto de Dio (1 Kor 13:9-13). Sekve, se nia Biblio estas "perfekta" post kiam estis finskribita la Nova Testamento kaj estis deprenitaj la donacoj, ne povas esti iuj aliaj aldonaj revelacioj de Dio. La asertoj, kiujn entenas la Libro de Mormono, kaj aliaj similaj al ĝi libroj, ke la Biblio ne estas plena revelacio, ne estas subtenataj. La foresto nune de la donacoj de la Spirito konfirmas, ke la Biblio estas plenskribita, kaj se ni akceptas la tutan revelacion de Dio en la Biblio, ni devas ankaŭ akcepti ĉiun ĝian parton, kaj la Malnovan kaj ankaŭ la Novan Testamentojn, nur tiam povas la homo de Dio iĝi "perfekta", kiel perfekta estas Dio, rivelita al ni en la Vorto.

**KOMENTO 8: "Kaj jenaj signoj sekvos la kredantojn" (Mk 16:17)**

Kutime, tiujn vortojn oni diras pruvante, ke veraj kredantoj ricevos la miraklajn donacojn. "Ili prenos en manojn serpentojn; kaj se ili trinkos ion mortigan, ĝi neniel difektos ilin; sur malsanulojn ili metos la manojn, kaj ili saniĝos" (Mk 16:18). Tio ne estas promeso, kiu nur teorie povas okazi, se kredanto havos fidon sufiĉmezure; tio estis efektivaj promesoj pri tio, kion povos okazigi ĉiuj kredantoj. Nune do ni ne vidas tiujn miraklojn, tio signifas, ke la promesoj de tiu verso ne povas rilati al ni nuntempe. Vi povas rememori, kiel Paŭlo tenis en la manoj venenan vipuron kaj nenio malbona okazis al li (Ag 18:3-7). Tio konfirmas, ke lia predikado estis de Dio. Dum la sekvaj jarcentoj neniu el "karismaj" kristanoj, asertantaj, ke ili posedas la donacojn, povis konfirmi posedon de tiu ĉi povo. Ĝis tiam, kiam ĉiu kredanto povos okazigi tiajn miraklojn, oni devas ne opinii, ke donitaj promesoj estas plenumitaj. Tion konfirmas nia konkludo, kiun ni faris dum nia trastudo de la Biblio rilate al la Spirito: tiujn miraklajn donacojn posedis fruaj kristanaj kredantoj en la unua jarcento, sed tiuj donacoj ĉesis sian efikon kaj estis deprenitaj post kiam estis finskribitaj la Sanktaj Skriboj de la Nova Testamento.

La lasta verso de la ĉapitro Mk 16 diras, ke tiuj mirakloj konfirmis la vortojn de Evangeliaj predikantoj: "Kaj jenaj signoj *sekvos* la kredantojn... Kaj elirinte, ili predikis ĉie, Kaj la Sinjoro laboris kun ili kaj fortikigis la vorton per signoj, kiuj *sekvis*"(Mk 16:17,20). Sed kiam nur tiu parkera Vorto estis

finskribita, kaj ekzistas nun en la Nova Testamento, malaperis neceso de miraklaj signoj por konfirmi predikojn.

**ĈAPITRO 2: Demandoj**

1. Kiu el pli sube donitaj vortoj konvenas al la vorto “Spirito”?
a) povo
b) sankteco
c) spiro
d) polvo

2. Kio estas la Sankta Spirito?
a) persono
b) povo
c) Dia povo
d) parto de Triunuo

3. Kiel la Biblio estis skribita ?
a) homoj skribis siajn proprajn pensojn
b) homoj skribis tion, kion, laû ili, Dio volis diri
c) por skribi la Biblion homoj estis inspiritaj de Dio
d) iuj partoj de ĝi estis inspirita de Dio, sed la aliaj ne estis inspiritaj

4. Kial, laû vi, estis donitaj la miraklaj donacoj de la Spirito?
a) por konfirmi la buŝan predikadon de la Evangelio
b) por pli disvastigi la fruan eklezion
c) por helpi al homoj esti justaj
d) por savi la apostolojn de iliaj personaj malfacilaĵoj

5. De kie ni povas lerni pri Dia vero?
a) parte el la Biblio, parte el nia propra pripensado
b) senpere de la Sankta Spirito, sen legado de la Biblio
c) nur el la Biblio
d) de pastroj

6. Nomu iujn donacojn de la Spirito, kiuj ekzistis en la unua jarcento.

7. Kiam ili estis deprenitaj? Ĉu oni povas posedi ilin nuntempe?

8. Kiel la Sankta Spirito povas efiki al nia vivo nuntempe?

# ĈAPITRO 3

# LA PROMESOJ DE DIO

## 3.1 LA PROMESOJ DE DIO: ENKONDUKO

Do, dum nia studo ni eksciis, kiu estas Dio kaj kiamaniere Li plenumas Siajn farojn. Ankaŭ ni eksciis pri kelkaj misopinioj pri tio. Nun ni volas pli detale esplori tion, kion "la Sinjoro promesis al tiuj, kiuj lin amas" (Jak 1:12; 2:5) pro observado de Liaj ordonoj.

La promesoj de Dio en la Malnova Testamento estas ununura espero de veraj kristanoj. En la plej grava momento de sia vivo, Paŭlo, atendante verdikton en la tribunalo, diris pri estonta rekompenco, pro kiu li estis preta perdi ĉion en sia vivo: "Kaj nun mi staras ĉi tie juĝota pro la espero de la promeso farita de Dio al niaj patroj... Kaj pri tiu espero mi estas akuzita" (Ag 26:6,7). Dum la plej granda parto de sia vivo li predikis ĝojajn novaĵojn (la Evangelion) "pri la promeso farita al la patroj", kiun Dio plenumis rilate al Jesuo (Ag 13:32, 33). Paŭlo klarigis, ke kredo je tiu promeso de Dio donis esperon je releviĝo el la mortintoj (Ag 26:6-8, kmp. 23:8), scion pri la dua alveno de Jesuo en la juĝa tago, kaj pri la venonta Regno de Dio (Ag 24:25; 28:20,31).

Ĉio tio detruas la miton pri tio, ke la Malnova Testamento estas nur fragmenta historio de Izraelo, kiu nenion diras pri eterna vivo. Tute ne subite Dio antaŭ 2000 jaroj proponis al ni eternan vivon pere de Jesuo. Tiun intencon Li havis de la komenco mem:

> "Kun espero al eterna vivo, kiun la senmensoga Dio promesis antaŭ la tempoj eternaj, sed ĝustatempe Li elmontris Sian vorton en la anonco" (Tito 1:2,3).
>
> "Kaj la vivo elmontriĝis, kaj ni vidis kaj atestas kaj anoncas al vi la vivon, la eternan vivon, kiu estis ĉe la Patro kaj montriĝis al ni" (1 Joh 1:2).

Konsiderante, ke la intenco de Dio doni al Lia popolo eternan vivon estis ĉe Li de la komenco mem de la mondkreo, estas malfacile supozi, ke Li pri tio restus silenta dum la tuta Lia kvarmiljara komunikado kun homoj, priskribita en la Malnova Testamento. Fakte, en la Malnova Testamento abundas profetaĵoj kaj promesoj, kiuj detale priskribas la esperon, donitan de Dio al Sia popolo. La promesoj, donitaj al la hebreaj patriarkoj estas gravaj ankaŭ por nia savo. Ili estas gravaj tiom, ke Paŭlo rememorigis al la kredantoj en Efeso, ke antaŭ ol ili

eksciis pri tio, ili "estis tiam sen Kristo, fremdigitaj for de la komunumo de Izrael, kaj eksteruloj de la interligoj de la promeso, esperon ne havantaj kaj sen Dio en la mondo" (Ef 2:12) - kvankam sendube ili kredis, ke ilia antaŭa pagana kredo donis al ili kelkan esperon kaj scion pri Dio. Sed ili ne konsciis, ke sen scio de la promesoj de Dio en la Malnova Testamento ili estis "esperon nehavantaj kaj sen Dio en la mondo". Rememoru, ke Paŭlo difinis la kristanan esperon kiel la esperon "de la promeso farita de Dio al niaj (hebreaj) patroj" (Ag 26:6).

Elvokas bedaŭron tiu fakto, ke nur malmultaj eklezioj sufiĉe atentas pri tiuj lokoj en la Malnova Testamento. Kristanismo degeneriĝis en religion, fonditan sur la Nova Testamento, sed ĝi ne estas uzata plenkomplete, el ĝi oni elektas nur kelkajn versojn. Jesuo klare diris pri tio:

> "Se ili ne aŭskultas Moseon (t. e. la unuajn kvin librojn, kiujn skribis Moseo), kaj la profetojn, ili ne kredos, eĉ se iu leviĝus el la mortintoj" (Lk 16:31).

Kelkaj opinias, ke sufiĉas kredi je la resurekto de Jesuo (kmp. Lk 15:30). Tamen Jesuo diris, ke sen fundamenta scio de la Malnova Testamento tiu kredo estus ne plena. Post la krucumo de Kristo la kredo de la apostoloj ŝanceliĝis kaj Jesuo konsilis al ili fortikigi ĝin per legado de la Malnova Testamento:

> "Kaj li diris al ili: Ho malsaĝuloj kaj kore malviglaj por kredi (ĝuste) ĉion, kion la profetoj antaŭparolis! Ĉu la Kristo ne devis suferi ĉion tion, kaj eniri en sian gloron? Kaj komencante de Moseo kaj de *ĉiuj* profetoj, li klarigis al ili el *ĉiuj* Skriboj la dirojn pri li mem" (Lk 24:25-27).

Atentu la emfazon de Jesuo, ke la tuta Malnova Testamento diras pri li. La afero ne estas en tio, ke la apostoloj neniam legis aŭ aŭdis la vortojn de la Malnova Testamento. Ili legis kaj aŭdis, sed ili ne plene komprenis ilian profundan sencon. Por la kresko de vera fido, necesas ne nur legado de la Vorto de Dio, sed ankaŭ ĝusta kompreno. La hebreoj fanatike rilatis al legado de la Malnova Testamento (Ag 15:21), tamen pro tio, ke ili ne komprenis la skribitan pri Jesuo kaj pri lia Evangelio, ili fakte ne kredis al la Malnova Testamento. Kaj Jesuo diris al ili:

> "Ĉar se vi kredus al Moseo, vi ankaŭ kredus al mi, ĉar li skribis pri mi. Sed se vi ne kredas liajn skribojn, kiel vi kredos miajn vortojn?" (Joh 5:46,47).

Malgraû ĉio sia legado de la Biblio, ili fakte ne vidis en ĝi la realan sciigon pri Jesuo, kaj opiniis, ke ili estas ĝuste tiuj, kiuj nepre estos savitaj. Sed Jesuo diris al ili:

> "Vi esploras la Skribojn, ĉar vi opinias, ke en ili vi havas eternan vivon; kaj ili estas tio, kio atestas pri mi" (Joh 5:39).

Simile povas opinii multaj aliaj homoj, kiuj havas supraĵan scion pri kelkaj eventoj kaj temoj el la Malnova Testamento: ĉar ilia scio estas akirita laûhazarde. Ili ankoraû ne komprenas la mirindan mesaĝon de Kristo kaj la Evangelion pri la Regno de Dio. En tiu ĉi ĉapitro ni provos montri al vi la realan sencon de la ĉefaj promesoj de la Malnova Testamento:

- **En la ĝardeno de Edeno**
- **Donita al Noa**
- **Donita al Abraham**
- **Donita al David**

Priskriboj de tiuj ĉi promesoj troviĝas en la unuaj kvin libroj de la Biblio (Genezo – Readmono), kiujn skribis Moseo, kaj ankaû en la libroj de la profetoj de la Malnova Testamento. Tie troviĝas ĉiuj fundamentoj de la kristana Evangelio. Paûlo klarigis, ke lia predikado enhavas nenion, krom tio, "kion la profetoj kaj Moseo anoncis kiel venontan: ke la Kristo devas suferi, kaj ke li unua per la revivigado de mortintoj proklamos lumon al la popolo kaj al la nacianoj" (Ag 26:22,23). La saman li deklaris en siaj lastaj tagoj: "Li (Paûlo) faris al ili klarigon, atestante la Regnon de Dio, kaj penante konvinki ilin pri Jesuo, el la leĝo de Moseo kaj el la profetoj, de mateno ĝis vespero" (Ag 28:23).

Tiu espero de Paûlo, kiu estis la glora lumo en lastaj tagoj de lia vivo, estas tiu ununura espero, kiun devas havi ĉiu vera kristano, kaj ĝi devas esti ankaû nia espero. Inspiritaj de tiu ekzemplo, ni povas nun "esplori la Skribon".

## 3.2 LA PROMESO EN EDENO

Ĉapitro 3 de Genezo enhavas la kortuŝan rakonton pri la homa falo. La serpento estis malbenita pro malĝusta citado de la vorto de Dio kaj pro tio, ke ĝi instigis Evan ne obei al tiu ĉi vorto. Pro sia neobeo la viro kaj virino`estis punitaj. Sed radio de espero prilumigas tiun malĝojan bildon, kiam Dio diras al la serpento:

"Kaj Mi metos malamikecon inter vi kaj la virino kaj inter via idaro kaj ŝia idaro; ĝi frapados vian kapon, kaj vi pikados ĝian kalkanon" (Gen 3:15).

Tiu ĉi verso estas tre lakona, sed ĝi enhavas vastan informon, kiun ni penos klarigi.

Antaŭ ĉio necesas klarigi, ke en la originala hebrea teksto la vorto, tradukita "idaro", estas fakte "semo", kaj povas enhavi aŭ singularan, aŭ pluralan sencon. La vorto "semo" signifas posteulon, aŭ infanon, kaj ankaŭ povas rilati al homoj, kunligitaj per unu difinita semo. Pli sube ni ekvidos, ke "la semo" de Abraham estis Jesuo (Gal 3:16), sed se ni iĝas "en Kristo Jesuo" pere de baptiĝo, ankaŭ ni iĝas la semo, la idaro de Abraham (Gal 3:27-29). La vorto "semo" esprimas ankaŭ ideon de patreco kaj naskiĝo (1 Petro 1:23); vera semo havas la karakterizojn de sia patro.

La semo de la serpento aludas do al tio, kio havas la karakteron de la Edena serpento:

- miskomprenigo de la vorto de Dio
- mensogo
- instigo por ke aliuloj peku

En ĉapitro 6 ni vidos, ke tio ne signifas laŭlitere personon, kiu kondutas sin tiele, sed ke en ni estas

- "nia malnova homo", nia karno (Rom 6:6)
- "la natura homo" (1 Kor 2:14)
- "la malnova homo, pereema laŭ trompaj deziroj" (Ef 4:22)
- "la malnova homo kun liaj agoj" (1 Kol 3:9)

Nome tiu "homo" de peko, kiu troviĝas ene en ni, estas tiu sama biblia diablo, la semo de la serpento.

La semo de la virino signifas specifikan individuon – "vi (la semo de la serpento) pikados ĝian kalkanon" (Gen 3:15). Tiu persono devas piedpremi la semon de la serpento, t. e. pekon – "li frapados vian kapon". Frapo al la kapo de serpento signifas morton por ĝi. La nura persono, kiu estas evidenta kandidato por la semo de la virino, devas esti la Sinjoro Jesuo:

"Jesuo Kristo, kiu neniigis (per la kruco) la morton (kaj sekve, la forton de peko - Rom 6:23) kaj enlumigis la vivon kaj la senmortecon per la evangelio" (2 Tim 1:10).

> “Dio, sendante Sian propran Filon en simileco de peka karno kaj pro peko, kondamnis la pekadon en la karno”, t. e. la biblian diablon, semon de la serpento (Rom 8:3).
>
> Jesuo “elmontriĝis, por forigi pekojn” (1 Joh 3:5).
>
> “Kaj vi nomos lin JESUO (tio estas “Savanto”); ĉar li savos sian popolon de ĝiaj pekoj (Mt 1:21).

Kvankam la patro de Jesuo estas Dio, li estis “el virino naskita” (Gal 4:4), li estis la filo de Maria. En tiu ĉi senco li estis la semo de la virino, kvankam donita al la mondo de Dio. Tiu ĉi semo de la virino por iom da tempo povis esti frapita de peko, la semo de la serpento – “vi pikados ĝian kalkanon” (Gen 3:15). Serpenta piko al kalkano kutime estas portempa vundo kompare kun mortiga frapo al la serpenta kapo.

La kondamno al la semo de la serpento efektiviĝis, ĉefe, per la krucumo de Kristo. Atentu, ke la cititaj pli supre versoj, diras pri la venko de Kristo en is-tempo. La portempa vundo al la kalkano de Kristo estas lia morto dum tri tagoj. Lia reviviĝo pruvas, ke tio estis nur portempa vundo kompare kun la mortiga frakaso de peko. Estas interese rimarki, ke historiaj dokumentoj atestas, ke viktimoj de krucumo estis alnajligitaj al ligna kruco tra iliaj kalkanoj. La versoj Jes 53:4,5 diras, ke Jesuo estis “vundita” sur la kruco. Tio senpere rilatas al la profetaĵo en Gen 3:15, ke Kristo estos pikita de la semo de la serpento. Dio “volis tiel lin turmenti” (Jes 53:10) por ke efektiviĝu Liaj intencoj. Sed Dio estis kun Sia Filo en tiuj malfacilaj por li minutoj. Kaj Dio ankaŭ estas kun ĉiu el ni, Lia popolo, en malfeliĉaj por ni tagoj.

### LA Konflikto Hodiaŭa

Ĉe vi povas aperi la demando: “Se Jesuo neniigis pekon kaj morton (la semon de la serpento), kial do ili ekzistas nun?”. La respondo estas en tio, ke Jesuo detruis la forton de peko en si mem, ĉar la profetaĵo en Gen 3:15 diras antaŭ ĉio pri la konflikto inter Jesuo mem kaj peko. Nune do tio signifas, ke ankaŭ ni povas venki pekon kaj morton, ĉar Jesuo invitas nin aliĝi al lia venko. Kvankam ankaŭ tiuj, kiuj estas veraj kredantoj pro sia aparteno al la semo de la virino, estas pekemaj kaj mortemaj, ili per baptiĝo je Kristo (Gal 3:27-29) povas ricevi pardonon de siaj pekoj kaj savon de morto, kiun rezultigas peko. Jesuo “neniigis la potencon de morto” sur la kruco (2 Tim 1:10), kvankam nur de post kiam efektiviĝos la intenco de Dio pri la tero en la fino de miljara regado de Kristo, homoj fakte ĉesos morti - la morto neniiĝos de sur la tero:

"ĉar li devas regadi, ĝis li metos ĉiujn malamikojn sub siajn piedojn. La lasta neniigota malamiko estas la morto" (1 Kor 15:25,26).

Se ni estas "baptitaj al *Kristo*", tiam promesoj pri Jesuo, kiel tiu en Gen 3:15, rilatas ankaŭ al ni persone. Kaj tiam ili jam estas por ni ne nur interesaj lokoj en la Biblio, sed ili rekte al ni rilatas. Kiel la semo de virino, ankaŭ ni spertos la venkon de peko super ni. Se la Sinjoro ne revenos dum nia vivo, ankaŭ ni estos pikitaj al la kalkano, same kiel Kristo, kaj ankaŭ ni mortos. Sed se ni estas vere la semo de la virino, tiu "vundo" estos por ni nur portempa. Tiuj, kiuj baptiĝas al Kristo per subakviĝo, ligas sin kun Lia morto; elirante do el la akvo, ili simbole reviviĝas (vd. Rom 6:3-5).

Se ni estas la vera semo de la virino, tiam nia vivo respegulos la vortojn el Gen 3:15 - ekzistos ĉiama sento de konflikto ("malamikeco") ene en ni inter bono kaj malbono. La granda apostolo Paŭlo priskribas preskaŭ paranojan konflikton inter li mem kaj peko, kiu furiozis ene en li (Rom 7:14-25).

Post baptiĝo al Kristo tiu interna konflikto kun peko pligrandiĝos kaj kreskos dum la tuta nia vivo. De unu flanko, tiu batalo estas malfacila, ĉar la forto de peko estas granda. Sed de alia flanko, tiun konflikton ni devas venki, ĉar ni estas en Kristo, kiu jam batalis kaj venkis ĝin.

Ĝuste tiel, kiel Jesuo kaj tiuj homoj, kiuj sekvas Lin, estas la semo de la virino, tiel same, peko (biblia "diablo") estas kaj la semo de la serpento, kaj homoj, montrantaj la karakterizojn de peko kaj la serpento. Tiaj homoj montras neglekton al la Vorto de Dio aŭ aliigas ĝin, kio fine kondukos ilin al la honto de peko kaj izolos ilin de Dio. Pro tio, ke la hebreoj estis la homoj, kiuj fakte mortigis Jesuon - t. e. pikis la semon de la virino al la kalkano, ili estas ĉefa ekzemplo de la semo de la serpento. Tio konfirmiĝis per Johano la Baptisto kaj Jesuo:

> "Kaj vidante multajn el la Fariseoj kaj Sadukeoj (tiuj, kiuj kondamnis Jesuon al la morto), venantajn al lia baptado, li (Johano) diris al ili: Ho vipuridoj! (la semo de la serpento) kiu vin avertis forkuri de la venonta kolero?" (Mt 3:7).

> "Kaj sciante iliajn (de Foriseoj) pensojn, li diris al ili... Ho vipuridoj! Kiel vi povas paroli bonaĵojn, estante malbonaj?" (Mt 12:25,34).

La mondo, eĉ la religia mondo, havas la samajn karakterizojn de la serpento. Kaj nur homoj, baptitaj al Jesuo, estas kunligitaj kun la semo de la virino; ĉiuj ceteraj, diversgrade, estas la semo de la serpento. La rilato de Jesuo al la homoj, kiuj estis la semo de la serpento, devas esti ekzemplo por ni:

- Li predikis al ili en spirito de amo kaj sincera kompato, sed samtempe

- Li ne permesis al iliaj vojoj kaj opinioj influi al la liaj, kaj

- Li montris al ili la amantan karakteron de Dio per sia propra vivo.

Sed malgraû ĉio tio ili malamis Jesuon. Lia obeemo al Dio elvokis ilian ĵaluzon. Eĉ liaj familianoj (Joh 7:5; Mk 3:21) kaj liaj intimaj amikoj (Joh 6:66) ne kredis al li, obstaklis lin kaj iuj eĉ foriris de li. Paûlo spertis tion samon, kaj li lamentis al tiuj, kiuj antaûe estis kun li en ĝojo kaj ploro:

"Ĉu mi do per verdirado fariĝis al vi malamiko?" (Gal 4:14-16).

La vero neniam estis populara; sciante tion kaj vivante tiel, kiel ni devas vivi, ni devas atendi aperon de diversaj malfacilaĵoj en nia vivo kaj eĉ persekutojn:

"Sed kiel tiam la laû karno naskita persekutis la laûspiritulon (naskitan "per la vorto de Dio" – 1 Pet 1:23), tiel estas ankaû nuntempe" (Gal 4:29).

Se ni vere kuniĝis kun Kristo, ni devas sperti iujn el liaj suferoj, por ke ankaû ni povu dividi lian gloran rekompencon. Kaj denove ni trovas senkomparan ekzemplon:

"Fidinda estas la diro: ĉar se ni mortis kun li (kun Kristo), se ni suferas (kun li), ni ankaû reĝos kun li... Tial mi suferas ĉion" (2 Tim 2:10-12).

"Se ili min (Jesuon) persekutis, vin ankaû ili persekutos... Sed ĉion ĉi tion ili faros al vi pro mia nomo" (Joh 15:20,21),

t.e. pro tio, ke ni baptiĝis en la nomo de Jesuo (Ag 2:38; 8:16).

Legante similajn versojn, nevole aperas deziro diri: "Se ĉiuj kunligitaj kun Jesuo, la semo de la virino, povas atendi suferojn kaj persekutojn, mi preferas ne aliĝi al ili". Sed certe ni devas memori, ke neniam ni estos submetitaj al tio, kion ni ne povos elteni, kvankam sinofero sendube necesas por ke ni plene aliĝu al Kristo. Nia kunligo kun li donos al ni tiom grandan rekompencon, ke "la suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estos malkaŝota al ni" (Rom 8:18). Kaj eĉ nun lia sinofero donas al ni eblecon dum niaj malfacilaj vivmomentoj per preĝoj ricevi de Dio helpon kaj necesajn

fortojn. Aldonu al tio la sekvajn bonegajn asertojn, kiuj estas substrekitaj en multaj kristadelfianaj Biblioj:

> "Sed fidela estas Dio, kiu ne lasos vin esti tentataj super via forto; sed kune kun la tento ankaû faros la forkurejon, por ke vi povu ĝin elporti" (1 Kor 10:13).

> "Tion mi parolis al vi, por ke en mi vi havu pacon. En la mondo vi havos suferadon; sed kuraĝu; mi venkis la mondon" (Joh 16:33).

> "Kion do ni diru pri ĉi tio? Se Dio estas por ni, kiu estas kontraû ni?" (Rom 8:31).

## 3.3 LA PROMESO AL NOA

Ju pli evoluis la homa historio de la tempo de Adamo kaj Eva, des pli senmorala iĝis homo. Kaj la civilizacio atingis tiun stadion de morala regreso, ke Dio decidis ekstermi de sur la tero ĉiun karnon krom Noa kaj lia familio (Gen 6:5-8). Dio ordonis al Noa konstrui arkeon, en kiu li kun sia familio kaj ankaû kun reprezentantoj de diversspecaj bestoj loĝos dum tuttera diluvo. Necesas diri, ke krom tiu ĉi priskribo de la diluvo en la Biblio, ekzistas multaj sciencaj informoj, konfirmantaj aûtentikecon de la Biblia diluvo. Atentu, ke la tero (t. e. – nia planedo) ne estis neniigita; pereis nur malmorala homaro, estinta sur ĝi, "kaj pereis ĉiu karno, kiu moviĝas sur la tero" (Gen 7:21). Jesuo (Mt 24:37) kaj Petro (2 Pet 3:6-12) opiniis la juĝon, okazintan en la tempo de Noa, kiel pratipo de tiu juĝo, kiu okazos dum la dua alveno de Kristo. Tiel senespere malmorala homaro de la tempo de Noa kompariĝas kun nia nuntempa mondo, kiu estos juĝata dum la reveno de Kristo.

Pro la granda homa pekemeco kreskas kredo, eĉ inter kristanoj, ke nia planedo estos neniigita. Tiu opinio klare demonstras absolutan nescion pri la ĉefa biblia promeso, ke Dio fikse atentas pri aferoj sur nia planedo, kaj ke Jesuo Kristo baldaû revenos por starigi ĉi tie sur la tero la regnon de Dio. Se al homaro estos permesite pereigi sian planedon, tiuj promesoj ne estos plenumitaj. En partoj 4.7 kaj 5 estas konvinkaj pruvoj, ke la Regno de Dio <u>*estos*</u> sur la tero. Pli sube sekvas kelkaj citoj el la Biblio, pruvantaj, ke nek nia planedo, nek la suna sistemo estos neniigitaj:

> "Kaj Li konstruis Sian sanktejon kiel monton, kaj kiel la teron Li fortikigis ĝin por ĉiam" (Ps 78:69).

“La tero restas eterne” (Pred 1:4).

“Suno kaj luno... ĉiuj lumaj steloj... plej supraj ĉieloj... Li starigis ilin por ĉiam, por eterne; Li donis leĝon, kiun ili ne malobeos” (Ps 148:3-6).

“La tero estos tiel plena de konado de la Eternulo, kiel la akvo plenigas la maron” (Jes 11:9; Nom 14:21) – se la tero estos neniigita, tiu ĉi promeso ne estos plenumita.

“Li estas Dio; la farinto kaj estiginto de la tero, Li ĝin aranĝis; Li kreis ĝin ne por ke ĝi estu malplena; Li faris ĝin por ke ĝi estu loĝata” (Jes 45:18). Se Dio kreus la teron nur por ke Li vidu ĝin detruita, Lia laboro estus vana.

Sed ni revenu al la libro “Genezo”, en kiu Dio promesis tion al Noa. Kiam Noa ekvivis en la nova mondo, aperinta post la diluvo, li, verŝajne, havis antaûtimon pri alia universala detruo. Ĉiu pluvo rememorigis al li pri tiu diluvo, kaj pro tio Dio testamentis, ke tio neniam plu ripetiĝos:

“Mi starigas Mian interligon kun vi (atentu pri tiu miraklo – al mortemulo por fari promesojn turnas Sin Dio Mem, kaj Li emfazas la pronomon “Mi”), ke ne ekstermiĝos plu ĉiu karno per akvo de diluvo kaj ne estos plu diluvo, por pereigi la teron” (Gen 9:9-12).
Tiu testamento estis konfirmita per la ĉielarko:

“Mian arkon Mi metas en la nubon, kaj ĝi estu signo... Kaj kiam Mi venigos nubon super la teron, montriĝos la arko en la nubo; kaj Mi rememoros Mian interligon, kiu ekzistas inter Mi kaj vi kaj ĉiu viva ekzistaĵo el ĉiu karno... Kaj la arko estos en la nubo; kaj Mi ĝin vidos, por memori pri la eterna interligo inter Dio kaj ĉiu viva ekzistaĵo el ĉiu karno...” (Gen 9:13-17).

Pro tio, ke tiu interligo inter Dio kaj homoj, kaj bestoj de la tero estas eterna, el tio sekvas, ke homoj kaj bestoj devas vivi sur la tero eterne. Tio ankaû pruvas, ke la Regno de Dio estos sur la tero.

Tiu ĉi promeso al Noa estas fundamento de la Evangelio pri la Regno de Dio; ĝi montras, ke Dio dediĉas al nia planedo grandan atenton, kaj ke Li celas eternan vivon sur ĝi. Eĉ en kolero Li memoras pri kompato (Ĥab 3:2), kaj Lia amo estas tiom granda, ke Li zorgas eĉ pri Sia kreita animalaro (1 Kor 9:9, kmp. Jona 4:11).

## 3.4 LA PROMESO AL ABRAHAM

La Evangelio, kiun predikis Jesuo kaj la apostoloj, laûesence ne diferenciĝis de tiu, kiun sciis Abraham. Dio per la Skribo "antaûpredikis la evangelion al Abraham" (Gal 3:8). Tiuj promesoj estis tiom gravaj, ke Petro komencis kaj finis per ili sian publikan predikon de la Evangelio (Ag 3:13,25). Se ni komprenos, kion estis dirite al Abraham, ni komprenos la veran esencon de la kristana Evangelio. Kaj estas indikoj, ke tiu "evangelio" estis predikata antaû la tempo de Jesuo:

> "Kaj ni alportas al vi bonan sciigon pri la promeso farita al la patroj, ke Dio plenumis tion al ni" (Ag 13:32,33).
>
> "...La evangelio de Dio, kiun Li promesis antaûe per Siaj profetoj (ekz. – Abraham, Gen 20:7) en la sanktaj skriboj" (Rom 1:1,2).
>
> "Por tio ankaû la evangelio estas anoncita al la mortintoj" (1 Pet 4:6) - t.e. al fiduloj, kiuj vivis kaj mortis antaû la kristana erao.
>
> "Ĉar al ni ankaû estas evangelio anoncita tiel same, kiel al ili" (Heb 4:2) - t. e. al la Izraelidoj en la dezerto.

La promesoj al Abraham havas du ĉefajn temojn:

1. Pri la semo de Abraham (precipe pri unu el la idaro) kaj
2. Pri la lando promesita al Abraham.

Tiuj ĉi promesoj estas klarigitaj ankaû en la Nova Testamento, kaj sekvante al nia principo klarigi la Biblion per ĝi mem, ni unuigos ĉi tie la doktrinojn de ambaû Testamentoj, por doni plenan bildon pri la promesoj, donitaj al Abraham.

Dekomence Abraham loĝis en Ur, prospera urbo, kiu nuntempe troviĝas en Irako. Nuntempa arkeologio atestas pri la altnivela civilizacio antaû la tempo de Abraham. Estis evoluita sistemo de bankaj institucioj, socikultura servo kaj konforma infrastrukturo. Abraham loĝis en tiu ĉi urbo kiel ĉiu alia homo. Sed jen venis al li neordinara alvoko de Dio - lasi tiel bone instalitan vivon kaj ekiri vojon al promesita lando. Li ne sciis, kie troviĝas tiu lando kaj kia ĝi estas. Rezulte tio estis vojaĝo je 2400 km. Tiu lando estis Kanaan - nuntempa Israelo.

Dum la vivo de Abraham Dio kelkfoje elmontriĝis al li, ripetante kaj aldonante al li Siajn promesojn. Tiuj promesoj estas la fundamento de la kristana Evangelio. Kiel veraj kristanoj, ni akceptas al ni tiun saman alvokon,

adresitan al Abraham, lasi niajn efemerajn aferojn kaj iri antaûen fidante je Dia Vorto, je Diaj promesoj. Ni povas imagi al ni, kiel Abraham meditis pri la promesoj dum sia vojaĝo. "Per la fido Abraham, vokite, obeis eliri (el la urbo Ur) en lokon (Kanaan), kiun li estis ricevonta kiel heredaĵon; kaj li eliris, ne sciante, kien li iras" (Heb 11:8).

Dum la unua nia pripenso pri la promesoj de Dio ankaû ni ne scias ĝuste, kia estos la promesita lando de Dia Regno. Sed nia fido je Dia Vorto devas esti tia, ke ni ankaû volonte obeus al ĝi.

Abraham ne estis malriĉa nomado, kiu estus tre ĝoja uzi la okazon kaj sekvi la promesojn. Li lasis bone instalitan vivon, kaj ni povas imagi nin en la stato de Abraham, kiel estus malfacile por ni akcepti tiun malfacilan kaj maltrankviligan decidon por sekvi al la promesoj de Dio kaj ekiri nekonatan kaj malproksiman vojon. Eble ni renkontos strangajn rigardojn de niaj kolegoj en laborejo kaj de niaj najbaroj ("Li eniĝis religion!")... ĉion tion Abraham spertis. Por akcepti ĝustan decidon kaj poste efektivigi ĝin, necesis granda volo kaj sana prudento. Kaj la ununura stimulo por venki multajn malfacilaĵojn dum lia multjara vojaĝo estis la vortoj de la promesoj. Ili havis por li gravan signifon, kaj li, verŝajne, memoris ilin parkere kaj ĉiutage pripensadis ilian signifon. Havante la saman fidon kaj agante konforme al ĝi, ni povas meriti tiun saman honoron, kiun havis Abraham - la eternan vivon en la Regno de Dio. Ankoraûfoje ni emfazas, ke la Evangelio de Kristo baziĝas sur tiuj ĉi promesoj al Abraham. Por havi veran fidon je la kristana Evangelio, ni ankaû devas scii la promesojn, donitajn de Dio al Abraham. Sen ili nia fido ne estas fido. Ni devas atente kaj avide legi kaj relegi dialogojn inter Dio kaj Abraham.

### La Lando

1. "Iru el via lando... al la lando, kiun Mi montros al vi" (Gen 12:1).

2. "Kaj li daûrigis sian migradon de sudo ĝis Bet-El (en la centra parto de Israelo)... Kaj la Eternulo diris al Abram... Levu viajn okulojn, kaj rigardu de la loko, sur kiu vi nun estas, norden kaj suden kaj orienten kaj okcidenten. Ĉar la tutan teron, kiun vi vidas, Mi donos al vi kaj al via idaro por eterne... Leviĝu, trairu la landon laûlonge kaj laûlarĝe, ĉar al vi Mi ĝin donos" (Gen 13:3, 14, 15, 17).

3. "La Eternulo faris interligon kun Abram, dirante: Al via idaro Mi donos ĉi tiun landon, de la rivero de Egiptujo ĝis la granda rivero, la rivero Eûfrato" (Gen 15:18).

4. “Kaj Mi donos al vi kaj al via idaro post vi la landon, en kiu vi loĝas kiel fremdulo, la tutan landon Kanaanan, por eterna posedaĵo” (Gen 17:8).

5. “Ĉar ne per la leĝo fariĝis la promeso al Abraham aŭ al lia idaro, ke li estos heredanto de la mondo, sed per la virto el fido” (Rom 4:13).

Ni vidas ĉi tie progresintan revelacion al Abraham:

1. “Estas lando, en kiun Mi volus, ke vi venu”.

2. “La tutan teron, kiun vi vidas, Mi donos al vi kaj al via idaro por eterne”. Atentu, ke tiu ĉi promeso pri eterna vivo estas donita sen romantika aŭreolo aŭ emfazo; homa verkisto skribis tiujn vortojn, sendube, pli emocie kaj inspirplene.

3. La teritorio de la promesita lando estis pli konkrete difinita.

4. Abraham ne devis atendi efektivigon de la promesoj dum sia vivo; li devis esti “fremdulo” en la lando, en kiu pli poste loĝos ĉiame. La senco estas en tio, ke li mortos, kaj pli poste reviviĝos por ricevi tiun ĉi promeson.

5. Paŭlo, en inspirstato, evidente perceptis la promesojn al Abraham, kiel indikojn pri lia tuttera heredo.

La Skribo emfaze rememorigas al ni, ke Abraham ne ricevis efektivigon de la promesoj dum sia vivo: “Per la fido li fariĝis pasloĝanto en la lando de la promeso, kiel lando fremda, loĝante en tendoj” (Heb 11:9).

Li loĝis kiel fremdulo en la lando, verŝajne, kun la sama kaŝita sento de necerteco kaj nekonformeco, kiun havas elmigrintoj. Kaj li, kaj ankaŭ Isaak kaj Jakobo (al kiuj ankaŭ rilatis la promesoj) - “Ĉiuj tiuj mortis en fido, ne ricevinte la promesojn, sed vidinte kaj salutinte ilin de malproksime, kaj konfesinte, ke ili estas fremduloj kaj migrantoj sur la tero” (Heb 11:13). Rimarku kvar stadiojn:

- Scio pri la promesoj – ankaŭ ni akiras tion, studante la Biblion.

- “Salutinte ilin de malproksime”. Ili vivis, kun espero atendante sian estontecon. Same, kiel ni.

- “Ĉiuj tiuj mortis en fido” – ankaŭ ili “al Kristo baptiĝis” (Gal 3:27-29).

- “Konfesinte, ke ili estas fremduloj kaj migrantoj sur la tero”. Ankaŭ ni per nia vivmaniero konfesas, ke la nuntempa mondo ne estas nia vera hejmo, sed ke ni vivas kun espero pri alveno sur la teron de estonta erao.

Se ni ŝatas tiujn ĉi asertojn, Abraham iĝas nia granda heroo kaj ekzemplo. Nur imagu al vi, ke definitiva kompreno, ke plenumo de la promesoj okazos en la estonteco, venis al lacigita de la vivo maljuna homo, jam post kiam mortis lia edzino. Fakte li estis devigita aĉeti pecon de promesita lando, por entombigi tie sian edzinon. (Ag 7:16). Efektive Dio “donis al li nenian heredaĵon en ĝi, eĉ ne piedspacon”, sed samtempe Li promesis doni ĝin al li por posedaĵo (Ag 7:5). Kaj la nuntempa idaro de Abraham, povas esti, ankaŭ sentas la saman nekonformecon, kiam ili aĉetas aŭ luas teron - en la lando, kiu estas promesita al ili por ilia persona eterna heredo!

Tamen Dio plenumas Siajn promesojn. Kaj devas veni tago, kiam Abraham kaj ĉiuj tiuj, al kiuj estis donitaj la promesoj, estos rekompencitaj. La versoj Heb 11:13, 39, 40 konvinkas nin pri tio:

“Ĉiuj tiuj mortis en fido, ne ricevinte la promesojn... ĉar Dio antaŭvidis por ni ion pli bonan, por ke ili sen ni ne estu perfektigataj”.

Ĉiuj veraj kredantoj estos rekompecitaj en la sama tempo, t. e. en la tago de la juĝo. El tio sekvas, ke ĝuste antaŭ la juĝo, Abraham kaj aliaj, kiuj sciis tiujn promesojn, devas esti revivigitaj por esti juĝataj.

Se ili ankoraŭ ne ricevis la promesojn, ili ricevos ilin post releviĝo kaj la juĝo ĉe la reveno de Kristo. Tio signifas, ke ne estas alia alternativo, krom agnoski, ke ĉiuj ili, kiel Abraham, estas nun en sensenca stato, atendante la alvenon de Kristo. Sed samtempe kolorigitaj vitraj mozaikaj bildoj ornamas preĝejojn de la tuta Eŭropo kaj montras Abrahamon kvazaŭ li troviĝas en la ĉielo kaj estas kontenta pri plenumita promeso, rekompence pro sia vivo en la fido. Dum jarcentoj miloj da homoj preteriras tiujn bildojn, religie perceptante ilin. Ĉu trovos vi kuraĝon en vi por ekkredi al la Biblio kaj lasi tiun vicon?

**La semo**

Kiel estis dirite en la parto 3.2, la promeso pri semo rilatas antaŭ ĉio al Jesuo kaj poste al tiuj, kiuj estas “en Kristo” kaj pro tio ankaŭ ili estas konsiderataj kiel la semo de Abraham:

1. “Mi faros vin granda popolo, kaj Mi benos vin... kaj beniĝos per vi ĉiuj gentoj de la tero” (Gen 12:2,3).

2. “Mi faros vian idaron kiel polvo de la tero; se iu povos kalkuli la polvon de la tero, li kalkulos ankaŭ vian idaron. La tutan teron, kiun vi vidas, Mi donos al vi kaj al via idaro por eterne” (Gen 13:15, 16).

3. “Rigardu al la ĉielo kaj kalkulu la stelojn, se vi povas ilin kalkuli... Tiel estos via idaro... Al via idaro Mi donos ĉi tiun landon” (Gen 15:5, 18).

4. “Kaj Mi donos al vi kaj al via idaro post vi... la tutan landon Kanaanan por eterna posedaĵo kaj Mi estos Dio por ili” (Gen 17:8).

5. “Mi multigos vian idaron simile al la steloj de la ĉielo kaj al la sablo sur la bordo de la maro; kaj via idaro posedos la pordegojn de siaj malamikoj. Kaj beniĝos per via idaro ĉiuj popoloj de la tero” (Gen 22:17, 18).

Denove la kompreno pri la semo de Abraham pli vastiĝas:

1. Unue, al li estis dirite, ke li iamaniere havos grandkvantan idaron kaj per lia “idaro” beniĝos ĉiuj popoloj de la tero.

2. Pli poste al li estis dirite, ke lia idaro estos tiom multnombra, ke iĝos granda popolo. Kaj tiu ĉi popolo kune kun li havos eternan vivon sur la tero, al kiu li venis, t. e. en Kanaano.

3. Al li ankaŭ estis indikite, ke lia idaro iĝos tiom multnombra, kiom estas la steloj en la ĉielo. Tio povis sugesti al Abraham, ke li havos multe da spiritaj idoj (steloj en la ĉielo) krom multe da naturaj idoj (polvo de la tero).

4. Al antaŭaj promesoj estis aldonitaj asertoj, ke multaj homoj, kiuj iĝos parto de la idaro, havos personajn interrilatojn kun Dio.

5. La idaro venkos siajn malamikojn.

Atentu, ke per la idaro devas ricevi la benon ĉiuj popoloj de la tero. En la Biblio ofte la ideo pri beno asociiĝas kun pardono de pekoj. Kaj tio estas la plej granda beno, kiun volas ricevi homo, amanta Dion. “Feliĉa estas tiu, kies krimo estas pardonita, kies peko estas kovrita” (Ps 32:1); “La kaliko de beno” (1 Kor 10:16) – estas la kaliko da vino, simbolanta la sangon de Kristo, per kiu eblas ricevi pardonon.

La ununura ido de Abraham, alportinta pardonon de pekoj al la mondo, certe, estis Jesuo. La Nova Testamento, klarigante la promesojn al Abraham, konfirmas tion:

> "Sed al Abraham kaj al lia semo la promesoj estis parolitaj (de Dio). Li ne diras: Kaj al semoj, kvazaû pri multaj; sed kvazaû unu: Kaj al via semo, kiu estas Kristo" (Gal 3:16).

> "... Kaj de la interligo, kiun Dio faris kun viaj patroj, dirante al Abraham: Kaj beniĝos per via idaro ĉiuj gentoj de la tero. Al vi unue Dio relevinte Sian Servanton (t. e. - la semo), sendis lin, por vin beni, deturnante ĉiun el vi for de liaj pekoj" (Ag 3:25,26).

Atentu, kiel Petro citas kaj interpretas la vortojn el la verso Gen 22:18:

La semo - Jesuo
La beno - pardono de pekoj.

La promeso, ke Jesuo, kiel la semo de Abraham, venkos siajn malamikojn, estas ĉi tie ĝustaloke, se tiu promeso rilatas al la venko de Kristo super peko – la plej ĉefa malamiko de la Dia popolo kaj sekve, ankaû de Jesuo mem.

**Aliĝo Al La Semo**

Nun al ni devas esti klare, ke Abraham havis ĝustan komprenon pri bazaj elementoj de la evangelio. Tamen tiuj ĉi gravegaj promesoj rilatis ne nur al Abraham, sed ankaû al lia semo – Jesuo. Kion oni povas diri pri ceteraj? Eĉ fizikaj idoj de Abraham ne ĉiam estis nomataj liaj semoj (Joh 8:39; Rom 9:7). Tamen ni povas iĝi parto de Jesuo, por ke la promesoj pri la semo rilatu ankaû al ni. Tion ni povas atingi per baptiĝo al Jesuo (Rom 6:3-5). Pri baptiĝo en Lia nomo ni legas en Ag 2:38; 8:16; 10:48; 19:5, sed plej klare pri tio diras Gal 3:27-29:

"Ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston. Ne estas ja Judo nek Greko, ne estas sklavo, nek liberulo, ne estas ja vira kaj virina; ĉar vi ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo (per baptiĝo). Se do vi apartenas al Kristo, vere vi estas la idaro de Abraham, kaj heredantoj laû la promeso" – la promeso de la eterna vivo sur la tero per ricevo de pardono de pekoj pere de Kristo.

Per baptiĝo al Kristo, la semo, ni ricevas la promesojn, donitajn al li. Ĝuste pro tio en la verso Rom 8:17 ni estas nomitaj "kunheredantoj kun Kristo".

Rememoru, ke la beno devas veni al homoj de la tuta mondo pere de la semo. Kaj la semo devas iĝi tutmonda homaro, simile al la sablo sur la marbordo kaj steloj en la ĉielo. "Naskotaro Lin servos; oni predikos pri mia Senjoro al la estonta generacio" (Ps 22:30).

Nun ni povas sumigi du partojn de la promesoj, donitaj al Abraham:

**1. La Lando**

Abraham kaj lia semo, Jesuo, kaj ankaŭ tiuj, kiuj estas en Li, heredos la landon Kanaanan kaj per disvastiĝo – la tutan teron, kaj eterne vivos tie. Dum tiu ĉi vivo ili ne ricevos la landon, sed ricevos ĝin en la lasta tago, kiam revenos Jesuo.

**2. La Semo**

Antaŭ ĉio, tio estis Jesuo. Pere de li estos venkitaj ĉiuj pekoj ("malamikoj") de la homaro kaj la beno-pardono disvastiĝos en la tuta mondo.

Per baptiĝo en la nomo de Kristo ni iĝas parto de la semo.

La samaj du fadenoj oni povas rimarki en la Nova Testamento, kaj ne vokas miron, ke homoj, sciinte ilin, akceptis baptiĝon. Tio estis kaj estas la ununura vojo por ke tiuj ĉi promesoj rilatu ankaŭ al ni. Kaj nun ni povas kompreni, kial Paŭlo, maljuna homo, antaŭ sia morto difinis sian esperon kiel "la espero de Izraelo" (Ag 28:20) – la vera kristana espero estas dekomence la juda espero. La vortoj de Kristo "el la Judoj estas la savo" (Joh 4:22) devas signifi ankaŭ por ni neceson iĝi spiritaj judoj, por ke la promesoj pri la savo pere de Kristo, donitaj al la judaj patroj, rilatu ankaŭ al ni.

**Ni legas, ke la fruaj kristanoj predikis:**

1. "Pri la regno de Dio" kaj
2. Pri la nomo de Jesuo Kristo" (Ag 8:12).

Tiuj ĉi ideoj estis klarigitaj al Abraham iom alie:

1. Promesoj pri la lando kaj
2. Promesoj pri la semo.

Notu, ke la vorto "evangelio" pri regno de Dio kaj pri Jesuo en Ag 8:5 estas ĝeneraligita kiel "proklamo pri Kristo". Ofte oni povas aŭdi: "Jesuo amas

vin! Nur diru, ke vi kredas je lia morto pro vi, kaj vi estos savitaj". Sed la vorto "Kristo" klare resumas vicon da tezoj pri li kaj pri lia estonta Regno. La profetaĵo pri la Regno, dirita al Abraham, ludis ĉefan rolon en la frua predikado de la Evangelio.

Paûlo en Korinto "parolis sentime en la daûro de tri monatoj, diskutante kaj rezonante rilate la regnon de Dio" (Ag 19:8); ankaû en Efeso li "iradis predikante la regnon" (Ag 20:25), kaj lia cignokanto en Romo estis la sama: "Li faris al ili klarigon, atestante la regnon de Dio kaj penante konvinki ilin pri Jesuo, el la leĝo de Moseo kaj el la profetoj, de mateno ĝis vespero" (Ag 28:23,31). Tiu fakto, ke Paûlo povis tiom multe paroli, atestas, ke ĉefaj tezoj de la Evangelio pri la regno de Dio kaj pri Jesuo ne estis nur la frazo "Fidu je Jesuo". La revelacio de Dio al Abraham estis multe pli detala, ol tiu ĉi frazo, kaj tio, kion Li promesis al li, fakte estas la bazo de vera kristana Evangelio.

Ni jam montris, ke baptiĝo al Jesuo igas nin parto de la semo kaj heredantoj de la promesoj (Gal 3:27, 29). Sed nur baptiĝo ne sufiĉas por ke ni ricevu la promesitan al ni savon. Ni devas resti en la semo, en Kristo, se ni volas ricevi la promeson, faritan al la semo. Baptiĝo estas nur komenco; ni nur startis kune kun grupo da kurantoj kaj ni devas trakuri la tutan distancon ĝis la fino. Ne forgesu, ke esti en la semo de Abraham ne signifas, ke ni nepre estas akcepteblaj al Dio. La Izraelidoj iusence estas la semo de Abraham, sed tio ne signifas, ke ili estos savitaj sen baptiĝo kaj sen ĉiutaga vivado konforme al la instruado de Jesuo kaj al la ekzemplo de Abraham (Rom 9:7,8; 4:13,14). Jesuo tiel diris al ili: "Mi scias, ke vi estas idaro de Abraham; sed vi celas mortigi min... Se vi estus Abrahamidoj, vi farus la farojn de Abraham" (Joh 8:37, 39), t. e. kredus al Dio kaj al tiu, kiun Dio sendis – al la promesita semo (Joh 6:29).

"La semo" devas havi karakterizojn de sia antaûlo. Se ni volas esti veraj idoj de Abraham, ni devas esti ne nur baptitaj, sed ankaû havi tre fortan fidon je Diaj promesoj, kiujn havis Abraham. Ĝuste pro tio li nomiĝas "la patro de ĉiuj kredantoj... kiuj sekvas la paŝojn de tiu fido" (Rom 4:11, 12). "Sciu do, ke tiuj, kiuj rilatas al fido, estas filoj de Abraham" (Gal 3:7).

Vera fido devas elmontri sin en faroj, ĉar "fido, ne havante farojn, estas en si mem malviva" (Jak 2:17). Kaj la unua konfirmo, ke ni efektive kredas al tiuj promesoj, kiujn ni studas nun, estos nia baptiĝo. Tiam tiuj ĉi promesoj rilatos persone al ni (Gal 3:27-29). Ĉu efektive vi fidas je Diaj promesoj? Tiun ĉi demandon ni devas ĉiame metadi al ni mem dum la tuta nia vivo.

### La Malnova Kaj Nova Interligoj

Nun iĝas tute klare, ke la promesoj al Abraham estas la bazo de la Evangelio de Kristo. La alia aro da gravaj promesoj estas tiuj, kiujn Dio donis al la judoj kuntekste al la leĝo de Moseo. En ili estas dirite, ke se la judoj obeos

la leĝon, ili estos benitaj dum sia vivo. (Read 28). En tiuj promesoj aŭ "testamento" forestas rekta promeso pri eterna vivo. Kaj pro tio estas du grupoj da promesoj:

1. Al Abraham kaj idaro, promesanta pardonon kaj eternan vivon en la Regno de Dio, post kiam revenos Kristo. Tiu ĉi promeso estis donita en Edeno kaj al David.

2. Al la judoj en la tempo de Moseo, promesanta pacon kaj feliĉon en tiu ĉi nuna vivo, se ili obeos la leĝon, kiun Dio donis al Moseo.

Dio promesis al Abraham pardonon kaj eternan vivon en la Regno, sed tio eblas nur pere de la ofero de Jesuo. La morto de Kristo sur la kruco konfirmas la promesojn al Abraham (Gal 3:17; Rom 15:8; Dan 9:27; 2 Kor 1:20), kaj pro tio lian sangon oni nomas "la sango de la nova testamento" (ĉe Mt 26:28 – "la sango de la interligo"). Necesas memori, ke Jesuo diris, ke ni regule trinku la kalikon da vino, simbolantan lian sangon por rememorigo pri li (vd. 1 Kor 11:25): "Ĉi tiu kaliko estas la nova interligo en mia sango" (Lk 22:20). Se ni ne havos klaran komprenon pri tio ĉi, okazigo de "dispecigo de pano" por rememorigo pri Jesuo kaj liaj faroj perdos sian sencon.

La sinoferdono de Kristo ebligis pardonon de pekoj kaj eternan vivon en la Regno de Dio; li konfirmis la promesojn, donitajn al Abraham: "Jesuo fariĝis garantiulo de des pli bona interligo" (Heb 7:22). Heb 10:9 diras, ke Jesuo nuligas la unuan leĝon kaj deklaras la novan. Laŭvorte: "forprenas la unuan, por ke li starigu la duan". Tio atestas , ke Jesuo konfirminte la promesojn al Abraham, nuligis validecon de la interligo, donita pere de Moseo, kaj per sia morto li starigis la novan interligon, kiu malnovigis la unuan (Heb 8:13).

Ĉio tio signifas, ke kvankam la interligo rilate al Kristo estis donita pli frue, sed ĝi ne iĝis plene valida antaŭ lia morto. De post la morto de Jesuo tiu ĉi interligo estis nomita la "nova" interligo kontraste de la malnova. La celo de la "malnova" interligo, farita pere de Moseo, estis la antaŭdiro pri agoj de Jesuo kaj substreki gravecon de la fido je la promesoj rilate al Kristo (Gal 3:19, 21). Siavice, fido je Kristo konfirmas la verecon de la leĝo, donita al Moseo (Rom 3:31). Paŭlo sumigis tion per tiuj vortoj: "Tial la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukanta al Kristo, por ke ni praviĝu per fido" (Gal 3:24). Ĝuste por tio estis konservata la leĝo de Moseo, kaj ĝis nun ni bezonas ĝin por studado.

Ĉion pli supre diritan estas malfacile kompreni dum la unua tralego, sed ni povas sumigi tion kiel:

La promesoj rilate al Jesuo, donitaj al Abraham, estas la Nova Interligo.

La promesoj al la Izraelidoj rilate al la leĝo, donita al Moseo, estas la Malnova Interligo.

La morto de Kristo metis la finon al la Malnova Interligo kaj donas la vivon al la Nova Interligo (Kol 2:14-17).

Lige al tio, tiuj nocioj, kiel dekonaĵa imposto, observo de sabat-tago kaj tiel plu, estantaj parto de la Malnova Interligo, iĝis nedeviga (vd. Parton 9.5). La Nova Interligo estos donita al la realaj Izraelidoj, kiam ili pentos kaj akceptos Kriston (Jer 31:31,32; Rom 9:26, 27; Jeĥ 16:62; 37:26), kvankam, certe, ĉiu judo, kiu faros tion nun kaj baptiĝos al Kristo, povas tuj aliĝi al la Nova Interligo (en kiu ne estas "Judo nek Greko... ĉiuj estas unu en Kristo Jesuo" (Gal 3:27-29).

Ĝusta kompreno de la Malnova kaj la Nova Interligoj helpos al ni esti certaj pri la promesoj de Dio. Skeptikuloj maljuste kulpigas la fruajn kristanajn predikantojn, ke ili ne aldonas konvinkajn argumentojn. Responde al tio Paûlo diris, ke pere de la morto de Kristo, Dio konfirmis Siajn promesojn, kaj ke la espero, pri kiu ili parolas, estas absolute certa propono: "Kiel Dio estas fidela, nia parolo al vi ne estas Jes aû Ne. Ĉar la Filo de Dio, Jesuo Kristo, kiu de ni estas predikata inter vi... ne estis Jes kaj Ne, sed en li la Jes estiĝis... tiel ankaû per li estas la Amen" (2 Kor 1:17-20).

## 3.5 LA PROMESO AL DAVID

Simile al Abraham, David kaj aliaj ricevintoj la promesojn de Dio, ne havis facilan vivon. David estis la plej juna filo en granda familio. Mil jaroj antaû Kristo en Izraelo tio signifis, ke li paŝtis ŝafojn kaj estis servkuristo ĉe siaj pli aĝaj kaj pli estremaj fratoj (1 Sam 15-17). Dum tiu tempo li ekhavis tiun fidon je Dio, kiun havis nur malmultaj homoj.

Venis la tago, kiam la Izraelidoj estis devigitaj alfronti la ultimaton, faritan al ili de iliaj atakemaj najbaroj, la filiŝtoj. La Izraelidoj devis elstarigi el sia medio homon, kiu povus batali kontraû la grandegulo Goliafo, ĉampiono de la filiŝtoj. Laû anoncita kondiĉo, la venkonto regus la venkitan popolon. Kun helpo de Dio David venkis Goliafon, havante nur ŝtonojn kaj ĵetilon. Tiu ĉi venko donis al David popularecon, kiu superis la popularecon de lia reĝo (Saul). Sed "la ĵaluzo estas nefleksebla kiel Ŝeol" (Kanto 8:6), kaj tiuj ĉi vortoj estis konfirmitaj per postaj agoj de Saul, kiu dum 20 jaroj persekutis Davidon kiel raton en la dezerto de suda Jzraelo.

Finfine David iĝis reĝo, kaj por esprimi sian dankon al Dio pro Lia amo al li dum tiuj persekutoj, li decidis konstrui templon al Dio. Tamen Dio diris al

David, ke lia filo Salomon konstruos la templon, sed Dio konstruos la domon al David (2 Sam 7:4-13). Poste sekvis detale klarigita promeso, kiu ripetas multon el tio, kio estis dirite al Abraham:

> "Kiam finiĝos viaj tagoj kaj vi kuŝiĝos kun viaj patroj, Mi starigos post vi vian idon, kiu eliros el via ventro; kaj Mi fortikigos lian regnon. Li konstruos domon al Mia nomo; kaj Mi fortikigos la tronon de lia regno por eterne. Mi estos al li patro, kaj li estos al Mi filo; se li faros malbonaĵon, Mi punos lin per vergo de homoj kaj per batoj de homoj. Kaj Mia favorkoreco ne deturniĝos de li, kiel Mi deturnis ĝin de Saul, kiun Mi forigis antaŭ vi; via trono estos fortikigita por eterne" (vv. 12-16).

El niaj antaŭaj lecionoj ni scias, ke la "semo" estos Jesuo. La priskribo pri li, kiel la filo de Dio (2 Sam 7:14), konfirmas tion, same kiel konfirmas tion multaj aliaj lokoj en la Biblio:

> "Mi estas la markoto kaj ido de David" (Ap 22:16).

> "Pri Sia filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ karno" (Rom 1:3).

> "El la idaro (de David) Dio laŭ promeso venigis al Izrael Savanton, Jesuon (Ag 13:23).

> La anĝelo diris al la virgulino Maria rilate al ŝia filo, Jesuo: "Li estos granda, kaj estos nomata Filo de la Plejaltulo; kaj Dio, la Eternulo, donos al li tronon de lia patro David; kaj li reĝos super la domo de Jakob eterne, kaj lia regno ne havos finon (Lk 1:32, 33). Ĉi tiu promeso rilate al la semo de David (2 Sam 7:13) rilatas al Jesuo.

> Firme difininte, ke la semo estas Jesuo, nun ni atentu al vico da pluaj signifoplenaj detaloj:

**1. La semo**

"Vian idaron, kiu eliros el via ventro... Mi estos al vi patro, kaj li estos al Mi filo". "Frukton de via ventro Mi sidigos sur via trono" (2 Sam 7:12, 14; Ps 132:11). Jesuo, la semo, estis laŭlitere korpa ido de David, tamen samtempe lia Patro estas Dio. Tio povis okazi nur per virgulina naskiĝo, kiel estas dirite pri tio en la Nova Testamento. Maria, ido de David, estis patrino de Jesuo, (Lk 1:32), sed lia patro ne estis homo, sed Dio. Por ke Maria koncipu Jesuon, Dio miraklmaniere efikis al ŝia ventro pere de la Sankta Spirito. Kaj la anĝelo tiel

diris pri tio: "La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin; pro kio ankaŭ la naskotaĵo estos nomata sankta, la Filo de Dio (Lk 1:35). "Naskiĝo pere de la virgulino" estis sola vojo, por ke vere plenumiĝu la promesoj de Dio al David.

### 2. La domo

"Li konstruos domon al Mia nomo" (2 Sam 7:13). Tio signifas, ke Jesuo konstruos templon por Dio, kaj laŭlitere, kaj spirite. En ĉapitroj 40-48 de Jeĥezkel estas detala priskribo pri domo de la Eternulo, kiu estos konstruita en Jerusalemo dum la Ora miljaro (la unuaj mil jaroj de la regado de Dio post la dua alveno de Kristo al la tero), domo, en kiu Dio vivos. Ankaŭ Jes 66:1, 2 diras, ke Dio venos, por vivi en la koroj de homoj, obeantaj al Lia vorto. Tial nune Jesuo konstruas el la veraj fidantoj spiritan templon por Dio. Ĉi-loke necesas aldoni la vortojn de Petro, diritajn de li pri Jesuo, kiel pri la bazangula ŝtono de la templo de Dio (1 Pet 2:4-4), kaj pri kristanoj, kiel pri ŝtonoj vivantaj, el kiuj la templo estos konstruita (1 Pet 2:5).

### 3. La trono

"Mi fortikigos la tronon de lia (de Kristo) regno por eterne... Kaj fidinda estos via domo de David kaj via regno... via trono estos fortikigita por eterne" (2 Sam 7:13, 16; kmp. Jes 9:6, 7). Sekve, la regno de Kristo estos bazita sur la antikva regno de David, nome Izraelo. Tio signifas, ke la estonta regno de Dio estos la restarigita regno de Izraelo. Pli detale tio estas priskribita en Parto 5.3. Por ke plenumiĝu tiu promeso, Kristo devos regi sur la trono de David, en Jerusalemo. Tio ankoraŭfoje pruvas, ke la regno de Dio devas esti starigita ĉi tie, sur la tero.

### 4. La regno

"Fidinda estos via domo kaj via regno eterne antaŭ vi" (2 Sam 7:16). La vortoj "antaŭ vi" donas eblecon supozi, ke David estos ĉeestanto dum la starigo de la eterna regno de Kristo. Tio estas nerekta promeso, ke ankaŭ li reviviĝos ĉe la reveno de Kristo por vidi propraokule la starigon de la tutmonda Regno, regata el Jerusalemo de Kristo.

Tiuj promesoj al David estas tre gravaj por nia kompreno. David ĝoje diris, ke tio estas "eterna interligo... mia domo... kaj mia tuta savo kaj ĉio, kion mi deziras" (2 Sam 23:5). Tio rilatas ankaŭ al nia savo; la tuta nia deziro konsistas el tio, ke tiuj promesoj rilatu ankaŭ al ni. Ankoraŭfoje necesas emfazi

la gravecon de tiuj doktrinoj. Estas tragike, ke kristanismo kontraŭas al tiu ĉi mirinda vero, instruante la jenajn dogmojn:

Se Jesuo nature ekzistus kiel persono antaŭ sia naskiĝo, estus sensencaj ĉiuj promesoj, ke Jesuo estos la semo de David aŭ lia ido.

Se la regno de Dio estos en la ĉielo, Jesuo ne povos restarigi la David-regnon de Izraelo, li ankaŭ ne povos regi sur la trono de David aŭ sur la loko de lia regado. Tiuj eventoj okazis sur la tero, kaj pro tio ilia restarigo devas okazi ankaŭ sur la tero.

**Ĉu plenumiĝis la promesoj pere de Salomon?**

Iu parto de la promesoj, donitaj de Dio al David, estis plenumitaj en Salomono, filo de David. Li konstruis templon al Dio (1 Reĝ 5:8) kaj havis vere prosperantan regnon. Regantoj de ĉiuj najbaraj landoj sendis al Salomon siajn reprezentantojn por esprimi al li sian estimon (1 Reĝ 10), kaj pro aktiva uzado de la templo fontis spiritaj benoj. La regado de Salomon aŭguris tiun regnon, kiu estos dum la regado de Kristo, kiam ĉiuj promesoj, donitaj al David, estos plenumitaj.

Iuj homoj asertas, ke la promesoj al David estis tute plenumitaj pere de Salomon, tamen tio kontraŭas al la jenaj faktoj:

Multaj eldiroj de la Nova Testamento atestas, ke la "semo" estis Kristo, sed ne Salomon.

La regado de "la semo" devas esti eterna, sed tiu de Salomon ne estis tia.

David agnoskis, ke la promesoj koncernis eternan vivon, kaj sekve ne rilatis al lia tiama familio "Ĉu ne tiel estas mia domo ĉe la Eternulo? Ĉar Li faris kun mi eternan interligon (2 Sam 23:5).

La semo de David estas la Mesio, la Savanto (Jes 9:6, 7; 22:22; Jer 33:15; Joh 7:42). Sed Salomono pli poste forklinis sian koron de la Eternulo (1 Reĝ 11:1-13; Neĥ 13:26) pro siaj multnombraj aligentaj edzinoj.

**KOMENTO 9: Nova Tero Kaj Nova Ĉielo**
**(Ap 21:1; 2 Pet 3:6-12)**

Sian Regnon Dio intencas establigi ĉi tie, sur la tero (vd. ĉapitro 5.4), kaj pro tio estas malverŝajne, ke Li detruos nian planedon. Tion ankaŭ konfirmas la

promesoj, kiun ni studis en parto 3.3. Do, la menciojn pri detruo de la tero kaj ĉielo necesas kompreni metafore.

La citaĵo el la epistolo de Petro montras la similecon inter la juĝo sur la tero en la tempo de Noa kaj tiu, kiu okazos en la "tago de la Sinjoro" en estonteco. "La tiama mondo, diluvite, pereis; sed la nuna ĉielo kaj la tero... rezervate ĝis la tago de juĝo..." (2 Pet 3:6, 7).

Petro rimarkigas diferencon inter akvo, kiel rimedo de pereigo en la tempo de Noa, kaj fajro, kiu estos uzata en la tempo de la dua alveno de Kristo. "La ĉielo kaj la tero" en la tempo de Noa ne estis laŭlitere neniigitaj, sed "pereis ĉiu karno", kiu estis pekema (Gen 7:21; kmp. 6:5,12). "La ĉielo kaj la tero", sekve, signifas objektan sistemon aŭ homan organizon. Tiuj, kiuj miskomprenas tiun citon, emas ne atenti la vortojn pri la detruo de la "ĉielo", pri kio estas dirite pli supre. Ne necesas kompreni ilin laŭlitere, ĉar la ĉielo estas la loko de la estado de Dio (Ps 123:1), kie forestas pekeco (Ĥab 1:13; Ps 65:4,5) kaj "la ĉieloj rakontas la gloron de Dio" (Ps 19:1). Se la vortojn pri neniigo de la ĉielo devas kompreniĝi metafore, tio ankaŭ rilatas kaj al la "tero".

La sekvaj citaĵoj el aliaj partoj de la Biblio atestas, ke la vortojn "la ĉielo kaj la tero" oni devas kompreni figure, ĉar ili rilatas al objekta sistemo sur la tero:

- "Mi rigardas la teron, kaj jen ĝi estas malplena kaj dezerta; la ĉielon, kaj jen ĝi estas senluma... ĉar tiele diras la Eternulo: Dezertigita estos la tuta lando (de Izrael)... pro tio la tero ploros kaj la ĉielo supre malĝojos" (Jer 4:23-28). Tio estas profetaĵo pri la estonta juĝo de "la ĉielo kaj la tero", nome de la popolo de Izrael, pro kiu ili (ne la laŭlitera ĉielo kaj tero) ploros.

- Pli frue Moseo, turnante sin al ĉiuj izraelidoj, diris: "Atentu, ĉielo, kaj mi parolos; kaj aŭdu la tero la vortojn de mia buŝo" (Read 32:1). Tiu alparolo emfazas, ke ĉeestis du kategorioj de popolo, al kiuj li estis parolanta: 1) "ĉiuj plejaĝuloj de viaj triboj" kaj 2) "la tuta komunumo de Izrael (Read 31:28,30). La plejaĝuloj estas egaligitaj al la "ĉielo", kaj la ordinaraj homoj – al la "tero".

- Ankaŭ Jesaja komencis sian profetaĵon similstile: "Aŭskultu, ho ĉielo, kaj atentu, ho tero... Aŭskultu la vorton de la Eternulo, estroj..., atentu la instruon de nia Dio, popolo" (Jes 1:2,10). Ĉi tie ni ree vidas paralelon inter la ĉielo kaj la estroj, kaj inter la tero kaj la popolo.

- "Li vokas la ĉielon supre kaj la teron, por juĝi Sian popolon" de Izraelo (Ps 50:4). Tiu ĉi verso klarigas sin mem.

"Ĉar Mia glavo ebriiĝis en la ĉielo; jen ĝi malsupreniras sur Edomon... La glavo de la Eternulo estas plena de sango... La Eternulo aranĝas... grandan

buĉadon en la lando de Edom" (Jes 34:5,6). "La ĉielo" ĉi tie estas identigite al Edom; sekve, pli frue dirita profetaĵo, ke "velkos la tuta estaĵaro de la ĉielo" (Jes 34:4) rilatas al la velkado de Edom.

- La ĉielo kaj la tero, menciitaj en Jes 13, rilatas al la popolo de Babelo. En serio da deklaroj pri Babelo ni legas, ke Dio diras: "...Mi ektremigos la ĉielon, kaj la tero skuiĝos el sia loko... Ili estos kiel gazelo persekutata... Ĉiu sin turnos al sia popolo, kaj ĉiu kuros al sia lando" (Jes 13:13,14). Ankaŭ ĉi tie "la ĉielo kaj la tero" signifas la popolon.

Konsiderinte ĉion tion, oni povas konkludi, ke la vortoj pri nova ĉielo kaj tero en la Nova Testamento rilatas al tiu nova sistemo de tutmonda organizo, kiu establiĝos en la Regno de Dio post la reveno de Kristo.

Tion konfirmas 2 Pet 3. Post la priskribo de la fino de "la nuna ĉielo kaj la tero", la verso daŭrigas: "Sed laŭ Lia promeso ni atendas novan ĉielon kaj novan teron, en kiuj loĝos justeco". Tio estas citaĵo de la verso Jes 65:17 pri la promeso de Dio: "Ĉar jen Mi kreos novan ĉielon kaj novan teron". Pli sube Jes 65 diras pri nova sistemo de organizo de vivo ĉi tie, sur la tero: "Mi kreos Jerusalemon por ĝojo... Ili ne konstruos, ke alia loĝu... Ĉar junulo mortos en la aĝo de cent jaroj (t. e. vivdaŭro estos plilongita)... Lupo kaj ŝafido paŝtiĝos kune (Jes 65:18-25). Tiuj ĉi promesoj klare rilatas al la estonta Regno de Dio sur la tero: la novaj ĉielo kaj tero, kiuj anstataŭigos la nunan mizeran situacion.

**KOMENTO 10: La Pretendoj De Brita Izraelismo**

Adeptoj de la komunumo de H. W. Armstrong " Simpla Vero" anoncis la ideon, ke la promesoj al Abraham jam plenumiĝis en la angla kaj amerika popoloj, kiuj laŭ ilia opinio, estas la triboj de Efrem kaj Manase. Anoj de la "Brita Izraelismo" opinias, ke la reĝoj kaj la reĝinoj de Britio devenas de tiu branĉo de Judas, kiu komenciĝis per la reĝo David. Por pravigi sian teorion, ili asertas, ke Dio malakceptis la judojn, kiel Sian popolon, kaj anstataŭ ili Li elektis britajn popolojn.

Konforme al tio skribita en ĉapitro 3, estas klare, ke tiuj pretendoj ne estas laŭbibliaj. Pli sube estas donitaj nur kelkaj el multnombraj ekzemploj, konfirmantaj erarecon de similaj asertoj:

Estas tre malfacile konfirmi devenon de la britaj kaj la amerikaj popoloj; ili estas miksdevenaj popoloj el multaj partoj de la mondo. Krome, ke iu naskiĝis en tiuj ĉi landoj tute ne signifas, ke lin elektis Dio.

Britaj izraelanoj asertas, ke benoj, promesitaj al la idaro de Abraham, estis plenumitaj al britaj popoloj sendepende de ilia obeemo al Dio. Sed tio tute

kontraŭas al la multfoje ripetita principo, ke benojn de Dio ricevos nur obeemaj al Li homoj. En Lev 26 kaj Read 28 estas emfazite, ke la izraelidoj ricevos benojn, se ili obeos al Lia vorto, sed ilin trafos malbenoj pro ilia malobeemo. La asertoj, ke Dio sendis al britoj siajn benojn sendepende de ilia obeo al Lia vorto kaj eĉ malkaŝita malobeo al Li, signifas, ke Dio malplenumas la kondiĉojn, pro kiuj Li sendas Siajn benojn.

La asertoj, ke Dio malakceptis la popolon de Izrael kaj anstataŭigis ĝin per la britoj, kontraŭas al la versoj Rom 11:1,2: "Ĉu Dio forpuŝis Sian popolon? Nepre ne! Ĉar ankaŭ mi (Paŭlo) estas Izraelido, el la idoj de Abraham... Dio ne forpuŝis Sian popolon, kiun Li antaŭkonis".

La Regno de Dio en la pasinteco estis la Regno de Izrael (2 Kron 9:8). Ĝi estis renversita pro malobeo, tamen la Regno estos restarigita (Jes 21:25-27). Ĝi revenos al Jerusalem (Miĥ 4:8), kiam Jesuo sidos tie sur la trono de David (Lk 1:32).

La nune disĵetita popolo de Izrael denove kunvenos de ĉiuj partoj de la mondo: "Jen Mi prenos la Izraelidojn el inter la nacioj, kien ili iris, kaj Mi kolektos ilin de ĉirkaŭe kaj venigos ilin en ilian landon. Kaj Mi faros ilin unu nacio en la lando, sur la montoj de Izrael" (Jeĥ 37:21,22). Tio plenumiĝas nune, kaj judoj revenas al sia lando. La definitiva plenumiĝo okazos dum la Regno, kiu, kiel montras la nuna reveno de judoj al sia lando, devas veni baldaŭ.

**Rimarko:** Tiuj, kiuj interesiĝas pri tiu ĉi demando, povas senpage ricevi de la eldonistoj la broŝuron "Studo de Brita Izraelismo".

## ĈAPITRO 3: Demandoj

1. Kiuj el la promesoj de Dio antaŭdiras ĉiaman batalon inter peko kaj justeco?
   a) La promesoj al Noa
   b) La promesoj en Edeno
   c) La promesoj al David
   d) La promesoj al Abraham

2. Kiuj el pli sube donitaj asertoj estas veraj rilate al la promesoj en Edeno?
   a) La semo de la serpento estas Lucifero
   b) Kristo kaj la justuloj estas la semo de la virino
   c) La semo de la serpento estis portempe vundita de Kristo

d) La semo de la virino estis vundita pere de la morto de Kristo

3. Kie eterne vivos la idaro de Abraham?
   a) En la ĉielo
   b) En Jerusalem
   c) Sur la tero
   d) Kelkaj en la ĉielo, kaj kelkaj sur la tero

4. Kio estis promesita al David?
   a) Ke lia granda posteulo reĝos eterne
   b) Ke lia semo havos Regnon en la ĉielo
   c) Ke la semo estos la filo de Dio
   d) Ke lia semo, Jesuo, vivos en la ĉielo antaŭ sia naskiĝo sur la tero

5. Kiel ni povas iĝi la semo de Abraham?

6. Ĉu iam estos detruita la tero?

7. Kiel la promesoj de Dio konfirmas Vian respondon al demando 6?

8. Klarigu la promeson en Edeno, pri kiu diras Gen 3:15.

## ĈAPITRO 4

# DIO KAJ MORTO

### 4.1 LA HOMA NATURO

La plimulto da homoj dediĉas malmulte da tempo por medito pri morto aŭ pri sia propra naturo, kiu finrezulte estas la kialo de morto. Tia foresto de memanalizo kondukas al foresto de sinkonscio kaj sekve, homoj naĝas laŭ la fluo de la vivo, farante siajn decidojn konforme al siaj propraj deziroj. Ili ne volas akcepti, ke la vivo estas mallonga, ke frue aŭ malfrue ili devas renkontiĝi kun morto. "Kio estas via vivo? Vi ja estas vaporo, kiu mallongan tempon montriĝas kaj poste malaperas" (Jak 4:14). "Ni devas morti, kaj ni similas al akvo, kiu estas verŝata sur la teron kaj kiun oni ne povas enkolekti" (2 Sam 14:14). "Kiel herbo: matene ĝi floras kaj ĝermas, vespere ĝi dehakiĝas kaj sekiĝas" (Ps 90:5,6). Moseo, vere pensanta homo, agnoskis tion kaj turnante al Dio, petis: "Instruu nin kalkuli niajn tagojn, por ke ni akiru saĝan koron" (Ps 90:12). Tial, pro la efemereco de nia ekzistado, ni devas aspiri al akiro de la vera saĝeco kiel al la unuavica celo.

La homoj rilatas al la fineco de morto diverse. Iuj popoloj konceptis la morton kaj entombigon kiel parton de la vivo, mildigante per tio la senton de perdo kaj fineco. La plimulto da tiuj homoj, kiuj nomas sin kristanoj, konceptas, ke la homo havas "senmortan animon" aŭ iun senmortan elementon ene en si, kiu postvivos la morton, transportante sin en iun lokon por ricevo de rekompenco aŭ puno en la estonteco. Pro tio, ke la morto estas la ĉefa problemo kaj tragedio de ekzistado, necesas atendi, ke la homa menso trovos iun metodon por mildigi ĝian psikan influon. Tial ne estas mirinde, ke aperis diversaj eraraj teorioj rilate al la morto kaj al la homa naturo mem. Por trovi la veron, necesas, kiel ĉiam, turni sin al la Biblio kaj serĉi en ĝi klarigon pri tiu temo. Necesas memori, ke la unua malvero, pri kiu diras la Biblio, estas la mensogo de la serpento en Edeno. Malgraŭ la klara averto de Dio, ke homo "mortos", se pekos (Gen 2:17), la serpento diris: "Ne, vi ne mortos" (Gen 3:4). Tiu provo nei, ke ĉiu homo estas mortema, karakterizas ĉiujn erarajn religiojn. Estas evidente, ke en tiu ĉi specifika sfero, unu erara doktrino kondukas al la alia, kaj la alia al la alia kaj tiel plu. Kaj male, unu parto de la vero kondukas al la alia, kiel tion montras 1 Kor 15:13-17, kie Paŭlo sekvas de unu parto de la vero al la alia.

Por kompreni nian veran naturon, ni devas konsideri, kion diras la Biblio pri la kreo de homo. Tiu evento estas priskribita en simpla kaj klara maniero, kiu ne lasas en ni iun ajn dubon pri tio, kio ni estas laŭ nia naturo (vidu Komenton 18 rilate al la laŭlitereco de tio, pri kio estas dirite en Genezo). "Kaj

Dio la Eternulo kreis homon el polvo... Ĉar vi (Adam) estas polvo kaj refariĝos polvo" (Gen 2:7; 3:19). Tie ĉi estas neniu aludo je tio, ke homo povas havi senmortecon; ke restas neniu lia parto, kiu povus ekzisti post lia morto.

En la Biblio estas kelkfoje substrekite, ke la homo konsistas ĝenerale el tera polvo: "Ni estas argilo" (Jes 64:8); "La unua homo estas el la tero, elpolva" (1 Kor 15:47); "Kiuj loĝas en argilaj dometoj, fonditaj sur tero" (Ijob 4:19); Kaj homo refariĝus polvo (Ijob 34:15). Abraham konfesis, ke li estas "polvo kaj cindro" (Gen 18:27). Tuj post malobeo al la ordono de Dio en Edeno, Dio "elpelis Adamon... nun eble li etendos sian manon kaj prenos ankaŭ de la arbo de vivo kaj manĝos kaj vivos eterne" (Gen 3:24,22). Se homo havus ene en si senmortan elementon, tio ĉi estus, certe, superflua.

## Kondiĉa Senmorteco

En la Evangelio plurfoje ripetiĝas mesaĝo, ke homo povas trovi vojon por ricevi eternan vivon kaj senmortecon pere de laboro de Kristo. Tio estas la sola speco de senmorteco, pri kiu diras la Biblio. El tio sekvas, ke ĉiu penso pri tio, ke oni eterne suferos pro siaj pekoj, ne trovas iun ajn subtenon en la Biblio. La sola vojo por akiri senmortecon estas fido kaj obeado al la ordonoj de Dio; tiuj, kiuj estos obeemaj, havos senmortecon en perfekta stato kiel rekompencon pro sia fideleco.

La sekvantaj citaĵoj pruvas, ke tiu senmorteco estas kondiĉa, kaj ne estas io, kion li laŭnature posedas:

> "Sed nun malkaŝita per la apero de nia Savanto Jesuo Kristo, kiu neniigis la morton kaj enlumigis la vivon kaj la senmortecon per la evangelio" (2 Tim 1:10; 1 Joh 1:2).
>
> "Se vi ne manĝos la karnon de la Filo de homo kaj ne trinkos lian sangon, vi ne havos en vi vivon. Kiu manĝas mian karnon kaj trinkas mian sangon, tiu havas eternan vivon; kaj mi levos tiun en la lasta tago" por doni al li tiun "eternan vivon" (Joh 6:53, 54). En Joh 6 Jesuo diras: "Mi estas la pano de vivo", kaj nur per ĝusta respondo al li eblas havi la esperon pri la eterna vivo (Joh 6:47,50,51,57,58).
>
> "Dio donis al ni la vivon eternan; kaj tiu vivo estas en Lia Filo" (1 Joh 5:11). Ne estas eble esperi pri la eterna vivo sen Kristo. Nur por tiuj, kiuj estas "en Kristo", estas ebla senmorteco. Li estas la "aŭtoro de (eterna) vivo " (Ag 3:15); "li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantoj

(Heb 5:9). Pro tio la senmorteco por homoj estas ligita kun la agoj de Kristo.

La vera kredanto serĉas la vojon al senmorteco kaj li estos rekompencita pro tio per la donaco de la eterna vivo, kion li ne havas denature. (Rom 2:7; 6:23; Joh 10:28), por ke nia putrema karno "surmetu senputrecon" ĉe la reveno de Kristo (1 Kor 15:53); tiele, senmorteco estas donaco promesita, ne nun posedata (1 Joh 2:25). Nur Dio havas senmortecon (1Tim 6:16).

## 4.2 LA ANIMO

El ĉio dirita pli supre sekvas, ke fakte homo ne havas de la naturo senmortan animon aŭ iu ajn senmortan elementon ene en si. Kaj nun ni provos klarigi signifon de la vorto "animo".

En la hebrea kaj greka lingvoj la vortojn, tradukitajn kiel "animo" en la Biblio, estas ankaŭ tradukitaj jene:

| | |
|---|---|
| Korpo | Spiro |
| Kreitaĵo | Koro |
| Menso | Persono |
| Memo | |

Sekve, la vorto "animo" rilatas al persono, korpo aŭ memo. La fama frazo "Savu niajn animojn" klare signifas "Savu nin de morto". Do, la vorto "animo" signifas personon (ci, vi), la tuton de la spiritaj kaj vivigaj ecoj de homo. Ĝuste pro tio multaj nuntempaj tekstoj de la Biblio malofte uzas la vorton "animo", preferante la vortojn "vi" aŭ "persono". La bestoj, kiujn Dio kreis, estas nomitaj "vivaj estaĵoj" (Gen 1:20, 21). La hebrea vorto tradukita kiel "estaĵo" estas "nephesh", kiun oni ankaŭ tradukas kiel "animo". Ekzemple, Gen 2:7 diras "kaj la homo fariĝis viva animo". Sekve, homo estas "animo" same kiel la bestoj estas "animoj", t. e. estaĵoj. La nura diferenco inter ili estas tio, ke la homo mense superas la bestojn; li estas kreita laŭ la bildo de Dio rilate al la fizika naturo (Gen 1:26; vidu ĉp.1.2). Krom tio, kelkaj homoj estas alvokitaj scii la Evangelion, kiu donas al ili la esperon je senmorteco (2 Tim 1:10). Rilate al niaj ĉefaj naturaj ecoj kaj la naturo de nia morto tie ĉi ne estas diferenco inter homo kaj besto:

"La sorto de homidoj kaj la sorto de bruto estas sorto egala: kiel ĉi tiuj mortas, tiel mortas ankaŭ tiuj, kaj sama spirito estas en ĉiuj; kaj supereco de homo kontraŭ bruto ne ekzistas... Ĉiuj (t. e. homoj kaj bestoj) iras al

unu loko (la tombo); ĉiuj fariĝis el polvo, kaj ĉiuj fariĝos polvo" (Pred 3:19, 20). La enspirita verkisto de La Predikanto preĝis al Dio, ke Li helpu al homoj ekkonscii tiun fakton, "ke ili estas bruto per si mem" (Pred 3:18). Certe, multaj homoj rezistas akcepti tiun fakton, ke laŭnature ni estas nur bestoj kaj vivas laŭ la samaj instinktoj de sinkonservo, trairante la saman naturan selekton kaj sinreproduktón, sed fakte ni devas humile konscii tion. En la verso Pred 3:18 estas dirite, ke Dio "elprovas" homon, devigante lin vidi, ke li estas nur besto; t. e. tiuj, kiuj estas sufiĉe humilaj kaj konscios tiun veron, estos Lia vera popolo, sed tiuj, kiuj ne volas kompreni tion, ne sukcesos la "elprovon". Dum la XX-a jarcento tra la tuta mondo disvastiĝis la filozofio de humanismo, ke homaj estaĵoj estas superege gravaj kaj valoraj. Purigi nian konscion de la influo de humanismo estas nune grava tasko. La klaraj vortoj de Ps 39:5 helpas al ni: "Absoluta vantaĵo estas ĉiu homo". "Homo iranta ne povas libere direkti siajn paŝojn" (Jer 10:23).

La baza vero, kiun ni scias, estas tio, ke ĉiuj homoj, fakte, ĉiuj "vivantaj kreitaĵoj", finfine mortos. Sekve, la animo ankaŭ mortas. Ĝuste pro tio ne vokas miron tiu fakto, ke preskaŭ la triono da ĉiuj vortoj en la Biblio, tradukitaj kiel "animo", estas kunligitaj kun la morto kaj neniigo de la animo. Kaj tio, ke la vorto "animo" estas tiele uzata, montras, ke ĝi ne povas esti io nedetruebla kaj senmorta:

"Tiu animo, kiu pekas, ĝi mortos" (Jeĥ 18:4).

"Timu Tiun (Dion), kiu povas pereigi kaj animon kaj korpon" (Mt 10:18). Ankaŭ en la versoj Jes 22:27; Sent 6:32; Lev 23:30 estas menciite pri tio.

"Ili ekstermis tiel, ke restis neniu animo" (Jos 11:11; kmp Jos 10:30-39).

"...Kaj mortis ĉiu vivanta estaĵo en la maro" (Ap 16:3; kmp. Ps 78:50).

La ordono de Moseo ofte menciis, ke ĉiu animo, kiu ne estas obeema, devas esti neniigita (ekzemple, Nom 15:27-31).

Indikoj pri tio, ke la animo povas esti strangolita aŭ povas trafi en kaptilon, havas sencon nur en tiu okazo, se la animo povas morti (Sent 18:7; 22:25; Ijob 7:15).

"...Nepovantaj konservi sian animon viva" (Ps 22:29).

Kristo "elmetis sian animon al la morto" (Jes 53:10,12).

Multaj versoj montras al ni, ke la "animo" rilatas al la persono aŭ korpo, sed ne al iu senmorta fajrero en ni. Jen du evidentaj ekzemploj:

> "Benu, ho mia animo, la Eternulon, kaj mia tuta internaĵo Lian sanktan nomon. Benu, ho mia animo, la Eternulon, kaj ne forgesu ĉiujn Liajn bonfaraĵojn" (Ps 103:1,2).
>
> "Kiu volas savi sian animon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian animon pro mi kaj pro la evangelio, tiu ĝin savos" (Mk 8:35).

Tio estas konvinka pruvo, ke la animo ne signifas iun spiritan elementon en ni, tie ĉi la vorto "animo" (greka "psuche") signifas nur fizikan vivon.

> Nom 21:4 diras, ke "senkuraĝiĝis la animo de la popolo" (la popolo havas unu animon). Sekve, la "animo" ne povas esti iu spirita parto interne de iu persono.

## 4.3 LA SPIRITO DE LA HOMO

Bedaŭrinde, multaj homoj konfuzas la signifojn de la vortoj "animo" kaj "spirito". Tion ankoraŭ pli komplikigas tiu fakto, ke en multaj lingvoj kaj ankaŭ en tradukoj de la Biblio la vortoj "animo" kaj "spirito" estas tradukitaj per la sama vorto. La animo rilatas ĉefe al la tuta korpo de homo, sed iufoje ĝi povas rilati ankaŭ al la spirito, tamen kutime estas diferenco inter "animo" kaj "spirito", laŭ Biblia uzado: "ĝis divido de la animo kaj spirito" (Heb 4:12). La hebrea kaj greka vortoj, signifantaj spiriton ("ruach" kaj "pneuma" respektive), povas esti tradukitaj kiel:

| | |
|---|---|
| Vivo | Spirito |
| Menso | Vento |
| Spiro | |

Ni jam studis la temon "Spirito" en Parto 2.1. Dio uzas Sian Spiriton por konservi la naturan kreitaĵon, inkluzive homon. La spirito de Dio, estante interne en homo, estas lia interna viva forto. "La korpo aparte de la spirito estas malviva" (Jak 2:26). "Kaj Dio la Eternulo kreis la homon el polvo de la tero, kaj Li enblovis en lian nazon spiron (spiriton) de vivo, kaj la homo fariĝis viva animo" – viva kreitaĵo (Gen 2:7). Ijob diras "la spiro de Dio estas en mia nazo"

(Ijob 27:3; kmp. Jes 2:22). El tio sekvas, ke la spirito de vivo estas donata al ni je nia naskiĝo kaj restas interne en ni tiom longe, kiel longe vivos nia korpo. Kiam la spirito de Dio estas elprenita el io ajn, ĝi senprokraste pereas, ĉar la spirito estas la viva forto. Se Dio "prenus al Si Sian spiriton kaj spiron, tiam pereus absolute ĉiu karno, kaj homo refariĝus polvo. Se vi havas prudenton, aŭskultu ĉi tion" (Ijob 34:14-16). La lasta propozicio refoje aludas, ke la homo kun granda malfacilo konscias la realan naturon de sia ekzisto.

Kiam Dio forprenas de ni Sian spiriton je nia morto, mortas ne nur nia korpo, sed ankaŭ venas la fino por nia konscio. David komprenis tion kaj pli fidis je Dio, ol je tiel malfortaj kreitaĵoj kiel homo. Al la asertoj de humanistoj kontraŭas Ps 143:3-5 "Ne fidu eminentulojn, Homidon, kiu ne povas helpi. Eliras lia spirito, li reiras en sian teron; Kaj en tiu tago neniiĝas ĉiuj liaj intencoj. Bone estas al tiu, kies helpo estas la Dio de Jakob, kiu esperas al la Eternulo, lia Dio". Post la morto "la polvo refariĝos tero, kiel ĝi estis, kaj la spirito reiros al Dio, kiu ĝin donis" (Pred 12:7). Pli frue ni jam montris, ke Dio pere de Sia Spirito ĉeestas ĉie. En tiu ĉi senco "Dio estas Spirito" (Joh 4:24). Dum nia morto ni faras "nian lastan enspiron" en tiu senco, ke la Spirito de Dio, kiu estas en ni, forlasas nin. Tiu spirito ensorbiĝas en la spiriton de Dio, kiu ĉirkaŭas nin; sekve, post nia morto "la spirito reiros al Dio".

La saman procezon de la morto havas ankaŭ la bestoj, ĉar la spirito de Dio subtenas ĉiun kreitaĵon. Homoj kaj bestoj havas la saman spiriton, aŭ vivan forton, interne de si. "Ĉar la sorto de homidoj kaj la sorto de bruto estas sorto egala: kiel ĉi tiuj mortas, tiel mortas ankaŭ tiuj, kaj sama spirito estas en ĉiuj; kaj supereco de homo kontraŭ bruto ne ekzistas" (Pred 3:19). Kaj la aŭtoro aldonas: "Ĉiuj iras al unu loko: ĉiuj fariĝis el polvo, kaj ĉiuj refariĝos polvo" (Pred 3:20). Tiu priskribo de homoj kaj bestoj, havantaj la saman spiriton kaj egale mortantaj, rememorigas al ni la rakonton pri tio, kiel homoj kaj bestoj, havantaj la saman spiriton, donitan de Dio (Gen 2:7; 7:15), pereis per la sama morto dum la diluvo: "Kaj pereis ĉiu karno, kiu moviĝas sur la tero, la birdoj kaj la brutoj kaj la bestoj, kaj ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero, kaj ĉiuj homoj. Ĉio, kio havis en si spiriton de vivo, el ĉio, kio estis sur la seka tero, mortis (Gen 7:21-23). Atentu pri tio, kiel estas komparata la morto kaj la diluvo en Ps 90:5 . La priskribo, donita en Gen 7, klare montras, ke la homo ĝenerale rilatas al la sama kategorio de "ĉiu karno... ĉiu ekzistaĵo", ĉar li havas la saman spiriton, kiel la bestoj.

## 4.4 MORTO ESTAS SENKONSCIA STATO

El tio, kion ni jam eksciis pri la animo kaj la spirito, oni povas konkludi, ke ĉiu mortinto estas plene en senkonscia stato. La Biblio diras, ke ĉiujn aferojn de respondeculoj antaŭ Dio, Li memoras (Mal 3:16; Ap 20:12; Heb 6:10), sed

en ĝi ne estas eĉ iu ajn aludo, ke mortintoj havas iun ajn konscion. Malfacile estas kontraŭdiri al la sekvantaj klaraj pruvoj rilate al tio:

> "Eliras lia spirito, li reiras en sian teron; kaj en tiu tago (momento) neniiĝas ĉiuj liaj intencoj" (Ps 146:4).
>
> "La mortintoj scias nenion... Kaj ilia amo, kaj ilia malamo, kaj ilia ĵaluzo jam de longe malaperis" (Pred 9:5,6). "... Ekzistas nek faro, nek kalkulo, nek scio, nek saĝo (kaj tial – ankaŭ konscio) en Ŝeol (tombo), kien vi iros (Pred 9:10).
>
> Ijob diras, ke post sia morto li "estus kiel ne estinta" (Ijob 10:19). Li opiniis la morton, kiel senkonscia stato kaj plena ĉeso de ekzisto, kiel tio estis antaŭ nia naskiĝo.
>
> Homoj mortas same kiel bestoj (Pred 3:19). Se homa konscio ie venkus morton, ankaŭ bestoj devus scipovi fari tion. Tamen, nek la Skribo, nek scienco mencias pri tio.
>
> Dio "scias nian esencon; Li memoras, ke ni estas polvo. La tagoj de homo estas kiel herbo; kiel floro de kampo, tiel li floras. Pasas super ĝi vento, kaj ĝi jam ne ekzistas; Kaj ĝia loko ĝin jam ne rekonas" (Ps 103:14-16).

Tion, ke morto estas vera senkonscia stato eĉ por piuloj, montras ripetataj preĝoj de servistoj de Dio, kiuj petis Dion daŭrigi iliajn vivojn; ili sciis, ke post morto ili jam ne povos glori kaj laŭdi Dion, ĉar morto estas senkonscia stato. Jeĥezkel (Jes 38:17-19) kaj David (Ps 6:4,5; 30:9; 115:117) estas bonaj ekzemploj pri tio. Morto plurfoje estas menciita kiel sonĝo aŭ ripozo egale por piuloj kaj ankaŭ por malpiuloj (Ijob 3:11,13,17; Dan 12:13). Havante sufiĉan kvanton da pruvoj, ni povas konkludi, ke la Biblio ne enhavas konfirmojn al popolaj asertoj, ke piuloj tuj post sia morto leviĝas al la ĉielo por ricevi tie rekompencojn kaj esti tie en beatstato. La vera doktrino pri morto kaj homa naturo donas al ni grandan senton de kontenteco. Post ĉiuj traŭmoj kaj suferoj de homa vivo la tombo estas loko de plena senkonscio. Por tiuj, kiuj ne sciis la edifojn kaj postulojn de Dio, tiu ĉi stato de senkonscio daŭros eterne. La vanaj esperoj kaj timoj de la natura menso fine kaj poreterne malaperos.

Per studado de la Biblio, oni povas trovi sistemon de vero; tamen bedaŭrinde, estas ankaŭ sistemo de eraro en religia pensado de homoj pro neatento al la Biblio. Senesperaj penoj de homo eviti sian finan mortan destinon venigis lin al kredo, ke homo havas senmortan elementon, ke en li estas loko, kien tiu elemento - "senmorta animo" - venos post lia morto. Tio kondukas al

la penso, ke devas esti iu diferenco inter la sortoj de la justuloj kaj la malpiuloj. Por tion ebligi, oni konkludis, ke devas esti loko, kien povas iri “bonaj senmortaj animoj”, nomita “ĉielo”, kaj alia loko, nomita “infero”, kien iros “malbonaj senmortaj animoj”. Tamen pli frue ni jam montris, ke laŭ la Biblio senmortaj animoj ne ekzistas. Estas ankaŭ aliaj disvastigitaj falsaj ideoj, kiujn ni ankaŭ konsideros:

1. Ke rekompenco pro nia vivo estos donita je morto, nome, ke nia senmorta animo post nia morto estos direktita en difinitan lokon.

2. Ke la malkunigo de piuloj kaj malpiuloj okazas je morto.

3. Ke la rekompenco por piuloj estos enlokigo en la ĉielo.

4. Ke se ĉiu havas senmortan animon, do ĉiu devas veni aŭ en la ĉielon, aŭ en inferon.

5. Ke la “animoj” de malpiuloj iros al loko de puno, nomita infero.

La celo de nia analizo ne estas nur negativa; per detala konsidero, ni kredas, ke ni malkovros multajn elementojn de Biblia vero, kiuj necesas por vere kompreni la homan naturon.

## 4.5 LA RELEVIĜO

La Biblio emfazas, ke la rekompenco por la justuloj estos la releviĝo ĉe la reveno de Kristo (1 Tes 4:16). La releviĝo de la respondeculoj (mortintoj en Kristo, vidu Parton 4.8) estos la unua ago, kiun faros Kristo, kaj poste sekvos la juĝo. Se la “animo” post la morto venus en la ĉielon, ne estus necese revivigi ĝin. Paŭlo diris, ke se ne estus la reviviĝo de la mortintoj, ĉiuj niaj penoj por esti obeemaj al Dio estus senutilaj (1 Kor 15:32). Certe, li ne dirus tion, se li kredus, ke lia “animo” iros al la ĉielo post lia morto. Sed li kredis, ke la rekompenco por homo post lia morto estos nur reviviĝo de lia korpo. Kristo kuraĝigis nin, dirinte, ke ni ricevos la rekompencon “en la releviĝo de la justuloj” (Lk 14:14).

Kaj ree ni devas rimarki, ke la Biblio instruas nin, ke ne ekzistas iu ajn formo de la vivo aparte de korpa formo, tio egale rilatas al Dio, Kristo, anĝeloj kaj homoj. Post kiam Kristo revenos, li “denove elformos la korpon de nia humiliĝo, por ke ĝi konformiĝu al la korpo de lia gloro” (Fil 3:21). Pro tio, ke li nun havas laŭlitere la korpan formon, movatan de la energio de la Spirito, ankaŭ ni havos similan formon. Dum la juĝo ni ricevos rekompencon laŭ niaj

faritaĵoj, faritaj dum nia korpa vivo (2 Kor 5:10). Tiuj, kiuj vivis por korpa vivo, tiuj restos en siaj nunaj mortemaj korpoj, kiuj poste forputros kaj refariĝos polvo; sed tiuj, kiuj dum sia vivo penis anstataûigi sian korpon "por la Spirito, el la Spirito tiu rikoltos eternan vivon" (Gal 6:8), en la formo de spiritplena korpo.

Estas multe da pruvoj, ke la rekompenco por la justuloj estos korpa formo. Akceptinte tion, iĝas komprenebla la vivgrava signifo de la releviĝo. Nia nuna korpo certe ĉesos ekzisti post morto; sed se ni povas havi eternan vivon kaj senmortecon en korpa formo, el tio sekvas, ke morto devas esti senkonscia stato ĝis tiu momento, kiam nia korpo reviviĝos kaj ricevos la Dian naturon. La tuta ĉapitro 1 Kor 15 detale rakontas pri la releviĝo, ĉiam necesas legi ĝin tre atente. La versoj 1 Kor 15:35-44 klarigas al ni, ke simile al semo, kiu estis semita kaj poste ĝi kreskas el la grundo kaj akceptas formon, donitan de Dio, same la mortintoj releviĝos kaj havos korpan formon. Kiel Kristo releviĝis el la tombo kaj lia mortema korpo iĝis senmorta, tiel same ricevos la rekompencon la veraj kredantoj (Fil 3:21). Pere de baptiĝo ni kuniĝos al la morto kaj releviĝo de Kristo, montrante nian fidon je tio, ke ankaû ni ricevos la rekompencon, kiun ricevis Kristo (Rom 6:3-5). Partopreninte liajn suferojn nun, ni ankaû partoprenos lian rekompencon: "Ĉiam portante (nun) en la korpo la mortiĝon de Jesuo, por ke la vivo ankaû de Jesuo elmontriĝu en nia korpo" (2 Kor 4:10). "Kaj se la Spirito de Tiu, kiu levis Jesuon el la mortintoj, loĝas en vi, tiam la Levinto de Kristo Jesuo el la mortintoj vivigos eĉ viajn mortajn korpojn per Sia Spirito, loĝanta en vi" (Rom 8:11). Kun tiu espero ni atendas "nian adopton, nome la elaĉeton de nia korpo" (Rom 8:23), senmortigon de ĝi.

Tiun ĉi esperon pri ricevo de korpa reviviĝo la Dia popolo komprenis ekde la plej fruaj tempoj. Al Abraham estis promesite, ke li persone heredos la landon Kanaan poreterne (Gen 13:17; vidu Parton 3.4). Lia certeco je tiuj promesoj naskis lian fidon, ke lia korpo iam en estonteco restariĝos kaj iĝos senmorta.

Ijob klare esprimis sian komprenon de tio, dirinte, ke malgraû tio, ke lian korpon formanĝos vermoj en tombo, li ricevos sian rekompencon en korpa formo: "Sed mi scias, ke mia Liberigonto vivas, kaj fine Li leviĝos super la polvo. Kaj post kiam mia haûto estos tiel detruita kaj mi estos senkorpa, mi vidos Dion; Lin vidos mi, kaj miaj okuloj vidos, ne fremdaj; pri tio sopiregas mia interno en mia brusto" (Ijob 19:25-27). Tiun saman esperon havis Jesaja: "Reviviĝos Viaj mortintoj, miaj kadavroj releviĝos" (Jes 26:19).

Similajn vortojn ni trovas en la priskribo de la morto de Lazaro, persona amiko de Jesuo. Anstataû konsoli la fratinojn de la mortinto, dirante al ili, ke lia animo foriris al la ĉielo, la Sinjoro Jesuo diris pri la tago de reviviĝo: "Via frato releviĝos". La fratino de Lazaro, Marta, rapide respondis al tio: "Mi scias, ke li releviĝos ĉe la releviĝo en la lasta tago" (Joh 11:23-24). Tiu rapida respondo

montras, kiel forte fruaj kristanoj kredis je sia releviĝo el la mortintoj. Kiel Ijob, tiel ankaŭ Marta komprenis, ke la morto ne malfermas pordon al la ĉielo por vivi tie en beateco, anstataŭ tio, ŝi pensis pri releviĝo "en lasta tago". La Sinjoro promesas: "Ĉiu do, kiu aŭdis de la Patro kaj lernis, venas al mi... Mi levos tiun en la lasta tago" (Joh 6:44, 45).

## 4.6 LA JUĜO

La doktrino de la Biblio pri la juĝo estas unu el la bazaj principoj de la fido kaj necesas klare kompreni ĝin antaŭ baptiĝo (Ag 24:25; Heb 6:2). La Skriboj ofte diras pri "la tago de juĝo", pri tiu tempo, kiam tiuj, kiuj sciis Dion, ricevos laŭ siaj faritaĵoj, ekzemple, 2 Pet 2:9; 3:7; 1 Joh 4:17; Judas 6. "Ni ĉiuj staros antaŭ la tribunala seĝo de Dio (Rom 14:10); "ĉar ni ĉiuj devos elmontriĝi antaŭ la tribunala seĝo de Kristo" (2 Kor 5:10), por ke ĉiu ricevu laŭ siaj faritaĵoj, kiujn li faris estante en korpa formo.

En sia sonĝo pri la dua alveno de Kristo la profeto Daniel vidis la tribunalan tronon (Dan 7:9-14). La paraboloj helpas al ni pli detale kompreni tion. La parabolo pri talantoj diras pri mastro, kiu reveninte hejmen, alvokis siajn servistojn kaj demandis ilin, kiel ili uzis talantojn, lasitajn al ili (Mt 25:14-29). La parabolo pri fiŝkaptistoj komparas la Evangelion kun fiŝreto, kolektanta homojn; post kaptado fiŝkaptistoj sidiĝas kaj apartigas bonajn fiŝojn de la malbonaj (Mt 13:47-49). La klarigo estas simpla: "en la fino de la mondaĝo la anĝeloj eliros kaj apartigos la malbonulojn el inter la justuloj"

El ĉio dirita pli supre oni povas konkludi, ke post la reveno de Kristo kaj releviĝo de la mortintoj tiuj, kiuj estis alvokitaj pere de la Evangelio, estos kolektitaj en certa loko, en certa tempo, kaj tie ilin renkontos Kristo. Ĉiu raportos al Kristo pri sia vivo, kaj Kristo mem decidos, kiu meritas la rekompencon esti en la Regno de Dio. Nur en tiu momento la justuloj ricevos sian rekompencon. La saman diras la parabolo pri ŝafoj kaj kaproj: "Sed kiam la Filo de homo venos en sia gloro, kaj ĉiuj anĝeloj kun li, tiam li sidos sur la trono de sia gloro (t. e. sur la trono de David en Jerusalem, Lk 1:32, 33), kaj antaŭ li kolektiĝos ĉiuj nacioj, kaj li apartigos ilin unu de alia, kiel paŝtisto apartigas la ŝafojn for de la kaproj; kaj li starigos la ŝafojn dekstre de li, kaj la kaprojn maldekstre. Tiam diros la Reĝo al tiuj, kiuj staras dekstre de li: Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de post la komenco de la mondo" (Mt 25:31-34).

La heredo de la Dia Regno, partopreno kune kun Abraham donitajn al li promesojn – tio estas la rekompenco por la justuloj. Sed tio okazos post la juĝo, post la reveno de Kristo. Tial ne estas eble ricevi la promesitan rekompencon antaŭ la reveno de Kristo. Ni devas konkludi, ke ekde la momento de la morto

ĝis la releviĝo, la justuloj tute ne havos konscian vivon, ĉar neeblas ekzisti iuforme sen korpo.

Plurfoje ripetata principo de la Biblio estas tio, ke kiam revenos Kristo, tiam estos donita la rekompenco, sed ne antaŭ tio:

- "Kiam elmontriĝos la Ĉefpaŝtisto, vi ricevos la nevelkontan kronon de gloro" (1 Pet 5:4; kmp 1:13).

- "Mi ordonas al vi antaŭ Dio, kaj antaŭ Kristo Jesuo, kiu juĝos la vivantojn kaj mortintojn, kaj pro lia apero kaj lia regno... De nun estas konservita por mi la krono de justeco, kiun la Sinjoro, la justa juĝisto, donos al mi _en tiu tago_" (2 Tim 4:1,8).

- Kiam revenos la Mesio en la lastaj tagoj, "multaj el tiuj, kiuj dormas en la tero (kmp. Gen 3:19) vekiĝos, unuj por vivo eterna, aliaj por eterna malhonoro kaj honto" (Dan 12:2).

- Kiam Kristo venos al juĝo, "la mortintoj aŭdos la voĉon de la Filo de Dio; kaj la aŭdintoj vivos... la farintoj de malbono, al releviĝo por juĝo" (Joh 5:25-29).

- "Jen mi (Jesuo) rapide venos; kaj mia rekompenco estas kun mi, por repagi al ĉiu laŭ lia faro" (Ap 22:12). Ni ne venos al la ĉielo por ricevi rekompencon – Kristo mem alportos rekompencon por ni el la ĉielo.

La vortoj pri tio, ke Jesuo kunportos al ni nian rekompencon, signifas, ke ĝi estas jam pretigita por ni en la ĉielo, sed estos alportita al ni surteren ĉe la dua reveno de Kristo. Nia "heredo" en la lando, promesita al Abraham, en tiu senco necesas kompreni kiel "rezervitan en la ĉielo por vi, kiuj estas gardataj de la potenco de Dio per fido al savo preta malkaŝiĝi en la lasta tempo" (1 Pet 1:4,5), kiam revenos Kristo.

La ĝusta kompreno de la dirita pli supre donas al ni eblecon klarigi veran sencon de la fragmento el Joh 14:2,3, kiu ofte estas erare komprenata: "Mi iras, por pretigi por vi lokon. Kaj se mi iros kaj pretigos por vi lokon, mi revenos kaj ricevos vin al mi mem, por ke vi ankaŭ estu tie, kie mi estas". En alia loko Jesuo diras, ke li revenos denove, por doni al ni rekompencon (Ap 22:12), kaj ni scias, ke tio okazos ĉe lia tribunala seĝo. Li reĝos eterne sur la trono de David en Jerusalemo (Lk 1:32, 33). Lia regno estos ĉi tie, sur la tero, kaj ankaŭ ni estos kun li en la Regno de Dio sur la tero. Lian promeson "ricevi vin por mi mem" ni devas kompreni, ke dum la juĝo li ricevos nin. La greka frazo "preni

iun al si" estas ankaû en Mt 1:20, koncerne al Jozefo: "ne timu *prenu al vi* vian edzinon Maria". Tio tute ne signifas fizikan movon al Jesuo.

Se la rekompenco estos donita nur dum la juĝo, kiam revenos Kristo, el tio sekvas, ke la justuloj kaj maljustuloj post sia morto iros en la saman lokon, t. e. en la tombon. Ne estas diferenco inter ili dum ilia morto, kaj la sekvaj citaĵoj konfirmas tion:

- Jonatan estis justulo, sed Saul estis maljustulo, tamen "eĉ ĉe sia morto ne disiĝis" (2 Sam 1:23).

- Abraham estis justulo, sed "li alkolektiĝis al sia popolo" (Gen 25:8; Jos 24:2).

- La saĝulon kaj malsaĝulon atingos tia sama sorto (Pred 2:15, 16).

Ĉio tio akre kontrastas al populara "kristanismo". Ilia opinio, ke la justuloj post sia morto tuj iros al la ĉielo, neniigas neceson de releviĝo kaj juĝo. Sed ni jam vidis, ke tiuj eventoj estas vivnecesaj en la plano de Dio pri nia savo. Laû la populara ideo, justulo post sia morto rekompence iras al la ĉielo, lin ĉiutage, ĉiumonate kaj ĉiujare sekvas la aliaj. Tamen tio kontrastas al la biblia doktrino, kiu diras, ke *ĉiuj* justuloj estos rekompencataj *kune* , en la sama tempo:

Ŝafoj estos apartigitaj de kaproj unu post la alia dum la juĝo. Post kiam ĉiuj estos juĝitaj, Kristo diros al *ĉiuj* ŝafoj, starantaj dekstre de li: "Venu, vi benataj de mia Patro, heredu la regnon preparitan por vi de la komenco de la mondo" (Mt 25:34). Sekve, ĉiuj ŝafoj heredos la Regnon de Dio en la sama tempo (kmp. 1 Kor 15:52).

Dum la "rikolto", kiam revenos Kristo kaj okazos la juĝo, ĉiuj tiuj, kiuj agis laû la Evangelio, "ĝojos kune" (Joh 4:35, 36; kmp. Mt 13:39).

En la verso Ap 11:18 "la tempo de la mortintoj, por esti juĝataj" estas la tempo, kiam Dio donos "la rekompencon al Viaj servistoj... al la sanktuloj, kaj al la timantoj de Via nomo" t. e. al ĉiuj kredantoj kune.

En la ĉapitro Heb 11 estas nomitaj multaj justuloj de la Malnova Testamento. Verso 13 de tiu ĉi ĉapitro diras, ke "ĉiuj tiuj mortis en fido, ne ricevinte la promesojn", donitajn al Abraham pri la savo pere de eniro en la Regnon de Dio (Heb 11:8-12). El tio sekvas, ke post sia morto homoj ne iras unu post la alia al la ĉielo por ricevi laû iliaj faritaĵoj. La kialo de tio estas

priskribita en la versoj 39, 40: Ili “ne ricevis la promeson, ĉar Dio antaŭvidis por ni ion pli bonan, por ke ili sen ni ne estu perfektigitaj”. La plano de Dio antaŭvidas, ke la justuloj ”estu perfektigitaj” ĉiuj kune en la sama tempo. Tio estos anoncita al ili dum la juĝo ĉe la reveno de Kristo.

### 4.7 LA LOKO DE REKOMPENCO: ĈIELO AŬ TERO?

Krom la pli supre diritaj argumentoj, por tiuj, kiuj ĉiam ankoraŭ opinias, ke la Regno de Dio, t. e. la loko de la rekompenco, estas en la ĉielo, ne sur la tero, ni aldonas sekvajn citaĵojn:

- Per la preĝo de la Sinjoro “Patro nia” la kredantoj petas Dion pri alveno de la Regno de Dio (t. e. ili preĝas pri la alveno de Kristo), kiam Dio efektivigos Siajn dezirojn sur la tero, same kiel ili estas efektivigitaj nun en la ĉielo (Mt 6:10). Alivorte, ni preĝas, ke la Regno de Dio venu al la tero. Tre bedaŭinde estas, ke miloj da homoj sensence prononcas la vortojn de tiu ĉi preĝo, estante tute certaj, ke la Regno de Dio estas jam establigita en la ĉielo, kaj ke la tero estos detruita.

- “Feliĉaj estas la humilaj, ĉar ili heredos la teron” (Mt 5:5) - ne estas dirite ĉi tie, ke iliaj animoj iros al la ĉielo. La saman diras la psalmo 37, klarigante, ke la fina rekompenco por justuloj okazos sur la tero. Sur la sama tero, kie maljustuloj havis sian portempan superecon, la justuloj estos rekompencitaj per eterna vivo kaj eterne ili posedos la saman teron, sur kiu regis la malpiuloj. (Ps 37:34, 35). “Kaj la humiluloj heredos la teron... Liaj benitoj heredos la teron... La virtuloj heredos la teron kaj loĝos sur ĝi eterne” (Ps 37:11, 22, 29). Loĝi sur la tero (la promesita lando) eterne, signifas neeblecon loĝi eterne en la ĉielo.

- David “mortis kaj estis enterigita... David ne supreniris en la ĉielon” (Ag 2:29, 34). Ankaŭ Petro klarigas, ke la espero estas la releviĝo post la morto, ĉe la reveno de Kristo (Ag 2:22-36).

- Tero estas la areno de la Diaj agoj pri homaro: “La ĉielo estas ĉielo de la Eternulo, sed la teron Li donis al la homidoj” (Ps 115:16).

- En la verso Ap 5:10 estas skribite, kion diros la justuloj ĉe la tribunala seĝo dum la juĝo: “(Kristo) faris ilin al nia Dio regno kaj pastroj; kaj ili reĝas sur la tero”. Tiu ĉi mencio pri regado en la Regno de Dio sur la tero, kontrastas al la malklara ideo, ke ni ĝojos “beaton” ie en la ĉielo.

- La profetaĵoj de Daniel en la ĉapitroj 2 kaj 7 priskribas sukceson de politikaj povoj, kiuj finrezulte estos anstataŭigitaj per la Regno de Dio, kiam revenos Kristo. La Regno estos "sub la tuta ĉielo" kaj plenigos "la tutan teron" (Dan 7:27; 2:35, kmp. v. 44). Tiu Regno "sub la tuta ĉielo estos donita al la sankta popolo de la Plejaltulo" (Dan 7:27); ilia rekompenco, sekve, estos la eterna vivo en la Regno sur la tero <u>*sub*</u> la tuta ĉielo.

## 4.8 RESPONDECO ANTAŬ DIO

Se homo havas de la naturo "senmortan animon", li devas havi ie lokon por sia eterna ekzisto. Tiun lokon li ricevas aŭ kiel rekompencon, aŭ kiel punon. Tio signifas, ke ĉiu homo estas respondeca antaŭ Dio. Sed ni montris, ke laŭ la Biblio, homo similas al besto, sen ia ajn heredata senmorteco. Sed kelkaj homoj ricevis la promeson pri eterna vivo en la Regno de Dio. Tio signifas, ke ne ĉiu homo, kiu iam vivis, releviĝos. Simile al la bestoj, homo vivas kaj mortas kaj iĝas polvo. Pro tio, ke estos tago de juĝo, dum kiu iuj homoj estos kondamnitaj kaj aliaj rekompencitaj per eterna vivo, ni povas konkludi, ke estos certa kategorio de homoj, kiuj estos relevitaj por ke ili estu juĝataj kaj rekompencitaj. Ĉu releviĝos aŭ ne iu persono - dependas de tio, ĉu li estas respondeca antaŭ la juĝo aŭ ne. La ĉefa kriterio de la juĝo estos nia rilato al la Dia vorto. Kristo klarigis: "Tiu, kiu forrifuzas min kaj ne akceptas miajn dirojn, havas juĝonton; la vorto, kiun mi parolis, juĝos lin en la lasta tago" (Joh 12:48). Tiuj, kiuj ne sciis aŭ ne komprenis la vorton de Kristo kaj, sekve, ne havis eblecon akcepti aŭ rifuzi ĝin, tiuj ne estos respondecaj antaŭ la juĝo... "ĉar ĉiu, kiu pekis sen leĝo, ankaŭ pereos sen leĝo; kaj ĉiu, kiu pekis sub leĝo, estos juĝata per leĝo" (Rom 2:12). Tiuj, kiuj ne sciis la postulojn de Dio, pereos kiel la bestoj, sed tiuj, kiuj sciis la leĝon de Dio kaj ne obeis al ĝi, tiuj estos juĝataj, kaj, sekve, releviĝos por stari antaŭ la juĝo.

Laŭ Dio "peko ne estas alkalkulata, kiam ne ekzistas leĝo...Ĉiu, kiu faras pekon, faras ion kontraŭ la leĝo... Ĉar per la leĝo venas konscio pri peko" (Rom 5:13; 1Joh 3:4; Rom 3:20). Laŭ Lia Vorto, sen scio de la leĝo de Dio "peko ne estas alkalkulata" al homo, kaj pro tio tiaj pekuloj ne estos juĝataj kaj relevigataj. Sekve, tiuj, kiuj ne scias la Vorton de Dio, restos mortintaj, same kiel okazas al bestoj kaj kreskaĵoj, ĉar ĉiuj ili estas en la sama stato. "Homo, kiu estas en honoro, sed ne havas prudenton, estas egala al bruto buĉota" (Ps 49:20). "Kiel ŝafoj ili estos metataj en Ŝeolon" (Ps 49:14).

La scio de vojoj de Dio, devigas nin esti respondecaj antaŭ Li pro niaj agoj kaj, sekve, estas bezonata por nia releviĝo kaj apero antaŭ la tribunala seĝo. Necesas kompreni, ke releviĝos ne nur justuloj, aŭ baptitaj, sed releviĝos

ĉiuj, kiuj estas respondecaj antaŭ Li pro sia scio pri Li. La Skribo ofte ripetas tion:

- Joh 15:22 montras, ke respondeco sekvas scion de la Vorto: "Se mi ne estus veninta kaj parolinta al ili, ili ne havus pekon; sed nun ili ne havas pretekston por sia peko". Ankaŭ Rom 1:20-21 diras, ke "tial al ili mankas defenda pledo", ke sciante pri Dio, ili pekis.

- "Ĉiu, kiu aŭdis de la Patro kaj lernis... Mi (Kristo) levos tiun en la lasta tago" (Joh 6:44, 45).

- Dio "preterrigardas" agojn de tiuj, kiuj tute ne scias Liajn vortojn. Sed Li atentas pri tiuj, kiuj scias Liajn vortojn kaj atendas de ili respondon (Ag 17:30).

- "Kaj tiuj servistoj, kiuj sciis la volon de sia sinjoro, kaj nenion pretigis, nek faris laŭ lia volo, suferos multajn batojn; sed tiu, kiu ne sciis, kaj laŭ siaj agoj meritis batojn, suferos malmultajn batojn (ekzemple, restante mortinta). Kaj al kiu multo estas donita, el tiu estos multo postulata; kaj al kiu oni multon komisiis, el tiu oni des pli multon postulos" (Lk 12:47, 48), - kiomgrade pli multon, ho Eternulo?

- "Kiu do scias bonfari, kaj ne bonfaras, ĉe tiu estas peko" (Jak 4:17).

- Precipa respondeco de la Izraelidoj antaŭ Dio estas pro Lia elmontriĝo de Si Mem antaŭ ili (Am 3,2).

- Laŭ tiu ĉi doktrino pri respondeco "estus por ili (kiu pli poste returnis sin de Dio) pli bone ne ekkoni la vojon de justeco, ol, ekkoninte ĝin, returni sin for de la sankta ordono al ili transdonita" (2 Pet 2:21). Aliajn eldiraĵojn pri tiu ĉi temo vi trovos en Joh 9:41; 3:19; 1 Tim 1:13; Hoŝ 4:14; Read 1:39.

La scio pri Dio devigas nin esti respondecaj antaŭ la tribunala seĝo kaj sekve, tiuj, kiuj ne havis tiun scion, ne releviĝos, ĉar ne necesas juĝi ilin, kaj foresto de scio pri Dio faras ilin "egala al bruto buĉota" (Ps 49:20). Estas aliaj gravaj konfirmoj al tio, ke ne ĉiuj, kiuj vivis iam, releviĝos:

- La popolo de la antikva Babel "ne vekiĝos" post sia morto, ĉar ili ne sciis pri la vorto de Dio (Jer 51:39; Jes 43:17).

- Jesaja kuraĝigis sin mem: “Ho Eternulo, nia (de Izraelidoj) Dio! Regis super ni sinjoroj krom Vi (filistoj kaj babelanoj), sed nur per Vi ni gloras Vian nomon. Ili mortis kaj ne reviviĝos, ili estas malvivuloj kaj ne releviĝos; ĉar Vi ilin punis kaj ekstremis, kaj Vi malaperigis ĉiun memoron pri ili” (Jes 26:13, 14). Atentu pri trifoja ripeto, ke ili ne reviviĝos: “ ne reviviĝos... ne releviĝos... malaperigis ĉiun memoron pri ili”. Kontraŭe al tio, antaŭ la Izraelidoj estis ebleco de releviĝo, ĉar ili sciis la Veron de Dio: “Reviviĝos Viaj mortintoj (izraelidoj), miaj kadavroj releviĝos” (Jes 26:19).

- Pri la popolo de Dio, la Izraelidoj, al ni estas dirite, ke post la reveno de Kristo “Multaj el tiuj, kiuj dormas en la tero, vekiĝos, unuj por vivo eterna, aliaj por eterna malhonoro kaj honto” (Dan 12:2). Do, “multaj”, sed ne ĉiuj hebreoj reviviĝos, nur la respondecaj al Dio, kiel elektita popolo. Tiuj el ili, kiuj tute ne scias la Veron de Dio, “falos, kaj ne plu releviĝos”, ĉar ili ne havos eblecon trovi “la vortojn de la Eternulo” (Am 8:12, 14).

**Ni eksciis, ke:**

1. Scion de la Vorto de Dio sekvas respondeco antaŭ Li.

2. Nur la respondeculoj releviĝos kaj estos juĝataj.

3. Tiuj, kiuj ne scias la veran Dion, restos mortintaj, same kiel la bestoj.

Tiuj ĉi konkludoj faras fortan baton al homa fiereco, kaj al tio, je kio ni kutimis kredi. Milionoj da homoj, vivantaj nun kaj ankaŭ vivintaj iam ajn pli frue, ne sciante la veran Evangelion, mensmalsanuloj ne kapablaj kompreni la mesaĝon de la Biblio, beboj kaj infanoj, mortintaj antaŭ ol iĝis plenkreskuloj kapablaj kompreni la Evangelion – ĉiuj tiuj kategorioj de homoj ne estas respondecaj antaŭ Dio. Tio signifas, ke ili ne reviviĝos, malgraŭ spirita stato de iliaj gepatroj. Tio tute kontraŭas al la idealoj de humanismo kaj al ĉiuj niaj naturaj deziroj kaj sentoj. Tamen vera humileco antaŭ la vero de la Dia Vorto kaj modesta opinio pri nia propra naturo kondukos nin al akcepto de la Vero. Objektiva ekzameno de tiuj faktoj de homa vivsperto, eĉ sen helpo de la Evangelio, ankaŭ kondukos nin al la konkludo, ke ne eblas la espero pri la eterna vivo por pli supre menciitaj kategorioj de homoj.

Niaj demandoj pri la vojoj de Dio estas malkonvenaj: “Ho viro, kiu vi estas, ke vi respondas kontraŭ Dio?” (Rom 9:20). Ni povas konfesi nian eraran

komprenon, sed neniam ni akuzu Dion pri maljusteco kaj malpraveco. La supozo, ke Dio povas esti neamanta aŭ eraranta rilate al ni, kondukas al terura konkludo, ke ĉiopova Dio, la Patro kaj Kreinto rilatas al Sia kreitaĵo maljuste kaj malprudente. Rilate al tio estas utile relegi la versojn 2 Sam 12:15-24, kiuj diras pri la morto de filo de David, pri tio, ke David multe preĝis pro sia bebo dum ĝi estis viva, kaj ke samtempe li reale perceptis ĝian neeviteblan morton: "Dum la infano ankoraŭ vivis, mi fastis kaj ploris, ĉar mi pensis: Kiu scias? Eble la Eternulo indulgos min kaj la infano vivos. Sed nun ĝi mortis; por kio do mi fastos? Ĉu mi povas ankoraŭ revenigi ĝin?.. ĝi ne revenos al mi". David poste konsolis sian edzinon kaj ili ekhavis alian bebon baldaŭ kiel estis eble.

Fine necesas diri, ke multaj homoj, kompreninte tiun ĉi principon de la respondeco antaŭ Dio, perdas deziron scii pli multe pri Li, timante respondecon antaŭ Li kaj antaŭ la tribunala seĝo. Tamen tiuj homoj iugrade jam iĝis respondecaj antaŭ Dio, ĉar ilia scio de la Vorto de Dio donis al ili komprenon, ke Dio partoprenas ilian vivon kaj proponas al ili realajn parencajn rilatojn kun Li. Necesas ĉiam memori, ke "Dio estas amo", Li, volante, ne ke iuj pereu... Li donis Sian solenaskitan filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon (1 Joh 4:8; 2 Pet 3:9; Joh 3:16). Dio volas, ke ni estu en Lia Regno.

Tiun honoron kaj privilegion neeviteble sekvas respondeco. Sed ĝi ne estas tro malfacila aŭ peza por ni; se ni vere amas Dion, ni komprenos, ke Lia propono pri la savo ne estas aŭtomatika rekompenco pro iuj faroj, sed ama volo de Dio agi por Siaj infanoj, por doni eternan feliĉan vivon al ĉiuj, kiuj komprenas Lian mirindan karakteron. Dum ni komencas aŭdi kaj ŝati la alvokon de Dio al ni pere de Lia Vorto, ni komprenas, ke eĉ kiam ni estas en homamaso, Dio atentas nin, atendante de ni signojn de nia respondo al Lia amo. Neniam tiuj ĉi atentaj okuloj malatentos nin; neniam ni povos forgesi aŭ forviŝi niajn sciojn pri Li por favori nian karnon, ke ĝi estu libera de respondeco antaŭ Dio. Anstataŭ tio ni povas kaj devas ĝoji pri favora intimeco al Dio kaj tiel fidi je Lia amo, ke ĉiam devas havi deziron scii pri Li pli multe. Nia amo al la Diaj vojoj kaj nia deziro scii ilin por ke ni povu esti pli similaj al Li, devas superi nian naturan timon antaŭ la grandeco de Lia sankteco.

## 4.9 INFERO

Ekzistas populara koncepto, ke infero estas loko de punado de pekemaj "senmortaj animoj" senprokraste post la morto, aŭ la loko de turmento por tiuj, kiuj estos malakceptitaj dum la juĝo. Laŭ nia konvinko, la Biblio instruas nin, ke infero estas la tombo, kien iras ĉiuj homoj post morto. La hebrea vorto "ŝeol" signifas "kaŝita, kovrita loko". Sekve, kiam ni legas la vorton "infero", ni legas ne ĝuste tradukitan vorton. Laŭ la Biblio tiu "kovrita loko" aŭ "infero"

estas la tombo. Estas multe da ekzemploj, ke la originala vorto "ŝeol" estas tradukita kiel "tombo". Fakte, multaj nuntempaj versioj de la Biblio malofte uzas la vorton "infero", tradukante ĝin per pli ĝusta vorto "tombo".

Kelkaj ekzemploj, montrantaj, ke la vorto "ŝeol" estas tradukita kiel "tombo", devas refuti la popularan koncepton pri infero kiel loko, kie en fajro turmentiĝas pekuloj:

> "Hontigitaj estu la malpiuloj, ili silentiĝu por Ŝeol" (Ps 31:17).
>
> "Sed Dio liberigos mian animon el la mano de Ŝeol" (Ps 49:15) - animo aû korpo de David releviĝos el la tombo, t. e. el infero.

Kredo je tio, ke infero estas loko por pekuloj, de kie ili ne povas eliri, ne konvenas al tiu ĉi verso; justuloj povas eniri tien kaj eliri reen. Hos 13:14 konfirmas tion: "El Ŝeol Mi savos ilin, de la morto Mi liberigos ilin". La saman aludas 1 Kor 15:55 rilate al la releviĝo kaj reveno de Kristo. Simile al tio diras Ap 20:13: "kaj la morto kaj Hades liveris la mortintojn, kiuj estis en ili". Atentu la identecon inter la morto, t. e. la tombo, kaj infero (vidu ankaû Ps 6:5). La vortoj de Hanna en 1 Sam 2:6 estas tre klaraj: "La Eternulo mortigas kaj vivigas, malsuprigas en Ŝeolon kaj suprigas".

Sciante, ke "infero" estas la tombo, oni povas opinii, ke justuloj estos savitaj de ĝi por eterna vivo pere de releviĝo. Sekve, tute eblas eniri en "inferon" aû la tombon kaj poste eliri el ĝi pere de releviĝo. La superan ekzemplon pri tio montris al ni Jesuo, "ke li ne estos lasita al Ŝeol, kaj lia karno ne forputros" (Ag 2:31), ĉar li releviĝos. Tio, ke lia karno *ne estos lasita* en infero, pruvas, ke ĝi estis tie dum iom da tempo. Kaj tio, ke Kristo estis en "infero" pruvas, ke en tiun lokon iras ne nur pekuloj. La justuloj kaj ankaû maljustuloj iras en "inferon", t. e. en tombon; tiel al Jesuo "inter malbonaguloj oni donis al li tombon" (Jes 53:9). Kaj estas aliaj ekzemploj, ke ankaû justuloj iras en inferon, t. e. tombon. En Gen 37:35 Jakobo diras: "En funebro mi iros en Ŝeolon al mia filo".

Unu el la ĉefaj postuloj de Dio estas "la salajro de peko estas morto" (Rom 6:23; 8:13; Jak 1:15). Pli supre ni montris, ke la morto estas tute senkonscia stato. Ĝin sekvas tuta pereo, sed ne eterna turmentado (Mt 21:41; 22:7; Mk 12:9; Jak 4:12) – ekzemple, kiel pereo de homoj pro la tutmonda diluvo (Lk 17:27, 29), aû kiel la Izraelidoj pereadis en la dezerto (1 Kor 10:10). Ambaû tiuj ekzemploj montras, ke la pekuloj mortis, sed ne estis metitaj al eterna turmentado. Sekve, tute ne eblas, ke la pekuloj estu eterne turmentataj kaj suferantaj, estante en senkonscia stato.

Ni ankaû montris, ke Dio ne akuzas nin pri peko, kaj ne alkalkulas pekon al ni, se ni ne scias Lian vorton (Rom 5:13). Tiuj, kiuj ne scias Lian vorton,

restos mortintaj. Sed tiuj, kiuj sciis la postulojn de Dio, estos revivigitaj kaj juĝataj ĉe la reveno de Kristo. La maljustuloj ricevos la punon, t. e. la morton, ĉar la puno pro peko estas morto. Do, ili mortos denove kaj poreterne. Tio estos "la dua morto", pri kiu diras Ap 2:11; 20:6. "La dua morto", t. e. la stato de absoluta senkonscio, por ili daûros eterne.

La puno pro peko en tiu ĉi senco estos "eterna", t. e. la morto ne havos finon. Esti mortinta poreterne, estas eterna puno. Ekzemplon de uzo de tiu esprimo ni trovas en Read 11:4, kiu priskribas la pereigon de armeoj de Faraono en la Ruĝa Maro, por ke tiuj armeoj neniam plu ĝenu Izraelon: "Li superverŝis per la akvo de la Ruĝa Maro... kaj la Eternulo pereigis ilin ĝis la nuna tago".

Eĉ en frua tempo de la Malnova Testamento la kredantoj komprenis, ke en la lasta tago okazos releviĝo, post kiu respondecaj maljustuloj revenos al la tombo. Ijob 21:30,32 tre klare diras: "La malpiulo... estas metata flanken... Kaj li estas akompanata (poste) al la tomboj".

Kristanoj-apostatoj ofte asocias "inferon" kun fajro kaj turmentoj. Tio akre kontraûas al la instruo de la Biblio pri infero (tombo). "Kiel ŝafoj ili estos metataj en Ŝeolon; La morto ilin paŝtos" (Ps 49:14) – tio signifas, ke la tombo estas loko por paca forgeso. Malgraû tio, ke la animo aû korpo de Kristo estis en infero (tombo) dum tri tagoj, ĝin ne tuŝis la putro (Ag 2:31). Sed putro kaj fajro estas nekunigeblaj. Jeĥ 32:26-30 montras, ke potencaj batalantoj de la diversaj popoloj pace kuŝas en siaj tomboj. "Ĉiuj ili estas mortigitaj de glavo... kaj iris en Ŝeolon kun siaj bataliloj kaj metis siajn glavojn sub siajn kapojn... kaj kuŝos... kun tiuj, kiuj iris en la tombon". Tio rilatas al la kutimo entombigi mortintajn batalantojn kun iliaj armiloj, metante batalilojn sub iliajn kapojn. Tiu ĉi priskribo de "infero" montras, ke infero estas la tombo. Tiuj potencaj batalantoj pace kuŝas tie en siaj tomboj ĝis nun, kio tute kontraûas al la ideo, ke la infero estas loko de fajro. Kaj tio, ke palpeblaj aĵoj, kiel glavo, iras kun homoj en la saman inferon (tombon), montras, ke infero ne estas loko por spirita turmento.

La rakonto pri Jona ankaû kontraûas al la ideo, ke infero estas fajra loko aû loko de spiritaj turmentoj. Forglutita de marmonstro, "Jona ekpreĝis al la Eternulo, sia Dio, el la interno de la fiŝo... El la ventro de Ŝeol mi kriis" (Jona 2:1,2). Tie ĉi la ventro de Ŝeol estis la ventro de baleno, fakte ĝi estis "kaŝita loko", infero, ŝeol por Jona. Tute klaras, ke ne estis tie fajro, kaj pro tio la animo de Jona estis elirinta el "la ventro de infero", kiam la baleno elvomis lin (Jona 2:7). Tio ankaû estas antaûdiro pri la releviĝo de Kristo el infero (la tombo) - vidu Mt 12:40.

## Metafora Fajro

Tamen la Biblio ofte uzas figuran esprimon pri eterna fajro por reprezenti la koleron de Dio pro peko, kiu kondukos al la tuta neniigo de pekuloj en la tombo. Per eterna fajro estis punita la urbo Sodom (Judas 7); en kiu ĉiuj loĝantoj estis neniigitaj pro pekoj. Nune de ĝi restas nur la ruinoj, kuŝantaj sub la akvo de la Morta Maro, sed ne en fajro, se kompreni "eternan fajron" laŭlitere. La sama puno minacis ankaŭ Jerusalemon pro pekoj de la Izraelidoj: "Mi ekbruligos en ĝiaj pordegoj fajron, kiu ekstermos la palacojn de Jerusalem kaj ne estingiĝos" (Jer 17:27). Sed pri Jerusalemo estas dirite kiel pri la ĉefurbo de la estonta Regno (Jes 2:2-4; Ps 48:2,3), do ni ne devas kompreni "eternan fajron" laŭlitere. La grandaj domoj de Jerusalemo estis forbruligitaj per la fajro (2 Reĝ 25:9), sed tiu fajro ne daŭris eterne.

Simile al tio, Dio punis per fajro la landon de Edom, kiu "Nek tage, nek nokte ĝi estingiĝos, eterne leviĝados ĝia fumo; de generacio al generacio ĝi restos dezerta... kaj gufo kaj korvo loĝos sur ĝi... Kaj en ĝiaj palacoj kreskos dornoj kaj urtikoj (Jes 34:9-15). Pro tio, ke iuj plantoj kaj bestoj povis ekzisti en la detruita lando de Edom, necesas kompreni, ke la vortoj pri "eterna fajro" pli rilatas al la detruo de la loko kaj al la kolero de Dio, ol al laŭlitera fajro.

La hebrea kaj greka frazoj, kiuj estas tradukitaj kiel "por eterne", signifas iun certan periodon, ekzemple – cent jaroj. Iufoje tiel difiniĝas tempo de ekzisto de iu ajn regno. 2 Sam 7:13 ilustras tion: "Mi fortikigos la tronon de lia regno por eterne". Ĝuste tiel oni povas kompreni la vortojn "eterna fajro". Plurfoje kolero de Dio pro la pekoj de Jerusalemo kaj Izraelo estas komparata kun fajro: "Jen Mia kolero kaj indigno elverŝiĝos... ĝi ekflamos kaj ne estingiĝos" (Jer 7:20 kaj aliaj similaj en Plorkanto 4:11 kaj 2 Reĝ 22:17).

Fajro ankaŭ asociiĝas kun la malaprobo de Dio pekon, precipe ĉe la reveno de Kristo: "Ĉar jen venos tago, ardanta kiel forno; tiam ĉiuj malhumiluloj kaj malbonaguloj estos kiel pajlo, kaj la venonta tago bruligos ilin" (Mal 4:1). Kiam pajlo kaj eĉ homa korpo estas forbruligita, ĝi iĝas polvo. Tute ne eblas, ke iu substanco kaj precipe homa karno brulus eterne. Fajro ne povas daŭri eterne, se ne estas io por bruli. Sekve, la vortoj "eterna fajro" ne povas signifi laŭlitere eternan turmenton. Necesas rimarki, ke "Hades" estis "ĵetita en la fajran lagon" (Ap 20:14). Tio signifas, ke "Hades" kaj "la fajra lago" ne estas la sama. Tiel tie ĉi estas dirite pri tuta neniigo. La libro Apokalipso en simbola formo diras al ni, ke la morto estos plene neniigita, ĉar en la fino de miljara regado de Kristo la morto plu ne ekzistos.

### Gehena

En la Nova Testamento estas du vortoj, tradukitaj kiel “infero”: hades kaj Gehena. “Hades” ekvivalentas la hebrean vorton “ŝeol”, pri kiu ni jam menciis pli frue. “Gehena” estas la nomo de la rubejo apud Jerusalemo, kie estis forbruligataj diversaj forĵetaĵoj. Similaj lokoj ĉirkaŭas grandajn urbojn ankaŭ nuntempe. La vorto mem “Gehena” estas la aramea, ŝanĝita de “Ge-ben-Hinnon” – la loko apud Jerusalemo, kie en la tempo de Kristo estis urba rubejo kaj kie estis forbruligataj rubaĵoj kaj ankaŭ kadavroj de mortigitaj krimuloj. La fajro brulis tie ĉiame, kaj la loko tiu iĝis simbolo de absoluta neniigo kaj damno.

Kaj denove indas rimarki, ke ĉio ĵetita en la fajron ne bruladis eterne, sed forbrulante, aĵoj kaj ankaŭ korpoj iĝis polvo. “Nia Dio estas fajro konsumanta” (Heb 12:29) en la tago de juĝo; la fajro de Lia kolero pro pekoj konsumos ĉiujn pekulojn, forbruligos, neniigos ilin, farante ilin la polvo, sed ne lasos ilin vivi en eterna fajro. En la tempo de antaŭaj juĝoj, kiam Li kondamnis la popolon de Izraelo por Babelona mallibero, Gehena jam estis plenigata de korpoj de pekuloj (Jer 7:32, 33).

Ĉiujn eldirojn de la Malnova Testamento pri tiu loko la Sinjoro Jesuo saĝe unuigis en la vorto “gehena”.

Li ofte diris, ke kondamnitaj de li en la juĝa tago ĉe lia reveno, venos al “Gehenan, en la neestingeblan fajron, kie ilia vermo ne pereas kaj la fajro ne estingiĝas” (Mk 9:43, 44). La vorto “gehena” devis elvoki ĉe la aŭskultantaj hebreoj pensojn pri malakcepto kaj la neniigo de korpoj de pekuloj. Kaj ni vidas, ke la eterna fajro estas idiomo, signifanta la koleron de Dio pro pekoj, kaj neniigon de pekuloj.

La vortoj “ilia vermo ne pereas” evidente estas parto de tiu idiomo pri plena neniigo, ĉar ne eblas imagi vermojn, kiuj neniam pereos.

**KOMENTO 11: Purigejo**

La Roma katolikismo instruas, ke la animoj de la popolo de Dio povos veni post morto al “purigejo”, kiu troviĝas ie en la mezo inter “ĉielo” kaj “infero”. Ĝi asertas, ke tiu loko servas por purigi animojn, kie ili suferos dum kelka tempo antaŭ ol iĝi indaj por esti savitaj en la “ĉielo”. La tempon de estado en “purigejo” eblas plimallongigi, se amikoj de iu mortinta persono preĝos pri li, bruligos kandelojn kaj oferos monon al preĝejoj. La sekvaj ekzemploj montras, ke tiaj asertoj estas eraraj:

- La Biblio nenion diras pri ekzisto de tiu loko.

- Ni jam diris, ke la animo apartenas al nia korpo kaj ĝi ne estas ia parteto ene en ni, kaj ke la “infero” estas la tombo, sed ne loko por punado.

- Al justuloj ne estis donitaj promesoj pri savo en la ĉielo. La savo estos donita ĉe juĝa loko nur post kiam Kristo revenos, sed ne post iom da tempo post morto, kiam la animoj lasas "purigejon" (Mt 25:31-34; Ap 22:12).

- Ĉiuj justuloj ricevos rekompencon en la sama tempo, sed ne ĉiu persono aparte.

- Morto estas senkonscia stato, sed ne aktiveco, kiun sugestas la doktrino pri purigo.

- Ni estas purigataj de niaj pekoj per baptiĝo en Kristo kaj fortikigo de nia kredo je lia ago dum nia nuna vivo, ne post iu periodo de suferoj post morto. Al ni estas dirite "Forpurigu la malnovan fermentaĵon" de peko dum niaj vivoj (1 Kor 5:7); purigu nian konsciencon de pekaj faroj niaj (Heb 9:14; 2 Tim 2:21). La tempo por nia purigo estas nun, dum nia vivo, ne post nia morto en iu "purigejo", ĉar "jen nun la tempo de favoro; jen nun la tago de savo" (2 Kor 6:2). Nia obeado al Dio per baptiĝo kaj kresko de spirita karaktero en ĉi tiu vivo kondukas nin al nia savo (Gal 6:8), ne al periodo de suferado en iu "purigejo".

- La penoj de aliaj homoj por savi nin per monofero al preĝejoj kaj ekbruligado de kandeloj ne validos por nia savo. "Fraton tute ne liberigos homo, Nek donos al Dio elaĉeton por li... ke li restu viva eterne" (Ps 49: 6-9).

**KOMENTO 12: Fantomoj Kaj Metempsikozo**

De pratempo la homaro penas konvinki sin, ke morto ne estas la fino de ekzisto, ke post la morto homo vivos en formo de alia persono aŭ besto, kiu posedos lian spiriton. Tia kredo estas unu el la plej fruaj.

Ni jam montris, ke la spirito de homo rilatas al la spirado, viveca forto ene en li, kaj ke la spirito revenas al Dio post kiam homo mortas (Pred 12:7). Tio signifas, ke lia spirito ne ĉirkaŭvagadas kiel "fantomo", kaj ke ĝi ne estas libera posedi alian homon aŭ beston por ke la personeco de homo daŭrigu sian ekziston en li (aŭ en ĝi). Ĉiu el ni estos juĝata laŭ siaj faroj (2 Kor 5:10). Sed se niaj faroj kaj pensoj estas rezulto de agoj kaj pensoj de antaŭvivinta homo, la koncepto, ke Dio juĝas kaj rekompencas nin laŭ niaj faroj (Ap 22:12), perdas sian sencon.

Post nia morto la spirito revenas al Dio kaj nia konscio tute ĉesas. Pro tio ĉiuj provoj kontakti la mortintojn atestas pri grava miskompreno de la Biblia instruo koncerne tion (Jes 8:19,20). La Biblio klare diras, ke mortintaj homoj ne revenas iumaniere al siaj urboj kaj domoj. Kaj tio signifas, ke ĉiuj "spiritoj" kaj "fantomoj" estas nur produkto de homa imago. Ne eblas diri pri tio pli bone, ol diris Ijob: "Li tamen pereos por ĉiam, kiel lia sterko; Tiuj, kiuj lin vidis, diros: Kie li estas?.. Kaj oni lin ne trovos... Okulo, kiu rigardis lin, ne plu vidos lin. Lia loko lin ne plu vidos" (Ijob 20:7-9). Similaj estas ankaŭ la versoj Ijob 7:9-10: "Tiel ne plu revenas tiu, kiu iris en Ŝeolon; Li ne plu revenas en sian domon; lia loko ne plu rekonos lin". Humila agnosko de tiuj eldiroj kondukos nin al la konkludo, ke ĉiuj rakontoj pri apero de "fantomoj", "spiritoj" de mortintaj homoj, en siaj domoj, estas nur produkto de homa imago.

**KOMENTO 13: Naturo De Nia Resurekto**

Ni montris, ke eterna vivo kaj transiro al la naturo de Dio estos donita al la justuloj post la juĝo. Unuavice Kristo revivigos tiujn, kiuj estas respondecaj al lia juĝo, kaj juĝos ilin, post kiam ili estos kolektitaj antaŭ li. Ĉar transiro al eterna vivo estos efektivigita dum la juĝo, el tio antaŭ ĉio sekvas, ke ĉiuj revivigotaj havos la mortan naturon. Se ili havus senmortajn korpojn je sia reviviĝo, ĉi-okaze la juĝo, dum kiu estos donite rekompenco, ne havus sencon.

Ni eniras en la Regnon de Dio tuj post la juĝo ĉe la tribunala seĝo (Mt 25:34); sekve, la justuloj ne troviĝas en la Regno de Dio antaŭ la juĝo. "Karno kaj sango ne povas heredi la regnon de Dio... ni ĉiuj ŝanĝiĝos... Ĉar estas necese, ke ĉi tiu putrema surmetu senputrecon, kaj ke ĉi tiu mortema surmetu senmortecon (1 Kor 15:50, 51, 53). El tio sekvas, ke tiu ĉi ŝanĝo de la morta naturo al la senmorta okazas ĉe la juĝa seĝo antaŭ ol ni eniros en la Regnon de Dio.

Tamen, la inspirita apostolo Paŭlo ofte parolis pri releviĝo, kiel pri "releviĝo de justuloj", kiuj ricevos eternan vivon post juĝo. Li komprenis, certe, ke "estos iam releviĝo de la justuloj kaj de la maljustuloj" (Ag 24:15), "kaj eliros; la farintoj de bono, al releviĝo por vivo; sed la farintoj de malbono, al releviĝo por juĝo" (Joh 5:29).

Tiele, Paŭlo ofte diras "releviĝo", kiam temas pri "releviĝo por vivo". La justuloj eliros el siaj tomboj "al releviĝo por vivo". Post tiu eliro ili estos juĝataj, kaj post la juĝo ili ricevos la eternan vivon. Tiu ĉi proceso estas "releviĝo por vivo". Estas diferenco inter "releviĝo" el tomboj kaj "releviĝo por vivo". Paŭlo diras pri sia penado vivi kristanan vivon por "atingi la releviĝon el la mortintoj" (Fil 3:11). Ĉar li estis respondeca, li releviĝos por esti juĝata, kaj tio, ke li aspiris "atingi la releviĝon", signifas, ke "la releviĝo" estas tie ĉi la "releviĝo por vivo".

Aliajn ekzemplojn de uzo de la vorto "releviĝo" en la senco "releviĝo por vivo" (kmp. Lk 14:14) ni trovas en la versoj: Lk 20:35; Joh 11:24; 1 Kor 15:21, 42; Heb 11:35; Ap 20:6. La uzo de la vorto "releviĝo" en 1 Kor 15, helpas al ni kompreni la sencon de la verso 1 Kor 15:52 – "la mortintoj releviĝos senputraj". Necesas rimarki, ke la vorto "mortintoj" iufoje (kaj precipe en 1 Kor 15) rilatas al la mortintaj justuloj, kiuj releviĝos por ricevi la eternan vivon dum la juĝo: 1 Kor 15:13, 21, 35, 42; 1 Fes 4:16; Fil 3:11; Ap 14:13; 20:5,6.

La versoj 1Tes 4:16, 17 listigas la eventojn, kunligitajn kun la reveno de Kristo:

1. La vidata reveno de Kristo.

2. La mortintoj releviĝos

3. Tiuj respondeculoj, kiuj estas vivantaj en tiu tempo, estas alkondukataj al la juĝo.

La dono de eterna vivo okazas post kiam ĉiuj kolektiĝos antaŭ Dio (Mt 25:31, 34; 13:41-43); tial senmorteco ne povas esti donita ĉe la releviĝo antaŭ ol ĉiuj kolektiĝos. Ni montris, ke ĉiuj justuloj estos rekompencitaj en la sama momento (Mt 25:34; Heb 11:39-40). Tio ne estus ebla, se senmorteco estus donita dum la releviĝo, ĉar tiuokaze ĝi estus donita antaŭ ol ĉiuj kolektiĝus.

Necesas rimarki, ke nia percepto pri tempo estas tre homa. Dio ne havas limigojn en tempo. Eble farinte egajn penoj, ni imagos specifan kronologion de eventoj ĉe la reveno de Kristo. La releviĝo kaj nia ŝanĝiĝo al senmorteco ĉe la juĝa trono okazos "en momento, en okula ekmovo" (1 Kor 15:51, 52). Almenaŭ por tiuj, kiuj estos juĝitaj, la tempo, dum la reveno de Kristo, laŭ bezono, iros en alian dimension. Laŭ la Biblio ĉiu respondeculo devas raporti ĉe la juĝa seĝo pri siaj faroj, paroli pri tio kun la Sinjoro Jesuo (Mt 25:44 k. p.; Pred 3:17; 12:14; Lk 12:2,3; 19:23; Jeĥ 18:21, 22; 1 Tim 5:24,25; Rom 14:11,12). Konsiderante, ke la respondeculoj estos multnombraj, oni povas konkludi, ke la tempo aŭ estos haltigita, aŭ ege kunpremita, por ke ĉiu el ni estu juĝata "en momento", tamen ankaŭ individue. Ĝuste pro tio, ke la tempo tiam estos kunpremita por ke la tuta proceso de la releviĝo kaj la juĝo okazu "en momento, en okula ekmovo", ofte oni parolas pri la releviĝo, kiel pri evento, dum kiu al la justuloj estos donita eterna vivo. La rapideco de nia transiro el la tomboj al la juĝa seĝo kaj, per la Dia graco, al eterna vivo, estos por la respondecaj nur "okula ekmovo". La versoj, indikitaj pli supre, diras, ke laŭ la Biblio eterna vivo estos donita ĉe la juĝa seĝo, ne ĉe la releviĝo. Tial 1Tes 4:16 diras, ke la justuloj estos elvokitaj la unuaj al la juĝo per signaloj de trumpeto, sed 1 Kor 15:52 diras pri la sama trumpeto, laŭ signalo de kiu estos donita

senmorteco. Tio ankaŭ klarigas, kial Paŭlo identigis la releviĝon kaj la alvokon al la juĝa seĝo (ekzemple, Fil 1:23).

**KOMENTO 14: La Suprenkapto**

Inter religiaj homoj, precipe inter evangelistoj, estas disvastigita opinio, ke ĉe la reveno de Kristo la justuloj estos suprenkaptitaj en la ĉielon. Tiu ĉi kredo ofte asocias kun la ideo, ke la tero tiam estos detruita. En Komento 9 ni montris, ke tio estas neebla. Ni ankaŭ montris en Ĉapitro 4.7, ke la loko de rekompenco estos la tero, ne la ĉielo. Tiuj eraraj opinioj baziĝas sur malĝusta kompreno de 1Tes 4:16, 17: "Ĉar la Sinjoro mem malsupreniros de la ĉielo... kaj la mortintoj en Kristo leviĝos la unuaj; poste ni, kiuj vivas, ankoraŭ restantaj, estos kune kun ili suprenkaptitaj en la nubojn, por renkonti la Sinjoron en la aero; kaj tiel ni estos por ĉiam kun la Sinjoro".

Ne parolante pri la evidenta danĝero fari erarajn konkludojn, bazintajn sur nur unu citaĵo el la Evangelio, necesas rimarki, ke tiuj versoj ne havas aludon pri tio, ke la justuloj estos suprenkaptitaj <u>*en la ĉielon*</u>. Kristo malsupreniros de la ĉielo antaŭ ol la kredantoj renkontiĝos kun li. Kristo reĝos eterne sur la trono de David en Jerusalemo, kaj ni estos kune kun li tie ĉi sur la tero. Tial tute ne eblas, ke la justuloj kun Kristo estos en pendigita stato ie en la aero inter la tero kaj la ĉielo. "La aero" disvastiĝas nur je kelkaj kilometroj super la tera surfaco, sekve, ĝi ne povas rilati al la ĉielo, kie Dio estadas.

La greka frazo, tradukita en la Evangelio kiel "suprenkaptitaj" laŭlitere signifas "estos forportitaj"; ĝi ne indikas iun ajn certan direkton.

En Agoj 8:39, 40 ni legas: "La Spirito de la Eternulo forkaptis Filipon... sed Filipo troviĝis en Aŝdod". Ĉi tie estas dirite, ke Filipo per mirakla maniero estis transportita de unu loko al la alia.

Kiam venos Kristo, la respondeculoj kolektiĝos ĉe la loko de juĝo, sed ili ne mem venos, ili estos kolektitaj, povas esti tiu transiro estos okazigita laŭ la aero laŭlitere.

Jesuo diris: "en tiu tago, kiam la Filo de homo malkaŝiĝos... du viroj estos sur kampo; unu estos prenita, kaj la alia lasita" (Lk 17:30, 36). Tio ankaŭ donas eblecon konkludi, ke tiu "unu" estos subite "forkaptita". La apostoloj sincere demandis: Kie, Sinjoro?". Kaj Li respondis al ili: "Kie estas la kadavro, tien ankaŭ kolektiĝos la agloj" (Lk 17:37). Kiel la agloj per instinkto flugas en la aero al kadavro sur la tero, tiel same la respondeculoj estos transportitaj ("forkaptitaj") al la loko, kie ili renkontos sian Sinjoron dum juĝo.

Ni denove devas emfazi la gravecon de la doktrino pri la juĝa seĝo de Kristo; unuaj devas veni al la juĝa seĝo la respondeculoj. La justuloj el ili estos rekompencitaj. Neatenta, supraĵa legado de 1Tes 4:16, 17 povas alkonduki al erara konkludo, ke ĉiuj respondeculoj estos forkaptitaj en la ĉielon kaj restos tie

poreterne kune kun Kristo. Tamen ni scias, ke ĉiuj respondeculoj estos kolektitaj, povas esti laû la aero, al la loko de la juĝo, kaj nur post tio ili ricevos tie sian rekompencon.

**ĈAPITRO 4: Demandoj**

1. Kio okazas post morto?
a) La animo iras al la ĉielo
b) Ni estas en senkonscia stato
c) La animo estas iuloke antaû juĝo
d) Pekemaj animoj iras al la infero, sed la bonaj iras al la ĉielo

2. Kio estas la animo?
a) Senmorta ero ene en ni
b) Vorto, signifanta "korpo, persono, kreitaĵo"
c) Tio sama, kio estas la Spirito
d) Io, kio iras al la ĉielo aû al infero post morto

3. Kio estas la spirito de homo?

4. Donu kurtan priskribon de la naturo de homo.

5. Donu du versojn el la Biblio, kiuj pruvas, ke morto estas stato de senkonscienco.

6. Kion vi scias pri la juĝa seĝo de Kristo?

7. Kiuj estos revivigitaj kaj juĝitaj?

8. Kio estas la infero?

9. Kio estas Gehena?

# ĈAPITRO 5

# LA REGNO DE DIO

## 5.1 DIFINO DE LA REGNO

En niaj antaûaj ĉapitroj ni montris, ke la celo de Dio estas rekompenci Siajn fidulojn per eterna vivo ĉe la reveno de Kristo. Tiu ĉi eterna vivo daûros sur la tero. Plurfojaj promesoj de Dio pri ĝi ne enhavas vortojn, ke la justuloj transiros en la ĉielon. "La Evangelio (bonaj novaĵoj) de la regno" (Mat 4:23) estis sciigita al Abraham, kiel promesoj de Dio rilate al eterna vivo sur la tero (Gal 3:8). La regno de Dio estos post kiam revenos Kristo kaj plenumiĝos tiuj promesoj. Kvankam Dio estas Reĝo de la tuta Sia mondkreitaĵaro, Li donis al homoj liberon por regi la mondon kaj siajn proprajn agojn laû sia deziro. Tiele, la mondo nun estas "la regno de homoj" (Dan 4:17).

Kiam Kristo revenos, plenumiĝos vortoj: "La regno de la mondo fariĝis regno de nia Sinjoro kaj de Lia Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne" (Ap 11:15). Tial Jesuo instrias nin preĝi: "Venu Via regno, plenumiĝu Via volo, kiel en la ĉielo, tiel ankaû sur la tero" (Mt 6:10). Pro tio la vortoj "la regno de Dio" kaj "la regno de la ĉielo" havas la saman signifon (Mt 13:11; kmp Mk 4:11). Atentu, ke nenie estas dirite "regno *en* la ĉielo", sed "la regno *de* la ĉielo" estos establita de Kristo sur la tero post lia reveno. Kiel la volo de Dio nun estas plenumata per la anĝeloj en la ĉielo (Ps 19:21), tiel same estos en la estonta regno de Dio sur la tero, loĝata nur de justuloj, kiuj estos egalaj al la anĝeloj" (Lk 20:36).

Eniro en la regnon de Dio post la reveno de Kristo estos la fina rezulto de nia kristana vivado (Mt 25:34; Ag 14:22); tial ni devas havi absolute ĝustan komprenon pri tio. La predikoj de Filipo pri Kristo difiniĝas kiel "predikanta la evangelion pri la regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo" (Ag 8:5, 12). En la predikoj de Paûlo citaĵo post citaĵo memorigas al ni, ke "la regno de Dio" estas lia ĉefa temo (Ag 19:8; 20:25; 28:23,31).

La doktrino pri la regno de Dio estas grava parto de la Evangelio, kaj pro tio la ĝusta kompreno de ĝi havas gravan signifon. "Tra multaj suferoj ni devas eniri en la regnon de Dio" (Ag 14:22); tio estas la lumo ĉe la fino de la tunelo de nia vivo kaj ĝi stimulas nin toleri suferojn de nia kristana vivo.

Nebukadnecar, la reĝo de Babel, volis scii pri la estonteco de la mondo (vidu Dan 2). Nokte li sonĝis pri granda statuo, farita el diversaj metaloj. Daniel klarigis al li, ke la ora kapo de la statuo prezentas la reĝon de Babel mem (Dan 2:38). Post lia regado sur la teritorio ĉirkaû Izraelo aperos aliaj imperioj, kiuj

estos diversmaniere kunligitaj kun Izraelo. Finfine estos tiaj cirkonstancoj, ke "kiel la fingroj de la piedoj (de la statuo) estis parte el fero, parte el argilo, tiel ankaŭ la regno estos parte fortika, parte rompebla" (Dan 2:42).

Nuntempe la mondo estas loĝata de multaj popoloj, unuj el ili estas pli fortaj, kaj la aliaj pli malfortaj. Daniel klarigis plue, ke la malgranda ŝtono, deŝiriĝinta de la roko kaj fariĝinta mem granda monto, kiu plenigis la tutan teron, estas nova regno, kiu staros eterne (Dan 2:34, 35). Tiu ŝtono prezentas Jesuon (Mt 21:42; Ag 4:11; Ef 2:20; 1 Pet 2:4-8). "La monto", kiun li kreos en la tuta mondo, estos la eterna regno de Dio. Ĝi estos establita ĉe la dua alveno de Kristo. Tiu ĉi profetaĵo mem estas pruvo, ke la regno de Dio estos sur la tero, ne en la ĉielo.

Ankaŭ estas aliaj versoj de la Biblio, kiuj diras, ke la regno de Dio estos plene establita post la reveno de Kristo. Paŭlo diras, ke Jesuo "juĝos la vivantojn kaj la mortintojn kaj pro lia apero kaj lia regno" (2 Tim 4:1). Ankaŭ Miĥ 4:1 diras, ke la regno de Dio similos al granda monto: "en la tempo estonta la monto de domo de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj" kaj poste priskribas la regnon sur la tero (Miĥ 4:1-4). Dio donos al Jesuo la tronon de David en Jerusalem: "Kaj li reĝos... eterne, kaj lia regno ne havos finon (Lk 1:32, 33). Necesas kompreni de kiu tempopunkto komenciĝos la regado de Jesuo sur la trono de David. Tio okazos post la reveno de Kristo. Kaj la vortoj "lia regno ne havos finon" estas koneksaj al Dan 2:44 "Dio de la ĉielo starigos regnon, kiu neniam detruiĝos, kaj ĝia regado ne transiros al alia popolo". La similan diras Ap 11:15 pri la dua alveno de Kristo: "La regno de la mondo fariĝis regno de nia Sinjoro kaj de Lia Kristo; kaj li reĝos por ĉiam kaj eterne". Tio ankaŭ konfirmas, ke regado de Kristo sur la tero komenciĝos post lia reveno.

## 5.2 LA REGNO NUN NE ESTAS ESTABLITA

Estas vaste tenata opinio, ke la Dia Regno jam plene ekzistas nuntempe, kaj ke ĝi konsistas el kredantoj – "la eklezio". Kvankam la veraj kredantoj estas jam "savitaj" kaj por ili jam estas rezervitaj lokoj en la estonta Regno, oni ne povas nune esti en la Regno, ĉar Kristo ankoraŭ ne revenis por establi ĝin.

El tio, kion ni jam ellernis, sekvas, ke "karno kaj sango ne povas heredi la regnon de Dio" (1 Kor 15:50). Ni estas "heredantoj de la regno, kiun Li promesis al tiuj, kiuj Lin amas" (Jak 2:5), ĉar per baptiĝo ni heredas la promesojn, donitajn al Abraham. Tiuj promesoj estas la bazo de la Evangelio pri la Regno de Dio (Mt 4:23; Gal 3:8, 27-29). Tial ni ofte renkontas versojn, kiuj diras, ke la promesoj al Abraham pri heredo de la regno estos plenumitaj post la reveno de Kristo (Mt 25:34; 1 Kor 6:9, 10; 15:50; Gal 5:21; Ef 5:5). Kaj

ankaŭ tio, ke tiuj ĉi versoj diras pri la heredo de la regno "os"-tempe, montras, ke la regno ankoraŭ ne estas ricevita de la kredantoj.

Jesuo rakontis parabolon por korekti tiujn, kiuj "supozis, ke la regno de Dio tuj aperos". Li diris: "Unu nobelo forvojaĝis en malproksiman landon, por ricevi al si regnon, kaj reveni". Por la tempo de sia foresto li donis al siaj servistoj certajn taskojn. "Kaj kiam li revenis, ricevinte la regnon, li ordonis voki al li tiujn servistojn" kaj li juĝis ilin (Lk 19:11-27).

La nobelo reprezentas Jesuon forvojaĝantan "en malproksiman landon" de la ĉielo por ricevi la regnon, kun kiu li revenos por juĝi en la tago de sia dua alveno. Tial ne estas eble, ke "servistoj" posedu la regnon nun, dum ilia Sinjoro estas for.

La sekvaj citaĵoj konfirmas tion:

- "Mia regno ne estas el ĉi tiu mondo (epoko)", klarigis Jesuo (Joh 18:36), kvankam eĉ en tiu tempo li povis diri: "Mi estas reĝo" (Joh 18:37), montrante per tio, ke eĉ nuna ĉeesto de Kristo ne pruvas, ke Lia Regno estas establita jam nun.

- Kristo diris al siaj disĉiploj, ke li neniam trinkos vinon "ĝis tiu tago, kiam mi trinkos ĝin novan kun vi en la regno de mia Patro" (Mt 26:29). Tio klare montras, ke la regno estos en la estonteco, kaj ĝuste tiel homoj komprenis predikojn de Kristo, kiam li predikis "la evangelion de la regno de Dio" (Lk 8:1). "Feliĉa estas tiu, kiu manĝos panon en la regno de Dio" (Lk 14:15).

- Lk 22:29, 30 daŭrigas: "Kaj mi difinas por vi regnon... por ke vi manĝu kaj trinku ĉe mia tablo en mia regno".

- Jesuo klarigis signojn, kiuj akompanos lian duan alvenon, finante sian parolon per la vortoj: "Tiel same vi, kiam vi vidos, ke tio okazas, tiam sciu, ke la regno de Dio estos proksima" (Lk 21:31). Estas absurde opinii, ke la regno jam ekzistas nune, kiam Kristo ne estas reveninta.

- "Tra multaj suferoj ni devas eniri en la regnon de Dio" (Ag 14:22). Ne mirinde estas, ke ĉiu suferanta kredanto sincere preĝas: "*Venu* Via regno" (Mt 6:10).

- Dio "vin vokas en Sian regnon" (1 Tes 2:12); kaj responde al tiu voko ni devas peni eniri en la regnon pere de nuna spirita vivo (Mat 6:33).

**Ĉu la Regno de Dio estas ene en ni?**

Malgraŭ tiuj argumentoj, multaj ortodoksaj "kristanoj", bazinte sin nur sur unu verso, kredas, ke la regno de Dio ekzistas nune en la koroj de kredantoj. Kvankam en tiu verso estas dirite: "... la regno de Dio estas *inter* vi" (Lk 17:21). En Lk 17:20 ni vidas, ke tiujn vortojn Jesuo diris al fariseoj; kaj "vi" rilatis al ili. Certe, ili ne estis kristanaj kredantoj – la regno de Dio ne estis establita en iliaj koroj.

La hebreoj publike demonstris sian fervoran atendadon de Mesio. En ĉi tiu citaĵo, verŝajne, la vortoj "la regno de Dio " estas titolo de la Mesio, pro tio, ke li estos la Reĝo de la Regno. Ekzemple, kiam Jesuo eniris Jerusalemon, homoj kriis: Estu benata tiu, kiu (Mesio) venas en la nomo de la Eternulo; estu benata la venanta regno de nia patro David" (Mk 11:9, 10), tie ĉi la vorto "la regno" egalas al la vorto "Mesio". Ankaŭ Johano la Baptisto en siaj predikoj diris: "... alproksimiĝis la regno de la ĉielo. Ĉar li (Jesuo) estas tiu, pri kiu estis dirite per la profeto Jesaja" (Mt 3:2, 3). Kaj en Lk 17:20-24 al la demando de fariseoj "kiam venos la regno de Dio" Jesuo respondis al ili, dirante pri la alveno de "la Filo de homo".

Kristo vidis, ke la fariseoj, demonstrante sian pormontran fervoron pri atendado de Mesio, kiu laŭ ili, devas veni subite, en gloro kaj forto, ne rimarkis la Mesion, "la regnon de Dio" – Jesuon, kiu jam estis humile staranta "inter" ili. Kaj li diris al ili: "La regno de Dio ne venas kun observado... ĉar jen la regno de Dio estas inter vi" (Lk 17:20, 21).

## 5.3 LA REGNO DE DIO EN LA PASINTECO

La regno de Dio estas la estonta rekompenco de la kredantoj. Kiel tia ĝi instigas ilin vivi laŭ la ekzemplo de Kristo – toleri suferojn kaj malfacilaĵojn de tiu ĉi vivo. Tial oni povas atendi, ke la kredantoj pasigos ĉiujn siajn tagojn kun ĉiame kreskanta deziro kompreni kaj pritaksi la belecon de la estonta regno. Tio estos la rezulto de ĉiuj iliaj streboj kaj elmontroj de sia amo al Dio, kiel al sia Patro.

En la Skriboj abundas detaloj pri la estonta Regno, kaj vi povas elspezi la tutan vian vivon por klare imagi al vi nur kelkajn el ili. Unu el vojoj, kiuj povas konduki nin al kompreno de la bazaj principoj de la estonta Regno estas agnoski, ke la Regno de Dio jam ekzistis pasinttempe en la formo de la nacio de Izraelo. Tiu ĉi regno estos restarigita post la reveno de Kristo. La Biblio donas al ni multe da informoj pri la nacio de Izraelo, por ke ni povu pli ĝuste kompreni kiel estos aranĝita la estonta Regno de Dio.

Multfoje Dio estas priskribita kiel "la Reĝo de Izrael" (Jes 44:6; kmp. Jes 43:15; Ps 48:2; 89:18; 149:2); el tio sekvas, ke la popolo de Izraelo estis Lia regno. Ili iĝis la regno de Dio post kiam Dio donis al ili la promesojn ĉe la

monto Sinai, post ilia eliro el Egiptujo kaj transiro la Ruĝan maron. Responde al ilia deziro observi Liajn ordonojn ili estos Lia "regno... kaj popolo sankta" (El 19: 5, 6).

Tiele, "kiam Izrael eliris el Egiptujo... tiam fariĝis... Izrael Lia regno" (Ps 114:1, 2). Ricevinte tiujn promesojn, la Izraelidoj transiris la dezerton de Sinai kaj enloĝiĝis en la promesita lando Kanaan. Pro tio, ke ilia reĝo estis Dio Mem, ili estis direktitaj pere de "juĝistoj" (ekzemple, Gideon kaj Ŝimŝon), sed ne de reĝoj. Tiuj juĝistoj estis ne reĝoj, sed administrantoj, direktataj de supre kaj ili administris nur iujn certajn partojn de la lando. Dio vokis ilin por certaj celoj, ekzemple, por direkti Izraelon al pento, aŭ savi ilin de malamikoj. Kiam la Izraelidoj petis juĝiston Gideon esti ilia reĝo, li respondis: "Mi ne reĝos vin... la Eternulo reĝos vin" (Juĝ 8:23).

La lasta juĝisto estis Samuel. En tiu tempo la Izraelidoj petis Samuelon doni al ili homan reĝon "kiel ĉe ĉiuj popoloj" (1 Sam 8:5, 6).

Dum la tuta sia historio la vera popolo de Dio estis tentata ne sufiĉe taksi siajn intimajn rilatojn kun Dio, kaj preferis esti, kiel ĉiuj aliaj ĉirkaŭantaj ilin popoloj. Tiuj tentoj estas aktualaj ankaŭ nune. Dio diris al Samuel: "Min ili forpuŝis de regado super ili" (1 Sam 8:7). Tamen Dio donis al ili reĝon – Saulon. Post Saul, reĝis David kaj vico da aliaj reĝoj, devenintaj de ili. Pli spiritdotitaj el ili komprenis, ke Izrael estas la regno de Dio. Ili konsciis, ke malgraŭ tio, ke la Izraelidoj forpuŝis regadon de Dio, ilia regado estas ne ilia, sed de Dio, kaj ili nur plenumas Lian volon.

Komprenante tiun principon, ni ankaŭ povas kompreni la sencon de la vortoj pri Salomono, la filo de David, kiu "suriris sur la tronon de la Eternulo kiel reĝo" (2 Kron 9:8; 1 Kron 28:5; 29:23). La regado de Salomono donis al Izrael pacon kaj prosperon; kaj estis modelo (aŭ tipo) de la estonta Regno de Dio. Jen tial estas precipe emfazite, ke Salomono estis reĝo de Izrael kaj regis ilin je la nomo de Dio same, kiel Jesuo, kiu sidos sur la trono de Dio, kaj kiel la Reĝo de Izrael regos ilin je la nomo de Dio (Mt 27:37, 42; Joh 1:49; 12:13).

Multaj justaj reĝoj, pri kiuj diras la Malnova Testamento, regis tiele, ke ilia regado fariĝis kiel modelo de la estonta regno de Kristo. Kiel Salomono konstruis en Jerusalemo la templon por Dio, la saman faros Kristo en la estonta regno (vidu Jeĥ 40:48). Kiel Ĥizkija kaj Salomon ricevadis donacojn kaj tributojn de la najbaraj popoloj (1 Reĝ 10:1-4; 2 Reĝ 20:12) kaj faris la landon fruktodona kaj prosperanta (1 Reĝ 10:5-15; Jes 37:30), tiel same estos farite en la tutmonda regno de Kristo, sed en nekompareble pli alta grado.

**Geedzeco**

Malgraŭ sia bona komenco, Salomono faris multe da eraroj koncerne sian geedzecon, kaj tio pli kaj pli konsumadis liajn spiritajn fortojn de jaro al jaro.

“La reĝo Salomono amis multajn aligentajn virinojn, la filinon de Faraono, Moabidinojn, Amonidinojn, Edomidinojn, Cidonaninojn, Ĥetidinojn, el tiuj popoloj, pri kiuj la Eternulo diris al la Izraelidoj: Ne iru al ili kaj ili ne iru al vi, ĉar ili turnos vian koron al siaj dioj; al ili Salomono aliĝis per amo. ... kaj liaj edzinoj forklinis lian koron. En la tempo de maljuneco de Salomono liaj edzinoj turnis lian koron al aliaj dioj, kaj lia koro ne estis tiel plene fordonita al la Eternulo... Kaj Salomono sekvis Aŝtaron... Kaj Salomono faris malbonon antaŭ la okuloj de la Eternulo kaj ne sekvis plene la Eternulon... Kaj la Eternulo ekkoleris Salomonon... Kaj la Eternulo diris al Salomono: ...Mi forŝiros de vi la regnon” (1 Reĝ 11:1-11).

La apostateco de Salomono daŭris ĝis la fino de lia vivo. Liaj interrilatoj kun virinoj, kiuj ne agnoskis la ordonojn de Dio al Izrael, pli kaj pli klinigis lin simpatii al iliaj falsaj dioj. Lia amo al siaj edzinoj superis la konscion, ke iliaj falsaj dioj estas spiritaj falsaĵoj de la vera Dio. Dum la tempo pasadis, li pli kaj pli forkliniĝis de Dio de Izrael. “Lia koro ne estis tiel plene fordonita al la Eternulo”, t. e. lin ne turmentis konsciencriproĉoj pro la adoro de falsaj dioj. La foresto ĉe li de korinklino al la vera Dio estis “malbono antaŭ la okuloj de la Eternulo” kaj kondukis al la rompo de interrilatoj de Dio kun Salomono. Plurfoje al la Izraelidoj estis dirite, ke ili ne parenciĝu kun alinacianoj (El 34:12-16; Jos 23:12,13; Read 7:3).

Per baptiĝo je Kristo ni fariĝas spirite Izrael. Se ni estas fraŭloj, ni devas edziĝi (fraŭlinoj – edziniĝi) al spirita Izrael, homoj, kiuj estas “en la Sinjoro”, t. e. baptitaj “je Kristo” (1 Kor 7:39). Se ni estas jam edziĝitaj, post nia baptiĝo ni devas ne forlasi niajn edzinojn, ĉar niaj interrilatoj estas sanktigitaj per nia kredo (1 Kor 7:12-14). Edziĝo kun tiu, kiu ne scias pri la vera volo de Dio, povas konduki al la apostateco. Salomono, verŝajne, ne sufiĉe taksis la forton de la avertoj de Dio pri tiaj edzinoj: “Ili turnos vian koron al siaj dioj” (1 Reĝ 11:2; El 36:16). Nur altnivela memkontrolo kaj sincera pento povas fari nin escepto el tiu regulo.

Ni jam montris pli supre, ke ortodoksaj kristanoj ne akceptas la hebrean bazon de la kristana espero, ili ne scias la veran Dion de Izrael. Edziĝo kun tiaj homoj kondukas kutime al iompostioma defalo de la gloraj doktrinoj de la vero, kiuj estas la bazo de nia savo. Ĝuste pro tio Isaak kaj Jakobo klopodis zorge kaj superis malfacilaĵojn por edziĝi al virinoj, kiuj havas konforman veran kredon. Kaj ankaŭ pro tio Isaak estis ne edziĝita ĝis sia 40-jara aĝo (Gen 24:3, 4; 28:1).

La ĉagreno de Ezra kaj Neĥemja pro la edziĝo de la hebreoj kun ne hebreaj virinoj montras, kiom grava estis tiu ĉi temo (Ezra 9:12; Neĥ 10:29, 30).

Ni tuŝis tie ĉi tiun temon nur parte, pli detale ni diskutos pri edzeco en Parto 11.3.

**La juĝo de Dio**

Rezulte de la apostateco de Salomono la regno de Izrael estis dividita je du partoj: la filo de Salomono Reĥabeam regis la tribojn de Jehuda kaj Benjamen, dum Jerobeam regis tiun dektriban regnon, kiu nomiĝis Izrael (aŭ Efraim). La dutriba regno estis Judujo.

La pli granda parto de la popolo de tiuj triboj sekvis la malbonan ekzemplon de Salomono – ili asertis, ke kredas je la vera Dio, sed samtempe ili adoris idolojn de alinacianoj. Pere de profetoj la Eternulo multfoje alvokis ilin penti, sed ve! – senrezulte. Pro tio Li punis ilin, elpelinte ilin el la regno de Izrael en landojn de iliaj malamikoj. Tio estis okazigite pere de asirianoj kaj babelanoj, kiuj invadis Izraelon kaj militkaptis ĝiajn loĝantojn. "Vi (Dio) atendis por ili dum multe da jaroj, Vi admonadis ilin kun Via spirito per Viaj profetoj; sed ili ne atentis; tial Vi transdonis ilin en la manojn de la popoloj alilandaj" (Neĥ 9:30).

La dektriba regno tute ne havis bonajn reĝojn. Jerobeam, Aĥab, Aĥazja kaj tiel plu - ĉiuj ili estis priskribitaj en la libro "Reĝoj" kiel idoladorantoj. La lasta reĝo estis Hoŝea; dum lia regado la asirianoj venkoprenis Izraelon kaj transkondukis la Izraelidojn en Asirion (2 Reĝ 17); de tie ili neniam revenis.

La dutriba regno, Judujo, havis kelkajn bonajn reĝojn (ekzemple, Ĥizkija, Joŝija), sed la pli granda parto el ili estis malbonaj. Pro multaj pekoj Dio rifuzis regi Judujon, kaj dum la regado de Cidkija la babelanoj invadis Judujon, militkaptis ĝiajn loĝantojn kaj venigis ilin en Babelon (2 Reĝ 25). La militkaptitoj restis en Babelo dum 70 jaroj, post tio iuj el ili revenis al Izraelo, gvidataj de Ezra kaj Neĥemja. De tiu tempo la hebreoj ne havis sian propran reĝon kaj estis regataj de la babelanoj, grekoj kaj romanoj. Jesuo naskiĝis dum la regado de la romanoj. Pro tio, ke Izraelo malakceptis Jesuon, la romanoj invadis ĝin en la jaro 70 PK, kaj dispelis la Izraelidojn tra la tuta mondo. Nur dum la lastaj 100 jaroj la Izraelidoj komencis revenadi en Izraelion, montrante per tio pri la baldaŭa reveno de Kristo (vidu Suplementon 3).

Jeĥezkel 21:25-27 profetis pri tia fino de la regno de Dio – la nacio de Izrael: "Vi, ho senhonora kaj malpia estro de Izrael (t. e. Cidkija), kies tago alvenis nun... tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Deprenu la cidaron kaj demetu la kronon (t. e. ĉesu esti reĝo); ne plue estos tiel... Mi forigos, forigos, forigos ĝin; kaj ĝi ne ekzistos *ĝis* venos tiu, kiu havas rajton je ĝi, kaj al li Mi ĝin donos". Fragmento post fragmento en la profetaĵoj lamentas pri la fino de la regno de Dio (Hoŝ 10:3; Ploro 5:16; Jer 14:21; Dan 8:12-14).

La trifoje ripetita vorto "forigos" en la versoj Jeĥ 21:25-27 rilatas al tri invadoj de Nebukadnecar, la reĝo de Babel. La atentema studanto povas rimarki, ke "estro de Izrael" kaj "la regno de Dio" en tiuj versoj estas paralelaj nocioj, ĉar la detroniĝo de Cidkija estis samtempe la fino de la regno de Dio

(vidu 5.2). "Mi metos finon al la regno de la domo de Izrael" (Hoŝ 1:4) – tiel finiĝis la regado de Dio en Izrael. "Kaj ĝi ne ekzistos *ĝis*..." signifas, ke la regno estos revivigita, kiam "venos tiu, kiu havas rajton je ĝi kaj al li Mi ĝin donos". Dio, "la Eternulo donos al li la tronon de la patro David... kaj lia regno ne havos finon" (Lk 1:32,33) – kiam Kristo revenos. Tiam plenumiĝos la promeso pri la restarigo de la regno de Dio.

### Restarigo de Izrael

La Malnova Testamento havas multe da profetaĵoj pri la *restarigo* de la Regno de Dio post la reveno de Mesio. La disĉiploj de Kristo ankaŭ demandis lin: "Sinjoro, ĉu en ĉi tiu tempo vi *restarigas la regadon al Izrael*?", t. e. ĉu la profetaĵo en Jeĥ 21:27 plenumiĝas nun? Jesuo respondis al ili, ke neniu scias la precizan tempon de lia dua alveno, sed ĝi nepre okazos kaj la anĝeloj konfirmis, ke Jesuo revenos (Ag 1:6-11).

Sekve, la restarigo de la regno de Dio/Izrael okazos post la dua alveno de Kristo. Ankaŭ Petro predikis, ke Dio sendos "Kriston Jesuon, kiun la ĉielo devas ricevi (t. e. li devas resti tie ĝis la tempoj de restarigo de ĉio, pri kiuj parolis Dio per la buŝo de Siaj sanktaj profetoj" (Ag 3:20,21). La dua alveno alportos la reestabligon de la regno de Dio, kiel restarigo de la antaŭa regno Izrael.

Pri restarigo de la regno de Dio diris ĉiuj sanktaj (Diaj ) profetoj:

- "Kaj fortikiĝos trono per favorkoreco, kaj sur ĝi kun justeco en la tendo de David (dum la dua alveno – Lk 1:32,33) sidos juĝisto, celanta justecon" (Jes 16:5).

- "En tiu tempo mi restarigos la falintan tabernaklon de David (t. e. "tronon" – Lk 1:32,33), Mi reŝtopos ĝiajn breĉojn, Mi restarigos la detruitaĵon, kaj Mi rekonstruos ĝin, *kiel en la tempo antikva*" (Am 9:11). La lasta frazo klare diras pri restarigo.

- "Kaj ili (Izrael) havos filojn *kiel antaŭe*, kaj ilia komunumo forte staros antaŭ Mi" (Jer 30:20).

-"Kaj la Eternulo... denove favoros Jerusalemon" (Zeĥ 2:12), farinte ĝin la ĉefurbo de Lia tutmonda Regno (kmp. Ps 48:2; Jes 2:2-4).

-"Mi revenigos la kaptitojn de Jehuda kaj la kaptitojn de Izrael, kaj Mi aranĝos ilin *kiel antaue*... ankoraŭ estos aŭdata sonoj de ĝojo... Mi revenigos la forkaptitojn de la lando *kiel antaŭe*... sur ĉi tiu loko

(Jerusalem)... _denove_ troviĝos loĝejoj de paŝtistoj... _denove_ pasados ŝafoj" (Jer 33:7-13).

La reveno de Kristo por restarigi tiun Regnon estas vere "la espero de Izrael", al kiu ankaŭ ni apartenas pere de nia baptiĝo al Kristo.

## 5.4 LA REGNO DE DIO EN LA ESTONTECO

Partoj 1 kaj 3 de tiu ĉi studo havas multe da informoj pri la estonta Regno. Ni vidas, ke al Abraham estis promesite, ke per lia idaro beniĝos ĉiuj popoloj de la tero. Rom 4:13 pli klarigas tion jene, ke la tutan mondon heredos la idaro de Abraham, t. e. tiuj homoj, kiuj estas en Kristo. La profetaĵo en Dan 2 montras, ke la revenon de Kristo simbolas malgranda ŝtono, kiu ĉiame pligrandiĝante, plenigos la tutan mondon (kmp. Ps 72:8). Tio signifas, ke la regno de Dio estos establita ne nur en Jerusalemo aŭ en la lando de Izrael, kiel opinias iuj, kvankam certe tiu lando estos ĝia centro.

Tiuj, kiuj sekvas Kriston dum la nuna vivo, en la regno de Dio estos pastroj, kaj ili reĝos sur la tero (Ap 5:10). Ili estros diversnombrajn kaj diversgrandajn urbojn; iu estros en dek urboj, alia estros en kvin urboj (vidu Lk 19:17,19). Kristo estros la tutan teron, dividinte sian regadon kun ni (Ap 2:27; 2 Tim 2:12). "Jen kun justeco regos reĝo (Jesuo), kaj princoj (la kredantoj) administros laŭleĝe" (Jes 32:1; Ps 45:16).

Kristo reĝos eterne sur la restarigita trono de David (Lk 1:32,33), t. e. li havos tronon en Jerusalemo. Ĉar Kristo regos el Jerusalemo, Jerusalemo estos la ĉefurbo de la estonta regno kaj en ĝi estos konstruita templo (Jeĥ 40-48). Kvankam ĉiuj popoloj gloros Dion diversloke (Mal 1:11), tiu ĉi templo estos la centro de la tutmonda adorado al Dio. Popoloj "...venados ĉiujare, por adorkliniĝi antaŭ la Reĝo, la Eternulo Cebaot, kaj por festi la feston de laŭboj" al la templo en Jerusalemo (Zeĥ 14:16).

Tiu ĉiujara pilgrimado al Jerusalemon ankaŭ estas profetita en Jes 2:2,3: "En la tempo estonta la monto (regno - Dan 2:35,44) de la domo (templo) de la Eternulo staros kiel ĉefo inter la montoj (t. e. la regno de Dio superos homajn regnojn); ...kaj fluos al ĝi ĉiuj nacioj. Kaj iros multaj popoloj, kaj diros: Venu, ni iru supren sur la monton de la Eternulo, al la domo de la Dio de Jakob, por ke Li instruu nin pri Siaj vojoj...; ĉar el Cion eliros la instruo, kaj la vorto de la Eternulo el Jerusalem". Tiu priskribo montras la unuajn tagojn de la regno, kiam homoj disvastigados la scion pri la regado de Kristo kaj homoj estos venantaj al la "monto" de la Dia Regno, kiu iompostiome plenigos la tutan mondon. Tie ĉi ni vidas la bildon de sincera kaj fervora adorado al Dio.

Unu el la plej ĉefaj tragedioj de niaj tagoj estas tio, ke multe da homoj "adoras" Dion pro politikaj, sociaj, kulturaj aŭ emociaj kialoj, ne pro vera kompreno pri Li, kiel pri nia Patro kaj Kreinto. Dum la restarigo de la Regno la popoloj de la mondo strebos lerni la vojojn de Dio; homojn tiel posedos tiu deziro, ke ili vojaĝos de ĉiuj anguloj de la tero al Jerusalem por akiri pli da scio pri Dio.

Anstataŭ la konfuzoj kaj maljusteco, elvokitaj per neperfekta sistemo de justeco kaj administrado, ekzistos unu universala jura kodo, "la leĝo kaj la vorto de Dio", anoncataj de Kristo el Jerusalemo. "Kaj *fluos* al ĝi ĉiuj nacioj": tio montras, ke homoj vivos laŭ la samaj leĝoj, havos la samajn dezirojn scii la veron pri Dio, kaj tio kondukos al plibonigo de homaj interrilatoj.

Tiu ĉi priskribo de la popoloj, kiuj *fluos* al Jerusalemo, similas al la priskribo en Jes 60:5, kie la hebreoj "fluas kune" kun la paganoj (nehebreoj) por adori Dion en Jerusalemo. Ĉio tio plene respondas al la profetaĵo pri la Regno en Zeĥ 8:20-23:

> "Venados ankoraŭ popoloj kaj loĝantoj de multaj urboj; kaj la loĝantoj de unu urbo venos al la loĝantoj de alia urbo, kaj diros: Ni iru rapide, por preĝi antaŭ la Eternulo kaj por turni nin al la Eternulo Cebaot; mi ankaŭ iros. Kaj venos multaj popoloj kaj potencaj nacioj, por serĉi la Eternulon Cebaot en Jerusalem kaj por preĝi antaŭ la Eternulo... En tiu tempo forte kaptos dek homoj el ĉialingvaj nacioj la baskon de Judo, kaj diros: Ni iros kun vi, ĉar ni aŭdis, ke Dio estas kun vi".

Tio kreas bildon de la juda popolo, kiu fariĝos la "kapo, ne la vosto" de la nacioj pro sia pento kaj obeemo (Read 28:13), kaj tio montras, kiun lokon okupas la hebreoj en la Dia plano de savo. Homoj emocie kaj kun ĝojo diskutos pri eventoj, kaj diros al la hebreoj: "Ni iros kun vi, ĉar ni *aŭdis*, ke Dio estas kun vi". Tiam oni povas aŭdi interparoloj nur pri spiritaj temoj, kaj la vanaj malcertaj paroloj, kiuj nune okupas la cerbojn de multaj homoj, tute ĉesos.

Se homoj estos tiom piemaj, ne estas mirinde, ke Kristo "juĝos inter la nacioj... kaj ili forĝos el siaj glavoj plugilojn kaj el siaj lancoj rikoltilojn; ne levos nacio glavon kontraŭ nacion, kaj oni ne plu lernos militon" (Jes 2:4). La absoluta aŭtoritato de Kristo kaj perfekta lia juĝado kondukos al tio, ke la popoloj volonte ŝanĝos siajn militarmilojn je terkulturaj maŝinoj kaj ĉesigos ĉiujn militajn instruadojn. "En liaj tagoj floru virtulo" (Ps 72:7) – tiam kreskos spiriteco kaj respektataj estos tiuj, kiuj montros la karakterizojn de Dio: de amo, bonkoreco, justeco kaj tiel plu, kontraste al la nunaj laŭdego de fiereco, memfido kaj egoistaj ambicioj.

La propravola forĝo "el glavoj plugilojn" estos nur parto de tiu granda ŝanĝo en terkulturo, kiu okazos sur la tuta tero. Pro la peko de Adam la tero

estis malbenita (Gen 3:17-19), tial nune oni devas doni multe da fortoj por ricevi bonan rikolton de ĝi. En la Regno estos "multe da greno en la lando; sur la supro de la montoj ĝiaj spikoj ondiĝu kiel Lebanon" (Ps 72:16), "Pluganto renkontiĝos kun la rikoltanto, la vinberpremanto kun la semanto; kaj la montoj elgutigos dolĉan sukon" (Am 9:13); tia estos pli fekundiĝinta tero, kiam la malbeno estos deprenita. Gravaj ŝanĝoj en la terkulturo ŝanĝos ankaŭ la vivon de multaj homoj. La profetaĵoj pri la Regno diras, ke homoj returnos sin al memprovizado, al agrikultura vivmaniero:

> "Ĉiu sidos sub sia vinberujo kaj sub sia figarbo, kaj neniu timigos" (Miĥa 4:4).

La memprovizado eliminos krimojn, kiuj neeviteble akompanas ĉiujn sistemojn de uzado de laborfortoj por la mono.

> "Ili konstruos domojn kaj loĝos en ili; ili plantos vinberĝardenojn kaj manĝos iliajn fruktojn. Ili ne konstruos, ke alia loĝu; ili ne plantos, ke alia manĝu... kaj Miaj elektitoj eluzos la produktojn de siaj manoj... Ili ne laboros vane..." (Jes 65:21-23).

Jes 35:1-7 havas senkomparan profetaĵon pri ŝanĝoj sur la tero, kiuj donos ĝojon kaj feliĉon por tiuj, kiuj prilaboros ĝin: "Ekĝojos la dezerto... Ĝi forte ekfloros kaj triumfos kaj kantos... en la dezerto elfendiĝos akvo kaj en la stepo riveroj... kaj la tero senakva fariĝos fonto de akvo". Malaperos eĉ la natura agresiveco inter bestoj: "Lupo kaj ŝafido paŝtiĝos kune" kaj infanoj ludos kun serpentoj (Jes 65:25; 11:6-8).

Kiel malpliiĝos la malbeno, donita al la tero, same malpliiĝos la malbeno, donita al la homaro. Ap 20:2,3 simbollingve diras pri la diablo (peko kaj ĝiaj efektoj), kiu estos katenita dum la Jarmilo. La vivdaŭro plilongiĝos tiom, ke se homo mortos en la aĝo de 100 jaroj, li estos konsiderata infano (Jes 65:20). Virinoj "ne naskos por pereo" infanojn (Jes 65:23). "Tiam malkovriĝos la okuloj de la blinduloj, kaj la oreloj de la surduloj malfermiĝos. Tiam la lamulo eksaltos kiel cervo, kaj la lango de la mutulo ekkantos" (Jes 35:5,6). Tio okazos dank` al la miraklaj donacoj de la Spirito, kiu denove estos donita al homoj (kmp. Heb 6:5).

Tamen oni devas ne opinii, ke la Regno de Dio similas al paradizo ie sur tropika insulo, kie la piuloj loĝos senzorge, kiel nuntempaj sunbruniĝantoj kuŝas en la sino de naturo. La ĉefa celo de la Regno de Dio estas glori Dion ĝis la tero pleniĝos de la gloro al Li, "kiel la akvo plenigas la maron" (Ĥab 2:14). Tio estas la fina celo de Dio.

Glori Dion signifas, ke la loĝantoj de la tero komprenos, aprezos, gloros kaj sekvos Liajn gloron kaj justecon. Tiele, “Kaj la humiluloj heredos la teron (en la Regno) kaj ĝuos grandan (spiritan) pacon” (Ps 37:11), sed ne nur facilan vivon. “Feliĉaj estas tiuj, kiuj malsatas kaj soifas justecon, ĉar ili satiĝos” en la Regno (Mt 5:6).

Eĉ nur penson pri la posedo de eterna vivo en la Regno oni ofte uzas kvazaŭ karoton antaŭ la nazo por eksciti la intereson de homo pri kristanismo. Sed en tiu okazo nia posedo de ĝi estos nur flanka al la vera kialo de nia esto en la Regno, kiu estas glorado de Dio. Dum la tempo post nia baptiĝo la kompreno de tio devas ĉiame plifortigadi kaj evoluigi nian aprezon de Dio. Ekzemple, por mi, la aŭtoro de tiuj ĉi linioj, nur dek jaroj da vivo en la ĝojo de absoluta perfekteco kaj unueco kun Dio superos valoron de la tuta mia vivo. La konscio, ke tia stato daŭros eterne, konsternas la menson, forportante nian imagon for de la limoj de homa kompreno.

Anstataŭ zorgi pri niaj avantaĵoj kaj materiala stato en nia nuna vivo ni devas aspiri al la ĉefa celo – la Regno de Dio. Kristo konsilis: “Celu unue Lian regnon kaj Lian justecon, kaj ĉio tio estos aldonita al vi” (Mt 6:30-34). Ĉio tio, al kio ni strebas en nia vivo estas sensignifa kompare kun tio, kio “estos aldonita” al ni en la Regno de Dio.

Ni devas “celi Lian justecon”, t. e. peni evoluigi en ni la Diajn karakterizojn (ekzemple, amon), kaj tio signifas, ke ni volas esti en la regno de Dio, ĉar tie justeco estos glorata, ĉar ni volas esti morale tute perfektaj, ne ĉar ni volas eskapi la morton kaj vivi eterne facilan vivon. Tre ofte la esperon de la Evangelio oni prezentas tiele, ke ĝi respondas al homa gloramo. Certe, la kaŭzoj, laŭ kiuj ni volas eniri en la Regnon, povas ŝanĝiĝi de tago al tago, sed la ĉefa kaj nepra kondiĉo estas tio, ke ni devas ellerni la Evangelion, esti obeemaj al ĝi kaj al Dio, elmontrante nian obeemon pere de nia baptiĝo.

## 5.5 LA JARMILO

Nun la atentema leganto povas demandi: ĉu tiu bildo de la Regno de Dio ne estas tro homa? Homoj en la Regno naskos bebojn (Jes 65:23) kaj ili mortos (Jes 65 :20). Tiuj homoj disputos inter si, kaj Jesuo juĝos ilin (Jes 2:4), kaj tamen ili devos prilabori la grundon por resti vivaj, kvankam tiu laboro estos pli facila ol la nuna. Ĉio tio ŝajnas tre malsimila al la promesoj, ke la justuloj vivos eterne, havos naturon de Dio, estos egalaj al la anĝeloj, kiuj nek edziĝas, nek naskas infanojn (Lk 20:25,36). La respondo kuŝas en tio, ke la komenca periodo de la Dia regno daŭros mil jaroj (vidu Ap 20:2-7). Dum tiu Jarmilo estos sur la tero du grupoj da homoj:

a. La sanktuloj, nome tiuj el ni, kiuj sekvas Kriston en la nuna vivo, al kiuj ĉe la juĝa seĝo estos donita eterna vivo. Rimarku, ke "sankta" signifas "elvokita" kaj povas rilati al iu ajn kredanto.

b. La ordinaraj mortemaj homoj, kiuj ne sciis la Evangelion antaŭ la reveno de Kristo, t. e. ili estas ne respondecaj al la tribunala seĝo.

Ĉe la Krista reveno, du viroj estos sur kampo, unu estos prenita (al juĝo), kaj la alia lasita (Lk 17:36; jen tiuj "lasitaj" apartenas al la dua grupo.

Ricevinte antaŭ la juĝa seĝo la naturon de Dio, la sanktuloj ne estos mortemaj kaj ne naskos bebojn. Kaj tio signifas, ke ĉio pli supre dirita pri la Regno de Dio rilatas al la dua grupo. La rekompenco por la justuloj estos tio, ke ili estos reĝoj kaj presbiteroj en la Dia regno sur la tero (Ap 5:10), regante tiujn, kiuj ne sciis la Evangelion antaŭ la reveno de Kristo. Estante en Kristo, ni dividos Lian rekompencon, t. e. ni estos la reĝoj de la mondo: "...al la venkanto... mi donos aŭtoritaton super la nacioj; kaj li regos ilin per fera sceptro... kiel *mi* ankaŭ ricevis de mia Patro" (Ap 2:26,27).

Nun iĝas klara la parabolo de Kristo pri min'oj kaj urboj; la veraj servistoj ricevis po dek kaj kvin urboj en la Regno (Lk 19:12-19). Scio pri la Diaj vojoj ne disvastiĝos rapide tuj post la deklaro, ke Kristo estas Reĝo en Jerusalemo. Al Jerusalem fluos homoj por pli ekscii pri la Eternulo (Jes 2:2,3). Ni memoru ankaŭ, ke la monto en Dan 2:35,44 (reprezentanta la Regnon de Dio) pligrandiĝis en la mondo poiome. Disvastigi la scion pri Dio kaj Lia Regno estos la devo de la sanktuloj. Pli frue, kiam Izrael estis la regno de Dio, tiam la pastroj havis devon disvastigi scion pri Dio (Mal 2:57). Tiucele ili loĝis en diversaj urboj de Izrael. En la pli glora restarigota Regno la rolon de pastroj plenumos la sanktuloj (Ap 5:10).

***Se Kristo venos hodiaŭ:***

a. La mortintoj respondeculoj estos revivigitaj kaj kune kun la vivantaj respondeculoj estos venigitaj al la juĝa seĝo.

b. La pekemaj respondeculoj estos punitaj je morto, sed la justuloj ricevos eternan vivon.

c. La justuloj estros tiujn popolojn, kiuj estos vivantaj, sed ne respondecaj antaŭ Dio. Ili instruos, kiel "reĝoj kaj pastroj" (Ap 5:10).

d. Tio daŭros dum 1000 jaroj. Dum tiu tempo ĉiuj mortemaj homoj aŭdos pri la Evangelio kaj sekve, fariĝos respondecaj antaŭ Dio. Ĉiuj ili vivos pli longe kaj feliĉe.

e. Ĉe la fino de la Jarmilo okazos ribelo kontraû Kristo kaj la sanktuloj, sed ĝi estos sufokita de Dio (Ap 20:8,9).

f. Ĉe la fino de la Jarmilo ĉiuj tiuj, kiuj mortis dum tiu periodo, estos revivigitaj kaj metitaj antaû la juĝo (Ap 20:5, 11-15).

g. La pekuloj el ili estos neniigitaj, sed la justuloj aliĝos al ni kaj havos eternan vivon.

Ekde tiam la celo de Dio rilate al la tero estos plenumita. La tero estos plenigita de senmortaj justaj estaĵoj. Tiam fakte efektiviĝos la nomo de Dio "Jahve Elohin", signifanta "Tiu, kiu aperos inter potenculoj". Peko kaj, sekve, morto neniam plu ekzistos sur la tero. Tiam plene efektiviĝos la promeso, ke la semo de la serpento estos neniigita per la frapo al ĝia kapo (Gen 3:15). Dum la Jarmilo reĝos Kristo, ĝis "li metos ĉiujn malamikojn sub siajn piedojn. "La lasta neniigota malamiko estas la morto... kiam ĉio estos submetita al li, tiam la Filo ankaû mem estos submetita al Tiu, kiu submetis ĉion al li, por ke Dio estu ĉio en ĉio" (1 Kor 15:25-28). "Poste venos la fino, kiam li transdonos la reĝecon al Dio, al la Patro" (1 Kor 15:24). Kio sekvos post tiu periodo, kiam Dio estos "ĉio en ĉio" ne estas dirite al ni; ni scias nur, ke ni havos eternan vivon, la naturon de Dio kaj ni vivos por glori kaj komplezi Dion. Ni povas nur konjekti kaj supozi pri tio, kio okazos post la Jarmilo.

Kompreno de "la Evangelio pri la Regno de Dio" estas vivgrave por savo de ĉiu leganto de tiuj ĉi linioj. Ni petegas, ke vi ankoraûfoje legu tiun ĉi ĉapitron, precipe atentante la versojn de la Biblio, aldonitaj en ĝi.

Dio volas, ke ni estu en Lia Regno. Lia celo estas en tio, ke ni aktive partoprenu la Regnon, ne nur rakontu pri Liaj kreaj scipovoj. Post baptiĝo ni heredas la promesojn rilate al la Regno. Estas malfacile kredi, ke baptiĝo kaj kelkaj sekvontaj jaroj de nia humila obeemo al la Dia vorto donos al ni eblecon eniri tiun gloran eternan vivon. Por tio necesas nur nia firma kredo je senlima amo de Dio. Neniuj problemoj de nia nuna vivo devas esti kialoj por nia rezisto al la voko de la Evangelio, ĉu ne?

"Se Dio estas por ni, kiu estas kontraû ni?" (Rom 8:31).

"La suferoj de la nuna tempo ne indas komparon kun la gloro, kiu estas malkaŝita al ni" (Rom 8:18).

"Nia malpeza kaj momenta sufero elfaras por ni, pli kaj pli ekster mezuro, eternan pezon da gloro" (2 Kor 4:17).

**KOMENTO 15: La Laûlitereco De La Regno**

Teologoj kaj membroj de diversaj konfesioj ofte primokas la priskribojn de la Regno en la profetaĵoj de la Malnova Testamento. Ili diras, ke la lingvo de la priskriboj estas figura kaj la loko por la rekompenco devas esti ie, sed ne sur la tero, ĉar nia planedo pereos en la fajro.

Al tio ni respondas, ke necesas kompreni la ĉefan regulon de Biblia studo – akcepti enhavon de la Biblio laûlitere, krom tiuj lokoj, kie estas indikoj pri spiritaj interpretoj. Ekzemple, la unua verso de la Apokalipso diras al ni, ke la vizio estas simbola (Ap1:1), kaj ni devas kompreni ĝin simbole. La lingvamaniero mem ankaû ofte indikas, kiel necesas kompreni la vortojn – simbole aû laûlitere. Kiam ni legas, ke "ŝanceliĝas la tero kiel ebriulo" (Jes 24:20), estas klare, ke tio estas la simbola priskribo. Kontraste al tio, la lingvo, uzata por priskribi la estontan Regnon, estas facila por laûlitera konpreno, kaj forestas tie ia aludo, ke ni devas kompreni ĝin simbole.

Pro tio, ke multaj ne kapablas percepti kaj en sufiĉa grado kredi, ke tiu tempo reale venos sur la teron, ili elpensis multe da teorioj, kontrastaj al la vera doktrino. Iliaj alternativaj ideoj pri spirita aû ĉiela regno estas malklaraj kaj ne enhavas detalajn informojn, la menso perceptas ilin malfacile, kaj mankas en ili neceso de forta kredo. Se la priskriboj, dirantaj pri lamaj homoj, kiuj estos resanigitaj, aû pri dezertoj, kiuj fariĝos fekundaj, estas simbolaj, oni povas demandi: "Kion ili simbolas?". Tiuj ĉi eltiraĵoj priskribas la Regnon de Dio. Se ni ne estas certaj, kion ili simbolas, ni ne scias la Evangelion ("bonajn novaĵojn") pri la Regno, kaj tial ne povas esperi pri iu loko en ĝi. Krom tio, el la prezentitaj citaĵoj necesas klare kompreni, ke Dio havas celon establi eternan vivon por la homaro ĉi tie, sur la tero. Li ne detruos la planedon, kiun Li promesis poreterne al la semo de Abraham. Tial ni konkludas, ke la Regno, kiu venos ĉi tien, sur la teron, estas priskribita en la Biblio laûlitere. La sekvantaj citaĵoj konfirmas tion:

> "Li (Dio) ĝin (la teron) aranĝis... Li faris ĝin por ke ĝi estu loĝata" (Jes 45:18). La kreo de la tero estus <u>*vana*</u>, se Dio planas detrui ĝin, sed kontraûe, Dio celas fari ĝin enloĝata de senmortemaj homoj.
>
> "La tero restas eterne" (Pred 1:4)
>
> "Li starigis ilin (la planedojn de la suna sistemo) por ĉiam, por eterne; Li donis leĝon, kiun ili ne malobeos" (Ps 148:6).

La miljaran daûron de la regno, priskribita en Ap 20:4, necesas kompreni ankaû laûlitere, por ne rompi la harmonion kun aliaj profetaĵoj pri la esenco de tiu ĉi periodo. Estas interese, ke en Heb 4:4-9 la Jarmilo estas priskribita kiel Sabato, la tago de ripozo. Kun la Sinjoro "unu tago estas kiel mil jaroj" (2 Pet 3:8). Post ses "tagoj" de laboro de Dio pri la tero, venos la Sabata tago, la Jarmilo.

Laû la Biblio, la 6000-jara periodo (t. e. ses tagoj) finiĝos ĉirkaû la jaro 2000 de nia epoko (t. e. la kreado okazis ĉirkaû 4000 jaroj AK). Tio signifas, ke la komenco de la Jarmilo devas esti ĉirkaû la jaro 2000 PK. La tempo estas tre limigita por ĉiu el ni. Atendante la baldaûan revenon de Kristo ni devas uzi ĉiun momenton de nia mallonga vivo por prepari nin al lia alveno.

**KOMENTO 16: Ĝeneraligo de la historio de Izrael**

**Abraham** estis elvokita el la Ĥaldea urbo Ur; la unua hebreo. Dio promesis al li kaj al lia semo la landon Kanaan. Li mortis ne ricevinte la promesitan landon.

**Isaak.** Abraham estis preta oferdoni sian filon Isaak. Pro tio, ke Abraham estis fidela, Dio konfirmis Siajn promesojn al li per ĵuro. La preteco de Isaak morti, obeante al la ordono de sia patro, indikas, ke li estas pratipo de Kristo. La promesoj estis donitaj ankaû al Isaak (Gen 26:3-5).

**Jakob** estis la filo de Isaak. La promesoj estis ripetitaj ankaû al Jakob. Li havis dek du filojn – Ruben estis la plej aĝa, Benjamen estis la plej juna. Levi estis tiu, de kiu devenis la pastroj. La plej amata filo de Jakob estis Jozef.

**Jozef.** Dum sia infaneco li dufoje sonĝis, ke li estros siajn fratojn. Pro ĵaluzo ili vendis lin, kiel sklavon, en Egiptujon. Tie li fariĝis reganto kaj organizis la konservadon de greno, pli poste li uzis ĝin dum sep jaroj de malsato, kiuj trafis tiun regionon. Dum tiu tempo Jakob kaj liaj filoj transloĝiĝis en Egiptujon al Jozef. Ili kaj iliaj posteuloj loĝis en Goŝen, landparto de Egiptujo. Pli posta Faraono persekutis la popolon de Izrael, farinte ilin sklavoj.

**Moseo** naskiĝis en tiu tempo. Por savi la bebon, lia patrino kaŝis lin en kanoj, kie lin trovis la filino de Faraono kaj ŝi adoptis lin. Kiam Moseo estis jam plenkreska, li mortigis egiptanon, kiu batis hebreon. Pro tio li estis devigita eskapi en la landon Midjan, kie li dum 40 jaroj paŝtis ŝafojn de Jitro. Tiam Dio rivelis Sin al li el flamanta arbusto. Dio ordonis al li iri al Faraono kaj peti liberigon por la Izraelidoj. Por pruvi, ke li efektive estas sendita de Dio, al li estis donita la povo fari miraklajn signojn. Sed Faraono ne forliberigis la

Izraelidojn kaj pro tio al Egiptujo estis senditaj dek plagoj, inter kiuj estis: ranoj, mallumo, hajlo kaj la lasta estis la morto de ĉiuj virgenraj unuanaskitoj de egiptanoj. La Izraelidoj devis mortigi ŝafidojn kaj per ilia sango surŝprucigi la pordojn de siaj domoj. Tio indikas al ni, ke la sango de Kristo povas savi nin de morto. Tiu tago estas konata nun kiel la festo Pasko.

**Eliro.** Fine al la Izraelidoj estis permesite forlasi Egiptujon. Ili iris, gvidataj per la Dia anĝelo en nuba kolono tage kaj fajra kolono nokte. La armeo de Faraono postkuris ilin ĝis la Ruĝa maro. La akvo de la maro disfendiĝis por doni la vojon al la Izraelidoj, kaj poste la akvo revenis sur sian lokon, forglutante postkurantajn egiptojn. La Izraelidoj daŭrigis sian iradon al la promesita lando Kanaan. Dio donis al ili el roko akvon por trinki kaj ĉiumatene al ili estis donita manĝo enforme manao. Kiam ili atingis la monton Sinaj, tiam Dio donis al ili dek ordonojn kaj la leĝon de Moseo. Dio ordonis al la Izraelidoj konstrui specialan tendon, tabernaklon, kie ili povus preĝi kaj adori Dion. Al ili estis donitaj pastroj kaj ĉefpastro, por akcepti oferdonojn al Dio. Ĉiuj detaloj de la tabernaklo kaj pastreco estas prafiguroj de Kristo.

**La promesita lando** estis finfine atingita. Al ĝi estis senditaj 12 esplorrigandantoj, dek el ili revenis kaj diris, ke estos tre malfacile ekposedi tiun landon Kanaan. Sed la aliaj du Josuo kaj Kaleb diris la veron – ke oni povas ekposedi tiun landon, se estas fido al la promesoj de Dio. Tamen homoj preferis kredi al dek esplorrigardintoj kaj pro tio la Izraelidoj estis kondamnitaj migri en la dezerto dum 40 jaroj, ĝis mortis ĉiuj tiuj, kiuj havis pli ol dudekjaran aĝon, kiam ili foriris el Egiptujo.

**Josuo** estis posteulo de Moseo, kaj li alvenigis Izraelon al la lando Kanaan. La unua urbo, kiun posedis la Izraelidoj estis Jeriĥo, kie loĝis Raĥab, poste ili ekposedis Ajon.

**Juĝistoj.** Kiam la Izraelidoj enloĝiĝis en tiun landon, ilin regis juĝistoj, sed reala ilia reganto estis Dio. Inter la juĝistoj estis Gideon, Jiftaĥ kaj Ŝimŝon. Ĉiuj ili liberigis Izraelon de ĝiaj malamikoj, kiuj invadis ĝin pro pekoj de la Izraelidoj antaŭ Dio. La historio de Izrael abundas de pruvoj, ke la Izraelidoj multfoje malobeis Dion, kaj pro tio estis punitaj de Dio pere de invadoj de najbaraj popoloj. Post ilia pento Dio liberigis ilin, sed ili pekadis denove. La lasta juĝisto estis Samuel. En lia tempo la popolo de Izrael rifuzis Dion kiel ilia Reĝo kaj petis al si homan reĝon, kiel ĉe najbaraj popoloj.

**La Reĝoj.** Ilia unua reĝo estis Saul, kiu bone komencis sian regadon, sed pli poste fariĝis senmorala, kaj li malobeis la ordonojn de Dio kaj persekutis

Davidon. Post la morto de Saul Izraelon regis David, kiu estis unu el la plej bonaj reĝoj de Izrael. Dio donis al li grandan promeson. Post David Izraelon regis lia filo Salomon, kiu post la bona komenco estis forkliniĝinta de la vera kredo pere de siaj multnombraj alinaciaj edzinoj. Post lia morto la regno estis dividita je du partoj – dek triboj fariĝis la regno Izrael, kiun dekomence regis Jerobeam; la aliaj du triboj de Jehuda kaj Benjamen fariĝis la regno de Jehuda, kiun regis Reĥabeam, la filo de Salomon.

La regno Izrael (dek triboj) ne havis bonajn reĝojn. Ĉiame ili malobeis Dion. Dio sendis al ili multe da profetoj, kiuj alvokis ilin penti, sed ili ne volis aŭskulti la profetojn, kaj pro tio la asirianoj invadis ilian landon, forkaptis ilin kaj dispelis ilin tra la tuta mondo.

La regno de Jehuda (du triboj) havis kelkajn bonajn reĝojn (ekzemple, Asa, Ĥizkija), sed ankaŭ ili ne ĉiam obeis Dion, kaj tial la babelanoj estis senditaj invadi kaj forkapti ilin en Babelon por 70 jaroj. De tiam la judoj neniam havis reĝon. Post 70 jaroj kelkaj el ili revenis al la lando Izrael gvidataj de Ezra, Neĥemja, Josuo (la ĉefpastro en tiu tempo) kaj Zerubabel, ilia estro. Dekomence ili estis sub la regado de Persujo, poste – Grekio kaj fine de Romo. Izrael estis sub la regado de Romo, kiam naskiĝis Jesuo. Pro tio, ke la hebreoj malakceptis Jesuon, Dio sendis la romanojn detrui Jerusalemon en la jaro 70 PK, kaj la hebreoj estis dispelitaj el la lando Izrael.

Dum la lastaj jardekoj la hebreoj iom-po-iom komencis revenadi al la lando – tiel parte plenumiĝas la profetaĵoj de la Malnova Testamento. Restarigo de la ŝtato Israelo estas vera signo, ke Jesuo baldaŭ revenos por restarigi la Regnon de Izrael, kiel la Regno de Dio.

### ĈAPITRO 5: Demandoj

1. Kiam estos establita la Regno de Dio?
    a) Ĝi estas jam establita
    b) Ĉe la reveno de Kristo
    c) Ĝi estis establita en la tago de Pentekosto de la unua jarcento
    d) Ĝi estas en la koroj de kredantoj ĉe ilia konvertiĝo

2. Ĉu ekzistis la Regno de Dio en la pasinteco? Se – jes, kiaforme?

3. Kiam ĝi ĉesis ekzisti?

4. Kio estas la Jarmilo?

    a) Regado de graco en niaj koroj
    b) Jarmila regado de la kredantoj en la ĉielo

c) Jarmila regado de Satano sur la tero
d) La unua milo da jaroj de la estonta Regno de Dio sur la tero.

5. Kia estos la Regno?

6. Kion faros la nunaj kredantoj dum la Jarmilo?
   a) Regos la mortemajn homojn
   b) Regos en la ĉielo
   c) Ni ne scias
   d) Vivados sur alia planedo

7. La mesaĝo pri la Regno de Dio estis predikita:
   a) Nur en la Nova Testamento
   b) Nur de Jesuo kaj la apostoloj
   c) En la Malnova kaj en la Nova Testamentoj
   d) Nur en la Malnova Testamento

# ĈAPITRO 6

# DIO KAJ MALBONO

Formatted: Indent: First line: 1.48 cm, Space Before: 12 pt, Tab stops: Not at 2.57 cm

## 6.1 DIO KAJ MALBONO

Multaj kristanoj kaj ankaû homoj de aliaj religioj kredas, ke ekzistas iu estaĵo, nomata diablo aû satano, kiu estas organizanto de ĉiuj problemoj en la mondo kaj en niaj vivoj, kaj kiu estas respondeca pri la pekoj, kiujn ni faras. La Biblio instruas, ke Dio estas ĉiopova. El ĉapitro 1.4 ni scias, ke la anĝeloj peki ne povas. Se ni sincere kredas al tio, ni komprenas, ke estas neebla ekzistado de iuj ajn supernaturaj estaĵoj en la universo, kiuj opozicias al la ĉiopova Dio. Se ni kredas, ke tiaj estaĵoj fakte ekzistas, ni metas en dubon la superecon de la ĉiopova Dio. Ĉi tiu temo estas tre grava, kaj ĝustan komprenon pri la diablo kaj satano necesas konsideri, kiel eksterordinare gravan doktrinon. Heb 2:14 diras, ke Jesuo neniigis la diablon per sia morto; se ni ne havas ĝustan komprenon pri la diablo, ni ne povas kompreni la agojn kaj la naturon de Kristo.

En la mondo, precipe en la kristana mondo, estas disvastigita opinio, ke ĉio bona en vivo venas de Dio, kaj ĉio malbona - de la diablo aû satano. Tiu ĉi ideo ne estas nova; kaj ĝi karakterizas ne nur apostatan kristanismon. Ekzemple, babelanoj kredis, ke estas du dioj: dio de bono kaj lumo kaj dio de malbono kaj mallumo; tiuj du dioj ĉiame militas unu kontraû la alia. Ciro, la reĝo de Persujo, opiniis same. Tial Dio diris al li: “Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas alia; ne ekzistas Dio krom Mi... kiu faras lumon kaj kreas mallumon, faras pacon kaj estigas malbonon; Mi, la Eternulo, faras ĉion ĉi tion” (Jes 45:5-7, 22). Dio kreas pacon kaj Li kreas malbonon aû malfeliĉon. Dio estas la aûtoro, la kreinto de “malbono” ĉi-sence. Kaj en tiu ĉi senco estas diferenco inter “malbono” kaj peko, kiun faras homo - peko eniris en la mondon de homo, sed ne de Dio (Rom 5:12).

Dio diris al Ciro kaj la popolo de Babel, ke “ne ekzistas Dio krom Mi”. La hebrea vorto “el”, tradukita kiel “Dio”, fakte estas “forto” aû “fonto de povo”. Dio diras ĉi tie, ke ne ekzistas alia fonto de povo krom Li. Ĝuste pro tio vera kredanto je Dio ne povas akcepti la ideon pri supernatura diablo aû demonoj.

### Dio: La kreinto de malfeliĉoj

La Biblio havas multe da ekzemploj pri tio, ke Dio portas "malbonon" en la vivon de homoj kaj en la mondon. Am 3:6 diras, ke se estas malbono en urbo, tion faris la Eternulo. Por ekzemplo, se en urbo okazas tertremo, homoj diras, ke tion faras "la diablo", sed la vera kredanto devas kompreni, ke Dio estas tiu, kiu respondecas pri tio. Miĥa 1:12 diras: "Malfeliĉo venis de la Eternulo al la pordego de Jerusalem". En la libro de Ijob ni legas, ke Ijob, virta homo, perdis ĉion, kion li posedis en tiu ĉi vivo, kaj ke malfeliĉoj venas al homo sendepende de tio, ĉu estas li virta aŭ ne. Ijob agnoskis, ke "la Eternulo donis kaj la Eternulo prenis" (Ijob 1:21). Li ne diris "La Eternulo donis kaj satano prenis". Li klarigis al sia edzino: "Ĉu bonon ni akceptu de Dio, kaj malbonon ni ne akceptu?" (Ijob 2:10). En la fino de tiu libro liaj amikoj konsolas lin "pri la tuta malbono, kiun la Eternulo venigis sur lin" (Ijob 42:11; kmp. 19:21; 8:4). Tiele, Dio estas la fonto de "malfeliĉoj" tiusence, ke Li estas nia fina juĝisto, kiu decidas problemojn de nia vivo.

"Ĉar kiun la Eternulo amas, tiun Li punkorektas... Se vi suferas punon... sed poste ĝi donas la pacplenan frukton de justeco" (Heb 12:6-11). Tiuj vortoj montras, ke malfeliĉoj, kiujn Dio sendas al ni, fakte kondukas nin al nia spirita kresko. Tiuj vortoj kontraŭus al si mem, se la diablo estus estaĵo, kiu devigas nin peki kaj esti maljustaj, kaj samtempe alportas problemojn en nian vivon, kiuj kondukas al evoluo de "pacplena frukto de justeco". La ortodoksa ideo pri la diablo kondukas al seriozaj problemoj. Precipe estas malfacile ĉi okaze kompreni tiujn citojn, kiuj diras, ke homo estas kondukita al satano "por ke la spirito saviĝu" aŭ "por ke ili lernu ne blasfemi" (1 Kor 5:5; 1 Tim 1:20). Se satano estas reala estaĵo, deviganta homojn peki, kaj negative influanta al ilia spirita vivo, kial do ĉi okaze tiuj citoj parolas pri satano pozitive? La respondo estas en tio, ke "satano" aŭ malfacilaĵoj en la vivo ofte kondukas al pozitiva rezulto en la spirita vivo de kredantoj.

Se ni akceptas, ke malbono venas de Dio, ni povas preĝi al Dio kaj peti Lin forpreni niajn problemojn. Se Li ne faras tion, ni scias, ke ili estas senditaj de Dio por nia spirita plibonigo. Se ni kredas, ke estas malbona estaĵo, nomita diablo aŭ satano, kiu alportas al ni problemojn, ĉi okaze ni ne havas eblecon interrilati kun li. Perdon de fortoj, malsanojn, subitan morton aŭ plagojn ni devas percepti kiel malsukcesojn. Se la diablo estas iu plenpotenca, pekema anĝelo, li estas pli forta, ol ni, kaj ni ne havas elekton kaj devas suferi en liaj manoj. Male, ni konsoliĝas, ke sub la kontrolo de Dio "ĉio kunlaboras al bono" por la kredantoj (Rom 8:28). Tial por kredantoj ne ekzistas tiu nocio, kiel "bonŝanco".

**La origino de peko**

Necesas emfazi, ke peko devenas de ni mem. Tio estas nia difekto, ke ni estas pekemaj. Certe, estus pli agrable kredi, ke ni ne respondecas pri niaj pekoj. Ni povus peki kaj pravigi nin mem, ke pri io de ni farita respondecas la diablo. Ne estas mirinde, ke pekuloj ofte pravigas sin, dirante, ke en momento de sia misfaro aŭ eĉ krimo, ilin posedis la diablo, kaj pro tio ili ne povas respondeci pri la farita de ili. Tute ĝuste, tiun pretekston oni ignoras kaj kulpuloj ricevas laŭ siaj "meritoj".

Ni devas memori, ke "la salajro de peko estas morto" (Rom 6:23); peko kondukas al morto. Se opinii, ke ni ne respondecas pri niaj pekoj, ke respondecas la diablo, ĉi okaze justa Dio devas puni la diablon, ne nin. Tamen, tiu fakto, ke pro niaj pekoj juĝataj estas ni, montras, ke respondecas pri ili ni mem. La ideo, ke pro niaj pekoj respondecas la diablo, iu estaĵo ekster ni, celas pravigi nin pro faritaj de ni pekoj. Ĉi tio estas ankoraŭ unu ekzemplo de tio, kiel homoj malakceptas la Biblian instruon pri la naturo de homo.

"Ekzistas nenio, kio, enirante en homon de ekstere, povas lin profani;... ĉar de interne, el la koro de homoj, eliras malvirtaj pensoj, malĉastaĵoj, ŝteloj, mortigoj... aroganteco, malsaĝeco; ĉiuj tiuj malbonoj elvenas de interne kaj profanas la homon" (Mk 7:15, 21-23). La ideo pri ekzisto de io peka ekstere ni, kiu eniras internen de ni kaj devigas nin peki, estas nekunigebla kun la klara instruo de Kristo. Elinterne de ni, el la koro de homo, eliras ĉiuj tiuj ĉi malvirtaj pensoj. Kaj ĝuste pro tio dum la diluvo Dio diris, ke "la penso de la homa koro estas malbona jam de lia juneco" (Gen 8:21). Jak 1:14 diras, kiel ni estas tentataj: "Ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia dezirado, kaj delogata". Ni estas tentataj per nia propra volupto; per niaj propraj pekaj deziroj, sed ne per iu, kiu estas ekstere de ni. Jakobo demandas: "De kie militoj, kaj de kie bataloj inter vi? Ĉu ne de viaj voluptoj?" (Jak 4:1). Ĉiu el ni havas karakterajn personajn tentojn. Ili naskiĝas de niaj propraj malbonaj deziroj kaj apartenas nur al ni. Kaj tute juste oni diras, ke ni estas la plej malbona malamiko por ni mem.

La libro "Al la Romanoj" diras ĉefe pri peko, ĝia deveno kaj kiel superi ĝin. Estas tre grave rimarki, ke en tiu ĉi libro la diablo kaj satano estas menciitaj tre malofte, kaj dirante pri la deveno de peko, Paŭlo tute ne mencias ilin. La sama koncepto pri "la diablo" estas en la Malnova Testamento. Se estus iu ekstera estaĵo, kiu devigas nin peki, certe, en la Malnova Testamento ĝi nepre estus menciita. Sed tie pri ĝi estas dirite nenio. La skribo de la periodo de Juĝistoj aŭ de Izrael en la dezerto montras, ke en tiu tempo Izrael multe pekis. Tamen Dio ne avertis ilin pri iu potenca supernatura estaĵo aŭ forto, kiu povus eniri en ilin kaj devigi peki. Anstataŭ tio, Li persvadis ilin konfidi al Lia vorto

kaj sekvi Lian vojon, ne la vojon de ilia propra karno (ekzemple, Read 27:9,10; Jos 22:5).

Paûlo lamentas: “en mi (t. e. en mia karno) bono ne loĝas... Ĉar la bonon, kiun mi volas fari, mi ne faras; ... se mi faras tion, kion mi ne volas fari, faras ĝin jam ne mi, sed la peko, loĝanta en mi (Rom 7:18-21). Li ne transmetas sian kulpon sur iun eksteran estaĵon, nomitan la diablo. Li skribas pri sia propra malbona naturo, kiel pri la reala fonto de peko: “faras ĝin jam ne mi, sed la peko, loĝanta en mi. Mi do trovas leĝon, ke kiam mi volas fari bonon, la malbono estas ĉe mi”. Tion, kio opozicias al la spirita esenco de homo, Paûlo nomas “peko”, loĝanta en li. Al la sama konkludo venos ĉiu pensanta, spiritriĉa persono. Necesas diri, ke eĉ tia nesuperita kristano kiel Paûlo ne spertis ian ŝanĝon de naturo post sia konvertiĝo, nek li eniris en staton, en kiu li ne pekis kaj ne povis peki. La adeptoj de la nuntempa “evangelia” movado opinias sin en privilegia stato, kaj alkalkulas Paûlon al la vico da nesaviteblaj pro liaj vortoj, diritaj en Rom 7:15-21.

Alia sendube justa persono, David, same diris: “Mi estas ja naskita en krimo; Kaj en peko gravediĝis per mi mia patrino” (Ps 51:5). La Biblio tute klare diras pri la pekemeco de la homa naturo. Se tion ĝuste kompreni, ne estos necese elserĉi iun imagatan personon ekster ni, kiu respondecas pri niaj pekoj. Jer 17:9 diras, ke la koro de homo estas malica kaj nefidinda kaj ni ne povas imagi la profundon de ĝia pekeco. Kaj ne povas esti pli klara teksto, ol en Pred 9:3: “la koro de la homidoj estas plena de malbono”. En Ef 4:18 ni legas, ke homoj deflankiĝas de Dio pro “la nescio, kiu estas en ili, pro malmoleco de ilia koro”. Pro nia spirita blindeco, pro niaj malmolaj koroj, nia pensmaniero forigas nin de Dio. En Gal 5:19 estas dirite pri niaj pekoj kiel pri “la faroj de la karno”, t. e. nia propra karno, nia esenco kaj naturo devigas nin peki. Neniu el tiuj ĉi citaĵoj diras pri la deveno de peko, kvazaû ĝi estis enmetita en ni per la diablo; pekemeco estas io, kion ni posedas denature, ekde nia naskiĝo; ĝi estas fundamenta elemento de la homa naturo.

## 6.2 LA DIABLO KAJ SATANO

En la Biblia teksto oni povas renkonti vortojn, kiuj ne estas tradukitaj. Ekzemple, la aramea vorto “Mamono” en Mt 6:24. La hebrea vorto “satano” estas ankaû netradukita, ĝi signifas kontraûulon. La vorto “diablo” devenas de la greka “diabolos”, kiu signifas mensogulon, malamikon aû kalumniulon. Se ni kredas, ke satano kaj la diablo rilatas al iu estaĵo ekstere de ni, kiu devigas nin peki, tiam ni, renkontante en la Biblio tiujn vortojn, atribuos ilin al tiu peka

estaĵo. La Biblia uzado de tiuj vortoj montras, ke ili povas esti ordinaraj adjektivoj por priskribi ordinarajn homojn. Ĉi tiu fakto pruvas, ke la vortoj "diablo" kaj "satano", kiel ili estas uzataj en la Biblio, ne povas rilati al iu malbona persono aŭ estaĵo, kiu estas ekstere de ni.

### La Vorto "Satano" En La Biblio

En 1 Reĝ 11:14 ni legas: "Kaj la Eternulo aperigis kontraŭulon (la sama hebrea vorto, tradukita kiel "satano") kontraŭ Salomono, Hadadon, la Edomidon". "Dio starigis kontraŭ li ankoraŭ kontraŭulon (alian satanon), Rezonon... Kaj li estis kontraŭulo de la Izraelidoj" (1 Reĝ 11:23,25). Tio ne signifas, ke Dio kreis ian supernaturan personon aŭ anĝelon por esti satano (kontraŭulo) kontraŭ Salomono; Li estigis ordinarajn homojn. Mt 16:22,23 donas alian ekzemplon. Petro provis malkonsili Jesuon iri en Jerusalemon por morti tie sur la kruco. Jesuo turnis sin kaj diris al Petro: "Iru malantaŭ min, Satano; vi estas faligilo por mi, ĉar vi havas pensojn ne laŭ Dio, sed laŭ homoj". Petro ĉi tie estas nomita satano. Tiuj versoj kristale klare montras, ke Jesuo parolis ne kun anĝelo aŭ iu monstro, sed kun Petro.

Pro tio, ke la vorto "satano" signifas nur kontraŭulon, ĉiu homo kaj eĉ Dio Mem ankaŭ povas esti nomita satano. Laŭ sia esenco tiu vorto enhavas nenion pekan. La peka kunsignifo de la vorto "satano" estiĝas parte kaŭze de nia propra pekema naturo, kiu estas nia la plej granda "satano" aŭ kontraŭulo, kaj parte pro tio, ke ĝi tutmonde asociiĝas kun peko. Dio Mem povas esti satano por ni, ĉar Li alportas malfeliĉojn en niajn vivojn, kaj malhelpas al ni iri laŭ vojo, kiu povas esti malbona. Sed se ni nomas Dion satano, tio ne signifas, ke Li Mem estas "pekema".

La libroj de Samuel, kaj Kronikoj estas paralelaj, sed ne identaj raportoj pri la samaj incidentoj, same kiel la kvar evangelioj. En 2 Sam 24:1 ni legas, ke "Dio incitis Davidon" kalkuli Izraelon. La paralela priskribo en 1 Kron 21:1 diras tiel: "Satano leviĝis kontraŭ Izraelon kaj instigis Davidon kalkuli Izraelon". En unu citaĵo Dio incitis Davidon kalkuli Izraelon, sed en la alia tion faras satano. Ununura konkludo, kiun oni povas fari en tiu ĉi okazo, estas tio, ke Dio agis rilate al David kiel "satano" aŭ kontraŭulo. La saman Dio faris al Ijob, sendante malfacilaĵojn en lian vivon. Kaj Ijob diris pri Dio: "Vi fariĝis kruelulo por mi; Per la forto de Via mano Vi montras al mi Vian malamon" (Ijob 30:21); alivorte, li diris: "Vi agas kontraŭ mi kiel satano".

### La Vorto "Diablo" En La Biblio

Same la afero statas pri la vorto "diablo". Jesuo diris: "Ĉu mi ne elektis vin la dek du (disĉiploj), kaj unu el vi estas diablo? Li parolis pri Judas Iskariota", kiu estis ordinara mortema homo. Li ne diris pri iu estulo kun kornoj aŭ pri, tiel nomata, spirita estaĵo. La vorto "diablo" rilatas ĉi tie simple al pekema homo. 1 Tim 3:11 donas alian ekzemplon: "Virinoj ankaŭ devas esti seriozaj, ne kalumniantoj..."; tie ĉi la origina greka vorto estas "diabolos", la sama vorto, kiu aliloke estas tradukita kiel "diablo". Kaj Titon Paŭlo avertas per tiuj vortoj: "la maljunulinoj tiel same estu je sintenado respektemaj, ne kalumniantoj" aŭ "diabloj". La saman li diras al Timoteo (2 Tim 3:1,3): "en la lastaj tagoj... homoj estos... kalumniemaj (diabloj)". Tio ne signifas, ke homaj estuloj aliformiĝos kaj iĝos supernaturaj estaĵoj, sed ke ili iĝos pli pekemaj. Tiuj faktoj donas klaran komprenon, ke la vortoj "satano" kaj "diablo" tute ne signifas falintan anĝelon aŭ pekeman estaĵon ekstere de ni.

### Peko, Satano Kaj Diablo

La vortoj "satano" kaj "diablo" estas uzataj aligorie por priskribi niajn naturajn pekajn inklinojn (vidu 6.1), kiuj estas nia ĉefa "satano" kaj kontraŭulo. Ili povas esti personigitaj kaj en tiu okazo povas signifi "diablon" - nian kontraŭulon, kalumnianton. Tial la vera diablo estas nia interna "homo", nia "mi". La konekso inter la diablo kaj niaj malbonaj deziroj - pekeco ene en ni – klare videblas en kelkaj citaĵoj: "Ĉar do la infanoj (ni) partoprenas en sango kaj karno, li (Jesuo) ankaŭ mem egale partoprenis en ili, por ke per (sia) morto li neniigu tiun, kiu havis la potencon de morto, tio estas la diablo" (Heb 2:14). La diablo ĉi tie estas priskribita, kiel estulo respondeca pri morto. Sed "la salajro de peko estas morto" (Rom 6:23). Sekve, peko kaj la diablo devas esti samsignifaj nocioj. Simile diras Jak 1:13, ke niaj malbonaj deziroj tentas nin al peko kaj, sekve, al morto; sed Heb 2:14 diras, ke morton alportas la diablo. La sama verso diras, ke Jesuo havis nian naturon por neniigi la diablon. Tamen en Rom 8:3 ni vidas: "Dio, sendante Sian propran Filon en simileco de peka karno (t. e. nia homa naturo) kaj pro peko, kondamnis la pekadon en la karno". Tio pruvas, ke la diablo kaj la pekaj inklinoj, kiuj karakterizas la homan naturon, fakte estas la samo. Estas vivgrave kompreni, ke Jesuo estis tentata ĝuste tiel, kiel ni. Miskompreno de la doktrino pri la diablo signifas, ke ni ne povas en deca grado taksi la naturon kaj agojn de Jesuo. Nur pro tio, ke Jesuo havis nian homan naturon - la "diablon" en si - ni povas havi esperon pri savo (Heb 2:14; 4:15). Superinte la dezirojn de sia propra naturo, la Biblian diablon, Jesuo sur la kruco povis neniigi la diablon (Heb 2:14). Se la diablo estus persono, li ne

ekzistus plu ekde tiu evento. Heb 9:26 diras, ke Kristo "aperis, por forigi la pekon per la ofero de si mem". Ankaŭ en Heb 2:14 estas dirite, ke per sia morto Kristo neniigis la diablon en si mem. Per sia morto Jesuo neniigis "la korpon de peko" (Rom 6:6), t. e. homan naturon, pekon, elmontritan en la formo de niaj korpoj.

"Kiu faras pekon, tiu estas la diablo" (1 Joh 3:8), ĉar peko estas la rezulto de cedo al nia propra naturo, al niaj malbonaj deziroj (Jak 1:14,15), kiujn la Biblio nomas "la diablo". "Por tio la Filo de Dio elmontriĝis, por ke li detruu la farojn de la diablo"(1 Joh 3:8). Se ni pravas, dirante, ke la diablo estas niaj malbonaj deziroj, do rezultoj de tiuj deziroj estas niaj pekoj. 1 Joh 3:5 tion konfirmas: "Li (Jesuo) elmontriĝis, por forigi pekojn". El tio sekvas, ke "pekoj" kaj "la faroj de la diablo" estas samsignifaj.

Agoj 5:3 donas alian ekzemplon de interligo inter la diablo kaj niaj pekoj. Petro diras al Ananias: "Kial Satano plenigis vian koron tiel, ke vi mensogas al la Sankta Spirito?". Ankaŭ en verso 4: "Kial do ĉi tiun faron vi celis en via koro?". Apero de io malbona en nia koro signifas la saman, ke satano plenigas nian koron. Se ni intencas fari ion malbonan, tio komenciĝas interne de ni. Se virino gravediĝas, tio komenciĝas interne de ŝi. Jak 1:14,15 uzas la saman aligorion por priskribi kiel niaj voluptoj naskas kaj kreskigas pekojn, kiuj alportas morton. Ps 109:6 egaligas pekan personon kun "satano": "Metu malvirtulon super lin; kaj kontraŭulo stariĝu ĉe lia dekstra mano", t. e. superos lin (kmp. 110:1).

**Personigo**

Certe do, vi povas diri: "Sed en ĉiuj tiuj lokoj pri la diablo estas dirite, kiel pri reala persono". Tio estas tute vere. Heb 2:14 diras, ke Jesuo neniigis "tiun, kiu havis la potencon de morto, tio estas la diablo". Eĉ supraĵa legado de la Biblio montras, ke estas ofte uzata la metodo de personigo, kiam temas pri abstrakta ideo. Tiel Sent 9:1 priskribas la virinon, nomitan "Saĝo", kiu konstruis sian domon; kaj Rom 6:23 komparas pekon kun persono, kiu pagas salajron en formo de morto. Pli detale tiu ĉi temo estos priskribita en Komento 5. Nia diablo, la "diabolos", ofte reprezentas niajn malbonajn dezirojn. Sed homo ne povas havi abstraktan diabolismon; la malbonaj deziroj, kiuj estas en la homa koro, ne povas ekzisti aparte de homo; pro tio "la diablo" estas personigita. Peko ofte estas personigita, kiel mastro (ekzemple, Rom 5:21; 6:6,17; 7:3). Certe, "la diablo" estas ankaŭ personigita kaj rilatas al peko. Tiel Paŭlo diras pri ni, ke ni estas disduigitaj personoj, kiujn enhavas nia karno

(Rom 7:15-21); kie la homo de la karno, “la diablo”, batalas kun la homo de la Spirito. Tamen memkompreneble, ke interne de ni ne ekzistas iuj du personoj, laûlitere batalantaj unu kontraû la alia. Tiu ĉi peka parto de nia naturo estas personigita, kiel “la malbono” (Mt 6:13) - la Biblia diablo. La sama vorto, tradukita el la greka, kiel “malbono”, signifas “malvirtulo” en 1 Kor 5:13, montranta, ke kiam persono cedas al peko, al sia malbona parto, li mem fariĝas la malbono, aû “diablo”.

### “Diablo” Kaj “Satano” En Politika Kunteksto

La vortoj “diablo” kaj “satano” estas ankaû uzataj por priskribo de la malvirta, pekema mondo, en kiu ni vivas. Pri la socia, politika kaj pseûdo-religia hierarkio de la homaro oni povas paroli kiel pri “la diablo”. La diablo kaj satano en la Nova Testamento ofte rilatas al la politika kaj socia potenco de la Hebrea aû Roma sistemoj. Ekzemple, en Ap 2:10 ni legas, ke la diablo ĵetas la kredantojn en malliberejon. Tio estas aludo al la Roma registaro, kiu malliberigas la kredantojn. En la sama kunteksto ni legas pri eklezio en Pergamo, kiu situis proksime de la loko, aû trono, de Satano, t. e. proksime de la loko, kie troviĝis registaro de Roma kolonio en Pergamo, kaj kie estis ankaû grupo da kredantoj. Ni ne povas diri, ke Satano mem, se li ekzistas, havis personan tronon en Pergamo.

Individua peko estas difinita, kiel faro kontraû la leĝo de Dio (1 Joh 3:4). Sed peko, esprimita kolektive, kiel politika kaj socia forto kontraû Dio, estas forto pli potenca, ol individuaj pekoj; estas tiu kolektiva potenco, kiun iufoje oni personigas, kiel multpovan estulon, nomitan la diablo. Ĉi sence Irano kaj aliaj islamaj landoj nomas Usonon “La granda Satano” - t. e. la granda kontraûulo de ilia afero en politika kaj religia senco. Tiel same la vortoj “diablo” kaj “satano” estas uzataj en la Biblio.

Fine necesas diri, ke por ĝusta kompreno de tiu ĉi temo, pli ol de iu ajn alia, estas vivgrave baziĝi sur ĝeneraligita konkludo, farita laû la tuta Biblio, ne konstrui sian komprenon, bazinte sin sur nur kelkaj versoj. Partojn 6.1 kaj 6.2 indas relegi atente kaj kun preĝo. La klarigoj, donitaj en ili helpos al ni pli ĝuste kompreni ĉiujn citaĵojn, kiuj rakontas pri la diablo kaj satano. Tiuj ĉi vortoj povas esti uzataj kiel ordinaraj adjektivoj, aû iuloke ili rilatas al la peko, kiu devenas de nia propra homa naturo. Kelkajn el la plej vaste miskomprenataj citaĵoj ni konsideros en Komentoj en la fino de tiu ĉi parto.

**Demonoj**

Ni jam montris, ke la diablo kaj satano ne estas iu estulo aŭ monstro. Se ni akceptas, ke tiu estulo ne ekzistas, sekve ne ekzistas ankaŭ demonoj, kiujn oni nomas servantoj de la diablo. Multaj homoj opinias, ke ĉion bonan en nia vivo donas Dio, kaj ĉion malbonan al ni donas la diablo kaj liaj servantoj, kiuj ankaŭ forprenas de ni bonon, donitan al ni de Dio.

La Biblio klare instruas nin, ke nur Dio estas la fonto de tuta potenco (vidu 6.1), kaj Li estas tiu, kiu respondecas pri ĉio bona kaj ankaŭ pri ĉio malbona en nia vivo:

> "Mi estas la Eternulo..., kiu faras lumon kaj kreas mallumon, faras pacon kaj estigas malbonon; Mi, la Eternulo, faras ĉion ĉi tion" (Jes 45:7).
>
> "Ĉar malfeliĉo venis de la Eternulo al la pordego de Jerusalem" (Miĥa 1:12).
>
> "Ĉu oni blovas per korno en urbo, kaj la popolo ne ektimas? Ĉu okazas malfeliĉo en urbo, se tion ne faris la Eternulo?" (Amos 3:6).

Tiele, kiam nin trafas malfacilaĵoj, ni devas kompreni, ke ili devenas de Dio, kaj ni ne devas akuzi pro ili iujn demonojn kaj la diablon. Ijob perdis ĉion bonan, kion Dio donis al li, tamen li ne diris: "Tiuj demonoj forprenis ĉion, kion Dio donis al mi". Ne, li diris jenan:

> "La Eternulo donis, kaj la Eternulo prenis; la nomo de la Eternulo estu benata" (Ijob 1:21).
>
> "Ĉu bonon ni akceptu de Dio, kaj malbonon ni ne akceptu?" (Ijob 2:10).

Se ni komprenas, ke ĉio estas de la Eternulo, ni, ricevinte malfacilaĵojn en nia vivo, povas preĝi al Dio, kaj peti Lin forigi ilin, kaj se Li ne faras tion, ni devas esti certaj, ke Li sendas ilin por korekti nian karakteron kaj por nia bono en la estonteco:

"Mia filo, ne malŝatu la punon de la Eternulo, Nek svenu, riproĉate de Li; Ĉar kiun la Eternulo amas, tiun Li (sed ne demonoj!) punkorektas, Kaj Li skurĝas ĉiun filon, kiun Li akceptas. Se vi suferas punon, kiel al filoj Dio rilatiĝas al vi; ĉar kia filo estas, kiun la patro ne punas? Sed se vi estas sen puno, en kiu ĉiuj fariĝas partoprenantoj, tiuokaze vi estas bastardoj, kaj ne filoj" (Heb 12:5-8).

## Dio: la fonto de ĉia potenco

Dio estas la fonto de ĉia potenco. La hebrea vorto, tradukita kiel "dio", signifas "potenco":

"Mi estas la Eternulo, kaj ne ekzistas alia; ne ekzistas Dio krom Mi" (Jes 45:5);

"Ĉu ekzistas Dio krom Mi? ne ekzistas Roko, Mi iun ne konas" (Jes 44:8);

"La Eternulo estas Dio, ke ne ekzistas alia krom Li (Read 4:35).

Similajn versojn ofte oni povas renkonti en la Biblio. Pro tio, ke Dio estas la fonto de ĉia potenco kaj sola Dio, Li estas, kiel Li ofte rememorigas al ni, severa Dio (ekzemple, El 20:5; Read 4:24).

Dio fariĝas severa, se Liaj homoj komencas kredi je aliaj dioj, dirante: "Vi estas granda Dio, ĉiopova Dio, sed ni ankaŭ kredas, ke ekzistas ankoraŭ bonaj dioj, krom Vi, kvankam ili estas ne tiom potencaj, kiel Vi". Similan eraron faris ankaŭ la Izraelidoj. Kaj la Malnova Testamento ofte priskribas, ke la hebreoj ĉagrenis Dion pro sia kredo je aliaj dioj. El la Biblio ni vidas, ke la "demonoj", pri kiuj homoj kredas eĉ nune, similas al tiuj falsaj dioj, kiujn adoris la Izraelidoj.

## Demonoj Kaj Idoloj

En 1 Kor Paŭlo klarigas, kial kristanoj ne devas adori idolojn nek kredi je io simila. En la Biblia tempo homoj kredis, ke demonoj estas malgrandaj dioj, kiujn necesas adori por ke ili neniigu malfacilaĵojn el homaj vivoj. Pro tio ili faris modelojn de demonoj - idolojn, kaj adoris ilin.

"Tion, kion oferas la nacianoj, ili oferas al demonoj kaj ne al Dio; kaj mi ne volas, ke vi partoprenu kun demonoj" (1 Kor 10:20, 28). Do, fakte idoloj kaj demonoj estas la samo. Atentu, ke Paŭlo diras: "ili oferas al demonoj kaj ne al Dio". El tio sekvas, ke demonoj ne estas dioj kaj ne havas iun realan potencon, ĉar estas nur unu Dio. Al tio klare indikas 1 Kor 8:4: "...ni scias, ke idolo estas neniaĵo en la mondo, kaj ke ne ekzistas Dio krom unu". Idoloj kaj demonoj ne ekzistas tute. Estas nur unu vera Dio, aŭ potenco, en la mondo.

Paŭlo daŭrigas en la versoj 5, 6: "Ĉar kvankam estas tiel nomataj dioj, ĉu en la ĉielo aŭ sur la tero, kiel estas dioj multenombraj, kaj sinjoroj

multenombraj (ĝuste tiel homoj kredas je diversaj demonoj hodiaû - unu demono okazigas perdon de laborloko, alia demono faras tiel, ke via edzino foriras de vi, kaj tiel plu). Tamen por ni estas nur unu Dio, la Patro, el kiu estas ĉio (bono kaj malbono)".

La alian konfirmon, ke homoj en la tempo de la Nova Testamento kredis je demonoj, idoloj aû diversaj dioj ni vidas en Ag 17:16-18, kie estas dirite, ke Paûlo predikis en Ateno - la urbo "idolplena", adoranta diversajn idolojn. Aûskultante predikon de Paûlo pri la Evangelio, homoj diris: "Li ŝajnas esti proklamanto de fremdaj (novaj) diaĵoj (demonoj); ĉar li predikis Jesuon kaj la releviĝon". Do, la aûskultantoj opiniis, ke "Jesuo" kaj "releviĝo" estas novaj idoloj. Se vi legos ĉi tiun ĉapitron ĝis la fino, vi vidos, kiel Paûlo instruas ilin pri la vero, nomante ilin "tro servemaj al diaĵoj", t. e. adorantoj de idoloj, kaj klarigante al ili, ke la vera Dio ne ĉeestas en iliaj idoloj aû demonoj. Ni jam scias, ke Dio estas la sola fonto de potenco. Kaj se Li ne ĉeestas en iliaj idoloj, sekve, idoloj ne havas iun ajn potencon, t. e. ili ne ekzistas.

### Demonoj – idoloj en la Malnova Testamento

En Ps 106:36-39 ni trovas, ke la Izraelidoj adoris "demonojn" same, kiel "idolojn":

> "Ili (la Izraelidoj) servis al iliaj idoloj, kaj ĉi tiuj fariĝis reto por ili. Kaj ili oferdonis siajn filojn kaj filinojn al demonoj; kaj ili verŝis senkulpan sangon, la sangon de siaj filoj kaj filinoj, kiujn ili oferdonis al la Kanaanaj idoloj... Kaj ili malpuriĝis de siaj faroj, kaj malĉastiĝis per siaj agoj".

Dio diras, ke adorante demonojn, la Izraelidoj malpurigis sin de siaj faroj, malĉastiĝis per siaj agoj, ĉar ilia kredo je demonoj estis rezulto de homa imago; kaj la idoloj, kiujn ili kreis, estis faritaĵoj de iliaj propraj manoj. Tiele, tiuj, kiuj kredas je demonoj nune, kredas je tio, kion elpensis kaj kreis homoj, sed ne je tio, kion instruas nin Dio.

Read 32:15-24 priskribas la koleron de Dio, kiam Lia popolo kredas je demonoj: "Ili (la Izraelidoj) incitis Lin per fremdaj dioj, per abomenaĵoj (siaj) ili kolerigis Lin. Ili alportis oferojn al diabloj, ne al Dio. Al dioj, kiujn ili ne konis, al novaj, antaû nelonge venintaj, pri kiuj ne pensis viaj patroj... Kaj Li diris: Mi kaŝos Mian vizaĝon for de ili ... Ĉar ili estas generacio perfida, infanoj, kiuj ne havis en si fidelecon. Ili incitis Min per ne-dio, kolerigis Min per siaj vantaĵoj... Mi amasigos super ili malfacilaĵojn; Miajn sagojn Mi ĉiujn eluzos kontraû ili". Dio nomas diablojn kaj diojn "abomenaĵo" kaj "vantaĵo", t.

e. donas al ili tiujn nomojn, kiuj ne signifas estaĵon, kaj sekve, je ili oni ne povas kredi, ĉar ili ne ekzistas. Adoro de dioj montras foreston de kredo je Dio. Certe, ne estas facile akcepti, ke Dio sendas al ni ne nur bonon, sed malbonon ankaŭ. Pli facile opinii, ke malbono venas de iu alia. Sed se ni kredas, ke ankaŭ malbono venas al ni de Dio, ni devas kredi, ke Dio povas depreni de ni tiun malbonon, aŭ ke tiu malbono iĝos por ni nemezureble granda graco en la estonteco.

### Demonoj En La Nova Testamento

Tamen vi povas diri, ke en la Nova Testamento estas lokoj, kiuj klare diras pri demonoj.

Antaŭ ĉio ni devas klare kompreni, ke la Biblio ne povas kontraŭdiri al si mem, ĉar ĝi estas la Vorto de la ĉiopova Dio. Se en ĝi estas klare dirite, ke Dio sendas al ni niajn problemojn kaj ke nur Li estas la fonto de ĉia potenco, en tiu okazo ĝi ne povas diri al ni, ke ankaŭ demonoj - malgrandaj dioj, kiuj kontraŭas al Dio - alportas al nia vivo la saman. La vorton "demonoj" oni povas renkonti en la Malnova Testamento nur kvarfoje, kaj ĉiufoje konekse al idoladoro, sed en la Nova Testamento oni povas renkonti ĝin multfoje. Ni sugestas, ke en tiu tempo, kiam la Evangelioj estis skribataj, homoj alskribis ĉiujn nekomprenitajn malsanojn al demonoj. Se demonoj reale ekzustus kaj kaŭzus niajn malsanojn kaj problemojn, ni povus renkonti menciojn pri tio en la Malnova Testamento. Tamen en ĝi ni povas legi pri demonoj nenion en tiu ĉi kunteksto.

Kiam ni legas, ke el iu estis forpelitaj demonoj, ni komprenas, ke estis kuracata iu mensa malsano de tiu homo, aŭ alia malsano, kiun oni ne povis kompreni en tiu tempo. Homoj, kiuj vivis en la unua jarcento, pri ĉio, kion ili ne povis kompreni, emis kulpi elpensitajn estaĵojn, nomitajn "demonoj". En tiu tempo, por homoj kun tiama nivelo de medicinaj scioj, mensaj malsanoj estis nekompreneblaj. Pri mensmalsanuloj homoj diris "lin posedas demono". En la tempo de la Malnova Testamento pri mensmalsanuloj homoj diris, ke ilin posedas malbona aŭ malpura spirito (Juĝ 9:23; 1 Sam 16:14; 18:10). La saman oni diris pri mensmalsanuloj ankaŭ en la tempo de la Nova Testamento: "Oni venigis al li (Jesuo) multajn demonhavantojn; kaj li elpelis la spiritojn per vorto, kaj sanigis ĉiujn malsanulojn; por ke plenumiĝu tio, kio estis dirita per la profeto Jesaja, nome: Li mem prenis niajn malfortaĵojn kaj portis niajn malsanojn" (Mt 8:16,17). Do, homaj malfortaĵoj kaj malsanoj signifis la samon, ke esti posedata de demonoj kaj malbonaj spiritoj.

Homoj opiniis Jesuon frenezulo, kaj diris, ke lin posedas demono: “Li havas demonon kaj estas freneza...” (Joh 10:20; 7:19,20; 8:52).

### Resanigo De Malsanuloj

Resanigitaj de “posedo de demonoj” homoj denove fariĝis “en sana prudento” (Mk 5:15; Lk 8:35;). Tial, esti “posedata de demonoj”, aŭ demonhavanta, signifis esti mense malsana. Tiuj, posedataj de demonoj, estis “resanigitaj” (Mt 4:24; 12:22; 17:18). De tio ni povas konkludi, ke demonposediteco estis speco de malsano. En Lk 10:9 ni legas, ke Jesuo forsendis sepdek siajn apostolojn al diversaj urboj por ke ili “sanigu tieajn malsanulojn” kaj la apostoloj tion faris. Kiam ili revenis, ili diris: “Sinjoro, eĉ la demonoj submetiĝas al ni per via nomo” (vidu v.17). Ankaŭ ĉi tie ni vidas, ke demonoj kaj malsanoj signifis la saman, kaj ke la apostoloj mem scipovis resanigi malsanulojn per la nomo de Jesuo (vidu Ag 3:6; 9:34).

### La Lingvo De Tiu Tempo

Tiele, ni vidas, ke en la Nova Testamento por priskribi iun malsanulon, havantan mensan malsanon aŭ alian nekonatan en tiu tempo malsanon, estis uzata la lingvo de tiu tempo, diranta pri tiuj malsanuloj, ke ilin posedas demonoj. En tiu tempo la grekoj kaj romanoj firme kredis, ke demonoj ne nur posedas la homojn, sed ankaŭ ili liveras mensajn malsanojn. Tiuj “kristanoj”, kiuj kredas, ke demonoj ekzistas, per tio fakte agnoskas paganajn nociojn, kiel verajn. La Biblio estis skribita en la lingvo de tiu tempo, por ke homoj povu kompreni ĝin. Tamen, se ĝi estis skribita en la lingvo de tiu tempo, tio ne signifas, ke ĝi aŭ Jesuo kredis je demonoj. En kelkaj lingvoj estas nocio “lunatiko”, per kiu oni priskribas tiun homon, kiu estas mense malsana. Laŭlitere tio signifas iun, kiu estas “difektita de la luno”. Antaŭ multaj jaroj homoj kredis, ke se iu promenas nokte dum plenluno, li povas ricevi frapon de la luno kaj malsaniĝi mense. Nuntempe ni ankaŭ uzas la vorton “lunatiko” por diri pri mense malsana homo, sed tio ne signifas, ke ni nune kredas, ke lia mensmalsano estas rezulto de influo de la luno.

Se supozi, ke skribitajn de ni vortojn, homoj legos post 2000 jaroj, se Jesuo dume ne revenos, ili povos konkludi, ke ni kredas, ke la luno estas kaŭzo de homa frenezeco, sed ili ne pravos, ĉar ni nur uzas niatempan lingvon, kiel faris Jesuo antaŭ 2000 jaroj. Simile al tio ni parolas pri la hereda malsano “Danco de Sankta Vitus”, kvankam ĝi ne estas danco, sed uzante niatempan

lingvon, ni nomas ĝin "Danco de Sankta Vitus". Estas klare, ke Jesuo naskiĝis ne la 25-an de decembro, sed homoj ĝis nun nomas tiun ĉi daton, kiel "Kristnaska tago". La nomoj de tagoj de la semajno devenas de pagana idoladorado. Ekzemple, lundo signifas "tago de la luno", mardo – tago de Marso, merkredo – de Merkurij kaj tiel plu. La uzado de ni nune de tiuj nomoj ne signifas, ke ni dividas la paganan religion de tiuj homoj, kiuj estis originaj kreantoj de nia nuntempa lingvo. La vorto "influenco" estas uzata nuntempe, kiel "gripo", sed ĝia ĝusta signifo estas "infektita de demonoj.

En la tempo de Jeĥezkel ekzistis mito, ke la lando de Izrael donas malfeliĉojn al tiuj, kiuj en ĝi loĝas. Certe, tio ne estis la vero, sed Dio, riproĉante la Izraelidojn, uzis la lingvon, kompreneblan por homoj: "Tiele diras la Sinjoro, la Eternulo: Pro tio, ke oni diras al vi: Vi formanĝas homojn, kaj vi seninfanigis vian popolon - pro tio vi nun ne plu manĝos homojn, kaj vian popolon vi ne plu seninfanigos, diras la Sinjoro, la Eternulo" (Jeĥ 36:13,14). Ekzistis en tiu tempo ankaŭ alia pagana mito, ke la maro estas granda monstro, kiu celas forgluti la teron. Kvankam tio estas evidente malvera, Dio uzis tiujn figurajn eldirojn por helpi al la unuaj legantoj percepti la prezentitan ideon (vidu Ijob 7:12; Jer 5:22; Ps 89:9; Ĥab 3:10; Mt 14:24; Mk4:30). Asiria mitologio nomis tiun maran ribelan monstron "Rahab", kaj la sama nomo estis donita al la mara monstro de Egiptujo en Jes 51:9.

Ĉar la Biblio estas inspirita de Dio, tute ne eblas, ke ĝi nur respegulas paganajn opiniojn, vaste uzatajn dum la tempo de ĝia kreado. Verŝajne, ke Dio intence uzis tiutempajn popolkredaĵojn por montri, ke Li estas la ununura fonto de potenco, ke Li estas Tiu, Kiu kontrolas la agojn de la mara "monstro" tiel, ke ĝi plenumu Lian volon. Tial Dio korektis la bazan eraron en la tiutempaj kredaĵoj, nome, ke estas en la mondo aliaj, nekontroleblaj de Li fortoj, kiuj kaŭzas malfeliĉojn. Samtempe la Biblio ne aprobas popolkredaĵojn, ke en la maro loĝas granda monstro, aŭ ke la maro mem estas monstro.

La alia ekzemplo estas en la priskribo de fulmaj kaj tondraj nuboj, kiel "tordiĝanta serpento" (Ijob 26:13). Tio estis klara aludo al tiutempa pagana popolkredaĵo, ke fulmaj kaj tondraj nuboj estas vizioj de grandega serpento. Similaj eldiraĵoj nek dementas la absurdecon de tiu ideo, nek enhavas sciencan klarigon. Anstataŭ tio ili celas klarigi, ke Dio regas ĉion. Tiel same Kristo rilatis al la ekzistantaj en lia tempo popolkredaĵoj pri demonoj; liaj mirakloj klare pruvas, ke la potenco de Dio estas absoluta kaj perfekta, ne ligita kun popolkredaĵoj pri tiel nomataj "demonoj". Tiuj, kiuj kredas, ke la priskribo de demonoj en la Nova Testamento konfirmas ilian realan ekziston, devas ankaŭ agnoski, ke la maro estas reala monstro kaj tiuj fulmoj estas reala granda serpento. Tie ĉi necesas ankoraŭfoje substreki, ke la Biblio uzas lingvon de tiu

tempo, kiam ĝi estis kreata, sed ĝi ne konfirmas la kredon, kiu formigis la bazon de tiu lingvo. La saman oni povas diri ankaŭ pri niaj propraj lingvoj. La Biblio faras tion por konfirmi ĉefajn verojn, kiujn ni jam konsideris en Parto 6.1 kaj 6.2, ke Dio estas la fonto de ĉia potenco, ke Li estas Tiu, Kiu respondecas pri ĉiuj niaj malfeliĉoj; ke peko devenas de ni mem, kaj ĉio tio devigas nin aprezi la grandecon de la Dia povo por savi nin. Multaj el nuntempaj, tiel nomataj, "kritikuloj" ĉiam atentigas pri interligo de la lingvo de la Skribo kun la popolkredaĵoj kaj konceptoj de la ekzistantaj en tiu tempo kulturoj, kie estis inspirita kaj skribita la Biblio. Kaj tio estas memkompreneble, ĉar la Biblio uzas la lingvon, kiu enhavis tiulokajn popolajn kredaĵojn, tamen tio estas farite por emfazi, ke Jahve, la sola vera Dio, estas nekompareble pli granda, ol ĉiuj aliaj dioj, kiuj estis konataj al la unuaj legantoj de la inspiritaj vortoj, diritaj per la buŝoj de la profetoj.

Konsiderante tion, ni miras, ke en la Nova Testamento estas multe da ekzemploj de uzo de tiutempa lingvo, kiuj restis ne korektitaj en la Biblio.

La fariseoj kulpigis Jesuon, dirante, ke li elpelas demonojn per la povo de falsa dio Baal-Zebub. Jesuo diris: "Se mi per Baal-Zebub elpelas demonojn, per kiu viaj filoj elpelas ilin?" (Mt 12:27). 2 Reĝ 1:3 klare diras, ke Baal-Zebub estis la falsa dio de la Filistanoj. Jesuo ne diris: "Vidu, 2 Reĝ 1:2 diras, ke Baal-Zebub estis falsa dio, pro tio viaj akuzoj ne povas esti veraj". Anstataŭ tio Jesuo diris tiele, kvazaŭ Baal-Zebub estis ekzistanta, ĉar li volis, ke liaj vortoj estu kompreneblaj al tiuj homoj, al kiuj li predikis. Sammaniere Jesuo diras pri elpelo de demonoj. Li ne diris: "Fakte ili ne ekzistas", li simple predikis la Evangelion per la tiutempa lingvo.

La hebreoj en la tempo de Jesuo opiniis sin justuloj kaj la idaro de Abraham. Tial Jesuo nomis ilin "justuloj" (Mt 9:12,13) kaj diris: "Mi scias, ke vi estas idaro de Abraham" (Joh 8:37). Sed li ne opiniis ilin justuloj, pri kio li ofte parolis. Kaj li klare montris per sia rezonado en Joh 8:39-44, ke ili ne estas la idaro de Abraham. Jesuo ne kontraŭdiris al eraraj homaj kredoj; anstataŭ tio li demonstris al ili la veron. Ni jam montris, ke sammaniere Dio traktis la paganajn kredojn, ekzistantajn en la tempo de la Malnova Testamento. Tiele ankaŭ Jesuo faris rilate al demonoj. Liaj miraklaj, kun helpo de Dio, resanigoj tute klare montras, ke malsanoj devenas de Dio, sed ne de iuj ajn aliaj fortoj, kaj ke nur Dio estas Tiu, Kiu havas potencon resanigi ilin.

Paŭlo citis grekajn poetojn, kiuj skribis multe da sensencaĵoj, por kapti la atenton de tiuj, kiuj aprezis tiujn poetojn (Tito 1:12; Ag 17:28). Ekzemplo de ĉio tio, kion ni sugestas, troviĝas en la respondo de Paŭlo, kiam li trovis altaron,

dediĉitan “Al Dio nekonata”, t. e. al iu pagana diaĵo, kiu por la Atenanoj estis nekonata (Ag 17:22,23).

Ef 2:2 diras pri “la estro de la potenco de la aero”. Tio estas klara aludo al la mitologiaj konceptoj de Zoroaster, je kiuj antaŭe kredis la legantoj de Paŭlo. Paŭlo diris, ke ili loĝas sub “la estro de la potenco de la aero”. En la sama verso Paŭlo difinas tiun “estron”, kiel la spiriton (staton de menso), kiu “energias”en homo. Pli frue ili kredis je la pagana koncepto de ĉiela spirit-estro; nun Paŭlo rimarkigas, ke la potenco, al kiu ili subiĝas, estas nur rezulto de ilia propra imago. Tiel li aludas al la pagana ideo, ne dementante ĝin, sed montrante la veron koncerne pekon.

2 Pet 2:4 diras pri maljustaj homoj, kiuj venos al Tartarus (tradukita “infero” en multaj versioj). Tartarus estis mitologia loko en la subtera mondo; Petro ne korektas tiun nocion; male, li uzas tiun vorton, kiel simbolon de absoluta neniigo kaj puno pro peko. Simile al tio Kristo uzas la vorton “Gehena” (vidu Parto 4.9).

**Ĉu Malsanojn Kaŭzas Demonoj?**

Ĉiu, kiu kredas, ke demonoj reale ekzistas, malsaniĝinte, demandas sin: “Ĉu demonoj kaŭzas mian malsanon?”. Se vi opinias, ke demonoj, pri kiuj diras la Nova Testamento, estas malgrandaj dioj, vagantaj ĉirkaŭ ni kaj kaŭzantaj niajn malfeliĉojn, via respondo estos jesa. Sed en tiu okazo, kiel vi povos klarigi tiun fakton, ke multaj malsanoj, kiuj antaŭe estis atribuitaj al demonoj, nune estas kuraceblaj aŭ regataj per medikamentoj? Ekzemple, malario. Plimulto da homoj de Afriko ĝis antaŭnelonga tempo kredis, ke malarion kaŭzis demonoj, sed ni scias, ke malario estas kuracebla per kinino aŭ aliaj medikamentoj. Ĉu vi do opinias, ke demonoj ektimiĝas kaj forflugas, ekvidante malgrandajn flavajn tablojdojn, malleviĝantajn tra via gorĝo? Iuj malsanoj, kiujn Jesuo kuracis kaj kiuj estas priskribitaj, kiel rezulto de posedo de demonoj, nune estas determinitaj tetano kaj epilepsio – ambaŭ estas kuraceblaj per medikamentoj.

Unu el miaj amikoj loĝas en vilaĝo apud Kampala en Uganda. Li rakontis al mi, ke homoj, loĝantaj tie, kredis, ke malarion kaŭzas demonoj, sed ekvidinte, ke medikamentoj rapide resanigas malsanulojn, ili ĉesis akuzi demonojn. Foje iu homo malsaniĝis je celebrala malario (serioza mensa malsano) kaj ili denove ekkredis, ke lian malsanon kaŭzis demonoj. Kuracisto, alveninta el apuda urbo, proponis al li fortan kontraŭmalarian medikamenton, sed ili rifuzis ĝin, dirante, ke li pli bezonas ion precipan kontraŭ demonoj. Post kelka tempo la kuracisto revenis kaj denove proponis la saman medikamenton,

dirante: “Jen tiu ĉi medikamento elpelas demonojn”. La malsanulo volonte prenis la drogon kaj lia sanstato pliboniĝis. La kuracisto, certe, ne kredis je demonoj, sed li uzis la lingvon de tiu tempo por persvadi la malsanulon akcepti drogon - ĝuste tiel faris la “Granda Kuracisto”, la Sinjoro Jesuo, antaŭ 2000 jaroj.

### KOMENTO 17: Sorĉo

Tiu ĉi komento estas skribita ĉefe por loĝantoj en Afriko kaj aliaj partoj de la mondo, kie sorĉado estas kutima ago de ĉiutaga vivo. Ĉiuj veraj studantoj de la Biblio scias, ke agnosko de sorĉistoj, ŝamanoj kaj tiel plu, estas nekunigebla kun vera fido al Dio. Kompreneble, ke peti helpon de sorĉistoj (kaj aliaj similaj al ili) ofte estas pli malmultekoste, ol de medicina kuracisto. Kaj sorĉistoj iufoje donas al malsanuloj mildigon de suferoj kaj iufoje eĉ resanigas malsanulojn, kaj tio allogas lokajn loĝantojn. Ni rigardu tiun problemon de logika, Biblia vidpunkto. Tio estas la sola vojo, dank` al kiu vi povas trovi forton por venki tentojn kaj ne peti helpon de tiuspecaj “kuracistoj”.

### Pretendoj De Sorĉistoj

Unue, necesas analizi anoncitajn sukcesojn de tiuj sorĉistoj. Ni povas esti certaj, ke iliaj sukcesoj estas troigitaj. Siajn kuracagojn ili plenumas ĉiam kaŝite, kaj ne ĉiuj povas vidi ilin. Se ilia kuracado estus sukcesa, ili devus labori en hospitaloj, kaj ili estus rekonataj en la tuta mondo. Neniam estas konata la fakta sanstato de tiuj malsanuloj, kiujn ili “kuracis” - ĉu vere ilia sanstato bliboniĝis, aŭ ne? Kiam vin trafos tenton peti helpon de sorĉistoj, vi devas demandi vin mem, ĉu estas iuj pruvoj de iliaj povoj? Ĉu vi jam vidis (ne nur aŭdis pri tio!) homon, kies brako estis desegita, kuracita ĉe sorĉisto kaj li revenis de sorĉisto kun nova, funkcianta brako? Vi devas havi konvinkajn pruvojn antaŭ ol vi venos al sorĉistoj. Read 13:1-3 diras kategorie: la Izraelidojn oni instruis, se sorĉisto aŭ eĉ profeto prezentas signon aŭ miraklon, homoj ne devas kredi al tiu persono antaŭ ol ili konvinkiĝos, ke tiu persono sekvas la veran Biblian doktrinon. Tute klaras, ke sorĉistoj ne kredas al la vero, malkaŝita en la Biblio, kaj pro tio ne tentu kredi, ke ili havas iun realan potencon, ĉar ni scias, ke ĉia potenco estas de Dio (Rom 13:1; 1 Kor 8:4-6).

Due, kiajn malsanojn ili kuracas? Nuntempe estas agnoskita tiu fakto, ke homoj uzas nur unu procento da sia cerba potenco, la cetera parto estas neatingebla por ni (sendube, en la Regno de Dio homoj uzos ankaŭ ĝin). Senkonscie, nia menso povas efiki preskaŭ fizike al nia korpo. Psikologoj (homoj, kiuj studas la menson) povas kuraci homojn, kiuj havas malsanojn de sango, sugestante al pacientoj, ke ilia sango iĝas bonstata kaj normale cirkulas.

Estas konate, ke stresaj situacioj povas kaŭzi stomakulceron kaj kapdoloron. Malstreĉinte la menson aŭ farinte certajn ekzercojn, oni povas forigi tiujn malsanojn. Sed se, ekzemple, nia brako estas desegita, neniaj mensaj ekzercoj povas restarigi ĝin al sia loko. Ŝajnas, ke sorĉistoj povas resanigi homon nur de tiuj malsanoj, kiuj estas kontrolataj de nia menso. Ĉar ni ne tute komprenas, kiel funkcias nia cerbo, al ni ŝajnas, ke resaniĝo okazis pro psika potenco de tiuj sorĉistoj. Sed la afero statas alie, nur influante al la homa menso ili povas atingi iun efekton kaj resanigi homon.

**La Fonto De Potenco**

Sed ĉio devenas de Dio. Ĉion bonan kaj ĉion malbonan (ekzemple, malsanojn) sendas Li. La Skribo ofte diras pri tio: Jes 45:5-7; Miĥ 1:12; Amos 3:6; El 4:11; Read 32:39; Ijob 5:18). Ĉiujn tiujn lokojn necesas atente relegi. Ni komprenos, ke se ni malsaniĝas, ni devas kun preĝoj peti Dion pri helpo, samtempe prenante medikamentojn, indikitajn al ni de medicinaj kuracistoj. Se ni alvokas sorĉistojn por helpi al ni, ni devas kompreni, ke ni alvokas homojn, kiuj pretendas, ke ili kontrolas "potencojn de mallumo", kaj kredas, ke tiuj "potencoj" kaŭzas niajn malsanojn. Tamen ni jam scias, ke tiuj potencoj, je kiuj ili kredas, reale ne ekzistas. La Eternulo estas la fonto de potenco. Kaj se ni petas helpon de sorĉistoj, tio signifas, ke ni ne kredas je la plejpotenco de Dio, ke nur Li sendas al ni malsanojn, sed kredas, ke malsanojn sendas al ni aliaj potencoj, kontrolataj de sorĉistoj, kiel asertas ili mem.

Dio ĉagreniĝas, se homoj tiel opinias, ĉar Li scias, ke Li estas Tiu, Kiu sendas malsanojn, kaj estas plejpotenca. Izrael kredis je Dio, sed ili ankaŭ kredis, ke ekzistas aliaj fortoj, kiuj influas ilian vivon, kaj adoradis al idoloj, faritaj je la nomo de tiuj fortoj. Per tio ili incitis Dion kaj Li kaŝis Sian vizaĝon for de Lia popolo (Read 32:16-24). Se ni ne tutplene kredas je Dio, se ni kvankam iom dubas pri Lia plejpotenco, tio signifas, ke ni ne estas veraj kredantoj. Pretendi pri kredo je la vera Dio de Izrael kaj samtempe kredi je reala ekzisto de aliaj fortoj, apartaj de Dio, kaj permesi al sorĉistoj kuraci nin je nomo de tiuj fortoj, estas la samo, kion faris la Izraelidoj en la pasinteco. La longa, malĝoja historio de la Izraela idoladorado estas "skribita por nia lernado". Ni ne devas interrilati kun tiuj, kiuj kredas je tiuj fortoj.

> "Kian komunaĵon havas lumo kun mallumo... kaj kian konsenton havas templo de Dio kun idoloj? Ĉar ni estas templo de Dio vivanta... Eliru el inter ili, kaj estu apartaj, diras la Eternulo... Kaj Mi estos por vi Patro kaj vi estos Miaj filoj kaj filinoj" (2 Kor 6:14-18).

Se ni efektive penas apartiĝi de falsaj fortoj kaj idoloj, ni ricevas gloran certecon, ke ni estas la infanoj de Dio Mem. Naturaj gepatroj instinkte zorgas pri siaj infanoj kaj flegadas ilin, kiam ili malsanas. Ĉu estas malfacile kredi, ke nia Patro Ĉiela faras por ni la saman kaj eĉ en pli alta grado? Fakte, sorĉistoj havas influon nur al tiuj, kiuj kredas al ili. Ekzemple, persono, perdinta sian amaton, aliras al sorĉisto aŭ mediumo (peranto inter "spiritoj" kaj homoj) kaj petas lin pri renkonto kun la mortinta homo. La mediumo petos, ke la kliento fermu la okulojn kaj imagu antaŭ si la vizaĝon de la elvokata persono. La kliento povas fiksi sian menson al klare imagita fotaĵo de la persono. Kaj tiam la mediumo povas legi la pensojn de sia kliento, kaj realisme paroli pri la persono, kiun li volis vidi, tiel ke ĉe la kliento ne restas duboj, ke la mediumo vidas la mortinton vivanta. Tamen necesas rimarki, ke ne estos donitaj iujn pruvojn, ke tiu persono estas vivanta. Sed se la kliento estus skeptikulo, kaj ne povus subigi sin al la instrukcio de la mediumo, aŭ ne kredus al li, la rezulto estus sensukcesa.

La sorĉistoj, kiuj kutime interpretis al Faraono aŭ Nebukadnecar iliajn songôjn, ne restus dum longa tempo sur siaj postenoj, se ili ne estus bonaj psikologistoj kaj ne havus sukcesojn. Sendube, ili posedis la teknikon de penslegado. Sed kiam Dio Mem speciale influis la vivon de la persono, kiel okazis al Faraono kaj Nebukadnecar, tiam la sorĉistoj perdis siajn povojn. Analogie okazis al Bileam, kiu iugrade estis sorĉisto. Balak, la reĝo de Moab, kredis je la povo de Bileam malbeni homojn, li promesis grandan monsumon al Bileam pro sorĉado, dirante, ke li jam scias el pasinta sperto, ke "kiun vi malbenas, tiu estas malbenita" (Nom 22:6). Sed Bileam trovis, ke lia kutima povo forlasis lin, ĉar la afero koncernis la popolon de Izrael. Estas klare, ke tiaj homoj perdas siajn sorĉkapablojn, kiam la afero koncernas la popolon de Dio, kvankam rilate al aliaj popoloj iliaj faroj povis esti sukcesaj.

**Magio En La Biblio**

Se ni havas tenton peti helpon de sorĉisto-kuracisto, ni devas havi firman kredon, je lia sorĉkapablo. Plejverŝajne, li mem havas la saman opinion. Se ni iras al sorĉisto kun la penso, povas esti li resanigos min, nia espero pri resaniĝo fiaskos. Sed aliflanke, se ni kredas je tiuj personoj kaj je potencoj, kiujn ili pretendas regi, tio signifas, ke ni ne kredas je la vera, plejpotenca Dio. Se ni efektive kredas al tio, kio estas skribita pri Faraono kaj Nebukadnecar en la Biblio, ni ne povas havi fortan kredon je la faroj de sorĉistoj kaj, sekve, ni ne povas ricevi helpon de ili. La ekzemploj, kiujn ni donis, montras, ke sorĉistoj ne havas potencon efiki al la popolo de Dio, al kiu apartenas ankaŭ ni pro nia elvokiĝo kaj baptiĝo. Paŭlo nomas magion "faro de la karno", alkalkulante ĝin al falsa doktrino, adulto kaj malĉasteco (Gal 5:19-21). Li klarigas: "Mi avertas

vin, kiel mi jam antaŭe admonis vin, ke tiuj, kiuj tion faradas, ne heredos la regnon de Dio”.

La leĝo de Moseo diras, ke ĉiuj sorĉistoj kaj tiuj, kiuj uzas magion (alia vorto por sorĉado), kaj tiuj, kiuj trairigis siajn infanojn tra fajro, devas esti senprokraste mortigitaj (Read 18:10,11; El 22:18). Tiuj, kiuj trairigis siajn infanojn tra fajro, ne estis la sorĉistoj mem. Ili sekvis al la indikoj de tiuj sorĉistoj kaj la ĉefaj idoladorantoj, kiuj instruis ilin, ke por defendi sin kontraŭ malbono, ili devas trairigi siajn infanojn tra fajro. Ni vidas, ke la sorĉistoj kaj tiuj, kiuj uzis ilian potencon, devis esti mortigitaj, sed laŭ la Nova Testamento, la puno pro tiuj agoj estas forigo el la Regno de Dio.

Dio ne volas, ke ni turnu nin al sorĉistoj por plibonigi nian vivon. Vivante en Kristo, antaŭ ol fari gravan en nia vivo paŝon, ĉiufoje ni devas serioze demandi nin mem: “Ĉu efektive Dio volas, ke ni faru tion? Ĉu farus mi la saman, se Jesuo starus apud mi?”. Konsiderante, ke Dio klare malaprobas sorĉadon, mi opinias, ke la respondo devas esti – “Ne, Dio ne volas, ke ni faru tion”. Samuel difinis sorĉadon, kiel “malobeo” (hebrea “provoko”) al la vorto de Dio (1 Sam 15:23). Provoki la koleron de Dio, kiel faris la Izraelidoj, adorante idolojn kaj sorĉistojn (Read 32:16-19), estas ja nepenseble. Dio emfazas, ke Li ordonis al Izrael forpeli la Kanaanojn pro ilia kredo je sorĉado, kio estas abomenaĵo por Li, sed anstataŭ tio, ili mem aliĝis al tiu praktiko (Read 18:9-14). Sekve, pro la nova Izraelo de baptitaj kredantoj, ni devas ne fari la farojn de la ĉirkaŭanta nin malbona mondo, se ni akcelas eterne heredi la promesitan al ni landon de la Regno. La penso, ke nur la sorĉisto uzas magion, ne ni, estas senrilata. Se ni esperas, ke la sorĉado helpos nin, tio signifas, ke ni mem efektive uzas ĝin.

Benu nin ĉiujn Dio dum nia irado en tiuj ĉi lastaj tagoj de la malluma pagana mondo al Lia Regno de lumo, vero kaj gloro.

> “ Pro tio, ke ili ne ricevis la amon al la vero por esti savitaj... Dio sendas al ili energion de eraro, tiel, ke ili kredos mensogon... Ni devas ĉiam danki Dion pro vi, fratoj, amataj de la Sinjoro... Tial, fratoj, staru firme, kaj tenu la tradiciojn, kiujn vi lernis ĉu per parolo, aŭ per ia letero nia. Nia Sinjoro Jesuo Kristo mem, kaj Dio, nia Patro, kiu nin amis kaj al ni donis eternan konsolon kaj bonan esperon per graco, konsolu viajn korojn, kaj fortigu ilin por ĉia bona faro kaj vorto” (2 Tes 2:10-17).

## KOMENTO 18: Kio Okazis En Edeno?

“Kaj la serpento diris al la virino: Ne, vi ne mortos; sed Dio scias, ke en la tago, en kiu vi manĝos ion de ili, malfermiĝos viaj okuloj kaj vi estos kiel Dio, vi scios bonon kaj malbonon” (Gen 3:4,5).

Populara interpreto: Erare oni opinias, ke la serpento ĉi tie estas pekinta anĝelo, nomita “Satano”. Elpelita el la ĉielo pro peko, li malsuprenĝis al la tero kaj tentis Eva-n fari pekon.

**Klarigoj:**

La citaĵo diras pri “la serpento”. La vortoj “satano” kaj “diablo” forestas en la libro “Genezo”.

La serpento nenie estas menciita, kiel anĝelo.

Genezo ne mencias iujn estaĵojn, forpelitajn de la ĉielo.

“La salajro de peko estas morto” (Rom 6:23). Anĝeloj ne povas morti (Lk 20:35-36), ĉar ili ne povas peki. La rekompenco por justuloj estos tio, ke ili fariĝos egalaj al la anĝeloj kaj ili ne plu povos morti (Lk 20:35,36). Se anĝeloj povus peki, la justuloj ankaŭ povus peki kaj pro tio estus mortemaj, kio fakte signifas, ke ili ne havus eternan vivon.

En la sceno de la falo de homo en Genezo partoprenas: Dio, Adam, Eva kaj la serpento. Kaj neniu plu estas menciita. Forestas iuj ajn pruvoj, ke iu eniĝis internen de la serpento por fari tion, kio estis farita. Paŭlo diris: “trompis Evan la serpento per sia ruzeco (2 Kor 11:3). Dio diris al la serpento: “Ĉar vi tion faris...” (Gen 3:14). Se “satano” uzis la serpenton, kial li ne estis menciita kaj kial ne estis punita?

Adam kulpigis Evan pro sia peko: “Ŝi donis al mi de la arbo” (Gen 3:14). Eva kulpigis la serpenton: “La serpento tromplogis min, kaj mi manĝis” (Gen 3:14). La serpento ne kulpigis diablon - li ne pravigis sin.

Se oni rezonas, ke neniu el konataj al ni specoj de serpentoj povas pensi aŭ paroli, kiel la serpento en Eden, tamen ni rememoru: a) iufoje “muta azeno, parolante per homa voĉo, haltigis la frenezecon de la profeto (2 Pet 2:16), kaj b) “La serpento estis pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj, kiujn kreis Dio, la Eternulo” (Gen 3:1). Verŝajne, la malbeno senigis ĝin je la kapablo paroli, kiel ĝi parolis kun Eva.

Dio kreis la serpenton (Gen 3:1). Alia estaĵo, nomita “satano”, ne transformiĝis en ĝin. Se ni kredas tion, ni efektive diras, ke iu persono povas enloĝiĝi en alian kaj regi lin. Tiu ideo estas pagana, ne Biblia. Rilate al la

opinio, ke Dio povus ne krei la serpenton, por ke Adam kaj Eva ne havu eblecon peki, ni ekmemoru, ke peko eniris en la mondon per homo (Rom 5:12); ĉar la serpento estis estaĵo, ne havanta moralon, kaj parolis pri tio, kion ĝi vidis, ĝi ne estis respondeca antaŭ Dio, kaj sekve, ĝi ne faris pekon. Iuj homoj opinias, ke la serpento en Gen 3 estas la serafo. Tamen la hebrea vorto, tradukata kiel "serafo", tute forestas en Gen 3; tie estas uzita alia vorto, tradukita kiel "kupro", kiu simbolas pekon (Juĝ 16:21; 2 Sam 3:34; 2 Reĝ 25:7; 2 Kron 33:11; 36:6), kaj pro tio la serpento povas simboli pekon, sed ne falintan anĝelon.

**Klarigoj Pri Tiu Ĉi Paragrafo:**

**Formatted:** Thai Distributed Justification

1. Ni opinias, ke mankas kaŭzoj por dubi, ke ĉion diritan en la unuaj ĉapitroj de Genezo pri kreado de la mondo kaj falo en pekon, necesas kompreni laŭlitere. "La serpento" estis natura serpento. Tiu fakto, ke nune ni povas vidi serpentojn, rampantajn sur iliaj ventroj je plenumo de la malbeno, metita al la origina serpento (Gen 3:14), pruvas tion. Ni ankaŭ vidas, ke viroj kaj virinoj nune suferas pro la malbenoj, metitaj sur ilin en tiu sama tempo. Kaj ni povas ankaŭ supozi, ke Adam kaj Eva estis laŭlitere viro kaj virino, similaj al tiuj, kiujn ni vidas nune, sed pli perfektaj, ol ni; analogie, la serpento en Edeno estis laŭlitere besto, kvankam pli inteligenta, ol nuntempaj serpentoj.

2. Pli malsupraj citaĵoj pruvas, ke la unuajn ĉapitrojn de Genezo necesas kompreni laŭlitere: Jesuo referencas al la priskriboj de la kreado de Adam kaj Eva en sia instruo pri geedzeco kaj divorco (Mt 19:5,6); tie ne estas iu ajn aludo, ke li parolis pri tio metafore.

**Formatted:** Thai Distributed Justification, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

"Adam kreiĝis la unua, poste Eva; kaj Adam ne trompiĝis; sed la virino, trompite, falis en pekon" (1 Tim 2:13,14); sekve, Paŭlo legis Genezon ankaŭ laŭlitere. Kaj precipe gravas tio, ke li skribis, ke "trompis Evan la serpento per sia ruĝeco" (2 Kor 11:3). Atentu, ke Paŭlo ne mencias, ke la "diablo" trompis Evan.

Ĉu estas, ĝenerale, tie ĉi iu ajn aludo, ke legante pri la kreado kaj la falo en pekon, ni devas kompreni tion metafore? Laŭ Genezo 1 la mondo estis kreita dum ses tagoj. Ke ili estis laŭliteraj tagoj, havantaj ĉiu po dudek kvar horojn, pruvas tiu fakto, ke diversaj kreitaĵoj ne povus ekzisti unu sen aliaj, se ili estus kreitaj kun intertempo je kelkaj tagoj. Ke la tago ne daŭris 1000 jarojn aŭ eĉ pli, pruvas tiu fakto, ke Adam estis kreita en la sesa tago, sed ni scias, ke li mortis post la sepa tago, en la 930-jara aĝo (Gen 5:5). Se la sepa tago havus la 1000-jaran daŭron, Adam devus esti pli ol 1000-jara, kiam li mortis.

3. Ĉar la serpento estis malbenita kaj kondamnita rampi sur sia ventro (Gen 3:14), ni povas supozi, ke antaŭ tio ĝi havis piedojn; konsiderante, ke ĝi estis "pli ruza, ol ĉiuj kampaj bestoj", oni povas supozi, ke ĝi havis la bestan vivformon, la plej similan al la homa, kvankam ĝi dume estis la "besto" (Gen 3:1, 14).

4. Povas esti, la serpento jam manĝis la frukton de la arbo de sciado, kaj tion pruvus ĝia ruzeco. Eva "vidis, ke la arbo estas bona por manĝi... kaj la arbo estas dezirinda por saĝiĝi" (Gen 3:6). Kiele ŝi ekscius tion, se ŝi ne vidus la efikon de la frukto al iu, kiu ĝin manĝis? Povas esti, ŝi jam kelkfoje interparolis pri tio kun la serpento. La unuaj vortoj, diritaj de la serpento al Eva estas: "Ĉu Dio diris, ke vi ne manĝu de ĉiuj arboj de la ĝardeno?" (Gen 3:1). La demanda formo de tiu ĉi frazo donas eblecon supozi, ke ĝi estas la daŭrigo de antaŭa konversacio, kiu restis ne priskribita en la Biblio.

**KOMENTO 19: Lucifer**

En Jes 14:12-14 ni legas: "Kiel vi falis de la ĉielo, ho brilo, filo de la matenruĝo! Hakita sur la teron vi estas, ho turmentinto de la popoloj. Kaj vi diris en via koro: Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio mi levos mian tronon, kaj mi sidos sur la monto de kunveno, ĉe la rando de nordo; mi supreniros sur la altaĵon de la nuboj, mi similiĝos al la Plejaltulo".

Popularа interpreto: ekzistas la vaste uzata opinio, ke Lucifer, la filo de la matenruĝo, estis potenca anĝelo, pekinta en la tempo de Adam, kaj pro tio li estis forpelita surteren, kie li faras malbonaĵojn al la popolo de Dio.

**Klarigoj:**

La vorto "brilo" estas traduko de la hebrea vorto "lelah", kiu okazas nur unufoje en la Skriboj, kaj havas ligon kun lumo: "brilo" estas tiu, kiu brilas. De v.4 de ĉi tiu ĉapitro, oni lernas, ke temas pri la reĝo de Babel. Sekvas priskribo de la eminenteco, kaj posta falego de tiu reĝo, esprimita en tipa hebrea poezia formo.

En la angla versio, ankaŭ en kelkaj alilingvaj versioj, la tradukistoj, supozeble pro la esprimo "filo de la mateno", tradukis la vorton "lelah" kiel "Lucifer". "Lucifer" (de la latina vorto "lux" =lumo) estas la antikva nomo de la planedo Venuso, kiam ĝi aperis kiel matena stelo.

Formatted: Thai Distributed Justification
Formatted: Thai Distributed Justification, Indent: Left: 1.27 cm, First line: 0 cm
Formatted: Thai Distributed Justification
Formatted: Font: Bold
Formatted: Thai Distributed Justification, Indent: First line: 1.48 cm

Bedaûrinde, dum longa tempo, kristanaj kleruloj, kiuj kredis, ke “Satano” estas falinta anĝelo, interpretis Jesajan 14:12 laû la diro de Jesuo en Luko 10:18 : “Mi vidis Satanon falanta de la ĉielo, kiel fulmo”, kaj erare konkludis, ke la verso en Jesaja referencas al “Satano”. Pro tio, la vorto “Lucifer” mem, en la angla lingvo – ankaû en kelkaj aliaj lingvoj, fariĝis alia nomo por “Satano”.

Do, angla leganto ekzemple, vidante la nomon “Lucifer” en Jesaja 14:12, povas ekpensi, ke temas pri “Satano”. Tio estas la problemo, al kiu la aûtoro provas provizi respondon.

1. La vortoj “diablo”, “satano” kaj “anĝelo” ne troviĝas en tiu ĉi ĉapitro.

-2. Forestas iu ajn pruvo, ke Jes 14 priskribas ion, kio okazis en la ĝardeno de Eden.

3. Pri “la filo de la matenruĝo” estas dirite, ke li estas kovrita de vermoj (v.11), kaj primokita de homoj (v.16), ĉar li havas neniun forton, post kiam li estis elpelita de la ĉielo (vv. 5-8). Pro tio mankas iu ajn motivo opinii, ke la “filo de la matenruĝo” troviĝas nune surtere kaj tentas homojn lasi la vojon de la vero.

4. Kial “la filo de la matenruĝo” estas punita pro la vortoj “Mi supreniros en la ĉielon” (v. 13), se li jam estis tie?

5. La filo de la matenruĝo putras en la tombo: “En ŝeolon estas ĵetita via majesto... kaj vermoj estas via kovrilo” (v. 11). Sed anĝeloj ne povas morti (Lk 20:35,36), sekve, li ne povas esti anĝelo; tiu ĉi priskribo pli taûgas por homo.

6. La versoj 13 kaj 14, kiuj diras pri “la homo de peko”, havas ligon kun 2 Tes 2:3,4. Tial “la filo de la matenruĝo” pli rilatas al homo, ol al anĝelo.

**Sugestaj Klarigoj:**

1. “La Nova Internacia Versio” de la Biblio (N.I.V.) kaj aliaj nuntempaj versioj de ĝi interpretas la ĉapitrojn de Jes 13-23, kiel serioj de“malfacilaĵoj”, surmetitaj al diversaj nacioj, ekzemple, Babelo, Tiro, Egiptujo. En Jes 14:4 ni legas: “Vi eldiros ĉi tiun mokokanton pri la reĝo de Babel...”, do, ni vidas, ke la profetaĵo koncernas la homan reĝon de Babel, kiu estas priskribita, kiel la filo de la matenruĝo, aû Lucifer. Post la falo “Tiuj, kiuj vin vidos... kaj miros: Ĉu ĉi tio estas la viro, kiu tremigis la teron, teruris regnojn?” (v. 16). Tiele, Lucifer estas klare determita kiel homo.

**Formatted:** Thai Distributed Justification

**Formatted:** Thai Distributed Justification, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

**Formatted:** Thai Distributed Justification, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

**Formatted:** Font: Bold

**Formatted:** Font: Bold

2. Versoj 9, 10 estas poezia priskribo de antaûaj reĝoj, jam mortintaj, kiuj diras: "Vi ankaû senfortiĝis, kiel ni, vi similiĝis al ni". El tio sekvas, ke la falinta reĝo de Babel mem jam fariĝis, kiel ili.

3. Ĉapitro 13 de Jesaja estas la unua de serio da ĉapitroj, kiuj estas profetaĵoj pri diversaj landoj, nome Babel, Moab, Damasko kaj Egiptujo. Mankas do ia kialo por diri, ke ĉapitro 14 koncernas "Satanon".

4. En la parabolo la "matena stelo" decidas fiere: "Mi supreniros en la ĉielon, pli alten ol la steloj de Dio" (v. 13). Pro tiu ĝia fiereco ĝi estis elpelita surteren. Dan 4 priskribas, kiel Nebukadnecar, la reĝo de Babel, fiere ĉirkaûrigardas la grandegan regnon, kiun li kreis, opiniante, ke li mem, per sia propra forto, konkeris kaj kaptis aliajn naciojn. Li ne agnoskis, ke Dio donis al li tiun sukceson. "Via grandeco kreskis kaj atingis ĝis la ĉielo (v. 22). Pro tio li estis elpuŝita el meze de homoj, li komencis manĝi herbon, kiel bovoj, lia korpo estis trinkigata de la roso de la ĉielo, tiel, ke liaj haroj kreskis kiel la plumoj de aglo kaj liaj ungoj fariĝis kiel ĉe birdo (v. 33). Tia neatendita falo de unu el la plej potencaj en la mondo homoj ĝis la stato de malordigita frenezulo, estis tiel drama, ke ĝi similis al la matena stelo, falanta de la ĉielo sur la teron. Steloj estas simboloj de potencaj homoj, ekzemple, Gen 37:9; Jes 13:10 (koncerne la regantojn de Babel), Dan 8:10 (kmp. v. 24). Supreniro al la ĉielo kaj falo kaj renverso de sur la ĉielo estas la Biblia metaforo, ofte uzata por priskribi kreskantan fierecon kaj falon – vidu Ijob 20:6; Jer 51:53 (pri Babel); Plor 2:1; Mt 11: 23 (pri Kapernaum): "Kaj vi, Kapernaum! Ĉu vi estas altigita ĝis la ĉielo? Vi malsupreniĝos ĝis Hades (la tombo)".

5. La verso 17 akuzas Luceferon, ke li "faris la mondon dezerto kaj ruinigis ĝiajn urbojn, kiu siajn kaptitajn ne liberigas hejmen". Ĉi tiu citaĵo diras pri Babela milita politiko – ruinigo de tuta regiono ĝis la grundo (kiel tion estis farite en Jerusalem), translokigo kaptitojn al aliaj regionoj, ne permesante al ili reveni al ilia patrolando (kiel estis farite al la hebreoj), konstruado de novaj urboj kaj depreno tributon de konkeritaj popoloj. Ĉi tie estas emfazita tiu fakto, ke pro siaj faroj Lucifer eĉ ne estis tombigita kun honoro, konvena al reĝoj, kaj tio ankaû montras, ke li estis nur homa reĝo kaj lia korpo bezonis esti entombigita.

**Formatted:** Thai Distributed Justification, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

6. La verso 12 diras, ke Lucifer estis "hakita sur la teron", kvazaû li estis arbo. Tie ĉi ni ankaû vidas ligon kun Dan 4:8-16, kie Nebukadnecar kaj Babel estas komparataj kun hakita arbo.

7. Babel kaj Asirio ofte estas interanstataûigataj en la profetaĵoj; ekzemple, en v.25 ni legas pri la renverso de la reĝo de Babel: "frakasita estos

la Asiriano...”. La profetaĵoj pri Babel en Jes 47 ripetas diritan pri Asirio en Naĥum 3:4,5,18; Cef 2:13,15; kaj 2 Kron 33:11 diras, ke “la militestroj de la reĝo de Asirio... malliberigis Manasen per katenoj, ligis lin per ĉenoj, kaj forkondukis lin en Babelon”, montrante la similecon de iliaj metodoj. Amos 5:27 diras, ke la Izrael estis elpatrujigitaj “trans Damaskon”, t.e. en Asirion, sed Agoj 7:43 diras: “preter Babelon”. Ezra 6:1 priskribas la agojn de Dario, la reĝo de Babel, koncerne la restarigon de la templo. La hebreoj dankas Dion, ke Li “turnis al ili la koron de la reĝo de Asirio” (Ezra 6:22). Denove ni vidas la akordiĝon de tiuj priskriboj. La profetaĵoj de Jesaja akordiĝas kun la kunteksto pri la invado de la Asiria armeo dum la tempo de Jeĥezkel, kun priskribo de renverso de Asirio en v. 25. Estos pli facile kompreni la verson 13, se konsideri, ke en ĝi temas pri la blasfema asiria sieĝo de Jerusalem, la strebo de la asirianoj eniri la urbon kaj uzurpi la templon por siaj dioj. Pli frue la reĝo de Asirio Tiglat-Pileser volis fari la samon (2 Kron 28:20,21); Jes 14:13 : “Kaj vi diris en via koro: Mi supreniros en la ĉielon (simbolo de la templo kaj tabernaklo – 1 Reĝ 8:30; 2 Kron 30:27; Ps 20:2,6; 11:4; Heb 7:26)... mi sidos sur la monto de kunveno (monto Cion, kie estis la templo), ĉe la rando de nordo (Jerusalem – Ps 48:1,2).

### KOMENTO 20: La Tentoj De Jesuo

Mt 4:1-11: “Tiam Jesuo estis kondukita supren de la Spirito en la dezerton, por esti tentata de la diablo. Kaj fastinte kvardek tagojn kaj kvardek noktojn, li poste malsatis. Kaj la tentanto venis, kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ordonu, ke tiuj ŝtonoj fariĝu panoj. Sed responde li diris: Estas skribite: Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio. Poste la diablo portis lin en la sanktan urbon, kaj starigis lin sur la tegmenta pinto de la templo, kaj diris al li: Se vi estas Filo de Dio, ĵetu vin malsupren, ĉar estas skribite: Al Siaj anĝeloj Li ordonos pri vi, kaj sur la manoj ili vin portos, por ke vi ne falpuŝiĝu sur ŝtono per via piedo. Jesuo diris al li: Ankaŭ estas skribite: Ne provu la Eternulon, vian Dion. Denove la diablo portis lin al monto tre alta, kaj montris al li ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian gloron, kaj diris al li: Ĉion tion mi donos al vi, se vi faligos vin kaj adorkliniĝos al mi. Tiam Jesuo diris al li: Foriru, Satano! Ĉar estas skribite: Al la Eternulo, via Dio, vi adorkliniĝu, kaj al Li sola vi servu. Tiam la diablo forlasis lin, kaj jen anĝeloj venis kaj servadis al li”.

**Popularа interpreto**:

Tiu ĉi citaĵo montras, ke iu estaĵo, nomita la “diablo”, tentis Jesuon peki, kondukante lin al tentaj situacioj.

Formatted: Font: Not Bold

Formatted: Font: Bold

**Klarigoj:**

1. Jesuo estis “tentata en ĉio tiel same, tamen sen peko” (Heb 4:15), kaj “ĉiu estas tentata, kiam li estas fortirata de sia dezirado, kaj delogata” (Jak 1:14). Ni estas tentataj per la “diablo” de niaj propraj deziroj, kiel estis tentata Jesuo, sed ni ne estas tentataj per iu malbona estaĵo, kiu subite stariĝis apud ni kaj devigas nin peki - peko kaj tento eliras “de interne, el la koro de homoj” (Mk 7:21).

2. La tentojn, evidente, oni ne devas kompreni laŭlitere:

- Mt 4:8 diras, ke Jesuo estis portita al alta monto por ke li povu vidi ĉiujn regnojn de la mondo kaj ilian estontan gloron. Tamen ne ekzistas tiom alta monto, de kie oni povus vidi la tutan mondon, ĉar nia planedo estas globo.

- Komparo de Mt 4 kaj Lk 4 montras, ke la tentoj estas priskribitaj en malsama ordo. Kaj ankoraŭ, Mk 1:13 diras, ke Jesuo estis en la dezerto kvardek tagojn, tentata de Satano, sed en Mt 4:2,3 ni legas: “fastinte kvardek tagojn kaj kvardek noktojn, li poste malsatis. Kaj (poste!) la tentanto venis. Ĉar la Skribo ne povas kontrûdiri al si mem, ni povas konkludi, ke tiuj tentoj estis nur en la menso de Jesuo. Ĉar li havis nian naturon, manko de manĝaĵo dum longa tempo povis influi lian menson fizike, kaj mense li povis imagi tiujn eventojn. La tento transformi ŝtonojn je panoj estas esprimplena ekzemplo. La simileco laŭforme inter panoj kaj ŝtonoj estas menciita de Jesuo en Mt 7:9, kaj sendube, tiuj imagoj povis okazi en lia lacigita kapo, kvankam li ĉiam venkis tiujn tentojn per vortoj de la Skribo.

- Povas esti, Jesuo rakontis al la evangelistoj pri siaj tentoj, kaj por montri la profundon kaj forton de siaj travivaĵoj, li povis uzi la metaforan metodon, kiun ni vidas en Mt 4 kaj Lk 4.

- Tio ŝajnas malverŝajne, ke la diablo kondukis Jesuon tra la dezerto kaj la stratoj de Jerusalem kaj poste ili kune estis starantaj sur la templo kaj ilin rigardis scivolemaj judoj. Jozef Flavij ne mencias pri tio, kvankam tiaj eventoj, sendube, altirus lian atenton. Estas nekompreneble, kiamaniere Jesuo sukcesis, trairinte la dezerton, esti alveninta al monto tre alta. La plej proksima alta monto, Hermon, troviĝas malproksime en la norda parto de Izrael. Jesuo estis en la dezerto dum kvardek tagoj, kaj estis tentata nur en la dezerto, sekve li ne povis esti forlasinta la dezerton kaj iranta al Jerusalem kaj al alta monto. Tio signifas, ke tiuj eventoj ne povis okazi laŭlitere.

**Formatted:** Font: Bold

**Formatted:** Thai Distributed Justification

- Se la diablo estas natura persono, kiu ne respektas la Vorton de Dio kaj devigas homojn peki, kial Jesuo citas al li vortojn el la Skribo por lin subigi? Laŭ la populara nocio, la vortoj el la Skribo ne povas haltigi la diablon. Notu, ke Jesuo citas el la Biblio ĉiufoje. Se la diablo signifas malbonajn dezirojn en la koro de Jesuo, iĝas kompreneble, ke memorigante al si mem la vortojn el la Skribo, li povis venki ĉi tiujn malbonajn dezirojn. Ps 119:11 tre konvenas al tiu ĉi okazo, kvazaŭ ĝi estas skribita speciale por antaŭdiri la travivaĵojn de Jesuo en la dezerto: "En mia koro mi konservas Vian diron, por ke mi ne peku antaŭ Vi".

- Mt 4:1 diras: "Tiam Jesuo estis kondukita supren de la Spirito en la dezerton, por esti tentata de la diablo". Tiu Spirito estis la Spirito de Dio, malsuprenirinta Jesuon (Mt 3:16). Estus tre strange, se la Spirito de Dio kondukus Jesuon en la dezerton por ke li estu tentata de superhoma estulo, kontraŭstaranta al Dio.

**Sugestaj klarigoj:**

1. Post kiam Jesuo estis baptita de Johano en Jordan, li ricevis la potencon de la Sankta Spirito (Mt 3:16). Elirinte el la akvo, li estis kondukita de la Spirito al la dezerto por esti tentata. Sciante pri sia potenco transformi ŝtonojn je panoj, salti de sur altaj domoj ne difektinte sin kaj tiel plu, tiuj ĉi tentoj, verŝajne, estis en lia menso. Se tiuj tentoj estus proponitaj al Jesuo de iu persono, kaj Jesuo scius, ke la persono estas pekema, por Jesuo estus pli facile toleri ilin, ol tiujn, kiuj devenis el lia propra menso.

2. La tento preni al si mem la regnojn estus multe pli forta, se ĝi venis de interne de Jesuo. La menso de Jesuo entenis ĉiujn vortojn de la Skribo, kaj la tento elekti pli oportunajn lokojn en la Skribo, por pravigi pli facilan por si vojon al atingo de la starigita antaŭ li celo, sendube, estis tre granda.

Kiam Jeĥezkel staris sur tre alta monto, li vidis la estontan Regnon (Jeĥ 40:2); Johano vidis "sanktan Jerusalemon" de sur "granda kaj alta monto" (Ap 21:10). Jesuo, do, vidis ĉiujn regnojn de la mondo de la estonteco (Lk 4:5), t. e. la Regnon, kiam "la regno de la mondo fariĝos regno de nia Sinjoro kaj de Lia Kristo" (Ap 11:15). Povas esti, en tiu ĉi momento li pensis pri Moseo, pri lia kvardekjara vagado tra la dezerto (kmp. kvardektaga de Jesuo), kiel li rigardis al la Promesita Lando (la Regno) de sur la monto Nebo. En Dan 4:17, 25, 32; 5:21) estas emfazite, ke "la Plejaltulo regas en la regno de homoj kaj donas ĝin al tiu, al kiu Li volas". Jesuo sciis, ke nur Dio, sed neniu krom Li, povas doni al li la regnon. Pro tio por li ne estus granda tento, se iu malbona monstro deklarus al li, ke ĝi povas doni al li la Regnon, ĉar la tuta potenco apartenas nur al Dio.

Formatted: Font: Bold

Formatted: Thai Distributed Justification, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

Tamen Jesuo ankaŭ sciis, ke la Patro lia volas doni al li tiun ĉi Regnon, kaj pro tio "la diablo" interne de Jesuo instigis lin ekposedi tiun Regnon senprokraste. Ja li povus trovi al tiu ĉi sia ago klarigon, ke Dio, Dio Patro donis al li la potencon por la estonteco (Joh 5:26, 27), kaj ke li rajtas "repreni" aŭ "demeti" sian vivon (Joh 10:18), kvankam fakte la tuta potenco estas donita al li nur post lia morto kaj reviviĝo (Mt 28:18).

3. Bone sciante la Skribon, Kristo vidis similecon inter si mem kaj Elija, kiu post kvardektaga estado en la dezerto havis kolapson (1 Reĝ 19:8), kaj Moseo, kiu post kvardejara vagado en la dezerto perdis sian heredon de la lando. Jesuo, post sia kvardektaga fasto en la dezerto, estis en simila stato - stato proksima al falo en pekon. Moseo kaj Elija malsukcesis pro sia homa malforteco, sed ne pro iu persono, nomata la diablo. La sama homa malforteco, "satano", aŭ kontraŭulo, tentis ankaŭ Jesuon.

4. "Kaj la diablo diris al li: Se vi estas Filo de Dio..." (Lk 4:3). La demando - ĉu efektive li estas la Filo de Dio, ne la filo de Jozefo, kiel opiniis ĉiuj ceteraj homoj (Lk 3:23; Joh 6:42), aŭ eĉ eksteredziĝe naskita - verŝajne ĉiam tentis Jesuon. Li estis la sola homo, kiu ne havis homan patron. En Fil 2:8 ni vidas, ke Jesuo bone sciis, ke kvankam li havas la devenon de Dio, samtempe li havas la homan naturon. Pro tio la duboj pri lia propra naturo estis por li fortaj tentoj.

5. La tentoj de Jesuo estis regataj de Dio kaj servis por lia spirita instruo. Ĉiuj vortoj, cititaj de Jesuo por sin fortikigi kontraŭ siaj malbonaj deziroj ("diablo"), estis el la sama parto de Readmono, kiu priskribas la travivaĵojn de Izraelo en la dezerto. Jesuo klare vidis la paralelon inter sia stato kaj la ilia.

Formatted: Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

| **Read 8** | **Mt 4 / Lk 4** |
|---|---|
| Verso 2<br>"...Kondukis vin la Eternulo, via Dio, dum kvardek jaroj tra la dezerto, por humiligi vin, por elprovi vin, por sciiĝi, kio estas en via koro, ĉu vi obeos Liajn ordonojn aŭ ne." | "Jesuo estis kondukita supren de la Spirito en la dezerton" por "kvardek tagoj". Tie Jesuo estis tentata, sed li venkis ĉiujn tentojn, citante la vortojn de la Skribo, kiuj estis en lia koro (Ps 119:11). |
| Verso 3<br>"Kaj Li humiligis vin, kaj malsatigis vin... kaj nutris vin per manao... por montri al vi, ke ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉio (vorto), kio eliras el la buŝo de la Eternulo..." | "Li (Jesuo) poste malsatis". En Joh 6 Jesuo komparas manaon kun la Vorto de Dio, per kiu li vivis en la dezerto. Li komprenis, ke spirite li vivis per la Vorto de Dio. "Sed responde li diris: Estas skribite: Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto... de Dio" |
| Verso 5<br>"Kaj sciu en via koro, ke kiel homo instruas sian filon, tiel la Eternulo, via Dio, instruas vin" | Jesuo, sendube, meditis pri siaj agoj kaj pri tio, ke Dio rilatas al li, kiel al Sia Filo (2 Sam 7:14; Ps 89:32). |

Jesuo tiamaniere montris al ni, kiel ni devas legi kaj studi la Vorton - li imagis sin mem en la stato de Izrael en la dezerto kaj uzis por si ilian sperton dum sia estado en la dezerto.

**KOMENTO 21: Milito En La Ĉielo**

Ap 12:7-9: "Kaj fariĝis milito en la ĉielo: Miĥael kaj liaj anĝeloj ekmilitis kontraŭ la drako; kaj militis la drako kaj ĝiaj anĝeloj; kaj ne prosperis al ili, kaj ne plu troviĝis ilia loko en la ĉielo. Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento, nomata Diablo kaj Satano, la trompanto de la tuta mondo; ĝi ĵetiĝis sur la teron kaj ĝiaj anĝeloj ĵetiĝis kun ĝi".

**Popularа opinio:**

**Formatted:** Left, Indent: Left: 1.23 cm, First line: 1.27 cm, Right: 0.46 cm
**Formatted Table**
**Formatted:** Left, Indent: Left: 0 cm, First line: 1.25 cm, Right: 0.46 cm
**Formatted:** Font: 16 pt
**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm, Right: 0.46 cm
**Formatted:** Indent: First line: 1.27 cm, Right: 0.46 cm, Space Before: 0 pt
**Formatted:** Font: Bold
**Formatted:** Indent: First line: 0 cm
**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm
**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm
**Formatted:** Indent: Left: 1.27 cm, First line: 0 cm
**Formatted:** Font: Bold
**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

Ĉi tio estas unu el la plej popularaj tekstopartoj, kiujn oni uzas por sugesti, ke okazis ribelo en la ĉielo inter la anĝeloj, kun la rezulto, ke la diablo kaj liaj anĝeloj ĵetiĝis sur la teron, kie, en la formo de la serpento, ili komencis krei malfeliĉon kaj pekon.

**Klarigoj**:

1. Ĉion, kion ni eksciis el tiu ĉi parto, ni devas uzi por kompreni tiun ĉi citaĵon. Ni jam ellernis, ke anĝeloj ne povas peki, sekve, en la ĉielo ne povas okazi ribelo. Tiu ĉi citaĵo devas esti komprenata tiel, ke ne ekzistas pekantaj anĝeloj, ke ili ne devigas peki homojn surtere. Ni devas ĉiam memori, ke peko venas elinterne de ni mem, sed ne de ekstere (Mt 7:20-23).

2. Se la serpento estis elpelita de la ĉielo, tio signifas, ke komence ĝi estis tie. Sed la laŭlitera serpento estis kreita de Dio en Eden el la tero (Gen 1:24, 25). Tie forestas mencio, ke la diablo venis de la ĉielo kaj eniĝis en la serpenton.

3. Notu, ke tie ne temas pri pekantaj anĝeloj aŭ pri ribelo kontraŭ Dio, temas nur pri milito en la ĉielo.

4. Post la drama evento, priskribita en Ap 12:7-9, verso 10 mencias: "Kaj mi aŭdis grandan voĉon en la ĉielo, dirantan: Nun fariĝis la savo kaj la potenco kaj la reĝeco de nia Dio, kaj la aŭtoritato de Lia Kristo; ĉar ĵetiĝis malsupren la akuzanto de niaj fratoj, kiu tage kaj nokte akuzis ilin antaŭ nia Dio". Se tio, pri kio diras vv. 7-9 okazis en la komenco de la mondo, antaŭ la tempo de Adam kaj Eva, kiel oni povas diri, ke de post la falo de satano venis savo kaj regno de Dio? Post la falo de Adam en pekon la homaro komencis sian malĝojan historion de sklaveco al peko, kaj malsukceso. Ĉu oni povas nomi tiun staton "savo" aŭ "la reĝeco de nia Dio"? Pro tio, ke la diablo, la akuzanto, estis forĵetita surteren, en la ĉielo estis ĝojo. Kial tio estis ĝojo, se ĝia forĵeto surteren alportis al homoj pekon kaj malfeliĉojn. Se falo de la ĉieloj surteren kompreniĝas ne laŭlitere, sed metafore, kiel falo de potenco (kiel en Jes 14:12; Jer 51:53; Plor 2:1; Mal 11:23), la senco iĝas pli klara. Se ĉio tio okazis antaŭ la tempo de Adam, aŭ almenaŭ antaŭ la homa falo en pekon, kiel povis la diablo akuzi "tage kaj nokte" niajn fratojn, se ili tiam ankoraŭ ne ekzistis?

5. Ĉi tie forestas iu ajn indiko, ke ĉio tio okazis en la ĝardeno de Eden. En Ap 1:1 kaj 4:1 estas la grava rimarko, ke la Apokalipso estas profetaĵo pri tio, "kio devas baldaŭ okazi". Pro tio ĝi ne estas priskribo de la eventoj en Eden, sed profetaĵo pri tio, kio okazos en iu tempo post la unua jarcento, kaj post kiam estis donita la Apokalipso. Ĉiu, kiu sincere respektas la vorton de Dio, vidos, ke tiu ĉi argumento sola refutas ĉiujn provojn alligi Ap 12 al la eventoj

Formatted: Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

en la ĝardeno de Eden. Kaj krom tio, aperas la demando - kial tiom gravaj informoj pri la eventoj en Eden estas kaŝitaj en la fino mem de la Biblio?

6. "Kaj ĵetiĝis malsupren la granda drako, la antikva serpento" (Ap 12:9). La drako havis sep kapojn kaj dek kornojn (v. 3), kaj pro tio ĝi ne estis la serpento laŭlitere. Tiu fakto, ke ĝi nomiĝas "la antikva serpento", montras, ke ĝi similas al tiu serpento, kiu estis en Eden. Analogie, "la pikilo de la morto estas la peko" (1 Kor 15:56) ne signifas, ke la morto estas laŭlitere serpento, kvankam ili havas komunan karakterizon pro sia ligo kun peko.

7. La diablo estis ĵetita sur la teron, "havante grandan koleron, sciante, ke li havas nur malgrandan tempon" (Ap 12:12). Se la diablo estus ĵetita en Edenon, ĝi havus eblecon turmenti homojn dum sia tuta historio, kiu apenaŭ estas "malgranda tempo" por krei detruegon, ĉar la historio de la homaro komenciĝis ĵus.

8. Kiel la diablo povis trompadi la "tutan mondon" (v.9) antaŭ ol ĝi estis forĵetita de la ĉieloj, se antaŭ la apero de Adam homoj ne ekzistis?

9. En v. 4 ni legas: "Kaj ĝia vosto trenis trionon de la steloj de la ĉielo, kaj ĵetis ilin sur la teron". Por tion kompreni laŭlitere - kaj laŭ la populara opinio necesas kompreni Ap 12 laŭlitere - la efektiva dimensio de la drako estas neimageble granda, ja nur ĝia vosto trenis trionon da la universo (aŭ, almenaŭ, da la suna sistemo). La tero estas tro malgranda por lokigi tiom vaste etenditan beston. Multaj steloj estas pli grandaj, ol nia tero; kiel povus alteriĝi triono da ili? Triono de la steloj etendiĝas preskaŭ je kvin trilionoj kilometroj. Kian grandan voston havas la drako! Kaj notu, ke ĉio tio okazis aŭ okazos post la unua jarcento PK, post tiam, kiam estis donita tiu ĉi profetaĵo.

10. Konsiderante ĉion pli supre diritan pri la profetaĵo en Ap 12, oni povas konkludi, ke la eventoj, priskribitaj en ĝi, kaj ankaŭ en la tuta Apokalipso, ne povas esti plenumitaj laŭlitere. Kaj ne sen kaŭzo estas dirite en Ap 12:1,3 pri "granda signo", t. e. ilin necesas kompreni metafore, simbole.

11. Legante pri la faroj de la diablo sur la tero, ni ne trovas mencion, ke ĝi devigas homojn peki. Male, ni vidas, ke ĝi malsukcesis okazigi malfeliĉojn surtere. Kaj tio kontraŭdiras al la populara interpreto.

12. Por ĝuste kompreni la sencon de tiu ĉi citaĵo, necesas havi ĝustan respondon al la demando: "Ĉu efektive estis milito en la ĉielo, aŭ la vorto "ĉielo" ĉi tie estas uzata figure? Pli supre ni jam klarigis, ke en la Skribo la vorto "ĉielo" povas signifi lokon de aŭtoritato. La libro Apokalipso estas

skribita en la figura, simbola lingvo, kaj ankaŭ ĉi loke ni devas kompreni la vorton "ĉielo" figure.

La virino en v.1 "vestita per la suno, kaj la luno sub ŝiaj piedoj, kaj sur ŝia kapo krono el dek du steloj", ne povas esti komprenata laŭlitere, ĉar ŝi ne povas esti laŭlitere vestita per la suno kaj havi sur sia kapo dek du stelojn, ĉiu el kiuj estas pli granda, ol la tero.

En v.3 aperas alia signo - ruĝa drako. Kutime "la ĉielo" tie ĉi estas komprenata laŭlitere, sed kial la sama ĉielo en v.1 estas priskribita metafore? En v.4 la drako ĵetis trionon de la steloj de la ĉielo sur la teron. Ni jam diris, ke pro la efektivaj dimensioj de la steloj kaj la tero tio ne povas rilati al la realaj steloj kaj la ĉielo. La Regno de Dio estos establita sur la tero (Dan 2:44; Mt 5:5). Se la tero estos detruita per falantaj al ĝi grandegaj steloj, la promeso de Dio pri establigo surtere de la Regno ne plenumiĝos.

La virino en la ĉielo "naskis filon", kiu "estis forkaptita supren al Dio kaj al Lia trono" (v.5). La trono de Dio estas en la ĉielo. Se la virino jam estis en la ĉielo, kial ŝia filo devis esti "forkaptita" al la ĉielon? Ŝi devis esti simbolo de io sur la tero, kvankam en figura "ĉielo". Poste ŝi "forkuris en la dezerton" (v. 6). Se ŝi estus en laŭlitera ĉielo, tio signifas, ke estas dezerto en la ĉielo. Estus pli logike kompreni, ke ŝi estis en la ĉielo metafore, kaj pli poste forkuris en laŭliteran aŭ figuran dezerton surtere.

Ni legu v.7: "Kaj fariĝis milito en la ĉielo". Ĉio antaŭe skribita en Ap 12 pri la ĉielo, estis esprimita metafore. Sekve, en v.7 temas ankaŭ pri metafora ĉielo. Kaj efektive tiel devas esti, ĉar en la reala ĉielo ekzistas nek peko, nek ribelo (Mt 6:10; Ps 5:4,5; Ĥab 1:13).

Al tiuj, kiuj kredas je la ortodoksa ideo pri la diablo, la aŭtoro de tiuj ĉi linioj iufoje donas la demandon: "Ĉu povas vi doni al mi koncizan Biblian historion pri la diablo kun via interpreto de Bibliaj citaĵoj? La respondoj estis diversaj, ekzemple, tiaj:

a) La diablo estis anĝelo en la ĉielo, ĵetita surteren, en Edenon. Pri tio skribas Gen 1.

b) Li venis sur la teron por edziĝi, en Gen 6.

~~b)~~c) Oni diras, ke en la tempo de Ijob, li povis esti jen en la ĉielo, jen sur la tero.

ĉ) En la tempo de Jesaja li estis forĵetita de la ĉielo al la tero.

**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

**Formatted:** Numbered + Level: 1 + Numbering Style: a, b, c, … + Start at: 1 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.12 cm + Indent at: 2.12 cm

**Formatted:** Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

d) En Zeĥarja 3 li denove estas en la ĉielo.

e) Li estas sur la tero en Mt 4. Li estis denove ĵetita ĉe la morto de Jesuo, konforme al la populara opinio pri "la princo de tiu ĉi mondo", kiu estis ĵetita en tiu tempo.

f) Profetaĵo pri elĵeto de la diablo estas en Ap 12.

El tio pli supre dirita sekvas, ke homa populara opinio pri la diablo, elĵetita de la ĉielo pro peko, ne povas esti vera, ĉar laŭ ĝi li eĉ post sia elĵeto denove de tempo al tempo revenas en la ĉielon. Sekve, kaj la ĉielon, kaj la diablon necesas kompreni en la metafora senco.

**Sugestaj klarigoj:**

1. Por klarigi la tutan ĉapitron Ap 12 (eĉ tre koncize), necesas klarigi la tutan Apokalipson, sed tio ne povos enspaciĝi en tiu ĉi libro.

2. La konflikto en figura ĉielo, t. e. loko de aŭtoritato, estis inter du potencaj grupoj. Ĉiu el ili havis adeptojn aŭ anĝelojn. Notu, ke la diablo kaj satano ofte asociiĝas kun la Roma aŭ Juda sistemoj.

3. Ke la diablo-drako reprezentas iun specon de politika potenco montras tiu fakto, ke ĝi havis "sep kapojn... kaj sur siaj kapoj sep diademojn" (v.3). Ap 17:9,10 ankaŭ diras pri la drako: "Ĉi tie estas la signifo, kiu havas saĝecon" - t. e. ne provu kompreni tiun beston, kiel reala estaĵo - "La sep kapoj estas sep montoj... Kaj ili estas sep reĝoj". Unu el tiuj reĝoj, kiuj "devos resti kelkan tempon", verŝajne, asociiĝas kun la diablo-drako, kiu "havis nur mallongan tempon" en Ap 12:12.

**PARTO 6: Demandoj**

1. Kiu respondecas pri niaj problemoj kaj malfeliĉoj?

a) Dio

b) Hazardo

c) Pekema estaĵo, nomita satano

d) Pekemaj estaĵoj, nomitaj demonoj

2. Kiu respondecas pri niaj tentoj peki?

**Formatted:** Indent: Left: 1.48 cm, Hanging: 0.63 cm

**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

**Formatted:** Font: Bold

**Formatted:** Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.27 cm

**Formatted:** Indent: Left: 0 cm, First line: 1.48 cm

**Formatted:** Font: Bold

**Formatted:** Indent: Left: 1.27 cm, First line: 0 cm

**Formatted:** Font: Bold

**Formatted:** Font: Not Bold

**Formatted:** Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

**Formatted:** Indent: Left: 1.27 cm, First line: 0 cm

a) Nia propra homa naturo

b) Dio

c) Malbonaj spiritoj

d) Pekema estaĵo, nomita satano

3. Kion signifas la vorto “diablo”?

a) Peko

b) La serpento

c) Falsa akuzanto/ kalumnianto

d) Lucifer

4. Kion signifas la vorto “satano”?

a) Pekulo

b) Kontraŭulo

c) Besto

d) Reĝo de demonoj

5. Ĉu povas la vorto “satano” rilati al bonaj homoj?

6. Kion povas signifi la vortoj “satano” kaj “diablo” en la figura senco?

7. Kiel vi komprenas la vorton “demonoj”, pri kiuj estas dirite en la Nova Testamento?

a) Pekemaj anĝeloj

b) Malsanoj

c) La lingvo de tiu tempo por malsanoj, kiujn (laŭ homa opinio) kaŭzis demonoj

d) Spiritaj estaĵoj

Formatted: Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

Formatted: Numbered + Level: 1 + Numbering Style: 1, 2, 3, … + Start at: 4 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.17 cm + Indent at: 2.17 cm

Formatted: Bullets and Numbering

Formatted: Numbered + Level: 1 + Numbering Style: a, b, c, … + Start at: 1 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.17 cm + Indent at: 2.17 cm

Formatted: Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

Formatted: Numbered + Level: 1 + Numbering Style: 1, 2, 3, … + Start at: 4 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.17 cm + Indent at: 2.17 cm

Formatted: Bullets and Numbering

Formatted: Numbered + Level: 1 + Numbering Style: a, b, c, … + Start at: 1 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.17 cm + Indent at: 2.17 cm

8. Kiel vi komprenas la vorton “serpento”, en la ĝardeno de Eden?

------------------------------------------------------------------------------------

Formatted: Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

Formatted: Numbered + Level: 1 + Numbering Style: 1, 2, 3, … + Start at: 4 + Alignment: Left + Aligned at: 1.48 cm + Tab after: 2.17 cm + Indent at: 2.17 cm

Formatted: Bullets and Numbering

Formatted: Indent: Left: 1.48 cm, First line: 0 cm

Formatted: Thai Distributed Justification, Indent: Left: 1.48 cm

Formatted: Font: 12 pt

# PARTO 2

## *“La evangelio pri... la nomo de Jesuo Kristo”*

## ĈAPITRO 7

# JESUO KRISTO

### 7.1 PROFETAĴOJ DE LA MALNOVA TESTAMENTO PRI JESUO

En Ĉapitro 3 ni montris, ke la intenco de Dio rilate al savo de homoj koncentriĝis al Jesuo. La promesoj, kiujn Li donis al Eva, Abraham kaj David diris pri Jesuo, kiel pri ilia laŭlitera posteulo. Fakte, la tuta Malnova Testamento profetas pri Jesuo. La leĝo de Moseo, al kiu obeis la Izraelidoj antaŭ la tempo de Kristo, antaŭdiris Jesuon: “... la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukanta al Kristo” (Gal 3:24). Ekzemple, dum la hebrea festo Pasko oni buĉis sendifektan ŝafidon (El 12:3-6), ĉi tiu ŝafido reprezentis la oferdonon de Jesuo: “la Ŝafido de Dio, kiu forportas la pekon de la mondo” (Joh 1:29; 1 Kor 5:7). La sendifekteco de ĉiuj oferitaj bestoj indikas la perfektan karakteron de Jesuo (El 12:5; kmp. 1 Pet 1:19).

La psalmoj kaj profetaĵoj de la Malnova Testamento havas multajn indikojn pri tio, kia estos Mesio. Precipan signifon ili donas al lia morto. Judaismo rifuzas akcepti la ideon pri la morteco de Mesio pro tio, povas esti, ke ili malatentas tiujn profetaĵojn. Jen kelkaj el ili:

| **Profetaĵoj de la Malnova Testamento** | **Efektiviĝo en Kristo** |
|---|---|
| “Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?” (Ps 22:1). | La samaj vortoj estis diritaj de Kristo sur la kruco (Mt 27:46). |
| “Sed mi estas vermo kaj ne homo; Mokata de la homoj, malestimata de la popolo. Ĉiuj, kiuj min vidas, insultas min, Malfermegas la buŝon, balancas la kapon, dirante: “Li apogis sin al la Eternulo: Tiu helpu lin; Tiu savu lin, se Li amas lin” (Ps 22:6-8). | Izraelo insultis kaj mokridis Jesuon (Lk 23:35; 8:53); ili balancis la kapojn (Mt 27:39), ili diris la samajn vortojn, kiam li estis sur la kruco (Mt 27:43). |

| | |
|---|---|
| “Mia lango algluiĝis al mia palato... Ili mordas miajn manojn kaj piedojn” (Ps 22:15,16). | Sur la kruco Jesuo soifis (Joh 19:28). Oni trapikis la piedojn kaj manojn de Jesuo dum la krucumo. |
| “Ili dividas miajn vestojn inter si, Pri mia tuniko ili lotas” (Ps 22:18). | “Kaj krucuminte lin, ili dividis inter si liajn vestojn, ĵetante lotojn” (Mt 27:35). |
| Notu, ke Ps 22:22 estas citita en Heb 2:12 | |
| “Mi fariĝis fremda por miaj fratoj, Nekonato por la filoj de mia patrino. Ĉar fervoro pri Via domo min konsumis (Ps 69:8,9). | Tiuj ĉi vortoj bone respegulas la staton de Kristo, forlasita de siaj judaj gefratoj kaj de sia propra familio (Joh 7:3-5; Mt 12:47-49). Ankaŭ Joh 2:17 citas tion. |
| “Kaj ili donis al mi por manĝo galon, Kaj en mia soifo ili trinkigis al mi vinagron (Ps 69:21). | “Ĉi tio okazis al Kristo, kiam li estis sur la kruco (Mt 27:34). |

La tuta ĉapitro Jes 53 estas mirinda profetaĵo pri la morto kaj releviĝo de Kristo, ĉiu ĝia verso plenumiĝis ekzakte. Jen du ekzemploj:

| | |
|---|---|
| “Kiel ŝafido kondukata al buĉo kaj kiel ŝafo muta antaŭ siaj tondantoj, li ne malfermis sian buŝon” (Jes 53:7). | Kristo, la Ŝafido de Dio, silentis dum oni procesis kontraŭ li (Mt 27:12,14). |
| “Inter malbonaguloj oni donis al li tombon, inter riĉuloj post lia morto” (Jes 53:9). | Jesuo estis krucimita inter krimuloj (Mt 27:38), sed estis entombigita en la tombo de riĉa homo (Mt 27:57-60). |

Ne estas mirinde, ke la Nova Testamento memorigas al ni, ke "la leĝo kaj profetoj" de la Malnova Testamento estas la bazo de nia kompreno de Kristo (Ag 26:22; 28:23; Rom 1:2,3; 16:25,26). Jesuo mem avertis, ke se ni ne komprenos ĝuste "Moseon kaj la profetojn", ni ne komprenos lin, Jesuon (Lk 16:31; Joh 5:46,47).

Tiuj faktoj, ke la leĝo de Moseo indikis Jesuon kaj, ke la profetoj profetis pri li, estas sufiĉa pruvo, ke Jesuo ne ekzistis kiel reala persono antaŭ sia naskiĝo. La falsa doktrino pri la reala persona ekzisto de Kristo antaŭ lia naskiĝo fakte neniigas la ofte ripetatajn promesojn, ke li estos la semo de Eva, Abraham kaj David. Se li jam estus ekzistanta ie en la ĉielo, kiam Dio estis donanta la promesojn, ke ilia semo <u>estos</u> Mesio, tiuj ĉi promesoj estus nekorektaj. La genealogio de Jesuo, priskribita en Mt 1 kaj en Lk 3, pruvas, ke Jesuo devenas de tiuj homoj, al kiuj tiuj ĉi promesoj estis donitaj.

La promeso, donita al David koncerne Kriston, eliminas ĉiun penson, ke Jesuo reale ekzistis en tiu tempo, kiam tiu promeso estis donata: "Mi <u>starigos</u> post vi vian idaron, kiu <u>eliros</u> el via ventro... Mi <u>estos</u> al li patro, kaj li <u>estos</u> al Mi filo" (2 Sam 7:12,14). Atentu, ke tie ĉi estas uzata la futura tempo. Se Jesuo estus jam ekzistanta, Dio ne dirus, ke li <u>estos</u> filo al Li. La vortoj, ke la semo "<u>*eliros el via ventro*</u>", montras, ke li laŭlitere, reale devenos de David. "La Eternulo ĵuris al David veron... Frukton de via ventro Mi sidigos sur via trono" (Ps 132:11).

Salomono estis la unua, al kiu tiu promeso rilatis, sed ĉar li jam estis ekzistanta en la tempo, kiam tiu promeso estis donata (2 Sam 5:14), la ĉefa plenumo de tiu ĉi promeso devis efektiviĝi je posteulo de David; tiu posteulo estos la filo de David – Kristo (Lk 1:31-35). "Mi aperigos de David markoton virtan" (Jer 23:5).

La futura tempo estas uzata ankaŭ en aliaj profetaĵoj pri Kristo. "Profeton Mi <u>starigos</u> por ili (la Izraelidoj) el la mezo de iliaj fratoj (Read 18:18) – estas citita en Ag 3:22,23, kie la vorto "Profeto" signifas Jesuon. "Jen virgulino (Maria) gravediĝis, kaj ŝi <u>naskos</u> filon kaj ŝi <u>donos</u> al li la nomon Emanuel" (Jes 7:14). Tio ĝuste efektiviĝis en la naskiĝo de Kristo (Mt 1:23).

## 7.2 NASKITA DE LA VIRGULINO

Ĉio, kio estas skribita pri la koncipo kaj la naskiĝo de Kristo ne permesas opinii, ke li ekzistis pli frue, antaŭ sia naskiĝo. Tiuj, kiuj kredas je la falsa doktrino pri la "Triunuo", estas devigitaj konkludi, ke en la sama tempo en la ĉielo ekzistis tri personoj, kaj poste unu el ili malaperis kaj iamaniere fariĝis la embrio en la utero de Maria, sed du la aliaj restis en la ĉielo. Ĉi tiu komplika teologio tute ne konformas al la doktrino de la Skribo. Ĉio dirita en la Skribo

pri la deveno de Kristo ne donas kaŭzojn opinii, ke Kristo reale forlasis la ĉielon kaj eniris en Marian. Kaj la foresto en la Skribo de iaj pruvoj pri tio estas "mankanta ĉenero" en la dogmo pri la Triunuo.

La anĝelo Gabriel aperis antaŭ Maria por doni la mesaĝon: "Vi gravediĝos en via ventro kaj naskos filon, kaj vi nomos lin Jesuo. Li estos granda, kaj estos nomata Filo de la Plejaltulo... Kaj Maria diris al la anĝelo: Kiel estos tio, ĉar mi ne konas viron (t. e. ŝi estis virgulino)... Kaj la anĝelo responde diris al ŝi: La Sankta Spirito venos sur vin, kaj la potenco de la Plejaltulo superombros vin; pro kio ankaŭ la naskotaĵo estos nomita sankta, la Filo de Dio" (Lk 1:31-35).

Dufoje ĉi tie estas emfazite, ke Jesuo *estos* la Filo de Dio post sia naskiĝo. Kaj notu, ke denove ĉi tie estas uzata la futura tempo, ekzemple: "li *estos* granda". Se Jesuo jam estus ekzistanta en tiu tempo, kiam la anĝelo diris tiujn vortojn, li jam estus granda.

### La Koncipo De Jesuo

Per la Sankta Spirito (la spirito/ povo de Dio) Maria gravediĝis je Jesuo, ne "konante viron". Do, Jozef ne estis la natura patro de Jesuo. Necesas kompreni, ke la Sankta Spirito ne estas persono (vidu Parton 2); Jesuo estis la filo de Dio, sed ne de la Sankta Spirito. La Sankta Spirito "superombris" Marian, *pro kio* la naskotaĵo estis nomita la Filo de Dio (Lk 1:35). La vortoj "pro kio" indikas, ke sen la Sankta Spirito Maria ne gravediĝus je Jesuo kaj Jesuo ne ekzistus.

Tiu fakto, ke Maria gravediĝis kaj naskis Jesuon (Lk 1:31), pruvas, ke li ne ekzistis reale antaŭ sia naskiĝo. Se ni "koncipas" iun ideon, ĝi aperas ene en ni. Same Jesuo estis koncipita en la ventro de Maria kaj trapasis ĉiujn stadiojn de la homa evoluado same, kiel ordinara homo. Joh 3:16, la plej fama verso de la Biblio, diras, ke Jesuo estis "la solenaskita Filo" de Dio. Milionoj da homoj, kiuj citas tiun verson, ne atentas ĝian signifon. Se Jesuo estis "solenaskita" de la patro (Dio), certe lia patro estis pli maljuna ol li – Dio ne havas komencon (Ps 90:2), sekve, Jesuo ne povis esti Dio Mem (pli detale ni parolos pri tio en Parto 8).

Necesas memori, ke Jesuo ne estis kreita, kiel Adam, sed li estis naskita de Dio, kaj tio klarigas intimajn interligojn inter Dio kaj Jesuo – "Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si" (2 Kor 5:19). Tio, ke li ne estis kreita el polvo, sed naskita de Dio, helpas al ni kompreni lian naturan inklinon sekvi laŭ la vojo de Dio, lia Patro.

Jes 49:5,6 enhavas profetaĵon pri Jesuo, kiel lumo de la mondo, kaj tiu profetaĵo plenumiĝis en Jesuo (Joh 8:12). Jesuo diris: "La Eternulo, kiu el la patrina ventro kreis min Lia servanto" (Jes 49:5). Tiele, Kristo estis kreita de

Dio "el la patrina ventro" pere de la Sankta Spirito. La ventro de Maria estis la loko de la reala origino de Kristo.

En Parto 7.1 ni diris, ke Ps 22 profetas pri la pensoj de Kristo sur la kruco. Jesuo pensis: "Vi (Dio) eltiris ja min en la ventro... Al Vi mi estis ĵetita de post momento de mia naskiĝo; De la ventro de mia patrino Vi estas mia Dio" (Ps 22:9,10). Dum Kristo estis mortanta, li pensis pri sia origino el la ventro de sia patrino Maria, kie li estis kreita pere de la potenco de Dio. La priskribo en la Evangelio de Maria mem, kiel la "patrino" de Kristo, detruas la ideon, ke Jesuo ekzistis pli frue, ol li estis naskita de Maria.

Maria estis ordinara homo, kaj ŝi havis ordinarajn gepatrojn, tion pruvas tiu fakto, ke la kuzino de Maria naskis Johanon la Baptiston, ordinaran homon (Lk 1:36). La romkatolika ideo, ke Maria ne havis ordinaran homan naturon, signifas, ke Kristo povis esti nek la filo de homo, nek "la filo de Dio". Tamen la vortojn "la filo de homo" kaj "la filo de Dio" ofte oni povas renkonti en la Nova Testamento. Fakte, li estis "la filo de homo", ĉar li havis ordinaran homan patrinon; kaj li estis ankaŭ "la filo de Dio", ĉar Dio pere de la Sankta Spirito "superombris" Marian (Lk 1:35), kaj tio signifas, ke lia patro estis Dio. Tiu ĉi logika konkludo nuliĝas, se Maria ne estis ordinara virino.

"Ĉu povas purulo deveni de malpurulo? Neniu ... Kio estas homo, ke li povus esti pura kaj ke naskito de virino povus esti prava?.. Kaj kiel naskito de virino povas esti pura?" (Ijob 14:4; 15:14; 25:4). Maria estis "naskito de virino", ŝi havis ordinarajn homajn gepatrojn kaj havis nian pekeman homan naturon, kiun ŝi transdonis al Jesuo, "*naskita* el virino" (Gal 4:4). La vortoj "naskita el virino" pruvas, ke Kristo ne povus reale ekzisti, se li ne estis naskita de ŝi.

La Evangelio multfoje diras pri la homa naturo de Maria. Almenaŭ trifoje Jesuo riproĉis ŝin pro manko de spirita percepto (Lk 2:49; Joh 2:4); ŝi ne povis kompreni kelkajn de liaj diroj (Lk 2:50). Ĉar li, havante homan naturon, estis la filo de Dio, li, certe, estis pli perceptema ol ŝi. Post la naskiĝo de Jesuo (Mt 1:25), Jozef "ekkonis" Marian, kaj mankas kialoj opinii, ke ekde tiu momento ili ne havis normalajn geedzajn interrilatojn.

La mencio pri lia patrino kaj liaj fratoj en Mt 12:46,47 indikas, ke Maria naskis post Jesuo aliajn gefilojn. Jesuo estis nur "ŝia unuanaskito". La katolika doktrino, ke Maria restis virgulino kaj poste supreniris al la ĉielo, absolute ne havas Biblian pruvon. Kiel ĉiu homo, Maria maljuniĝis kaj mortis; kaj krom tio, en Joh 3:13 ni legas: "Kaj neniu supreniris en la ĉielon". Tiu fakto, ke Kristo havis homan naturon (Heb 2:14-18; Rom 8:3), signifas, ke ankaŭ lia patrino devas havi ĝin, ĉar lia Patro havis tute alian naturon.

## 7.3 LA LOKO DE KRISTO EN LA PLANO DE DIO

Dum la evoluo de la homa historio Dio ne ŝanĝas Siajn planojn. Dekomence de la kreado Dio havis komplete formulitan planon (Joh 1:1), kaj ekde la komenco mem Dio deziris havi Filon. La tuta Malnova Testamento montras diversajn aspektojn de la Dia plano de homa savo pere de Kristo.

Ni ofte montris, ke pere de la profetaĵoj de la profetoj, la ekzemploj el la leĝo de Moseo kaj la promesoj de Dio, la Malnova Testamento rivelas al ni la intencojn de Dio pri Kristo. Eĉ la mondkreadon mem Dio komencis, sciante, ke Li havos Filon. Nur pro Kristo, Dio permesis al homa historio daŭri (Heb 1:1,2). El tio sekvas, ke la revelacio de Dio al homoj dum jaroj, kiel diras la Malnova Testamento, estas kunligita kun Kristo.

Estas malfacile por ni imagi grandecon de Kristo kaj lian gravan rolon en planoj de Dio. Kristo estis en la planoj de Dio ekde la komenco mem, kvankam li venis en la realan mondon, naskiĝinte de Maria. Heb 1:4-7,13,14 emfazas, ke Kristo ne estis anĝelo; kaj malgraŭ tio, ke li en sia natura vivo ne havis pli grandan gravecon, ol anĝeloj (Heb 2:7), li estis glorita pli multe ol ili, ĉar li estis la "*solenaskita Filo*" de Dio (Joh 3:16). Ni jam montris, ke la Skribo diras nur pri unu formo de ekzisto – ekzisto en korpa formo. Sekve, Kristo ne ekzistis kiel "spirito" antaŭ sia naskiĝo. 1 Pet 1:20 diras: Kristo "estis antaŭdifinita antaŭ la fondo de la mondo, sed elmontrita en la fino de la tempoj pro vi"

Jesuo okupas la centran lokon en la Evangelio, lin Dio "promesis antaŭe per Siaj profetoj en la sanktaj skriboj, pri Sia Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno, la difinita Filo de Dio en potenco laŭ la Spirito de sankteco per la releviĝo de la mortintoj" (Rom 1:1-4).

Tiuj ĉi vortoj diras al ni, ke Kristo:

1. Estis promesita en la Malnova Testamento, t. e. li estis en la plano de Dio;
2. Estis kreita, kiel reala persono, semo de David, per naskiĝo de la virgulino;
3. Pro sia perfekta karaktero ("la Spirito de sankteco") elmontrita dum lia surtera vivo
4. Estis revivigita kaj denove anoncita, kiel la Filo de Dio en la predikoj de la spiritgvidataj apostoloj.

### Antaŭvido De Dio

Se ni agnoskas, ke Dio scias *ĉion*, kio okazos en la "estonteco", por ni estos pli facile kompreni, kiun lokon ankoraŭ antaŭ sia naskiĝo havis Kristo en planoj de Dio; Dio havas absolutan antaŭvidon. Li povas pensi kaj diri pri io, kiel pri jam ekzistanta, kvankam dume tio ne ekzistas fakte (Rom 4:17). Li povas deklari: "Mi anoncas antaŭe la estontaĵon, kaj antaŭlonge tion, kio

ankoraû ne okazis; kiam Mi diras, Mia decido plenumiĝas, kaj ĉion, kion Mi deziras, Mi faras" (Jes 46:10). Ĝuste tial Li povas diri pri la mortintoj, kiel pri vivantoj, kaj diri pri ankoraû ne naskiĝintoj, kiel ili estas jam ekzistanaj.

La "decido" de Dio pri Kristo estis anoncita ekde la komenco mem de la mondkreo, kaj, kompreneble, ke en iu difinita de Dio tempo, Jesuo devis naskiĝi reale; por ke en Kristo plenumiĝu la promesoj de Dio. La antaûvidoj de Dio estas respegulitaj en Lia Vorto. En la Biblio oni povas renkonti multajn lokojn, kie profetaĵoj pri estontaj eventoj estas priskribitaj en is-tempo – signo de tio, ke ili estos nepre plemumiĝintaj. Tiel David diras: "Ĉi tie estas la domo de Dio, la Eternulo" (1 Kron 22:1), kvazaû la templo estis jam konstruita, kvankam ĝi estis nur promesita de Dio. Tiom forte David kredis al la vorto de Dio, ke li uzis la as-tempon por priskribi tion, kio okazos en la estonteco. Alia ekzemplo de la Dia antaûvido: Dio estis tiel certa pri plenumiĝo de Siaj promesoj, ke Li diris al Abraham: "*Al via idaro Mi donos* ĉi tiun landon" (Gen 15:18) en la tempo, kiam Abraham ankoraû ne havis idojn. Ankoraû antaû naskiĝo de la semo (Isaak/Kristo) Dio promesis: "*Mi faris vin* patro de multe da popoloj" (Gen 17:5). Fakte, Dio diris pri "neekzistantaĵoj kvazaû ili ekzistus" (Rom 4:17). Ankaû Kristo dum unu el siaj predikoj diris, ke Dio "*donis* ĉion en lian manon" (Joh 3:35), kvankam tiam tio dume ne estis okazigita. "Ĉion Vi metis sub liajn (de Kristo) piedojn... Sed nun ni ankoraû ne vidas ĉion submetita sub lin" (Heb 2:8).

Dio parolis pri Siaj planoj pri savo pere de Jesuo "per la buŝo de Siaj sanktaj profetoj de post la komenco de la mondo" (Lk 1:70). Pro tio, ke ili estis tiel intime kunligitaj kun la Dia plano, pri ili estas dirite, kvazaû ili estis laûlitere ekzistantaj en la komenco mem, kvankam tio ne estis tiel. Elstara ekzemplo estas Jeremia. Dio diris al li: "Antaû ol Mi formis vin en la utero, Mi vin konis, kaj antaû ol vi eliris el la ventro, Mi vin sanktigis, Mi faris vin profeto" (Jer 1:5). Do, Dio sciis ĉion pri Jeremia ankoraû antaû lia naskiĝo. Simile al tio Dio diras pri la persa reĝo Ciro antaû lia naskiĝo, kiel pri jam ekzistanta (Jes 45:1-5). Heb 7:9,10 ankaû havas ekzemplon de uzo de la prezenco de iu, ankoraû ne naskita.

Same kiel pri Jeremia kaj la profetoj pro ilia partopreno en la plano de Dio estas dirite kiel pri ekzistantaj antaû kreado, tiel ankaû pri la veraj kredantoj estas dirite, kiel pri jam tiam ekzistantaj. Memkompreneble, ni ne ekzistis en tiu tempo reale, sed nur en la pensoj de Dio. Dio "nin savis kaj vokis per sankta voko... laû Sia propra antaûintenco kaj laû la graco donita al ni en Kristo Jesuo antaû tempoj eternaj" (2 Tim 1:9). Dio "elektis nin en li (Kristo) antaû la fondo de la mondo... antaûdestininte nin... laû la aprobo de Sia volo" (Ef 1:4,5). La ideo mem, ke homojn Dio antaûdestinis de la komenco, kaj ili estas markitaj (destinitaj) por esti savitaj, indikas, ke ili estis ekzistantaj en la menso de Dio ekde la fondo de la mondo (Rom 8:27; 9: 23).

Se tiel estas dirite pri ordinaraj homoj, ne estas surprize, ke pri Kristo, kiel akso de la Dia plano, estas dirite, ke li ekzistis en la menso de Dio de la komenco, kvankam reale li ne povis ekzisti tiam. Li estis "Ŝafido oferita jam de la fondo de la mondo" (Ap 13:8), t. e. de la komenco mem Dio planis oferdoni lin sur la kruco preskaŭ post 4000 jaroj (Joh 1:29; 1 Kor 5:7). Kiel Jesuo estis antaŭdifinita de la fondo de la mondo (1 Pet 1:20), tiel same estis antaŭdifinitaj ankaŭ la kredantoj (Ef 1:4).

## 7.4 "EN LA KOMENCO ESTIS LA VORTO" (Joh 1:1-3)

**"En la komenco estis la Vorto, kaj la Vorto estis kun Dio, kaj la Vorto estis Dio. Tiu estis en la komenco kun Dio. Ĉio estiĝis per li" (Joh 1:1-3).**

Tiuj ĉi versoj konfirmas konkludojn, faritajn en parto 7.3. Tamen ĉi tiu citaĵo estas vaste miskomprenata. Oni opinias, ke Kristo ekzistis en la ĉielo ankoraŭ antaŭ sia naskiĝo. Ĝusta kompreno de tiuj ĉi versoj dependas de ĝusta kompreno de la vorto "Vorto" en tiu ĉi kunteksto. Ĝi ne povas signifi personon, ĉar persono ne povas esti kun Dio kaj samtempe esti Dio. La greka vorto "logos", kiu ĉi tie estas tradukita kiel "vorto", per si mem ne signifas "Jesuo". Kutime ĝi estas tradukata kiel "vorto", sed ankaŭ povas esti tradukita kiel:

| | | |
|---|---|---|
| Raporto | Komuniko | Intenco |
| Kialo | Sciigo | Kaŭzo |
| Diraĵo | Doktrino | Prediko |

Miskompreno povas deveni pro tio, ke la vorto "logos" en la greka havas viran genron. Sed tio ne povas signifi, ke ĝi rilatas al viro, Jesuo. En diversaj lingvoj la "Vorto" povas havi ne nur la viran genron, sed ankaŭ aliajn genrojn, ekzemple, en la franca ĝi havas inan genron, en la germana kaj rusa – la neŭtran.

**"En La Komenco"**

"Logos", ĝuste dirante, signifas la internan penson, esprimitan per vortoj kaj ankaŭ alimaniere. En la komenco mem Dio havis la "logos", koncentritan sur Jesuo. Ni jam montris la kunligon inter la Dia Spirito kaj Lia vorto, ke internaj intencoj de Dio efektiviĝas en agoj pere de la Spirito de Dio (vidu 2.2). Per la Spirito de Dio estis efektivigita Lia plano pri homoj, kaj homoj estis inspiritaj por skribi la Vorton de la komenco mem; tiel same estis efektivigita la

ideo pri Kristo en liaj agoj kaj vortoj. Kristo estis la "logos" de Dio, kaj la plano de Dio pri Kristo efektiviĝis per la Spirito de Dio. Tio klarigas, kial en la Malnova Testamento estas multe da mencioj pri Jesuo. Tamen oni devas ne opinii, ke Kristo estis "la Vorto" – "la Vorto" signifas la Dian planon de savo pere de Kristo, kaj tiu plano estis "la Vorto". "Logos" ("la Vorto") ofte estas uzata por nomi la Evangelion mem pri Kristo – ekzemple, "la vorto de Kristo" (Kol 3:16; kmp. Mt 13:19; Joh 5:24; Ag 19:10; 1 Tes 1:8 k.t.p.). Notu, ke la "logos" estas la vorto *pri* Kristo aŭ la vorto *de* Kristo, sed ne li mem persone. Kiam Jesio naskiĝis, la vorto iĝis karno kaj sango – "la Vorto fariĝis karno" (Joh 1:14). Jesuo persone estis "la Vorto, kiu fariĝis karno", sed ne "la vorto" mem; li fariĝis "la Vorto" nur post sia naskiĝo de Maria. Kvankam Dio havis la planon pri Kristo de la fondo de la mondo, Li montris ĝin en la persono de Kristo kaj en la predikoj pri li en la Evangelio nur en la unua jarcento. Tiamaniere Dio diris al ni Sian vorton per Kristo (Heb 1:1,2). Ree kaj ree en ĝi estas emfazite, ke Kristo diris la vortojn de Dio kaj faris miraklojn laŭ la Dia indiko por elmontri al ni Dion (Joh 2:22; 3:34; 7:16; 10:32,38; 14:10,24).

Paŭlo obeis la ordonon de Kristo prediki la Evangelion pri li "al ĉiuj nacioj": "la predikado de Jesuo Kristo, laŭ la malkaŝo de la mistero, silentigita tra eternaj tempoj, sed nun elmontrita... al ĉiuj nacioj" (Rom 16:25,26; kmp. 1 Kor 2:7). Eterna vivo fariĝis ebla por homo per la agoj de Kristo (Joh 3:16; 6:53); sed jam de la komenco mem Dio havis planon doni al homo eternan vivon, kaj Li sciis, ke por tiu celo Jesuo oferdonos sin mem. Por ni tio elmontriĝis nur post la naskiĝo kaj morto de Jesuo: "...eterna vivo, kiun la senmensoga Dio promesis antaŭ la tempoj eternaj, sed ĝustatempe Li elmontris Sian vorton en la anonco" (Tit 1:2,3). Ni jam menciis, ke pri la profetoj de Dio estas dirite kiel pri ĉiam ekzistantaj, en tiu senco, ke ili profetis "la vorton" de Dio "de post la komenco de la mondo"(Lk 1:70).

La paraboloj de Jesuo klarigis multe da tiuj profetaĵoj; li ankaŭ efektivigis la profetaĵon pri si mem: "Mi malfermos per sentenco mian buŝon; Mi eldiros enigmojn el tempo antikva" (Mt 13:35). Tio estas la senco de la citaĵo, ke "la vorto estis kun Dio... en la komenco" por "fariĝi karno" ĉe la naskiĝo de Kristo.

### "La Vorto Estis Dio"

Nun ni konsideros, kion signifas la frazo "la vorto estis Dio". Niaj planoj kaj pensoj konsistigas nian esencon. Ekzemple, ni prenu la frazon "Mi veturas al Londono" – ĝi ankaŭ estas "vorto" aŭ komunikaĵo, car ĝi esprimas nian intencon, nian celon. Simile al tio, oni povas konsideri la planon de Dio rilate al Kristo. "Ĉar kiaj estas la pensoj en lia animo, tia li ankaŭ estas" (Sent 23:7), kaj kiaj estas la pensoj de Dio, tia Li estas. Tiele, la vorto de Dio aŭ Liaj pensoj *estas* Dio: "La vorto estas Dio". Ni vidas la interligon inter Dio kaj Lia vorto.

En la Skribo oni povas renkonti frazojn similaj al: “La voĉo de la Eternulo skuas dezerton, La Eternulo skuas la dezerton” (Ps 29:8) aŭ en Jer 25:7: “Vi ne aŭskultis *Min*, diras la Eternulo”, fakte tiuj vortoj tie ĉi signifas: “Vi ne aŭskultis *Mian vorton*, eldiritan de Miaj profetoj”. David komparas la vorton de Dio kun lumilo kaj lumo (Ps 119:105), kaj li ankaŭ diras: “Vi estas mia lumilo, ho Eternulo; La Eternulo lumigas mian mallumon” (2 Sam 22:29), montrante la paralelon inter Dio kaj Lia vorto. Estas kompreneble, ke la vorto de Dio estas personigita, kiel Dio Mem, t. e. pri la vorto de Dio oni diras, kiel pri Li Mem (vidu Komenton 5 “La principo de personigo”).

Dio “estas vera” (Joh 3:33; 8:26; 1 Joh 5:10) kaj sekve, Lia “vorto estas vero” (Joh 17:17). Jesuo identigas sin mem kun siaj vortoj tiomgrade, ke li personigas sian vorton: “Tiu, kiu forrifuzas min kaj ne akceptas miajn dirojn, havas juĝonton; la vorto, kiun mi parolis, juĝos lin en la lasta tago” (Joh 12:48). Jesuo diras pri sia vorto, kvazaŭ ĝi estas aktuala persono, t. e. li mem. La vortoj de Jesuo estis personigitaj, ĉar ili asociiĝas kun Jesuo mem.

La vorto de Dio estas ankaŭ personigita kaj ĝi prezentas Dion Mem. Pri la vorto de Dio estas dirite: “Ĉio estiĝis per li; kaj aparte de li estiĝis nenio” (Joh 1:3). Ĉion Dio kreis per Sia vorto, kaj ni komprenas, ke ĉion kreis Dio Mem. Se la vorto de Dio eniĝas niajn korojn, tio signifas, ke Dio alproksimiĝas al ni.

En Gen 1 ni legas, ke ĉion kreis Dio, Li kreis ĉion per Sia vorto, ne per Kristo persone. Joh 1:1-3 ankaŭ diras, ke “ĉio estiĝis” per la Dia vorto, sed ne per Kristo persone. En Ps 33:6,9 ni legas: “Per la vorto de la Eternulo estiĝis la ĉielo; Kaj per la spiro de Lia buŝo estiĝis ĝia tuta ekzistantaro (t. e. steloj)... ĉar Li diris, kaj tio fariĝis”. Kaj eĉ nun ĉio en la mondo fariĝas per Lia vorto: “Li sendas Sian ordonon al la tero; Tre rapide kuras Lia vorto. Li donas neĝon kiel lanon... Li sendas Sian vorton... kaj ekfluas akvo” (Ps 147:15-18). La vorto de Dio estas Lia kreanta potenco. Dio uzis ĝin por koncipi Jesuon en la ventro de Maria, kaj la Vorto, plano de Dio, efektiviĝis per la Sankta Spirito (Lk 1:35). Maria agnoskis tion: “Estu al mi laŭ via *diro*” (Lk 1:38).

La Vorto/Spirito de Dio spegulas Lian intencon, elmontritan en la Malnova Testamento. Tion konfirmas Ag 13:27: “ili (la hebreoj) plenumis la voĉojn de la profetoj”. Kiam Kristo naskiĝis, per lia persono estis enkarnigita la vorto de Dio pri li. La apostolo Johano inspirite parolis pri tio, ke la plano de Dio pri eterna vivo estis konkretigita en Kristo, kiun la disĉiploj havis eblecon reale vidi kaj tuŝi. Johano skribis pri tio, ĉar komprenis, ke ili aŭdis, vidis kaj palpis per siaj manoj la Vorton de Dio, Lian planon pri savo, elmontritan en Kristo (1 Joh 1:1-3). Kaj ni, kvankam ne havante nune tiun eblecon reale vidi Kriston, ni povas ĝoji, ke ni, pro la ĝusta kompreno pri li, povas kompreni la Dian intencon donaci al ni eternan vivon (1 Pet 1:8,9). Ĉiu el ni devas demandi sin mem: “Cu efektive mi *scias* Kriston?”. Ne sufiĉas nur scii, ke iam ekzistis

bona homo Jesuo, sed kun preĝo ĉiame studante la Biblion, ni devas akcepti lin, kiel nian Savanton kaj aliĝi al li pere de nia baptiĝo.

**KOMENTO 22: Jesuo En La Historio**

De tempo al tempo oni povas aûdi, ke Jesuo el Nazareto neniam ekzistis, ke li estas elpensita figuro. En tiu okazo estas tre malfacile ekspliki la ekzistadon mem de kristanismo. Kiel ekspliki tiun fakton, ke dum la lastaj 2000 jaroj milionoj da homoj bazis sian kredon sur homo, kiu neniam ekzistis, predikante pri li tra la tuta mondo malgraû persekutoj, iufoje eĉ riskante sian vivon? Kristanoj kaj judoj akceptas ĝenerale, ke iam ekzistis la homo Mahomet, kvankam ili ne akceptas lian doktrinon kaj postulatojn. Oni povas diri tiel ne nur pri Mahomet. Ni akceptas la ekziston de multaj famaj historiaj personoj, ne postulante iujn ajn pruvojn pri ilia reala ekzisto.

Tiu fakto, ke iuj personoj tiom energie rifutas la ekziston de Jesuo el Nazareto, indikas al supermezura deziro trovi pravigon por sia malakcepto de Jesuo kaj liaj agoj. Tion konfirmas tiu fakto, ke la judoj de la unua jarcento ne havis dubojn pri la ekzisto de Jesuo. Pli sube estas donitaj la historiaj pruvoj, ke Jesuo el Nazareto ne estis teologia invento de homoj, sed ke li estis reale ekzistanta. Pli granda parto da ili estis prenita el "Antikva atesto pri la vivo de Jesuo", verkita de Gary Habermas.

1. Roma historisto Tacito mencias pri Jesuo kaj kristanismo en siaj ĉefaj libroj pri la unua jarcento "Analoj" kaj "Historioj". En "Analoj" li skribis (ĉ. 115 jaroj PK):

"Grupo da homoj, kiuj estis malamataj kaj elvokis abomenon ĉe la popolo, nomis sin kristanoj. Kristo, kies nomo havis tiu ĉi socio, suferis kruelan punon de provincestro Pontio Pilato dum la tempo de Tiberio".

La imperiestro Tiberio regis ekde la 14-a ĝis la 37-a jaro PK. Ankaû Tacito skribis, ke la kredantoj de tiu ĉi religio disvastiĝis ne nur en Judujo, naskiĝloko de tiu ĉi religio, sed eĉ en Romo; kaj li daûrigas en la priskribo, ke kristanoj estis persekutataj kaj multaj el ili estis mortigitaj en Romo. Ĉio tio akordiĝas kun la skriboj de la Nova Testamento pri Jesuo, la disĉiploj kaj apostoloj, kiuj, suferante grandan opozicion, unuaj disvastigis lian doktrinon en Judujo kaj poste en la tuta Romana mondo, inkluzive Romon.

2. Seûtonio, alia Roma historisto, skribis pri la regado de Klaûdio (41 – 54 PK): "Pro tio, ke la judoj en Romo, instigitaj de Kristo, kaûzis senĉesajn perturbojn, li (Klaûdio) elpelis ilin de la urbo". Ag 18:2 diras, ke la judaj geedzoj Akvila kaj Priskila estis devigitaj foriri el Romo, ĉar la judoj tie estis persekutataj.

Seûtonio skribas plue pri la persekutoj de kristanoj en la tempo de Nerono: “Post granda incendio en Romo... punoj falis ankaû sur kristanoj, sekto, konfesanta novan kaj malutilan religion”. Tiu ĉi citaĵo pri ekzisto en la unua jarcento de grupo, nomata “kristanoj”, donas motivon sugesti, ke persono, nomita Kristo, ekzistis pli frue en tiu jarcento.

3. F.F. Bruce (“Origino de kristanismo”, p.p. 29,30) mencias historian libron de la Orienta Mediterania regiono, verkita de la historisto Thallus ĉirkaû la jaro 52 PK. En sia alia libro “Dokumentoj pri la Nova Testamento” (p. 113) Bruce mencias scienciston, nomitan Julij Afrikano, kiu primokante citas la priskribon de Thallus pri la ekmallumiĝo, okazinta dum la krucumo de Jesuo. Laû Julij Afrikano en tiu momento okazis la eklipso de la suno. Tio signifas, ke Thallus priskribis la krucumon de Jesuo pli frue, ol la 52-a jaro PK.

4. Plinio, roma ŝtata aganto, mencias pri la ekzisto en la lastaj jaroj de la unua jarcento de tre aktiva grupo da kristanoj. Li priskribas ilian memorigan diservon tiel: “Ili havis la kutimon kunveni en certa tago kaj antaû mateniĝo kanti himnon al Kristo” (“Leteroj de Plinio”, vol.2, X:96). Romaj imperiestroj Trojan kaj Hadrian ankaû parolis pri siaj problemoj rilate al kristanoj (vidu “Leteroj de Plinio”, vol.2, X:97, kaj Eûsebius “Eklezia historio”, IV:IX). La ekzisto de tiu ĉi grupo ekde la unua jarcento PK, kaj ilia eksterordinara pacienco dum persekuto atestas, ke ili estis gvidataj de reala historia persono, kiu vivis en la unua jarcento.

5. La Talmudo, la juda Sankta libro, en Sinedrio 43-a diras pri la morto de Jesuo. Estas akceptite, ke tiu ĉi parto de la Talmudo estis skribita en la frua tempperiodo de la kompilado de tiu ĉi libro (t. e. en 70-200 PK): “Tagon antaû Pasko Jesuo estis pendigita. Kvardek tagojn antaû la ekzekuto, heroldo antaûpaŝis kaj kriis: “Li devas esti mortigita per ŝtonoj, ĉar li predikas sorĉadon kaj incitas Izraelon rezigni al ĝia religio. Ĉiuj, kiuj povas diri ion por lia defendo, eliru kaj pledu”. Pro tio, ke neniu pledis por li, li estis pendigita tagon antaû Pasko”.

La vorton “pendigita” necesas kompreni kiel “krucumita” – tiamaniere ĝi estas uzata en la Nova Testamento (Gal 3:13; Lk 23:39). Tiu ĉi citaĵo diras, ke la judoj volis mortbati Jesuon per ŝtonoj, verŝajne laû la leĝo de Moseo, sed fakte li estis “pendigita”. La klarigon pri tio oni povas trovi en la Nova Testamento, kiu diras, ke la judoj devis sekvi la roman leĝon por efektivigi la mortigon de Jesuo, kio povis esti efektivigita nur per krucumo.

Sinedrio 43a ankaû skribas, ke kvin disĉiploj de Jesuo estis juĝitaj kaj kondamnitaj al morto; kaj tio denove montras, ke judoj tradicie kredis je la ekzisto de historia persono Jesuo. Sinedrio 106b eĉ diras, ke Jesuo havis 33-

jaran aĝon, kiam li mortis, kaj tio konformas al la Nova Testamento. Maier ("La unua Pasko", pp. 117, 118) citas la judan dokumenton de la kvina jarcento "Toledoth Jesuo", kiu diras, ke la apostoloj provis ŝteli la korpon de Jesuo post lia morto, sed ĝardenisto, nomita Juda, eksciis pri tiu plano kaj transportis la korpon de Jesuo en alian lokon, por transdoni ĝin pli poste al la judoj. Justin Martyr en la jaro 150 PK skribis, ke la judoj speciale sendis heroldojn, kiuj anoncis, ke la korpo de Kristo estas ŝtelita ("Dialogo kun Trypho", p. 108), kaj Tertuliano ("Pri spektaĵoj", p. 30) skribis similan en la 200-a jaro PK.

Ĉio tio pruvas, ke la judoj de fruaj jaroj de la unua jarcento kredis, ke Jesuo persone ekzistis kaj estis krucumita.

6. La greka dramverkisto Luciano, verkinta en la dua jarcento, priridis la kristanojn, kiuj "adoras krucumitan homon ĝis nun (Luciano, "La morto de alilandano en Romo", 11-13, en "La verkoj de Luciano", vol.4).

7. Jozefo Flavij estas la plej fama historisto de la unua jarcento. En sia verkaĵo "Antikvaĵoj" skribita en jaroj 90-95 PK, li mencias Jakobon, "la frato de Jesuo, nomita Kristo". En alia loko de la sama libro li skribas pri Jesuo same, kiel estas dirite pri Kristo en la Nova Testamento: "En tiu ĉi tempo estis Jesuo, saĝa homo... Li faris mirindaĵojn... Li estis Kristo... li aperis antaŭ ili vivanta en la tria tago, kiel antaŭdiris la profetoj pri li kaj pri dek mil liaj mirindaĵoj".

Tiu citaĵo havas tiom precizan priskribon, ke iuj homoj opinias ĝin interpolo. Tamen ekzistas multe da aliaj faktoj, kiuj konfirmas, ke homo, nomita Jesuo el Nazaret, ekzistis reale:

- Tiun ĉi citaĵon de Jozefo Flavij uzas Eŭsibio en "Ekleziasta historio", 1:X1.

- Respektindaj kleruloj subtenas la opinion, ke tiu ĉi citaĵo apartenas al Jozefo Flavij kaj povas pruvi, ke tiu ĉi citaĵo estas skribita en la sama stilo, kiel la tuta libro de Jozefo Flavij (vidu Daniel Rops "La silento de samtempuloj de Jesuo", p.21; J.N.D. Anderson "Kristanismo. La atesto de historio", p.20; F.F. Bruce "La dokumentoj de la Nova Testamento", p.p. 108,109).

- Forestas ia teksta atesto, ke tiu ĉi eltiraĵo estas interpolo.

- Profesoro Ŝlomo Pines ("The New York Times", 12.2.72) asertas, ke la araba eldono de la verkoj de J. Flavij preskaŭ laŭvorte konformas al la originalo. La citita de ni eltiraĵo ankaŭ estas en tiu ĉi eldono: "En tiu tempo estis la saĝa homo, nomita Jesuo. Li estis bonkonduta kaj fama pro sia virteco.

Kaj multaj homoj el la judoj kaj aliaj popoloj fariĝis liaj disĉiploj. Pilato kondamnis lin al krucumo kaj morto. Sed tiuj, kiuj fariĝis liaj disĉiploj ne apostatis de lia doktrino; ili asertis, ke li aperis antaŭ ili tri tagojn post sia morto sur la kruco, kaj estis vivanta; li verŝajne estis Mesio, pri mirakloj de kiu rakontis la profetoj".

Tio konformas al la Nova Testamento.

**KOMENTO 23 : "Mi Malsupreniris De La Ĉielo"**

**"La pano de Dio estas tiu, kiu malsupreniras de la ĉielo kaj donas vivon al la mondo... Mi malsupreniris de la ĉielo" (Joh 6:33, 38).**

Tiujn ĉi kaj ankaŭ aliajn similajn vortojn oni erare uzas por argumenti, ke Jesuo reale ekzistis en la ĉielo antaŭ sia naskiĝo. Tamen notu:

1. Tiuj, kiuj kredas je dogmo de la Triunuo, akceptas tiujn vortojn laŭlitere por pruvi sian vidpunkton. Tamen, se tiujn vortojn ni komprenus laŭlitere, ni devus kredi, ke Jesuo laŭlitere iumaniere "malsupreniras de la ĉielo". Sed la Biblio nenion diras pri tio, kaj la vortoj mem de Jesuo pri lia *koncipo* en la utero de Maria, kiel ordinara bebo, en tiu okazo estus sensencaj. Joh 6:60, dirante pri la manao, notas:"Malfacila estas tiu parolo", t. e. ni devas kompreni tiujn vortojn metafore.

2. En Joh 6 Jesuo klarigas, ke la manao estis tipo de li mem. La manao estis sendita de Dio, t. e. Dio Mem kreis ĝin sur la tero; ĝi ne laŭlitere flosis malsupren de la trono de Dio en la ĉielo. Same, Jesuo estis sendita de Dio, t. e. ke Dio Mem per la povo de la Sankta Spirito okazigis la koncipon de Jesuo en la utero de Maria sur la tero (Lk 1:35).

3. Jesuo diris: "La pano, kiun mi donos, estas *mia karno*" (Joh 6:51). Tiuj, kiuj akceptas la dogmon pri la Triunuo asertas, ke estis la "Dia" parto de Jesuo, kiu malsupreniris de la ĉielo. Sed Jesuo mem diris, ke lia "karno" estas "la pano", malsuprenirinta de la ĉielo. Same Jesuo ligas la panon de la ĉielo kun si mem, kiel la "Filo *de homo*" (Joh 6:62), ne "Dio la Filo".

4. En Joh 6 estas aliaj pruvoj, ke Jesuo ne egalas al Dio. "La vivanta Patro min sendis" (Joh 6:57) montras, ke Jesuo ne estas parto de Dio, sed li estas sendita de Dio. Kaj ankaŭ "Mi vivas pro la Patro" (Joh 6:57) ne signifas unuecon.

5. Aperas la demando: “Kiam kaj kiel Jesuo “malsupreniris” de la ĉielo? Adeptoj de la Triunuo uzas tiun ĉi verson en Joh 6 por pruvi, ke Jesuo malsupreniris de la ĉielo ĉe sia naskiĝo. Sed Jesuo diris pri si mem, ke li “estas tiu, kiu malsupreniras de la ĉielo” (vv.33,50), kvazaû tio ankoraû daûras. Pri la Dia donaco en si mem Jesuo diris: “Mia Patro _donas al vi_ la veran ĉielan panon” (v. 32). Dum kiam Jesuo parolis tiujn vortojn, li jam “malsupreniris”, en tiu senco, ke li jam estis sendita de Dio surteren. Tial li povis diri pri tio en is-tempo: “Mi estas la viva pano, kiu _malsupreniris_ de la ĉielo” (v.51). Sed li ankaû diris pri pano, kiu malsupreniras de la ĉielo jam post sia morto sur la kruco: “La pano, kiun mi donos, estas mia karno” (v.51). Sekve, Jesuo diras, ke li jam malsupreniris de la ĉielo, ke li malsupreniras kaj estos malsupreniranta en sia morto sur la kruco. Eĉ nur unu tiu ĉi fakto pruvas, ke: “malsupreniro” rilatas al elmontriĝo de Dio Mem, sed ne al la naskiĝo de Kristo. En la Malnova Testamento estas pruvoj, ke la referencoj al la “malsupreniro” de Dio havas la saman signifon, pri kiu ni ĵus diris. Ekzemple, Dio vidis malfeliĉojn de Sia popolo en Egiptujo kaj “malsupreniris” por savi ilin pere de Moseo. Li ankaû vidis nian sklavecon en peko kaj “malsupreniris” aû elmontris Sin, sendinte Jesuon, kiel la ekvivalento de Moseo por liberigi nin de pekeco.

**KOMENTO 24: Ĉu Kreis Jesuo La Teron?**

**“La unuenaskito inter la tuta kreitaro; ĉar en li (Jesuo) kreiĝis ĉio en la ĉielo kaj sur la tero, ĉio videbla kaj nevidebla, ĉu tronoj, ĉu regecoj, ĉu estrecoj, ĉu aûtoritatoj; ĉio kreiĝis per li, kaj por li; kaj li estas antaû ĉio, kaj en li ĉio ekzistas. Kaj li estas la kapo de la korpo, la eklezio; kaj li estas la komenco, la unuenaskita el la mortintoj...” (Kol 1:15-18). Tiu ĉi citaĵo estas unu el tiuj, kiujn oni citas por pruvi, ke Kristo kreis la teron.**

1. Tamen ekzistas multe da aliaj citaĵoj, kiuj instruas, ke Jesuo ne ekzistis antaû sia naskiĝo. La skribo en Genezo klare montras, ke la kreinto de ĉio estas Dio. Se ni supozas, ke Jesuo estis la kreinto, kaj Genezo diras, ke la kreinto estas Dio, fakte ni supozas, ke Jesuo egalas al Dio. Sed tiuokaze tute ne eblas klarigi multajn versojn, kiuj montras la diferencon inter Dio kaj Jesuo (por ekzemplo vidu 8:2).

2. Jesuo estis “_unuenaskita_”, tio signifas komencon. Forestas pruvoj, ke Jesuo estis “unuenaskita” antaû la kreo de la tero. Ekzemple, 2 Sam 7:14 kaj Ps 89:27 profetis, ke laûlitera posteulo de David _estos_ la unuenaskita de Dio. Estas klare, ke li ankoraû ne ekzistis en la tempo, kiam tiu citaĵo estis skribita, kaj, des pli en la tempo de kreado, priskribita en Genezo. Jesuo fariĝis “la Filo de

Dio en potenco *post* sia releviĝo de la mortintoj (Rom 1:4). Dio relevis Jesuon, "kiel ankaŭ estas skribite en la dua psalmo: Vi estas Mia Filo, *hodiaŭ* Mi vin naskis" (Ag 13:32,33). Sekve, Jesuo iĝis la unuenaskita de Dio per sia releviĝo el la mortintoj. Ankaŭ notu, ke filo, staranta ĉe la dekstra mano de sia patro estas la unuenaskita (Gen 48:13-16), kaj Kristo estis starigita ĉe la dekstra mano de Dio post sia releviĝo. (Ag 2:32; Heb 1:3).

3. Ĝuste en tiu ĉi senco Jesuo estis priskribita, kiel "unuenaskita el la mortintoj" (Kol 1:18), tio egalas al "la unuenaskito inter la tuta kreitaro" (Kol 1:15) aŭ el tutaj estaĵoj. Tial Jesuo diras pri si mem, ke li estas "unuenaskita el la mortintoj... la komenco de la kreo de Dio" (Ap 1:5; 3:14). Jesuo estis la unua el novspecaj senmortaj homoj, kies releviĝo kaj renaskiĝo, kiel senmortaj gefiloj de Dio, fariĝis ebla per la morto kaj releviĝo de Jesuo (Ef 2:10; 4:23,24; 2 Kor 5:17). "En Kristo ĉiuj (la veraj kredantoj) estos vivigitaj. Sed ĉiu en sia propra vico: Kristo la unuaaĵo, poste tiuj, kiuj apartenas al Kristo, ĉe lia alveno" (1 Kor 15:22,23). Tion saman diras Kol 1. Jesuo estis la unua persono revivigita de la mortintoj, al kiu estis donite senmorteco, li estis la unua el nova kreo, kaj la veraj kredantoj sekvos lian ekzemplon ĉe lia reveno.

4. La kreitaro, pri kiu diras Kol 1, sekve, estas la nova kreitaro, ne tiu el Genezo. Per agoj de Jesuo kreiĝis ĉio... ĉu tronoj, ĉu regecoj". Paŭlo ne diras, ke Jesuo kreis ĉion, ekzemple, riverojn, montojn, birdojn kaj tiel plu. La elementoj de tiu ĉi nova kreitaro konsistigas tiun rekompencon, kiun fideluloj havos en la Regno de Dio. "Tronoj... regecoj" kaj tiel plu signifas, ke la revivigitaj kredantoj estos "reĝoj kaj pastroj, kaj ili reĝas sur tero" (Ap 5:10). Tio fariĝis ebla pro la agoj de Jesuo. "En li kreiĝis ĉio *en la ĉielo*" (Kol 1:16). En Ef 2:6 oni legas pri la kredantoj, kiuj estas kunsidigitaj "en la ĉielejoj *en* Kristo Jesuo". Tiuj ĉi versoj instruas, ke tiu alta spirita stato, kiun ni povas havi nun, kaj ankaŭ tiu, kiun ni havos estonte, iĝis ebla dank' al Jesuo. "En la ĉielo kaj sur la tero... ĉio per li (Kristo) kunakordiĝis per la sango de lia kruco" (Kol 1:16,20), tio signifas, ke "ĉio en la ĉielo "rilatas al la kredantoj, kiuj *nun* estas en la "ĉielejoj... en Kristo Jesuo"

## KOMENTO 25: "Antaŭ Ol Naskiĝis Abraham Mi Ekzistas (Joh 8:58)

**Tiun ĉi verson ofte oni erare uzas por pruvi, ke Jesuo ekzistis ankoraŭ antaŭ la naskiĝo de Abraham. Sed pli atenta esploro de ĝiaj vortoj kondukos al la mala (sed vera) konkludo.**

1. Jesuo ne diris " Antaû ol Abraham naskiĝis, mi ekzistis". Li estis la promesita posteulo de Abraham; kaj ni sensencigus la Diajn promesojn, se ni dirus, ke Jesuo reale ekzistis ankoraû antaû la tempo de Abraham.

2. La vortoj en Joh 8:58 el la parolo al Judoj koncernas Abrahamon. Ili opiniis Abrahamon, kiel la plej granda el ĉiuj iam ajn ekzistintaj sur la tero homoj. Kaj Jesuo diris: "Mi, staranta antaû vi, *nun* estas pli grava, ol Abraham estis". La vorto "antaû" en Joh 8:58 pli signifas, ke en la plano de Dio, antaû la Liaj okuloj Jesuo estis pli frue (fakte "de la komenco"mem), ol Abraham. Laû sia signifo en la plano de Dio Jesuo estis "antaû" Abraham.

3. Pruvon por tio enhavas Joh 8:56: "Via patro Abraham ĝojegis vidi mian tagon, kaj li vidis kaj estis ravita". Nur unu fojon la Skribo mencias, ke Abraham ekridis kaj ĝojis; tio okazis, kiam li aûdis la promeson pri la semo, kiu, kiel li pli poste komprenis, estos Jesuo (Gen 17:17). Abraham antaûvidis Kriston pro la promesoj, donitaj al li, kaj li ekkriis pri la estonta oferdono: "La Eternulo *antaûvidos*..." (Gen 22:8). Ĝuste en tiu senco Jesuo diras, ke Abraham *vidis* lin. Sciante la promesojn, Jesuo povis diri: "Antaû ol naskiĝis Abraham, mi ekzistas". Kiel ni montris en 3.1, la promesoj de Dio al Abraham rivelis la planon de Dio rilate al Jesuo, kiun Li havis de la komenco de la mondo. Tiu celo, kiu estis "Antaû ol Abraham naskiĝis", estis rivelita al Abraham en la promesoj al li, kaj nun estis elmontrita al la judoj de la unua jarcento en Jesuo – "la vorto (de promeso) fariĝis karno".

**KOMENTO 26: Melkicedek**

Multaj studantoj de la Biblio sincere prononcas "Amen" post la versoj de Petro "Nia amata frato Paûlo, laû la saĝeco donita al li, jam skribis al vi... en ĉiuj siaj epistoloj... en kiuj iuj aferoj estas malfacile kompreneblaj, kiujn la malkleruloj kaj malkonstantuloj tordas, kiel ankaû la ceterajn skribaĵojn, al sia propra pereo" (2 Pet 3:15,16). Tio, certe, rilatas al la vortoj de Paûlo pri Melkicedek, diritaj en "Al la Hebreoj". Paûlo mem agnoskis, ke liaj vortoj estas malfacile percepteblaj kaj ilin komprenas nur tre maturaj kredantoj (Heb 5:10, 11, 14).

> "Tiu Melkicedek, reĝo de Salem (Jerusalem), pastro de Dio la Plejalta, kiu renkontis Abrahamon, revenantan de la mortigado de la reĝoj, kaj lin benis", pri kio oni diras, ke li estas "senpatra, senpatrina, sengenealogia, havanta nek komencon de tagoj, nek finon de vivo, sed similigita al la Filo de Dio" (Heb 7:1,3). El tiuj ĉi linioj iuj homoj konkludas, ke Jesuo

laûlitere ekzistis antaû sia naskiĝo kaj pro tio li ne havis homajn gepatrojn.

Jesuo havis Patron (Dio) kaj patrinon (Maria) kaj genealogion (vidu Mt 1, Lk 3 kaj kmp. Joh 7:27). Pro tio Melkicedek ne povas rilati al Jesuo persone. Krom tio, Melkicedek estis nur "*similigita* al la Filo de Dio" (Heb 7:3); li mem ne estis Jesuo. Li nur havis similecon al Jesuo, kiun la aûtoro uzas por instruaj celoj. "Laû simileco de Melkicedek leviĝas pastro alia", Jesuo (Heb 7:15), kiu estis destinita pastro "laû la maniero de Melkicedek" (Heb 5:5,6).

Tion, kio estas skribite en Hebreoj pri Melkicedek, ne povas esti akceptita laûlitere. Se Melkicedek havis nek patron, nek patrinon, ĉi okaze li devis esti Dio Mem: nur Dio sola estas senkomenca (1Tim 6:16, Ps 90:2). Sed Heb 7:4 diras: "Nur pripensu, kiel granda estis ĉi tiu, al kiu la patriarko Abraham donis dekonon el la akiraĵoj", kaj ankaû tiu fakto, ke li estis vidata de homoj kaj oferdonis al Dio, montras, ke li ne estis Dio. Se oni nomas lin homo, li devas havi homajn gepatrojn. Tiu fakto, ke li estas "senpatra, senpatrina, sengenealogia", signifas nur, ke lia genealogio kaj liaj gepatroj ne estas menciitaj en la Biblio. La gepatroj de la reĝino Ester ne estas priskribitaj, kaj pri ŝia genealogio estas dirite en la simila maniero. Mordeĥaj "estis prizorganto de Hadasa (Ester)... filino de lia onklo, ĉar ŝi ne havis patron nek patrinon... Kiam mortis ŝiaj gepatroj, Mordeĥaj prenis ŝin al si kiel filinon" (Ester 2:7).

La libro Genezo kutime donas longan detalan genealogion de tiuj personoj, kiuj estas prezentataj al ni. Sed Melkicedek aperas sen iu ajn anonco pri li, sen priskribo de liaj gepatroj, kaj tiel same subite malaperas. Samtempe, forestas duboj, ke li estis tre respektata persono – eĉ Abraham mem pagis al li dekonon kaj estis benita de li, tio montras la superecon de Melkicedek super Abraham (Heb 7:2,7).

Paûlo ne nur ekzercis mense je la Skribo. Dum la unua jarcento estis reala problemo, kiun oni povis solvi nur per argumentoj pri Melkicedek. La judoj rezonis tiel: "Vi kristanoj diras al ni, ke tiu Jesuo povas esti nun nia ĉefpastro, prezentanta niajn preĝojn kaj agojn al Dio. Sed tiu pastro devas havi genealogion, pruvantan, ke li estas el la tribo de Levi, sed vi mem evidentigas, ke Jesuo devenas de Jehuda (Heb 7:14). Pardonu nin, sed por ni Abraham estas plejalta gvidanto kaj ekzemplo (Joh 8:33,39) kaj ni ne volas respekti tiun Jesuon".

Al tio Paûlo respondis: "Rememoru Melkicedekon. La libro Genezo montras al ni, ke tiu granda pastro ne havas genealogion; kaj Mesio devas esti reĝo kaj pastro, kies pastreco estos laû la maniero de Melkicedek (Heb 5:6, kmp. Ps 110:4). Abraham laû sia signifo estis pli malgranda, ol Melkicedek, sekve, vi devas deturni vian atenton de Abraham al Jesuo kaj ĉesi plu gravigi la demandon pri genealogio (vidu 1 Tim 1:4). Se vi pensas pri tio, kiom multe

Melkicedek similas al Jesuo, (ekzemple, pri detaloj de iliaj vivoj), vi havos pli multe da kompreno pri la agoj de Jesuo mem”.

Kaj ankaû ni ĉiuj devas pripensi tiun ĉi lecionon.

## ĈAPITRO 7: Demandoj

1. Donu du profetaĵojn el Malnova Testamento pri Jesuo.

2. Ĉu ekzistis reale Jesuo antaû sia naskiĝo?

3. En kiu senco oni povas diri, ke Jesuo ekzistis antaû sia naskiĝo?
   a) Kiel anĝelo
   b) Kiel parto de la Triunuo
   c) Kiel spirito
   d) Nur en la menso kaj intenco de Dio

4. Kiu el la sekvaj asertoj pri Maria estas vera?
   a) Ŝi estis perfekta, senpeka virino
   b) Ŝi estis ordinara virino
   c) Ŝi koncipis Jesuon pere de la Sankta Spirito
   d) Ŝi nun transdonas niajn preĝojn al Jesuo

5. Ĉu Jesuo kreis la teron?

6. Kiel vi komprenas Joh 1:1-3 “En la komenco estis la Vorto”?

7. Kial, laû vi, gravas ĝuste scii, ĉu ekzistis reale Jesuo antaû sia naskiĝo aû ne?

# ĈAPITRO 8

# LA NATURO DE JESUO

## 8.1 LA NATURO DE JESUO: ENKONDUKO

Unu el la plej grandaj tragedioj de kristanismo estas en tio, ke la venko de la Sinjoro Jesuo Kristo super peko, kiun li venkis disvolvante sian perfektan karakteron, ne ricevis en deca grado la respekton kaj agnoskon. La disvastigita opinio pri la Triunuo fakte faras lin Dio Mem. Sed Dio ne estas tentebla (Jak 1:13) kaj ne povas peki, sekve, Jesuo reale ne havus batalon kontraŭ peko. Lia servo sur la tero estus ŝajnaĵo; li havus homan vivon, sed realaj kaj spiritaj problemoj, kiujn havas la tuta homaro, ne koncernus lin persone.

Aliflanke, la mormonoj kaj atestantoj de Jehova kaj ankaŭ aliaj ne povas akcepti kaj aprezi la mirindaĵon, ke Kristo estas la solenaskita Filo de Dio, kaj sekve, li povis esti nek anĝelo, nek la natura filo de Jozef. Ankaŭ ekzistas la opinio, ke dum sia surtera vivo, Kristo havis la saman naturon, kiun havis Adam antaŭ sia falo en pekon. La Biblio ne havas pruvojn por subteni tiun vidpunkton; krom tio, ni scias el la Biblio, ke Adam estis kreita de Dio el polvo de la tero, sed Jesuo estis naskita de la virgulino Maria, kaj kvankam Jesuo ne havis homan patron, en ĉiuj aliaj rilatoj li estis homo, kiel ni estas. Multaj homoj ne povas akcepti, ke homo de nia pekema naturo povas havi perfektan karakteron, kaj tiu ĉi fakto malhelpas al ili akcepti la veran kredon en Kristo.

Akcepti, ke Jesuo havis nian naturon, sed estis tute senpeka kaj *ĉiam* venkis siajn tentojn, estas malfacile. Necesas atente legi kaj pripensi la skribojn de la Evangelio pri lia senpeka vivo, vivo de homo, sed ne Dio, por havi klaran komprenon kaj firman kredon en la reala Kristo. Pli facile estas supozi, ke li estis Dio Mem, kaj pro tio perfekta. Sed tiu vidpunkto malpliigas la signifon de la venko, kiun Jesuo akiris en la batalo kontraŭ la pekema homa naturo. Ja li havis homan naturon; li estis tentata tiel same, kiel ni (Heb 4:15), sed li venkis siajn tentojn per sia obeemo al la vojoj de Dio kaj serĉante Lian helpon por venki la pekon. Kaj Dio volonte helpis al li, ĉar "Dio estis en Kristo, repacigante la mondon al Si" pere de Sia propra Filo (2 Kor 5:19).

## 8.2 DIFERENCOJ INTER DIO KAJ JESUO

Etas klara akordiĝo inter citaĵoj, kiuj emfazas, ke "Dio estis en Kristo", kaj tiuj, kiuj priskribas la homan naturon de Kristo. La dua grupo da citaĵoj neniigas la ideon pri tio, ke Jesuo estis Dio Mem, "vera Dio de vera Dio", kiel erare instruas la doktrino pri la Triunuo. (La frazo "Vera Dio de vera Dio" estis uzata dum la unua Tutmonda Koncilo en Nicea en la jaro 325 PK, kie estis deklarita la ideo pri la Dia triunueco; ĝi ne estis sciata de la fruaj kristanoj). La vorto "Triunuo" ne troviĝas en la Biblio. En Ĉapitro 9 estos pli detale dirite pri la venko de Kristo super peko kaj la partopreno de Dio en ĝi. Nun ni ankoraŭfoje rememoru, ke savo dependas de korekta kompreno de la reala Jesuo Kristo (Joh 3:36; 6:53; 17:3). Kiam ni havos tiun veran komprenon pri lia venko super peko kaj morto, tiam ni povos baptiĝi je Kristo por aliĝi al tiu savo.

Unu el la plej klaraj citaĵoj pri rilatoj inter Dio kaj Jesuo estas 1 Tim 2:5: "Ekzistas *unu* Dio, kaj *unu* interulo inter Dio kaj homoj, *homo*, Kristo Jesuo". Medito pri tiuj ĉi vortoj elvokas sekvajn konkludojn:

- Estas nur unu Dio, kaj sekve, Jesuo ne povas esti Dio. Se la Patro estas Dio kaj Jesuo ankaŭ estus Dio, sekve, estus du Dioj. "Tamen por ni estas unu Dio, la Patro" (1 Kor 8:6). Tiele, "Dio, la Patro" estas ununura Dio. Ne povas esti iu aparte ekzistanta estulo, nomita "Dio la Filo", kiel tion erare instruas la doktrino pri la Triunuo. Ankaŭ la Malnova Testamento diras, ke estas nur unu Dio, la Patro (ekzemple, Jes 63:16; 64:8).

- "Kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo" (1 Tim 2:5). La vorto "kaj" indikas al diferencon inter Dio kaj Kristo.

- Kristo estas la "interulo", inter Dio kaj homoj. Tute klaras, ke interulo inter pekema homo kaj senpeka Dio ne povas esti senpeka Dio Mem. Homojn interligas kun Dio senpeka homo, havanta homan pekeman naturon. "La *homo*, Kristo Jesuo" - tiu ĉi citaĵo estas la konvinka pruvo, ke Jesuo ne estas Dio. Necesas rimarki, ke malgraŭ tio, ke Paŭlo skribis post la ascendo de Jesuo, li ne nomis Jesuon "Dio Kristo Jesuo".

Kelkaj lokoj de la Skribo rememorigas al ni, ke "Dio ne estas homo" (Nom 23:19; Hoŝ 11:9). Sed pri Kristo estas dirite, ke li estas "filo de homo" aŭ "*homo* Kristo Jesuo". Tamen li estis ankaŭ "Filo de la Plejaltulo". La nomo "Plejaltulo" signifas, ke ekzistas neniu, kiu havas pli altan pozicion; Jesuo estas "Filo de la Plejaltulo", tio montras, ke li ne povas esti Dio Mem persone. Kaj eĉ nur tio, ke Dio estas nomita la Patro, kaj Jesuo - la Filo, indikas al la diferenco

inter ili. Filo povas havi certajn trajtojn de sia patro, sed li ne povas esti la sama persono, kaj havi la saman aĝon de sia patro.

Pli sube sekvas listo da diferencoj inter Dio kaj Jesuo, montrantaj, ke Jesuo ne estas Dio Mem:

| **Dio** | **Jesuo** |
|---|---|
| Dio ne estas tentebla (Jak 1:13). | Kristo estis "tentita en ĉio" tiel same, kiel ni (Heb 4:15). |
| Dio ne povas morti. Li estas senmorta laŭ Sia naturo (Ps 90:2; 1Tim 6:16). | Kristo estis mortinta ĝis la tria tago (Mt 12:40; 16:21) |
| Dion neniu povas vidi kaj neniu vidis (1Tim 6:16; El 33:20). | Homoj vidis Jesuon kaj palpis lin (1 Joh 1:1 emfazas tion) |

Dum kiam ni estas tentataj, ni devas fari elekton inter peko kaj obeemo al Dio. Ofte ni elektas pekon kaj malobeemon al Dio; Kristo same havis elekton, sed li ĉiam elektis obeemon. Li havis eblecon peki, sed fakte li neniam faris tion. Ni jam diris, ke la semo de David, promesita en 2 Sam 7:12-16 estas Kristo. Verso 14 diras, ke Kristo povis peki: "*Se li faros malbonaĵon*, Mi punos lin".

## 8.3 LA NATURO DE JESUO

La vorto "naturo" signifas nian denaskan esencon. En Parto 1 ni montris, ke la Biblio diras nur pri du naturoj - de Dio kaj de homo. Laŭ Sia naturo Dio ne povas morti, esti tentata kaj tiel plu. Kaj estas evidente, ke Kristo laŭ sia naturo ne estis Dio dum sia surtera vivo. Li havis homan naturon. Laŭ nia determino de la vorto "naturo" Kristo ne povis havi du naturojn samtempe. Kristo estis tentata, kiel ni (Heb 4:15), sed dank' al lia absoluta venko de tento li akiris pardonon por ni. La malbonaj deziroj, kiuj estas bazo de niaj tentoj aperas el intere de ni mem (Mk 7:15-23), de nia homa naturo (Jak 1:13-15). Tiele, por sperti kaj suferi tiujn tentojn, Kristo devis havi la homan naturon.

Heb 2:14-18 diras pri tio tiel:

"Ĉar do la infanoj (ni) partoprenas en sango kaj karno (homa naturo), li (Kristo) ankaŭ mem egale partoprenis en ili (en la sama naturo), por ke

> per morto li neniigu tiun, kiu havis la potencon de morto, tio estas la diablo... Ĉar vere li ektenas ne anĝelojn, sed la idaron de Abraham (ilian naturon) li ektenas. Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj, por ke li fariĝu kompatema kaj fidela ĉefpastro... por fari repacigon por la pekoj de la popolo. Ĉar per tio, ke li mem, tentate, suferis, li povas helpi la tentatojn".

Tiu ĉi citaĵo precipe emfazas tiun fakton, ke Jesuo havis homan naturon: "Li *__ankaû mem__* egale" partoprenis tion (Heb 2:14). Heb 2:16 emfazas, ke Kristo ne havis la naturon de anĝeloj, montrante, ke li estis la semo de Abraham kaj venis por savi multajn kredantojn, kiuj iĝos la semo de Abraham. Por efektivigi tion, Kristo devis havi homan naturon. "Tial li devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj" (Heb 2:17), por ke Dio povu doni al ni pardonon pro la oferdono de Kristo. Diri, ke Jesuo havis ne nur homan naturon, signifas ne scion de la vera bazo de la bonaj novaĵoj de Kristo.

Baptitaj kredantoj, farintaj pekon, povas preĝe turni sin al Dio kaj pere de Kristo konfesi siajn pekojn (1 Joh 1:9); Dio scias, ke Kristo estis tentata peki, kiel ili estas tentataj, sed li estis perfekta kaj venkis ĝuste tiun tenton, pri kiu ili malsukcesas. Pro tio "Dio en Kristo" povas pardoni nin (Ef 4:32). Kaj tial ni devas havi klaran komprenon, ke Kristo estis tentata same, kiel ni estas tentataj, kaj ke li devis havi homan naturon por efektivigi ĉion antaûdiritan. Heb 2:14 klare diras, ke Kristo havis por tio "la sangon kaj karnon". Sed "Dio estas Spirito" (Joh 4:24) laû la naturo, kaj kvankam Li havas realan korpon, kiel "Spirito" Li ne havas "la sangon kaj karnon". Tiu fakto, ke Kristo havis "karnan" naturon, signifas, ke dum lia surtera vivo, li ne havis la Dian naturon.

Antaûaj provoj de homoj sekvi la vorton de Dio, t. e. venki ĉiujn tentojn, ne havis sukcesojn. Pro tio Dio sendis "Sian propran Filon en simileco de peka karno kaj pro peko, kondamnis la pekadon en la karno" (Rom 8:3).

"Peko" estas nia natura emo peki, donita al ni de naturo. Ni jam komencis tiun pekan vojon kaj daûras iradi laû ĝi, sed la "salajro de peko estas morto". Por lasi tiun vojon, homo bezonas helpon. Sen ies helpo li ne povas liberiĝi de peko de karno kaj fariĝi perfekta. Pro tio Dio sendis al ni Sian propran Filon, kiu havis nian "pekeman karnon" kun emo peki same, kiel ni. Havante pekan karnon, Kristo venkis ĉiujn tentojn. Rom 8:3 priskribas la homan naturon de Kristo, kiel "peka karno", ankaû en Rom 7:18-23 Paûlo diras, ke en la karno "bono ne loĝas", kaj karno militas kontraû obeemo al Dio. Post tiuj vortoj ankoraû pli multe ni admiras, ke Kristo venkis ĉiujn tentojn de la karno kaj montris al ni la vojon de savo de nia propra peka karno. Iufoje iu homo nomis lin "Bona Majstro", opiniante lin kiel bona kaj perfekta de la naturo. Li respondis: "Kial vi nomas min bona? Neniu estas bona krom Unu, nome Dio" (Mk 10:17,18). Alifoje, vidinte liajn miraklojn, kiujn li faris, "multaj fidis al lia

nomo. Sed Jesuo ne konfidis sin al ili, ĉar li konis ĉiujn, kaj ne bezonis, ke iu atestu pri la homo, ĉar li mem sciis, kio estas en la homo" (Joh 2:23-25). Jesuo ne volis, ke homoj laûdegu lin persone, ĉar li bone konsciis, kiom pekema estas lia propra naturo.

## 8.4 LA HOMECO DE JESUO

La evangelio havas multe da ekzemploj, montrantaj homan naturon de Jesuo. Ekzemple, en Joh 4:6 ni legas, ke Jesuo estis lacigita kaj sidiĝis apud fonto. En alia loko ni legas: "Jesuo larmis" pri Lazaro (Joh 11:35). Kaj ĉio, kio estas skribite pri liaj lastaj suferoj, pruvas, ke Kristo estis homo: "Nun maltrankviliĝas mia animo" - sur la kruco diris li en sia preĝo al Dio (Joh 12:27). Preĝante li diris: "Ho mia Patro, se povas esti, ĉi tiu kaliko (suferoj kaj morto) pasu for de mi; tamen ne kiel mi volas, sed kiel Vi volas" (Mt 26:39). Tio indikas, ke ne ĉiam volo kaj deziroj de Kristo kongruis kun volo kaj deziroj de Dio.

Dum la tuta sia vivo Kristo estis obeema al la volo de Dio kaj preparis sin al la finala sufero sur la kruco: "Mi ne povas per mi mem fari ion; kiel mi aûdas, tiel mi juĝas; kaj mia juĝo estas justa, ĉar mi celas ne mian propran volon, sed la volon de Tiu, kiu min sendis" (Joh 5:30). Tiu ĉi diferenco inter la volo de Kristo kaj la volo de Dio estas sufiĉa pruvo, ke Jesuo ne estis Dio.

Jesuo estas ekzemplo por ni, kaj ni devas peni sekvi tiun ekzemplon, kreskante en scio pri Dio kaj lernante de la problemoj kaj zorgoj, kiujn ni ĉiuj spertas. Same kiel ni, Jesuo ne naskiĝis kun scio pri Dio. Ekde infaneco "Jesuo progresis en saĝeco kaj staturo (t. e. spirita matureco, kmp. Ef 4:13), kaj en graco ĉe Dio kaj homoj" (Lk 2:52). "Kaj la infano kreskadis kaj fortiĝis, pleniĝante de saĝeco" (Lk 2:40). Tiuj ĉi du versoj diras, ke Jesuo kreskis ne nur korpe, sed ankaû spirite. Se "Filo estas Dio", kiel asertas la doktrino pri la Triunuo, ĉio pli supre dirita pri Kristo estus ne ebla. Ja en la fino de sia vivo Kristo diris, ke li ne scias la ĝustan tempon de sia dua alveno, scias pri tio nur Patro (Mk 13:32).

Obeemo al la volo de Dio estas tio, kion ni devas lerni dum tuta nia vivo. Kristo ankaû devis lerni obeadon al sia Patro. "Kvankam li estis Filo, tamen lernis obeon (obeon al Dio) per tio, kion li suferis; kaj perfektigite, li fariĝis la fonto de eterna savo al ĉiuj al li obeantaj" (Heb 5:8,9). En Fil 2:7,8 (vidu ankaû Komenton 27) ni legas pri la sama procezo de spirita evoluo de Jesuo, kulmina punkto de kiu estis lia morto sur la kruco. Li "*sin malplenigis*, *alprenante* la formon de sklavo,... li sin humiligis kaj fariĝis obeema ĝis morto, eĉ ĝis la morto per kruco". Tiuj versoj ilustras, ke Jesuo konscie iris antaûen en sia spirita evoluo, fariĝante pli kaj pli humila, kaj fine li *fariĝis* tute obeema al la

deziro de Dio por morti sur la kruco. Li fariĝis perfekta pro sia korekta rilato al siaj suferoj.

El tio sekvas, ke Jesuo devis konscie direkti siajn fortojn por esti justulo; Dio ne devigis lin esti tia, aliokaze li estus simpla marioneto. Jesuo sincere amis nin, kaj ĝuste pro tio li oferdonis sin sur la kruco. Se Dio devigus Kriston morti sur la kruco, kristanaj emfazoj, ke Kristo amis nin (Ef 5:2,25; Ap 1:5; Gal 2:20) estus sensencaj; se Jesuo estus Dio, li ne havus elekton, sed li devus esti perfekta kaj morti sur la kruco. Tiu fakto, ke Jesuo *havis* tiun elekton, stimulas nin aprezi lian amon kaj evoluigi personan rilaton al li.

Dio amis Kriston pro tio, ke li propravole decidis oferdoni sian vivon: "Pro tio la Patro min amas, ke mi demetas mian vivon, por ke mi ĝin reprenu. Neniu ĝin forprenas de mi, sed mi ĝin demetas memvole" (Joh 10:17-18). Se Jesuo estus Dio, malfacile estus kompreni, kial al Dio plaĉis la memvola decido de Jesuo suferi morton, kiam li estis vivanta en formo de pekema homo (Mt 3:17; 12:18; 17:5). Tiu priskribo, ke la Patro amas Sian Filon pro lia obeo, sufiĉe pruvas, ke Kristo havis la eblecon malobei, sed li intence elektis esti obeema.

### Kristo Bezonis Savon

Pro tio, ke Jesuo havis homan naturon, li, same kiel ĉiuj homoj, estis inklina al malsanoj, laciĝo kaj tiel plu. Sekve, se li ne mortus sur la kruco, li mortus alimaniere, ekzemple pro maljuneco. Tial Jesuo bezonis esti savita per Dio de morto. Bone konsciante tion, Jesuo "preĝojn kaj petegojn oferinte, kun forta kriado kaj larmoj, al Tiu (Dio), kiu povis lin savi el morto, kaj aŭdite pro sia pia timo" (Heb 5:7). Tiu fakto, ke Kristo petis Dion pri sia savo de morto, forigas ĉiujn dubojn, ke li ne estis Dio. Post la releviĝo de Kristo "la morto ne plu lin regas" (Rom 6:9), tio signifas, ke antaŭ tiu tempo Kristo estis sub la rego de morto.

Multaj psalmoj profetas pri Jesuo; se iujn ajn versojn el psalmo citas la Nova Testamento, estas logike supozi, ke ankaŭ multaj aliaj versoj en la Psalmaro, ankaŭ rilatas al li. Jen estas kelkaj el ili, kiuj diras, ke Jesuo bezonis esti savita per Dio:

> **Ps 91:11,12** estas citata en Mt 4:6. Ps 91:16 profetas, ke Dio donos savon al Jesuo: "Mi satigos lin per longa vivo (t. e. eterna vivo), kaj aperigos al li Mian helpon".
>
> **Ps 69:21** diras pri la krucumo de Jesuo (Mt 27:34). La tuta psalmo priskribas pensojn de Kristo sur la kruco: "Savu min, ho Dio...

Alproksimiĝu al mia animo, savu ĝin... Via helpo min defendu, ho Dio" (vv. 1,18,29).

**Ps 89** komentarias la promesojn de Dio al David koncerne Kriston. La verso 26 profetas pri Kristo: "Li vokos Min: Vi estas mia Patro, Mia Dio, kaj la roko de mia *savo*".

La preĝoj de Kristo pri savo estis aûditaj; li estis aûdita pro sia persona spiriteco, sed ne pro lia loko en la Triunuo (Heb 5:7). La ĉefa temo de la Nova Testamento estas tiu, ke Dio relevis Jesuon kaj gloris lin per senmorteco:

"Dio... levis Jesuon... Lin altigis Dio per Sia dekstra mano por esti Estro kaj Savanto" (Ag 5:30,31).

"Dio... gloris Sian Servanton Jesuo... kiun Dio relevis el la mortintoj" (Ag 3:13,15).

"Ĉi tiun Jesuon relevis Dio" (Ag 2:24,32,33).

Jesuo mem rekonis ĉion tion, kiam li petis Dion glori lin (Joh 17:5, kmp. 13:32; 8:54).

Se Jesuo estus Dio Mem, ĉiuj tiuj vortoj estus malkonvenaj, ĉar Dio estas la Eternulo kaj ne povas morti, kaj Jesuo ne bezonus savon. Tiu fakto, ke Dio altigis Jesuon, montras Lian apartecon de Jesuo kaj Lian superecon. Neniel Kristo povis esti "vera kaj eterna Dio, havanta du naturojn - naturon de Dio kaj naturon de homo" - kiel deklaras la unua el 39 artikoloj de la Angla Eklezio. La signifo de tiu ĉi vorto montras, ke estulo povas havi nur unu naturon. Ni opinias, ke aldonitajn citaĵojn sufiĉas por pruvi, ke Jesuo havis nian homan naturon.

## 8.5 LA INTERRILATOJ DE DIO KUN JESUO

Revivigo de Jesuo pere de Dio devigas nin pripensi la interrilatojn de Dio kaj Jesuo. Se ili estas "egalaj... egale eternaj", kiel instruas la doktrino pri la Triunuo, ni povas supozi, ke iliaj interrilatoj estas egalrajtaj. Tamen ni jam donis sufiĉan kvanton da pruvoj, ke Dio superas Jesuon. La rilatoj inter Dio kaj Jesuo similas al rilatoj inter geedzoj: "la kapo de ĉiu viro estas Kristo; kaj la kapo de virino estas viro; kaj la kapo de Kristo estas Dio" (1 Kor 11:3). Kiel la edzo estas la kapo de la edzino, tiel same Dio estas la kapo de Kristo. Sekve "Kristo (apartenas) al Dio" (1 Kor 3:23) same, kiel apartenas la edzino al sia edzo.

Dion la Patron ofte oni nomas Dio de Kristo. Tiu fakto, ke Dio estas priskribita, kiel "Dio kaj Patro de nia Sinjoro Jesuo Kristo" (1 Pet 1:3; Ef 1:17) eĉ nun, post la supreniĝo de Jesuo al la ĉielo, montras, ke iliaj interrilatoj eĉ nun restas la samaj, kiel ili estis dum la surtera vivo de Kristo. Adeptoj de la doktrino pri la Triunuo iufoje akceptas, ke Jesuo ne estis egala al Dio, sed nur dum lia surtera vivo. La epistoloj de la Nova Testamento estis skribitaj kelkaj jaroj post la supreniro de Kristo en la ĉielon, sed en ili Dio estas nomita, kiel Dio kaj Patro de Kristo. Jesuo, kiel antaŭe, nomas la Patron Sia Dio.

Apokalipso, la lasta libro de la Nova Testamento, estis skribita pli ol tridek jarojn post la supreniĝo de Kristo al la ĉielo, sed eĉ ĝi skribas pri Dio, kiel pri "lia (Kristo) Dio kaj Patro (Ap 1:6). En tiu ĉi libro estas transdonitaj mesaĝoj de la revivigita kaj glorita Kristo al la kredantoj. Li diris pri "la templo de mia Dio... nomo de mia Dio... urbo de mia Dio" (Ap 3:12). Tio pruvas, ke eĉ nun Jesuo opinias la Patron sia Dio, sekve, li (Jesuo) ne estas Dio.

Tiel same Jesuo rilatis al sia Patro dum sia vivo sur la tero. Li diris pri supreniro "al mia Patro kaj via Patro, kaj al mia Dio kaj via Dio" (Joh 20:17). Sur la kruco Jesuo montris sian homan naturon plenmezure: "Mia Dio, mia Dio, kial Vi forlasis min?" (Mt 27:46). Tiuj ĉi vortoj estus ne kompreneblaj, se ili estus diritaj de Dio Mem. Kaj la fakto mem, ke Jesuo preĝis al Dio "kun forta kriado kaj larmoj", indikas al la vera naturo de iliaj interrilatoj (Heb 5:7; Lk 6:12). Memkompreneble, Dio ne povas preĝi al Si Mem. Kaj eĉ nun Kristo preĝas al Dio por ni (Rom 8:26, 34).

Kristo rilatis kaj preĝis al Dio, kiel al sia Patro, al sia Dio; la saman rilaton li havas nun, post sia reviviĝo kaj supreniĝo (Ag 3:13,26; Jes 42:1, 53:11). Sklavo obeas al volo de sia sinjoro kaj neniam estas egala al li (Joh 13:16). Kristo emfazas, ke potenco kaj aŭtoritato, kiun li posedas, estas donitaj al li de Dio, sed ne estas liaj propraj: "Mi ne povas per mi mem fari ion... mi celas... la volon de Tiu, kiu min sendis... La filo ne povas per si mem fari ion" (Joh 5:30,19).

### KOMENTO 27: "Estante En La Formo De Dio"

**"Jesuo... estante en la formo de Dio, ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio, sed sin malplenigis, alprenante la formon de sklavo" (Fil 2:5-11).**

Tiujn ĉi versojn oni uzas por pruvi, ke Jesuo estis Dio, sed kiam li naskiĝis, li prenis la formon de homo. Se tio estus vera, ni devus malakcepti ĉiujn niajn pruvojn, faritajn en Partoj 7 kaj 8, ĉar ili kontraŭas al tiu eldiraĵo. Sed ni scias, ke la Skribo ne enhavas iujn ajn kontraŭaĵojn, kaj ke ni devas ne krei doktrinon bazitan sur <u>*nur unu*</u> verso, kiu kontraŭas al la <u>*tuta*</u> doktrino de la Biblio. Estas grave noti, ke tiu ĉi citaĵo estas

preskaŭ la _sola_, kiun oni povas uzi por subteni la "forestantan ĉeneron" en la doktrino pri la Triunuo - kiamaniere Jesuo fariĝis el la formo de Dio en la ĉielo al la formo de bebo en la utero de Maria. Pli subaj analizoj montras, kion fakte signifas tiu ĉi citaĵo.

1. En Fil 2:5-11 estas kelkaj frazoj, kiuj kontraŭas al la ideo pri la Triunuo:

a) "_Dio_ tre alte superigis lin (Jesuon) kaj _donis_ al li nomon, kiu estas super ĉia nomo" (v.9). Jesuo ne superigis sin mem, sed Dio faris tion. Sekve, li ne estis superigita antaŭ ol Dio superigis lin ĉe lia reviviĝo.

b) La procezo de humiliĝo de Kristo kaj post tio la superigo pere de Dio okazis "al la gloro de Dio, _la Patro_" (v.11). Do, la Filo ne egalas al la Patro, al Dio.

2. Ni devas atente legi ne nur tiun ĉi citaĵon, sed la tutan epistolon, ĉar Paŭlo komencis paroli pri Jesuo pli frue. En Fil 1:8 Paŭlo diras pri la amo de Jesuo, en Fil 1:27 li komencas paroli jam pri ni, pri nia mensstato, daŭrigante sian penson en Fil 2: "...vi tiel same sentu, havante la saman amon, estante unuanimaj, _sampensaj_... kun humileco... ne atentu ĉiu siajn proprajn aferojn, sed ĉiu ankaŭ la aferojn de aliaj. Tiu sama _spirito_ estu en vi, kiu estis ankaŭ en Kristo Jesuo" (Fil 2:2-5). Paŭlo diras ĉi tie pri la graveco havi pensmanieron la saman, kiun havis Jesuo, dediĉinta sin al la humila servado por aliaj homoj. La sekvaj versoj diras pri la humileco de menso, kiun Jesuo montris, sed ne pri iu ŝanĝo de la naturo.

3. Jesuo estis "en la formo de Dio". Ni jam montris en 8.3, ke Jesuo havis homan naturon, kaj pro tio li ne povis samtempe havi Dian naturon. Interalie, kelkaj nuntempaj tradukoj, kiujn oni destinas por "facila legado", havas tendencon malĝuste interpreti la grekan tekston, kaj ili pli parafrazas la tekston, ol tradukas ĝin ekzakte. Tamen ni ne celas plimalaltigi signifon de tiu maniero de disvastigo de scio pri la Biblio.

La vorto "formo" (la greka "morfe") ne povas esti uzata por esprimi esencon de naturo en Fil 2:7, kiam oni skribas, ke Kristo alprenis "la formon de sklavo". Li havis la formon de Dio, sed alprenis la formon de sklavo. Natura formo de sklavo ne diferenciĝas de formo de iu ajn alia homo. Laŭ la kunteksto ni povas interpreti tion, ke kvankam Jesuo estis perfekta, havis spiritan menson, similan al la Dia, li volis al sia konduto aldoni la formon de sklavo. En Fil 3:10 Paŭlo kuraĝigas nin "konformiĝi al lia (Kristo) morto". Ni devas aspiri la formon de Kristo, kiun li montris al ni per sia morto. Certe, tio ne signifas, ke ni devas havi naturon, kiun li havis, ĉar ni jam havas homan naturon. Ni ne

bezonas ŝanĝi nin mem por havi homan naturon, sed ni bezonas ŝanĝi nian pensmanieron por ke ni povu havi la "formon", aŭ menson, kiun havis Kristo.

La greka vorto "morfe" signifas 'formo", "bildo", "simileco". Pri homoj oni diras, ke ili estas kreitaj laŭ la *bildo* de Dio (Gen 1:27). Gal 4:19 diras, ke "Kristo formiĝos en" kredantoj. Pro tio, ke Kristo havis perfektan karakteron, perfektan mensmanieron, similan al la Dia, li estis "en la formo de Dio". En tiu ĉi senco li estis egala al Dio. Fil 2:6 diras, ke Kristo "ne rigardis kiel ŝatindaĵon la egalecon kun Dio". Eĉ por unu momento li ne celis esti egala al Dio, kaj tio pruvas, ke Jesuo ne estis Dio.

4. Kristo "sin malplenigis" aŭ, kiel diras Jes 53:12, "elmetis sian animon al la morto" kaj surprenis la formon (konduton) de sklavo rilate al siaj disĉiploj (Joh 13:14). Per la morto sur la kruco li montris sian humilecon (Mt 20:28). La verso Jes 52:14 profetas pri suferoj de Kristo sur la kruco: "Lia aspekto estis malbeligita pli ol ĉe ĉiu alia kaj lia eksteraĵo pli ol ĉe iu ajn homo"

Ni montris, ke kunteksto de tiu ĉi eltiraĵo koncernas la *menson* de Jesuo, kiam li estis sur la tero en nia homa formo. Lian humilecon ni devas preni, kiel ekzemplon por ni.

5. Se Jesuo laŭ naturo estis Dio kaj, veninte de la ĉielo, surprenis homan naturon, kiel asertas adeptoj de la Triunuo, li estis ne "vera Dio" dum sia vivo sur la tero; similaj kontraŭdiroj aperas, kiam oni interpretas la Biblion laŭ homa pensado.

6. Fine pri la frazo "estante en la formo de Dio". La greka vorto, tradukita kiel "estante", ne signifas "estante de eterneco". Ag 7:55 diras pri Stefano, kiu "(*estante*) plena de la Sankta Spirito" rigardis al la ĉielo. Stefano estis plena de la Sankta Spirito en tiu momento, sed ne estis *ĉiame* plena de ĝi. Ni povas ankoraŭ aldoni ekzemplojn el Lk 16:23; Ag 2:30; Gal 2:14. Kristo "estante en la formo de Dio" signifas, ke li estis en la formo de Dio mense; tiu ĉi frazo ne signifas, ke li estis en la formo de Dio de la komenco de la tempo.

## ĈAPITRO 8: Demandoj

1. Ĉu instruas la Biblio, ke Dio estas la Triunuo?

2. Nomu tri diferencojn inter Dio kaj Jesuo.

3. Kiuj el la jenaj diraĵoj pri Jesuo estas ĝustaj?
a) Li neniam pekis
b) Li estis la solenaskita filo de Dio

c) Li ne povis peki
d) Dio devigis lin esti justa

4. Per kiu el la sekvaj punktoj Jesuo similas Dion?
a) Li havis naturon de Dio dum sia vivo sur la tero
b) Li havis perfektan karakteron, kiel Dio
c) Li sciis ĉion, same kiel Dio
d) Li estis tute egala al Dio

5.Laû kiuj el la sekvaj punktoj Jesuo similas nin?
a) Li havis ĉiujn niajn tentojn kaj homan sperton
b) Li pekis dum sia infaneco
c) Li bezonis savon
d) Li havis homan naturon

6. Kiuj el la sekvaj asertoj estas veraj?
a) Jesuo havis perfektan naturon kaj perfektan karakteron
b) Jesuo havis pekeman naturon, sed perfektan karakteron
c) Jesuo estis vera Dio kaj vera homo
d) Jesuo havis la saman naturon, kiun havis Adam antaû sia falo en pekon

7. Ĉu havis Jesuo la eblecon por peki?

--------------------------------------------------------------------------------

# ĈAPITRO 9

# LA AGOJ DE JESUO

## 9.1 LA VENKO DE JESUO

La antaûa ĉapitro montras, ke Jesuo havis nian homan naturon, kaj estis tentata de peko same, kiel ni. La diferenco inter li kaj ni estas en tio, ke Jesuo plene venkis pekon; kvankam li havis pekeman naturon, li ĉiam demonstris perfektan karakteron. Ni admiras pri tiu ĉi mirindaĵo kaj ĝi inspiras nin. La Nova Testamento multfoje emfazas la perfektecon de la karaktero de Kristo:

- Li estis "tentita en ĉio tiel same (kiel ni), tamen sen peko" (Heb 4:15).

- Li "ne konis pekon". "Kaj peko ne estis en li" (2 Kor 5:21; Joh 3:5).

- "Pekon li ne faris, kaj trompo ne troviĝis en lia buŝo" (1 Pet 2:22).

- "Sankta, senpeka, senmakula, apartigita for de pekuloj" (Heb 7:26).

La Evangeliaj skriboj montras, ke samtempuloj de Jesuo agnoskis lian perfektecon, elmontritan en liaj vortoj kaj agoj. La edzino de Pilato rekonis, ke Jesuo estas "justulo" (Mt 27:19) kaj ke li ne devas esti punata. La Roma centestro, rigardanta al la torturoj de Kristo sur la kruco, diris: "Ĉi tiu estis ja justulo" (Lk 23:47). Pli frue Jesuo, turnante sin al la judoj, demandis: "Kiu el vi pruvas kontraû mi pekon? (Joh 8:46). Respondon li ne ricevis.

Pro sia perfekta karaktero Jesuo evidentigis Dion en la karno (1Tim 3:16); li agis kaj parolis, kiel Dio, se Dio estus homo. Li estis la perfekta respegulo de Dio – "bildo de nevidebla Dio" (Kol 1:15). Tial por homo ne necesas reale vidi Dion. Jesuo klarigis: "Tiu, kiu vidis min, vidis ankaû la Patron; kiel vi diras: Montru al ni (reale) la Patron?" (Joh 14:9). Ni havas pekeman naturon kaj vivas en peka mondo kaj estas malfacile por ni kompreni kaj aprezi en deca grado la tutan spiritan superecon de Kristo; kiel homo, havante nian naturon, povas per sia karaktero plene riveli la justecon de Dio. Por kompreni tion, necesas pli forta kredo, ol simple akcepti la teologian ideon, ke Kristo estas Dio Mem; tio, ke la falsa doktrino pri la Triunuo estas tiel populara, montras, ke ĝi estas pli facile akceptata.

Kristo mortis, ĉar li havis nian naturon. Li estis posteulo de Adam pere de Maria, kaj ĉiuj posteuloj de Adam estas mortemaj (1 Kor 15:22). Pro la peko de Adam ĉiuj liaj posteuloj devas esti mortemaj, eĉ la justuloj: "Morto reĝis de post Adam... per la eraro de unu (Adam) mortis la multaj... la juĝo venis el unu ĝis kondamno... kiel per la malobeo de unu la multaj fariĝis pekuloj" (Rom 5:14-19, kmp. 6:23), sekve, ĉiuj devis morti. Kiel posteulo de Adam, Kristo ankaŭ "fariĝis pekulo" kaj sekve, ankaŭ devis morti, ĉar ĉiuj posteuloj estis klasifikitaj kiel pekuloj, meritantaj morton pro la peko de Adam.

Dio ne ŝanĝas tiun principon, Li aplikis ĝin ankaŭ rilate al Kristo. Dio "Tiun, kiu ne konis pekon, Li *faris* peko pro ni" (2 Kor 5:21).

Krom Jesuo, ĉiuj posteuloj de Adam, meritas tiun ĉi punon, ĉar ni ciuj persone pekas. Jesuo mortis, ĉar li havis nian naturon, dividinte kun ni la malbenon, senditan al ĉiuj posteuloj de Adam. Tamen, pro tio, ke li persone faris nenion por meriti morton, "lin Dio levis, malliginte la suferojn de morto, ĉar estis neeble, ke li estu tenata de ĝi" (Ag 2:24). Kristo estis "la difinita Filo de Dio en potenco laŭ la Spirito de sankteco per la releviĝo de la mortintoj" (Rom 1:4). Tiele, pro sia perfekta karaktero, sia "spirito de sankteco" Jesuo estis relevigita kun gloro.

Kristo mortis sur la kruco *ne nur* pro tio, ke li havis homan naturon. Li propravole fordonis sian perfektan vivon, kiel donacon al ni, montrinte sian amon al ni; li sciis, ke mortinte "pro niaj pekoj", li savos nin de peko kaj morto (Ef 5:2,25; Ap 1:5; Gal 2:20). Pro tio, ke Jesuo havis perfektan karakteron, li sukcesis venki la rezulton de peko kaj fariĝis la unua persono, releviĝinta el la mortintoj kaj ricevinta eternan vivon. Ĉiuj tiuj, kiuj identigas sin kun Jesuo per baptiĝo kaj sekvas lian ekzemplon en sia vivo, havas esperon pri releviĝo kaj rekompenco. En tio estas la glora signifo de la releviĝo de Kristo. Tio estas garantio, ke ankaŭ ni estos relevigitaj kaj juĝitaj (Ag 17:31), kaj se ni estos vere similaj al li, ankaŭ ni ricevos rekompencon, eternan vivon, "sciante, ke Tiu, kiu levis la Sinjoron Jesuo, levos nin ankaŭ kun Jesuo" (2 Kor 4:14; 1 Kor 6:14; Rom 6:3-5). Kiel pekuloj ni meritas eterman morton (Rom 6:23). Sed pro la perfekta vivo de Kristo, lia obeema morto, Dio povas *donaci* al ni eternan vivon, konforme kun ĉiuj Siaj principoj.

Por forigi la rezultojn de niaj pekoj, Dio "kalkulas virton" (Rom 4:6) por ni pro nia kredo al Liaj promesoj pri savo. Ni scias, ke pekon sekvas morto; se ni sincere kredas, ke Dio savos nin de tio, ni devas kredi, ke Li kalkulas nin justuloj, kvankam ni ne estas tiaj. Kriston, kiu ne konis pekon, "Li faris peko pro ni; por ke ni fariĝu justeco de Dio en li" (2 Kor 5:21), t. e. esti en Kristo per baptiĝo kaj vivi laŭ la ekzemplo de Kristo. Por tiuj, kiuj estas "en Kristo Jesuo", li "fariĝis... saĝeco... kaj justeco kaj sanktigo, kaj elaĉeto" (1 Kor 1:30); la sekva verso kuraĝigas nin glori Kriston pro liaj grandaj agoj, kiujn li faris: "Ĉar la justeco de Dio malkaŝiĝas en ĝi de fido al fido, kiel estas skribite: La

virtulo vivos per sia fideleco” (Rom 1:17). Ĝusta kompreno de tiuj ĉi linioj estas necesa parto de scio pri la vera Evangelio.

Ĉio tio fariĝis ebla pro la releviĝo de Kristo. Li estis la unua frukto el la tuta rikolto de homaj estaĵoj, kiuj estos senmortaj dank' al liaj agoj (1 Kor 15:20), “la unuenaskita” el nova spirita familio, al kiu estas donita la naturo de Dio (Kol 1:18, kmp. Ef 3:15). La releviĝo de Kristo el la mortintoj donis al Dio eblecon konsideri kredantojn en Kristo kiel justulojn, ĉar ili estas kovritaj per lia justeco. Kristo “estis transdonita pro niaj pekoj kaj estis relevita por nia pravigo” (Rom 4:25).

Ĉio plisupredirita certigas nin, ke ni povas esti kalkulataj de Dio kiel justuloj. Kristo povas starigi nin ĉe la juĝa seĝo “*senriproĉaj* antaŭ sia gloro”, “sanktaj kaj senmakulaj kaj ne riproĉeblaj antaŭ li” (Judas, v. 24; Kol 1:22, kmp. Ef 5:27). Havante pekeman naturon kaj ĉiamajn spiritajn malsukcesojn, ni bezonas firman fidon por atingi al vera kredo pri tio. Vera kredo ne atingeblas nur per senpripensa akcepto de kelkaj doktrinoj.

Nur per baptiĝo en Kriston ni povas esti “en Kristo” kaj, sekve, esti kovritaj de lia justeco. Per baptiĝo ni kuniĝas al lia morto kaj resurekto (Rom 6:3-5), liberiĝas de niaj pekoj per “nia pravigo” (Rom 4:25). Ĉion tion, kion ni priskribis, povas esti malfacile komprenebla por nebaptita persono, ĉar nur per baptiĝo ni fariĝas kunligitaj kun la sango de Kristo, verŝita sur la kruco; kredantoj “lavis siajn robojn, kaj blankigis ilin en la sango de la Ŝafido” (Ap 7:14). Ni metafore surmetas blankajn robojn, reprezentantajn la justecon de Kristo (Ap 19:8). Povas esti, ke tiuj blankaj roboj denove fariĝos malpuraj pro niaj pekoj (Judas, v. 23); se tio okazos post nia baptiĝo, ni devas denove lavi ilin per la sango de Kristo kaj blankigi ilin, petante Dion pardoni nin je la nomo de Kristo.

El tio sekvas, ke post baptiĝo ni devas strebi resti en tiu benita stato, en kiun ni eniris. Necesas regule, ĉiutage dum kelkaj minutoj pripensi niajn agojn, ĉiame preĝante kaj petante pardonon. Agante tiel, ni havos certecon, ke dank' al la justeco de Kristo, kovranta nin, ni reale estos en la Regno de Dio. Ni devas strebi por esti en Kristo en la tago de nia morto aŭ ĉe la reveno de Kristo, “ne havante mian (nian) justecon... sed la justecon, kiu devenas de Dio sur fidon” (Fil 3:9).

La ripetata emfazo de la vorto “*fido*” montras, ke ni ne povas akiri savon nur pro niaj agoj, ĉar “per graco vi saviĝis per fido, ne per vi mem: ĝi estas dono de Dio; ne el faroj” (Ef 2:8,9). Kiel pravigo kaj justeco estas “donacoj” (Rom 5:17), tiel same ankaŭ savo estas donaco. Niaj agoj en kristana servo devas respeguli nian dankon al Dio pro Liaj faroj por ni, ke Li kalkulas nin justuloj kaj per tio montras al ni la vojon al savo. Opinii, ke savon oni povas ricevi nur pro siaj agoj, estas grava eraro. Niaj faroj nur montras nian amon kaj

dankon. Savo estas <u>donaco</u>, kiun ni povas akiri pro nia fido, kaj vera fido neeviteble montros sin en agoj (Jak 2:17).

## 9.2 LA SANGO DE JESUO

En la Nova Testamento ofte oni povas renkonti menciojn, ke nia pravigo kaj savo estas rezulto de la verŝita sango de Kristo sur la kruco. Ekzemple, 1Joh 1:7; Ap 5:9; 12:11; Rom 5:9). Por taksi la signifon de la verŝita sango de Kristo ni devas kompreni la Biblian principon, ke "la animo de ĉiu korpo estas ĝia sango" (Lev 17:14). Korpo ne povas vivi sen sango; ĝi estas simbolo de vivo. En tio estas klarigo de la vortoj de Kristo: "Se vi ne manĝas la karnon de la Filo de homo kaj ne trinkas lian sangon, vi ne havas en vi vivon" (Joh 6:53).

Pekon sekvas morto (Rom 6:23), t. e. perdo de la sango, kiu subtenas la vivon. Pro tio la Izraelidoj devis sangverŝi ĉiufoje, kiam ili pekis. "Laŭ la leĝo (de Moseo), preskaŭ ĉio puriĝas per sango; kaj sen sangverŝado ne fariĝas absolvo" de pekoj (Heb 9:22). Tial Dio ne akceptis la agon de Adam kaj Eva, kiuj kovris sian pekon per folioj de figarbo; anstataŭ folioj por kovri ilian pekon, Dio donis al ili felon de ŝafido (Gen 3:7,21). Laŭ la sama kialo Dio akceptis la donacoferon de Habel, alportinta al Li bestojn, kaj rifuzis la donacoferon de Kain el la fruktoj de la tero. Habel komprenis, ke sen sangverŝo ne estas eble ricevi absolvon de peko kaj akiri vojon al Dio (Gen 4:3-5).

Precipe tion respegulas la evento, kiam la Izraelidoj por akiri savon de la morto, markis dum Pasko la pordojn de siaj domoj per sango de ŝafidoj. Tiuj ĉi eventoj montras la ekskluzivan gravecon de la sango de Kristo. La sango de ŝafido indikas al la sango de Kristo, per kiu ni devas kovri nin. Antaŭ la tempo de Jesuo, laŭ la ordono de Dio, donita pere de Moseo, la judoj devis oferdoni bestojn pro siaj pekoj. Tamen la verŝon de sango de bestoj oni okazigis nur por edukaj celoj. La salajro de peko estas morto (Rom 6:23), kaj pro tio la morto de bestoj ne absolvos homon de lia peko, ĉar la besto, kiun li oferas, estas senpeka, ĝi ne havas scion pri bono kaj malbono, ĝi ne povas tute reprezenti homon persone: "Ĉar ne eble estas, ke la sango de bovoj kaj kaproj forprenus pekojn" (Heb 10:4).

Aperas la demando: Kial la judoj devis oferi bestojn pro siaj pekoj? Paŭlo resumas la diversajn respondojn al tiu ĉi demando tiele: "La leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukanta al Kristo" (Gal 3:24). La bestoj, kiujn oni oferdonis pro pekoj, devis esti senmakulaj, sen difektoj (El 12:5; Lev 1:3,10 kaj tiel plu). Tio indikas al Kristo - "Ŝafido senmakula kaj sendifekta" (1 Pet 1:19). La sango de tiuj bestoj <u>*reprezentis*</u> la sangon de Kristo; Dio sciis, ke Kristo faros tion. Kaj pro tio Dio povis pardoni la pekojn de Sia popolo, kiu vivis antaŭ la tempo de Kristo. La morto de Kristo estis "por la elaĉeto de tiuj pekoj, kiuj estis sub la unua testamento (Heb 9:15), t. e. sub la leĝo de Moseo (Heb 8:5-9). Ĉiuj

ordonoj, faritaj sub tiu leĝo, antaûdiris la alvenon de Kristo kaj lian perfektan sinoferdonon "por forigi la pekon per la ofero de si mem" (Heb 9:26; 13:11,12; Rom 8:3, kmp. 2 Kor 5:21).

En Ĉapitro 7.3 ni montris, ke la tuta Malnova Testamento, precipe la leĝo de Moseo, antaûindikis al Kristo. Laû la Leĝo la vojo al Dio ebliĝis pere de la Ĉefpastro; li estis la peranto inter Dio kaj homoj laû la Malnova interligo, kaj laû la Nova interligo la Ĉefpastro estas Kristo (Heb 9:15). "La leĝo starigas kiel ĉefpastrojn homojn, kiuj havas malfortecon; sed la vorto de la ĵuro... nomas Filon, perfektigitan por ĉiam" (Heb 7:28). Pro tio, ke la ĉefpastroj mem estas pekemaj, ili ne povis doni veran pardonon al homoj. La bestoj, kiujn ili oferis pro (siaj) pekoj ne povis esti veraj respondecaj pro la pekoj. Necesis tiurilate perfekta homa estaĵo, kiu povus reprezenti pekeman homecon kaj sinoferdoni pro ĉies pekoj, por elaĉeti la pekojn de ĉiu homo. Ankaû necesis perfekta ĉefpastro, kompatema al suferoj de homoj, kiu estus same, kiel homoj, tentata de pekoj kaj kiu estos interulo inter Dio kaj homoj (Heb 2:14-18).

Jesuo perfekte konvenis al tiuj kondiĉoj – "Por ni konvenis tia ĉefpastro, sankta, senpeka, senmakula, apartigita for de pekuloj" (Heb 7:26). Li ne bezonis oferi oferojn pro siaj propraj pekoj, ĉar li estis senpeka, li sinoferdonis nur pro la pekoj de la popolo. Ĝuste pro tio la Skribo nomas lin nia ĉefpastro: "Li povas savi ĝis la ekstremaĵo tiujn, kiuj alproksimiĝas per li al Dio, ĉar li ĉiam vivas, por propeti pro ili" (Heb 7:25). Pro tio, ke Kristo havis homan naturon, li estas nia ideala Ĉefpastro, "povante indulgi tiujn, kiuj estas malkleraj kaj erarantaj, tial, ke li mem estas ĉirkaûata de malforteco" (Heb 5:2). Tion ankaû konfirmas Heb 2:14: "li ankaû mem egale partoprenis en ili", t. e. havis homan naturon.

Kiel la judaj ĉefpastroj estis interuloj nur por la Dia popolo, la Izraelidoj, tiel ankaû Kristo estas Ĉefpastro nur por spirita Izraelo, por tiuj, kiuj estas baptitaj al Kristo, komprenante la Evangelion. Li estas: "granda pastro super la _domo de Dio_" (Heb 10:21), kiun konsistigas tiuj, kiuj denove naskiĝis per la baptiĝo (1 Pet 2:2-5), havante la veran esperon de la Evangelio (Heb 3:6). Kompreno pri la vera senco de la pastreco de Kristo, devas kuraĝigi nin por esti baptitaj al li, ĉar se ni ne baptiĝos al li, li ne povos esti nia interulo.

Baptiĝinte al Kristo, ni devas plene konfidi al lia ĉefpastreco. Fakte, ni prenas al ni iun respondecon, kiun ni devas plenumadi dum la tuta nia vivo. "Per li do ni oferu al Dio ĉiam oferon de laûdo" (Heb 13:15). Dio donis al ni Kriston por ke ni laû lia ĉefpastreco povu glori kaj laûdi Dion kaj ke pere de Kristo ni havu vojon al Dio.

En Heb 10:21-25 estas indikite, kiel ni devas vivi, "havante grandan pastron super la domo de Dio":

1. “Ni alproksimiĝu kun sincera koro, en pleneco de fido, kun niaj koroj aspergitaj for de malbona konscienco, kaj kun la koroj lavitaj per akvo pura”. Akcepti la ĉefpastrecon de Kristo signifas, ke ni devas baptiĝi (purigi nin per la akvo pura) al li kaj vivi, purigante niajn pensojn, korojn, konsciencon, firme kredante, ke pro lia sinoferdono ni aliĝas al Dio.

2. “Ni tenu firme la konfeson de nia espero sendekliniĝinte”. Ni ne devas deflankiĝi de la veraj doktrinoj, kiuj donis al ni veran komprenon pri la ĉefpastreco de Kristo.

3. “Ni pripensu unu la alian, por instigi al amo kaj bonaj faroj, ne forlasante nian kunvenadon”. Ni devas esti kunligitaj per amo kun tiuj, kiuj komprenas la signifon de la ĉefpastreco de Kristo kaj ricevas helpon de ĝi. Tion oni atingas pere de kunvenoj por komuna Diservo, dum kiuj ni rememoras pri la ofero de Kristo (vidu 11.3.5).

Tiuj ĉi postulatoj, se ni estas baptitaj al Kristo kaj restadas en li, devas plenigi nin per la konvinko, ke ni reale ricevos savon: “ni do alvenu kun kuraĝo al la trono de graco, por ke ni ricevu kompaton kaj trovu gracon por ĝustatempa helpo” (Heb 4:16).

## 9.3 OFERDONO PRO NI KAJ SI MEM

La juda ĉefpastro devis antaŭe oferdoni pro siaj propraj pekoj, kaj poste pro la pekoj de la popolo (Heb 5:1-3). La saman devis agi ankaŭ Kristo. Kvankam li persone ne havis pekojn, sed li havis homan naturon kaj pro tio ankaŭ li bezonis savon de morto. Kaj Dio donis al li savon pro lia sinoferdono. Jesuo, sekve, mortis por akiri sian propran savon, kaj ankaŭ por ebligi nian savon. Multaj versoj konfirmas tion. Pli sube ni indikas kelkajn el ili:

- La Ĉefpastro “devas, kiel por la popolo, tiel ankaŭ por si mem oferi pro pekoj... tiel ankaŭ Kristo” plenumis la rolon de Ĉefpastro laŭ tipo de Moseo (Heb 5:3,5). La greka vorto, tradukita kiel “devas”, signifas ankaŭ financan ŝuldon. Rilate al nia Sinjoro tio signifas, ke li repagis sian ŝuldon, elaĉetante sian kaj nian savon. Kristo *devis* fari tion pro sia homa naturo, sed tio ne signifas, ke li havis iujn siajn pekojn, kiujn li devis elaĉeti. Li faris tion por ni, kaj ni estas elacetitaj per lia oferaĵa sango, sed per tio ankaŭ li mem estis elaĉetita.

- Kristo “ne havas ĉiutagan necesecon, kiel tiuj ĉefpastroj, oferi oferojn, unue pro la propraj pekoj, poste pro la pekoj de la popolo; ĉar *tion li faris unufoje* por ĉiam, oferante sin mem” (Heb 7:27). Sendube, Paŭlo emfazis la similecon inter la oferdonoj de la pastroj kaj Kristo. Li ripetas tion en Heb 9:7 (kmp. vv.12, 25). La diferenco estas en tio, ke Kristo faris tion unufoje, sed la ĉefpastroj okazigis tion ĉiujare. Se diferenco estus en tio, ke Kristo oferis *nur* por la popolo, tio estus substrekita. Sed estas dirite, ke Kristo unue oferdonis pro siaj “pekoj”, kaj aparte “pro la pekoj de la popolo” - liaj pekoj ne estis niaj pekoj. Tamen estas dirite, ke li estis tute senpeka kaj tio signifas, ke pekema estas la homa naturo mem.

- Dio “revelis el la mortintoj la grandan paŝtiston de la ŝafoj, nian Sinjoron Jesuo, per la sango de la eterna interligo” (Heb 13:20), t. e. per lia propra sango. El tio ni vidas, ke nia Sinjoro estis la paŝtisto kaj samtempe ankaŭ oferaĵo.

- Necesas atenti, ke ĉiuj mencioj pri besta oferdono laŭ la leĝo de Moseo figure respegulas la oferon de Kristo. La altaro, simbolo de Kristo, ĉiujare estis purigata per sango de oferaĵoj (El 30:10), tio indikas, ke Kristo purigis sin mem per sinoferdono. Fakte, la tabernaklo mem metafore reprezentis Kriston, kaj devis esti purigata per sangoverŝado (Heb 9:23). La tabernaklo mem ne faris pekon, sed ĝi devis esti purigata per sango, ĉar ĝi asociiĝis kun peko. Same statas pri Kristo. Kiel la ĉefpastroj komencis sian diservon per sinsangpurigo, tiel same Kristo purigis sin per sia propra sango antaŭ ol komenci sian servadon por ni en la ĉielo (Lev 8:23).

Ke Kristo purigis sin mem, tute ne signifas, ke li persone estis pekulo. Oferdoni oferon pro peko ne ĉiam signifas, ke la oferanto pekis. (Ekzemple, en Lev 12 virino faris tion post naskiĝo de bebo).

## 9.4 JESUO KIEL NIA REPREZENTANTO

Pli supre ni vidis, ke la bestaj oferoj ne povis tute reprezenti pekemajn homojn. Jesuo *estis* reprezentanto de ni, kiu “devis en ĉio similiĝi al siaj fratoj” (Heb 2:17). “Li gustumis morton por ĉiu” (Heb 2:9). Kiam ni pekas, ekzemple, dum kolero, - Dio povas pardoni nin “en Kristo” (Ef 4:32), ĉar Dio povas kompari nin kun Kristo, kiu, kiel ni, estis tentata peki (ekzemple, koleri), sed kiu venkis ĉiujn tentojn. Dio povas pardoni niajn pekojn (ekzemple, koleron), ĉar ni, estante en Kristo, estas kovritaj per lia justeco. Kristo, kiel nia

reprezentanto, estas rimedo, per kiu Dio povas montri Sian gracon, samtempe subtenante Siajn proprajn justajn principojn.

Se Jesuo estus Dio, sed ne estulo kun homa naturo, li ne povus esti nia reprezentanto. Tio estas ankoraŭ unu pruvo, ke unu falsa ideo kondukas al alia. Tiel teologoj havas multe da komplikaj teorioj por klarigi la morton de Kristo. La populara opinio de apostatoj de kristanismo estas tio, ke pro siaj pekoj, iu homo tion ŝuldas al Dio, kion li mem ne povas pagi. Kristo per sia sango, elverŝita sur la kruco, forigis la ŝuldon de ĉiu kredanto. Multaj predikantoj de la Evangelio klarigas tion tiele: "Ni ĉiuj estas kvazaŭ starigitaj ĉe muro por ke la diablo pafmortigu nin. Jesuo hastis antaŭen, kaj la diablo mortigis lin anstataŭ ni, kaj pro tio ni nun estas liberaj".

Tiuj ĉi artefaritaj teorioj ne havas iun ajn subtenon en la Biblio. Se Kristo mortus *anstataŭ* ni, do ni neniam povus morti, sed pro tio, ke ni havas dume homan naturon, ni devas morti. Savo de peko kaj de morto estos donita al ni dum la juĝo (kiam al ni estos donita senmorteco). Ni ne ricevis ĝin ĉe la morto de Kristo. La morto de Kristo "neniigis... la diablon" (Heb 2:14; la diablo ne neniigis lin).

La Biblio instruas, ke savo fariĝis ebla pro la morto de Kristo *kaj* pro lia releviĝo, ne nur pro lia morto.

Se Kristo elaĉetus niajn pekojn per sia sango, donita savo estus opiniata de ni, kvazaŭ ĝi apartenas al ni laŭ rajto. Tamen savo estas donaco al ni de la kompatema kaj pardonema Dio; kaj se Jesuo jam pripagis niajn ŝuldojn, elaĉetis niajn pekojn, do tiu donaco perdas sian sencon. Tio signifus, ke kolerigita Dio trankviliĝis, ekvidinte la sangon de Kristo. Sed fakte, dum nia pento pro niaj pekoj Dio vidas, ke ni strebas sekvi Lian Filon, kiel nian reprezentanton antaŭ Li, kaj ne konsideras la sangon de Kristo kiel simplan talismanon. Multaj kristanaj himnoj kaj kantoj enhavas nekredeblan kvanton da falsaj doktrinoj en tiu ĉi sfero. Pere de muziko kaj preĝeja kantado falsaj doktrinoj eniras en la menson de homo pli facile kaj pli forte, ol racia Biblia instruado. Ni devas zorge atenti, por ke tiuj falsaj doktrinoj ne eniru en nian menson.

Bedaŭrinde, la simplaj vortoj "Kristo mortis por ni" (Rom 5:8) ofte estas komprenataj malĝuste, kiel "Kristo mortis anstataŭ ni". Estas interligo inter Rom 5 kaj 1 Kor 15 (ekzemple, v. 12 = 1 Kor 15:21; v.17 = 1 Kor 15:22). "Kristo mortis *por ni*" (Rom 5:8) egalas al "Kristo mortis *pro niaj* pekoj" (1 Kor 15:3). Lia morto malfermis la vojon, laŭ kiu ni povas ricevi pardonon pro niaj pekoj; en tiu ĉi senco "Kristo mortis por ni". La prepozicio "por" ne signifas "anstataŭ"; Kristo mortis "pro niaj pekoj" ne signifas "anstataŭ niaj pekoj". Li "propetas" por ni (Heb 7:25), sed ne anstataŭ ni. La prepozicio "por" ankaŭ ne signifas "anstataŭ" en Heb 10:12 kaj Gal 1:4.

## 9.5 **JESUO KAJ LA LEĜO DE MOSEO**

Pro tio, ke Jesuo estis la perfekta oferaĵo pro peko kaj la ideala Ĉefpastro, kiu reale povis ricevi pardonon por ni, la malnova sistemo de ĉefpastroj kaj oferado de bestoj ĉesis sian validecon post la morto de Kristo (Heb 10:5-14). “Ĉar kiam la pastraro ŝanĝiĝas (de la Levidoj ĝis Kristo), necese ankaŭ fariĝas ŝanĝo de leĝo” (Heb 7:12). Kristo “estas farita ne laŭ la leĝo de ordono karna (t. e. pastro devis deveni nur el la tribo de Levi), sed laŭ la potenco de vivo nedetruebla”, kiu estis donita al li pro lia perfekta ofero (Heb 7:16). Sekve, “okazas vere nuligado de antaŭiranta ordono (t. e. la leĝo de Moseo), pro ĝia malforteco kaj senutileco (ĉar la leĝo nenion perfektigis); kaj okazas la enkonduko de pli bona espero (per Kristo)” (Heb 7:18,19).

Tio evidentigas, ke la leĝo de Moseo ĉesis sian validecon post la sinoferdono de Kristo. Kredi al homa pastreco aŭ oferdoni bestojn signifas, ke ni opinias la oferon de Kristo ne tute sukcesa kaj perfekta, kaj por nia savo ne sufiĉas nur la kredo je Kristo, necesas ankaŭ niaj agoj. Sed “neniu praviĝas antaŭ Dio per la leĝo;... La virtulo vivos per fido” (Gal 3:11, kmp. Ĥab 2:4).

Se ni intencas sekvi la leĝon de Moseo, ni devas observi *ĉiujn* ĝiajn partojn. Se ni ne observas eĉ unu ĝian parton, tio kondukas al kondamno, “ĉar estas skribite: Malbenita estas ĉiu, kiu ne persistos en ĉio, kio estas skribita en la libro de la leĝo, por plenumi ĝin” (Gal 3:10).

Pro nia pekema homa naturo ni ne povas plene observi la leĝon de Moseo, sed dank’ al la perfekta obeado de Kristo, ni estas liberigitaj de la devo observi ĝin. Nia savo estas donaco de Dio pro obeado de Kristo, ne pro nia persona obeema ago. “Ĉar kiam la leĝo troviĝis nekapabla pro tio, ke ĝi estis malforta pro la karno, Dio, sendante Sian propran Filon en simileco de peka karno kaj pro peko, kondamnis la pekadon en la karno” (Rom 8:3). “Kristo elaĉetis nin el la malbeno de la leĝo, fariĝinte malbeno pro ni” (Gal 3:13).

Pro tio ni ne plu devas observi la leĝon de Moseo. En parto 3.4 ni jam vidis, ke la nova interligo en Kristo anstataŭigis la malnovan leĝon de Moseo (Heb 8:13). Per sia morto Kristo nuligis “la dekreton kontraŭ ni en ordonoj skribitan, kiu estis al ni malfavora (pro nia nekapableco plene observi ĝin), kaj li forprenis ĝin..., najlinte ĝin al la kruco... Neniu do vin juĝu pri manĝaĵo, aŭ trinkaĵo, aŭ rilate al festo, aŭ novmonato, aŭ sabato, kiuj estas ombro de la estontaĵoj, sed la korpo apartenas al Kristo” (Kol 2:14-17).

La fruaj kristanaj eklezioj de la unua jarcento estis sub ĉiama premo de la ortodoksaj judoj, kiuj postulis observi partojn de la leĝo. La Nova Testamento multfoje indikas malakcepti tion. Sed malgraŭ tiuj sugestoj, eĉ hodiaŭ estas eklezioj, kiuj subtenas postulojn observi la leĝon parte.

Pli supre ni jam vidis, ke por ricevi savon necesas observi *la tutan* leĝon, aliokaze tion aŭtomate sekvas kondamno pro malobeemo (Gal 3:10).

Estas io en la homa naturo, kio igas homon inklini al la ideo, ke per agoj oni povas pravigi sin; ni ŝatas opinii, ke ni *povas* ion *fari* por nia savo. Ĝuste pro tio en multaj religioj, kaj ankaŭ en la kristana, dekonaĵo, ikonoj, portado de krucifikso surbruste, preĝado en certaj pozoj kaj tiel plu estas popularaj. Savo nur per kredo je Kristo (kion fakte instruas la Biblio) estas doktrino unika, kaj sur ĝi baziĝas vera kristanismo.

Tra la tuta Nova Testamento videblas avertoj kontraŭ la observado de iu ajn parto de la leĝo por akiri savon. Iuj opinias, ke laŭ la leĝo de Moseo, kristanoj devas esti cirkumciditaj "kaj observi la leĝon". Je la nomo de la veraj kredantoj Jakobo kondamnis tiun ideon: "Ni ne ordonis tion" (Ag 15:24). Petro diris pri tiuj, kiuj instruas, ke necesas observi la leĝon de Moseo: "Vi incitas Dion, dezirante meti sur la kolon de la disĉiploj jugon, kiun povis porti nek niaj patroj, nek ni. Sed ni kredas pri nia savo per la graco de la Sinjoro Jesuo" (Ag 15:10,11). Ankaŭ Paŭlo kelkfoje atentigis la saman: " Praviĝas homo ne per faroj de la leĝo, sed nur per fido al Jesuo Kristo... ni praviĝu per fido al Kristo, kaj ne per faroj de la leĝo... per faroj de la leĝo neniu karno praviĝos... neniu praviĝas antaŭ Dio per la leĝo... ĉiu kredanto al li estas pravigita pri ĉio, pri kio vi ne povis esti pravigitaj per la leĝo de Moseo" (Gal 2:16; 3:11; Ag 13:39). La fakto, ke en populara kristanismo oni observas partojn de la leĝo de Moseo, atestas al apostateco de la vera instruo de kristanismo, kiu instruas, ke kristanoj ne devas observi la leĝon de Moseo, ĉar ĝia valideco estis ĉesigita post la sinoferdono de Kristo.

Pli sube sekvas la elementoj de la leĝo de Moseo, kiuj estas uzataj en nuntempa "kristana" praktiko:

**Pastroj**

La katolika kaj anglikana eklizioj uzas sistemon de homa pastreco. La romaj katolikoj opinias la Papon, kiel ekvivalenton de la juda ĉefpastro. Sed ni jam ellernis, ke "ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo, Kristo Jesuo" (1Tim 2:5). Tial tute ne eblas, ke la Papo aŭ pastroj povu esti niaj interuloj, kiel tio estis laŭ la Malnova Interligo. Nur Kristo estas nun nia Ĉefpastro en la ĉielo, kiu transdonas niajn preĝojn al Dio.

En la Biblio tute forestas iuj ajn atestoj, ke la posedantaj la Sanktan Spiriton apostoloj de la unua jarcento, ekzemple Paŭlo, transdonis sian donacon de la Spirito al sekvantaj generacioj aŭ, ekzemple, al la Papo. Sed se ni eĉ supozos tiun eblecon, ni ne trovos iujn ajn pruvojn, ke la Papo kaj pastroj persone estas ĝuste tiuj homoj, al kiuj falis la spirita mantelo de la apostoloj de la unua jarcento.

La donacoj de la Sankta Spirito estis deprenitaj, kaj ĉiuj kreduloj egalrajte havas la saman sanktan donacon, la Sanktan Vorton, en la Biblio (vidu 2.2 kaj

2.4). Pro tio ĉiuj homoj estas gefratoj, neniu havas pli altan spiritan pozicion ol aliaj. Fakte, ĉiuj veraj kredantoj estas membroj de nova pastreco, ĉar ili estas baptitaj al Kristo kaj proklamas la gloron de Tiu, kiu vokis vin el mallumo en Sian lumon mirindan (1 Pet 2:9). Tial, kiam revenos Kristo kaj establigos sian regnon surtere, ili estos regantoj kaj pastroj (Ap 5:10).

La katolikoj havas kutimon nomi siajn pastrojn "patro" ( ankaŭ "Papo" signifas patron). Tio akre kontrastas al la klaraj vortoj de Kristo: "Nomu neniun sur la tero via patro; ĉar Unu, kiu estas en la ĉielo, estas via Patro" (Mt 23:9). Fakte, Jesuo avertis ne fari iun ajn homon spirita pastro: "Sed vi ne estu nomataj Rabeno; ĉar unu estas via instruanto, kaj vi ĉiuj estas fratoj" (Mt 23:8).

La ornamitaj vestaĵoj de pastroj kaj episkopoj devenas de la specialaj vestaĵoj de pastroj kaj ĉefpastroj de Moseo-tempo. Tiuj vestaĵoj simbole indikis al la perfekta karaktero de Kristo, sed pro tio, ke la tuta leĝo nune jam ne validas, perdis sian signifon ankaŭ tiuj ornamitaj vestaĵoj. Tiuj vestaĵoj antaŭdiris la gloron kaj grandecon de Kristo, sed bedaŭrinde ili nune servas por glori kaj potencigi tiujn homojn, kiuj portas ilin. Iuj el ili eĉ ne kredas je releviĝo de Kristo kaj je ekzisto de Dio Mem.

La katolika ideo, ke Maria estas pastro, ankaŭ estas granda eraro. Ni preĝas en la nomo de Jesuo, ne de Maria (Joh 14:13; 15:16; 16:23-26). Nur Kristo estas nia Ĉefpastro, ne Maria. Jesuo malaprobis Marian, kiam ŝi provis igi lin fari tion, kion, laŭ ŝi, necesis fari (Joh 2:2-4). Dio kondukos homojn al Kristo, ne al Maria (Joh 6:44).

## Pago De Dekonaĵo

Dekonaĵo ankaŭ estis parto de la leĝo de Moseo, laŭ kiu la Izraelidoj devis doni dekan parton de sia enspezo al la filoj de Levi (Nom 18:21). Sed ni scias, ke ne devas esti homa pastreco, kaj tial neniu devas pagi dekonaĵon al iu ajn eklezia aŭtoritatulo. Kaj denove unu falsa ideo (ĉi okaze, pri pastreco) kondukas al alia (t. e. dekonaĵo). Dio Mem ne bezonas niajn oferaĵojn, ja ĉio apartenas al Li (Ps 50:8-13). Ni redonas al Dio tion, kion Li donis al ni (1 Kron 29:14). Estas ne eble por ni akiri savon rezulte de niaj materialaj oferdonoj, ekzemple, en financa formo. Kiel dankon al Dio pro Lia granda donaco al ni, ni devas oferi ne nur dekonaĵon de nia mono, sed la tutan nian vivon. Paŭlo donis al ni ekzemplon pri tio, plenuminte tion, kion li predikis: "prezentu viajn korpojn kiel vivantan oferon, sanktan, plaĉantan al Dio, kio estas via racia servo (Rom 12:1).

## Manĝaĵo

Laŭ la juda leĝo iuj specoj de manĝaĵo estas "malpuraj". Tiun leĝon sekvas ankaŭ nune iuj eklezioj, precipe koncerne porkaĵon. Pro tio, ke Kristo nuligis la leĝon de Moseo sur la kruco, "Neniu do vin juĝu pri manĝaĵo, aŭ trinkaĵo" (Kol 2:14-16), nuligitaj estas ankaŭ la ordonoj pri manĝaĵo. Kristo estis tiu, al kiu antaŭindikis la "puraj" manĝaĵoj.

Jesuo mem klarigis, ke neniu manĝaĵo, manĝata de homo, povas profani lin. Profanas homon nur tio, kio eliras el lia koro (Mk 7:15-23). Tion li diris, purigante ĉiajn manĝaĵojn (Mk 7:19). La saman diras Petro en Ag 10:14,15, kaj ankaŭ Paŭlo instruis: "Mi scias, kaj konvinkiĝis en la Sinjoro Jesuo, ke nenio estas malpura per si" (Rom 14:14). Kaj en Rom 14:2 li diris, ke opinii iun manĝaĵon malpura signifas spiritan malfortecon. Nia rilato al manĝaĵo "ne rekomendas nin al Dio" (1 Kor 8:8). Pli ol tio, la Biblio enhavas averton, ke apostatoj de kristanismo instruas homojn "deteni sin de manĝaĵoj, kiujn Dio kreis por ke ili estu danke ricevitaj de tiuj, kiuj kredas kaj scias la veron... ĉar ĉiu kreitaĵo de Dio estas bona, kaj nenio devas esti forĵetita, se oni ĝin ricevas kun dankesprimo" (1Tim 4:3,4).

## 9.6 SABATO

Unu el la plej disvastigitaj heredaĵoj, kiuj eniris en kristanismon el la leĝo de Moseo, estas observo de la sabata tago. Iuj grupoj postulas, ke ni observu la judan sabaton same, kiel difinas la leĝo de Moseo. Multaj aliaj opinias, ke kristanoj devas uzi iun specialan tagon de semajno por diservo, kaj plej ofte elektas dimanĉon. Por klarigi tion necesas rememorigi, ke sabato estas la lasta tago de la semajno, kaj Dio ripozis en la sepa tago post la kreado dum ses tagoj (El 20:10,11). Dimanĉo estas la unua tago de la semajno, kaj estus nekorekte observi ĝin kiel sabaton. La sabatoj estis "signo inter Mi (Dio) kaj ili (Izrael), por ke ili sciu, ke Mi, la Eternulo, ilin sanktigis" (Jeĥ 20:12). Kiel tia, ĝi neniam estis deviga por paganoj (por nejudoj).

Ni jam scias, ke Kristo per sia morto sur la kruco nuligis la leĝon de Moseo, kaj nun ne necesas observi sabaton aŭ iun alian tagon, ekzemple, la tagon de la morto de Kristo (Kol 2:14-17). Kelkaj fruaj kristanoj returniĝis al parta observado de la sabato, kaj tion Paŭlo priskribis, kiel returnon "al la malfortaj kaj mizeraj elementoj, al kiuj vi deziras denove sklaviĝi? Vi observas tagojn (sabaton) kaj monatojn kaj tempon kaj jarojn (t. e. la judajn festojn). Mi timas pri vi, ke eble mi vane laboris ĉe vi" (Gal 4:9-11). Tio estas grava rememorigo al tiuj, kiuj intencas observi sabaton por ricevi savon. Tute klaras, ke observado de la sabato ne rilatas al savo: "Unu juĝas unu tagon pli alte ol alian, alia egale juĝas ĉiun tagon. Ĉiu homo konvinkiĝu en sia menso. Kiu observas la tagon, tiu observas ĝin al la Sinjoro; ... kaj la nemanĝanto nemanĝas al la Sinjoro" (Rom 14:5,6).

Pro tio estas kompreneble, kial ni ne renkontas iujn ajn priskribojn, ke la fruaj kristanoj observis sabaton. Estas priskribo, ke ili kunvenis "en la unua tago (t. e. en dimanĉo) de la semajno: "Kaj en la unua tago de semajno, kiam ni kunvenis, por dispecigi panon..." (Ag 20:7). Tiuj kunvenoj iĝis kutimaj, kaj Paŭlo konsilis al la kredantoj de Korint okazigi la monkolekton en la unua tago de semajno (1 Kor 16:2) t. e. en tagoj de iliaj regulaj kunvenoj. Al tio necesas aldoni, ke ĉiuj kredantoj estas priskribitaj kiel pastroj (1 Pet 2:9), kiuj estis ne devigitaj observi sabaton (Mat 12:5).

Se ni volas observi la sabaton, ni devas tion fari ĝuste. Ni jam antaŭe montris, ke parta observo de la leĝo alportas nur kondamnon (Gal 3:10; Jak 2:10). Savo estas atingebla per observo de la leĝo de Kristo, ne tiu de Moseo. La Izraelidoj devis ne fari ian laboron dum sabato: "Ĉiu, kiu faros en ĝi laboron, estu mortigita". Al ili estis ordonite: "Ne bruligu fajron en ĉiuj viaj loĝejoj en la tago sabata", pro tio ili ne povis prepari por si manĝajon en sabato (El 35:2,3; 16:23). Homo, kiu estis trovita, kiam li kolektis lignon en sabata tago, verŝajne, por bruligi fajron, estis mortigita per ŝtonoj pro lia malobeo al la leĝo (Nom 15:32-36).

Sekve, tiuj eklezioj, kiuj predikas observon de la sabato, devas ankaŭ puni per morto siajn membrojn, kiuj rompas la leĝon. Ili ankaŭ devas ne prepari manĝaĵon aŭ bruligi iun ajn fajron, konduki aŭton, uzi hejtilon kaj tiel plu. Ortodoksaj judoj nuntempe montras ekzemplom de tiuspeca konduto: ili penas resti interne de loĝejoj dum la tuta tago, elirante nur por relegiaj kunvenoj, ne preparas manĝaĵon, ne kondukas aŭton kaj tiel plu.

Ofte oni asertas, ke observo de la sabato estas unu el dek ordonoj, donitaj al Moseo, kaj kvankam la leĝo de Moseo ne validas plu, sed la devo observi la dek ordonojn restas valida. Adventistoj de la Sepa Tago distingas "moralan leĝon kaj tiel nomatan "ceremonian leĝon", forigita per Kristo. La Skribo ne instruas pri tiuspeca distingo. Pli frue ni jam vidis, ke la Malnova Interligo, al kiu apartenas la leĝo de Moseo, estas anstataŭigita sur la kruco per la Nova Interligo. Sed la dek ordonoj, inkluzive ankaŭ de la ordono pri observo de la sabato, estas parto de la Malnova Interligo, sekve, ni povas diri, ke ankaŭ ili estis forigitaj per Kristo:

- Dio "sciigis al vi (al Izrael) Sian interligon, kiun Li ordonis al vi plenumi, la dek ordonojn; kaj Li skribis ilin sur du ŝtonaj tabeloj" (Read 4:13).

Denove indas noti, ke tiuj dek ordonoj estis donitaj de Dio al la Izraelidoj, ne al alinacianoj de nunaj tagoj.

- Moseo ascendis la monton Ĥoreb por ricevi la ŝtonajn tabelojn, sur kiuj estis skribitaj la dek ordonoj. Moseo poste komentis tion: "La Eternulo, nia Dio, faris kun ni interligon sur Ĥoreb" (Read 5:2), t. e. pere de tiuj dek ordonoj.

- “Kaj li (Moseo) skribis sur la tabeloj la vortojn de la interligo, la dek ordonoj” (El 34:28). Tiuj ĉi ordonoj enhavas detalojn de la tiel nomata “rita leĝo”. Se ni insistos pri observo de la interligo, indikita en la dek ordonoj, ni devas observi ĉiun detalon de la tuta leĝo, ĉar ili estas partoj de la sama interligo. Sendube, tion fari por ni estas ne eble.

- Heb 9:4 diras pri “la tabeloj de la interligo”. Sur la ŝtonaj tabeloj estis skribitaj dek ordonoj, kiujn enhavis “la (malnova) interligo”.

- Paûlo nomas tiun interligon “enĉizita sur ŝtonoj”, t. e. sur la ŝtonaj tabeloj, kaj diris pri ili: “la administrado mortigita... la administrado de kondamno... kio forpasas” (2 Kor 3:7-11).

- Kristo elviŝis “la dekreton kontraû ni en ordonoj skribitan” (Kol 2:14) sur la kruco. Tio rilatas al la skribaĵoj sur la ŝtonaj tabeloj. Kaj Paûlo, parolante pri la leĝo, mortinta pro “malnoveco de litero” (Rom 7:6), verŝajne, aludas al la literoj de la dek ordonoj, skribitaj sur la ŝtonaj tabeloj.

El ĉio supredirita ni vidas, ke la dek ordonoj estis parto de la tuta leĝo, kaj ili, same kiel la tuta leĝo, estis forigitaj per la nova interligo.

Tamen necesas rimarki, ke naû el la dek ordonoj estis restarigitaj en la Nova Testamento. Nombrojn 3,5,6,7,8, kaj 9 oni povas trovi en 1 Tim 1, kaj nombrojn 1,2,10 – en 1 Kor 5. Sed la kvara ordono, kiu rilatas al la sabato, nenie estas menciita en la Nova Testamento, sekve, tiu ordono ne estas deviga por ni.

Jen estas la listo da versoj, kie oni povas trovi naû ordonojn, restarigitajn en la Nova Testamento:

1-a ordono: Ef 4:6; 1 Joh 5:21; Mt 4:10
2-a ordono: 1 Kor 10:14; Rom 1:25
3-a ordono: Jak 5:12; Mt 5:34,35
5-a ordono: Ef 6:1,2; Kol 3:20
6-a ordono: 1 Joh 3:15; Mt 5:21
7-a ordono: Heb 13:4; Mt 5:27,28
8-a ordono: Rom 2:21; Ef 4:28
9-a ordono: Kol 3:9; Ef 4:25; 2 Tim 3:3
10-a ordono: Ef 5:3; Kol 3:5

**KOMENTO 28: La Krucifikso**

En kristanismo estas disvastigita la ideo, ke Jesuo Kristo estis mortigita sur kruco. Tamen la greka vorto “staûros”, kutime tradukita kiel “kruco” en la Biblio, fakte signifas “fosto” aû “stango”. Reale do, la krucifikso, verŝajne, havas paganan divenon. Estas konvene, ke Kristo mortis kun la brakoj levitaj super la kapo, ne etenditaj flanken, kiel sur kruco. Levitaj brakoj estas simbolo de konfirmo de la Diaj promesoj (Jeĥ 20:5,6,15; 36:7; 47:14) kaj de preĝo (Ploro 2:19; 1Tim 2:8; 1 Kron 6:12,13; Ps 28:2), kiun Kristo arde faris dum la krucumo (Heb 5:7). Li diris, ke kiel la bronza serpento estis levita sur *stangon* en la dezerto, tiel same li estos publike levita. Tiele, li asociis la “krucon” kun la “*stango*” (Joh 3:14).

La Roma-katolika eklezio donas grandan mistikan signifon al la kruco. Tamen tio ne trovas subtenon en la Biblio. La kruco fariĝis talismano, materiala simbolo por homoj, kiuj opinias, ke se ili havas kruceton surbruste aû krucsignas sin, ili iĝas pli proksime al Dio. Sed tio estas nur simboloj; la reala potenco de la kruco estas en tio, ke ni per kredo kaj baptiĝo asocias nin kun la morto de Kristo.

**KOMENTO 29: “Ĉu Jesuo Naskiĝis La 25-an De Decembro?**

Alia grava eraro de populara kristanismo koncernas la naskiĝtagon de Jesuo. La paŝtistoj dormis en la kampo kun siaj gregoj dum tiu momento, kiam naskiĝis Kristo (Lk 2:8), sed ili ne povis dormi tie vintre. Kristo vivis dum 33,5 jaroj kaj mortis dum la festo de Pasko. Sekve, li devis naskiĝi ĉirkaû ses monatoj antaû Pasko, t. e. en septembro-oktobro. En antaûkristana Eûropo, la 25-an de decembro estis la dato de pagana festo. En La Agoj de la apostoloj estas dirite, ke la fruaj kristanoj de la unua jarcento estis severe persekutataj pro sia kredo. Kaj la apostoloj multfoje avertis la kredantojn, ke pro persekutoj multaj kristanoj adoptos paganajn kredojn, por ke ilia religio ne tiom akre kontrastu al la pagana (ekzemple, Ag 20:30; 1 Joh 2:18; 2 Fes 2:3; 2 Pet 2:1-3). Kaj tio, ke la dato estis adoptita kiel kristana festo, estas esprimplena ekzemplo de tio. Ornamitaj kristnaskarboj devenas de antikvaj paganaj kutimoj, praktikitaj la 25-an de decembro.

El tio sekvas, ke veraj kristanoj ne devas celebri la naskiĝtagon de Kristo la 25-an de decembro. Sed praktike, veraj kredantoj uzos donitajn festajn tagojn, ekzemple, Kristnaskon, por renkontiĝi kun gefratoj en Kristo.

**ĈAPITRO 9: Demandoj**

1. Kial nia savo devenas de la morto de Kristo, ne de la morto de iu ajn alia homo?

2. Kial la bestaj oferdonoj ne sufiĉis por la pardono de niaj pekoj?

3. En sia morto, ĉu Jesuo estis nia reprezentanto aŭ nia anstataŭanto?

4. Kiuj el la sekvaj asertoj estas veraj?
a) Kristo mortis anstataŭ ni
b) Kristo reprezentis nin, sekve Dio povas pardoni nin pro li
c) Kristo estis simila al ni, sed li ne reprezentis nin
d) La morto de Kristo signifas, ke Dio ne plu kulpigos homojn pro peko.

5. Ĉu akiris Jesuo iun profiton el sia propra morto?

6. Kiam Kristo mortis sur la kruco, ĉu li
a) Foigis la pli malgravajn ordonojn de la leĝo de Moseo, sed ne la dek ordonojn?
b) Forigis la tutan leĝon de Moseo, inkluzive de la dek ordonoj
c) Forigis la leĝon de Moseo krom la judaj festoj
d) Ne iel influis al la leĝo de Moseo?

7. Ĉu devas ni observi la sabaton nun?

8. Donu kialojn pri via respondo al demando 7.

## ĈAPITRO 10

# BAPTIĜO AL JESUO

### 10.1 **LA VIVGRAVA BEZONO DE BAPTIĜO**

En niaj antaûaj lecionoj jam kelkfoje estis menciita la vivgrava bezono de baptiĝo, ĉar ĝi estas la unua paŝo de obeo al la mesaĝo de la Evengelio. Heb 6:2 diras pri baptiĝo, kiel pri unu el la plej gravaj doktrinoj. Ni intence iom prokrastis la studon pri tiu doktrino, ĉar vera baptiĝo devas veni de vera kompreno de la Evangelio. Nun ni jam atingis la necesan gradon de scio, kaj se vi volas akiri la veran grandan esperon, kiun la Biblio donas per Jesuo Kristo, vi absolute bezonas baptiĝon.

"El la Judoj estas savo" (Joh 4:22) en tiu senco, ke la promesoj pri savo estis donitaj nur al Abraham kaj lia semo. Tiuj promesoj povas esti niaj, se ni aliĝas _al_ la semo de Abraham, baptiĝinte _al_ Kristo (Gal 3:22-29).

Jesuo klare diris al siaj disĉiploj: "Iru en la tutan mondon kaj prediku la evangelion (kiu estis promesita al Abraham - Gal 3:8) al ĉiu kreitaĵo. Kiu kredos _kaj_ estos baptita, tiu estos savita" (Mk 16:15,16). Tio klare indikas, ke por havi savon, ne sufiĉas nur kredi, ankaû necesas baptiĝi. Kompreneble, baptiĝo mem ne donos savon al ni, sed ĝi estas la unua paŝo al obeema al la Vorto de Dio vivo. Jesuo emfazis tion: "Vere, vere, mi diras al vi: Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio" (Joh 3:5).

Ankaû tiun ĉi naskiĝon el akvo ne sufiĉas, necesas ankoraû naskiĝo "el la Spirito", t. e. "el nepereema (semo), per la vorto de Dio, vivanta kaj restanta" (1 Pet 1:23). Tiele, ĉiame sekvante al la Vorto de Dio, ni renaskiĝas el la Spirito (vidu 2.2).

Ni baptiĝis _al_ Kristo, _en_ lian nomon (Ag 19:5; 8:16; Mt 28:19). Rimarku, ke ni baptiĝas al Kristo, ne al la kristadelfianoj aû al iu alia homa organizaĵo. Sen baptiĝo ni ne estas "en Kristo" kaj, sekve, ne estas kovritaj per liaj agoj (Ag 4:12). Petro komparas la arkeon de Noa kun Kristo, montrante, ke kiel la arkeo savis Noan kaj lian familion de la juĝo, tiel ankaû baptiĝo al Kristo savos kredantojn de eterna morto (1 Pet 3:21). Noa, eniranta en la arkeon, simbolas nian baptiĝon en la nomon de Kristo. Ĉiuj tiuj, kiuj estis ekster de la arkeo,

pereis pro la diluvo. Nek amikaj interrilatoj kun Noa, nek tio, ke ili troviĝis apude de la arkeo povis savi ilin. La sola vojo al savo estas kaj estis – esti interne de la Krist/arkeo. Estas evidente, ke la dua alveno, kiun la diluvo tipigis (Lk 17:26,27), okazos jam baldaŭ (vidu Suplementon 3). Sekve, eniro en la Krist/arkeon per baptiĝo estas urĝe necesa. Homaj vortoj ne povas en deca grado esprimi sencon de tia urĝeco; la biblia ekzemplo pri la eniro en la arkeon dum la tempo de Noa estas pli efika.

La fruaj kristanoj, obeante al la indiko de Kristo, iris tra la mondo, predikante la Evangelion kaj baptante. Pri tio rakontas la libro de Agoj. Tiu fakto, kiel *rapide* post akcepto de la Evangelio homoj baptiĝis, pruvas la vivgravan necesecon de baptiĝo (ekzemple, Ag 8:12; 36:39; 9:18; 10:47; 16:15). Tiu emfazo iĝas komprenebla, se ni akceptas, ke sen baptiĝo nia studo de la Evangelio estas senutila; baptiĝo estas la unua paŝo laŭ la vojo al savo. La inspirita de Dio Skribo speciale emfazas tiun fakton, ke malgraŭ diversaj malfacilaĵoj, homoj kun helpo de Dio, finfine superas ĉiujn obstaklojn kaj plenumas sian deziron baptiĝi.

La forta tertremo, kiu detruis la malliberejon en Filipi, ŝanĝis la vivon de la malliberejestro. Ĉe la arestitoj tiam aperis ebleco eskapi kaj tio endanĝerigus la vivon de la malliberejestro. Anstataŭ forkuri, Paŭlo kaj Silas predikis la Evangelion kaj la malliberejestro ekkredis kaj "li baptiĝis senprokraste" (Ag 16:33). Se iu havis validan kaŭzon por prokrasti baptiĝon, li estis tiu, ĉar tiam okazis la plej forta tertremo en Grekio dum la lastaj 3000 jaroj. Hordo da arestitoj estis preta liberiĝi el karceroj kaj danĝero de mortpuno minacis al la vivo de la malliberejestro. Sed li klare vidis, kiun gravan aferon necesas fari por eterna vivo kaj eterna sorto. Kaj ignorante ĉiujn urĝajn problemojn (t. e. tertremon), ĉiujn malfacilaĵojn de sia ĉiutaga servado, superante fortan nervan konsternon, li estigis sian baptiĝon. Multajn homojn povas inspiri tiu ĉi ekzemplo por esti baptitaj. Necesas rimarki, ke tioma kredo venas de scio, kaj plej verŝajne li jam aŭdis pri la Evangelio, ĉar "la fido venas do per aŭdado, kaj aŭdado per la vorto de Kristo (Rom 10:17, kmp. 17:11).

Ag 8:26-40 rakontas pri etiopa oficisto, kiu studis la Biblion dum sia vojaĝo en la ĉaro tra la dezerto. Li renkontis Filipon, kiu detale klarigis al li la Evangelion, inkluzive la postulon pri baptiĝo. Ŝajnas, ke estas neeble okazigi baptiĝon en dezerto, sed Dio ordonas nenion, kion oni ne povas plenumi. "Kaj dum ili iris sur la vojo, ili alvenis al iu akvo", t. e. al la oazo, kie estis eble baptiĝi (Ag 8:36). Tiu ĉi epizodo pruvas, ke Dio ĉiam donos eblecon por plenumi Liajn ordonojn.

La apostolo Paŭlo ricevis de Kristo draman vizion, kiu tiel efikis al lia konscio, ke li senprokraste "leviĝis kaj baptiĝis" (Ag 9:18). Povas esti, ke li havis tenton prokrasti la baptiĝon, memorante pri sia alta socia stato, pri sia kariero. Sed Paŭlo, tiu ĉi leviĝanta stelo de la juda mondo, akceptis ĝustan

decidon baptiĝi tuj, kaj malkaŝe malkonfesis sian antaŭan vivmanieron. Pli poste li diris pri sia decido esti baptita: "Sed kio estis al mi gajno, tion mi rigardis kiel malgajnon pro Kristo. Kaj efektive mi rigardis ĉion kiel malgajnon pro la supereco de la scio de Kristo Jesuo, mia Sinjoro... forgesante tion, kio estas malantaŭe, kaj strebante al tio, kio estas antaŭe, mi min pelas al la celo, por akiri la premion de la supera voko de Dio en Kristo Jesuo (Fil 3:7,8,13,14).

Tio estas la lingvo de atleto, kiu strebas antaŭen por disŝiri la finan rubandon. Tiu spirita kaj korpa streĉo por atingi finan celon, devas karakterizi nian vivon post baptiĝo. Necesas kompreni, ke baptiĝo estas ne nur ŝanĝo de kredo aŭ eklezio, ne inerta kuniĝo al iuj malklaraj kristanaj principoj, sed la komenco de la vojo, kiu kondukas al la Regno de Dio. Ĝi kunigas nin en nia menso al la morto de Kristo sur la kruco kaj lia releviĝo (Rom 6:3-5).

Paŭlo, jam lacigita, nejuna, sed spirite triumfanta homo, diris: "Mi ne iĝis malobeema al la ĉiela vizio" (Ag 26:19). Kio estis vero por Paŭlo, tio estas vero ankaŭ por ĉiuj, kiuj estas konvene baptitaj; baptiĝo estas tiu evento, pri kiu oni neniam bedaŭros. Dum la tuta nia vivo ni konscios, ke ni faris ĝustan elekton, kion ni ne povas diri pri multaj decidoj, akceptitaj dum nia vivo. Kaj pro tio seriozan respondon postulas la demando: 'Kio malhelpas al mi esti baptitaj?"

## 10.2 **RITO DE BAPTO**

Ekzistas disvastigita opinio, ke bapton oni povas plenumi, aspergante per akvo la frunton de baptatan, precipe rilate al beboj. Sed tio akre kontrastas al la biblia postulato pri bapto.

La greka vorto, tradukita kiel "bapto" *ne* signifas aspergi; ĝi signifas plenan enakviĝon. Tiu vorto estis uzata en la klasika greka lingvo rilate al dronanta ŝipo, kiu malaperas sub la akvon. Tio rilatas ankaŭ al tolaĵo, kiun oni rekolorigas, mergante ĝin en farbsolvaĵon. Tolaĵo devas esti plene dronigita en likvaĵo, kompreneble, aspergon ne sufiĉas en tiu faro. Do, subakvigo estas la ĝusta formo de bapto, kion konfirmas la sekvaj versoj:

- "Johano ankaŭ baptadis en Enon, proksime de Salim, ĉar estis tie multe da akvoj; kaj oni alvenis kaj estis baptitaj" (Joh 3:23). El tio sekvas, ke por bapto necesas "multe da akvo". Por tion plenumi per kelkguta aspergo, nur unu sitelo da akvo sufiĉus por cent homoj. Homoj alvenis al tiu loko surborde de la rivero Jordan por baptiĝi, sed Johano ne iradis ĉirkaŭ ili kun botelo da akvo.

- Ankaŭ Jesuo estis baptita per Johano en la rivero Jordan: "Kaj Jesuo, baptite, supreniris tuj el la akvo" (Mk 3:13-16). Certe, la baptiĝo de Jesuo okazis per subakvigo, ĉar li "supreniris *el* la akvo" post baptiĝo. Unu el la kaŭzoj, kial Jesuo estis baptita, estis doni al homoj la ekzemplon de Jesuo, por

ke neniu povu sekvi Jesuon, ne kopiante lian ekzemplon de baptiĝo per plena subakviĝo.

- Simile al tio, Filipo kaj la etiopa eûnuko "ambaû malsupreniris *en* la akvon... kaj li baptis lin. Kaj kiam ili supreniris *el* la akvo..." (Ag 8:38,39). Rimarku, ke la eûnako petis pri la bapto, kiam li ekvidis la oazon: "Jen estas akvo; kio malhelpas min baptiĝi?" (Ag 8:36). Estas tute kompreneble, ke homo vojaĝanta tra la dezerto, certe, kunhavis iun kvanton da akvo, ekzemple, en botelo. Se estus eble bapti per aspergo, ili ne bezonus la oazon.

- Bapton oni komparas kun enterigo (Kol 2:12) de homo, sed oni enterigas ja tutan homan korpon.

- Baptiĝon oni nomas "forlavo de pekoj" (Ag 22:16). Fakta enakviĝo estas komparata kun lavo en Tit 3:5; Heb 10:22 kaj tiel plu. La vorto "lavo" pli konvenas por baptiĝo, ol "aspergo".

La Malnova Testamento enhavas kelkajn indikojn, ke akceptebla alproksimiĝo al Dio devas sekvi sinlavon iumaniere.

La ĉefpastroj antaû Diservo devis lavadi sin en "lavujo" (Lev 8:6; El 40:32; 40:30). Ankaû ĉiuj Izraelidoj devis lavi sin per akvo, se ili havis iujn ajn malpurajn okazintaĵojn (ekzemple, Read 23:11), kiuj reprezentas pekojn.

Homo, nomita Naaman, estis leprulo kaj serĉis resanigon de Dio de Izrael. Per si mem li reprezentis pekan homon, kondamnitan al morto pro siaj pekoj. Li resaniĝis post kiam li enakviĝis en la riveron Jordan. Naaman trovis tiun resanigan ceremonion ne akceptebla; li pensis, ke Dio postulos de li iun eksterordinaran agon, aû almenaû, enakviĝon en la akvon de iu granda kaj fama rivero, ekzemple, Amana, sed anstataû tio lin resanigis la akvo de la rivereto Jordan. Simile al tio, por ni estas malfacile kredi, ke tiu simpla ago, kiel enakviĝo, rezultigos nian savon. Pli facile estas opinii, ke niaj propraj agoj kaj publika kunligo kun iu vaste fama eklezio (komparu kun la rivero Amana) povas savi nin, ne nia kunligo kun la vera espero de Izrael. Post enakviĝo en Jordanon la korpo de Naaman "resaniĝis kiel la korpo de malgranda infano, kaj li fariĝis pura" (2 Reĝ 5:9-14).

Nun, post ellerno de la baza mesaĝo de la Evangelio, estas tute kompreneble, ke baptiĝo signifas plenan subakviĝon. En la Biblio troviĝas nenia difino, pri la stato de tiu, kiu efektive baptas. Teorie, homo, kiu komprenas kaj akceptas la Evangelion, povas bapti sin mem. Tamen pro tio, ke bapto estas valida nur post akcepto de ĝustaj doktrinoj, estas dezirinde, ke alia vera kredanto ekzamenu la nivelon de scio de la baptoto antaû lia subakviĝo.

Ĉuste pro tio ĉe kristadelfianoj estas tradicio efektivigi intiman konversacion kun ĉiu kandidato al baptiĝo antaŭ lia subakviĝo. Demandoj, kiuj povas esti bazaj por tiu konversacio, troviĝas en la fino de ĉiu ĉapitro de tiu ĉi libro. Kristadelfianoj estas pretaj traveturi mil kilometran vojon por helpi baptiĝi eĉ nur al unu persono. Ni sincere ĝojas, kiam ankoraŭ unu homo ricevas la veran esperon pri eterna vivo, kaj ne celas ekhavi kiel eble plej multe da konvertitoj. Kvalito por ni pli gravas, ol kvanto.

### 10.3 LA SIGNIFO DE BAPTIĜO

Subakvigo dum bapto simbolas nian iron en la tombon kaj kunigon kun la morto de Kristo. Per tio ni montras la morton de nia antaŭa vivo en peko kaj profaneco. Eliro el la akvo kunigas nin kun la resurekto de Kristo kaj donas al ni la esperon pri reviviĝo por eterna vivo ĉe lia reveno, sed tio ankaŭ devigas nin havi novan vivmanieron, spirite superantan pekon pro la venko de Kristo, kiun li atingis per sia morto kaj reviviĝo.

"Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj, kiuj baptiĝis al Jesuo Kristo, baptiĝis al lia morto? Ni do estas entombigitaj kun li per bapto al morto, por ke, kiel Kristo estas levita el la mortintoj per la gloro de la Patro, tiel same ni ankaŭ iradu en noveco de vivo. Ĉar se ni jam kuniĝis al la simileco de lia morto (per baptiĝo), ni tiel same kuniĝos al la simileco de lia releviĝo" (Rom 6:3-5).

Pro tio, ke savo estas ebla nur per la morto de Kristo kaj lia releviĝo, ni bezonas aliĝi al tiuj eventoj por nia persona savo. La simbolaj morto kaj reviviĝo kun Kristo, kiujn donas baptiĝo, estas la sola vojo al tio. Necesas rimarki, ke aspergo ne donas plenan reprezenton pri la senco de tiu simbolo. Dum baptiĝo "nia malnova homo (antaŭa vivmaniero) estas kun li (Kristo) krucimita" (Rom 6:6); Dio "nin vivigis en Kristo" dum baptiĝo (Ef 2:5). Sed ni kaj post baptiĝo ankoraŭ havas la homan naturon, kaj tial la malnova karna vivmaniero de tempo al tempo evidentiĝas. La "krucumo" de nia korpo estos ĉiama procezo, kiu nur *komenciĝis* post nia baptiĝo. Ĝuste pro tio Jesuo diris, ke la kredantoj devas preni sian krucon kaj sekvi lin tiel, kvazaŭ ili ĉiutage iras al Golgota (Lk 9:23; 14:27). Ne estas facile vivi vivon de vera krucumiĝo kun Kristo, sed neeldirebla ĝojo kaj konsolo venas al ni de konscio, ke ni estas kunligitaj kun Kristo ankaŭ en lia resurekto.

Kristo faris pacon "per la sango de lia kruco" (Kol 1:20), - pacon "de Dio, kiu superas ĉian intelekton" (Fil 4:7). Rilate al tio Jesuo promesis: "Pacon mi lasas al vi; mian pacon mi donas al vi; ne kiel la mondo donas (pacon), mi donas al vi" (Joh 14:27). Tiu ĉi paco kaj spirita ĝojo superas doloron kaj malfacilaĵojn de vivo kunigita kun la krucumo de Kristo: "Ĉar kiel la suferoj de

Kristo abundas ĉe ni, tiel same abundas ankaŭ per Kristo nia konsolo" (2 Kor 1:5).

De la konscio, ke nia natura "Mi" mortis, kaj Jesuo partoprenas niajn malfacilaĵojn, ni pleniĝas per la ĝoja sento de libereco. La apostolo Paŭlo, havante grandan vivan sperton, povis diri: "Kun Kristo mi krucumiĝis, tamen mi vivas; jam ne mi mem, sed Kristo vivas en mi; kaj tiun vivon, kiun mi vivas en karno, mi vivas en fido al la Filo de Dio" (Gal 2:20).

"Ankaŭ vin nun savas en antitipo, la bapto... per la releviĝo de Jesuo Kristo" (1 Pet 3:21), ĉar nia kunigo kun la releviĝo de Kristo, malfermas al ni vojon al eterna vivo ĉe lia reveno. Kaj nur pro partopreno en tiu ĉi releviĝo ni fine estos savitaj. Jesuo difinis tion per simplaj vortoj: "ĉar mi vivas, tial vi ankaŭ vivos" (Joh 14:19). Ankaŭ Paŭlo diris: "Ni... estas repacigitaj kun Dio per la morto de Lia Filo... ni estos savitaj per lia vivo" (releviĝo, Rom 5:10).

Denove kaj denove estas emfazite, ke se ni estas kunligitaj per baptiĝo kun la suferoj kaj la morto de Kristo, kaj se ni sekvas lin en nia vivo, ni ankaŭ estas kunligitaj kun lia glora releviĝo:

> "Se ni mortis kun li (Kristo), ni ankaŭ vivos kun li; se ni suferas, ni ankaŭ reĝos kun li" (2 Tim 2:11,12).

> "Ĉiam portante en la korpo la mortiĝon de Jesuo, por ke la vivo ankaŭ de Jesuo elmontriĝu en nia korpo... sciante, ke Tiu, kiu levis la Sinjoron Jesuon, levos nin ankaŭ kun Jesuo" (2 Kor 4:10,11,14). Paŭlo ankaŭ partoprenis "liajn (de Kristo) suferojn, konfirmiĝinte al lia morto... por atingi la releviĝon" por eterna vivo (Fil 3:10,11, kmp. Gal 6:14).

## 10.4 BAPTIĜO KAJ SAVO

Baptiĝo kunligas nin kun la morto de Kristo kaj tio signifas, ke ni nur per baptiĝo povas akiri pardonon. Ni "enterigite kun li en bapto, en kiu ankaŭ vi estas kunlevitaj per la fido al la energio de Dio, kiu lin levis el la mortintoj. Kaj vin, kiuj estis malvivaj per viaj eraroj... Li vivigis kun li, pardoninte al ni ĉiujn erarojn" (Kol 2:12,13). Ni "laviĝis... en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo" (1 Kor 6:11), t. e. baptiĝo en la nomo de Kristo estas rimedo por ke niaj pekoj estu forlavitaj, pri tio ni jam menciis en 10.2 (kmp. Ag 22:16).

Nun ni komprenas la respondon de Petro al la demando "Kion ni faru?" (por esti savitaj). Li diris: "Ekpentu, kaj baptiĝu ĉiu el vi en la nomo de Jesuo Kristo <u>*por forigo*</u> de pekoj" (Ag 2:37,38). Baptiĝo en la nomo de Kristo estas <u>*por*</u> pardono de pekoj; sen baptiĝo ne povas esti senkulpigo, kaj nebaptita persono devas ricevi la pagon pro pekoj, nome morton (Rom 6:23). Ne estas iu ajn alia nomo, per kiu ni povus esti savitaj krom la nomo de Kristo (Ag 4:12).

Por saviĝi ni devas esti baptitaj en lia nomo. Tio signifas, ke ne-kristanaj religioj ne havas vojon al savo. Ĉiu vera kredanto ne povas akcepti alian vojon al savo. Se katolikismo aŭ pli disvastigita movado de ekumenismo deklaras alion, tio estas malgaja fakto, montranta ilian rilaton al la Sankta Skribo.

La releviĝo de Kristo al eterna vivo signifas lian personan triumfon super peko. Baptiĝinte, ni kunligas nin al tiu triumfo kaj pro tio ni povas diri, ke kun Kristo ankaŭ ni releviĝos kaj peko ne plu havos potencon super ni, kiel ĝi ne potencas super li. Per baptiĝo ni liberiĝas el peko; "kaj liberinte el peko... peko ne regos vin" post baptiĝo (Rom 6:18,14). Post baptiĝo ni ankoraŭ pekas (1 Joh 1:8,9); se ni returniĝas de la vojo de Kristo, peko denove kaptas nin. Tamen ni havas esperon, ke partopreninte per baptiĝo la morton de Kristo, ni partoprenos lian releviĝon, kiam li revenos.

Nur en la estonteco ni estos liberaj de peko. "Kiu kredos kaj estos baptita, tiu estos savita" (Mk 16:16) ĉe la dua alveno de Kristo. Savo ne okazos tuj post baptiĝo, sed ĝi okazos ĉe la tribunala seĝo, ĉar se ni ricevus savon tuj post baptiĝo, ne necesus atendi la juĝon: nek ni devus morti. "Kiu persistos ĝis la fino, tiu estos savita" (Mt 10:22).

Eĉ post baptiĝo Paŭlo (kaj ĉiuj kristanoj) strebis al savo (Fil 3:10-13; 1 Kor 9:27), dirante pri la <u>*espero*</u> de eterna vivo (Tit 1:2; 3:7; 1 Tes 5:8; Rom 8:24) kaj pri nia <u>*heredo de savo*</u> (Heb 1:14). Ĉe la tribunala seĝo la kredantoj <u>*eniros en*</u> eternan vivon (Mt 25:46). En Rom 13:11 Paŭlo inspire diras, ke post nia baptiĝo ni scios, ke ĉiu tago de nia vivo kaj niaj suferoj proksimigas nin al la dua alveno de Kristo, ke "nun nia savo estas pli proksima, ol kiam ni ekkredis". Sekve, nun ni ne posedas savon, ni estos savitaj, <u>*se*</u> ni havos fortan veran kredon (Heb 3:12-14), <u>*se*</u> ni memoros la bazajn tezojn de la Evangelio (1 Tim 4:16; 1 Kor 15:12), kaj <u>*se*</u> ni kondutos konforme kun nia granda espero (2 Pet 1:10).

La greka vorto, tradukita kiel "savita", kelkfoje uziĝas en la kontinua tempo, tiel montrante, ke savo estas daŭra procezo, kiu okazas interne en ni pro nia daŭra obeemo al la Evangelio. 1 Kor 1:18 nomas la kredulojn "savataj" pro ilia rilato al la Evangelio. Ankaŭ Ag 2:47 kaj 2 Kor 2:15 montras, ke la vorto "savo" havas signifon de longdaŭra procedo. En preterito la sama vorto estas uzata nur se temas pri la granda savo, kiun Kristo ebligis sur la kruco kaj kun kiu ni estas kunigitaj per nia baptiĝo (2 Tim 1:9; Tit 3:5).

Ĉion tion konfirmas la rilato de Dio al la Izraelidoj, kiu estas la bazo de Lia rilato al spiritaj Izraelidoj, t. e. la kredantoj. La Izraelidoj forlasis Egiptujon, kiu reprezentas la mondon de la karno kaj de la falsa religio, kun kiu ni estis kunligitaj antaŭ nia baptiĝo. Ili trairis la Ruĝan maron kaj la Sinajan dezerton al la promesita lando, kie ili establis la Regnon de Dio. Tiu transiro tra la Ruĝa maro reprezentas nian baptiĝon (1 Kor 10:12); la irado en la dezerto reprezentas nian nunan vivon, kaj Kanaan – la Regnon de Dio. Judas 5 diras, ke multe da

nekredantoj pereis dum tiu trairado: “la Sinjoro, savinte popolon el la Egipta lando, poste pereigis la nekredantojn”. La Izraelidoj estis “savitaj” el Egiptujo, kiel ĉiuj baptitaj estas “savitaj” de peko. Se estus eble demandi al unu el tiuj izraelidoj “Ĉu vi estas savitaj?”, li respondus “jes”, sed tio ne signifas, ke li estas *plene* savita.

Kiel la Izraelidoj returniĝis en sia koro al Egiptujo (Ag 7:39), al falsa doktrino, al vivo por favori al la karno, tiel same tiuj, kiuj estis per baptiĝo “savitaj” de peko, povas forfaliĝi de la benita vivo, kiun ili havas. Pri tio mencias Heb 3:12-14; 6:4-6; 10:20-29. La aserto - “Unufoje savita estas savita por ĉiam” - certe, estas agrabla por la oreloj, sed ne havas konfirmon en la Biblio.

Necesas ĝuste kompreni la signifon de baptiĝo por nia savo. Oni devas ne opinii, ke baptiĝo donas *garantion* de nia savo, kvankam, certe, tio estas pli bone, ol ne esti baptita. Baptiĝinte “al Kristo” ni estos savitaj en la estonteco; ni *reale* ricevas *firman* esperon pri aliĝo al la Regno de Dio, se ni daŭrigos nian vivon en Kristo. Post nia baptiĝo ni ricevas esperon, ke ni estos akceptitaj en la Regno de Dio ĉe la reveno de Kristo. Sed ni ne povas havi absolutan certecon pri tio, ĉar eĉ en la lasta tago ni povas forfaliĝi de la vera vojo: ne estas donite al ni scii dum tiu ĉi vivo pri nia estonteco. Ĉiutage ni devas peni plenumi niajn bonajn promesojn, kiujn ni donis al Dio antaŭ nia baptiĝo (1 Pet 3:21).

Kvankam baptiĝo estas vivgrava kondiĉo por nia savo en Jesuo Kristo, ni devas ne opinii, ke per la unu ago de baptiĝo ni estos savitaj. Ni jam montris, ke por nia savo ni devas esti ĉiame kunligitaj kun krucumo de Kristo: ”Se homo ne estas naskita el akvo kaj la Spirito, li ne povas eniri en la regnon de Dio” (Joh 3:5). Komparo de tiu ĉi verso kun 1 Pet 1:23 montras, ke la naskiĝo de la Spirito post baptigo rilatas al nia ĉiama renaskiĝo per la Spirito/Vorto. Savo ne rezultiĝas de baptiĝo sola; ĝi estas la rezulto de la Dia graco (Ef 2:8), kredo (Rom 1:5) kaj espero (Rom 8:24).

Iufoje oni povas ekaŭdi, ke por nia savo necesas nur kredo, kaj akvo de baptiĝo estas nenecesa. Sed Jak 2:17-24 klarigas, ke “fido, ne havante farojn, estas en si mem malviva... homo praviĝas per faroj, kaj ne sole per fido. Iufoje la kredantoj demandas, kion ili devas *fari* por esti savitaj, la respondo ĉiam enhavas la vorton “baptiĝo” (Ag 2:37; 9:6; 10:30). Tiele, la ago de baptiĝo montras nian fidon al la Evangelio de nia savo. La faro pri nia savo estas jam farita de Dio kaj Kristo, sed ni devas fari “farojn indajn je pento” (Ag 26:20, kmp. Mk 16:15,16).

Pli supre ni jam vidis, ke la vortoj pri forlavo de pekoj rilatas al la Dia pardono de niaj pekoj post nia baptiĝo al Kristo. Sed iuj citaĵoj diras, ke niaj pekoj forlaviĝas per nia kredo kaj nia pento (Ag 22:16; Ap 7:19; Jer 4:14; Jes 1:16), kaj aliaj eltiraĵoj diras, ke *Dio* forlavas niajn pekojn (Jeĥ 1:16; Ps 51:2,7; 1 Kor 6:11). Ĉio tio konvinke pruvas, ke se ni konfirmas nian kredon per faro,

t. e. baptiĝo, Dio forlavas niajn pekojn, sekve, per la “faro” de baptiĝo ni ricevas la gracon (nemeritan donacon) de la Dia Evangelio, sendita al ni en Lia Vorto.

**KOMENTO 30: Rebaptiĝo**

Iuj homoj prokrastas sian baptiĝon, klarigante, ke ili jam estas baptitaj per akvaspergo, kiel beboj, aŭ per subakviĝo en alia eklezio. Sed antaŭ baptiĝo ĉiu devas penti kaj havi la veran kredon je la vera Evangelio (Ag 2:38; Mk 16:15,16). Baptiĝo estas valida, se la kredanto ĝuste komprenas tion antaŭ sia subakviĝo. Bebo ne kapablas penti aŭ kompreni la Evangelion kaj ankaŭ akvaspergo ne estas baptiĝo. Naĝanto, saltante en naĝbasenon ankaŭ subakviĝas, sed tio ne estas baptiĝo, ĉar tiu persono mense ne kunligas tion kun la vera Evangelio. Tio ankaŭ rilatas al homoj, kiuj subakviĝas, kredante je falsa doktrino; ili subakviĝis, sed ne baptiĝis.

Estas nur “unu fido”, t. e. tiu doktrino, kiu enhavas la veran Evangelion, kaj, sekve, estas nur unu baptiĝo – baptiĝo post akcepto de tiu sama “unu fido”. “Estas unu korpo, (t. e. unu vera eklezio)... ankaŭ vi estas vokitaj en unu espero de via voko. Unu Sinjoro, unu fido, unu bapto” (Ef 4:4-6). Ne estas du esperoj, kiel iuj opinias, kiuj diras, ke ne gravas, kie ricevi nian rekompencon: sur la tero aŭ en la ĉielo. Estas nur “unu Dio” kaj sekve, Kristo ne estas Dio. Se ĉe nia unua bapto ni ne povis kompreni tiajn bazajn nociojn pri la Regno de Dio, pri la naturo de Dio kaj Jesuo kaj tiel plu, tiu baptiĝo ne estas valida.

Johano la Baptisto baptis homojn, alvokante al pento kaj instruante ilin pri Jesuo (Mk 1:4). Tamen eĉ tio ne sufiĉis por savo. Ag 19:1-5 diras, ke tiuj homoj, kiuj estis baptitaj de Johano, devis baptiĝi denove, ĉar ili havis ne plenan scion pri la vera doktrino. Simile al ili, ni povas opinii, ke post sincera pento kaj baptiĝo, ni komencis novan vivon. Sed por ricevi “veran baptiĝon” necesas “vera kredo”, kiu venas post kompreno de ĉiuj elementoj de la doktrino.

**KOMENTO 31: Kion Necesas Scii Antaŭ Baptiĝo**

Multaj legantoj, verŝajne, jam aŭdis pri la asertoj de tiel nomataj “evangelistoj”, ke por savo ne necesas studi la doktrinon, sufiĉas nur diri “Mi kredas, ke Jesuo estas la Filo de Dio”. Unuavide tio ŝajnas kredebla, ĉar tiuj ĉi vortoj troviĝas en La Agoj, okaze de diversaj konvertiĝoj, kaj ankaŭ ili alvokas al “amo” kaj “toleremo”, kiuj akordiĝas kun la spirito de la nuna tempo. Pli sube estas donita pli detala analizo de la signifo de doktrino.

**Kial Tiel Rapide?**

Supraĵa tralego de La Agoj povas doni la impreson, ke homoj antaŭ baptiĝo ricevis nur kurtan predikon, pri la bazaj tezoj de la Evangelio, kaj ke por esti baptitaj, sufiĉis nur konfesi, ke Jesuo estas la filo de Dio. Sed, por ricevi savon, ne sufiĉas nur simple prononci la vortojn "Mi kredas je Kristo", aŭ simile. Ankoraŭ necesas kompreno pri la senco de la eldiritaj vortoj, por kio necesas pli vasta scio pri la Sanktaj Skriboj. La sekvaj linioj konfirmas, faritan de ni konkludon:

- "Ĉio skribita en La Agoj, kaj ankaŭ en la tuta Skribo, estas skribita tre koncize. Estas interese noti la tempon, necesan por laŭtlegi iujn citaĵojn el La Agoj. Memkompreneble, en realaj kondiĉoj, por eldiri kelkajn el la paroladoj raportitaj en La Agoj, necesis pli da tempo. Jen kelkaj ekzemploj:

La paroladon de Paŭlo en Jerusalem oni povas tralegi dum kvar minutoj (Ag 22); la paroladon al Felikso – dum unu minuto; al Agripa – kvar minutoj; la paroladon de Petro en la tago de Pentekosto oni povas tralegi dum kvar minutoj; al Kornelio – tri minutoj; la paroladon de Jesuo post la satigo de 5000 homoj – ses minutoj; la surmontan predikon – 18 minutoj. Por laŭtlegi la predikon de Petro en Ag 3:12-26 necesas proksimume du minutoj, sed reale ĝi daŭris sufiĉe longe, por ke eldiritaj frazoj atingu orelojn de ĉiuj homoj, la ĉefpastroj, la kapitano de la templo kaj sadukeoj (Ag 4:1), kaj ili povis veni al la scenejo.

Tiu fakto, ke la Biblio ne diras pri plilongtempa prediko al kandidatoj por baptiĝi, ne signifas, ke tio ne okazadis.

- Krom tio, tiutempaj predikantoj posedis miraklajn donacojn kaj povis kompreni la pensojn de la homoj, al kiuj ili predikis, kaj pro tio plena doktrina ekzameno, kiun ni bezonas nun, tiam estis superflua.

- La multnombra baptiĝo de judoj en Jerusalemo en la komenco de kristanismo estis okazo speciala. Forestas iuj ajn atestoj, ke tiu ĉi metodo de bapto de grandkvanta homamaso ie kvankam unufoje estis ripetita dum la unua jarcento. Se similaj baptoj daŭrus plu, la tuta loĝantaro de Jerusalemo fariĝus kristanoj dum kelkaj jaroj. Necesas memori, ke tiuj unuaj baptiĝantoj, estante hebreoj, havis vastajn sciojn pri la Malnova Testamento kaj la vojoj de Dio. La enhavo de la mesaĝo de Paŭlo al la Hebreoj kaj la mesaĝoj de Petro (ankaŭ adresitaj al hebreoj) montras, ke legantoj de ili havis bonan scion pri la Malnova Testamento, kaj scipovis kompreni citaĵojn el ĝi. Verŝajne, tiuj ĉi leteroj estis adresitaj antaŭ ĉio al la jerusalema eklezio, plimultaj personoj de kiu estis baptitaj dum la unuaj tagoj, priskribitaj en la komenco de La Agoj.

- Ni esperas montri, ke predikado de la nomo de Kristo kaj konfesio, kiel tion priskribas La Agoj, estas ekvivalenta al detala komprenado pri doktrino.

- El 1 Kor 1:17 ni vidas, ke Paûlo kaj aliaj apostoloj agis kune kun grupo da aktivaj adeptoj, al kiuj ili donis rajton prediki kaj bapti. Sekve, li mem povis ne resti longtempe en tiu loko, kie predikis liaj helpantoj.

**La Nomo De Jesuo**

La Nomo de Dio enhavas multe da instruoj pri Li kaj Liaj vojoj, ĉar ĉiuj Liaj nomoj kaj titoloj esprimas Lian karakteron kaj Liajn intencojn. Ankaû la nomo de Jesuo Kristo ne estas nur nomo, sed ankaû estas pli profunda deklaro pri doktrino.

Kredo en la nomo de Jesuo estas kunligita kun baptiĝo (Joh 3:5,18,23). Gal 3:26,27 diras: "Ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo, ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston". Tiun interligon oni povas vidi en Ag 19:4; 10:42,48; 2:37,38; Lk 24:47. Apolos "konis" nur la bapton de Johano (Ag 18:25), kaj tio signifas, ke baptiĝo estas ne nur ago, sed ankaû scio de certa instruo.

"Filipo... proklamis al ili la Kriston" (Ag 8:5), kvazaû li diris "Kredu je Kristo". Sed en Ag 8:12 ni legas: "Kiam ili kredis al Filipo, ***predikanta*** la evangelion pri la regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo, ili ***baptiĝis.*** Nur post predikado sekvis bapto. Sed predikado ne estis nur kelkvorta eldiro. Predikado pri Kristo inkluzivas ankaû doktrinon pri lia instruo kaj bapto. Joh 6:40 diras al ni, ke "estas la volo de mia Patro, ke ĉiu, kiu vidas (komprenas) la Filon kaj kredas al li, havu eternan vivon"; iom pli poste Jesuo diris: "Se iu volas plenumi Lian (de Dio) volon, tiu scios pri la instruado" (Joh 7:17). El tio sekvas, ke scii pri la instruado kaj "vidi" la Filon signifas la samon. La vortoj de Kristo "Vi observis mian vorton kaj ne malkonfesis mian nomon" (Ap 3:8) ankaû montras, ke la vorto de Kristo estas kunligita kun lia nomo. Kristo inspirplene citas el Jes 42:4: "Lian (de Kristo) instruon atendas la insuloj" kaj "al lia nomo esperos nacioj" (Mt 12:22). Denove ni vidas egaligon de lia nomo kun la evangelio pri li. La dua kaj tria epistoloj de Johano diras pri vojaĝantaj predikantoj: "Vi faros bone, tiujn antaûenigante dece je Dio, ĉar pro la Nomo ili eliris" (3 Joh 6,7). Ĉi tie, verŝajne estas subkomprenata la misio de Mark 16:15,16 iri en la tutan mondon kaj prediki la evangelion. Tiele, la nomo de Kristo kaj lia evangelio estas egaligitaj. Laû la biblia vidpunkto "kredi je Jesuo" inkluzivas ankaû baptiĝon: "Ĉar vi ĉiuj per la fido estas filoj de Dio en Kristo Jesuo, ĉar ĉiuj el vi, kiuj al Kristo baptiĝis, surmetis al si Kriston" (Gal 3:26,27). Paûlo diras, ke ilia kredo je Kristo estas procedo de kompreno, kiun

sekvas obeemo, sed ne simpla rapida vorta agnosko: “Mi kredas je Kristo”. Tion konfirmas Joh 6:35: “Kiu venas al mi, tiu neniam malsatos, kaj kiu kredas al mi, tiu neniam soifos”, kiu egaligas kredon al Kristo kaj *alvenon* al li, t. e. procezo de akiro de kredo.

La predikado de “Kristo”, tiele, inkluzivas la serion da bazaj doktrinoj. Lk 9:11 diras, ke Kristo predikis la Evangelion pri la Regno de Dio (kmp. Mt 4:23), kaj Mk 6:34 diras, ke li komencis “instrui al ili multon”. La Evangelio enhavas “multon” (t. e. multe da instruoj), sed ne nur koncizan deklaron pri Kristo, kiun oni povas eldiri dum unu minuto. En Berea, aŭskultante predikojn de Paŭlo, homoj “ĉiutage esploris la Skribojn, por konstati, ĉu tiuj aferoj estas veraj” (t. e. konformas al sinagogaj kopioj de la Malnova Testamento). Konvinkiĝinte, ke la evangelio de Paŭlo estas bazita sur la doktrinoj de la Malnova Testamento, homoj kredis al li (Ag 17:12). Nun ni ofte predikas al homoj, ne havantaj bonan scion pri la Biblio, kaj ne esplorantaj la Biblion post niaj prelegoj, kaj certe, nun necesas pli multe da tempo por ili sciu bazajn doktrinojn de la Biblio, ol bezonis por tio homoj en la unua jarcento. La vortoj “Ĉiu, kiu kredas, ke Jesuo estas la Kristo, naskiĝis el Dio” (1 Joh 5:1) akordas kun la vortoj “Laŭ Sia propa volo Li naskis nin per la vorto de la vero” (Jak 1:18) kaj kun “Renaskite... per la vorto de Dio... Kaj ĉi tiu estas la parolo, kiu estas predikita al vi” (1 Pet 1:23,25).

Ĉio tio montras, ke kredo je tio, ke Kristo estas la Filo de Dio, venas de kompreno de la evangelio pri la vorto de Dio.

### La Reĝo De La Regno

La vortoj pri kredo al Kristo fariĝas pli signifoplena, kiam ni ekkonas el multaj lokoj de la Evangelio, ke la titolo “Kristo” estas sinonimo de la “Regno de Kristo”. Nia Sinjoro diris al la fariseoj, ke ili ne bezonas iradi malproksimen por serĉi Mesion, ĉar li jam staras inter ili. Li diris: ”Jen la regno de Dio estas inter vi” (Lk 17:21), egaligante la “regnon” kaj la “reĝo de la regno”. Tial Johano, predikante, ke la regno de Dio estas apude, aludis al Kristo. La ŝtono, kiu frapis la statuon en la sonĝo de Nebukadnecar (Dan 2:44), estis la ŝtono-Regno, kiu “frakasos kaj detruos ĉiujn regnojn”; tiu ĉi ŝtono estis la Regno antaŭ la frakaso kaj estos la Regno post ĝi. Simile al tio parolas la parabolo de Jeĥezkel pri la delikata branĉeto de cedro, kiu estos plantita sur monto kaj el kiu elkreskos belega cedro. “Kaj loĝos sub ĝi ĉiaspecaj birdoj” (Jeĥ 17:22,23). Tio ĉi rilatas al Kristo. La “delikata branĉeto” estas la Juna branĉeto” el Jes 53:2, kiu elkreskos “el tero senakva”. Ĉi tie ni klare vidas kunligon kun la parabolo de Kristo pri la senapa semeto, kie la Regno de Dio estas komparata kun malgranda semeto, kiu elkreskos kaj fariĝos arbo kun grandaj branĉoj, sub la ombro de kiu povos ekloĝi diversspecaj birdoj. La kunligo inter la vorto

"Regno" kaj la persono de Jesuo montras, ke li mem estis la vivanta vorto pri la Regno. En la lumo de tio iĝas kompreneble, ke kredi je Kristo kaj kredi je la Evangelio pri la Regno de Dio signifas la saman.

**Kio Estas La Evangelio?**

Nun ni aliras al pli detala pridiskuto pri tio, kion inter la kredantoj de la unua jarcento oni konsideris esenca. Necesas rimarki, ke en la tempo de la Nova Testamento jam ekzistis korpo de doktrino, simila al nia "Statuto de kredo". Ankaû necesas memori, ke en tiu tempo estis fratoj, kiuj posedis la donacon profeti, t. e. ili povis en la Spirito antaûdiri tion, kion al ili revelaciis Dio. Estas kaûzo opinii, ke poste kelkaj el tiuj profetaĵoj estis aldonitaj al la baza doktrino.

**Bazo De Doktrino**

Paûlo diris al eklezianoj en Romo: Vi "fariĝis kore obeemaj al tiu tipo de instruado, al kiu vi estas kondukataj" (Rom 6:17) antaû ilia baptiĝo. La greka vorto "tipo" signifas ankaû "modelo", "ekzemplo", kaj rilatas al la vaste uzata sistemo de instruado en tiu tempo. Ke Paûlo aludas al tio, montras la gravecon de iu difinita instruado antaû baptiĝo, kaj la faktom, ke ne sufiĉas nur kelkajn kurtajn konfesojn, ke antaû baptiĝo necesas scii kaj kompreni bazon de instruado. Iuj eklezianoj, "havante ŝajnon de pieco, sed neinte ĝian potencon" (2 Tim 3:5), povis scii kaj sekvi la bazan doktrinon, sed ne povis imagi al si la tutan potencon de la Vero en ilia vivo. Paûlo rememorigas al la galatoj, ke antaû iliaj okuloj "Kristo Jesuo estis publike prezentita krucumita" (Gal 3:1), kaj tiuj vortoj servas kiel instrukcio al kompreno de la doktrino.

Difinante la doktrinon pri la releviĝo, Paûlo skribis: "Mi transdonas al vi... kion mi ankaû ricevis, ke Kristo mortis" (1 Kor 15:3), montrante, ke tion li ricevis kiel revelacion de Dio. Ĉi tie estas ĝusta loko por citi la vortojn el 2 Pet 2:21,22: "Estus por ili pli bone ne ekkoni la vojon de justeco, ol, ekkoninte ĝin, returni sin for de la sankta ordono al ili transdonita... porkino lavita (baptita) (reveninta) al ruliĝado en koto". El tio ni vidas, ke la "vojon de justeco" kaj la "sanktan ordonon" ili ekkonis antaû baptiĝo, kaj ke la "sankta ordono", indikita ĉi tie en singularo, sugestas bazon de instrio, kiun necesas scii kaj kompreni antaû baptiĝo. Estas kelkaj lokoj, kiuj diras pri "ricevo" de instruo pri doktrino kaj "la Evangelio": Gal 1:9,12; Fil 4:9; Kol 2:6; 1 Fes 1:6; 2:13; 4:1. Tio konfirmas, ke "la Evangelio" konsistas el specifaj doktrinoj, kiujn ricevis kaj poste predikis la apostoloj.

**"La Kredo"**

Ankaû Judas 3 diras pri “la kredo, jam per unu fojo transdonita al la sanktuloj”. “La kredo” ĉi tie asocias kun “doktrino”, kiu estis transdonita al ili antaû baptiĝo. Povas esti, en la unua jarcento tiuj vortkombinoj esprimis la samon. La admono de Paûlo “Ni tenu firme la konfesion de nia espero sendekliniĝe” (Heb 10:23) povis esti rememorigo al kredantoj pri la konfesio, pri la espero, kiujn ili ricevis antaû baptiĝo kune kun la doktrino kaj kredo. “Tenanta la fidelan vorton” en Tito 1:9 signifas antaû ĉio sekvi tiun kredaron, kiun ili ricevis dekomence. Kaj tiu doktrino estis komuna por ĉiuj kredantoj, “komuna fido” (Tito 1:4) kaj nur “unu fido” (Ef 4:5). “La fido” kaj la nomo de Kristo estas egaligitaj en Ag 3:16. La nomo de Kristo estas alia titolo de la sama doktrino, de “la fido”. En 1 Tim 6:10 kaj ankaû en 1 Tim 4:1 Paûlo avertas, ke iuj “defalos de la vero”. La unua etapo en tiu apostateco estos diri, ke estas neeble difini “la kredon”.

**Praktikaj Aferoj**

Praktikaj aferoj estis ankaû parto de tiu ĉi doktrino. “La fido al Kristo” inkluzivis rezonadon “pri justeco, sinregado kaj la juĝo estonta” (Ag 24:24,25). Kiel pri la releviĝo, tiel ankaû pri la dispecigo de pano Paûlo diras: “Ĉar mi ricevis de la Sinjoro tion, kion mi ankaû transdonis al vi (1 Kor 11:23). Ŝajnas, ke jam tiam ekzistis regularo pri praktika vivo, kiun pli poste Paûlo inkluzivis en la doktrinon, ekzemple, pri konduto de fratinoj en eklezio: “Vi firme tenas la tradiciojn, ĝuste kiel mi transdonis ilin al vi... Sed mi volas sciigi vin... ke la kapo de virino estas viro” (1 Kor 11:2,3). Tio indikas, ke antaû baptiĝo necesas havi scion pri la doktrino, kiun sekvis la kredantoj en la unua jarcento. Pri la sama tradicio diras ankaû 2 Tes 3:6 kaj 2:15: “Ni ordonas al vi, fratoj, en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo, ke vi vin apartigu for de ĉiu frato, kiu iradas senorde kaj ne laû la tradicio, kiun oni ricevis de ni... Staru firme, kaj tenu la tradiciojn, kiujn vi lernis ĉu per parolo, aû per ia letero nia”. Ĉio tio indikas al urĝa neceso havi antaû baptiĝo scion pri la doktrino, kaj apartiĝo for de tiuj, kiuj ne obeas al ĝi: “Tenanta la fidelan vorton, kiu estas laû la instruado, por ke li povu admoni pri la sama doktrino kaj ankaû refuti la kontraûdirantojn” (Tito 1:9).

Ni scias, ke en la fruaj eklezioj estis “falsaj profetoj”, asertantaj, ke ili ricevis Diajn revelaciojn, koncerne al la doktrino, kiujn necesas aldoni al la akceptita doktrino. Pro tio Paûlo emfazas, ke en la doktrinon indas akcepti kaj enlistigi (1 Tim 1:15; 4:9) nur “la fidelajn vortojn” de inspirita revelacio ( Tito 1:9; 3:8; 2 Tim 2:11; 1Tim 4:9). Ankaû pro tio Johano avertis: “Kredu ne al ĉiu spirito, sed provu la spiritojn, ĉu ili estas el Dio; ĉar multaj falsaj profetoj eliris en la mondon (1 Joh 4:1).

**Specifikaĵoj**

Pli sube sekvas kelkaj klaraj ekzemploj pri doktrinoj, aparte de simpla "kredo al Kristo", kiuj estis instruataj kiel parto de la baza Evangelio, kiun oni devis kompreni antaŭ baptiĝo:

- "Dio juĝos la sekretojn de homoj, laŭ mia evangelio, per Jesuo Kristo" (Rom 2:16). Tial la doktrino pri la tribunala seĝo kaj pri respondeco estas akceptita kiel komenca "elemento". Vidu ankaŭ Ag 24:25; Heb 6:1,2).

- La ideon pri la neceso cirkumcidiĝi por savo Paŭlo nomis "malsama evangelio" (Gal 1:6). Sekve, kompreno pri tio, ke ni ne devas observi la leĝon de Moseo, ekzemple, la Sabaton, estas parto da kompreno pri la vera Evangelio.

- "La Evangelio pri la Regno" estas ne nur evangelio pri Kristo, sed ankaŭ pri la estonta Regno mem; Jes 52:7 (kmp. Rom 10:15) diras pri la predikanto, kiu predikis pri tempo, kiam oni povos diri al Cion: "Reĝas via Dio!", t. e. en la Regno.

- La ĝusta kompreno de la naturo de Kristo estis afero de frateco (2 Joh 7-10), pro tio la Evangelio enhavas multon pri Kristo (Ag 8:12), kaj nur diri, ke ni kredas je Kristo, certe, ne sufiĉas.

- La promesoj pri la Regno estas grava parto de la Evangelio, kiu estis antaŭpredikita al Abraham (Gal 3:8) kaj al la Izraelidoj (Heb 4:2). Tial Paŭlo parolis pri la promesoj, donitaj al David, kiel pri "la vorto de ĉi tiu savo" (Ag 13:23, 26), t. e. la promesoj ankaŭ estis grava parto de tiu evangelio, kiu en tiu tempo estis anoncata antaŭ baptiĝo. Paŭlo predikis pri "la promeso farita al la patroj (Ag 13:32), pri la evangelio de Dio, "kiun Li promesis antaŭe... pri Sia Filo, kiu naskiĝis el la idaro de David laŭ la karno" (Rom 1:1-4).

- Por kompreni la promesojn, necesas kvankam iomete scii la historion de Izrael. Studo de la prediko de Paŭlo en Antioĥia en Ag 13 montras, ke li, dirante pri la historio de Izrael, speciale emfazas la signifon de la promesoj kaj precipe tion, ke ili efektiviĝis en Jesuo. Lia prediko estas bazita sur la historio de Izrael, kaj enhavas averton pri puno por tiuj, kiuj ne akceptos la vorton de lia prediko (Ag 13:40,41). Niaj predikoj devas esti similaj al la lia.

**Konkludoj**

Estas malfacile supertaksi la gravecon de ĉio supredirita. "Atentu legadon... instruadon... Zorgu pri vi mem kaj pri via instruo... ĉar tion farante, vi savos vin mem, kaj tiujn, kiuj vin aŭskultas" (1Tim 4:13-16). La listo da gravaj doktrinoj en Suplemento 1 de tiu ĉi libro ne estas Diinspirita, sed laŭ la opinio de la aŭtoro ĝi enhavas tion, kion necesas scii unuavice pri "la fido". Tiu ĉi ĉapitro montras, ke necesas havi sufiĉan nivelon de scio pri la doktrino, kiun ni akceptas. La enhavo de tiuj ĉi gravaj doktrinoj devas provizi nian instruadon por tiuj, kiuj volas baptiĝi. Kaj estas juste al ili kontroli per diskutekzameno, antaŭ ilia subakviĝo, ke ili plene komprenas tion, pri kio ili estis instruitaj. Ofte la kredantojn dum malfacila por ili tempo oni kuraĝigis al "la fido": "La firma fundamento de Dio staras" (2 Tim 2:19). Nia intima scio pri la unuaj principoj de la doktrino, pri la Diaj intencoj kuraĝigas nin. Nur ĉiama studado kaj predikado povas doni utilon kaj profundan certecon. Kaj tiam, kiel Paŭlo, ni povos diri: "Mi finis la kuradon, mi gardis la fidon... Mi konas tiun, al kiu mi kredis, kaj mi konvinkiĝis, ke li havas la povon gardi mian konfiditaĵon (nian vivon kaj nian ĉion) ĝis tiu tago" (2 Tim 4:7; 1:12).

**Rimarko: Konfeso pri Jesuo Sinjoro**

"Se vi per via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro, kaj kredas en via koro, ke Dio lin levis el la mortintoj, vi saviĝos" (Rom 10:9).

Necesas fari kelkajn notojn:

- Ni jam vidis, ke "La Sinjoro Jesuo" estas, verŝajne, sinonimo por la tuta enhavo de la doktrino pri la Regno de Dio kaj la nomo de Jesuo Kristo, inkluzive baptiĝon (Ag 8:5, kmp. v. 12). La "konfeso", pri kiu diras Paŭlo, povis ja esti ĉe baptiĝo. Ĉi-okaze li, sendube, aludis al Mk 16:16: "Kiu kredos (kmp. "per via buŝo konfesas") kaj estos baptita (kmp. kun la releviĝo el la mortintoj), tiu estos savita".

- Por kompreni la releviĝon de Kristo, necesas scio pri biblia doktrino pri infero kaj la naturo de homo.

- Rom 10:8,9 konformas al v. 13: "Ĉiu, kiu vokos (al si – greka teksto) la nomon de la Eternulo, saviĝos". Paŭlo mem estis baptita, kaj tiel vokis al si la nomon de la Eternulo (Ag 22:16). Nur baptiĝo donas al ni eniron en la nomon de la Patro (Mk 28:19).

- Emfazinte la gravecon de baptiĝo en Rom 6, Paŭlo ne povis instrui, en Rom 10, ke ĝi ne estas necesa por savo.

- Antaû Rom 10:9, en vv. 6-8 li diras: “Ne diru en via koro: Kiu suprenirus en la ĉielon?.. Kiu malsuprenirus en la abismon?.. Sed kion ĝi (Skribo) diras? La afero estas proksime de vi, en via buŝo kaj en via koro; tio estas, la vorto de fido, kiun ni predikas”. Sekve, “la vorto de fido” estis tio, kion oni devis konfesi, kaj konformas al “Jesuon Sinjoro” en v. 9. Ni jam difinis, ke “la fido” signifas la tutan regularon de la doktrino, kiun enhavas la Evangelio. En Read 30:11-14 Paûlo citas: “Ĉar ĉi tiu ordono, kiun mi donas al vi hodiaû... Ne en la ĉielo ĝi estas... Kaj ne trans la maro ĝi estas... Sed tre proksime de vi estas”. Estas evidente, ke la vortoj “ĉi tiu ordono” rilatas al Kristo. Same kiel la antikva Izrael estus benita, se ili observus la ordonojn (Read 30:16), tiel ankaû la nova Izrael estos savita per fido je la vorto pri Kristo. Pro tio perbuŝe konfesi Jesuon Kristo konformas al akcepto de la instruo pri Kristo. “Se vi aûskultos la voĉon de la Eternulo” (Read 30:10) konformas al Rom 10:9: “Se vi per via buŝo konfesas Jesuon Sinjoro”. Tiu ĉi konformeco ankoraûfoje montras, ke la vortoj “la Sinjoro Jesuo” estas titolo, kiu resumas la bazajn doktrinojn pri la vorto de Dio.

**KOMENTO 32: La Krimulo Sur La Kruco**

La krimulo diris: “Jesuo, memoru min, kiam vi venos en vian regnon. Kaj li diris al li: Vere mi diras al vi: Hodiaû vi estos kun mi en Paradizo” (Lk 23:42,43). Tiujn versojn oni uzas por pruvi, ke baptiĝo ne necesas por savo, kaj ke ni post nia morto iras tuj al la ĉielo. Tamen pli atenta tralego de tiu ĉi eltiraĵo malkovras jenan:

1. La indiko baptiĝi en la nomo de Kristo estis donita jam post la releviĝo de Kristo (Mk 16:15,16). La krimulo vivis sub la leĝo de Moseo, kiam Kristo parolis kun li.

2. La vera baptiĝo estas baptiĝo al la morto kaj releviĝo de Jesuo. Sed kiam Kristo respondis al la krimulo, tiam ankoraû okazis nek la morto, nek la releviĝo, kaj baptiĝo en Kristo estis neebla.

3. Baptiĝo simbolas nian morton kun Kristo (Rom 6:3-5). La krimulo estis la sola persono, kiu laûlitere mortis kune kun li.

4. Tute povas esti, ke la krimulo estis unu el tiuj, kiujn baptis Johano la Baptisto. Multaj el la tiam konvertitoj havis antaûe suspektindan vivmanieron (Mt 21:32). Mankas atesto, ke la krimulo ne estis baptita, kaj tial oni ne povas

konkludi, ke baptiĝo ne estas necesa. Aldone al tio, ĉi tiu eltiraĵo diras nenion pri signifo de vortoj "animo" kaj "ĉielo".

5. La krimulo petis Jesuon memori pri li, kiam Jesuo returnos _en_ lian Regnon. Sekve, la krimulo sciis pri la Evangelio kaj pri la Regno de Dio, kiun predikis Jesuo (Mt 4:23). Li sciis, ke venos juĝa tago ĉe la establigo de tiu Regno, kaj ke Jesuo releviĝos el la mortintoj kaj juĝos en la tago de juĝo, kaj pro tio li petis Jesuon ekmemori pri li.

6. Jesuo respondis, ke la krimulo _estos_ kun li en "Paradizo". La greka vorto "paradizo" ĉiam signifas idealajn kondiĉojn _sur la tero_. Ĝi rilatas al la restarigota Ĝardeno en Eden (Ap 2:7). Dum la Regno de Dio la mondo estos restarigita al la paradizaj kondiĉoj de la Ĝardeno en Eden (Jes 51:3; Jeĥ 36:35), ĉar la malbeno estos deprenita (Ap 22:3). La greka Malnova Testamento (Septuaginto) ankaŭ uzas la saman vorton "paradizo" rilate al idealaj kondiĉoj sur la tero (Pred 2:5; Neĥ 2:8; Alta Kanto 4:13; Gen 13:10). La vorto "paradizo" asociiĝas kun la ĉielo pro la uzado de ĝi en fantazia literaturo, ekzemple, "Perdita paradizo" de Milton. Jesuo promesis al la krimulo lokon en Paradizo, responde al lia deziro esti en la Regno de Kristo. Sed ni jam scias (Ĉapitro 5), ke la Regno estos surtere; sekve, "paradizo" estos ankaŭ sur la tero.

7. La verson 43 kutime oni tradukas, kvazaŭ Kristo kaj la krimulo estos kune en la paradizo kaj en la sama tago. Sed estas klare, ke la Regno ĝis nun estas ne establita sur la tero. Ili ne venis en "paradizon" en la sama tago. Jesuo estis metita en la tombon (Ag 2:32) kaj laŭ lia profetaĵo, li "estis tri tagojn kaj tri noktojn en la koro de la tero" (Mt 12:10, kmp. 16:21), post sia morto sur la kruco. Eĉ post la reviviĝo li diris: "Ne tuŝu min, ĉar mi _ankoraŭ_ ne supreniris al la Patro" (Joh 20:17). Sekve, Jesuo ne supreniris al la ĉielo _en la_ _sama_ tago, kiam li mortis.

Tamen Jesuo promesis al la krimulo: "Hodiaŭ vi estos kun mi en Paradizo". La respondon al tiu ĉi kontraŭdiro oni povas trovi en tiu fakto, ke la originala hebrea kaj greka teksto de la Biblio ne havas interpunkcion kaj majusklojn. Oni povas ŝanĝi la lokon de la komo kaj tralegi: "(Jesuo) diris al li: Vere mi diras al vi _hodiau_, ke vi _estos_ kun mi en paradizo" (Lk 23:43). En la teksto, tradukita de Rotherham, la komo staras post la vorto "hodiaŭ". Tio konformas al la kunteksto: la krimulo petis Jesuon ekmemori lin en tago de la juĝo; li agnoskis sian kulpon kaj kredis, ke li ĉeestos ĉe la juĝa seĝo. Kaj Jesuo donis al li tiun mirindan promeson: "Mi povas diri al vi _jam nun_ (hodiaŭ)! Ne atendu ĝis tiam por ekaŭdi mian verdikton, vi estos kun mi en la regno".

8. Konsiderante ĉion pli suprediritan, oni povas listigi doktrinojn, pri kiuj, verŝajne, la krimulo havis komprenon:

- La Regno de Dio
- La dua alveno de Kristo
- Releviĝo kaj juĝo
- Respondeco
- Savo per fido en Kristo
- La releviĝo de Kristo
- La perfekteco de Kristo ("tiu ĉi homo faris nenion malbonan")
- La neceso sekvi Kriston (li nomis lin "Sinjoro")
- La pekeco de homo ("Kaj ni ja juste estas kondamnitaj").

Tiele, estas neeble uzi tiun krimulon kiel bazo por aserti, ke iu povas ricevi savon, havante nur malgrandan intereson pri kristanismo. Ĉiu bezonas havi la bazan scion pri la doktrino, simile al tiu, kiun havis la krimulo. Sen tiu scio la krimulo ne povus atingi la gradon de fido, kiun li havis. Kristo ne promesis savon al la alia krimulo, kiu diris: "Se vi estas Kristo, savu vin mem kaj nin", ĉar li opiniis proksimume tiel: "Se estas ia profito de tiu Jesuo, kial mi ne povus ekhavi ĝin. Li opiniis tiel, ĉar li ne havis sufiĉan komprenon pri la doktrino, kaj pro tio li ne havis ankaŭ fidon, kiu povus doni al li savon en la fino de liaj tagoj.

**KOMENTO 33: Kiel Okazigi Bapton?**

Por doni ekzemplon, kiel devas esti okazigita rito de bapto, ni konsideru la priskribon de tia evento, okazinta inter kristadelfianoj en la angla urbo Hartlepool, sabate en novembro de la jaro 1990.

Ankoraŭfoje necesas rimarki, ke vera baptiĝo estas baptiĝo kun plena subakviĝo post sincera pento kaj post alveno al vera kredo en la Evangelio. La rito estas nur aldono por emfazi la gravecon de momento. La ordo de la rito estas jena:

- Preĝo
- Legado de Rom 6
- Mallonga prediko pri baptiĝo (sekvas pli sube; efektivaj nomoj estas ŝanĝitaj)
- Preĝo
- Subakvigo de la persono en naĝejo
- Preĝo

**Mallonga Prediko Antaû Baptiĝo**

Sendube, hodiaû estas la plej grava tago en la vivo de Dejv: post kelkaj minutoj li subakviĝos kaj leviĝos plene “en Kristo”, semo de Abraham, havante tiujn glorajn promesojn, kiuj estis donitaj al Abraham.

La simpleco de tiu ĉi ago povas esti trompiga, sed Dejv, kiel ankaû ĉiuj ĉeestantoj, tute kredas, ke tiu ĉi mergo en akvon kunigos lin kun la morto kaj releviĝo de Jesuo, pri kio ni legis en Rom 6:3-5:

> “Ĉu vi ne scias, ke ni ĉiuj, kiuj baptiĝis al Jesuo Kristo, baptiĝis al lia morto? Ni do estas entombigitaj kun li per bapto al morto, por ke, kiel Kristo estas levita el la mortintoj per la gloro de la Patro, tiel same ni ankaû iradu en noveco de vivo. Ĉar se ni jam kuniĝis al la simileco de lia morto, ni tiel same kuniĝos al la simileco de lia releviĝo”

Post kelkaj minutoj ni ekvidos Dejvon eliranta el la akvo, kie li kuniĝos kun la morto kaj releviĝo de Jesuo. Ni imagu por momento la bildon de la releviĝo de Jesuo: silento kaj freŝa nokta aero kaj... mirinda sento de nova vivo! Fore antaû si Jesuo, verŝajne, vidis la trembrilantajn lumetojn de Jerusalemo; imagis al si homojn, loĝantajn tie kaj tute ne sciantajn pri la signifoplena evento, kiu okazis tiel proksime de ili kaj kiu koncernas ĉiun el ili. Ili eĉ ne supozis, ke apude de ili okazis vera miraklo – releviĝo de homo el la mortintoj al nova vivo.

Kiam Dejv eliros el la akvo, ankaû la mondo ne scios pri la mirakla evento, okazinta al li ĉi tie kaj nun. Ĉion, kion ili povus vidi, se ili volus vidi, estas grupo da viroj kaj virinoj, iranta al naĝejo, kaj homo, kiu subakvigas alian. Sed kiel anĝeloj ĝojis ĉe la reviviĝo de Jesuo, tiel same, nevideblaj al ni, ili ĝojas nun pri ankoraû unu pentinta pekulo.

Ni tralegis en Rom 6, ke “ni ankaû *iradu* nun en noveco de vivo”. Laû tio ĵus legita, li ne plu estos sklavo de peko, sed de Dio, plenumante Lian volon, kiel instruas nin la Biblio. Certe, ni estas tentataj servi al ni mem, sed servante al ni mem, ni ne estas liberaj, ĉar ni estas sklavoj de peko. Ĵus Dejv faris sian elekton kaj servos al Dio. Iufoje ŝajnas, ke la limigoj, surmetitaj al ni el la nova vivo estas tro malfacilaj, kaj niajn fortojn ne sufiĉos por toleri ilin, kaj ni provas liberigi nin el ili. Sed ni devas memori, ke farante tiel, ni ne estos liberaj, denove ni servos al peko.

Paûlo en 1 Kor 10:1,2 komparas baptiĝon kun la trairo de la Izraelidoj tra la akvo de la Ruĝa maro. El tio ni povas preni lecionon por ni. La Izraelidoj estis sklavoj en Egiptujo, havante sencelan vivon, multe laborante kaj adorante la idolojn de Egiptujo. Ili petegis Dion, ke Li montru al ili vojon por savo, kvankam, verŝajne, ne komprenante, kiel Li povas respondi al ili. Responde

Dio sendis al ili Moseon, por ke li konduku ilin el Egiptujo tra la Ruĝa maro kaj tra la dezerto kaj alvenigu ilin al la promesita lando. Izrael en Egiptujo similis al Dejv kaj al ĉiuj tiuj, kiuj intencas baptiĝi: nun Dejv estas alkondukita al la bordo de la Ruĝa maro. Sed trairinte ĝin, li ne alvenos tuj en la promesitan landon de la Regno. Li aliĝos al ni por kune kun ni trairi la dezerton. Dio gvidis la Izraelidojn en la dezerto pere de anĝelo, kiu ĉiame estis kun ili kaj tage, kaj ankaŭ nokte. Simile al tio, ĉiuj ni havas anĝelon, kiu gvidas nin dum nia vivo al savo (Ps 34:7; Heb 1:14).

La Izraelidoj en la dezerto ĉiutage manĝis manaon, kiun Jesuo en Joh 6 nomis la vorto de Dio. Se ili ne manĝus ĝin, ili baldaŭ mortus en tiu dezerto, ĉar tie estis nenio por manĝi. Por ne perdi la vojon en la vivo, ni konsilas al vi legi tabelon de ĉiutaga legado - "Bibliokunulo". Estas tre grave en nia rutina vivo ĉiutage fari paŭzojn, prefere en la sama horo, por legi la ĉapitrojn de la Biblio, menciitajn en ĝi.

Al la Izraelidoj estis dirite, ke ili ne kolektu en unu tago manaon por kelkaj tagoj, sed ĉiutage. Nia nutrado per la Vorto devas esti ankaŭ ĉiutaga. Kiel ni ne forgesas pri nia natura manĝaĵo, same ni devas ne forgesi nutrigi nin per la Vorto de Dio, ĉar estas dirite: "Ne per la pano sole vivas homo, sed per ĉiu vorto, kiu eliras el la buŝo de Dio".

La Izraelidoj ankaŭ trinkis akvon, fluantan el trabatita roko; 1 Kor 10 diras, ke ĝi reprezentas Kriston. Do, ni ankaŭ devas manĝi kaj trinki laŭ la ekzemplo de Jesuo; tion ni povas okazigi dum niaj ĉiusemajnaj diservoj. Rilate al niaj kunvenoj necesas emfazi nian naturan deziron renkontiĝi por kune dividi nian Esperon. Vojiranto en natura dezerto estos ĝoja al ĉiu ebleco renkonti alian vojiranton por diskuti problemojn, kiuj povas aperi, kaj komuniki pri akirita sperto. Tiel ankaŭ ni en la dezerto de vivo en ĉi tiu pekema mondo devas aspiri havi renkontiĝojn unu kun alia. Ofte cirkonstancoj ne permesas al ni partopreni kunvenojn, sed ni devas serĉi vojon por subteni kunligojn per leteroj, per legado de revuoj kaj gazetoj kaj tiel plu.

Ni parolis pri la respondeco de nia nova vivo, sed estus erare opinii, ke se ni faros certajn farojn, ekzemple, la ĉiutagan legadon de la Biblio, Dio rekompencos nin. Plaĉas al la Patro doni al ni la Regnon kiel donacon, ne kiel salajron pro nia laboro (Rom 6:23). Estus erare opinii, ke baptiĝo estas bona ideo, dank' al kiu ni havas bonan ŝancon eniri la Regnon. La Vero, amo de Dio, kaj la venko de Kristo, donas al ni pli da certeco ol tio. Dio vere *volas*, ke Dejv kaj ĉiuj ĉeestantoj estu en la Regno. Tio estas tiel mirinda, ke ni devas denove kaj denove rememorigi al ni, ke tio estas ja vera, kaj respondi al la amo de Dio.

Kiam la Izraelidoj trairis la Ruĝan maron, Moseo ekkantis gloron al Dio kaj la tuta popolo ekĝojis. Psalmo 105:37-43 diras, ke Dio prizorgis ĉion necesan por ilia sukcesa trairado:

“Sed ilin Li elkondukis kun arĝento kaj oro, kaj en iliaj triboj estis neniu kadukulo. Ĝojis Egiptujo, ke ili eliris, ĉar atakis ilin timo antaŭ ili. Li etendis nubon, kiel kovron; Kaj fajron, por ke ĝi lumu en la nokto. Ili petis, kaj Li sendis koturnojn, kaj per pano ĉiela Li ilin satigis. Li malfermis rokon, kaj ekfluis akvo kaj ekiris kiel rivero en la dezerto. Ĉar Li memoris Sian sanktan vorton al Abraham, Sia sklavo. Kaj Li elkondukis Sian popolon en ĝojo, Siajn elektitojn kun kantado”.

La sama estas la ĝojo de ni, viaj estontaj gefratoj, kiuj ĉeestas ĉi tie kaj atestas pri via baptiĝo. Tio ĉi estas la ĝojo de Dio, de Jesuo kaj de la anĝeloj, kiuj nun atente observas nin. Ni gardu do nian Esperon kaj nian ĝojon “firme ĝis la fino” por ke ni kune eniru en la Regnon.

Nun ni povas trairi en la ĉambron por alivestigi nin, kaj poste ni iros en naĝbasenon...

## ĈAPITRO 10: Demandoj

1. Ĉu povas ni esti savitaj sen baptiĝo?

2. Kion signifas la vorto “baptiĝo”?
a) Sindono
b) Akvosprucigo
c) Kredo
d) Subakviĝo

3. Kion signifas baptiĝo, laŭ Rom 6:3-5?

4. Kiam necesas baptiĝi?
a) Post kompreno de la vera Evangelio kaj post pento
b) Kiel tre juna infano
c) Post kiam aperis intereso pri la Biblio
d) Kiam ni ekvolis aliĝi al eklezio

5. En kion ni estas baptitaj?
a) En eklezion, kiu baptas nin
b) En la vorton de Dio
c) En Kriston
d) En la Sanktan Spiriton

6. Kio okazas post baptiĝo?
a) Ni fariĝas parto de la idaro de Abraham

b) Ni ne plu pekos
c) Ni ricevas savon por ĉiam
d) Ni ricevas pardonon de niaj pekoj

7. Ĉu savos nin baptiĝo sola?

8. Ĉu ricevos ni la miraklajn donacojn de la Sankta Spirito post nia baptiĝo?

---

## ĈAPITRO 11

# VIVO EN KRISTO

### 11.1 ENKONDUKO

Baptiĝo donas al ni certan esperon pri eterna vivo en la Regno de Dio. Ju pli firma iĝas nia fido, des pli klare ni komprenas respondecon, kiu kuŝas sur ni. Baptiĝo ŝanĝas tutan nian vivmanieron, farante ĝin pli bona ĉe tiuj homoj, kiuj celas fariĝi partoprenantoj en la Dia naturo (2 Pet 1:4) kaj havas en si Lian Nomon (Ap 3:12).

El Ĉapitro 10.3 ni scias, ke post baptiĝo ni devas vivi ĉiame neniigante malbonajn dezirojn de nia naturo (Rom 6:6). Se ni ne volas peni tion fari, nia baptiĝo estos sensenca.

Dum baptiĝo ni mortas al nia antaŭa vivmaniero kaj metafore ni reviviĝas kun Kristo. "Se do vi estas levitaj kun Kristo, serĉu tion, kio estas supre, kie Kristo sidas dekstre de Dio. Atentu tion, kio estas supre, ne surteraĵojn. Ĉar vi mortis... Malvivigu... malĉastecon, malpurecon, volupton, malbonan deziron... avidecon" (Kol 3:1-5). Post baptiĝo ni devas rigardi ĉion per la Diaj okuloj, pensante pri ĉielaj (spiritaj) aĵoj, rifuzante korpajn dezirojn kaj aspirante al la spiritaj por eniri en la Regnon de Dio.

Homa naturo emas montri obeemon al Dio komence, kaj poste - de tempo al tempo. Sed Dio ofte avertas nin per siaj instruoj, "per kies plenumado homo vivas" (Jeĥ 20:13). Se ni agnoskas Liajn instruojn kaj komencas obei al ili per baptiĝo, ni devas obei al ili ĉiame.

### 11.2 SANKTECO

"Sankta, sankta, sankta estas la Eternulo Cebaot" (Jes 6:3). Trifoje dirita vorto en tiu ĉi verso emfazas agnoskon de la sankteco de Dio. "Sankteco" ĉefe signifas "aparta", *aparta* de malindaj agoj *por* spirita vivo. Al ni estas dirite: "Estu do imitantoj de Dio, kiel infanoj amataj" (Ef 5:1). Kaj "kiel via Vokinto estas sankta, tiel vi ankaŭ fariĝu sanktaj en ĉia konduto (t. e. fakta vojo de vivo); pro tio, ke estas skribite: Vi estu sanktaj, ĉar Mi estas sankta" (1 Pet 1:15,16, Lev 11:44).

Originaj Izraelidoj estis liberigitaj el Egiptujo per ilia baptiĝo en la Ruĝa maro por esti "popolo sankta" (El 19:6). Post nia baptiĝo, ni, membroj de

spirita Izrael, iĝas vokitaj "per sankta voko" (2 Tim 1:9) por esti "sklavoj al justeco", sklavoj de Dio (Rom 6:19,22).

Ĉar sankteco estas grava parto de la naturo de Dio, ĝin devas celi ĉiuj tiuj, kiuj strebas esti "imitantoj de Dio". Se ni faros tiel, ni estos "partoprenintoj en Lia sankteco", kiam al ni estos donacita Lia naturo (Heb 12:10; 2 Pet 1:4). Tial sen sankteco en sia vivo kredantoj ne "vidos la Sinjoron" (Heb 12:14), t. e. ili ne vidos Dion kaj ne povos persone interrilati kun Li en la Regno, se ili ne montros sian sanktecon en la nuna vivo.

Fariĝinte partoprenantoj en tiu granda espero ni devas apartigi nin de la mondo, kiu nin ĉirkaŭas kaj kiu ne havas tiun esperon por kuniĝi al la naturo de Dio, al eterneco. Nia "apartiĝo" devas ne esti deviga – nia espero mem, la alvoko kaj foriro en la altspiritan mondon devas naski en ni naturan senton de aparteco de tiu mondo, kie dominas karnaj tentoj.

Ni konsideru la faktojn, de kiuj ni devas apartigi nin, kaj poste en Ĉapitro 11.3 ni priskribos tion, al kio ni devas strebi.

### 11.2.1 Perforto

Ni vivas en la mondo, en kiu regas peko. El Ĉapitro 6.1 ni vidas, ke homaj registaroj povas esti nomitaj "la diablo", ĉar ili servas laŭ la deziroj de la karno, t. e. la biblia "diablo". La Biblio kelkfoje diras, ke peko kaj la semo de la serpento iutempe triumfas en la mondo, tamen fine, post portempaj diversaj suferoj la semo de la virino venkos ilin. Pro tio al la kredantoj estas rekomendite "Ne rezistu al malbono" (Mt 5:39; Rom 12:17; 1 Tes 5:15; 1 Pet 3:9).

Ni jam vidis, ke kelkfoje malbono aperis laŭ la volo de Dio (Jes 45:7; Am 3:6, kmp. Ĉap. 6.1). Sekve, aktive rezisti al malbono signifas batali kontraŭ Dio. Kaj tial Jesuo instruas nin ne rezisti al la fortoj de malbono: "Sed al tiu, kiu frapos vian dekstran vangon, turnu ankaŭ la alian. Kaj se iu deziras procesi kontraŭ vi, por forpreni vian tunikon, lasu lin preni ankaŭ vian mantelon" (Mt 5:39,40). Kristo estas la ekzemplo de tio: "Mian dorson mi elmetis al la batantoj" (Jes 50:6).

Kristo montras, ke juĝaj procesoj kontraŭstaras al konvinkoj de la kredantoj. Kontraŭstarante ni rezistas al malbono; sed neniu faros tion, se li havas firman kredon al la Diaj vortoj: "Ĉe Mi estas venĝo, Mi repagos, diras la Sinjoro" (Rom 12:19). "Ne diru: Mi repagos malbonon; Fidu la Eternulon, kaj Li vin helpos" (Sent 20:22, kmp. Read 32:35). Ĝuste pro tio Paŭlo riproĉis la korintanojn, ke ili altiras aliajn al juĝo (1 Kor 6:1-7).

Havante tiun grandan esperon, ni devas ne troe okupiĝi pri la maljustecoj de la nuna vivo: "Ĉu iu el vi, havante aferon kontraŭ sia proksimulo, kuraĝas procesi... Ĉu vi ne scias, ke la sanktuloj juĝos la mondon?" (1 Kor 6:1,2). La

vera kredanto devas ne procesi en juĝo pri divido de parcelo aŭ pri divorco, aŭ pri io alia.

Por subpremi fortojn de malbono kaj iuokaze subteni potencon de pekuloj, registaroj uzas armeon kaj policon. Tio estas konstitucia formo de la rezisto al malbono. Sekve, la veraj kredantoj devas ne partopreni ilin. "Ĉiuj, kiuj glavon prenas, per glavo pereos" (Mt 26:52). Tio estis ripeto de la frua Dia principo: "Se iu verŝos sangon de homo, lia sango ankaŭ estos verŝita de homo; ĉar laŭ la bildo de Dio estas farita la homo" (Gen 9:6). Ĉiu intenca perforto kontraŭ iu homo estas perforto kontraŭ Dio, se Li ne sankciis tion.

Ĉiu kristano devas memori la vortojn: "Amu viajn malamikojn, kaj preĝu por viaj persekutantoj... benu tiujn, kiuj vin malbenas; preĝu por tiuj, kiuj kun insulto vin atakas (Mt 5:44; Lk 6:27). Fortoj de armeo kaj polico agas ĝuste kontraŭe al tiuj ĉi principoj, kaj tial la veraj kredantoj evitas kunlabori kun ili. Servante en armeo aŭ en polico, homo povas rompi tiujn ĉi kristanajn leĝojn, ĉar li ĵuris defendi interesojn de registaro. Pro tio vera kredanto ne servas en armeo aŭ en polico, kvankam ĉe ekstrema okazo li estas preta helpi al proksimuloj per iu ajn alia maniero.

### 11.2.2 Politiko

Klara kompreno de la evangelio pri la veno de la Dia Regno kaj firma kredo al ĝi signifas nian agnoskon, ke homaj registaroj ne kapablas kunagi al perfekteco. Ĉiu partopreno politikan vivon estas nekunigebla kun la Espero pri la Regno. Kristo profetis, ke dum "lastaj tagoj", ĝuste antaŭ lia reveno, eventoj progresos de malbona al pli malbona (Lk 21:9-11; 25-27). Ne estas kunigeble – kredi al liaj vortoj kaj samtempe peni plibonigi situacion pere de homa politiko aŭ helpaj strukturoj. La parabolo pri la bona Samariano montras, kiel la kristano povas okazigi helpon en la ĉirkaŭanta mondo – farante bonon al ĉiuj homoj, kiom permesas ebleco (Gal 6:10).

La skriboj de la fruaj kredantoj montras ilian spiritan vivon, plenigitan de atendado de la Krista reveno, elmontrante sian rilaton al la ĉirkaŭanta ilin mondo per predikado pri la vera doktrino. Estas neniuj indikoj pri ilia rilato al sociaj, ekonomiaj aŭ politikaj problemoj de la mondo.

"La vojo de homo estas ne laŭ lia volo, ke homo iranta ne povas libere direkti siajn paŝojn" (Jer 10:23). Tia aprezo de malbono kaj eraroj de homa naturo signifas, ke la veraj kredantoj en sia vivo devas sekvi en ĉio al Dio, ne homan gvidantaron. Se la kredanto tion komprenas, li ne partoprenos voĉdonon. "Super la regno de homoj regas la Plejaltulo, kaj donas ĝin al tiu, al kiu Li volas" (Dan 4:32). Al homaj reĝoj donas la potencon ankaŭ Dio (Rom 13:1), kaj voĉdonante, la kredanto povas senintence doni sian voĉon kontraŭ

tiu, kiun *Dio* elektis esti gvidanto. En Jer 27:5,6 estas skribite, ke *Dio transdonis* kelkajn landojn al Nebukadnecar, reĝo de Babel.

Se ni agnoskas, ke Dio donas naciojn en la manojn de iliaj gvidantoj, ni devas esti diligentaj civitanoj, obeemaj al leĝoj de tiu lando, kie ni vivas, se tio ne kontraŭas al la leĝo de Kristo. "Ĉiu animo submetiĝu al la superaj aŭtoritatoj... kiuj estas starigitaj de Dio... Ĉar pro tio vi ankaŭ pagas tributon... Redonu ŝuldon al ĉiuj: tributon, al kiu tributo estas ŝuldata; imposton, al kiu imposto; timon, al kiu timo; honoron, al kiu honoro" (Rom 13:1-7).

Partopreno de kristanoj en politikaj protestoj aŭ imposta bojkoto, sekve, estas intenca neglekto al bazaj bibliaj principoj. Certe, estas okazoj, kiam leĝoj de lando kontraŭas al la leĝoj de Kristo. Tiuokaze al ni helpas la ekzemplo de Petro, kiu daŭrigis la predikadon pri Kristo eĉ tiam, kiam la registaro malpermesis al li fari tion: "Ĉu estas juste antaŭ Dio aŭskulti vin prefere ol Dion, vi juĝu" (Ag 4:17-20; 5:28,29).

La rilato de kristadelfianoj al deviga militservo dum lastaj jaroj ankaŭ estas ekzemplo de tio.

### 11.2.3 Mondaj plezuroj

Ne havante kredon al Dio kaj realan esperon pri la estonteco, la mondo inventis sennombrajn formojn de plezuroj. Tiuj do, kiuj celas vivi spiritan vivon devas apartiĝi de homoj, kiuj trovas kontentigon en karnaj plezuroj, "ĉar la karno deziregas kontraŭ la Spirito, kaj la Spirito kontraŭ la karno" (Gal 5:17). Pro tio kontraŭstaro tute ne eblas vivi samtempe laŭ la karno kaj laŭ la Spirito. La mondo vivas laŭ "la deziro de la karno kaj la deziro de la okuloj kaj la fiereco de vivo" (1 Joh 4:16). "Amikeco *al la mondo* estas malamikeco al Dio" (Jak 4:4). La deziregoj de la mondo forpasos kaj kune kun ili ankaŭ forpasos tiuj, kiuj estas kunligitaj kun ili (1 Joh 2:15-17). "La mondo (socio) de malpiuloj" estos detruita dum la dua alveno (2 Pet 2:5), ĉar "la tuta mondo kuŝas en la malbonulo" (1 Joh 5:19). Se ni volas eviti tiun detruon, ni devas "ne esti el la mondo" (Joh 17:16, kmp. Ap 18:4).

Multaj mondaj plezuroj de karno detruas sanon de homo: fumado, narkotaĵoj, supermezura drinkado estas ekzemploj de tio. Necesas memori, ke ĉio, kion ni havas kune kun nia sano, nia mono - ĉio apartenas al Dio. Sekve, ni ne povas uzi libere laŭ nia deziro tion, kio ne apartenas al ni, sed ni devas agi kiel administranto de tio, kion Dio donis al ni. Ni estos demandataj kaj devos doni respondon ĉe la tribunala seĝo pri tio, kiel ni uzis tiujn ĉi aĵojn (Lk 19:12-26). Tiuj alkutimiĝoj kiel fumado kaj drinkado montras nian neglekton al nia propra sano kaj financoj. "Ĉu vi ne scias, ke vi estas templo de Dio kaj ke en vi loĝas la Spirito de Dio? Se iu detruas la templon de Dio, tiun detruos Dio... Via korpo estas templo de la Sankta Spirito, kiu estas en vi... kaj vi ne apartenas al

vi mem, ĉar vi estas aĉetitaj per prezo; gloru do Dion en via korpo” (1 Kor 3:16,17; 6:19,20).

Tamen, se supremenciitaj kutimoj formiĝis antaŭ konvertiĝo kaj superi ilin momente ne estas eble, gravas kompreni iliajn malutilecon kaj kontraŭstari al ili kun preĝoj kaj la Dia Vorto.

## 11.3 ĈIUTAGA KRISTANA VIVO

### 11.3.1 Studado De La Biblio

Post nia baptiĝo ni devas peni kreskigi frukton de sankteco, havante vivon laŭ la spirito, sed ne laŭ la karno (Rom 6:22; 8:1; Gal 5:16,25). Spiritajn fruktojn ni povas doni, se interne de ni vivas la Dia vorto (Joh 15:7,8), kaj ni komprenas, ke ni estas gvidataj de la Spirito. Dum tuta nia vivo ni devas sekvi la Dian vorton, ĉiame studante kaj legante la Biblion.

Rezulte de atenta studado de la Biblio, homo venas al kompreno, ke necesas baptiĝi, sed ankaŭ post baptiĝo studado de la Biblio devas daŭri plu; baptiĝo estas nur la unua paŝo en la vojo de dumviva obeemo al la Vorto de Dio. Estas reala danĝero de familiara rilato al la Biblio kaj Evangelio, kiam la Vorto ne plu influas nin - ni legas la Biblion, sed ĝiaj vortoj jam ne kaptas nian atenton, kaj ne havas iun praktikan signifon por ni (vidu Suplemento 2). Kaj tial estus saĝe antaŭ ĉiu lego de la Biblio okazigi kurtan preĝon: “Malfermu miajn okulojn, ke mi vidu miraklojn de Via instruo” (Ps 119:18).

La Vorto de Dio devas esti nia ĉiutaga nutraĵo, eĉ pli dezirata, ol nia natura nutraĵo. Jer 15:16 diras: “Kiam mi trovis Viajn vortojn, mi ilin englutis; kaj Via vorto fariĝis mia ĝojo kaj gajeco de mia koro”. Necesas tiel fari nian tagordon, ke en ĝi estu tempo por ĉiutaga legado de la Biblio. Senrompa 30-minuta legado de la Biblio montras, ke ni elektis la veran vojon en nia spirita vivo. Tia kutimo estos kiel oro.

Por eviti naturan deziron legi nur interesajn partojn de la Skribo, Kristadelfianoj uzas specialan programon de legado, nomita “La Biblia Kunulo” (havebla de la adreso, indikita en “Enkonduko”). Ĝi enhavas numerojn de ĉapitroj, kiuj devas esti tralegitaj en certaj datoj. Laŭ tiu “Kunulo” dum jaro oni povas tralegi la Malnovan Testamenton, kaj dufoje – la Novan. Ĉiutage ni legas certajn ĉapitrojn kaj scias, ke miloj da kredantoj en la sama tago legas la samajn ĉapitrojn. Kaj kiam ni renkontiĝas, ĉiam ni havas komunan temon por konversacii - ĉapitrojn, kiujn ni studis lasttempe.

### 11.3.2 Preĝo

Preĝo havas gravan signifon en la vivo de la kredantoj. Paûlo, rememorigante al ni, ke "ekzistas unu Dio, kaj unu interulo inter Dio kaj homoj, homo Kristo Jesuo, kiu sin donis kiel elaĉetaĵon por ĉiuj", ankaû diris: "Mi deziras do, ke la viroj preĝu en ĉiu loko... sen kolero kaj disputado" (1Tim 2:5-8). "Ĉar ni havas ĉefpastron ne tian, kiu ne povus simpatii kun niaj malfortaĵoj, sed tentitan en ĉio tiel same, tamen sen peko. Ni do alvenu kun kuraĝo al la trono de graco, por ke ni ricevu kompaton kaj trovu gracon por ĝustatempa helpo" (Heb 4:15,16).

La kompreno, ke Kristo estas nia persona Ĉefpastro, kiu transdonas niajn preĝojn al Dio, inspiras nin preĝi ĉiutage kaj kun fido. Tamen, preĝo devas ne esti nur listo de niaj deziroj, prezentataj al Dio. Danko pro manĝaĵo antaû ĉiu manĝo, pro sendanĝera vojaĝo kaj tiel plu devas esti grava parto de niaj preĝoj. Enmetinte niajn problemojn antaû Dio, ni sentas grandan trankviliĝon: "Pri nenio trozorgu; sed pri ĉio, per preĝo kaj peto kun dankesprimo, viaj deziroj sciiĝu al Dio. Kaj la paco de Dio... gardos viajn korojn kaj pensojn en Kristo Jesuo" (Fil 4:6,7). "Kaj jen estas la kuraĝo, kiun ni havas antaû Li: ke se ni ion petas <u>*laû lia volo*</u>, Li nin aûskultas" (1 Joh 5:14). Lian volon ni povas scii, studante Lian Vorton, kiu malfermas al ni Lian Spiriton/menson. El tio sekvas, ke la Biblio instruas nin kiel preĝi kaj pro kio preĝi, ke niaj preĝoj estu efikaj. "Se vi restadas en mi... petu kion ajn vi volas, kaj tio estos farita por vi: (Joh 15:7).

La Skribo havas multe da ekzemploj de regulaj preĝoj (Ps 119:164; Dan 6:10). Matene kaj vespere, kun kelkaj kurtaj preĝoj de dankesprimo dum la tago estos spirite fortiga.

### 11.3.3 Predikado

Dum studado de la Biblio povas aperi unu el grandaj tentoj - spirita egoismo. Ni povas esti tiel kontentaj pri niaj propraj rilatoj kun Dio, tiel absorbitaj pri studado de la Biblio, ke povas tute forgesi pri neceso partopreni en nia scio kun aliaj homoj. La Vorto de Dio kaj la vera Evangelio, kiun enhavas ĝi, similas al lumo aû lampo lumanta en la mallumo (Ps 119:105; Sent 4:18). Jesuo diris, ke neniu havanta tiun lumon metas ĝin sub grenmezurilon, sed lumas per ĝi por aliaj (Mt 5:15). "Vi estas la lumo de la mondo", ĉar estas baptitaj al Kristo, "la lumo de la mondo" (Mt 5:14; Joh 8:12). "Urbo starigita sur monto ne povas esti kaŝita" (Mt 15:14) - daûrigas li.

Se ni fakte vivas laû la vera Evangelio, nia "sankteco" estas videbla al ĉiuj, kiuj ĉirkaûas nin. Ni ne povos kaŝi nian "algluiĝon" al la espero pri la Regno kaj apartiĝon de mondaj vivmanieroj.

Ni devas taktplene peni disvastigi nian scion pri la vero al aliaj homoj, direktante konversaciojn al spiritaj temoj, diskutante pri la doktrino kun

membroj de aliaj eklezioj, disdonante flugfoliojn kaj broŝurojn, aperigante informon en gazetoj kaj ĵurnaloj - ĉiujn tiujn rimedojn oni povas uzi por porti al homoj la lumon. Ni devas ne opinii, ke laboron por prediki la veron faros iu alia; ĉiu el ni havas respondecon pri tio. Kompare kun aliaj eklezioj Kristadelfianoj okazigas ne multe da multnombraj kunvenoj. Sed ĉiu el ni persone penas disvastigi la Evangelion laŭ niaj kapabloj.

Unu el la plej efektivaj vojoj de predikado estas klarigo pri nia kredo al niaj familianoj, amikoj kaj konatuloj. Necesas klare kaj simple klarigi al ili pri nia kredo, sed ne enuige denove kaj denove. Kaj estas grave ne tro fervori, ne devigi, ĉar Dio ne ŝatas, ke homoj sanĝu sian religion pro premo. Nia devo - klarigi pri la vero, ne atendante iajn sukcesojn. Kaj ni respondecas pri tiu ĉi klarigo (Jeĥ 3:17-21); se Kristo venos dum nia vivo, "Du viroj estos sur kampo; unu estos prenita, kaj la alia lasita" (Lk 17:36). Estus strange, se ni nenion dirus al niaj familianoj, kolegoj, amikoj pri la dua veno de nia Sinjoro.

### 11.3.4 Eklezia Vivo

Ĝis nun en tiu ĉi ĉapitro ni parolis pri nia persona spirita respondeco pri disvastigo de la Evangelio al aliaj homoj, sed ni devas ankaŭ havi naturan deziron renkontiĝi kun tiuj, kiuj dividas nian esperon. Ni jam scias, ke post baptiĝo ni komencas vojon tra dezerto al la Regno. Tiu vojo estos pli facila, se ni havos bonajn samvojulon, pretajn helpi al ni venki tentojn de ĉirkaŭanta nin mondo, kaj al kiuj ankaŭ ni povus helpi dum tiu ĉi vojo "ne forlasante nian kunvenadon... sed konsilante unu la alian, kaj des pli forte, ju pli vi vidas la tagon alproksimiĝanta" (Heb 10:25; kmp. Mal 3:16). Kredantoj devas aspiri al interrilatoj, kunvenante por kuna legado de la Biblio, dispecigo de pano, diservo kaj predika agado.

Ĉiu el ni estas "elvokita" de la mondo al la granda espero pri la Regno. La vorto "sankta" signifas ankaŭ "elvokita, pura", kaj ĝi rilatas al ĉiu vera kredanto, ne nur al kelkaj famaj kreduloj de la pasinteco. La greka vorto, tradukita kiel "eklezio", fakte signifas "kunsido de elvokitaj", t. e. kunveno de kredantoj. Eklezio estas aro de kredantoj.

Se en iu urbo aŭ vilaĝo estas kelkaj kredantoj, certe ili penas trovi lokon, taŭgan por siaj kunvenoj. Tio povas esti loĝejo de unu el kredantoj aŭ luita ejo. Kristadelfianaj eklezioj okazigas siajn kunvenojn en klubejoj, haloj de hoteloj, memkonstruitaj domoj aŭ privataj loĝejoj. Loko ne havas signifon, ĉar nia celo estas kunveno de kredantoj, ilia spirita kresko per komuna studo de la Biblio kaj porti la lumon en la mondon, predikante la Evangelion. Tipa programo de kristadelfianaj kunvenoj estus jena:

**Dimanĉo** 11.00 - Diservo kun dispecigo de pano.

18.00 - Publika atesto (disdono de flugfolioj, broŝuroj)

**Merkredo** 20.00 - Studado de la Biblio

Eklezio estas parto da la Dia familio. En ĉiu kunligita societo ĉiuj ĝiaj anoj devas esti obeemaj kaj atentemaj unu al alia. Kristo estis perfekta ekzemplo de tio, ĉar li, estante spirite nekompareble pli alta ol ĉiuj, agis kiel "servanto por ĉiuj", lavante la piedojn de siaj disĉiploj, kiuj tiutempe diskutis, kiu el ili estas pli grava. Jesuo alvokas nin sekvi lian ekzemplon (Joh 13:14,15; Mt 20:25-28).

Nune, kiam la miraklaj donacoj jam ne estas evidentaj, "unu estas via instruanto, kaj vi ĉiuj estas fratoj" (Mt 23:8). Kristadelfianoj tial interrilatas kiel "fratoj" kaj "fratinoj" kaj nomas unu alian laŭ unua nomo, sendepende de ilia stato en civitana vivo. Memkompreneble, ili rilatas kun respektplena estimo al tiuj kredantoj, kiuj sekvas la veran vojon jam dum multaj jaroj, kreskante spirite en la Vorto de Dio. Konsiloj de tiuj kredantoj estas tre valoraj por homoj, kiuj volas sekvi la Dian Vorton. Tamen, ĉiuj konsiloj devas esti bazitaj sur la Vorto de Dio.

Ĉiuj, publike parolantaj en la eklezio, reflektas Dion kaj parolas en Lia nomo. Nur fratoj rajtas publike instrui pri la Dia Vorto, kiel diras 1 Kor 14:34: "La virinoj silentadu en la eklezioj; ĉar ne estas permesate al ili paroli". 1Tim 2:11-15 klarigas tion de vidpunkto de tiuj eventoj, kiuj okazis en la ĝardeno de Eden, kie Eva instigis Adamon fari pekon, kaj tial nun virino devas ne instrui viron. Tiu fakto, ke Dio faris Adamon pli frue ol Evan, signifas, ke "la kapo de virino estas viro" (1 Kor 11:3), kaj viro devas spirite gvidi virinon, ne male. "Virino lernu en kvieteco kun ĉia submetiĝo. Sed mi ne permesas al virino instruadi, nek regi super viro, sed esti en kvieteco. Ĉar Adam kreiĝis la unua, poste Eva; kaj Adam ne trompiĝis; sed la virino, trompite, falis en pekon; sed ŝi saviĝos per la naskado, se ili daŭras en fido kaj amo kaj sanktiĝo kun sobreco" (1Tim 2:11-15).

Tio indikas, ke la Biblio diras pri malsamaj roloj de kredantaj viroj kaj kredantaj virinoj. Publikaj agoj en eklezio apartenas al viroj. Al virinoj estas indikite "edziniĝu, nasku infanojn, mastrumadu" (1 Tim 5:14). Tio difinas la sferon de ilia spirita vivo – la hejmo. Ĉi tio akre kontrastas al la homaj teorioj pri genra egaleco, kiam virino povas postuli egalajn rajtojn en ĉiuj faroj de socia vivo, disponi pri familia buĝeto kaj porti virajn vestaĵojn. Tamen similaj teorioj ne atentas en deca grado pri signifo de nasko kaj edukado de infanoj. Veraj kredantoj rifuzas tiujn teoriojn, kvankam, kiel en ĉio, necesas havi mezursenton.

La edzo devas ne potenci sian edzinon, li devas ami ŝin, kiel Kristo amis nin (Ef 5:25). "Edzoj, kunvivadu kun viaj edzinoj laŭscie (t. e. tenere, konforme

al via scio de la Dia Vorto), donante honoron al la virino kiel al la plimalforta ilo, kaj estante ankaŭ kun ili kunheredantoj de la graco de vivo" (1 Pet 3:7).

En spirita senco baptiĝo al Kristo egaligas viron kaj virinon (Gal 3:27,28; kmp. 1 Kor 11:11), sed tio ne influas la klaran principon, ke "la kapo de virino estas viro" (1 Kor 11:3) en praktika kaj spirita vivo, kiel en familio, tiel ankaŭ en eklezio.

Por montri sian akcepton de tiu principo, la kredantaj virinoj devas kovri sian kapon, kiam frato instruas pri la Vorto de Dio. Praktike tio signifas, ke ŝi devas havi surkape ĉapelon aŭ tukon dum ĉiuj ekleziaj kunvenoj. La diferencon inter roloj de viroj kaj virinoj emfazas ankaŭ longeco de haroj (1Kor 11:14,15). "Ĉiu virino, preĝanta aŭ profetanta kun kapo senvuala, malhonoras sian kapon (t. e. sian edzon – v. 3), ĉar tio estas tia sama, kvazaŭ ŝi estus razita. Ĉar se virino ne estas vualita, ŝi ankaŭ tondiĝu; sed se estas hontinde por virino esti kun haroj tonditaj aŭ razitaj, ŝi estu vualita... pro tio virino devas havi sur la kapo signon de aŭtoritato, pro la anĝeloj" (1 Kor 11:5,6,10).

"Senvualita" kapo de virino egalas al "razita" kapo, sed vualita kapo montras al konscia rilato al uzado de kapvesto. Virino devas ne opinii, ke ŝia hararo anstataŭigas vualon; antaŭ la okuloj de Dio, ŝi estas kvazaŭ "razita". Sed "viro devas ne havi la kapon vualitan" (1 Kor 11:7).

En la tempo de la Nova Testamento virino povis esti tondita kaj razita, se ŝi estis malĉastino, adultino aŭ se ŝi mem tondis sin pro profunda malĝojo pri forpasinta edzo, kiu estis la tipo de Kristo.

La virino reprezentas la eklezion, kiel viro reprezentas Kriston. Kiel ni konscie akceptas kredon pri nia savo pere de Kristo, tiel ankaŭ la virino devas akcepti konscian decidon pri vualigo de sia kapo. Opinii, ke por kovri sian kapon sufiĉas havi surkape nur harojn, egalas opinii, ke ni povas savi nin sen Jesuo Kristo, kaj tio kontraŭas al Kristo.

Longaj haroj de virino "estas por ŝi gloro, donita al ŝi de Dio anstataŭ vualo (la greka vorto egalas al "natura kovraĵo" 1 Kor 11:15); virino devas kreskigi ilin por emfazi sian diferencon de la viro, sian apartan rolon.

Tamen ni devas esti atentemaj por ke vualigo de kapo ne estu farata nur kiel simbola signo. Se fratino havas veran spiriton kaj sintenon (kmp. 1 Pet 3:5), ŝi obeos al fratoj, kiel la kredantoj obeas al Kristo, kaj kun ĝojo elmontros sian obeemon ĉiumaniere, inkluzive vualitan kapon. Se ŝi komprenos tiun ĉi ordonon, kaj ankaŭ ĉiujn aliajn ordonojn de Dio, ŝi penos plenumi ilin.

En la eklezio ĉiam estas laboro por fratinoj - ĉiudimanĉa lerneja instruado, okupo pri financaj aferoj kaj multaj aliaj devoj, kiuj ne enhavas publikan instruadon aŭ predikadon. Spirite maturaj virinoj povas esti kuraĝigataj por gvidi lecionojn al junaj fratinoj (Tit 2:34, kmp. kun Mirjam, gvidantino de la virinoj de Izrael en El 15:20).

### 11.3.5 Dispecigo De Pano

Kune kun ĉiama preĝado kaj legado de la Biblio necesas observi la ordonon de Kristo pri dispecigo de pano kaj trinko da vino memore al lia oferdono. "Ĉi tion faru por memorigo pri mi" (Lk 22:19). Estis la deziro de Jesuo, ke liaj adeptoj regule faru tion ĝis lia dua alveno, tiam li dividos la panon kaj vinon kun ili (1 Kor 11:26; Lk 22:16-18).

La pano reprezentas la korpon de Kristo, oferdonitan sur la kruco, kaj la vino - lian sangon (1 Kor 11:23-27). La fruaj kredantoj observis la ordonon pri dispecigo de pano (Ag 2:42,46), farante tion, verŝajne, unu fojon ĉiudimanĉe (Ag 20:7). Se ni amas Kriston, ni penos obei al lia ordono (Joh 15:11-14). Se ni havas la veran personan rilaton kun li, ni aspiros observi liajn ordonojn, memorante lian oferdonon pro nia savo. Pripensado pri liaj surkrucaj suferoj helpos al ni kompreni, ke niaj propraj malfeliĉoj estas bagatelaj kompare al tiuj, kiujn suferis Kristo.

La dispecigo de pano estas diservo de "memorigo", ĝi enhavas nenion misteran kaj egalas al la hebrea festo Pasko laŭ la leĝo de Moseo (1 Kor 5:7,8; Lk 22:15). Pasko estis rememorigo pri la granda savo el Egiptujo, kiun Dio okazigis pere de Moseo ĉe la Ruĝa maro.

Nun la dispecigo de pano estas rememorigo pri nia propra liberiĝo de peko, kio fariĝis ebla post nia baptiĝo en Jesuo Kristo. Observado de tiu ĉi ordono devas esti nia natura deziro.

Diservo pri dispecigo de pano rememorigas al ni pri la amo de Kristo al ni kaj pri nia savo pere de li. Ĉiusemajna dispecigo de pano montras sanan spiritan staton. Se iu ne povas partopreni kunvenon por dispecigi la panon kune kun siaj gefratoj en Kristo, li devas okazigi tion memstare. Estas neniu pardonebla kialo, kiu pravigus deflankiĝon de observado de tiu ĉi ordono. Ni devas doni ĉiujn niajn fortojn por ekhavi panon kaj vinon por okazigi la dispecigon de pano, kvankam en eksterordinaraj okazoj eĉ foresto de tiuj ĉi produktoj ne devas malhelpi al ni por okazigi la dispecigon je la memoro pri Kristo, farante tion kiel nur eblas en la kutima maniero. Jesuo trinkis "el la frukto de la vinberarbo" (Lk 22:18) kaj tial ankaŭ ni devas trinki ruĝan vinberan vinon.

Preni la simbolojn de la suferoj kaj oferdono de Kristo estas la plej granda honoro, kiun povas havi viro aŭ virino. Kaj preni ilin kun nesufiĉa atento al tio, kion ili reprezentas, estas preskaŭ blasfemo, "ĉar ĉiufoje, kiam vi manĝos ĉi tiun panon kaj trinkos la kalikon, vi proklamos la morton de la Sinjoro... ĉiu, kiu neinde manĝos la panon aŭ trinkos la kalikon de la Sinjoro, kulpiĝos pri la korpo kaj la sango de la Sinjoro" (1 Kor 11:26,27). Por la dispecigo necesas elserĉi tian lokon kaj tempon, kiuj ne provokus la mensan delogon de la Diservo; tio povas esti frumatene aŭ vespere. Ni scias la konsilon: "Oni sin provu, kaj tiele manĝu el la pano kaj trinku el la kaliko" (1 Kor 11:28). Tial ni

devas koncentrigi niajn pensojn pri la oferdono de Kristo, laŭeble trarigardante la skribojn de la Evangelio pri lia krucumo. Farante tion en deca maniero, ni ekzamenas nian konsciencon antaŭ Kristo.

Ordo de la diservo por la dispecigo de pano povus esti jena:

1. Preĝo - peto pri la Dia beno de nia kunveno, pri helpo kompreni Lian Vorton, pri helpo al suferantaj kredantoj. Dankon pro Lia amo al ni, elmontrita en Kristo.

2. Legado de la Biblio laŭ la "Biblia Kunulo"

3. Pripenso pri legitaj el la Biblio tekstoj aŭ prediko, kiu gvidas nin al la celo de nia diservo - la rememorigo pri Kristo.

4. Lego de versoj 1 Kor 11:23-29.

5. Kelkaj minutoj da silento - memekzameno.

6. Preĝdanko pri la pano.

7. Dispecigo de pano - ĉiuj manĝas po peceto da ĝi.

8. Preĝdanko pri la vino.

9. Eltrinko po malgranda gluto da vino.

10. Konkluda preĝo.

La tuta diservo devas daŭri iom pli ol unu horo.

## 11.4 GEEDZECO

El Ĉapitro 5.3 ni jam scias, ke edzi(ni)ĝi necesas nur kun baptita persono. En la Biblio estas kelkaj lokoj, kiuj donas ekzemplon de Jesuo kaj Paŭlo ne edzi(ni)ĝi kaj resti sola por plene dediĉi sian vivon al la ago de la Sinjoro (1 Kor 7:7-9; 32-38; kmp. 2 Tim 2:4; Mt 19:11,12,29; Pred 9:9), "sed se vi edziĝas, vi ne pekas " (1 Kor 7:28). Multaj apostoloj estis edziĝintaj (1 Kor 9:5), kaj laŭ la Dia intenco edzeco donas multe da fizika kaj spirita utilo. "Estu honorata la edzeco ĉe ĉiuj, kaj la lito estu senmakula" (Heb 13:4). "Ne estas bone, ke la homo estu sola" (Gen 2:18), krom se li plenumas altnivelajn devojn en spiritaj sferoj, kaj tial Dio establigis edzecon (Gen 2:18-24). "Kiu trovis

edzinon, tiu trovis bonon kaj ricevis favoron de la Eternulo” (Sent 18:22; 19:14). Komunan konkludon ni trovas en 1 Kor 7:1,2: “Estas bone por viro, ne tuŝi virinon. Sed pro malĉastaĵoj ĉiu viro havu propran edzinon, kaj ĉiu virino havu propran edzon” (kmp. v. 9).

La senco de tiuj ĉi versoj estas en tio, ke ĉiuj eksteredzecaj seksrilatoj estas rompo de geedzeca fideleco, adulto. Avertoj pri adulto kaj ĉiuj formoj de malmorala konduto ni povas trovi en la Nova Testamento, ekzemple, en Ag 15:20; Rom 1:29; 1 Kor 6:9-18; 10:8; 2 Kor 12:21; Gal 5:19; Ef 5:3; Kol 3:5; 1 Tes 4:3; Judas 7; 1 Pet 4:3; Ap 2:21. El tiuj ofte ripetataj avertoj ni povas konkludi, ke rompi tiel klare esprimitajn ideojn de Dio estas serioza kulpo. Dio povas pardoni pekon de momenta malforteco, pri kiu homo sincere pentas, ekzemple, la adulto de David kun Bat-Ŝeba, sed regulara adulto dum la tuta vivo devas esti kondamnita. Paûlo kelkfoje diris: “malĉasteco, malpureco, voluptemo... kaj aliaj similaj, pri kiuj mi avertas vin, kiel mi jam antaûe admonis vin, ke tiuj, kiuj tion faradas, ne heredos la regnon de Dio” (Gal 5:19,21), tial “Forkuru de malĉasteco (kmp. 2 Tim 2:22). Ĉiu peko, kiun homo faras, estas ekster la korpo; sed tiu, kiu malĉastas, pekas kontraû sia propra korpo” (1 Kor 6:18). Nuntempe preskaû en la tuta mondo estas akceptite, ke junaj paroj vivas kune antaû sia geedziĝo, ĝuante pri seksaj interrilatoj. Uzado por tiu socia fenomeno de la termino “Civitana geedzeco” por pravigi tion estas tute nekorekta. Geedzeco por la kredantoj devas konformi al la Dia difino. Ni do devas ne malpurigi geedzecan unuiĝon simile al tio, kiel faras homoj, kiuj falsas aû ignoras la ordonojn de Dio por kontentigi siakarnajn dezirojn. Ja geedzeco estas deklarita de Dio, ne de homo. Laû la Biblio geedzeco devas enhavi minimume tri kondiĉojn:

1. Geedziĝa ceremonio (ĝi povas esti eĉ tre simpla). La priskribo de edziĝo de Boaz kun Rut en Rut 3:9-4:13 montras, ke geeziĝo estas ne nur simpla aliĝo al interrilato, sed devas esti specifa momento, post kiu geedziĝo iĝas okazigita. Kristo estas komparata kun fianĉo, kaj la kredantoj - kun fianĉino, kun kiu li edziĝos ĉe sia dua alveno. Tiam okazos “la edziĝo de la Ŝafido” (Ap 19:7-9). La interrilatoj de edzo kaj edzino tipigas tiujn inter Kristo kaj la kredantoj (Ef 5:25-30); kiel interrilatoj de Kristo kun la kredantoj havos sian celebran feston, tiel same geedziĝo devas komenciĝi per nupto.

2. La geedzeca kunligo de Dio kun Izrael inkluzivis spiritan interkonsenton pri fideleco de unu al alia (Jeĥ 16:8), simile okazas kun la kredantoj ĉe geedziĝo.

3. Seksaj geedzaj interrilatoj estas necesaj por firma kaj feliĉa geedza vivo (Read 21:13; Gen 24:67; 29:21; 1 Reĝ 11:2). 1 Kor 6:15,16 klarigas, kial

eksteredzecaj seksaj interrilatoj estas malvirtaj. Ĉar Dio unuigis geedzan paron kaj faris ilin "unu karno" (Gen 2:24). Portempaj kaj okazaj seksaj interrilatoj rompas tiun unuigon.

El tio sekvas, ke paroj, kiuj "vivas kune" antaŭ geedziĝo, fakte vivas en peko. Se ili ne leĝigos sian kunvivon aŭ se ili ne disiĝos, ili ne povas esti baptataj.

En iuj landoj de la evoluanta mondo forestas nocioj pri nupto aŭ geedziĝa kontrakto por ordinaraj homoj. Paro povas kunvivi dum multaj jaroj sen geedziĝa ceremonio kaj opinii sin geedziĝitaj. La aŭtoro de tiuj ĉi linioj konsilas al tiu, kiu baptigos similajn personojn, klarigi al ili la aferon kaj konvinki ilin subskribi iun ajn geedziĝan interkonsenton. Tiu ĉi interkonsento devas esti registrita en konvena civitana oficejo kiel eble plej rapide.

Baptitaj homoj, havantaj nebaptitan edz(in)on, devas ne forlasi sian edz(in)on (1 Kor 7:13-15), sed devas ami ŝin (lin) kaj elmontri la veran kredon al Dio, kuraĝigante per sia korekta konduto sekvi lian (ŝian) ekzemplon (1 Pet 3:1-6).

La Dia leĝo pri geedzeco diras: "Viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno" (Gen 2:24). Tiu ĉi celado al maksimuma intimeco inter viro kaj virino reprezentas nian celadon al maksimuma intimeco kun Kristo. Sed por tio necesas superi pekon kaj nian propran egoismon. Ju pli ni sukcesos pri tio, des pli feliĉaj ni estos, des pli plena estos nia unuiĝo kun Kristo kaj ankaŭ kun edz(in)o.

Tamen ni vivas en reala mondo de peko, kaj pro tio atingi plej altan gradon de sankteco, pri kiu diras la Biblio en la ekzemplo pri Dio kaj Kristo, por ni estas neeble. La idealon, al kiu ni devas esti celataj, indikas Gen 2:24: unu viro kaj unu virino devas vivi kune dum la tuta sia vivo.

Kredantoj devas kompreni, ke ne ĉiam eblas atingi tiun staton en nia propra vivo aŭ en la vivo de aliaj kredantoj; geedzoj povas havi diversajn opiniojn, malpaci, perdi komunecon, kaj kuna vivo povas fariĝi tute neebla. Kaj povas esti viro jam havis kelkajn edzinojn antaŭ sia baptiĝo, se li vivas en socio permesanta poligamion. Tiuokaze li devas restadi kun ili, sed ne preni novajn. La apostolo Paŭlo, bone sciante la Diajn principojn kaj ankaŭ malfortan homan naturon, li allasis divorcon en esceptaj okazoj de nekunigebleco: "Edzino ne foriĝu de sia edzo (<u>*tamen, se*</u> ŝi foriĝas, ŝi restu senedza" (1 Kor 7:10-11).

Ĉi tiu konfirmo indikas al ideala varianto, sed la Skriboj ankaŭ diras pri cedoj rilate al principoj de geedzeco, se ili ne kontraŭas al la Diaj principoj (ekzemple, peko de adulto). La konsilo de Paŭlo en 1 Kor 7:10,11 similas al la konsilo en 1 Kor 7:27,28: "Ĉu vi estas ligita kun edzino? Ne serĉu malligon. Ĉu vi estas malligita je edzino? Ne serĉu edzinon. <u>*Sed se*</u> vi edziĝas, vi ne pekas". Tamen intenca divorco akre kontraŭas al la principo de Dio, ke viro kaj virino

devas esti “unu karno”. La vortoj de Kristo estas tute klaraj: “Sed de la komenco de la kreo : Li faris ilin vira kaj virina. Tial viro forlasos sian patron kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj ili estos unu karno. Sekve ili jam estas ne du, sed unu karno. Kion do Dio kunigis, tion homo ne disigu (per divorco)... Kiu forsendos sian edzinon kaj edziĝos kun alia, tiu adultas kontraŭ ŝi. Kaj se ŝi mem forsendos sian edzon kaj edziniĝos kun alia, ŝi adultas” (Mk 10:6-12).

En ĉiuj sferoj kaj precipe en seksaj interrilatoj la karno ĉiame strebas elserĉi pravigon por siaj naturaj deziroj. Homoj, kiujn trafis tentaj situacioj, povas serĉi forton kaj spiritan subtenon en la versoj, menciitaj en tiu ĉi parto. Iuj penas pravigi samseksemecon kiel naturaj seksaj deziroj. Sed antaŭ la okuloj de Dio tiuj ĉi agoj estas absolute malvirtaj fenomenoj. Kaj tion konfirmas Gen 2:24, kie estas dirite, ke Dio kunigas _viron kun virino_. Dio kreis helpanton al Adam Evan, sed ne kreis al li alian viron. Multfoje la Biblio malaprobas seksajn interrilatojn inter viroj. Tio estis unu el pekoj, pro kiuj estis detruita Sodom (Gen 18 kaj 19). Paŭlo klare diris, ke homoj, kiuj faras tion, incitas la koleron de Dio kaj ili ne estos allasitaj en Lian Regnon (Rom 1:18-32; 1 Kor 6:9,10).

Tamen esti kulpa pri tiu ĉi faro tute ne signifas, ke Dio ne helpos en tiu ĉi okazo. Pri tiuj homoj Dio atentas ankaŭ. Dio estas pardonema kaj povas pardoni tiujn, kiuj, pentinte, Lin petegas pri pardono (Ps 130:4). La eklezio en Korinto havis kelkajn pentintajn malĉastulojn: “Estis kelkaj el vi; sed vi laviĝis (per baptiĝo). Sed vi sanktiĝis, sed vi justiĝis en la nomo de la Sinjoro Jesuo Kristo kaj en la Spirito de nia Dio” (1 Kor 6:11).

La plendo pro la manko de natura inklino al persono de kontraŭa sekso fakte estas direktita kontraŭ Dio, tio signifas, ke Dio, malpermesinte samseksemecon, enmetis en nin ne supereblan deziron fari tion. Sed Dio “ne lasos vin esti tentataj super via forto” (1 Kor 10:13). Alkoholulo aŭ narkotulo ne povas vivi sen regula uzado de kemiaĵoj, sed kutime medicina helpo revenigas ilin al normala vivmaniero.

Samseksemuloj devas sekvi la saman vojon. Dio helpos al iliaj penoj. Sed se ili tute cedis al deziregoj de la karno, Dio faros al ili la samon, kion Li faris al la Izrael en la pasinteco: “Dio fordonis ilin al malhonoraj pasioj; ĉar iliaj virinoj ŝanĝis la naturan uzadon en kontraŭnaturan; kaj tiel same ankaŭ la viroj, forlasante la naturan uzadon de la virino, brulis en sia volupto unu al alia, kaj viroj kun viroj faris hontindaĵon kaj ricevis en si mem la taŭgan rekompencon de sia malvirto” (Rom 1:26,27).

Nur iu tute senigita je vidkapablo povas ne vidi en tio ĉi senduban profeton pri AIDS kaj aliaj malsanoj, transportataj per seksa vojo, kaj kiuj nun plenigas nian malĉastan mondon.

## 11.5 INTERKOMUNIKADO

La grekaj vortoj, tradukitaj kiel “komunikado, interkomunikado”, signifas ĉefe ion komunan, komunajn interrilatojn, komunan union. Sciante kaj sekvante la vojojn de Dio, ni interrilatas kun Li kaj kun ĉiuj aliaj, kiuj estas “en Kristo”. Paûlo rememorigas al ni: “Ne forgesu la bonfaradon kaj kunulecon (interkomunikadon)” (Heb 13:16). Fil 1:5 diras pri nia “partopreno en la evangelio”, sekve, la bazo de nia interrilato estas doktrino de la vera Evangelio. Tial valoro de spiritbazitaj interrilatoj superas ĉiujn aliajn homajn interilatojn. Kaj por tiu spirita interkomunikado kun aliaj kredantoj la veraj kredantoj faras longdistancajn vojojn, skribas leterojn, interŝanĝas telefonparolojn, vizitas izolitajn kredantojn.

Unuavice, certe, nia interkomunikado okazas dum kunvenoj por dispecigo de pano. La fruaj kredantoj “persistis en la instruo de la apostoloj kaj en la kunuleco, en la dispecigo de pano kaj en preĝoj... dispecigante panon... kun ĝojo kaj unueco de koro” (Ag 2:42, 46). Tiuj simboloj reprezentas nian esperon, kiu nin kunigas en “unueco de koro”. “Ĉu ne estas la kaliko de beno, kiun ni benas, partopreno en la sango de Kristo? Ĉu ne estas la pano, kiun ni dispecigas, partopreno (interrilato) en la korpo de Kristo? Pro tio, ke ni... estas unu pano, unu korpo” (1 Kor 10:16,17). Tial ni devas partopreni tiujn ĉi simbolojn de la oferdono de Kristo kune kun tiuj, kiuj “partoprenas en la korpo de Kristo”, nur kun tiuj, kiuj estas konvene baptitaj al Kristo, sciante la veron. Estus malsanktigo, se ni dividus tiujn ĉi simbolojn kun iuj aliaj.

Johano skribis, ke li dividis la evangelion pri la eterna vivo kun aliaj “por ke vi ankaû havu kunulecon kun ni; kaj nia kunuleco estas kun la Patro kaj kun Lia Filo Jesuo Kristo” (1 Joh 1:2,3). Tio montras, ke interkomunikado estas bazita sur komuna kompreno de la vera Evangelio, kaj sekve, montras nian personan interligon kun Dio kaj Jesuo. Ju pli ni aplikas la Evangelion en nia vivo, superante niajn pekajn dezirojn kaj ju pli ni progresas en kompreno de la Vorto de Dio, des pli estos intima nia interligo kun Dio kaj Kristo.

Tamen nia interkomunikado kun Dio kaj Kristo kaj aliaj kredantoj dependas ne nur de nia kompreno de la doktrinoj de la Vero, sed ankaû la tuta nia vivmaniero devas konformi al la principoj, esprimitaj en ili. “Dio estas lumo, kaj da mallumo estas en Li neniom. Se ni diras, ke ni havas kunulecon kun Li, kaj iradas en la mallumo, ni mensogas, kaj ne faras la veron, sed se ni iradas en la lumo, kiel Li estas en la lumo, ni havas kunulecon unu kun la alia, kaj la sango de Jesuo, Lia Filo, nin purigas de ĉia peko” (1 Joh 1:5-7).

“Iradas en mallumo” rilatas al vivmaniero, al kiu estas kontraûstarigita “iradas en la lumo”, t. e. vivo en Dio, laû Lia Vorto (Ps 119:105; Sent 4:18). “Mallumo” ne signifas niajn okazajn pekojn de malfirmeco, ĉar en la sekva

verso ni legas: "se ni diras, ke pekon ni ne havas, ni nin trompas kaj la vero (t. e. la Vorto de Dio – Joh 17:17; 3:21; Ef 5:13) ne estas en ni (1 Joh 1:8).

Tio evidentigas, ke interrilatoj rompiĝas, se kredantoj deflankiĝas de la sanktaj doktrinoj aŭ ilia vivmaniero kontraŭas al la klara instruo de la Biblio: "ne partoprenu kun la senfruktaj faroj de mallumo, sed prefere refutu ilin" (Ef 5:11). Ĉiuj fortoj devas esti uzataj por revenigi ilin al la vero, laŭ la ekzemplo de la paŝtisto, kiu serĉis perditan ŝafon (Lk 15:1-7). Se la frato aŭ fratino persistas en falsa instruo aŭ en sia malbona konduto, necesas ĉesigi interkomunikiĝon kun li (Mt 18:15-17). Praktike tio efektiviĝas post konversacio inter respondecaj anoj de eklezio kaj la deflankiĝinto. Sed necesas emfazi, ke tio okazas nur en okazo de nekaŝita akcepto de falsa doktrino aŭ persista peka vivmaniero. Homo devas esti certigita, ke pro lia deflankiĝo de la Biblia doktrino, restas nenio komuna inter ni kaj li kaj necesas rompi nian interkomunikiĝon.

Unu el la plej klaraj citaĵoj koncerne al interkomunikiĝo estas 2 Kor 6:14-18: "Ne estiĝu kunjuguloj maltaŭge kun nekredantoj; ĉar kian partoprenon havas justeco kun maljusteco? Aŭ kian komunaĵon havas lumo kun mallumo?.. Tial Eliru el inter ili, kaj estu apartaj, diras la Eternulo... Kaj Mi vin akceptos, Kaj Mi estos por vi Patro, Kaj vi estos Miaj filoj kaj filinoj, diras la Eternulo Plejpotenca".

Ni jam scias, ke la Vorto de Dio estas lumo. Ĉi tiuj versoj klarigas, kial ni devas eviti interkomunikiĝon kun eklezioj, kiuj instruas pri falsaj doktrinoj, kial ni devas eviti geedziĝon kun tiuj, kiuj ne scias la Veron kaj kial ni devas rifuzi vivmanieron, akceptitan en la mondo. Rezulte de nia apartiĝo de la mondo ni akiras mirindan honoron iĝi la veraj filoj kaj filinoj de Dio, iĝi ano de tutmonda familio de homoj, kiuj havas la saman parencecon – niaj gefratoj. Estas nur "unu karno", t. e. unu vera eklezio (Ef 1:23), bazita sur tiuj, kiuj havas la saman esperon – unu Dio, unu baptiĝo, kaj "unu fido", t. e. verajn doktrinojn, kiuj konsistigas unu fidon (Ef 4:4-6).

Tute ne eblas esti parto de "unu korpo" kaj santempe interkomunikiĝi kun aliaj religiaj organizoj, kiuj ne sekvas la veran kredon. Sciante, ke lumo havas nenion komunan kun mallumo, ni devas apartiĝi de mallumo kaj "iradi en lumo".

Se ni plene kaj sincere akceptas ĉiujn doktrinojn de la vero, rivelita en la Skribo, ni vidos, ke tiuj, kiuj nomas sin kristanoj, sed predikas falsan doktrinon, havas ne pli da interrilato kun Dio, ol ateistoj.

Se vi legis tiujn ĉi lecionojn atente, vi konvinkiĝis, ke ni ne povas resti duon-voje en nia interrilato (interkomunikiĝo) kun Dio. Aŭ ni devas esti en Kristo per baptiĝo en lia nomo, aŭ ni estos ekstere de li. Aŭ ni estas en la lumo, komprenante la veran doktrinon kaj praktike obeante al ĝi, aŭ ni estas en mallumo. Ne eblas aparteni samtempe al du antagonistaj unuiĝoj.

Nia scio pri tio devigas nin esti respondecaj antaû Dio. Ni jam ne povas vivi, kiel ni vivis antaûe, kiel daûras vivi ceteraj homoj de la mondo. Dio atentas pri ni. Dio, Jesuo Kristo kaj ĉiuj veraj kredantoj atendas de vi la veran decidon. Dio, Lia Filo kaj ni ĉiuj laû niaj fortoj estas pretaj helpi al vi – Dio eĉ fordonis Sian Filon por ni. Nun via savo dependas de via propravola decido akiri la grandan Esperon, donatan al vi nune.

## ĈAPITRO 11: Demandoj

1. Kiaj ŝanĝoj okazas en la vivo kiam oni baptiĝas?

2. Kion signifas "sankteco"?
a) Apartiĝo de ne kredantoj
b) Apartiĝo de peko kaj aliĝo al aferoj de Dio
c) Vizitadi preĝejon
d) Fari bonon al aliaj homoj

3. Kiaj metioj aû profesioj estas netaûgaj por vera kristano?

4. Kion signifas la vortoj "sanktulo" kaj "eklezio"?

5. Kiuj el la subaj eldiroj estas veraj rilate al dispecigo de pano?
a) Ni devas okazigi tion ĉiusemajne
b) Ni devas okazigi tion unufoje en jaro ĉe Pasko
c) La pano kaj vino iĝas laûlitere la karno kaj sango de Jesuo
d) La pano kaj vino reprezentas la karnon kaj sangon de Jesuo

6. Kiuj el la subaj asertoj rilate al geedziĝo estas veraj?
a) Ni devas edz(in)iĝi nur kun veraj kredantoj
b) Divorco estas permesita por kredantoj
c) Kredantaj homoj, havantaj nekredantajn edz(in)on devas resti en geedzeco
d) En geedzeco la viro reprezentas Kriston kaj la virino reprezentas la kredantojn

7. Ĉu virino rajtas instrui en eklezio?

8. Se vi eksciis la veron kaj baptiĝis, ĉu daûrigos vi interrilatojn kun eklezioj, kiuj ne sekvas la veran doktrinon?

## SUPLEMENTO 1: Resumo De Bazaj Bibliaj Doktrinoj

### 1. DIO

1.1 Estas persona estaĵo, nomita Dio,
1.2 Kiu estas kaj justa kaj indulgema,
1.3 Kaj havas realan personan ekziston,
1.4 Kies bildon ni portas.
1.5 La anĝeloj estas Liaj senditoj,
1.6 kiuj ne povas peki,
1.7 kiuj partoprenas Lian naturon.
1.8 La kristana Espero estas ricevo de la naturo de Dio en korpa formo ĉe la reveno de Kristo.

### 2. LA SPIRITO DE DIO

2.1 La Spirito de Dio estas Lia potenco, spiro kaj menso,
2.2 per kiu Li efektivigas ĉion
2.3 kaj estas ĉieĉeestanta.
2.4 La Sankta Spirito ankaŭ estas uzata por efektivigi specialajn celojn.
2.5 En diversaj tempoj en la pasinteco homoj posedis la miraklajn donacojn de la Spirito.
2.6 Nuntempe ili ne estas haveblaj,
2.7 la potenco de Dio nun estas elmontrata al ni per Lia Vorto.
2.8 La Sankta Spirito ne devigas homojn esti spirituloj kontraŭ ilia volo.
2.9 La Biblio estas tute inspirita de Dio per la Spirito.
2.10 La Biblio estas nia sola aŭtoritato en niaj rilatoj kun Dio.

### 3. LA PROMESOJ DE DIO

3.1 La Evangelio estis predikita per la promesoj, faritaj al la patroj de judoj.
3.2 La semo de la virino en Gen 3:15 reprezentas Kriston, kiu portempe estis frapita de peko, t. e. de la semo de la serpento.
3.3 Plenume de la Diaj promesoj, la planedo Tero neniam estos detruita.
3.4 La semo de Abraham kaj de David estis Kristo;
3.5 ni povas esti en Kristo per kredo kaj baptiĝo,
3.6 por ke ĉi tiuj promesoj povu rilati ankaŭ al la veraj kredantoj.

### 4. DIO KAJ MORTO

4.1 Laŭ sia naturo homo estas pekema kaj mortema,

4.2 malbenita pro la peko de Adam.
4.3 Kristo havis tiun homan naturon.
4.4 La “animo” rilatas al ni, al nia korpo, menso aŭ persono.
4.5 La spirito rilatas al nia viva forto/spirito kaj karaktero.
4.6 Morto estas stato de senkonscieco.
4.7 Ĉe la reveno de Kristo, korpe relevigitaj estos nur tiuj, kiuj sciis pri la vera Evangelio kaj respondecas pri sia respondo.
4.8 Ni estos juĝataj laŭ nia scio pri, kaj obeo al la vorto de Dio.
4.9 Senmorteco estos donita ĉe la tribunala seĝo.
4.10 La puno por la respondecaj pekuloj estos eterna morto.
4.11 “Infero” estas la tombo.
4.12 “Gehena” estis loko apud Jerusalem, kie oni bruligadis rubojn kaj krimulojn.

## 5. LA REGNO DE DIO

5.1 En la pasinteco la regno de Dio estis la popolo de Izrael.
5.2 Nune ĝi ne ekzistas, sed kiam revenos Kristo, ĝi estos restarigita
5.3 kiel la tutmonda Regno sur la tero, kiun regos Kristo je la nomo de Dio.
5.4 Dum la unuaj 1000 jaroj de la Regno ordinarajn mortemulojn regos Kristo kaj la veraj kredantoj.
5.5 Sekve, la Regno ne estas nun politike starigita.
5.6 Ni estas savitaj per graco pro nia fido, ne pro niaj agoj.

## 6. DIO KAJ MALBENO

6.1 La vorto “diablo” signifas falsan akuzanton aŭ kalumniulon.
6.2 “Satano” signifas “kontraŭulo”,
6.3 kiu povas rilati kaj al bonaj kaj al malbonaj homoj.
6.4 Simbole la diablo kaj satano povas signifi pekon kaj la karnon, aŭ la homan naturon.
6.5 La serpento en Eden estis laŭlitera besto;
6.6 la skribojn en Genezo pri la kreado kaj falo de la homo necesas kompreni laŭlitere, ne simbole.
6.7 “Demonoj”, kiel pekaj spiritoj, foririntaj animoj aŭ fortoj de peko, ne ekzistas.
6.8 “Elpelo de demonoj”, kiun Kristo okazigis, signifas la resanigon de mensmalsanuloj.
6.9 La nomo Lucifero ne signifas pekeman anĝelon.
6.10 Dio estas ĉiopova. Li ne dividas sian povon kun iu ajn pekema estaĵo, kiu kontraŭstaras al Liaj vojoj.

6.11 Ĉiuj feliĉoj kaj malfeliĉoj en la vivo de kredantoj devenas de Dio, ne de pekema estaĵo, nomata la diablo.

## 7. JESUO KRISTO

7.1 La vaste kredata en kristanismo doktrino pri la Triunuo ne trovas subtenon en la Biblio.
7.2 Kristo naskiĝis de la virgulino Maria,
7.3 kiu estis virino havanta normalan homan naturon.
7.4 Jesuo havis homan naturon,
7.5 sed perfektan, senpekan karakteron,
7.6 Jesuo mortis, kiel perfekta oferdono pro niaj pekoj, laŭ sia propra volo.
7.7 Jesuo estis relevigita post sia morto sur la kruco.
7.8 Jesuo ne fizike ekzistis antaŭ sia naskiĝo;
7.9 kvankam li estis en la menso/intenco de Dio de la komenco.
7.10 Jesuo mortis kiel oferdono pro niaj pekoj
7.11 por gajni savon kaj por si mem kaj por ni,
7.12 sed ne anstataŭ ni, kiel instruas kristanisma doktrino.
7.13 Jesuo mortis kiel nia reprezentanto.
7.14 La leĝo de Moseo ne validas ekde la morto de Kristo,
7.15 pro tio ni nun ne devas observi ĝin, inkluzive la sabaton.

## 8. BAPTIĜO

8.1 Sen baptiĝo ni ne havas esperon pri savo;
8.2 Per kredo kaj baptiĝo ni partoprenas la promesojn, donitajn al Abraham, kaj ricevas la pardonon de pekoj.
8.3 Baptiĝo estas tutplena subakviĝo
8.4 de plenkreskulo, kiu scias pri la Evangelio.
8.5 Homoj, subakvigitaj sen scio de la vera Evangelio, devas esti baptitaj denove, post plena scio.
8.6 Nur kompreno de la vera Evangelio faras baptiĝon valida.

## 9. LA VIVO EN KRISTO

9.1 Post baptiĝo kredanto devas apartiĝi de la vojoj de tiu ĉi peka mondo
9.2 kaj en ĉio sekvi la ekzemplon de Kristo.
9.3 Partopreno en agoj kaj plezuroj, kiuj kondukas al malobeo al la ordonoj de Dio, estas nekunigebla kun vera kristana vivo.
9.4 Baptitaj kredantoj devas uzi ĉiujn eblecojn por renkontiĝi unu kun aliaj.

9.5 Baptitaj kredantoj devas regule dispecigi panon kaj trinki vinon por rememoro pri la oferdono de Kristo.
9.6 Regulaj preĝado kaj legado de la Biblio estas necesaj por baptitaj kredantoj.
9.7 Baptita kredanto devas havi kunulecon nur kun tiuj, kiuj sekvas la veran doktrinon kaj penas praktike realigi ĝin.
9.8 Kaj pro tio la veraj kredantoj devas ĉesi havi kunulecon kun tiuj, kiuj ĉesis kredi kaj sekvi la veron en praktikaj agoj.

**Rimarko: Formalan "Statuto pri la vera kredo"-n, kiu validas jam dum 100 jaroj, oni povas ricevi ĉe la eldonistoj.**

## SUPLEMENTO 2: Nia Rilato Al Studo De Biblia Vero

Oni povas trastudi ĉiujn bazajn doktrinojn de la Biblio, sed ne apliki ilin al si mem. Tiu ĉi fakto povas esti ĉagreniga por tiuj homoj, kiuj uzas tiun ĉi lernolibron por instrui homojn, kiuj poste ne povas kompreni la formulitajn en ĝi principojn.

En la unua jarcento respondo al la predikado pri la Evangelio estis sincera kaj ĝoja. Homoj, "kiuj akceptis lian parolon, baptiĝis" (Ag 2:41). Sen sincera respondo al la mesaĝo, sen volonta akcepto de ĝi, baptiĝo perdas sian sencon. Tiuj, kiuj akceptas ĝin sub premo de siaj parencoj kaj amikoj, ĉu povas ili elteni la novan vivon? Ni celas konduki al savo novajn homojn, sed al baptiĝo homoj devas aliri kun vera kompreno de la Evangelio. Kaj ni devas senlace prediki ĝin.

En Berea "ili akceptis la vorton kun plena fervoro, kaj ĉiutage esploris la Skribojn" (Ag 17:11) por kontroli, ĉu Paŭlo diras la veron laŭ la Skriboj. Tiu ĉi libro estas nur provo ĝuste speguli Biblian instruon. Por ke estu vera respondo al la Evangelio, devas esti menso, sentema al la Vorto, vere deziranta esplori la Skribojn je persona nivelo. Tion la predikanto ne necese povas efektivigi; li povas nur allogi atenton al la rilataj tekstopartoj. La kredantoj en Romo "fariĝis <u>*kore obeemaj*</u> al tiu tipo de instruado", al kiu ili estis kondukataj antaŭ ol ili estis baptitaj (Rom 6:17).

Tiuj, kiuj obstine sekvas la vojon de sia karno, neniam povos en deca grado percepti la Evangelion; tiuj homoj "havante ŝajnon de pieco, sed neinte ĝian potencon... ĉiam lernantajn, kaj neniam kapablajn veni al la scio de la vero" (2 Tim 3:5-7). Ni neniam povos kompreni, kiel ni devas vivi, se ni ne havas veran amon al pieco, se ni ne havas veran deziron meti nian vivon sub la kontrolo de Dio; ni neniam povos atingi la scion de la vero, malgraŭ ĉiuj niaj

penoj por lernadi la Biblion, kaj ĉiuj niaj penoj lerni la Biblion estos nur akademia ekzerco.

Ofte homoj legas la Biblion sen efektiva kompreno. Tio estas larĝskala malsano. La judoj en la tempo de Kristo aspiris al scio de la Vorto de Dio; ili entuziasme fidis al la skriboj de la Malnova Testamento (Joh 5:45; Ag 6:11); kaj opiniis, ke sciante la Skribojn, ili ricevos eternan vivon (Joh 5:39), kaj tial ili ĉiusemajne publike legis la skribojn en sinagogoj (Ag 15:21), iuj el ili aldone al tio ĉiame profunde studis ĉapitrojn de la Skriboj, tamen ili ne havis plenan komprenon de tiuj lokoj en la Skriboj, kiuj diras pri Kristo. Jesuo malkaŝe diris al ili: "Vi esploras la Skribojn... Se vi kredus al Moseo, vi ankaŭ kredus al mi, ĉar li skribis pri mi. Sed se vi ne kredas liajn skribojn, kiel vi kredos miajn vortojn?" (Joh 5:39, 46, 47; Lk 16:29-31).

Ni povas imagi la indignon de la judoj, dirantaj: "Ni ja legas la Biblion! Ni kredas ĝin!", sed fakte, pro sia malvasta spirito, ili legis, tamen ne komprenis; ili rigardis, sed ne vidis. Ne estas pli blindaj homoj, ol tiuj, kiuj ne volas vidi. Dum nia vivo en ĉiuj niaj agoj ni devas atenti por ne similiĝi al tiuj judoj.

## SUPLEMENTO 3: La Baldaŭa Reveno De Kristo

En Mt 24:36 Kristo diras, ke neniu scias pri la tempo, kiam li revenos: "Sed pri tiu tago kaj horo scias neniu, eĉ ne anĝeloj de la ĉielo... sed la Patro sola". (kmp. Ag 1:7). Tamen, kiam la disĉiploj demandis Jesuon: "Kio estos la signo de via alesto?" (Mt 24:3), Jesuo ne diris, ke al tiu ĉi demando ne estas respondo. Li donis al ili signojn, kiuj estos videblaj ĝuste antaŭ lia reveno. Li ne farus tiel, krom se li volis, ke antaŭ lia reveno homoj povu kompreni, ke ili ja vivas en la "lastaj tagoj". Do, ni havas esperon kaj kredon, ke ĝuste ni estas tiuj, kiuj vivas en tiuj lastaj tagoj.

### La signoj De La Reveno De Kristo

En Mt 24 kaj Lk 21 Jesuo diras pri tempo, kiam

1) Aperos falsaj profetoj, deklarantaj sin Kristo
2) Militoj kaj perfortoj plenigos la teron
3) "Estos malsatoj kaj tertremoj en diversaj lokoj"
4) Homoj apostatos for de la Vero
5) "Homoj malfortiĝos de timo kaj de atendado de tio, kio venos sur la mondon, ĉar la potencoj de la ĉielo ŝanceliĝos" (Lk 21:26).

Necesas rimarki, ke tiuj ĉi problemoj plenigis la mondon en ĉiuj tempoj. Jesuo bone sciis tion kaj plejverŝajne, li diris pri tiu tempo, kiam tiuj ĉi problemoj pligrandiĝos tiom, ke aperos minaco de ruiniĝo de la tero. Sendube, ĉiu klare pensanta observanto povas diri, ke temas pri nia tempo. La optimismo de homa naturo kaj nedeziro reale vidi nian situacion malhelpas ĝuste taksi la staton de la mondo.

Pli sube sekvas kelkaj ekzemploj, kiuj atestas, ke la vortoj de Kristo efektiviĝas jam nun:

1) Preskaŭ sur ĉiuj kontinentoj estas multe da ĉarlatanoj kaj mensoguloj, kiuj gvidas homojn al falsaj doktrinoj.

2) La sekva statistika informo de la Instituto de Studo de Konfliktoj en la Universitato de Londono montras akran plinombriĝon de militoj, malgraŭ fokusitaj penoj de ĉiuj pacemaj fortoj haltigi tiujn ĉi militojn:

| **Jarcento** | **Viktimoj (mln)** | **Kvanto de ĉefaj militoj** |
|---|---|---|
| 17-a | 3.3 | ? |
| 18-a | 5.0 | ? |
| 19-a | 5.5 | ? |
| 1900-1945 | 40.5 | 19 |
| 1945-1975 | 50.7 | 119 |

3) Ĉiuj ni scias pri vastiĝintaj problemoj de malsato kaj malsanoj. Al la mondo minacas epidemio de A.I.D.S, kiu povas akre redukti la nombron de homoj sur la tero. Ankaŭ tertremoj. Krom Mt 24, kaj Lk 21 en la Biblio estas aliaj lokoj, kiuj montras al ligo de tertremoj kun la reveno de Kristo: Jes 2:19-22; Jer 38:20; Joel 3:16; Ĥagaj 2:7; Zeĥ 14:34). La lastjaraj tertremoj, okazintaj en tute neatenditaj lokoj kaj kaŭzintaj senprecedentan kvanton da viktimoj, ankaŭ povas esti antaŭsigno de baldaŭa alveno. La sekva statistika informo pri tertremoj, aperigitaj de la Departemento pri Internaj Aferoj de USA ankaŭ estas atentindaj:

| **Jaro** | **Kvanto da registritaj tertremoj** |
|---|---|
| 1948 | 620 |
| 1949 | 1152 |
| 1950 | 2023 |
| 1964 | 5154 |
| 1965 | 6686 |

4) Nuntempe pli kaj pli da homoj apostatas de Biblia vero. La filozofio pri la tutmonda unuiĝo de homoj per ajnaj manieroj, kiu ĉirkaûkaptas nun la tutan homan socion, plirapidigas tiun ĉi procezon.

5) La impetaj forkuroj for de realeco, kiuj nun estas rimarkeblaj en ĉiuj socioj, servas kiel konvinka pruvo pri homara timo antaû la estonteco. Sciencistoj, ekonomistoj kaj ekologistoj – ĉiuj konsentas, ke la mondo ne povas esti en sia nuna stato. Konsumo de naturaj provizoj, malpurigo de la aero kaj akvo, difektigo de la azona tavolo kaj aldone danĝero de epidemioj kaj nuklea detruado – ĉio tio avertas pri neevitebla pereo de la nuna mondo. Tamen Dio promesis, ke tio neniam okazos (vidu Komenton 9). Por plenumi tiujn promesojn, Dio baldaû sendos Kriston, kiu ŝanĝos nian planedon kaj restarigos sur ĝi la Regnon de Dio.

**Reviviĝo De Izrael**

Jesuo finis la liston da signoj, dirante per kuraĝigaj vortoj: "Kaj tiam oni vidos la Filon de homo, venantan en nubo kun potenco kaj granda gloro" (Lk 21:27). La sekva verso kuraĝigas tiujn, kiuj estas baptitaj kaj vivas kun pura konscienco antaû Dio: "Sed kiam tio komencos okazi, rigardu supren kaj levu viajn kapojn, ĉar via elaĉeto alproksimiĝas" (Lk 21:28).
Al tiuj profetaĵoj pri sia dua alveno Jesuo aldonis la parabolon pri la figarbo: "Rigardu la figarbon kaj ĉiujn arbojn; kiam ili ekkreskigas foliojn, vi ekvidas, kaj el vi mem scias, ke la somero jam estas proksima. Tiel same vi, kiam vi vidos, ke tio okazas, tiam sciu, ke la regno de Dio estas proksima (kaj sekve, la dua alveno de Kristo). Vere mi diras al vi: ĉi tiu generacio ne forpasos, ĝis ĉio plenumiĝos" (Lk 21:29-32). Kiam printempe ni vidas ekflorantajn arbojn, ni scias, ke baldaû venos somero. Simile al tio, kiam "figarbo" ekfloros, ĉe ni aperos certeco, ke nia generacio ekvidos la duan alvenon. La figarbo estas simbolo de la Izraela nacio (Joel 1:7; Hoŝ 9:10; Miĥa 7:1; Jer 42:2, kmp. Jeĥ 36:8). Kaj ekfloro de figarbo signifas restarigon de la Izraelo. La gravaj eventoj, okazintaj en Israelo post ĝia restarigo kiel nacio en la jaro 1948 estas signifoplena en tiu ĉi kunteksto.

**Estonta Invado En Israelon**

Multaj profetaĵoj de la Biblio priskribas grandan invadon de Israelo, kiu okazos antaû la reveno de Kristo. En Ps 83:4,12 estas skribite, ke nacioj, kiuj ĉirkaûas Israelon komencis unuiĝi, dirante: "Ni iru, kaj ni ekstremu ilin el inter

popoloj, ke oni ne plu rememoru la nomon de Izrael... Ni ekposedu la loĝejojn de Dio!”. Ni rimarku, ke la lasta invado okazos, kiam Izraelo fariĝos nacio. Sekve, la nuna reviviĝo de la nacio Izraelo estas necesa preludo de tiu lasta granda invado. Homoj, atente studantaj la Biblion, antaŭdiris reviviĝon de Izraelo kiel nacio, multaj jaroj antaŭ tiam, kiam ĝi komenciĝis (vidu John Tomas “Elpis Izrael”, aperigita en 1848; eblas peti ĝin ĉe la eldonistoj de tiu ĉi libro). La intencoj de la invadantoj, priskribitaj en Ps 83, ĝuste konvenas al la intencoj de la arabaj najbaroj de Israelo. Ili ĉiame deklaras pri sia senkompromisa malamo al Israelo, kaj postulas al si Jerusalemon, kiel ilian sanktan islaman urbon. La psalmo priskribas la finon de la invado kaj la restarigon de la Regno de Dio tutmonde (Ps 83:13-18).

Multaj aliaj profetaĵoj diras pri la sama sinsekvo de eventoj: la invado de la araboj kaj aliaj nordaj malamikoj en Israelon, enmiksiĝo de Dio, Kiu sendos Kriston establi la Regnon (Jeĥ ĉap. 38-40; Dan 11:40-45). Atenta studado de tiuj profetaĵoj post nia baptiĝo helpos al nia spirita kresko. La plej klara el ili estas en Zeĥ 14:2-4: “Mi kolektos ĉiujn naciojn milite kontraŭ Jerusalemon, kaj la urbo estos venkoprenita (kmp. Lk 21:24), la domoj estos detruitaj, la virinoj estos senhonorigitaj... Sed la Eternulo eliros kaj militos kontraŭ tiuj nacioj, kiel iam Li militis en tago de batalo (t. e. Li miraklmaniere intervenos en mondaferojn same, kiel Li faris pli frue). Liaj peidoj en tiu tempo stariĝos sur la Monto de Olivoj, kiu estas antaŭ Jerusalem oriente”.

Tiu ĉi granda invado povas okazi ĉiumomente. Konsiderante la nunajn rapidajn ŝanĝojn de politikaj kaj militaj eventoj, tute eblas, ke ĝuste en tiu momento, kiam leganto legas tiujn ĉi liniojn, arabaj raketoj flugas al Israelo. Memoru la vortojn de Paŭlo: “Dum oni diras: Paco kaj sendanĝereco, tiam subita detruo venas sur ilin” (1Tes 5:3). Ni ne povas scii la ĝustan daton de la reveno de Kristo, ni nur scias, ke ĝi okazos post invado en Israelon el nordo kaj ke ĝi povas okazi eĉ nun. Tamen tute eblas, ke okazos aliaj invadoj en Israelon antaŭ ol okazos tiu, pri kiu diras la profetaĵoj. Tiuj, kiuj studas la Biblion devas atenti pri eventoj en Israelo. Ni scias, ke fine Dio enpaŝos per la piedoj de Kristo sur la Monton de Olivoj. Ĝuste de sur tiu ĉi monto Jesuo supreniris al la ĉielo kaj tien ĉi li revenos: “ĉi tiu Jesuo, kiu estas prenita supren for de vi en la ĉielon, tiel same revenos, kiel vi vidis lin iranta en la ĉielon” (Ag 1:11), - diris la anĝeloj al la disĉiploj, starantaj sur la monto kaj rigardantaj al supreniranta Jesuo.

La profetaĵoj koncerne mondajn eventojn proksimajn al la reveno de Kristo estis donitaj por kuraĝigi tiujn, kiuj jam konfidis sin al Kristo per baptiĝo. Samtempe la evidenta konformeco inter ili kaj la nuna situacio en la mondo, sendube, devas esti granda stimulo por tiuj, kiuj nun pretigas sin al tiu ĉi paŝo. Sed nia obeemo al la vortoj de Dio ne devas esti bazita nur sur timo pro

la neevitebla reveno de Kristo. Nur tiuj, kiuj vere kaj sincere "amas lian aperon" (2 Tim 4:8), ricevos la rekompencon.

**SUPLEMENTO 4: La Justeco De Dio**

Ĉe studantoj de la Biblio ofte aperas samspecaj demandoj. Precipe tio rilatas al la justeco de Dio. Ekzemple:

> "Ĉu estas juste, ke ne ĉiuj homoj estas alvokitaj de Dio por scii la Evangelion?"
>
> "Kial Dio permesis al Adam kaj Eva peki kaj pro tio milionoj da iliaj posteuloj havas suferojn kaj malfeliĉojn?"
>
> "Kial Dio elektis Izraelon esti Lia popolo, kial Li ne donis tiun ŝancon al ĉiuj?"

Similaj demandoj aperas ĉe ĉiu el ni sendepende de la grado de nia scio pri la Biblio. Kaj kvankam tiuj demandoj estas tre komplikaj por kompreni, ni ne devas deflankiĝi de la alvoko de Dio. Ni ne scias la ĝustajn respondojn al tiuj ĉi demandoj same, kiel ni ne scias la ĝustan daton de la reveno de Kristo. Antaŭ du mil jaroj homo ekkriis: "Mi kredas; helpu mian nekredemon" (Mk 9:24). Ĉiuj ni havas la similan disduiĝon de pensoj. Ni estas kredantoj, sed aliflanke ni havas "nekredemon" kaj ege bezonas helpon de Dio. Antaŭ baptiĝo homon plenigas similaj emocioj, kiuj iugrade restas kun li dum tuta lia vivo.

Nia "nekredemo" elmontriĝas forme de demandoj al Dio, indikitaj pli supre. Tamen sensence estas kulpigi Dion pri maljusteco kaj krueleco. Farante tion, ni juĝas la Ĉiopovan Dion laŭ *nia* kompreno. Ni diras, se ni estus Dio, ni agus alimaniere. Kaj tio estas unu el plej grandaj difektoj de homoj – malkapableco kompreni la gradon de homa pekemeco kaj la absolutan justecon de Dio. Se Dio ne estus absolute senpeka, ne estus iu ajn kriterio en la tuta ekzistanta mondo. Ne estus kriterio de bono kaj malbono. La ideo mem pri religio (kun-ligo) kun Dio fariĝus sensenca. Kiel infanoj kontraŭdiras al plenaĝuloj nur laŭ sia nematura menso kaj sia mondpercepto, tiel same agas ankaŭ ni, infanoj de Dio, kontraŭdirante al sia Patro. Sed ni antaŭ Li estas nur polvo. Jeremia diris, penante pli profunde kompreni la vojojn de Dio, kiun li opiniis absolute prava: "*Vi* estos prava, ho Eternulo, kiam mi procesos kun Vi; tamen mi parolos kun Vi pri justeco (Jer 12:1, kmp. Ps 89:19, 34,39,52).

Supozi, ke Dio povas esti ne prava, signifas, ke ni havas iujn rajtojn, kiujn Li rompas. Sed tiu fakto, ke Dio estas nia Kreinto kaj nia ĉiama subtenanto, signifas, ke ni havas neniun rajton. Eĉ se ni ne pekas, ni vivas nur dank' al Lia

favoro. "Homaj rajtoj" estas homa koncepto, farita de homoj por pravigi sin mem. Ni venas en tiun ĉi mondon, havante nenion, kaj ni forpasos ankaŭ kun nenio. Ĉio, kion ni havas, estas nur donaco, donita al ni por mallongdaŭra tempo, por scii, kiel ni uzos tiun ĉi donacon. Se Dio alvokas nin al pli intimaj rilatoj kun Li, kun ĝojo ni devas obei al tiu ĉi voko. Rifuzi tiun ĉi vokon nur pro tio, ke aliaj homoj ne estas alvokitaj, kaŭzus doloron al Dio.

Laŭ naturo ni ĉiuj estas bestoj (Pred 3:18-20). Ni povus diri: "Kial por interrilatoj kun Dio estas elektita homo, sed ne iu ajn alia besto?", sed ni ne povus kompreni la kialojn, eĉ se oni malkaŝus ilin al ni. Tio sama rilatas al la priskribo de la kreado en Genezo. Kiel Dio estigis la materion kaj transformis ĝin je la mirinda miraklo de nia universo ankaŭ estas ekster nia kompreno. Pro tio Dio priskribas Sian kreadon per lingvo, kiun povus kompreni ĉiuj, eĉ infanoj. La saman oni povas diri pri la moralaj dilemoj, kiujn ni citis en la komenco de tiu ĉi Suplemento. Tiu ĉi libro estas provo klarigi la doktrinon de la Biblio rilate al la menciitaj demandoj. Nia naturo, nia menso ne povas tute obei al la vorto de Dio, tial ni kun malfacilo akceptas tion, kio estas skribite en la Biblio. Sed ni devas kompreni, ke tio estas <u>nia</u> problemo, ne Dia. Ni devas kompreni, ke niaj menskapabloj estas ne idealaj kaj ni emas erari, kaj ke ili estas tute ne kompareblaj kun la menskapablo de Dio. Nia menskapablo estas ne nur iugrade pli sube, ĝi estas tute alispeca. Ĝuste pro tio ni devas simile al Kristo akordigi nian pensadon kun la Vorto de Dio, kaj kompreninte la pensmanieron de Kristo, fari ĝin nia propra.

Ni ĉiuj rekonas, ke en la Dia kreaĵo multaj elementoj estas tre bonaj, ke en la kreaĵo de nia Kreinto evidentiĝas ia koncepto de justeco. La problemo estas, ke laŭ nia homa sperto estas aliaĵoj, kiuj estas malbonaj kaj negativaj. Bedaŭrinde, tio povas kaŭzi dubon rilate al la justeco de Dio kaj eĉ pri Lia ekzisto. Ĉu ne estas pli bone rekoni, ke Dio estas ĉiam prava kaj justa, kiel Li deklaras en Sia Vorto, kaj ke ni havas problemojn <u>*kompreni*</u> la rolon de bono kaj malbono en tio de Li kreita?

"La kaŝitaĵo apartenas al la Eternulo, nia Dio; kaj la nekaŝitaĵo al ni kaj al niaj gefiloj" (Read 29:29). La Evangelio estas la elmontrita "scio pri Dio" (Rom 1:19), sed tiuj vortoj indikas, ke estas multe da tio, kion ni ne povas scii, ne kapablas kompreni. En la Vorto de Dio ni vidas multe da certaj principoj de Dio kaj Lian multfacetan karakteron, sed estas aliaj sennombraj "kaŝitaĵoj" pri la vojoj de Dio, al kiuj ni ne havas aliron. Tiele, Paŭlo povis diri, ke iusence li konis Kriston kaj Dion, kiel povas scii ankaŭ ni (2 Tim 1:12; 2 Kor 5:16; Gal 4:9; Heb 10:30; 1 Joh 2:13), precipe per persona sperto de la Dia amo kaj responda sento al ĝi (1 Joh 4:7,8); sed aliflanke li sciis nur "laŭparte" (1 Kor 13:9,12), sopirante pri la reveno de Kristo "por ke ni sciu lin kaj la potencon de lia releviĝo" (Fil 3:10).

Pri la justeco de Dio ni ekkonas, studante Lian vorton, kaj ni senpacience atendas la alvenon de Lia Regno, kiam finfine foriĝos ĉiuj duboj kaj klare estos elmontritaj Liaj karakterizoj laŭ maniero, kiun Lia popolo ĝoje komprenos kaj amos. Kaj tiam resaniĝos ĉiuj niaj nunaj vundoj - intelektaj, moralaj kaj korpaj: "nun ni vidas per spegulo, malhele; sed tiam okulon ĉe okulo; nun mi konas laŭparte; sed tiam mi konos tiel same, kiel ankaŭ mi estas konita" (1 Kor 13:12,13).

---

**www.carelinks.net** **info@carelinks.net**